REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 1 (25)

★

Januaro
1934

Novan adreson

havas de nun La Praktiko. Ĉi tiu bildo montras la domon en Hago, kie de nun la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto funkcias, kaj kie la redaktado kaj administrado de La Praktiko okazas. En la antaŭa numero de La Praktiko ni jam raportis pri la oficiala inaŭguro de la nova ejo. Granda honoro estis por ni, ke la nederlanda ministro de instruado, artoj kaj sciencoj sendis sian reprezentanton, kaj ke multaj aliaj eminentuloj kaj gravuloj partoprenis ĉe la soleno. Ĉi tie ni publike dankas al ili kaj ni esperas, ke ilia simpatio kaj bondeziroj estos efikaj kaj ke niaj laboroj en la nova ejo prosperos.

Riouwstraat 172.

Ni aparte dankas al tiuj ŝatataj gesamideanoj, kiuj okaze de la inaŭguro afable sendis al ni salutajn leterojn, telegramojn kaj florojn. Estis agrable vidi la pruvojn de amikeco kaj solidareco. Ili estas grava kuraĝigo kaj fortigo en nia laborado por Esperanto.

La Praktiko dum du jaroj estis gasto en la hejmo de gesinjoroj Isbrücker, kiuj malavare oferis lokon kaj helpon. Sed la domo en la Oostduinlaan fariĝis ĉiam pli malgranda por la kreskantaj laboroj de la Instituto. Fine ni devis serĉi pli grandan hejmon.

La ŝanĝon ni faris kun iom peza koro, ĉar ĝi signifas por nia Instituto gravan ŝarĝon en la nunaj malfacilaj tempoj. Sed kuraĝigis nin nia esperantista optimismo kaj la firma fido, ke la Esperanto-movado povas nur progresi. La homaro trapasas senekzemplan krizon. Sed ĝuste pro tiu krizo nia movado fariĝas ĉiam pli kaj pli grava kaj necesa, ĉar ĝi prezentas elprovitan vojon al pli hela estonteco.

Estas vera miraklo, ke dum la krizaj tempoj, kiam grandaj entreprenoj unu post la alia pereas, nia malforta entrepreno tenas sin kaj eĉ plivastigas sian agadon, malgraŭ la teruraj malfacilaĵoj, kiuj malhelpadas la internacian laboron. Kaj estas pli granda miraklo, ke ĉiam kreskanta aro de diligentaj instruistoj migras tra la landoj por disvastiĝi Esperanton. Por tiu granda propaganda agado oni laboras en la Riouwstraat 172.

La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Aperas monate. **Abonprezo por unu jaro: 2.50 nederl. guldenoj,** por duonjaro la duono. — Unu numero kostas -.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., ½ p. 45.-, ¼ p. 25.-, ⅛ p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

La nova adreso

de la Internacia Cseh-Instituto (redaktejo kaj eldonejo de La Praktiko) estas:

Riouwstraat 172,

DEN HAAG (Nederlando).

De nun oni bonvolu sendi ĉiun poŝtaĵon al la supra adreso. — Ankaŭ tiuj poŝtaĵoj, kiujn oni adresis al la malnova adreso (Oostduinlaan 32), bone atingas nin.

LA REZULTO DE NIAJ KONKURSOJ

71-a konkurso. En la Julia numero de La Praktiko ni publikigis ĉi tiun bildeton kun la klarigo, ke la sinjoro haltis sur la strato antaŭ interesa afiŝo kaj legas ĝin kun atento. Nia konkursa demando estis: **„Kion anoncas la Esperanto-lingva afiŝo?"** La demando forte eklaborigis la fantazion de niaj legantoj, ĉar ne malpli ol 95 personoj ensendis solvon. Kvankam ni esprimis, ke la solvoj devas ampleksi maksimume 10 vortojn, tamen ni ricevis plurajn solvojn kun pli multe da vortoj, kaj unu solvon eĉ kun 44 vortoj (de s-ro L. K. en B.)! Kompreneble, tiuj solvoj ne povas partopreni en la konkurso. — La konkursa komitato trovis inter la solvoj tri bele ellaboritajn pentritajn afiŝojn kaj decidis doni la unuajn tri premiojn al iliaj aŭtoroj: **1. S-ro A. Bloemendal** en Deventer, Nederl. (La teksto de la afiŝo: *Eĉ guto malgranda konstante frapante traboros malfidon, kontraŭstaron*). — **2. S-ro J. P. v. Dijk** en Rotterdam (Teksto: *Esperanto la nura mondpacigilo. Lernu ĝin per Cseh-metodo!*) — **3. S-ro E. W. v. d. Burgh** en Leiden, Nederl. (Teksto: *Atentu! La mondfama gazeto LA PRAKTIKO en 1934 aperos duonmonate!*). — Desegnitan solvon kun originala ideo ensendis ankaŭ **s-ro A. Lienhardt** en Montigny-lès-Metz (Francujo). Ĉi tie ni publikigas ĝin. S-ro Lienhardt aldonas, ke tiun afiŝon en malgranda formato iu U.E.P.K. (= Universala Esp-a Propaganda Komitato) baldaŭ dissendos kaj ke ĉiu samideano devos fiksi ĝin ĉe la pantoflejo kaj ĉiu samideanino devos glui ĝin sur la angulon de sia mur-spegulo, por ke ĝi estu konstante antaŭ la okuloj. Gratulante al s-ro Lienhardt pro tiu interesa ideo ni sciigas lin, ke la juĝa komitato al li donis **la 4-an premion,** kaj ni esperas, ke li sukcesplene qvidados la utilan agadon de U.E.P.K.



Restas ankoraŭ 90 solvoj kaj du liberaj premioj. Sed estas treege malfacila tasko fari juĝon. Aliflanke ni opinias, ke ankaŭ nia legantaro estas scivola pri tio, kiel funkcias la fantazio de niaj konkursantoj. Tial ni decidis apliki refoje la demokratan sistemon: ni publikigas la solvojn kaj **ni invitas niajn legantojn, ke ili mem faru la juĝon. Bonvolu ensendi al ni sur aparta paperfolieto aŭ sur poŝtkarto la numerojn de la premiindaj du solvoj.** Ĉar estas tro multaj solvoj kaj la spaco en nia gazeto estas limigita, ni publikigas nur tiujn solvojn, kiuj laŭ la opinio de nia konkursa komitato havas ŝancon ricevi premion. Ni ricevis tre interesan kaj pravan solvon de s-ro B. en A. (Francujo), sed pro ĝia enhavo bedaŭrinde ni ne povas ĝin publikigi. — La voĉdonojn oni povas ensendi en letero aŭ sur poŝtkarto. Por ŝpari afrankon estas konsilinde sendi la voĉdonilon kune kun la solvoj de aliaj konkursoj. Ni fermos la voĉdonadon en la fino de Marto.

1. Esperantujo. La verda stelo valoras kiel pasporto por eniro.
2. Ĉu vi deziras havi mondmalfermantan ŝlosilon? Lernu Esperanton!
3. Gravaj estas belaj teorioj, sed ilin ĉiujn superas: LA PRAKTIKO.
4. La Ligo de Nacioj en Ĝenevo de nun intertraktos en Esperanto.
5. Aĉetu La Praktikon! Unufoje legita — ĉiam aĉetota!
6. En via libertempo al la Esperanto-Domo! Malalttarifa! Pura! Rava!
7. Ni diras: „IA". Nur homaj azenoj ne parolas Esperante. Azenligo.
8. Ĉiu vere civilizita homo estas Esperantisto. Ĉu vi ankaŭ?
9. Dum la senlaboreco lernu Esperanton!
10. Hura! Hodiaŭ komenciĝas la instruado de Esperanto en ĉiuj lernejoj!
11. Malkaraj kostumoj kaj ĉapeloj, ĉiuj kun verda stelo. Petro Tajloro.
12. Esperanto venkos! Ĝi pacigos la mondon kaj fratigos la homaron!
13. Ĉiuj registaroj de la mondo decidis enkonduki Esperanton!
14. Plej nova sciigo! De nun Esperanto deviga objekto en lernejoj!
15. Kino „LA ESTONTO". Atentu! Niaj sonfilmoj parolas nur Esperante!
16. Estonte La Praktiko aperos ĉiusemajne!
17. Ĉie Ĉe-kursojn ni organizu, por ke ĉiuj popoloj interfratiĝu!
18. Aliĝu frutempe al senpaga mond-flugvojaĝo!
19. Verdan stelon sur la ĉapo! Esperanton en la kapo!
20. Malsaĝuloj ne lernas Esperanton!
21. Bonvolu atenti! Anstataŭ batali, Estas pli elegante: Babili Esperante!
22. Kiu solvos la kaoson de la mondo? — Nur Esperanto!
23. Esperanto pacigas la homojn kaj utilas al ĉiu.
24. Se ĉiu homo konus Esperanton, vi ne bezonus plu tradukistojn.
25. La Praktikon abonu kaj abonigu, por ke ĝi baldaŭ duonmonatiĝu!
26. La stultuloj ne lernas Esperanton!
27. Se vi volas esti feliĉa, abonu La Praktikon!
28. Se vi volas perfektiĝi en Esperanto, legu La Praktikon!
29. En nia hodiaŭa programo troviĝas Esperanta parolfilmo. Paramount Teatro.
30. Admirinda okazaĵo! Esperanta parolfilmo! Sensacia sukseso! Vidu ĝin! Aŭdu ĝin!
31. Aŭtoritatoj Teraj, Maraj, Aeraj, Ĉielaj lasas liberan pasadon al verdsteluloj!
32. Ĉiu Esperantisto, kiu ne portas la verdan stelon, estos punata!
33. Morgaŭ komenciĝos la tutmonda bojkoto kontraŭ la neesperantistoj!
34. La Arnhema Esperantodoma parolfilmo estos prezentata hodiaŭ ĉi tie.
35. Atentu! Komence de nova jaro La Praktiko fariĝas ĉiutaga gazeto.
36. Vera lingva peranto: ESPERANTO! — Por ĝi vera taktiko: LA PRAKTIKO!
37. Pasigu vian libertempon en la agrabla Esperanto-Domo!
38. Lernu Esperanton! Hitler faros defendparoladojn pri Germanujo en Esperanto!
39. Ĉiela enirejo. Ĉiu, kiu parolas Esperante, rajtas eniri.
40. Esperanta parolfilmo! En la ĉefrolo Greta Garbo! Grandkino.
41. Lernu Esperanton kaj vi havos amikojn en la tuta mondo!
42. Ĉiuj regnanoj parolantaj Esperante estas liberigitaj de impostoj. Urbestraro.
43. Malaltkreskuloj, vi estas savitaj! Ni eltrovis medikamenton, kiu kreskigas vin!

La rezulto de la pluaj konkursoj aperos en la venonta numero.

INTERNACIA KONKURSO POR LA JUNULARO.

„Kristo kaj la universala frateco"

Dank' al la bonvolo de amerika kristanino, amikino de paco, S-ino Van Loan de Babylon (Usono), estas kreita fondaĵo, kiu aranĝas konkurson kun temo: **„Kristo kaj la universala frateco".** Ĝia celo estas helpi al la plivastigo de la paca spirito de internacia amikeco inter la junularo.

La konkurson organizas la Junulara Komisiono (fako de la „Universala Konsilantaro por Kristana Vivo kaj Laboro" kaj la „Tutmonda Ligo por Internacia Amikeco per Eklezioj").

Rajtas partopreni gejunuloj loĝantaj en Eŭropo kaj naskitaj post la 30-a de Aprilo 1914 kaj antaŭ la 1-a de Majo 1920. Teksto en kiu ajn lingvo. Limtempo: 30-Aprilo 1934. La juĝantaro (el diversaj nacioj kaj eklezioj) disdonos pli ol 150 premiojn, el kiuj:

la unua premio: 300 dolaroj,
„ dua „ 200 „
„ tria „ 100 „ k.t.p.

Detalaj informoj kun regularo estas haveblaj senpage pere de la Sekretariejo de la Junulara Komisiono: Case-postale No. 46, Eaux-Vives, Genève (Svislando). Bonvolu mencii, ĉu oni deziras la regularon en Esperanto, franca, angla aŭ germana lingvo.

JAĈJO HOLM KAJ LIAJ AMIKOJ

verkita de W. G. van Hulst

ilustrita de Isings

tradukita de H. C. van Leeuwen

Bele bindita. — Prezo: 2½ ned. guld.

S-ro Jakob, Direktoro de UEA, skribis al ni pri ĉi tiu libro:

„Ni volas esprimi al vi nian gratulon pro la belega eldonaĵo, tute laŭ la solida kaj serioza maniero en via lando."

HAVEBLA EN ĈIU LIBREJO

G. F. Callenbach — Eldonisto

Nijkerk (Nederlando)

ATENTU!

(Daŭrigo)

39. Akcio.

Ĉi tiu vorto signifas: valorpapero, atesto pri partopreno en la kapitalo de financa societo.

Oni devas atenti je tio, ke la vorto „akcio" en Esperanto ne havas alian signifon. Ĝi neniam povas esti uzata anstataŭ la vorto „agado".

40. Akcio. Aŭkcio.

La diferenco inter ĉi tiuj similsonaj vortoj estas:

Akcio = valorpapero (de industria aŭ financa entrepreno).

Aŭkcio = publika vendado, kie la aĉetantoj konkuras kaj tiu ricevas la objekton, kiu proponas pli altan prezon.

41. Akcidento. Incidento.

Ĉi tiuj du vortoj sonas sufiĉe simile kaj ankaŭ en la signifo ili havas parencecon. Ili ambaŭ signifas malbonan okazaĵon. La diferenco estas la jena:

Akcidento = neatendita malfeliĉaĵo. Ekzemple: *En la grandaj urboj okazas multaj akcidentoj pro la aŭtomobiloj.*

Incidento = negrava, flanka, malagrabla okazaĵo ĉe iu pli granda agado. Ekzemple: *La solenan procesion de la kongresanoj plurai incidentoj ĝenis.*

Noto: en la filozofio la vorto „akcidento" havas alian, specialan signifon: la eksteraĵoj de la substanco.

42. Akcizo. Depago. Dogano. Imposto. Tributo.

La diferenco inter ĉi tiuj malŝatataj sinonimoj estas la jena:

Imposto = la pago de la regnanoj al la ŝtato aŭ urbo, por la ĝeneralaj bezonoj.

Dogano = lim-imposto, imposto pagata pro la enporto de komercaĵoj en la landon.

Akcizo = speciala imposto, pagata ĉe manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kiam oni enportas ilin en la urbon. Imposto pri konsumado.

Tributo = imposto, kiun unu regno pagas al la alia, por esprimi sian dependecon.

Depago = imposto.

43. Akiri. Gajni. Konkeri.

Ĉi tiuj vortoj estas sinonimaj. Jen la diferencoj:

Akiri = havigi al si ion en kiu ajn maniero: prenante, aĉetante, ŝtelante, ricevante k.t.p.

Konkeri = akiri ion perforte, ekz. per milito aŭ per granda penado, ekz. konkeri la koron de la amata persono.

Gajni = akiri ion per la favoro de la sorto, per la hazardo; ekz. gajni en loterio, en kartludo, en veto. (La vorto „gajni" signifas ankaŭ: akiri ion bonan per penado, ekz.: per diligenta laboro gajni la vivrimedojn, gajni la favoron de iu.)

NOTO. Gajni oni povas nur bonaĵon. Akiri oni povas ankaŭ malbonaĵon, ekz.: *Li akiris per sia konduto multajn malamikojn.*

AVERTO. Ni kelkfoje vidas en esperantaj tekstoj la vorton „obteni". Ni atentigas pri tio, ke ĉi tiu vorto ne apartenas al la vortaro de Esperanto. La ĝusta esperanta vorto estas: „akiri".

44. Aklami. Aplaŭdi. Ovacii.

Ĉi tiuj vortoj signifas la publikan esprimadon de aprobo, favoro, plaĉo.

Aklami = akcepti, aprobi iun per krioj. Ekzemple: *oni elektis la prezidanton per aklamo* (t.e.: per aprobaj krioj, ne per voĉdonado).

Aplaŭdi = esprimi aprobon kaj plaĉon per kunfrapado de la manplatoj.

Ovacii = akcepti iun kun publika honoro kaj entuziasmo de popolamaso.

45. Akomodi. Komodo.

Similsonaj vortoj kun granda diferenco.

Akomodi = alĝustigi, adapti ion, por ke ĝi povu bone funkcii = alkonformigi.

Komodo = nomo de meblo kun multaj tirkestoj unu super la alia, por teni objektojn, precipe tolaĵojn.

46. Akompani. Kompanio.

Kvankam inter ĉi tiuj vortoj ekzistas parenceco, tamen ili ne estas samsignifaj.

Akompani = iri kun iu aŭ fari ion kun iu. Ekzemple la mastro akompanas sian gaston ĝis la pordo. Oni akompanas la kanton per pianludo.

Kompanio = societo, unuiĝo de kelkaj personoj por gvidi komercan entreprenon.

ATENTIGO. — Oni ne uzu la vorton „kompanio" anstataŭ la vorto „akompanado".

47. Akra. Akro.

La adjektivo **„akra"** signifas la kvaliton de la bona tranĉilo aŭ la guston de manĝaĵo, kiu pikas (ekz. pipro).

Sed la substantivo **„akro"** estas tute alia vorto, ĝi estas angla kaj amerika termezura unuo, nomata ankaŭ **„akreo"** (angle: *acre*).

48. Akrido. Lokusto. Grilo.

La tri vortoj signifas parencajn kaj bone konatajn insektojn.

Akrido = la fama fluganta insekto, kiu ofte en grandaj amasoj aperas kaj detruas la plantaĵojn. Laŭ la biblia rakonto Dio per akridoj punis Egiptujon en la tempo de Moseo.

Lokusto estas la insekto tre simila al la akrido, kiu dum la somero sur la kampoj saltadas.

Grilo estas la muzikanta insekto, kiu per sia ĉirpado donas ĉarmon al la kamparo. (Kaj ofte al la bakejo kaj kuirejo!)

49. Akto.

Ĉi tiu vorto havas du signifojn:

1) parto de dramo.
2) oficiala papero, dokumento.

50. Akurata. Ekzakta. Ĝusta. Preciza.

Jen la diferencoj inter ĉi tiuj sinonimoj:

Akurata estas tiu persono, kiu plenumas siajn taskojn aŭ agojn en la ordonita aŭ interkonsentita tempo.

Ĝusta = konforma al la regulo, al la vero aŭ al sia celo. Ekz.: ĝusta esprimo, ĝusta mezuro, ĝusta horloĝo.

Ekzakta = severe konforma al la vero. Ekzemple: ekzakta kalkulo = tre ĝusta, tute senerara, plenfarita kalkulo, ne nur proksimuma.

Preciza = klare determinita. Ekz.: preciza leĝo estas tiu leĝo, kiu klare kaj detale difinas, kion oni devas fari, tiel, ke duboj ne povas esti.

(Daŭrigota)

Someraj kursoj de Andreo Cseh
en la Esperanto-Domo en Arnhem dum 1934:

2—12 Julio:	Internacia kurso por poŝtistoj, telegrafistoj kaj telefonistoj.
20—31 Julio:	Internacia kurso por komencantoj kaj seminario por Cseh-metodaj instruistoj.
6—11 Aŭgusto:	Internacia perfektiga kurso.
16—25 Aŭgusto:	Internacia komenca kurso por gejunuloj (ĝis aĝo de 30 jaroj).

Detalaj informoj sekvos en la venontaj numeroj de La Praktiko.

AL LA VENKO

TABELO PRI LA ĜISNUNA ENHAVO:

Blinduloj 85
Edziĝo internacia 30
Esp-istaj organizaĵoj 4, 13, 31, 32, 86, 107, 125, 156, 160
Fervojoj kaj Esp-o 2, 43, 176
Filmoj Esp-aj 110, 133
Foiroj 38, 42, 44, 45, 173, 178
Gazetoj kun Esp. 35, 47, 51, 53, 55, 64, 70, 72, 74, 79, 81, 83, 87, 88, 89, 93, 97, 113, 115, 117, 118, 119, 120, 126, 127, 134, 141, 149, 150, 152, 174, 175
Gravuloj por Esp-o 7, 10, 14, 59, 61, 67, 68, 76, 78, 94, 106, 122
Instruistoj 24, 33, 51, 73, 81, 82, 87
Internaciaj movadoj kaj Esp-o 48, 91, 124, 139, 140
Komerco 3, 6, 98, 101, 112, 116, 129, 130, 143, 145, 158, 165
Kongresoj uzas Esp-on 25, 124, 140, 164, 183
Kursoj de Esp-o 29, 54, 56, 80, 96, 132, 169
Lernejoj 11, 15, 28, 34, 37, 50, 54, 62, 91, 144, 153
Libroj en Esp-o 156, 159, 171
Ligo de Nacioj 1, 40
Monumentoj 111, 146
Oficiala subteno al Esp-o 20, 23, 57, 71, 80, 91, 123, 154, 157, 169, 177, 180
Pacmovado 83
Parlamentanoj por Esp-o 1
Polico 5
Poŝto 5, 26, 41, 53, 56, 84, 95, 99, 104, 15 167, 1
Propagando 11, 12, 65, 125, 136, 1
Radio 14, 17, 18, 19, 27, 60, 63, 75, 103, 10
Registaroj por Esp-o 8, 36, 9
Scienco kaj scienculoj ... 10, 21, 79, 102, 1
Skoltoj 49, 1
Statistiko .....
Stratoj kun nomo Esp. aŭ Zamenhof 16, 52, 77, 128, 1
Turismo 9, 66, 69, 108, 109, 114, 121, 13 148, 151, 163, 1

184. Esperanto-teksto sur geografia signalo. — En la japana vilaĝo Mizuho, kiu kuŝas precize sur la norda tropika cirklo, oni starigis 7 metrojn altan signalŝtonon. Sur la ŝtono estas tabulo kun la Esperanto-lingva surskribo: „Signo de la Norda Tropiko" kaj ornamita per la verda Esperanto-stelo. *(Vidu la bildon de la ŝtono sur la bildaj paĝoj.)*

185. Esperanto en internacia kongreso. — En la internacia kongreso pri seksaj reformoj, okazinta antaŭ nelonge en Brno (Ĉeĥoslovakio), la lingvo Esperanto estis oficiale uzata. La prezidanto de la kongreso, Dro Leunbach, kuracisto el Kopenhago, faris ankaŭ Esperant-lingvan prelegon.

186. Esperantokurso per radio. — En Finnlando oni okazigis voĉdonadon de la publiko pri la radio-programo. Laŭ la publikigita statistiko pri la donitaj respondoj, 2000 personoj postulis la instruadon de Esperanto. Sekve de tiu amasa interesiĝo la finnlandaj radio-stacioj decidis disaŭdigi Esperanto-kurson kun komenco en Januaro 1934.

187. Artikoloj pri Esperanto en la ĉeĥoslovaka gazetaro. — La gazetara servo de la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista dum la jaro 1932 laboris kun granda efiko. Laŭ ĝia statistiko dum la nomita jaro en 227 ĉeĥaj gazetoj aperis 1089 artikoloj pri Esperanto.

188. Grava ĵurnalo en Hindoĉinujo kun Esperanto-rubriko. — La grava franclingva semajna gazeto *„La Patrie Annamite"*, aperanta en Hanoi (Hindoĉinujo), publikigas en ĉiu numero ampleksan Esperanto-rubrikon sub titolo „Le Carnet des Esperantistes". *(Ĉi tiun sukceson ni dankas al nia samideano N.V. Nhân, kiu senlace klopodas gajni por Esperanto la hindoĉinan gazetaron. En la nomita rubriko aperis ĝis nun artikoloj de s-roj Nhân, My, Kinh, Duong kaj aliaj. Ankaŭ la ĉefredaktoro de la gazeto fariĝis Esperantisto.)*

189. La Pola Turing-Klubo fondis Esperanto-Rondon. — La 30-an de Oktobro fondiĝis aparta Esperanto-rondo en la Pola Turing-Klubo. La celo de la nove fondita rondo estas parte diskongi Polujon en la eksterlando, parte helpi eksterlandajn vojaĝantojn en Polujo. Oni decidis ankaŭ, ke la oficiala organo de la P.T.K., la monata gazeto „Aŭton kaj Turisto", disponigos en ĉiu numero apartan paĝo Esperanto kaj ke ĉiu artikolo de la gazeto enhavos Espe lingvan resumon.

190. Policistoj kun Esperanto-stelo. — En Antve (Belgujo) la Esperante parolantaj policistoj r la permeson porti sur la uniformo dum la deĵoro la Espe insignon.

191. Gazeto kun Esperanto-rubriko. — La neder gazeto *„Baarsjesklok"*, aperanta ĉiusemajne en sterdam, publikigas en ĉiu numero Esperanto-rubrikon. Esperanto-rubrikon redaktas s-ro *H. J. Bosschert.)*

192. Esperanto-lingvaj radio-paroladoj en Vieno. — radio-stacio de Vieno (Aŭstrio) ĉiumerkrede di gas interesajn paroladojn en Esperanto-lingvo. *(La progra la paroladoj estas trovebla en la rubriko de la informoj.*

193. Novjara radio-saluto en Esperanto. — La neder radio-stacio A.V.R.O. en la novjara tago disa al sia aŭskultantaro novjaran saluton en diversaj lingvoj, kiuj ankaŭ en Esperanto.

194. Vendejoj en Vieno por Esperanto. — En la a ĉefurbo Vieno multaj komercaj firmoj konsenti digi en la elmontra fenestro la verdan stelon, insignon de ranto. Ĉiu aĉetanto, pruvanta per membrokarto sian apar al iu Esperantista organizaĵo, ricevas en tiuj vendejoj ral

195. „Quo Vadis" en Esperanto. — La mondkona mano „Quo Vadis?" de la fama pola aŭtoro He Sienkiewicz ĵus aperis en unuaranga Esperanto-lingva tra La libron tradukis el la pola originalo f-ino Lidja Zam filino de la aŭtoro de Esperanto, kaj eldonis ĝin en luksa la entrepreno „Populara Esperanto-Biblioteko" en Amste

196. Esperanto-lingva prospekto pri Ljubljana. — Ĵu ris bele ilustrita, lukse presita faldprospekto lingvo Esperanto pri la jugoslava urbo Ljubljana, la kultu ekonomia centro de la slovena popolo.

Koran dankon ni diras al ĉiuj afablaj gesamideanoj, kiuj okaze de la kristnaska festo kaj de la nova jaro sendis al ni saluton kaj bondeziron. Ni amike salutas ilin kaj tutkore reciprokas iliajn bondezirojn.

Intern. Cseh-Instituto de Esp.
Red. kaj eld. de La Praktiko.

La malnovaj jarkolektoj (1932 kaj 193 de LA PRAKTIKO

estas aĉeteblaj en la jenaj prezoj:

Simpla (nebindita) ekzemplero = la duona abonprez
Tole bindita kun ora surpreso = la tuta abonprez

Unuopaj numeroj kiel ekzercilo por grupoj kaj kursoj po 10 cendoj.

la mondo ridas

En la lernejo.

— Knabo, vi ne bone solvis ĉi tiun aritmetikan taskon. Ĉu vi ne vidas, ke mankas tri centimoj? Solvu ĝin denove!

— S-ro instruisto, mi prefere pagas la diferencon.

(Rire)

Eĉ en la dormo.

— Mia filino, la bankoficistino, tiel profunde dormas, ke mi preskaŭ ne povas ŝin veki en la matenoj.

— Kial vi ne aĉetas por ŝi vekhorloĝon?

— Ŝi havas ĝin. Sed kiel ajn forte ĝi sonoras, ŝi duondorme diras: „La sinjoro direktoro estas en konferenco, bonvolu pli poste voki." Kaj ŝi dormas plu.

Sav-zono.

— Jen estas la plej nova sav-zono, la lasta fabrikaĵo, la plej bona en la tuta mondo, — laŭdas la komercisto sian varon.

— Ĉu ĝi estas absolute fidinda?

— Certe, sinjoro, jam centoj da personoj aĉetis ĝin kaj ankoraŭ neniu reportis ĝin.

Sunleviĝo.

— Vere admirinda estas ĉi tiu sunleviĝo! Domaĝe, ke ni ne havas tempon, ĉar dum la tuta tago mi restus ĉi tie por rigardi ĝin.

(Berliner Illustrierte)

Inter amikinoj.

— Diru, kara amikino, kial vi ne surmetis hodiaŭ viajn perlojn?

— Mi opinias, ke ili ne estas konvenaj al ĉi tiu vesto.

— Kia domaĝo! Ankaŭ en la pasinta fojo mi diris al Elly, ke kun tiuj perloj vi aspektas kiel vera sinjorino.

Sincera funebro.

— Kio okazis al vi, kial vi estas tiel malĝoja?

— Ĉu vi ne aŭdis? Mortis la plej riĉa homo de Ameriko!

— Jes, mi aŭdis. Nu, ĉu li estis via onklo?

— Ne, ne, tute ne! Kaj ĝuste pro tio mi malĝojas.

(Moustique)



Moderna edziĝo.

— Ho, kara patro, mia edzino sidas dum la tuta nokto en la briĝ-klubo kaj se mi nur unu erareton faras en la kuirado, ŝi faras teruran skandalon...

(Lustige Blätter)

Singarda ŝoforo.

— Mi dungas nur tian ŝoforon, kiu neniam estas facilanima kaj riskema, sed ĉiam estas singarda.

— Tiam ĉi tiu viro estas por vi la taŭga. Li postulas ĉiam antaŭpagon.

(Die Woche)

Nur ĝentile!

— Nun mi vere ne scias, el ni du kiu estas la freneza, ĉu mi aŭ vi?

— Rigardu, mi petas, vi estas multe pli saĝa viro, ol povi interrilati kun mi, se mi estus frenezulo ...

(Berlingske Tidende)

Lokalpatriotismo.

Fremdulo: Ĉi tiu statuo estas tre malbona. Goethe ne tiel aspektis.

— De kie vi scias?

— Ankaŭ en mia vilaĝo estas unu Goethe-statuo.

Bonega ĵonglisto.

— Grandioza ĵonglisto prezentadas sin en la cirko. Vere estas inde rigardi lin.

— Ho, lasu, nura trompo estas ĉio, kion li prezentas.

— Ne, tute ne! Hieraŭ mi pruntis al li por la produktaĵo unu falsan bankbileton de dek markoj kaj li redonis al mi malfalsan.

(Die Woche)

Grava kaŭzo.

La malgranda Karĉjo petas monon de la patrino. La patrino miras.

— Por kio vi bezonas la monon?

— Imagu nur, panjo, mi iras en la strato kaj unu rabisto venas kontraŭ mi kaj diras al mi: monon aŭ vivon! Kio okazos, se mi ne havos monon?

La riĉa vidvino.

Rabisto: Ne timu, sinjorino, ne vian vivon mi deziras, nur vian monon!

— Nu, mi povus tion pli frue eltrovi. Ankaŭ vi ne estas pli bona, ol la aliaj viroj. Tuj elportu vin!

(Answers)

NOVAJ LIBROJ

H. Sienkiewicz: QUO VADIS? El la pola originalo tradukis Lidja Zamenhof. Unua parto. 272 paĝoj. En luksa tolbindaĵo. — La mondfama romano de la glora pola verkisto fine aperas en la mondlingvo, en unuaranga traduko de la filino de nia Majstro. La libro formas la duan numeron en la serio de la Populara Esperanto-Biblioteko en Amsterdamo. La dua parto de la verko aperos baldaŭ kiel tria numero de la P.E.B.

W. G. van de Hulst: JAĈJO HOLM KAJ LIAJ AMIKOJ. El la nederlanda lingvo tradukis H. C. van Leeuwen. 236 paĝoj. Ilustraĵoj de Isings. En luksa tolbindaĵo. Prezo 2.50 guld. Eldonejo: G. F. Callenbach en Nijkerk (Nederlando). — Jen, denove per bela granda libro pliriĉiĝas la Esperanta literaturo. Ĝi enhavas faman junularan rakonton, kiu en la nederlanda originalo vendiĝis jam en pli ol 80,000 ekzempleroj. Ni deziras, ke la Esperanto-lingva eldono havu similan sukceson.

LA VOJAĜOJ DE GULIVERO. Unua parto: Al Liliputlando. 112 paĝoj. Dukolora kovrilo. Prezo: 1.25 guld. Eldonejo: Piet Smits, Korvelsche weg 85, Tilburg (Nederlando). — La mondfama libro pri Gulivero nun aperas la duan fojon en Esperanta traduko. La unua traduko aperis kaj elĉerpiĝis longe antaŭ la mondmilito. Ĉi tiun tradukon faris s-ro Jos. A. de Roos. Sendube la Esperantistaro kun plezuro legos ĝin. Dek-du speciale desegnitaj bildoj ilustras la enhavon.

JARLIBRO POR ĈINAJ ESPERANTISTOJ, 1932. — 108 paĝoj. La Kantona Esperanto-Instituto (P. O. Box 88) sub ĉi tiu titolo eldonis enhavriĉan kaj utilan manlibron, kiu en ĉina lingvo entenas multajn informojn pri la ĉina kaj universala Esperanto-movado, kun pluraj bildoj. La apero de ĉi tiu jarlibro estas ĝojiga signo de tio, ke nia movado en Ĉinujo fortiĝas.

INTIMA FRAZLUDO. — 62 kartetoj en skatolo, por societa ludo, aranĝita de s-ro Jakob Rosenberg en Tallinn (Hollandi strato 11-4), Estonio. Ĉiu karto surhavas aron da demandoj, respondoj kaj proverboj, signitaj per nomoj de floroj. La ludantoj interŝanĝas siajn kartojn, nomante la floron, kiu signas la intencatan frazon. Al la skatolo estas aldonita ankaŭ „botanika vortareto" Esperanta-estona. Prezo: 0.75 guld.

Ĉu vi volas havi belajn librojn? Rigardu la lastan paĝon!

La partoprenintoj de la bonege sukcesinta unua Sudnorvega Esperantista Kunveno en la urbo Kristiansand.

Sinjorino G. H. Drost (dekstre) kaj fraŭlino B. de Zoete, fidelaj legantinoj de La Praktiko en Rotterdam, vestitaj kiel Volendam-anoj. — F-ino B. de Zoete nuntempe gvidas Esp-kursojn.

D-ro Inazo Nitobe, la fama japana politikisto, estinta ĝenerala vicsekretario de la Ligo de Nacioj, mortis en Kanado la 15-an de Oktob-

Kurso en Kalundborg (Danujo). — S-ro Ernst Juneby el Jönköping (Svedujo), instruisto de la Cseh-Instituto, gvidis grandsukcesajn kursojn en la dahaj urboj Kalund-



Nia fervora propagandisto, s-ro Dragutin Wranka,

Esperanto kaj hon. membro de UEA. derland (kun la flago), unu el la meritplenaj organizintoj de la grandaj kursoj. das nuntempe grandajn kursojn en Jugoslavujo.





Ni prezentas ĉi tie du bildojn, kiuj montras interesan dokumenton de la venka iro de Esperanto. — Ce la japana vilaĝo Mizuho (en la orienta parto de la insulo Formoso) oni starigis signoŝtonon precize sur punkto, tra kiu pasas la norda tropika cirklo. Antaŭ la signo-ŝtono staras tabulo, kiu en Esperanta lingvo klarigas la signifon de la loko. Malantaŭ la kolono kuŝas granda ŝtona disko kun diametro de ses metroj. Ĝi servas kiel sunhorloĝo. La supra bildo montras la tutan signo-ŝtonon, kies alteco estas sep metroj. La malsupra bildo montras la tabulon kun la surskribo: „Signo de la norda tropiko", kaj la gardiston. — Pro la sendo de la bildoj ni dankas al samideano Giiĉi Ŝirane.

La lernantinoj de la Esperanto-kurso en la 2-a Mastruma Lernejo de Amsterdamo. (Kliŝo de Nederl. Esp-isto.)



La ekspoziciitaj altaraj bezonaĵoj (altartuko, antaŭpendaĵo, kaliko-kovrilo, tabernaklaj kurtenoj k.t.p.), kiujn la Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakio donace sendis al la karmelita misiisto P. Henry Josef, laboranta en Ayroor (Suda Hindujo).

Nia fervora nederlanda propagandisto, s-ro Sipke Stuit, instruisto de la Ĉeĥ-Instituto, kiu diligente disvastigas Esperanton en Svedujo. Li jus finis la kursojn en Flen, Katrineholm, Sparreholm.

LA MONDO ESTAS INTERESA

La aĝo de la bakterioj. — Laŭ la komuna scio ĉiu viva estaĵo havas limigitan viv-daŭron kaj ju pli malaltranga estas iu organismo, des pli mallonge daŭras ĝia vivo. Sed la esploroj de la amerika geologo D-ro Charles B. Lipman refutas tiun opinion. Li konstatis, ke la bakterioj restas en vivo ne nur dum jarmiloj, sed eĉ dum jarmilionoj. Li faris eksperimentojn kun ŝtonaĵoj devenantaj el la plej diversaj epokoj de la Tero. Tute malebliginte, ke per la aero aŭ alimaniere novaj bakterioj atingu tiujn ŝtonojn, li trovis en la ŝtonoj ĉelojn, kiuj inter favoraj cirkonstancoj reprenis la vivfunkciojn, plimultiĝis kaj produktis grandan nombron da novaj ĉeloj. La ŝtonoj, kiujn la scienculo uzis, havis aĝon de pluraj jarmilionoj.

★

La historio de la banado. — En la orientaj landoj la fondintoj de la religioj kutimigis la popolojn al la banado. Tie la religiestroj enmetis la lavadon kaj banadon inter la religiajn ekzercojn. Ĉe multaj orientaj popoloj ĝis nun la banado havas religian koloron. En la antikva epoko oni multe banis sin. La grekoj kun varma bano atendis siajn ŝatatajn gastojn. La romanoj konstruis grandiozajn publikajn banejojn kaj ili havis la proverbon: „en la banejo loĝas la saneco". Dum la mezepoko oni ne ŝatis bani. Dum la krucaj militiroj la eŭropanoj konatiĝis kun la ban-kutimoj de la orientanoj, sed pro la timo de la teruraj epidemioj ili ne kuraĝis uzi komunajn banejojn, kiuj efektive estis la plej danĝeraj disvastigantoj de la infektaj malsanoj. Oni abomenis ankaŭ la lavadon de la manoj kaj vizaĝo, eĉ en la 17-a jarcento. Margareto Valois, unu el la plej altrangaj kaj plej belaj virinoj de la epoko, skribas pri si mem, ke ŝiaj manoj estas tre belaj, „kvankam jam de pli ol unu semajno ŝi ne lavis ilin". Kiam la sveda reĝino Kristino faris viziton al la franca kortego, laŭ aserto de atestantoj „ŝiajn manojn tiel dike kovris la malpuro, ke eĉ la formojn de ŝiaj manoj oni ne povis vidi". En tiu tempo ankoraŭ ne ekzistis banĉambroj, eĉ en la reĝaj palacoj. Nuntempe jam estas ĝenerale konata fakto, ke la purigado de la haŭto estas tre bonfara kaj utila por la tuta organismo. Precipe la varma bano estas tre saniga, ĉar ĝi helpas la funkciadon de la renoj. En Japanujo, kie ekzistas multaj varmaj fontoj, ĉiutage pli ol duonmiliono da homoj banas sin en varmega akvo de 40 centigradoj. Tio klarigas, ke la japanoj apartenas al la plej sanaj popoloj de la mondo.

★



En Ameriko la 17-jara junulo Lawrence Swank havis strangan akcidenton. Kiam li veturis per sia aŭtomobilo kun 40-kilometra rapideco, en momento subite meteora ŝtono falis sur la antaŭan parton de la aŭtomobilo kaj kun granda bruo trabatis la malvarmigilon. Kvankam, laŭ la taksado de la astronomoj, ĉiutage 10-20 milionoj da meteoroj falas el la ĉielo sur nian Teron, ili tre malofte kaŭzas malutilon, ĉar ili ankoraŭ en la aero forbrulas pro la frotiĝo kun la aero. Nur tre malmultaj tiaj ĉielaj ŝtonoj atingas la teron.

De kiam oni uzas sunombrelon? — la historiaj dokumentoj la unua sunor apartenis al la edzino de la tria fa el la dek-tria egipta dinastio. La for tiu ombrelo sekvis la liniojn de la folio, ĝi estis farita el fleksita ba kano kaj kovrita per tolo. De la e la ombrelon transprenis poste la kaj romanoj, ĉe kiuj ĝi fariĝis multe objekto. Post la pereo de la antikva imperio la ombrelo forgesiĝis k eŭropaj popoloj ekkonis ĝin nur en la jarcento, kiam ĝi venis el Peruo kaj siko. La glora epoko de la ombrelo dum la tempo de la franca reĝo Lud XV-a kaj liaj amikinoj. Ekzemple rino Pompadour ricevis de la reĝo j fojo 100 ombrelojn. Unu el kiuj oml farita el pergameno, fariĝis monc ĉar la fama pentristo Boucher ornam per floroj, kiuj neniam velkos.

★

La petrolo — kiel ŝmiraĵo por ka — La historio de la petrolo havas m interesajn epizodojn. Kvankam la h jam de pluraj jarcentoj konas la pet tamen nur tre malfrue, en la dua pa la pasinta jarcento oni komencis ĝ por industriaj celoj kaj por lum Marco Polo, la fama vojaĝisto, es unua, kiu skribis pri la petrolo. Li m en sia vojaĝpriskribo, ke en la regio Baku la popolo uzas la petrolon ki dikamenton, ŝmirante ĝin sur la kan Ankaŭ en Eŭropo estas regionoj, k uzas la petrolon eĉ hodiaŭ por kur de bestoj.

★

Kiom da homoj pereas pro tertren Oni opinias ordinare, ke en la hom la plej grandan detruadon kaŭzas la mobiloj kaj aliaj veturiloj. Tio tu estas vera. La plej fervora ekster de la homa vivo estas la tertremo proksimuma kalkulo ĉiujare 15,000 perdas la vivon pro tertremo. La n de la mortoj, kiujn la aŭtomobilaj ak toj kaŭzas, estas iom pli malgranda

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Morto. — S-ro *Alfred Barton*, ĉefkonsilanto de la angla urbo Sheffield, mortis la 9-an de Decembro.

— S-ro *Ludwig Istel* mortis en Wiesbaden (Germ.) la 17-an de Decembro. — S-ro Istel estis meritplena pioniro de Esperanto, fondinto kaj honora prezidanto de la Esp.-Grupo en Wiesbaden.

— S-ro *G. H. F. Clark*, angla samideano, diplomita Esp-instruisto, mortis la 4-an de Novembro.

— D-ro *Henri Sentis*, unu el la plej malnovaj francaj Esp-istoj, fondinto kaj honora prezidanto de la Esp.-Grupo de Grenoble, mortis la 15-an de Decembro.

Svisa Esperanto-Instituto fondita. — La 1-an de Novembro fondiĝis en Bern, en konsento kun UEA kaj Svisa Esperanto-Societo, la Svisa Esperanto-Instituto. Ĝia gvidanto estas nia meritplena propagandisto, D-ro E. Spielmann, honora prezidanto de ILEPTO kaj honora membro de la Berna Esperanto-Grupo. — La nova instituto celas propagandi Esperanton en privataj, komercaj kaj administraciaj rondoj de Svislando, organizi kursojn, peradi informojn, fari traduk-laborojn, organizi rabatitajn vojaĝojn kaj libertempojn, vendi Esperantaĵoj La adreso de la instituto estas: Poŝtkes Transit, Bern.

Mortis Prof. Grosjean-Maupin. — La 1 Decembro mortis apud Parizo post grava nia eminenta samideano Prof. Grosjean-M membro de la Esperantista Akademio. La t perantistaro bone konas la nomon de la plena kaj senlaca verkinto de la altvaloraj v la Franca-Esperanta kaj la Plena Vorta foriro de la multe estimata kaj ŝatata sa estas grava perdo por nia movado.

Interesa donaco. — En la franca urbo unu el la urbaj policistoj, s-ro Faucon, Esperanton kaj decidis peti permeson por verdan stelon sur la vesto dum la dejor

li aperis antaŭ la policestro kaj prezentis sian peton, li ricevis ne nur la permeson, sed ankaŭ la sumon de 100 frankoj. La policestro klarigis al la surprizita policisto, ke tiun sumon iam iu nekonata Esperantisto deponis ĉe la policejo kun la destino, ke ĝi estu donaco por la unua policisto en Cannes, kiu parolas la internacian lingvon.

Franca Esperanto-Instituto fondiĝis. — La Societo Franca por la Propagando de Esperanto kreis la Francan Esperanto-Instituton. La membroj de la nova instituto estas: s-roj Avril, Aymonier, Bastien, Bobin, Beau, Boucon, Corret, Cotton, Dejean, Deshays, Delor, Duval, Esselin, Jacoubet, Waringhien kaj Warnier.

Radio-konkurso en Lyon. — Por interesigi la aŭskultantaron, la radio-stacio Lyon-la-Doua (466 m.) aranĝos la 20-an de Januaro je la 21.10 (mezeŭropa tempo) interesan radio-konkurson. Kelkaj diversnaciaj Esperantistoj parolos antaŭ la mikrofono kaj la konkursa tasko estas, ke la aŭskultantoj divenu la naciecon de la parolantoj.

Universala Esperanto-Kongreso en Aŭstrio. — Niaj aŭstriaj samideanoj intencas inviti la 27-an kongreson al sia lando kaj ili proponas por la kongreso la urbojn Salzburg aŭ Innsbruck.

Lokshmiswar Sinha, nia ŝatata hinda samideano kaj propagandisto, revenis al Eŭropo kaj pasigas kelkajn monatojn en Svedujo, por studi la svedajn edukajn aferojn. Li faras nuntempe en Svedujo ankaŭ Esperanto-lingvajn prelegojn.

La sorto ne estas blinda. — S-ro André Boyer, prezidanto de la Esp-societo en Cannes (Francujo) kaj de la Provenca Esp-ista Federacio, fervora leganto de La Praktiko, en la lasta franca ŝtata loterio gajnis unu milionon da frankoj. La legantoj de La Praktiko jam konas s-ron Boyer. La ĉefartikolo en nia numero de Junio 1933 rakontis pri lia batalado por nia afero, kaj oni povas vidi lian fotografajon en La Praktiko de Aŭgusto 1933 sur la 4-a paĝo. Ni gratulas al s-ro Boyer kaj ni esperas, ke la belega gajno helpos lin en la plua agado por Esperanto.

Nederlanda karavano al la Stokholma kongreso. — Nia fervora samideano, s-ro Jakob Telling, ĉefdelegito de UEA por Nederlando, organizas karavanan vojaĝon al la venontjara kongreso. La partoprenantoj veturos per komforta ŝipo speciale luota por tiu celo. La ŝipo servos ankaŭ kiel hotelo dum la tuta kongreso. La kosto de la partopreno, entenanta la veturon kaj manĝojn dum la veturo, kaj dum la kongresaj tagoj loĝon kun matenmanĝo en la ŝipo, estas: 85, 110, 120 aŭ 130 guldenoj, laŭ la rango de la dormkajutoj. La ŝipo foriros el Hoek van Holland la 1-an de Aŭgusto kaj revenos la 14-an de Aŭgusto en la sama haveno. Nederlandaj, anglaj, belgaj kaj francaj kongresanoj estas invitataj partopreni en la karavano. Detalajn informojn oni petu de la organizanto: s-ro Jakob Telling, Bellevoysstraat 36, Rotterdam (Nederlando).

Aŭskultu gravajn kaj interesajn radio-paroladojn! — La radio stacio de Vieno (Aŭstrio) ĉiumerkrede disaŭdigas en Esperanto interesajn paroladojn pri Aŭstrio. Ni alvokas niajn legantojn aŭskulti tiujn paroladojn kaj pri bona akcepto skribi al Internacia Esperanto-Muzeo (Vieno, I., Neue Burg) aŭ al la Radio-stacio „Ravag" (Vieno I.). Jen la programo de la paroladoj:

24-Jan.: D-ro inĝ. Eugen Wüster: La elektroprovizado de Aŭstrio.

31-Jan.: Emma Raff: Belaj artoj en Aŭstrio.

7-Febr.: Kalkul-konsil. Rud. M. Frey: Karnavalaj kutimoj en Vieno.

14-Febr.: Reg. kons. H. Steiner: Foiro de Vieno.

Je la fino de ĉiu parolado oni disaŭdigos gravajn informojn pri la „Internacia Konferenco", kiu okazos en Vieno dum la tagoj 20—24 Majo, kaj oni anoncos la precizan horon de la sekvonta parolado.

Esp-ista skolta tendaro dum 1934. — Certe kun granda ĝojo sciiĝos la Esp-istaj skoltoj kaj la amikoj de la skoltismo, ke la 12-a Internacia Tendaro de la Skolta Esperantista Ligo okazos dum la tagoj 16—31 de Julio en la bela regiono de la montaro Tatro en Slovakio. La preparajn laborojn prizorgas la Esp-fako de la Centro de Slovakaj Katolikaj Skoltoj (Bratislava, Kapitulská 18), kiu jam vigle laboras. Ĝi jam dissendis la unuan cirkuleron. Interesatoj petu ĝin ĉe la citita adreso. Jen estas bona okazo por propagandi Esperanton inter la skoltoj. Tial ni varme rekomendas al niaj propagandistoj kaj kursgvidantoj, ke ili klopodu aranĝi specialajn kursojn por skoltoj, kiuj deziras partopreni. Estas ankoraŭ sufiĉa tempo, por ke ili ellernu la lingvon. La praktikadon de la lingvo ili faros en la tendaro mem. La prepara komitato ankaŭ danke akceptos monsubtenojn.

Ekzamenoj en Nederlando. — La 18-an de Novembro okazis en Utrecht Esperanto-ekzameno por diplomo „A". Partoprenis 114 kandidatoj, el kiuj sukcesis 79 personoj.

Internacia konkurso por la junularo. — Niaj legantoj trovas en ĉi tiu numero de La Praktiko anoncon pri granda konkurso kun valoraj monpremioj pri la temo: „Kristo kaj la universala frateco". Ĉar oni akceptas laboraĵojn ankaŭ en Esperanto kaj la aranĝanta komisiono uzas Esperanton en sia korespondado, ni varme rekomendas al niaj junaj legantoj, ke ili partoprenu en la konkurso per Esperant-lingva verkaĵo. Estos bonega propagando por nia lingvo, se Esperant-lingvaj verkaĵoj ricevos premiojn, ĉar la rezulton de la konkurso oni publikigos en ĉiuj kristanaj gazetoj de la mondo.

Aŭstrio. — En *Salzburg* nia senlaca propagandisto D-ro Franz Christanell komencis novan kurson por universitataj studentoj.

Danujo. — La kursoj, kiujn nia fervora sveda propagandisto s-ro Ernst Juneby gvidis en la urboj *Kalundborg, Tömmerup* kaj *Ubby,* finiĝis kun granda sukceso. En la tri kursoj partoprenis entute 113 personoj. En la organiza laboro multan meriton havas s-roj Nederland, pastro Hansen, Nylev, O. Hansen, Jörgensen kaj Schiött. La novaj Esperantistoj jam fondis tri klubojn kun 90 membroj. Antaŭ unu jaro en tiu tuta regiono ne estis eĉ dek Esperantistoj.

Francujo. — F-ino Lidja Zamenhof kun granda sukceso finis la kurson en *Marseille.*

Jugoslavio. — La Esperanto-Societo en *Beograd* tre solene festis la naskiĝtagon de Zamenhof. La 16-an de Dec. okazis granda festa kaj amuza vespero en la „Ĉeĥoslovaka Domo" kun riĉa programo. La 17-an de Dec. okazis solena akademio en la universitato de Beograd, kun interesaj kaj valoraj prelegoj kaj honorigo de la memoro de Zamenhof. La akademion gvidis s-ro Jova P. Jovanović, inspektoro ĉe la Kleriga Ministerio. Ambaŭ aranĝoj brile sukcesis kaj ilin ĉeestis multaj profesoroj de la universitato kaj mezaj lernejoj. — En *Osijek* komenciĝis speciala kurso por tramistoj, partoprenas 15 personoj. Oni preparas similajn kursojn por policistoj kaj por la motorciklista klubo „Tomislav". La gvidanto estas s-ro D. Wranka, instruisto de la Ĉseh-Instituto. — En *Mikluševci* por kamparanoj kurson gvidas s-ro B. Vančik.

Kanariaj Insuloj. — S-ro Juan Régulo Pérez gvidas du kursojn por 38 personoj en la urbo *Tazacorte.* Krom tio li instruas nian lingvon al kvar instruistoj.

Nederlando. — En *Breda* komenciĝis kurso por poŝtoficistoj, sub la gvidado de s-ro F. J. v. d. Burgt el Bergen-op-Zoom. — En *Leeuwarden* s-ro P. v. d. Molen gvidas du kursojn, unu por la Laborista Esp-Societo kaj unu por junaj senlaboruloj. — En *Zwolle* kun sukceso finiĝis la kurso de s-ro A. Siitam el Estonio. — En *Alkmaar* kun bona sukceso finiĝis la kurso de Julio Baghy el Hungarujo. En Januaro li komencos tie daŭrigan kurson. — En *Amsterdam* la Katolika Esperanto-Societo (ARKEV) aranĝis kurson sub la gvidado de s-ro H. J. Bosschert.

Nederlanda Hindujo. — La provizora sekretario de la O.C.E.O., s-ro F. W. Buenting, forvojaĝos en Januaro al Eŭropo. Lin anstataŭos kiel sekretario-kasisto: s-ro C. P. Krüss (adreso: Insulindelaan 20 en Meester-Cornelis, Java), kiu malgraŭ sia aĝo de 65 jaroj kun kuraĝo kaj plena fervoro transprenis la grandan laboron. Ni esprimas al li niajn plej korajn bondezirojn.

Norvegujo. — F-ino Margarete Glaser el Berlino sukcesplene finis siajn kursojn en *Horten* kaj *Holmestrand* kaj pasigis la festan libertempon en Oslo.

Polujo. — En *Borszczow* s-ro S. Rosenstock gvidas kurson por 10 progresantoj.

Svedujo. — S-ro Tiberio Morariu gvidos kursojn en *Borås* dum la monatoj Januaro-Marto.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — Petu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

LA NOVA PORTRETO de la Esp-ista episkopo D-ro Ant. Eltschkner kun speciala eldono de lia Esperanta blazono episkopa, estas ricevebla ĉe Ligo de Katolikaj Esp-istoj en Ĉ.S.R., Praha-Brevnov 514, kontraŭ sendo de 1 internacia respondkupono.

KORESPONDO. — La „Esperanta Rondo" en Koronowo (Polujo) dez. korespondi kun ĉiuj landoj per leteroj, il. poŝtkartoj (kun marko bildflanke), interŝanĝi poŝtmarkojn kaj il. jurnalojn. Adreso: s-ro Józef Gliba, Rynek 2, en Koronowo (pow. Bydgoszcz), Polujo.

LETERVESPERO. — 20 laboristoj (komencantoj) serĉas korespondadon kun ĉiuj landoj pri interesaj temoj. Adreso: Torstein Lunde, Sögne ĉe Mandal (Norvegujo).

STENOGRAFIO, skriba kurso. — Petu informojn de s-ro B. P. Roubos, Noordendijk 90, Dordrecht (Nederlando).

KORESPONDO. — En la plej suda norvega marurbo Mandal, 40 viglaj kaj fervoraj Esperantistoj (komencantoj) deziras korespondi kun la tuta mondo. Skribu tuj al: s-ro Haakon Christensen, Mandal (Norvegujo).

PETO. — Por rondiranta ekspozicio la Nordfranca Federacio bezonas materialon. Fakestro: s-ro LECHELLE, 128 Avenue Condé, en VALENCIENNES (Nord), Francujo. Antaŭdankojn!

ESPERANTO-LIBROJN SEN MONO, laŭplaĉe elekteblajn, vi akiru, per simpla partopreno je nia daŭra, senpaga KONKURSO al ĉiu alirebla!! — Validas nur por franclingvuloj. — Skribu ankoraŭ hodiaŭ al: Esperanto-Servo, 12 rue Pougin en Metz-Montigny (Moselle, Francujo). Aldonu respondspezojn.

KIAMANIERE ESTAS KULTATA la Jesu-Infano de Praha en via patrujo, loĝloko? — Je ĉi tiu temo malfermas Ligo de Katolikaj Esp-istoj en Ĉ.S.R. internacian konkurson kun 3 monpremioj de 200 ĉ.kr., 150 ĉ.kr., 100 ĉ.kr. kaj 4 libropremioj. Interesajn detalojn legu en la Oktobra n-ro de „Espero Katolika", Collell (Prov. Gerona), Hispanujo. Limtempo ĝis la 15-a de Marto 1934.

PETO. — La Esperanto-sekcio ĉe la Pola Turing-Klubo alvokas la tutmondan Esperantistaron al kunlaboro. Ĝi volonte donas informojn pri Polujo, pri la pola kulturo, arto k.t.p. kaj pri la turismo en Polujo. Esp-aj eldonejoj estas petataj sendi ekzemplerojn de siaj eldonaĵoj, por konigi ilin en la organo de la Turing-Klubo. Adreso: Pola Turing-Klubo, Esperanta Sekcio, redaktoro Antoni Pisarski, strato Kredytowa 5, Warszawa.

Sur la lasta paĝo:
informoj pri la
Libro-Loterio de La Praktiko.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respondmarkon.

M. M. en P. (Ĉeĥosl.). — La ĝusta vorto estas ne „pensiigita" aŭ „pensiumita", sed: „pensiita". La bazaj vortoj estas: pensio kaj pensii.

S-ro A. de V. en D. (Ned.). — Vi gajnis la veton, ĉar en la frazo: „Vendrede okazis la kunveno kaj en la postsekvinta ĵaŭdo estis la unua leciono", la vorto „postsekvinta" estas ĝusta. Vi bone klarigis: „kiu sekvis = sekvinta". Simile ni diras: „En la pasinta jaro la rikolto estis malbona". Estas eraro kompari la supran frazon kun la jena: „En la agrabla kongreso la prezidanto faris belan paroladon". Ĉi tie ni ne povas diri: „prezidinto". La klarigo estas, ke en ĉi tiu frazo ni kunrilatigas la tempojn. Jen: „en la kongreso parolis persono, kies prezidado estis samtempa (anta!) kun la kongreso". La ŝlosilo de ĉi tiu ŝajne malfacila problemo estas la jena: Via unua frazo ne estas unu frazo, sed du frazoj: „Vendrede okazis la kunveno. En la sekvinta ĵaŭdo estis la leciono". Analoge la dua frazo: „La kongreso estis agrabla. Post la kongreso la prezidinto vizitis sian bopatrinon". Sed se el la unua frazo ni faras unu frazon, en ĝi la tempoj kunrilatiĝos kaj ni ricevos la jenan rezultaton: „Vendrede en la kunveno oni decidis, ke la unua leciono okazu en la postsekvonta ĵaŭdo".

S-ro W. M. en W. (Aŭstrio). — Ni dankas pro viaj interesaj informoj pri tiu altvalora movado: kulturi fontojn por forpuŝi per la bona akvo la malutilan alkoholon. La poemeton, kiun vi dediĉis okaze de la inaŭguro de la „Parsifal-puto", ni volonte publikigas ĉi tie, por ĝojigi niajn legantojn kaj instigi ilin sekvi vian bonan ekzemplon.

La akvo bona estas;
Ni ĝin hodiaŭ festas
En bela Di-natur'
Per inda inaŭgur'
De nova put' arbara
Kun guto freŝa, klara,
Al migrantar' serena
Trinkaĵo plej bonvena.

Kune kun vi ni esperas, ke la baldaŭ konstruota nova puto havos la nomon: Esperanto-puto. Bondezirojn por viaj klopodoj.

S-ro F. B. en L. (Sved.). — 1. „Kiel feliĉa mi ne estis tiam!" Vi estas prava, oni devas forlasi la vorton „ne". — 2. Tre multaj personoj plendas al ni, ke ili ne komprenas la vorton „maljam". Tio klare montras, ke ĝi ne meritas esti uzata. Be rinde ankaŭ ni ne povas ĝin klarigi al vi. Vic la tutan tekston vi espereble eltrovos, kiun b Esp-an vorton ĝi klopodis anstataŭi.

S-ro S. R. en B. — Via poemo en prozo lerte skribita, sed ĝi ne estas sufiĉe matura po blikigo en La Praktiko.

F-ino A. J. de H. en H. (Ned.). — p adresado bonvolu legi nian respondon al s-ro W. en H., en la 23-a numero de La Praktiko.

S-ro R. P. en M. (Franc.). — „Li direkt okulojn ekster la ĉambron." En ĉi tiu frazo la zativo estas tute korekte uzata. Li direktis la lojn. Kien? Al (la loko, kiu estas) ekster la bro. Faru la kontrolon per la demandoj: Kie ekster la ĉambro. Kien? — ekster la ĉambro

S-ro G. P. en O. — Jes, la vorto „kliko" sig rondon kuntenatan de interesoj, kaj ĝi havas bonan, fian sencon, do: figrupo, firondo.

LIBRO-LOTERIO!

Informoj sur la lasta paĝo.

KONKURSOJ

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

GENERALAJ REGULOJ:

1. *En la konkursoj rajtas partopreni ĉiu, ankaŭ ne-abonantoj.*
2. *Ĉiun solvon oni devas sendi sur aparta papero aŭ poŝtkarto.*
3. *Ĉe ĉiu solvo oni devas alglui la koncernan konkurs-kuponon.*
4. *Al la solvo oni devas aldoni sur la sama papero la precizan nomon kaj adreson de la solvinto, per tre klara skribo.*
5. *Ni rekomendas, ke pluraj personoj sendu siajn solvojn kune en unu koverto, por ŝpari poŝtkostojn. Adreso: LA PRAKTIKO, Rijouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando.*
6. *La nomoj de tiuj personoj, kiuj ricevis premiojn, aperos en LA PRAKTIKO. La premioj konsistas el libroj kaj aliaj Esperantaĵoj, sendotaj afrankite al la gajnintoj.*

85-a konkurso.

TASKO POR KONSTRUISTOJ.

La amerika riĉegulo s-ro Dik Monsak intencas konstruigi por si novan domon. Ĉar li havas multan monon, li povas plenumi ĉiujn siajn kapricojn. Li invitis la faman arkitekton, nian samideanon P. Brikar kaj klarigis al li siajn postulojn pri la konstruota domo:

1. La bazo de la domo devas esti regula geometria kvadrato.
2. Sur ĉiuj kvar flankoj de la domo devas esti fenestroj.
3. Ĉiuj fenestroj devas rigardi al sudo.

S-ro Brikar estas tre malfeliĉa, ĉar li ne povas plenumi ĉiujn tiujn kondiĉojn kaj tial li ne povas ricevi tiun bonege pagotan laboron. Sed li havas bonan ideon: li petas la legantojn de La Praktiko, ke ili bonvolu solvi por li la malfacilan problemon.

Ni disdonos 6 premiojn al tiuj, kiuj ensendas la ĝustan solvon de la problemo. En la konkurso partopreni rajtas ĉiu, ne nur konstruistoj kaj inĝenieroj. Tiu, kiu ne komprenas la konstruistan arton, rajtas peti konsilon de konstruistoj. Solvojn ni akceptas ĝis la fino de Marto.

Bonvolu atente plenumi la konkursajn regulojn!

86-a konkurso.



Rigardu la kvar bildetojn! Ili prezentas la strangan aver turon de nia vojaĝema samideano Paŭlo Kalva.

La konkursa tasko estas: Bonvolu mallonge, sed elegan kaj sprite prikanti en versoj la aventuron de s-ro Kalva. I maksimuma longeco de la solvo estas: kvar kvarliniaj strofo Pli longaj solvoj ne estos konsiderataj. Ĉe la juĝo oni kor sideros ne nur la lingvan ĝustecon, sed ankaŭ la mallongecc kaj spritecon.

Se vi ne havas sufiĉan kuraĝon al versfarado, vi trova bonan helpanton en la grava libro: „Parnasa Gvidlibro (Ki fariĝi poeto?)", verkita de Kalocsay kaj Waringhien. T libro entenas ne nur instruon pri versfarado, sed ankaŭ rin vortaron.

Per 6 premioj ni rekompencos la ensendintojn de la plej bonaj solv Ni akceptas solvojn ĝis la fino de Marto.

Bonvolu plenumi la konkursajn regulojn!

Kupono por la 85-a konkurso	Kupono por la 86-a konkurso

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj al la redakcio.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —.45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson **senpage** unufoje en la jaro.

GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. — *La redakcio.*

ŜLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro
s-ino = sinjorino
f-ino = fraŭlino
dez. = deziras
koresp. = korespondi
interŝ. = interŝanĝi
L = letero
PK = poŝtkarto
PI = poŝtkarto ilustrita
PM = poŝtmarko
bfl. = la poŝtmarkon gluu sur la bildan flankon
k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

ANGLUJO

Leigh-on-Sea (Essex). — F-ino *M. E. Smith,* 44 Nelson Road. — Dez. kor. k.ĉ.l.

Southend-on-Sea (Essex). — F-ino *Doris Back,* oficistino kaj skoltina kapitanino, 21 Moseley Street. — Dez. kor. kun skolt(in)oj en ĉ.l.

Southend-on-Sea (Essex). — F-ino *Rosalind Watts,* 40 Harcourt Avenue. — Dez. kor. kun ĉino.

AŬSTRIO

Klagenfurt (Kärnten). — S-ro *Josef Lebmacher.* — L, PK, k.ĉ.l. (ne kun germanlingvanoj). Respondo garantiata.

Salzburg. — D-ro *Franz Christanell,* Post Parsch, serĉas por vi taŭgan korespondanton inter siaj multaj lernintoj.

BULGARUJO

Gara Gorna Orehovica. — S-ro *D-ro Mihail Muleškov,* 29-jara fraŭlo. — L, PI, kun latinlingvaj, germanaj landoj kaj Japanujo. P.ĉ.t. Nepre respondos almenaŭ unufoje.

Ruse. — S-ro *Atanas Krastev,* strato 6 Septemvri 17. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. PM.

Ruse. — S-ro *Angel Slavov,* strato Klementina 28. — K.ĉ.l., p.ĉ.t., PM.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Brno 16. — S-ro *Štěpán Zákravsky,* 19-jara studento, E. Voračické 20. — PM, PK, L, k.ĉ.l. Certe respondos.

FRANCUJO.

Bois-Colombes (Seine). — S-ro *Ernest Delava,* 27-jara laboristo, 3 rue Faidherbe. — L, PI, k.ĉ.l. Certe respondos.

Dunkerque. — 50 gelernantoj el la publika kurso de ges-roj Caubel dez. kor. k.ĉ.l. — Adreso: *Ges-roj Caubel,* 64 avenue About, en Malo-les-Bains (Nord), Francujo.

Hautmont (Nord). — *Esperantista Grupo,* 7 rue du Clos. — 50 gelernantoj de Esp-kurso (5 geinstruistoj, 2 poŝtoficistinoj, oficistoj, laboristoj k.t.p.) certe respondos. PI bfl., k.ĉ.l.,, p.ĉ.t.

Malo-les-Bains (Nord). — S-ino *Caubel,* profesorino, 64 avenue About. — K.ĉ.l. pri kuir-receptoj.

HUNGARUJO

Debrecen. — S-ro *Jozefo S. Takács,* 21-jara studento, Kut-u. 33. — Dez. kor. kun gefraŭloj kaj interŝ. PM kun tuta Eŭropo. Sendu unue. Respondos nur al poŝtmark-kolektantoj.

Rákosszentmihály. — S-ro *Teodoro Kovács.* — Dez. kor. pri la parenceco de la finno-ugraj kaj ural-altajaj popoloj, pri turismo, folkloro, fervojaj aferoj, fremdultrafiko, cigana kaj aliaj lingvoj; dez. ricevi reklam-afiŝojn pri fremdultrafiko kaj montregionoj, presaĵojn pri urboj kaj regionoj.

JAPANUJO

Osaka. — S-ro *Hara-Sozo, 19-jara* komizo en fabriko de vakuaj boteloj, 36 Nibanĉo, Kitahorie, Nišiku. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Neniam skribas al filatelistoj. Certe respondos.

LITOVUJO

N. Radviliškis. — S-ro Klr. *J. Kazlauskas,* katolika teologia studento en pastra seminario. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe kun Aŭstralio, Japanujo, Hindujo, Afriko. Certe respondos.

NEDERLANDO.

Goes (Zeeland). — F-ino *E. M. Westplate,* telefonistino, poŝtoficejo. — PI k.ĉ.l.

Utrecht. — S-ro *H. K. Rosema,* Hyacinthstraat 43. — Serĉas por 12 junuloj (14-16-jaraj) korespondajn geamikojn en la tuta mondo. Certa respondo garantiata ĝis la 1-a de Marto.

Wormerveer. — S-ro *C. Teer,* Bleekerstraat 29. — Interŝ. PI k.ĉ.l. Certe respondos.

POLUJO

Radom. — S-ro *Józef Duljas,* Sienkiewicza 5. — Dez. kor., interŝ. PK kaj gazetojn kun seriozaj Esp-istoj de Ĉinujo, Aŭstralio, Hindujo, Novzelando, Usono kaj Rusujo. Certe respondos al ĉiu.

Radom. — S-ro *Bogumil Górski,* Mleczna 49. — L, PK, k.ĉ.l. PM laŭ Yvert 1934.

Wilno. — S-ro *Abramo Suckewer,* 20-jara fraŭlo, str. Wilkomirska 14/11. — Dez. kor. pri literaturaj kaj politikaj temoj k.ĉ.l., precipe kun Hindujo, Japanujo kaj Sovjetunio. Certe respondos.

SOVJET-UNIO

Omutninsk (Gorjkovskogo kraja). — S-ro *G. M. Dehterev,* 29-jara oficisto, Poŝtkesto 7. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. per Intersteno. Aparta temo: lingvoj, precipe slavaj.

SVEDUJO

Kumla. — S-ro *Gösta Andersson,* 24-jara ŝu-laboristo, Box 500. — P.ĉ.t.

Kumla. — S-ro *Tage Broström,* 22-jara ŝu-laboristo, Box 500. — P.ĉ.t.

Vingåker. — S-ro *Evert Johansson,* 26-jara terkulturisto, Lundbyskog, N.K. — L, PI kun vere interesitaj geesp-istoj ĉ.l., p.ĉ.t., sed ne pri politiko. Absolute certe respondos.

USONO

Culver City (Kalifornio). — S-ro *Gerold Baggett,* 18-jara lernanto, 4134 Irving Place. — L, PI, kun Germanujo kaj Rusujo pri la nunaj registaroj, pri muziko kun Hungarujo kaj Latvujo.

Tralegu la lastan paĝon!

LIBROJ VERE AĈETINDAJ:

BELA JOE. Marshall Saunders (Blaikie & Hohlov)
Bona kaj interesa rakonto pri hundo, kun multaj ilustraĵoj.
Broŝurita 2 ŝ 6 p., bind. 3 ŝ 6 p., afranko 4 p.

LUNO DE IZRAEL. Sir H. Rider Haggard (Payson & Butler)
Leginda romano pri antikva Egiptujo.
Broŝ. 3 ŝ 6 p., bind. 5 ŝ., afranko 4 p.

LA DORMANTO VEKIĜAS. H. G. Wells (A. F. Milward)
Ekvido en la estonteco.
Broŝ. 3 ŝ 6 p., bind. 5 ŝ., afranko 4 p.

PINOKJO. C. Collodi (M. Marchesi)
Amuza por plenaĝuloj kaj junuloj. Ilustrita.
Broŝ. 3 ŝ 6 p., bind. 5 ŝ., afranko 4 p.

ESPERANTO POR INFANOJ. G. G. Solomon
Unua legolibro por infanoj ĉiuaĝaj. Bone ilustrita kaj amuza.
Fortika broŝ. 1 ŝ 6 p., afranko 2 p.

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO
142 High Holborn, London, W.C. 1.
Anglujo.

La LIBRO-LOTERIO de LA PRAKTIKO

2000 premioj. — Per unu loto oni povas gajni du premiojn. — Unu loto kostas nur 10 cendojn. — Rapide mendu viajn lotojn!

La Loteria Komitato de La Praktiko fiksis ĉiujn detalojn de la LIBRO-LOTERIO kaj invitas la legantojn al rapida aĉetado de la lotoj, por ke la tirado povu okazi kiel eble plej baldaŭ.

Estos dislotataj 2000 premioj, kiuj apartenas al du grupoj: En la **unua premio-grupo** estas 1000 libroj, inter kiuj estas preskaŭ ĉiuj nuntempe haveblaj gravaj Esperanto-libroj. La listo de la premioj estas publikigata en La Praktiko. La premioj mem estas ekspoziciitaj en la administrejo de La Praktiko (Hago, Riouwstraat 172).

La **dua premio-grupo** konsistas el 1000 simplaj premioj, t.n. „konsolaj" premioj, kies valoro tamen superas la prezon de unu loto.

Estas eldonitaj 10,000 lotoj kaj **la prezo de unu loto estas: nur 10 cendoj, t.e. malpli ol la afranko de unu simpla letero al eksterlando.** KIU AĈETAS DEK LOTOJN, RICEVAS UNU LOTON SENPAGE, do **per unu guldeno oni povas aĉeti 11 lotojn.**

Mendante lotojn oni **bonvolu aldoni leterafrankon** por la sendo de la lotoj (en Nederlando 6 cendojn, en aliaj landoj unu respondkuponon aŭ 15 cendojn). Se oni volas ŝpari tiun afrankon kaj eviti perdiĝon de la lotoj ĉe la poŝto, nia Loteria Komitato estas preta gardi la lotojn en aparta koverto, kaj en La Praktiko sciigi la numerojn al la aĉetintoj.

La tirado okazos publike en la administrejo de La Praktiko, tuj post la disvendo de ĉiuj lotoj, sed ne antaŭ la fino de Februaro 1934. La rezulto de la tirado estos publikigata en La Praktiko. La premioj estos dissendataj afrankite.

Kiel okazos la tirado?

El la tamburo, kiu entenas la 10,000 numerojn de la lotoj, oni eltiros 1000 numerojn kaj tiuj numeroj gajnos laŭvice la mil premiojn de la unua premio-grupo. Post tio el alia vazo, kiu entenas nur la ciferojn de 0 ĝis 9, oni eltiros unu ciferon, kaj ĉiu loto, kies numero finiĝas kun la eltirita cifero, gajnas unu premion de la dua premio-grupo.

Tia sistemo de la tirado ebligas, ke:

1-e: **per unu loto oni povas gajni du premiojn.** Ekzemple la posedanto de la loto n-ro 3856 povas gajni unu grandan premion kaj ankaŭ unu premieton, se el la vazo oni tiris la ciferon „6";

2-e: **kiu aĉetis dek lotojn kun sinsekvaj numeroj, havas la absolutan certecon gajni unu premieton.**

Mendu kaj vendu la lotojn, por ke la tirado baldaŭ okazu!

LA LISTO DE LA PREMIOJ:

1 **Originala Verkaro de Zamenhof.** Kompilis D-ro J. Dietterle. En luksa bindaĵo.
2 **Bibliografio de Internacia Lingvo.** Historia sistema katalogo de filologia, lingvistika kaj poliglota literaturo, pri universala alfabeto, filozofia gramatiko, signaro, gestlingvo, pasigrafio, internacia helpa lingvo kaj logistiko. Kompilis Petro Stojan. 560 paĝoj. Bele bindita.
3 **La Sankta Biblio.** Tradukita de D-ro L. Zamenhof. Plej luksa eldono, en ledo bindo kun ŝirmklapoj kaj ora tranĉo.
4 **Hungara Antologio.** Trad. de K. Kalocsay k.t.p. 470 paĝoj. Bindita.
5 Benson: **Universala Esperanto-Metodo.** La granda verko de D-ro Benson en Ameriko. Kurso, krestomatio kaj vortaro. Kun 11,000 bildoj. 560 paĝoj. Bele bindita.
6 **La Kurso de Andreo Cseh.** La stenografita kaj poste multobligita teksto de unu tuta kurso. Kun enkonduko, klarigoj pri la metodo, konsiloj al kursgvidantoj, aldonoj. En eleganta kartona ujo.
7 **La Sankta Biblio.** Luksa eldono. Bindita en malhelruĝa ledo.
8 **Per Balono al la Poluso.** La fama libro pri Andrée kaj liaj kamaradoj. Bele bindita.
9 Papini: **Historio de Kristo.** 580 paĝoj.
10 **Eterna Bukedo.** Poemoj tradukitaj de K. Kalocsay el 22 lingvoj. Lukse bindita.
11 **Fundamenta Krestomatio.** Bindita.
12 **La Pentroarto en la malnova Hungarujo.** Kun 96 ilustraĵoj. Lukse bindita.
13 **En okcidento nenio nova.** La fama libro de Remarque.
14 Dante: **La Infero.** En majstra traduko de K. Kalocsay.
15 Privat: **Historio de Esperanto. Unua kaj dua partoj.** Du lukse binditaj libroj.
16 **Poliglota Vademecum de la internacia Farmacio.** Granda libro, bindita.
17 **Aŭstralio.** Lando kaj popolo. Kun 31 ilustraĵoj kaj unu landkarto. En luksa tolbindaĵo.
18 **La Vojo Returne.** La dua verko de Remarque. Bele bindita.
19 **Fabiola.** La fama romano de kardinalo Wiseman pri la katakomboj.
20 **Stranga Heredaĵo.** Originala Esperanta romano de Luyken. Bindita.
21 **Pri l' Moderna Arto.** Verkis Grenkamp kaj Brzekowski. Kun 64 tutpaĝaj ilustraĵoj. Bindita.
22 **Luno de Izrael.** Romano de Sir H. R. Haggard. Bindita.
23 **Hura!** Romano originale verkita en Esp. de Julio Baghy. Duontole bindita.
24 **Preter la Vivo.** Poemaro de Julio Baghy. Bindita.
25 Privat: **Vivo de Zamenhof.** Bindita.
26 **Hamleto.** Dramo de Shakespeare. Tradukis D-ro Zamenhof.
27 **Bela Joe.** Ĉarma romano pri hundo. Verkis Marshall Saunders. Bindita.
28 Arišima: **Deklaracio.** Romano. El la japana lingvo tradukis T. Tooguu.
29 **La Tragedio de la Homo.** La fama ĉefverko de la hungara literaturo. Verkis E. Madách, tradukis K. Kalocsay.
30 Vondel: **Gysbreght van Aemstel.** Tragedio. Tradukis J. R. G. Isbrücker. Bindita.
31 **Rumana Bonhumoro.** Trad. de Firu kaj Pragano. Bindita.
32 Privat: **Esprimo de sentoj en Esperanto.** Bindita.
33 **La Nova Testamento.** Lukse bindita.
34 Drezen: **Historio de la mondlingvo.** Plena historio de la mondlingva ideo kaj konigo de la kelkcent artefaritaj lingvoj. Bindita.
35 **La Psalmaro.** Trad. D-ro Zamenhof.
36 **Preter la Vivo.** Poemaro de Baghy. Bindita.
37 **La Venecia Komercisto.** Dramo de Shakespeare.
38 **La Malŝparulo.** Teatraĵo de F. Raimund, en tri aktoj.
39 **Sonorilo kaj kanono.** Poemoj en prozo de Emil Isac. El la rumana lingvo tradukis T. Morariu.
40 Drezen: **Analiza historio de la Esperanto-movado.**
41 An-ski: **Dibuk.** Fama juda teatraĵo. El la juda lingvo tradukis I. Lejzerowicz.
42 **Vienaj Legendoj.** Kolektitaj de A. Mair. Kun bildoj.
43 **Jaĉjo Holm kaj liaj amikoj.** La fama junulara rakonto de W. G. van de Hulst. El la ned. lingvo tradukis H. C. van Leeuwen. 236 paĝoj. Lukse bindita.

Daŭrigota

GARDATAJ LOTOJ.

La administrejo de La Praktiko gardas la jenajn lotojn *(post la nomo de la aĉetinto estas la numeroj de la gardataj lotoj)*: E. Andersson-Heby 474-480, Avsec 1171-1181, Beaumel 1102-1112, Bichsel 1097-1101, v. Büüren 1203-1213, Čipera 1135-1145, v. Diest 1214-1224, „Ekaro" 1241-1245, Friberg 1184-1193, den Hollander 1113-1123, Inselmann 1162-1167, Kimmel 1091-1096, de Lang 1246-1256, Linder 1225-1235, Mušalik 1088-1090, Pollak 1157-1161, Prince 1182-1183, Putto 1236-1240, Rygg 1194-1197, Smeehuysen 1124-1134, Valaštan 1198-1202, Vana 1168-1170, Walli 1146-1156.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 2 (26)

★

Februaro
1934

Leono Zamenhof.

Nova kruela bato trafis la Zamenhofan familion, kaj kune kun ĝi la tutmondan Esperantistaron. Ĵus, antaŭ du monatoj mortis Felikso Zamenhof, kaj jam sekvas lin la alia frato de nia Majstro, D-ro Leono Zamenhof. Kun li forlasis nin la lasta frato de D-ro Ludoviko Zamenhof, aŭtoro de Esperanto.

D-ro Leono Zamenhof estis kuracisto en Varŝavo. Same kiel lia frato Felikso, ankaŭ li estis fervora adepto kaj helpanto de la glora frato Ludoviko Lazaro. Jam en la frua tempo de Esperanto li ellernis la novan lingvon kaj diligente laboris por ĝia disvastigado. Literaturistan kaj poetan talenton li havis simile al siaj du fratoj. Li tradukis el la pola lingvo plurajn verkojn de Swietochowski, Reymont kaj Wyspianski. Krom tio li verkis en Esperanto multajn originalajn poemojn, kiuj aperis en diversaj Esperantaj gazetoj. Kiel majstra uzanto de nia lingvo, li estis elektita ankaŭ kiel membro de la Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio.

Laŭ informoj ricevitaj de la Pola Telegrafa Agentejo, D-ro Leono Zamenhof mortis la 7-an de Februaro matene je la 5-a horo, pro brusta angino (angina pectoris). Jam du tagojn antaŭe li sentis malbonfarton, kiel kuracisto ekkonis la malsanon kaj antaŭvidis la baldaŭan morton. Post unutaga kuŝado alvenis la fatala kor-atako. Kelkaj urĝe alvokitaj kuracistoj, inter kiuj ankaŭ lia nevino, D-rino Zofja Zamenhof, filino de nia majstro, estis senkonsilaj. Pli ol cent injekcioj restis vanaj, la terura malsano venkis la 58-jaran, ankoraŭ fortan viron.

La enterigo okazis la 9-an de Februaro. Ĉe la ĉerko parolis reprezentantoj de multaj societoj. En la nomo de la Esperantistaro adiaŭis lin s-roj Strelczyk, Uziemblo, Wiesenfeld kaj D-rino Muszkatblatt.

La redakcio de La Praktiko esprimas al la dolore frapita Zamenhofa familio, precipe al la vidvino, kiu jam de ok semajnoj estas malsana, kaj al la funebrantaj filinoj Irena kaj Wanda, sinceran kondolencon.

La ŝatataj anoj de la kara Zamenhofa familio trovu konsolon en la profunda simpatio de la tutmonda Esperantistaro, kiu kun respekto honoras la mortintajn kaj kun frateco amas la vivantajn.

La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 2.50 nederl. guldenoj, por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Unu numero kostas -.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., ½ p. 45.-, ¼ p. 25.-, ⅛ p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE NIAJ KONKURSO

72-a konkurso. En la espero heredi grandan riĉaĵon de la onklo de nia abonanto s-ro J. P. H. en Alkmaar, precize 200 legantoj de La Praktiko faris la penon solvi la sekretan skribon. Sed la rezulto estas por ni ĉiuj: por s-ro J. P. K., por nia redakcio kaj por la solvintoj mem, tre malfeliĉiga. La sekrete skribita teksto sonas kruele: **Mi estas nur ŝajne riĉa. Mia sola posedaĵo estas ĉi tiu sekreta skribo. Nun vi estas mia heredanto.** La ŝlosiloj estis: 6 + 6 = 12; 16 + 6 = 22; 18 — 4 = 14; 5 + 5 = 10 kaj 7 — 3 = 4.

Unu el la solvintoj, s-ro H. K. Rosema el Utrecht (Nederlando), en la sekvantaj versoj esprimis sian ĉagrenon kaj koleron:

Dormadu en tomb' maltrankvile
La onklo mokinta tre malĝentile!
Jen mia sincera deziro
Pro tia kruela satiro.

Karaj solvintoj! Kion ni faru nun? Kiel ni dividu tiun „strangan heredaĵon"? Ni konsolu nin reciproke per la komuneco de niaj sortoj kaj ni esperu, ke dum la vivo ni renkontos ankoraŭ pli riĉajn kaj malpli ruzajn onklojn.

Se ni jam perdis la heredaĵon, restu almenaŭ la gloro, kiun la solvintoj plene meritas, ĉar ili faris tre lertan laboron, deĉifrante la malfacilan skribaĵon. Por honorigi ilin, ĉi tie ni publikigas iliajn nomojn:

O. **Ackerman** en Eindhoven, K. **Adamek** en Záblati, R. **Adamus** en Bohumin, A. **Akerstedt** en Skönsberg, s-ino M. **Alders-Backers** en Haarlem, H. kaj W. **Altehage** en Vlotho, M. **Anderlohr** en Frammersbach, f-ino J. **Artigaud** en Limoges, P. **Askehagen** en Hedmark, F. **Bergquist** en Lärje, s-ino A. **Bergsma** en Hago, f-ino E. **Bersin** en Riga, H. **Beucherie** en Parizo, E. **Bijald** en Bydgoszcz, W. **Bledsoe** en Seattle, A. **Bloemendal** en Deventer, H. **Bobbiesi** en Buenos-Aires, J. **Bogaard** en Terneuzen, f-ino J. W. v. d. **Bold** en Doesburg, M. H. **Boon** en Treebeek, f-ino R. **Bouman** en Lunteren, f-ino E. **Bowier** en Arnhem, L. **Brans** en Zijtaart, E. **Brenner** en Riga, P. **Brügger** en Bern, E. v. d. **Burgh** en Leiden, F. **Canonne** en La Sentinelle, A. **Carlin** en Trollenäs, A. **Cheminais** en Hautmont, M. **Cornet** en Tegelen, S. **Csató** en Budapest, f-ino S. **Cipera** en Pilsen, f-ino V. **Dejdarová** en Police, M. **Dewaele** en Coudekerque-Branche, G. C. v. **Diest** en Hago, B. **Dijk** en Hago, C. v. **Dijk** en Dordrecht, J. v. **Dijk** en Rotterdam, K. **Dokter** en Groningen, H. **Dresselhaus** en Rieste, A. **Droste** en Hillegersberg, L. **Ducornet** en Neuf-Mesnil, V. **Dudulad** en Moskvo, f-ino M. **Due** en Oslo, W. **Emeis** en Rotterdam, **Esperanto-Grupo „Zamenhof"** en Warnsdorf, f-ino H. **Ezopówna** en Bydgoszcz, W. **Feenstra** en Assen, s-ino E. **Feigenbutz** en Karlsruhe, G. **Ferreira** en Leomil, G. **Finkel** en Poschiavo, K. **Franz** en Wels, P. **George** en Zainvillers, A. **Gerasimov** en Filipovo, S. **Gjarde** en Trondheim, B. **Gluchowski** en Varŝavo, W. **Gostynski** en Krakovo, C. **Govers** en Den Helder, f-ino M. v. d. **Graaf** en Dordrecht, H. **Grabe** en Vlotho, V. A. **Griffeth** en Seattle, f-ino S. **Grönloh** en Leiden, s-ino A. v. **Haeften-Maier** en Rijswijk, G. ten **Hagen** en Borne, C. **Hamel** en H.-I.-Ambacht, **Helmonda Esperanto-Grupeto**, G. v. d. **Heyden** en Breda, f-ino F. **Hoestra** en Deventer, s-ino M. **Hoestra** en Hago, s-ino J. **Holleman v. Iterson** en Zutphen, A. kaj G. **Höner** en Bonneberg, A. C. v. **Ingen** en Rotterdam, f-ino Y. **Jakob** en Ĝenevo, s-ino M. **Jakubcová** en D.-Lhota, H. **James** en Bournville, R. **Jansma** en Grouw, R. **Johansen** en Trondheim, G. de **Jong** en Huizum, M. **Kaaij** en Haarlem, H. **Kaiser** en Köln-Ehrenfeld, G. O. **Karlsson** en Stehag, W. G. **Kellaway** en Gosforth, f-ino M. **Klaassen** en Rotterdam, E. A. **Koot** en Utrecht, s-ino N. **Koudijs-Modoo** en Utrecht, L. **Kökény** en Budapest, L. **Krisl** en Lom-Bruch, F. **Kupferberg** en Vlotho, A. **Lechelle** en Valenciennes, R. **Léger** en Les-Andelys, M. **Leis** en Burghausen, Lexa en Palaiseau, A. **Lienhardt** en Montigny-lès-Metz, C. J. S. v. d. **Linden** en Hago, D. E. **Lissauer** en Amsterdam, f-ino F. **Lörtscher** en Herisau, J. **Luze** en Ofenbach, L. **Maas** en Rotterdam, S. **Maljacki** en Riga, L. **Martensen** en Hamburg, A. **Marzahn** en Bleyerheide, J. v. d. **Meer** en Hago, K. **Meinel** en Ellefeld, K. **Mejers** en Usma, G. **Moerman** en Hago, f-ino J. **Mol** en Alkmaar, K. **Möller** en Sdr. Vissing, J. v. **Mourik** en Batavia, A. **Mucha** en Szopienice, D. **Nagy** en Satu-Mare, K. **Nagy** en Debrecen, Ŝ. **Nakamura** en Kumamoto, H. **Nederland** en Tömmerup, W. **Neuhaus** en Köln, **„Nia Idealo"** en Edegem, f-ino J. **Niegeman** en Baarn, f-ino A. **Nieuwenhuys** en Hago, B. **Nordstrand** en Trondhjem, B. **Noveljić** en Knin, W. **Oesterle** en Berlin, L. **Ollivaud** en Nice, L. **Orzel** en Varŝavo, A. **Paparel** en Fontenay, G. **Papaud** en Orléans, J. **Patalong** en Bydgoszcz, E. **Pedersen** en Jyderup, H. **Pedersen-Prag** en Hamar, K. **Pense** en Berlin, C. **Pereira** en Ponte-da-Pedra, R. **Perthold** en St.-Joachimstal, P. **Philippet** en Paris, s-ino J. H. **Poots** en Dordrecht, D-ro S. **Pop** en Lozna, R. **Prince** en Maubeuge, P. **Princis** en Usma, M. **Pujo** en Berson, A. **Quispel** en Rotterdam, f-ino N. **Rademaker** en Leiden, J. **Rambousek** en Ceske-Budějovice, W. v. **Ratingen** en Neer, J. **Régulo** en Santa-Cruz-de-la-Palma, f-ino A. **Reiter** en Brzezany, J. **Repil** en Sambodja, P. **Reutelingsperger** en Arcen, f-ino L. **Roch** en Bern, L. **Rodo** en Paris, P. **Rondeleux** en Nantes, H. **Rosema** en Utrecht, R. **Sakakihara** en Ucunomija, f-ino C. **Scheffelaar** en Hago, K. **Schreyver** en Chelmno, P. **Schwerin** en Berlin, L. **Sijtsma** en Hilversum, H. **Sijtstra** en Vriezenveen, B. **Skaftfell** en Reykjavik, H. **Smie** en Leipzig, J. J. **Smit** en Voorschoten, E. L. **Southwick** en Braintree, J. **Soyeur** en Seraing, G. **Spaan** en Nijmegen, A .v. d. **Starre** en Ymuiden, D. **Stegeman** en Arnhem, s-ino E. **Steup** en Hago, W. **Stockhausen** en Krefeld, O. **Stören** en Nötterö, **Ŝabtaj** en Malakoff, f-ino **Ŝindo-miĉiko** en Sumijoŝi-tantakabajaŝi, V. F. **Ŝirjaev** en Moskvo, M. **Ŝmerling** en Moskvo, F. **Taraba** en Ráječko, V. **Tartlan** en Valga, M. **Thibault** en Revin, G. **Thomson** en South-Pasadena, T. **Thorbjarnarson** en Reykjavik, s-ino E. **Tilstra-Rohdens** en Leeuwarden, P. **Toop** en Leisi, R. **Tsuji** en Osaka, M. **Tveit** en Hamar, G. **Unger** en Göteborg, K. **Unt** en Viljandi, f-ino M. **Valk** en Hago, J. **Vallé** en Isso E. **Vana** en Kleinkahn, s-ino W. de **Virieu-Gerdès** en Saint-Raphaël, C. v. **Voorthuysen** en Leiden, S. **Wabra** en Görkau, J. **Wakkee** en Ch. **Waldkötter** en Leiden, L. **Ware** en East-Orange, S. **Wellens** en Fr. **Werenfride** en Arnhem, M. **Wiersma** en Zwolle, f-ino S. **Wijers** en H. **Winterberg** en Vlotho, H. H. **Winterberg** en Vlotho, f-ino S. **Wit** Neu-Oderberg, F. **Witschi** en Biel, G. **Yben** en Hengelo, S. **Ysselst** Schiedam, P. **Zeegelaar** en Hago.

73-a konkurso. La redakcio ricevis de 102 personoj la s de ĉi tiu praktika problemo. Sed el la 10 35 personoj solvis ĝin ĝuste. Tio montras, ke la problemo ne estas tiel s kiel ĝi ŝajnas esti je la unua vido. La 33 personoj ensendis du div solvojn. Laŭ ambaŭ solvoj la transpaso de la rivero postulas 11 ve de la boato inter la du bordoj. Jen la unua solvo:

1-a	veturo:	Transiras 1 sinjoro kaj 1 servisto
2-a	„	Revenas 1 sinjoro
3-a	„	Transiras 2 servistoj
4-a	„	Revenas 1 servisto
5-a	„	Transiras 2 sinjoroj
6-a	„	Revenas 1 sinjoro kaj 1 servisto
7-a	„	Transiras 2 sinjoroj
8-a	„	Revenas 1 servisto
9-a	„	Transiras 2 servistoj
10-a	„	Revenas 1 servisto
11-a	„	Transiras 2 servistoj.

La dua ĝusta solvo estas:

1-a	veturo:	Transiras 2 servistoj
2-a	„	Revenas 1 servisto
3-a	„	Transiras 2 servistoj
4-a	„	Revenas 1 servisto
5-a	„	Transiras 2 sinjoroj
6-a	„	Revenas 1 sinjoro kaj 1 servisto
7-a	„	Transiras 2 sinjoroj
8-a	„	Revenas 1 servisto
9-a	„	Transiras 2 servistoj
10-a	„	Revenas 1 servisto
11-a	„	Transiras 2 servistoj.

Trarigardante la malĝustajn solvojn ni rimarkis, ke pluraj person pensis pri tio, ke la boato devas revenadi por transporti la pluajn pers Kelkaj solvantoj opiniis, ke la problemo estas simplena: *unu servisto kiel remisto dum ĉiuj veturoj.* Sed ĉe tia aranĝo plurfoje okazos, ke ĉ bordo estos pli da servistoj ol sinjoroj. Aliaj solvantoj proponis, k *retiradu la boaton per ŝnurego.* Sed la kondiĉoj de la konkurso ne tian solvon. Kaj fine, unu persono solvis la problemon tre radikale: „ *uzu la boaton, sed ili naĝu!"*

La 5 premiojn ni dislotis inter la 35 solvintoj. La gajnintoj estas: **G. C. v. Diest** en Hago. — S-ro **W. Gostynski** en Krakovo (Poluj S-ro **H. N. Nederland** en Kalundborg (Danujo). — S-ro **E. Romas** en B Aires (Argentino). — S-ro **Th. Thorbjörnsson** en Reykjavik (Islando).

La ceteraj 30 personoj, kiuj ensendis bonan solvon, estas: **Balke** en R dam, **Bloemendal** en Deventer, **Boon** en Treebeek, **Brenners** en Riga, **Burgh** en Leiden, **Canonne** en La Sentinelle, **Ferreira** en Leomil, **Geor** Zainvillers, **Gerasimov** en Filipovo, **Gjaerde** en Trondheim, **Gluchows** Varŝavo, **Grobben** en Voorburg, **Humez** en Douai, **Johansen** en Tron **Krisl** en Lom-Bruch, **Kuipers** en Bennekom, **Ledeboer** en Amsterdam, en Rotterdam, **Mejers** en Usma, **Nordstrand** en Trondhjem, **Oesterle** en **Pedersen-Prag** en Hamar, **Skaftfell** en Reykjavik, **Spaan** en Nijmegen, **Starre** en Ymuiden, **Ŝmerling** en Moskvo, **Taylor** en Halifax, **Thiba** Revin, **Waldkötter** en Leiden, **Wiersma** en Zwolle. — Estas interese, personoj, kiuj bone solvis la problemon, estas ĉiuj senescepte viroj.

INVITO

al la Esperantistoj en Hago kaj ĉirkaŭaj urboj.

Dimanĉe, la 25-an de Februaro, matene je la 11-a horo, okaz parolado de

s-ro Aleksandro Siitam el Estonio
pri: ESTONA MUZIKO KAJ KANTFESTOJ

en la klubejo de „Fine Ĝi Venkos": Hago, Riouwstraat 172.

Enirprezo 15 cendoj.

Posttagmeze okazos ekskurso al la bela parko de Marlot. Oni pov lunĉi en la sama klubejo.

Ĉiuj Esperantistoj de Hago kaj proksimaj urboj profitu ĉi ti okazon interkonatiĝi kaj aŭdi interesan prelegon.

La estraro de „Fine Ĝi Venkos".

Vintra vespero.

Estas vintro ... konsolas min longaj vesperoj,
kiam per silente falantaj neĝeroj
sin kovras la tero.
Tuta mondo nun staras neĝblanka kaj vasta,
la verda arbar' trans la kampo, la lasta,
atendas min gasta.
Vivmizero tien trapenetri ne povas,
spiro sankta de Dio la branĉojn movas
kaj pacon alblovas.
Nur en tiu ĉi horo trankvilas la koro,
forlasas min zorgoj, ĉagreno, doloro,
ekmutas la ploro.
Jes, en tiu ĉi hor' min ĉirkaŭas moleco
kiel forgesita ridet', kiel peco
el la infaneco ...
Kaj paŝas mi plu tra la kampo vespera
kun sent' radianta de l' amo espera
en koro sincera ...
Estas vintro ... dum longaj sopiraj vesperoj
jen kovras la etaj brilantaj neĝeroj
la veon de l' tero.

Ĉi tiun poemeton tre lerte verkis f-ino Anni Taube en Riga (Latvujo). Jen frazo el ŝia letero al la redakcio: *„Nur helpe de La Praktiko kaj per la malgranda Esperanto-ŝlosilo mi ellernis dum la pasinta jaro la Esperanto-lingvon, kiun mi nun tre ŝatas."* — Ni kore gratulas al nia talenta samideanino! La redakcio.

„Pacaj batalantoj".

Ĉu mi sonĝas? Ĉu ni malantaŭen marŝis? Ĉu ni ree vivas en la jaro 1907? Ŝajnas al mi, ke jes! Sed „sonĝas" laŭ la Cseh-metodo signifas: mi vidas *fantaziajn* bildojn *dum la nokto!* Tamen la bildoj, kiujn mi vidas, estas nek fantaziaj, nek dumnoktaj, sed — bedaŭrinde — veraj kaj dumtagaj!

Kial mi demandas, ĉu ree ni troviĝas en la jaro 1907? Ĉiu Esperantisto scias, ki tiam oni surtabligis la „novan mondlingvon": Ido. Kaj ĉi tie en la urbo Fredericia, (19.000 loĝantoj) en la bela Danlando, ekestis „milito". Esperantistoj — kaj milito? Ĉu eble? Jes, milito, akra gazetara kaj publika milito inter — Idistoj kaj Esperantistoj!

En la ĵus alveninta letero de mia amiko s-ro M. Palsberg, ĉef-delegito de UEA en Danujo, mi legas la vortojn: „Estas mia opinio, ke vi venis en ĝusta tempo kaj en la ĝustan lokon, ĉar mi ja ofte diris, ke vi povas venki eĉ la indiferentulojn. Tial mi ne ploras, ĉar Fredericia ĉiam ĝis nun estis la remparo de la Idistoj, kaj ili certe volas sin defendi kontraŭ la amara morto per ĉiaj rimedoj!"

„Per ĉiaj rimedoj!" La rimedoj, uzataj de la Idistoj, vere estas abomenindaj kaj malhonestaj. Antaŭ mia publika provleciono post ĉiu artikoleto kaj anonco de la ĉi tieaj kursaranĝantoj sekvis atak-artikolo de la Idistoj kaj — anonco pri okazonta „kurso en la mondlingvo Ido (Reform-Esperanto!) Kotizo: duono de la sumo, pagota en la Esperanto-kurso." Post mia sukcesplena kaj tre bone vizitita provleciono denove atakoj de la Idistoj en la gazetaro. Publike ili kuraĝis deklari, ke ĉiuj de mi cititaj *faktoj* pri la disvastiĝo de Esperanto estas „majstroverko de troigo kaj malvero"!

Nun ankaŭ mi fariĝis batalantino. Sed tre paca mi ne plu povis resti. Eĉ nuntempe daŭras la „milito". Kaj la rezultato?

En la malgranda urbo, kie la Esperanto-movado ankoraŭ nur tre malforte enradikiĝis, mi havas 34 kursanojn! Do ni venkis!

Tamen interesa fakto, ke nun okazas en la sama ĉitiea komunuma lernejo du kursoj je la sama tago: unu kurso en Esperanto kun 34 partoprenantoj kaj unu kurso apud nia ĉambro kun 10-12 partoprenantoj en Ido. Sed certe la Idistoj poste diros: „Ho, kiaj *bruemaj* homoj estas la Esperantistoj!" Ĉar en mia kurso regas la amuzo kaj la rido, dum en la Ido-kurso estas nura „instruado".

Mi kredas, ke la ĉi tieaj Idistoj povas savi sian vivon nur, se Andreo Cseh *tuj* ellaboros novan Cseh-metodon — por Ido! Ĉar mi kredas, ke, se eble la novaj Idistoj erare ŝteliros unufoje *nian* ĉambron, ili ankaŭ restos ĉe ni!

MARGARETE SAXL.

NOVAJ LIBROJ

H. Sienkiewicz: QUO VADIS? II-a volumo. El la pola originalo tradukis f-ino Lidja Zamenhof. 270 paĝoj. En luksa tolbindaĵo. Eldonis: Populara Esperanto-Biblioteko en Amsterdam. Prezo: 2.25 guld. — Ĵus aperis la dua volumo de la mondfama historia romano, en majstra traduko de f-ino Zamenhof. La libro formas la 3-an numeron en la serio de la konata entrepreno P.E.B.

D-ro Stan. Kamaryt: FILOZOFIA VORTARO. 172 paĝoj. Eldonis: Moraviaj Esperanto-Pioniroj en Olomouc (Ĉeĥoslovakio). Prezo: 28 ĉ. kronoj. — Niaj diligentaj Esp-pioniroj en Moravio akiris novan meriton eldonante ĉi tiun valoran sciencan libron, en kiu nia eminenta ĉeĥa samideano D-ro Kamaryt kun la kompetenteco de fakulo klarigas la filozofiajn ideojn, vortojn kaj esprimojn. Ĉe ĉiu vorto estas aldonita la traduko en angla, ĉeĥa, franca kaj germana lingvoj, kaj detala Esperanto-lingva klarigo. — La plaĉe bindita libro estas aĉetebla ankaŭ ĉe La Praktiko, prezo kun sendkostoj 2.25 guld.

Bianchini: CURSUS COMPLETUS ESPERANTI. 194 paĝoj. Eldonis: A. Paolet en S. Vito al Tagliamento (Italujo). Prezo 10 liroj, tolbindita 15 liroj. — Ĵus aperinta lernolibro de Esperanto en latina lingvo. Ĝi enhavas gramatikon, ekzercaron kaj vortaron. La klera aŭtoro ĉe la vortoj kaj afiksoj aldonas abundajn etimologiajn informojn pri ilia deveno. Estas interese vidi, kiel la antikva mondlingvo servas al la disvastigado de la moderna mondlingvo, pli taŭga por la novaj tempoj. La aŭtoro mem konstatas tion en la finparolo de la libro: „Ĉar la klasika latina lingvo ne povas esprimi la nuancojn de la nova penso, mi uzis latinon plej simplan kaj proksiman al la naciaj lingvoj." — La interesa libro estas aĉetebla ankaŭ ĉe La Praktiko.

Li-Lok: RAKONTOJ PRI ESPERANTO. 48-paĝa libro, kiu en ĉina lingvo enhavas dek ĉapitrojn pri la origino kaj historio de Esperanto, kun du bildoj pri Zamenhof kaj lia familio. La libro aperis en la eldono de la Kantona Esperanto-Instituto (P.O. Box 88 en Kanton, Ĉinujo).

Stjepan Mišak: KURSA LERNOLIBRETO. 1-a volumeto. Presis kaj eldonis la aŭtoro (Ŝabaniye Mahallesi 68, Adana, Turkujo). Prezo: 25 piastroj = 2 respondkuponoj. — Kajereto en la formo de la konataj „ŝlosiloj". Ĝi entenas demandojn kaj respondojn ĉerpitajn el la Kursa Lernolibro de E. Privat kaj proverbojn tradukitajn de Zamenhof.

J. Šupichová: ESPERANTO. — Ĵus aperis en 4-a eldono la bonega lernolibro de nia senlaca ĉeĥa propagandistino f-ino Šupichová, por ĉeĥoj. La 128-paĝa kaj bonguste aspektanta libro enhavas grandan ekzercan materialon praktike aranĝitan. La libron eldonis la firmo Šolc kaj Šimaĉek en Praha.

Dr. A. Sommer-Batek: NEOGLIFOJ. — 16-paĝa broŝuro pri bildskriba sistemo. Mendebla ĉe la aŭtoro en Praha-Liboc 162 (Ĉeĥoslovakio). Prezo: 2 respondkuponoj.

LA FABELO PRI LA GRANDA TURO KAJ LA MALGRANDA DOKTORETO. N-ro 1-a de la „Biblioteko de la propagandisto". 24 paĝoj. Eldonejo de la Esperanto-Centro Rumana en Bukaresto, str. Dr. Istrate 10. Prezo: 10 svisaj centimoj. — Ĉi tiu broŝureto entenas en fabela formo la historion de Zamenhof kaj kelkajn aliajn rakontetojn, kiuj estas efike uzeblaj por propagando. La verkinto estas nia eminenta kaj senlaca pioniro s-ro Henriko Fischer-Galatz, membro de la Lingva Komitato.

Zamenhof: FUNDAMENTO DE ESPERANTO. Tradukis por ĉinoj: s-ro Li-Lok. 106 paĝoj. — La Fundamento de D-ro Zamenhof aperis en ĉina lingvo kiel 5-a numero de la Biblioteko de Kantona Esperanto-Instituto. La libro entenas la Antaŭparolon de Zamenhof, la Fundamentan Gramatikon, la Ekzercaron kaj la Universalan Vortaron.

KIO ESTAS OOMOTO? 5-a eldono. 96 paĝoj. Prezo: 1 svisa franko. Eldonejo: Oomoto Centra Oficejo en Kameoka (Kioto-hu), Japanujo. — La broŝuro entenas informojn kaj klarigojn pri la grava japana religia movado „Oomoto", kaj plurajn bildojn.

KOERSOES ESPERANTO. — Hektografita Esperanto-kurso en malaja lingvo, verkita de s-ro K. Wirjosaksono en Klaten (Ned. Hindujo). Eldonis: Orienthinduja Centra Esperanto-Organizo en Batavia.

Sur la lasta paĝo: informoj pri la Libro-Loterio de La Praktiko.

AL LA VENKO !

AL NIAJ LEGANTOJ!

Sur ĉi tiu paĝo ni regule publikigas informojn pri la gravaj progresoj de Esperanto kaj de tempo al tempo ni faros alfabetan registron pri ili, por helpi al niaj propagandistoj.

197. **Poŝtmarkoj kun Esperanto-lingva surskribo.** — La poŝtadministracio de la Sovjet-Unio jam trifoje eldonis poŝtmarkojn kun Esperanto-lingvaj vortoj. La unua serio aperis kun la portreto de la radio-inventisto Popov, la dua serio okaze de la 6-a internacia proletaria Esperanto-kongreso en 1926 kaj la tria kun la portreto de Zamenhof en 1927 okaze de la 40-jara jubileo de Esperanto. *(Vidu la bildon!)*

Sovjetlandaj poŝtmarkoj kun Esperanto-lingva surskribo. (La bildo montras la veran grandecon de la markoj.)

198. **Internacia konkurso por la junularo.** — La Junulara Komisiono de la Universala Konsilantaro por Kristana Vivo kaj Laboro kaj de la Tutmonda Ligo por Internacia Amikeco per Eklezioj organizas internacian konkurson kun la temo: „Kristo kaj la universala frateco", kun la celo plivastigi la pacan spiriton kaj internacian amikecon ĉe la junularo. La plej bonaj laboraĵoj estos premiataj per pli ol 150 monpremioj, dank' al la bonvolo de la amerika sinjorino Van Loan de Babylon. Oni akceptas laboraĵojn ankaŭ en Esperanta lingvo. La konkursan regularon oni povas ricevi senpage ĉe la sekretariejo de la Komisiono: Case Postale 46, Eaux-Vives, Genève (Svisujo).

199. **Radio-kurso de Esperanto en Finnlando.** — Je la postulo de dumil finnaj radio-aŭskultantoj la radiostacioj de la finnaj urboj Helsinki, Lahti, Oulu, Viipuri, Tampere, Turku kaj Pori komencis disaŭdigi Esperanto- kurson. La lecionoj okazas en ĉiu merkredo je la 19,15 horo, dum 25 minutoj. La unua leciono estis la 24-an de Januaro kaj la tuta kurso daŭros dum 20 semajnoj. *(Ni alvokas niajn legantojn aŭskulti la finnajn kurslecionojn kaj pri bona aŭdo sendi informon al Suomen Yleisradio en Helsinki.)*

200. **Franca radio-stacio uzas Esperanton.** — Okaze de la novjaro la direktoro kaj la oficistaro de la radiostacio de Lyon-la-Doua dissendis novjarajn bondezirojn presitajn dulingve: en franca kaj Esperanto.

201. **La ĉefurbestro de Budapest pri Esperanto.** — D-ro *Aladár Huszár*, ĉefurbestro de la hungara ĉefurbo Budapest, ĵus faris la jenan deklaron pri Esperanto: „En la nuna tempo de alte evoluinta nacia konscio neniu nacia lingvo povas fariĝi ĝenerala mondlingvo. Dum la historia evoluo ĉi lingvo akiris tiajn ecojn, kiuj kaŭzas al la fremda uzanto de la lingvo nevenkeblajn malfacilaĵojn. Pro tio la helpa lingvo esta necesa kaj altvalora."

Luksa BINDO-TABULO por La Praktiko, el bela tolo kun ora preso.

(Nova, pli bonkvalita fabrikaĵo.)

Prezo kun poŝtkostoj: 1.25 ned. guld.

Havebla por la jarkolektoj 1932 (ruĝa) kaj 1933 (verda). Ĉe la mendo oni ne forgesu aldoni, por kiu jarkolekto oni deziras la bindaĵon.

BINDITAJ JARKOLEKTOJ de LA PRAKTIKO

en la supra bindaĵo,

unu jarkolekto (1932 aŭ 1933) afrankite: 3.— guld.

SAMIDEANA TRINKKANTO.

Germana melodio. Esperanta teksto de FRANS SWAGERS.

Gamo C. Solo.

1. Por Es-pe-ran-to, Se vi klo-po-das ki-el ni, Kaj pa-ce var-bas
2. Se l'an-taŭ-ju-ĝon Mal-he-lan de la nu-na hor Per ver-da ste-lo
3. En es-ton-te-co, Se fi-ne venkos ni-a pen' Nin re-kun-i-gos

Ĉiuj.

1. Ĉi-un por ĝi:
2. Pe-las vi for:
3. Gran-da fes-ten'!

Jen mi-a ma-no, Sam-i-de-an-o;

Ĝo-ju ni, trin-ku ni je vi-a sa-no! Ĝo-ju ni, trin-ku ni

je vi-a sa-no! Ĝo-ju ni, trin-ku ni je vi-a sa-no!

Ĉi tiun ŝatatan kanton ni represis el la kanto-kolekto „KANTU NI!", eldonita de la Brita Esperantista Asocio en Londono. — La redakcio.

NOVA FENOMENA UZEBLECO DE ESPERANTO

Esperantlingva instruo nun ebligas al ĉiu **en la tuta mondo,** ludi la pianon jam post kelkaj lecionoj, kaj post duona jaro, vi eĉ povas ludi Bach, Beethoven, Chopin, k.t.p., dank' al Klavarskribo, la miriga plibonigita muzikskribo por ĉiuj instrumentoj, kaj por kanto. Preskaŭ ĉiuj muzikaĵoj estas haveblaj.

Instrua libro (28-paĝa), enhavanta multajn belajn muzikpecojn kaj ekzercaĵojn, kun Esperantlingva klariga libreto kaj katalogo, estas sendata afrankite post ricevo de 1.25 ned. guld. — Post tio ludu „Internaciaj Kantoj", 0.75 ned. guld.

Instituto KLAVARSKRIBO
en SLIKKERVEER (Nederl.)

Mendu per poŝtmandato aŭ ĝiro Nederlando 179848 — Parizo 165685 Berlino 130219.

Simpla kalkulo.

— De kiam mi edziĝis, mi vivas je duono pli malkare, ol antaŭe.

— Tiam mi konsilas al vi preni ankoraŭ unu edzinon kaj tiam vi vivos tute senpage.

(Söndagsnisse)

Edziĝa malhelpo.

— Kial dissolviĝis la fianĉeco de Ella? Ŝi ja tiel multe amis sian fianĉon?

— Ŝi eksciis, ke ĉe la altaro ŝi devos ĵure promesi, ke ŝi neniam forlasos sian edzon, sed sekvos lin ĉien.

— Ĉu tio estas kaŭzo?

— Jes ja, ĉar lia fianĉo estis subakvisto ĉe la maristaro.

(Life)

Difino.

— Kiu estas tiu bela knabino? Ŝi ne havas edzon, ĉu ne?

— Ne, ... jam la trian fojon ne.

La karaktero.

— Aŭdu nur, la mortanonco de la kompatinda Berger alvenis sen poŝtmarko.

— Nu, tio karakterizas lin...

(Nebelspalter)

Sufiĉa adreso.

— Jen, fileto, prenu ĉi tiun paketon kaj enmetu ĝin en la plej proksiman tramon.

— Sed al kiu mi devas ĝin doni?

— Nur enmetu ĝin, en ĝi estas la buterpanoj de via paĉjo, kiujn li forgesis hejme. Li certe ricevos ĝin, ĉar li laboras en la oficejo de la trovitaj objektoj.

Kun ebria kapo.

— Bonvolu diri al mi, kioma horo estas?

— La kvina.

— Ĉu matene aŭ vespere?

— Matene.

— Dankon. Kaj nur tion bonvolu ankoraŭ diri al mi, ĉu hodiaŭ matene aŭ hieraŭ matene?

(Ric et Rac)

„La Leonoj", piedpilkista trupo de belgaj Esperantistoj en Antverpeno. — Starantaj personoj: K. Verhoeven, P. v. Peel, F. De Gruyter, J. Genar, G. Slegers, E. Boyens, F. Stroobandt. — En la meza vico: J. Timmermans, J. Vangeel, N. Volders. — Genuantaj: W. Wilson, D. De Gruyter, J. v. Schoor, S. Mortelmans, J. Vandersteen. — S-ro Wilson estas angla gasto.

En la hispana urbo Sevilla post vizito de nia estona propagandistino f-ino Elinjo Pähn komenciĝis Esperanto-kurso en la fama moderna knabina lernejo direktata de s-ino Maria de la Purificación Amorós. Partoprenas la direktorino, 12 instruistinoj kaj 30 knabinoj. Sur la bildo meze: s-ro C. Martinez kursgvidanto.



La Esp.-Grupo de Châteaurenard (Francujo) aranĝis grandsukcesan ekspozicion, kiun inaŭguris la urbestro, s-ro Genevet. La dekstra bildo prezentas la grupanojn. De maldekstre la 3-a persono estas s-ro Pauleau prez., la 7-a s-ro Gregoire, la 10-a s-ro Bouchet, la 13-a s-ro Baud.

La bildo de la arte presita granda afiŝo, kiu invitas la tutmondan Esperantistaron al la nunjara universala kongreso.

La urbestraro de Southend-on-Sea (Anglujo) aranĝis grandajn Esp-kursojn sub la gvidado de s-S. Pragano el Rumanujo (sidanta en la mezo). De s-ro Pragano la dua sidanto estas s-ro D. P. Boa man, meritplena pioniro de Esp. En la tria vico tute maldekstre: s-ro C. C. Goldsmith, adm. de BE.

Julio Baghy kiel reĝo. — Nia kunlaboranto s-ro N. H. Slinger en Alkmaar dum la kristnaska libertempo aranĝis „hungaran festenon" je la honoro de nia poeto Julio Baghy, kiu nuntempe gvidas kursojn en Nederlando. Dum la gaja festeno oni kronis s-ron Baghy kiel „reĝon de la poetoj" kaj poste li kronis la tri sinjorinojn, kiuj kuiris la bongustan hungaran gulaŝon, kiel „gulaŝreĝinojn". Meze sidas s-ro Baghy, malantaŭe s-ro Slinger.

Esperantigita sport-klubo. — Nia bildo prezentas la anaron de la kanot-klubo „Maaszwervers" en Rotterdam, kiu entuziasme aliĝis al Esperanto. Ĉiuj anoj de la klubo ellernis Esperanton en kurso de f-ino B. de Zoete (staranta malantaŭ la vorto „Esperanto"). La nova nomo de la klubo estas: „Maasvagantoj" (la Maas estas riverego ĉe Rotterdam) kaj ĉiu kanoto estas ornamita per la verda stelo kaj per la nomo de nia lingvo sur flageto.

Kurso en Naaldwijk. — F-ino Truus Hooyer el Voorburg, senlaca disvastigantino de nia lingvo, gvidis bonsukcesan kurson en la nederlanda urbeto Naaldwijk. F-ino Hooyer (sidanta ĉe la tablo) estas konata antaŭ la publiko ankaŭ kiel deklamistino en Esperanto kaj naciaj lingvoj. Ĉiuj novaj gesamideanoj estas fervoraj legantoj de La Praktiko.

La „espero de la estonteco" lernas la „lingvon de la estonteco". — En la monaheja junul-pensiono de Bleyerheide (precize sur la landlimo inter Germanujo kaj Nederlando) nia fervora propagandisto, la franciskana frato Ansgaro Marzahn (staranta maldekstre) instruas Esperanton al 45 knaboj. Kvankam la kurso estas deviga, ili lernas tre diligente.

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Novaĵoj ĉe la Esperantista Akademio. — Dum Januaro la Akademio eldonis bultenon kun oficialaj sciigoj pri nova sistemo ĉe la elektado de novaj anoj kaj pri metodo de prilingva funkciado. De nun ĉiu Esperantisto rajtas prezenti kandidatojn al la Lingva Komitato kaj Akademio, kaj oni rajtas prezenti ankaŭ sin mem kiel kandidaton. Plue, ĉiu Esperantisto rajtas de nun proponi al la Akademio la oficialigon de iu nova vorto. La Akademio starigis „Sekcion de Kontrolo", kies tasko estas kontroli la evolucion de nia lingvo. Pri la supraj aferoj detalajn informojn kaj instrukciojn oni povas ricevi de la sekretario de la Akademio: s-ro René de Lajarte, 4 Villa d'Orléans, Fontenay-sous-Bois (Seine), Francujo.

Mortis Prof. Mazzolini. — Nia eminenta itala samideano, Prof. Alessandro Mazzolini, membro de la Esp-ista Lingva Komitato, verkinto de pluraj konataj Esp-libroj (Ekzercilo, Komerca Vortaro), kunlaboranto de la ĉefaj Esp-aj gazetoj, mortis en Fano (Italujo), en la aĝo de 76 jaroj.

Novaj gazetoj. — Sub titolo *„Hindujo"* aperis nova gazeto trimonata, kiu celas informadi la Esperantistan mondon pri Hindujo. La unuan numeron, kiu aperis en Novembro, ornamas la bildo de la hinda gvidanto Gandhi. La gazeton redaktas s-ino Erna Sindhwad. Adreso: 37 rue Vanderkindere en Uccle apud Bruselo (Belgujo). — *„Progreso"* estas la nomo de la nova Esperanto-gazeto, kies unua numero aperis en Decembro en Ateno (Grekujo). Ĝi estas propaganda gazeto kaj tial ĝiaj artikoloj estas grandparte greklingvaj. La direktoro de la gazeto estas s-ro J. A. Thomopoulos (Str. A. Kalvou 19 en Ateno).

Dua intima muzikvespero en Hago. — Marde, la 27-an de Februaro okazos en la koncerta salono de „Galerij" (Laan van Meerdervoort) la dua intima muzikvespero sub la gvidado de nia samideano s-ro jurnalisto Henk Valckenier. Oni aŭdos violonsolojn de Kreisler, kantojn de Schubert, pianoduetojn de la hagaj pianistoj f-ino T. Buitendijk kaj H. Valckenier, k.t.p. Poste sekvos balo. S-ro Andreo Cseh parolos mallonge pri Esperanto, kun traduko de s-ino Julia Isbrücker. Kartoj por 25 cendoj estas haveblaj ĉe: van Ostadestraat 294, Laan van Meerdervoort 482 kaj en la salono.

Enketo pri la pedagogia aplikado de radio, kino kaj foto. — La internacia pedagogia servo de la Centra Kino-Foto-Radio Oficejo ĉe la Popolkomisariejo de la Pezindustrio de Sovjet-Unio deziras starigi regulan korespondadon pri la aplikado de la radio, kino kaj foto en la instruado. La demandaro, kiu entenas 23 punktojn, estas ricevebla ĉe la nomita oficejo (Moskvo, strato de K. Marks, Politeknikumo, domo 21, ĉambro 222). La celo de la enketo estas pruvi al la neesperantistaj fakuloj, ke nia lingvo taŭgas por praktikaj kaj sciencaj celoj. La oficejo plezure respondos je similaj demandoj kaj rekompence sendos deziratajn librojn rusajn aŭ esp-ajn aŭ alilingvajn, eldonitajn en la Sovjet-Unio.

Ĉeĥoslovakio. — En *Lazne Belohrad* kun granda sukceso finiĝis la kursoj de nia ŝatata itala instruisto s-ro E. M. Fasce. La 8-an de Januaro okazis adiaŭa vespero je la honoro de s-ro Fasce. Ĉeestis ankaŭ la urbestro kaj lia anstataŭanto, grafo Merweldt kaj la loka samideanaro. S-ro Fasce ricevis de la urba konsilantaro belan memoraĵon. Por la aranĝado de la sukcesplenaj kursoj multe kaj tre bone laboris la sekretariino de la loka societo, f-ino Olga Ungrová. La Esp-societo per cirkulero rekomendis s-ron Fasce al ĉiuj Esp-istaj societoj de Ĉeĥoslovakio. — S-ro E. M. Fasce gvidas kursojn en *Turnov* kaj *Mnichovo Hradište*. La kursojn lerte organizis niaj senlacaj samideanoj Fr. Pytloun Delegito de UEA en Bakov n/J., prof. Tureček realleneja direktoro kaj s-ro Blazek Delegito de UEA. — La 9a kunveno de la Nordbohemiaj Esp-istoj okazis la 14-an de Januaro en *Horni Litvinov*. Post paroladoj de s-roj Krisl kaj Murath oni unuvoĉe konsentis aliĝi al la fondota tutŝtata Esp-Asocio de Ĉeĥoslovakio. En la kunveno partoprenis ankaŭ karavano el Praha. La proksima kunveno okazos la 11-an de Marto en *Aussig*.

Danujo. — F-ino M. Saxl kun granda sukceso eklaboris en *Fredericia* kaj *Middelfart*. Kvankam la „idistoj" multe malhelpis, ŝi tamen havas du kursojn kun pli ol 70 kursanoj. — S-ro Halvor E. Sörensen komencis kursojn en *Aars* kaj *Haubro*. — S-ro H. Grönborg gvidas kurson en *Randers* (27 personoj), *Vejlby* (34), *Ry* (16) kaj *Hasselager* (18 plenaĝaj kaj 18 infanoj).

Estonio. — La 17-an de Dec. en la Esp-Societo de *Tartu* okazis viĝla kaj amuza Kristnaskvespero, kiu samtempe estis kursfina festo de la kursoj: daŭriga, gvidita de mag. fil. s-ro P. Ariste, kaj komenca, gvidita de instruisto J. Jaanisto. — La Tartua Esp-Societo la 24-an de Marto festos sian dudekjaran jubileon. La societo anoncis la jenajn temojn por premiotaj skribaĵoj: 1) Historio de TES, 2) Scienca felietono pri iu Esp-a temo, 3) Literatura felietono pri iu ajn temo. La premioj estas libroj, po du premioj por ĉiu temo je valoro de 10 kaj 5 estonaj kronoj. La skribaĵojn oni sendu al TES, Gildi 8, Tartu, ĝis la 15-Marto. — En la blindula lernejo de Tartu funkcias Esp-kurso gvidata de s-ino A. Tshakna.

Francujo. — S-ro Roger Bernard, instruisto de la Cseh-Instituto, kiu en la pasinta somero partoprenis la seminarion en Arnhem, bonsukcese finis sian unuan kurson, aranĝitan de la Komitato de Libertempoj en *Parizo*. — La 1-an de Marto okazos en la universitato de *Lille* parolado de s-ro M. J. Guadet prezidanto de la Franca Ligo de la Amikoj de Esp-o, pri la pedagogia valoro de Esperanto, sub la prezido de s-ro M. G. Waringhien. — En *Montreuil-sous-Bois* kurson gvidas s-ro A. Paparel, ĉiumarde en la lernejo Marcellin-Berthelot, partoprenas 30 personoj. — En *Saint-Raphaël* s-ino Blacklock kaj s-ino de Virieu-Gerdès aranĝis Esp-ekspozicion. — F-ino Lidja Zamenhof daŭrigas sian triumfan propagandan laboron. Ĵus ŝi komencis novajn kursojn en *Vallauris* (50 kursanoj), *Saint-Raphaël* (78 kursanoj) kaj *Cannes* (133 kursanoj!). — S-ro Julius Glück sukcesplene finis siajn kursojn en *Parizo* kaj *Rueil-Malmaison*, kaj komencis kurson en *Cherbourg*, Dank' al modela aranĝo de s-ro Fr. Macé okazis grandsukcesa provleciono post kiu komenciĝis la kurso kun 35 personoj. Ĝi la 4-a leciono la nombro de la kursanoj kreski al 75. — En *Hyéres* la loka Esp-societo „Verda Stelo" festis la kristnaskon per grandsukcesa vesperfesto, en kiu partoprenis pli ol 500 personoj.

Latvujo. — En *Liepaja* komenciĝis nova publika kurso en la Popola Altlernejo sub la gvidado d nia eminenta estona instruisto s-ro H. Rikand.

Nederlando. — S-ro Siitam el Estonio komenci kursojn en *Almelo*, *Hengelo (O.)* kaj *Enschede* La kursoj havas entute 78 partoprenantojn. — E *Kerkrade* Frato Ansgaro Marzahn gvidas kurso por 25 personoj. — En *Bleyerheide* Frato Marzah gvidas kurson por 25 skoltoj. — En *Finsterwolde* (Gron.) f-ino W. M. de Vries preparas publika kurson. — En *Rotterdam* la „A.M.V.J. Crisiswerk organizis kurson por senlaboruloj. Ĝin gvidas f-in B. de Zoete. — La nederlanda sekcio de la Belamy-unuiĝo propagandas Esperanton kaj instrua ĝin al interesiĝantoj. — S-ro S. Pragano komenc novajn kursojn: en *Ridderkerk* kun 42 kursano en *Dordrecht* kun 30 kursanoj, en *Rotterdam* ku 68 komencantoj kaj 25 progresantoj. — En *Hag* komenciĝis du kursoj sub la gvidado de Andre Cseh.

Norvegujo. — En *Horten* post la bonsukces kurso de f-ino M. Glaser fondiĝis Esperanto-klub — F-ino M. Glaser, la ŝatata Berlina instruistin de la Cseh-Instituto, komencis sian laboron e *Hamar*. Kvankam la urbo havas nur 6000 loĝanto kaj el ili 400 jam estas Esp-istoj, tamen aliĝis la komenca kurso 52 personoj. F-ino Glaser gvid ankaŭ progresan kurson kun 36 personoj. Po sukcesplena provleciono, kiun ŝi donis al la p bliko de Hamar, ŝi mem prenis provlecionon e skiado kaj montris sin bona lernantino.

Palestino. — En *Jerusalemo* jam de du monat okazas Cseh-metodaj kursoj, aranĝitaj de la Es societo „Paco kaj Frateco" kaj gvidataj de n fervora propagandistino s-ino Thea Kohn el Vien La kursoj havas bonan sukceson.

Polujo. — En *Varšavo* f-ino Halina Weinste gvidas kurson por la anoj de la Pola Turing-Klub — En *Pogon* fondiĝis nova grupo de Esp-babilul por perfektiĝi en la mondlingvo. S-ro Niedb gvidas kurson por geskoltoj. — En *Sosnowiec* du la skolta festo oni disvolvis novan standardon k sendis Esperanto-saluton al la skoltaro de 15 land

Svedujo. — En *Borås* komenciĝis kurso le preparita de s-ro A. Emanuelson. La kursgvidan estas s-ro Tiberio Morariu. — En *Ulricehamn* s-T. Morariu gvidas kurson por progresantoj.

GAJA LERNOLIBRO
120 gajaj bildoj
Kurso en amuza maniero
RM 1.75 aŭ 7 poŝtaj respondkuponoj

GAJAJ VESPEROJ
amuza kaj interesa enhavo
gajaj kaj instruaj grupkunvenoj
RM 1.— aŭ 4 poŝtaj respondkuponoj

GAJAJ HOROJ
spritaĵoj — enigmoj — gajaj preseraroj k.t.p.
RM 0.50 aŭ 2 poŝtaj respondkuponoj

Ĉiu poŝtoficejo vendas respondkuponojn. — 1 respondkupono = afranko de eksterlanda letero.

Mendu ĉe: **C. WALTER, Hohenzollernstrasse 11, Berlin W. 10 (Germanujo).**
Poŝtĉeko: Berlin 85766

Redaktataj en bona zamenhofa lingvo kaj plenaj de interesaj verkaĵoj estas la gazetoj eldonataj de **Sennacieca Asocio Tutmonda:**

Sennaciulo - Sennacieca Revuo - La Lernanto

Petu specimenon! Petu ankaŭ nian novan librokatalogon!

Petu prospekton pri la 2-a eldono de la **PLENA VORTARO DE ESPERANTO.** Adreso:

S.A.T., 23 rue Boyer, Paris-20.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respondmarkon.

S-ro H. R. en L. — La vorton „Riouwstraat" oni elparolas: *riaŭstrat.*

S-ro V. S. en Estonio. — Kompreneble, ni volonte akceptos freŝajn kaj gravajn informojn pri la movado en via lando.

S-ro J. M. A. M. en H. (Ned.) — 1. Inter la esprimoj *„decida paŝo"* kaj *„decidanta paŝo"* estas atentinda diferenco. Decida paŝo = paŝo, kiu povas decidi, kiu havas la econ, kapablon decidi. Decidanta paŝo = paŝo, kiu nun decidas. Do ĉe la esprimo „decidanta paŝo" estas aldonita ankaŭ la tempa elemento. Simile: *arda lampo* = lampo, kiu per ardado donas la lumon (ekz. la elektra piro). *Ardanta lampo* = arda lampo, kiu estas nun en funkciado. Plua ekzemplo: La cikonio estas dum la tuta jaro *migra* birdo, sed *migranta* birdo ĝi estas nur en la printempo kaj aŭtuno. Kiel vi povas konkludi, la regulo estas la jena: El verba radiko oni povas fari adjektivon per la finaĵo „a" kaj per la participaj finaĵoj. Per „a" ni ricevas adjektivon esprimantan daŭran, konstantan econ. Per la participaj finaĵoj ni ricevas adjektivojn, kiuj esprimas tempajn ecojn. — 2. *„Spaco da 250 hektaroj da tero".* En ĉi tiu esprimo estas eraro. Oni devas diri: spaco de 250 hektaroj da tero.

S-ro E. H.-S. en T. (Norv.) — En la Decembra numero de La Praktiko vi trovas la adresojn de du gazetoj por kolektantoj, en la rubriko de „novaj libroj".

S-ro K. L. en G. (Sved.) — 1. *Percepto* = kono pri la ekstera mondo, akirata per la kvin sentorganoj. *Koncepto* = ideo pri iu afero. *Koncepti* = formi ideon pri io. Detalajn klarigojn pri ĉi tiuj vortoj vi trovas en la ĵus aperinta Filozofia Vortaro, vidu inter „novaj libroj". En tiu artikolo de La Lernanto la vorto „koncepti" estas malĝusta. Devas esti: „kompreni". — 2. *„La gravaj okazintaĵoj de laborista movado en nordaj landoj senas tute."* La frazo estas sensenca. Oni povas sanigi la frazon, se anstataŭ la nekomprenebla „senas" oni diras: mankas. — 3. *„Ĉu ne serĉis min iu?"* La frazo estas bona. Oni povas demandi pozitive kaj negative. *Ĉu jes? Ĉu ne?* — 4. La Praktiko neniam uzas la vorton „unu" kiel nedifinan artikolon, sed jes kiel numeralan adjektivon. — 5. En tiu ŝerchistorio estas imitata la parolo de la infano. Tial la frazoj ne estas science ekzaktaj. — 6. „Elportu vin!" estis la vulgara esprimo de tiu persono. Kaj nia raportisto fidele notis ĝin.

S-ro K. M. K. en V. (Sovjetunio). — Ĉar vi ne povas sendi el via lando monon, ni ne povas plenumi al vi mendojn. La Praktikon aboni (jara abonprezo 4.20 rubloj) kaj niajn eldonaĵojn aĉeti vi povas ĉe S.E.U. en Moskvo.

S-ro J. S. en N.-B. (Pol.) — Via propono estas bona, ni klopodos realigi ĝin.

F-ino O. U. en L.-B. (Ĉeĥosl.) — Dankon pro la senditaj interesaj fotoj. Bedaŭrinde ili ne estas sufiĉe klaraj por fari laŭ ili kliŝojn.

S-ro A. B. en C. (Rum.) — Viaj poemetoj montras lertecon kaj ni esperas, ke vi baldaŭ sendos publikigeblajn.

S-ro A. P. en F. — La vorto „Intersteno" estas la mallongigita nomo de la „Internacional-Stenografio", ellaborita de F. de Kunovski.

S-ro N. W. en P. (Francujo). — 1. La Plena Vortaro estas nuntempe elĉerpita. La dua eldono estas en preparo kaj ĝi aperos post du monatoj. Vi vidos pri ĝi anoncon en La Praktiko. — 2. Ni ĝojas pro tio, ke via fileto nun jam kredas, ke la vitro estas tranĉebla per tondilo en la akvo, ĉar li jam faris kontrolon. Sed ni bedaŭras, ke post la sukcesa eksperimento vi devis sendi la tondilon al la akrigisto. Koran saluton al via kontrolema fileto!

S-ro J. M. en P. (Hung.) — „La Vegetarano", oficiala organo de la Internacia Vegetara Ligo Esperantista, redaktoro: s-ro I. Ionescu Capatzana (strada Dr. Istrate 10, Bukurešto-V., Rumanujo).

S-ro M. T. en R. (Franc.). — Tre interese estas al ni vidi, ke el la literoj de la nomo de nia gazeto vi formis la vorton „koralkapti". La gravaĵo nun estas, kiel vi komprenas tiun vorton? Ĉu „koralojn kapti" aŭ „korojn alkapti"?

S-ro W. P. en B. (Svisl.). — La reklamo, kiun kelkaj homoj faras por la mondlingva projekto „Occidental", ne maltrankviligu vin. Sur la kampo de la mondlingva praktiko ĝi ne havas gravecon. La praktiko pruvis, ke Esperanto estas nevenkebla kaj ke ĝi estas la sola solvo de la mondlingva problemo. Ni ne perdu la tempon batalante kontraŭ sensignifa malamiko, sed ni pozitive laboru por Esperanto kaj energie disvastigu ĝin.

Esperanto-Ekzamenoj

en Nederlando dum 1934.

„LA ESTONTO ESTAS NIA" kaj „NEDERLANDA KATOLIKO" okazigos dum la jaro 1934 la jenajn ekzamenojn:

Por Diplomo A:

la 21-an de Aprilo	en Arnhem	
„ 5 „ Majo	„ Den Haag	
„ 10 „ Majo	„ Groningen	
„ 26 „ Majo	„ Bergen-op-Zoom	
„ 9 „ Junio	„ Amsterdam	
„ 23 „ Junio	„ Maastricht	
„ 21 „ Julio	„ Leeuwarden	
„ 10 „ Novembro	„ Utrecht	

Por Diplomo B:

la 12-an de Majo	en Den Haag
„ 7 „ Julio	„ Utrecht
„ 3 „ Novembro	„ Nijmegen

Oni sin anoncu 14 tagojn antaŭ ĉiu ekzameno ĉe: s-ro H. J. Bulthuis, sekretario, Kamillestraat 37, Den Haag.

Por Diplomo B oni povas elekti 4 librojn el la jenaj:

Akbar, En okcidento nenio nova, Fabiola, La faraono, For la batalilojn!, Gysbrecht v. Amstel, Hamleto, Idoj de Orfeo, Infero (de Dante), La Leono de Flandrujo, Luno de Izrael, La malgranda Johano, Marta, Mister Tot, Odusseias, Palaco de danĝero, Pro Ištar, Quo vadis?, La revizoro, Tragedio de la homo, Viktimoj, Vila mano, La viro el Francujo, Ifigenio en Taŭrido.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — Petu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

KORESPONDADO, LETERVESPERO kaj EKSPOZICIO. — Ni aranĝas Esperanto-Ekspozicion kaj Letervesperon en parto de nia provinco, kie Esperanto ankoraŭ ne estas multe enkondukita. — Mi petas ĉiun, bonvolu sendi multnombre taŭgajn Esp-aĵojn kaj propagandilojn por la ekspozicio, kaj leterojn, il. poŝtkartojn k.t.p. por la letervespero de mia kurso. Ni certe respondos! — Adreso: s-ro Arie Zondervan, Lijsterstraat 78, Leeuwarden (Nederlando).

ATENTU! — Fervojoficisto, absolvinto de supera lernejo, parolanta angle, france kaj hispane, havanta bonan bazon en la lingvoj itala kaj rusa, deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo. Respondo garantiita. Fraŭlinoj preferataj. — S-ro Alfred Mayer, Gottesauerstrasse 16, Karlsruhe i/B. (Germanujo).

KORESPONDADO per leteroj kaj il. poŝtkartoj bildflanke afrankitaj. Volonte interŝanĝas ĉiajn poŝtmarkojn. Certe respondos. Adreso: s-ro Sylvester Grzesiek, Wilsona 41, Koronowo, (pow. Bydgoszcz), Polujo.

KORESPONDO. — Gelernantoj de ĉeflernejo en Vieno (Aŭstrio) kaj plenaĝuloj deziras korespondadi kun la tuta mondo pri diversaj temoj, precipe kolektive, en lingvoj Esperanta, franca, itala, angla kaj ĉeĥa. — Adreso: s-ro Werner Rentmeister, Kölblgasse 10, Wien-III (Aŭstrio).

PETO. — La unuan fojon okazos Esperanta ekspozicio en Palestino. Ĝi povos grave helpi nin en nia batalo por Esperanto. Ni petas la samideanojn, grupojn kaj eldonejojn, sendi Esp-aĵojn kaj propagandilojn al la adreso de nia delegito: s-ro P. Lahovicki inĝeniero, Kerem, Jerusalem.

POŜTKART-VESPERO. — Nia grupo „Nova Sento" aranĝos la 6-an de Marto poŝtkart-vesperon. Ni petas, bonvolu sendi al ni il. poŝtkartojn (pmarko bildflanke). Ni certe respondos al ĉiu. — Adreso: „Nova Sento", Janzenstraat 70, Den Helder (Nederlando).

MI DEZIRAS korespondi pri Esperanto-literaturo. Skribu al: s-ro K. A. Hoogerwerf, Cabotstraat 10, Amsterdam-West (Nederlando).

BONHUMORO, de Paul Nyssens, ĵus aperis. Moralfilozofia eduka kaj kleriga verko. Valora trezoro por via biblioteko. Prezo: afrankite 1.25 ned. guld. Aĉetebla ĉe La Praktiko.

PROPONO. — Mi deziras korespondi kun 40-50-jaraj fraŭloj por komunaj vojaĝoj, libertempo, kaj dumviva amikeco. Sendu vian biografion kaj portreton, kiun mi resendos en kazo de malakcepto. Adreso: f-ino S. Ĉipera, Zizkova 52, Pilsen III (Ĉeĥoslovakio).

KORESPONDO. — La anoj de daŭriga kurso deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj. Respondo garantiata! Skribu al Nils Linér, Föreningsgatan 95, Landskrona (Svedujo).

LETERVESPERO. — La Esperantista Klubo en Mladá Boleslav (Ĉeĥoslovakio) okazigos la 23-an de Marto 1934 letervesperon, kiu celas interesigi la publikon pri nia movado kaj havigi al la klubanoj korespondantojn en la tuta mondo. Samideanoj estas petataj sendi poŝtkarton al la prezidanto: D-ro K. Marek, kuracisto en Mladá Boleslav. Respondo garantiata.

KORESPONDO. — 50 gelernantoj en Hamar (Norvegujo) deziras korespondi kun gesamideanoj en fremdaj landoj. Bonvolu memori, ke ili atendas multajn leterojn kaj poŝtkartojn kaj ke ili certe respondos. Adreso: „La Norda Stelo" en Hamar.

KORESPONDO. — Esperanto- klubo deziras korespondi kun samideanoj de la tuta mondo, pri ĉiu temo. Respondo certa! Skribu al la sekretario: s-ro Willy Münchrath, Rosmarstrasse 85 en Frechen apud Köln (Germanujo).

LETERVESPERO okazos en nia grupo la 18-an de Aprilo. Sendu leterojn. Ni certigas la respondon. Skribu al: Esperantista Grupo Anzina, 3 bis rue Victor-Hugo, Anzin (Nord), Francujo.

ATENTU! — Senpagan specimenon de „Skolta Bulteno" sendos laŭ peto: La Redaktoroj, 54 Constable Road, Ipswich (Suffolk), Anglujo.

KONKURSOJ

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Januara numero!

87-a konkurso.

S-ro A. L. en M. (Francujo), fidela leganto de La Praktiko kaj senlaca propagandisto de Esperanto, sendis al nia redakcio interesan proponon. Li intencas starigi por la honoro de nia majstro D-ro Zamenhof grandiozan monumenton kun la jena memortabulo:

L	u	d	o	v	i	k	o	Z	a	m	e	n	h	o	f
u	d	o	v	i	k	o	Z	a	m	e	n	h	o	f	L
d	o	v	i	k	o	Z	a	m	e	n	h	o	f	L	u
o	v	i	k	o	Z	a	m	e	n	h	o	f	L	u	d
v	i	k	o	Z	a	m	e	n	h	o	f	L	u	d	o
i	k	o	Z	a	m	e	n	h	o	f	L	u	d	o	v
k	o	Z	a	m	e	n	h	o	f	L	u	d	o	v	i
o	Z	a	m	e	n	h	o	f	L	u	d	o	v	i	k
Z	a	m	e	n	h	o	f	L	u	d	o	v	i	k	o
a	m	e	n	h	o	f	L	u	d	o	v	i	k	o	Z
m	e	n	h	o	f	L	u	d	o	v	i	k	o	Z	a
e	n	h	o	f	L	u	d	o	v	i	k	o	Z	a	m
n	h	o	f	L	u	d	o	v	i	k	o	Z	a	m	e
h	o	f	L	u	d	o	v	i	k	o	Z	a	m	e	n
o	f	L	u	d	o	v	i	k	o	Z	a	m	e	n	h
f	L	u	d	o	v	i	k	o	Z	a	m	e	n	h	o
L	u	d	o	v	i	k	o	Z	a	m	e	n	h	o	f

Kiel vi vidas, sur la tabulo estas legebla nur la nomo de nia majstro. Sed ĝi estas legebla ne nur unufoje, sed multfoje, en diversaj zigzagaj linioj.

Ĉar la starigo de la grandega monumento (20 metrojn alta) kostos al s-ro A. L. tre grandan sumon, li volas efektivigi la planon nur, se la Esperantistaro montros pri ĝi tiom da intereso, kiom ĝi meritas. Tial s-ro A. L. faris la jenan kondiĉon: *La monumento estos starigata nur tiam, se inter la Esperantistoj de la tuta mondo troviĝos almenaŭ unu persono, kiu devigas sin legi la nomon „Ludoviko Zamenhof" sur la supra tabulo tiomfoje, kiomfoje ĝi estas legebla en ĉiam diversaj manieroj, kaj se tiu persono efektive plenumas sian promeson.* S-ro A. L. solene deklaris, ke sur la monumento, ĉirkaŭ la memortabulo mem, oni eternigos ankaŭ la nomojn de tiuj personoj, kiuj plenumis la supran kondiĉon.

Nia redakcio estus tre feliĉa, se inter tiuj honorindaj personoj estus ankaŭ kelkaj legantoj de La Praktiko. Tial ni varme rekomendas al ĉiuj niaj legantoj:

bonvolu plenumi la kondiĉon de s-ro A. L. kaj sendu al ni viajn promesojn. Ni kolektos viajn leterojn kaj transsendos ilin al s-ro A. L., por ke li povu rezervi sur la monumento sufiĉan lokon por la nomoj.

La Praktiko ankaŭ de sia flanko volas rekompenci tiujn samideanojn, kiuj montras intereson pri la monumento. Tial ni aranĝas konkurson kaj demandas:

kiomfoje estas legebla la nomo „Ludoviko Zamenhof" sur la supra memortabulo? Bonvolu ĉu praktike, ĉu teorie kalkuli la nombron!

Inter tiuj personoj, kiuj ensendas al ni la ĝustan respondon, ni disdonos 6 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la fino de Aprilo.

Bonvolu atente plenumi la konkursajn regulojn.

Kupono por la 87-a

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj al la redakcio

KORESPONDU!

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —.45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. — *La redakcio.*

ŜLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro
s-ino = sinjorino
f-ino = fraŭlino
dez. = deziras
koresp. = korespondi
interŝ. = interŝanĝi
L = letero
PK = poŝtkarto
PI = poŝtkarto ilustrita
PM = poŝtmarko
bfl. = la poŝtmarkon gluu sur la bildan flankon
k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

ANGLUJO

Bournville (Birmingham). — 25 lernantinoj, 16-20 jaraj, dez. kor. k.ĉ.l. Adreso: F-ino *V. C. Nixon*, 183 Woodlands Park Road.

ARGENTINO

Juarez (Buenos Aires). — S-ro *V. Roque Schettino*, profesoro, Calle Chacabuco 464-468. F.C.S. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Respondo garantiita. Ankaŭ kun geĝardenistoj, interŝ. florsemojn.

AŬSTRIO

Linz a/D. — S-ro *Rudolf Brunbauer*, 24-jara, Untere-Donaulände 68. — Pl k.ĉ.l., precipe pri landbelaĵoj. Certe respondos.

BELGUJO

Antwerpen. — S-ro *J. Molenaar*, 23-jara nederlanda oficisto, Postbus 257. — Dez. kor. (por perfektigi sin) dane, germane, Esperante, nur kun dana kaj germanaj fraŭlinoj (18-23-jaraj), p.ĉ.t. Certe resp.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Lazne Belohrad. — S-ro *Ludoviko Bechtold*, 28-jara arbaristo kaj kasisto de banejo, Pacákova 97. — L k.ĉ.l. pri ĉaso kaj arbaraj aferoj. Certe resp.

Praha II. — F-ino *Julie Šupichová*, p. faka instruistino, Mala Stepanska 6/II — Dez. interŝ esp-ajn lernolibrojn kaj vortarojn.

DANUJO

Fredericia. — F-ino *Ebba Geddey*, 23-jara vendistino, Danmarksgade 47. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Hasselager. — 40 gekursanoj kaj 15 infanoj, ĉiuj gekomencantoj, tre dez. kor. k.ĉ.l. Skribu unue al: s-ro *H. Grönborg*, instruisto.

Skaarup (Fueno). — S-ro *Halfdan Skjoldager*, 18-jara lernanto, „Hytten" — PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe resp.

Vallekilde. — 12 junaj gekursanoj dez. kor. PK, L k.ĉ.l. Skribu unue al la kursgvidanto: s-ro *N. H. Aldrich*.

FRANCUJO

Beauchamp (S. et O.). — S-ro *Bourlier*, 26 Avenue Pasteur. — Interŝ. kolektojn de stampitaj PM, k.ĉ.l. Reciprokeco certigata.

Dunkerque (Nord). — S-ro *Auguste Cléty*, 39-jara komercisto, 68 quai de Hollandais. — L, PI kun Rusujo kaj Germanujo, p.ĉ.t., kun laboristoj.

Le Chambon F-lles (Loire). — Lernantoj de la Esp-ista Grupo de La Vallée de l'Ondaine, dez. kor. k.ĉ.l.

Malo-les-Bains. — F-ino *Clody Patry*, 21-jara kudristino, 19 rue Louis Vanraet. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., interŝ. PM.

Montbéliard (Doubs). — S-ro *Pierre Kuster*, 23-jara kalkulisto, 14 rue Louis Loucheur. — Dez. kor. kaj interŝ. PM „peco por peco" nedifektitaj k.ĉ.l. Certe resp.

Riorges, près Roanne. — S-ro *Gabriel Chervin*, 9 rue de St. Romain. — Dez. interŝ. PM k.ĉ.l. laŭ „Yvert kaj Tellier".

Sains-Richaumont (Aisne). — S-ro *Roger Batteux*, 12 rue d'Harbes. — Interŝ. PI bfl. k.ĉ.l.

GERMANUJO

Frankfurt a/M. — S-ro *Hermann Schöne*, Bahnhof Bonames. — Dez. kor. PI k.ĉ.l. Ankaŭ kun komencantoj. Certe respondos.

Greiz i. Th. — S-ino *Hilde Bässler*, Brückenstrasse23.II. — Dez. kor. k.ĉ.l. p.ĉ.t., precipe kun Usono, Sud-Ameriko, Ĉinujo, Japanujo, Hinduj Afriko, Arabio. Interŝ. kun fotoamatoroj fotojn. Kun policistoj, militistoj maristoj. PI bfl. Certe resp.

Köln a/Rh. — S-ro *Peter Vosen*, tramisto, Feltenstrasse 91. — Kun tramist ĉ.l. reciproke pri siaj labor- kaj vivkondiĉoj.

Potsdam. — S-ro *Otto Koth*, 39-jara fervojisto, Lennestrasse 44. — Dez. kor. k.ĉ.l. Certe resp.

JAPANUJO

Osaka. — S-ro *Hara-Ŝozo*, 19-jara komizo en fabriko de magiaj (vakuaj) boteloj, 36 Nibanĉo, Kitahorie, Nišiku. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Nenia skribas al filatelistoj. Certe resp.

JUGOSLAVIO

Brod s/S. — S-ro *Viktor Skukan*, 27-jara oficisto. — Donas bonajn PM de SHS & Balkano por bonaj PM ĉ.l., PI (arto, filmo & c.), muziknotojn por violono kaj piano. Dez. kor. k.ĉ.l., precipe kun Afriko (Liberio), Azio (Malaja arkipelago) kaj Centra Ameriko. Tuj respondas.

LATVUJO

Riga. S-ro *Centis Zeltinŝ*, 15-jara fraŭlo, L. Nometnu iela 47-12. — L, PK, PI, PM, k.ĉ.l., p.ĉ.t. kun Romo, Afriko, Azio, Aŭstralio kaj Sud-Ameriko. Absolute certe respondos al ĉiu.

LITOVIO

Ŝiauliai. — S-ro *B. Giedra*, 36-jara juristo-ekonomiisto, Pagyziu 105. — L, PK, PI, k.ĉ.l., pri komerco (precipe sanigaj kreskaĵoj) kaj pri reciproka libertempa gastigado. Certe resp.

NEDERLANDO.

Amsterdam-C. — S-ro *O. Kupperman*, ĵurnalisto, Nieuwe Amstelstraat 21. I. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Amsterdam-West. — F-ino *J. Th. Walraven*, instruistino, Adm. de Ruyterweg 245. III. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Interŝ. PM. Certe resp.

Den Haag. — S-ro *W. Brizee*, Copernicuslaan 100. — Interŝ. k.ĉ.l. ĉiun nombron de PM kun PM de Nederlando kaj Hindujo (tre belaj) laŭ kataloga prezo (Michel).

Eindhoven. — S-ro *O. F. Ackerman*, flegisto, Corn. Dankertstraat 11. — Dez. kor. k.ĉ.l., interŝ. PM. Certe resp.

Helmond. — *Helmonda Esperanto-Grupeto*, Tolpoststraat 56. — 21 ĝis 40 jaraj anoj dez. kor. k.ĉ.l. Certe respondos.

Huizum (Frislando). — F-ino *Gee Steeneker*, instruistino, Ferdinand Bolstraat 13. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe resp.

Leeuwarden. — S-ro *Gerardus Kuperus*, 19-jara, 6-e Vegelindwarsstraat 1. — L, k.ĉ.l., p.ĉ.t. (ne pri politikaj aferoj). Ĉiu, kiu skribos al mi antaŭ la 1-a de Aprilo, ricevos donaceton en la letero. Certe resp.

Oostmolendam. — S-ro *Wes. Dirksen*, leterportisto. — PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe resp.

Rotterdam. — S-ino *K. S. Schreuders van Diejen*, 55-jara, gardistino de Krista konstruaĵo, St. Laurensstraat 55.c. — L, PK, PI, k.ĉ.l.

Schingen apud Dronrijp (Frislando). — S-ro *H. F. Breuker*, 22-jara. — L, PI, k.ĉ.l., precipe kun Balkanaj kaj ekstereŭropaj landoj, p.ĉ.t. Petas alglui div. malaŭtvalorajn PM. Afrankas per belaj, multaj PM (bonfaraj). Certe resp.

Voorburg (Zuid-Holland). — S-ro *J. van der Steur*, Prinses Mariannelaan 15. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe resp.

NORVEGUJO

Hamar. — F-ino *Aslaŭg Diesen*. — Dez. korespondi.

Trondhjem. — F-ino *Marie Aas*, ekspedistino, Mellemilen 3. — L, k.ĉ.l., pri literaturo. Certe resp.

POLUJO

Radom. — S-ro *Teodoro Supernat*, Kalinska 19. — Interŝ. PM, k.ĉ.l. en grandaj kvantoj (1000—10,000), peco por peco.

SOVJET-UNIO

Kiev. — S-ro *Juzij Fabiŝ*, oficisto, 13-y-6, Turgenevskaja 42-3. — Dez. kor. kun ekstereŭropanoj. Respondos al ĉiu.

SVEDUJO

Billesholms Gruva. — S-ro *Nils Welander*, komercisto. — L, k.ĉ.l., interŝ. PM.

Bjursås. — S-ro *Carl Persson*. — Dez. kor. k.ĉ.l. Certe kaj tuj respondos al ĉiu.

Borås. — S-ro *Sven Friberg*, Ramnalid. — K.ĉ.l., prefere kun Japanujo.

Flen. — S-ro *Herbert Boström*, bakeja laboristo, Britaborg. 2 tr. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Flen. — *Esperantista Grupo*. — Dez. kor. k.ĉ.l.

Göteborg. — S-ro *Alfons Lindberg*, Rambergsvägen 3. — Serĉas korespondantojn por 20 kursanoj.

Göteborg. — S-ro *Karl Lindqvist*, 34-jara laboristo, Nordhemsgatan 30. — P.I.

Göteborg. — S-ro *L. Runeskjöld*, inĝeniero, 4:de Långgatan 18. — Dez. kor.

Katrineholm. — S-ro *Erik Anderson*, Fredsgatan 58. — Dez. kor. k.ĉ.l.

Kumla. — F-ino *Sigrid Lindkvist*, Postfack 54. — L, PI.

Örebro. — S-ro *Torsten Lundbäck*, 22-jara kontoristo, Sörbyallén 4. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Sparreholm. — F-ino *Lizi Andersson*, Haga 17. — Dez. kor. k.ĉ.l.

Stockholm. — F-ino *Siri Linnander*, Völundsgatan 9.V. — L, PI, PM, prefere kun ekstereŭropaj landoj, p.ĉ.t.

Sundsvall. — S-ro *Arthur Nore*, 45-jara instruisto, Högom. — L, PK, k.ĉ.l.

Trelleborg. — S-ro *Hj. Olsson*, Repslagaregatan 8. — Kolektas PM laŭ Yvert.

Trelleborg. — S-ro *Gustav Jönsson*, Östra Förstadsgatan 257. — Dez. kor. k.ĉ.l.

Valdemarsvik. — 40 gekursanoj dez. kor. per PI k.ĉ.l. Adreso: Esperantokurso, Box 66.

SVISLANDO

Herisau-Hofegg. — S-ro *Walter Bruderer*, 24-jara laboristo. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., prefere kun laboristoj. Certe respondos al ĉiu.

USONO

East Orange (N.J.). — S-ro *L. A. Ware*, 32-jara elektra inĝeniero, 61 N. Arlington Ave. — L, PI, kun orientaj landoj, pri la sanskrita lingvo, orientaj manskribmanieroj k.t.p. Certe resp.

Hollywood (Kalifornio). — S-ro *D-ro A. Rudy*, 6061 Santa Monaca Bld.

Los Angeles (Kalifornio). — S-ro *Clarence R. Zoll*, 1950 Whitmore Ave.

New York. — S-ro *C. E. Germanton*, telefon-inĝeniero, 463 West St. — Kun sammetianoj en Svedujo kaj Rusujo.

Pennsylvania (Pa.). — S-ino *Fred. Bettelheim*, c/o Phi Epsilon Pi House, State College.

„FLORETOJ"

PORINFANAJ RAKONTOJ
TRADUKITAJ DE LA
„VENDREDA KLUBO"
EN WINSCHOTEN
(Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj bildoj
de C. Jetses
Prezo ..... 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la eldonisto:
J. B. WOLTERS
Groningen — Den Haag — Batavia.

LA ESPERANTA GAZETO
(Gov. Flinckstraat 301, Amsterdam)
aperas **ĉiusemajne.** Tute sendependa. Enhavo: tutmondaj novaĵoj, Esperanta radio-programo, k.t.p. Ĉefredaktoro: *Drs. J. Tensen* (Dipl. A kaj B). Abonprezo: duonjare 1.25 guld. — Kiu abonos antaŭ la 1-a de Marto de 1934, ricevos la unuan duonjaron por
UNU GULDENO.
Senpage la numerojn aperontajn antaŭ tiu dato.

LITERATURAJ PERLOJ KAJ JUVELOJ

sin trovas por ĉiu Esperantisto
en nia kolekto:

INTERNACIA MONDLITERATURO

LEGU! LEGU!

Ĉiu volumo kostas nur RM—.80

Irving: EL LA SKIZLIBRO
Niemojewski: KRISTOLEGENDOJ
Bertrana: BARBARAJ PROZAĴOJ
Ŝimunoviĉ: ANO DE L' RINGLUDO
Eekhoud:
SERVOKAPABLA! MARCUS TYBOUT

Mendu ĉe via libristo
aŭ senpere ĉe la eldonejo:

FERDINAND HIRT & SOHN, Esperanto-fako
LEIPZIG C 1, Salomonstrasse 15

Poŝtĉekkonto: Leipzig 52372

Bareluloj kaj Fadenuloj

Moderna fabelo por ge(mal)junuloj.

Tradukis: BERNO FABO.



„KONFERENCO DE BARELBOTEL"
(Ilustraĵo el la libro)

Jen amuza, nuntempa satiro de *André MAUROIS*, kiu rakontas la historion de du subteraj popoloj, kiuj pro bagatelo malpacas. Du surteraj knaboj hazarde trovas la vojon tien, ili spertas strangajn aventurojn inter la dikuloj kaj maldikuloj. Speciale pro la multaj tutpaĝaj ilustraĵoj la libro taŭgas kiel porjunula romano, sed verŝajne nur la gemaljunuloj plene ĝuos la senegale subtilajn detalojn de la kontraŭmilita tendenco. La libro estas facilstila, instrua por iom progresintaj komencantoj. Ĝi ne povas manki en la kursoj dum ĉi tiu vintro, oni ne bedaŭros la elspezon!

Mendu ĝin senprokraste!

Prezo: 1.20 guld. (+ 5 % afranko) = 10 respondkuponoj.

Mendebla ĉe:

Bern. BOON, Vreelandschestraat 12, HAGO, Nederlando.

Poŝtkonto 151888.

Kursgvidantoj, petu informojn!

LIBRO-LOTERIO de LA PRAKTIKO

Legu la detalajn informojn en la Januara numero!

LA LISTO DE LA PREMIOJ (DAŬRIGO):

44 **Bareluloj kaj Fadenuloj.** Moderna fabelo de André Maurois. Tradukis Berno Fabo. Kun multaj ilustraĵoj.
45 Welzl: **Tridek jarojn en la Ora Nordo.** 318 paĝoj. Bele bindita.
46 Grenkamp-Kornfeld: **5,000,000.** Libro kun humoro, sarkasmo kaj sentimentaleco.
47 Raymond Schwartz: **Verdkata Testamento.** Poeziaĵoj plenaj de humoro kaj sprito.
48 Sinha: **Bengalaj Fabeloj.**
49 **La morto de Smail Aga Ĉengijiĉ.** La kroata nacia eposo de Majuraniĉ. Trad. el la kroata lingvo M. Ŝpicer.
50 **La Kapitanfilino.** Romano de Puŝkin. El la rusa lingvo tradukis M. Ŝidlovskaja.
51 **Societa Ludaro.** Societaj ludoj por kunvenoj kaj ekskursoj, kolektitaj de J. Rosenberg.
52 **Bulgara Antologio.** Prozo kaj poezio de 40 bulgaraj verkistoj, tradukis I. H. Krestanov. 250 paĝoj.
53 **Eŭgeno Onegin.** La fama romano en versoj de A. S. Puŝkin. El la rusa lingvo tradukis N. V. Nekrasov.
54 **Kantaro Esperanta.** 358 kantoj Esperantistaj kaj tradukitaj. Kompilis M. C. Butler.
55 **Princo Serebrjanij.** Historia romano de grafo A. Tolstoj. El la rusa lingvo tradukis s-ino M. Ŝidlovskaja. 284 paĝoj.
56 **Skizoj pri la teorio de Esperanto.** Lingvosciencaj studoj de Drezen.
57 **Pri la solvo de l' problemo de internacia lingvo por komerco kaj trafiko.** Eldonita de la Foiroficejo de Frankfurto.
58 **Nobela Peko.** Novelo de Sadoveanu. El la rumana lingvo tradukis Tiberio Morariu.
59 **Elektitaj noveloj de Turgenev.** El la rusa lingvo tradukis A. Mexin.
60 **Naŭlingva Etimologia Leksikono de Esperanto.** Verkis L. Bastien. 250 paĝoj.
61 **Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto.** La fama supera lernolibro de Fruictier kaj Grenkamp. 200 paĝoj.
62 **Praktika Gvido de la Korespondo en Esperanto.** Interesa libro lukse eldonita en Japanujo. Verkis J. Iŝiguro. 310 paĝoj.
63 **La Prepozicioj kaj la Akuzativo en Esperanto.** Gramatika traktato de A. Mair.
64 **Komerca Vortaro.** Verkis Kreuz kaj Mazzolini.
65 **Servulrajto.** Rakonto en versoj, de Cankar. El la slovena lingvo tradukis J. Stefanĉiĉ.
66 **Bildotabuloj.** La fama praktika bilda lernolibro de Thora Goldschmidt.
67 **Universala Esperantistigilo.** Kurso per bildoj de Benson.
68 **Floretoj.** Porinfanaj rakontoj. Kun multaj koloraj kaj nigraj ilustraĵoj.
69 **Kursa Lernolibro** de Edmond Privat.
70 **La Nigra Galero.** Romano de W. Raabe. El la germana lingvo tradukis D-ro F. Wicke.
71 **Sonĝo de Somerameza Nokto.** Dramo de Shakespeare. El la angla lingvo tradukis L. Briggs.
72 **Lingvo, Stilo, Formo.** Studoj de D-ro K. Kalocsay.
73 **Hura!** Originala Esperanta romano de Julio Baghy.
74 **Gysbreght van Aemstel.** Tagedio de Vondel.
75 **El la skizlibro.** Noveloj de Wash. Irving. El angla lingvo tradukis H. L. Elvin.

Daŭrigota

GARDATAJ LOTOJ.

La administrejo de La Praktiko gardas la jenajn lotojn *(post la nomo de la aĉetinto estas la numeroj de la gardataj lotoj):* Balke 1958-1960, Bergkvist 1332-1342, Besler 1973, 3073, Blid 3426-3436, Bruklis 3346-3403, Bruquetas 2964-2970, Cesarini 3220-3232, Chapotot 3292-3296, Costantini 3721-3731, Cunot 2707, Diemel 1651-1710, v. Dijk 737-747, Dolak 1549-1559, Droste 3448-3458, Ems 2777-2781, Etayo 2975-2976, Germanton 2851-2861, Ginsburg 2375-2385, Gunvald 2720-2730, Hagenaars 3270-3280, Harsma 3255-3258, Hartingsvelt 3012-3022, James 3071-3072, Jófejü 797-807, Jurjans 3464-3473, Kaiser 1872-1874, Kazlauskas 2942-2952, Kelderman 2815-2819, Kleven 2879-2881, Kolodziejski 792-796, Kosko 1548, 1560, 1572, 1627, 1639, Král 2756, Krul 1343-1353, Lanzo 1527-1537, Lippert 3319-3323, Luze 1355-1365, Mahé 682, 1375, Minault 1962, Mortelmans 3023-3033, Morre 3404-3414, Orós 2979-2989, Pedersen 664, 3474, Peineau 3297-3307, Perthold 3475-3485, Peterson 2996-3000, Princis 1087, 1354, 1404, 1515, 1626, 1706, 1820, 1930, 2496, 2508, 2706, Puerto 2971-2974, Radziminski 3486-3488, Róna 3187-3197, Rozenfeld 3067-3069, Rumpel 2990-2995, Salzmann 3335-3345, v. d. Schaaff 3001-3011, Scherpon 2862-2872, v. d. Starre 2332-2342, Ŝtupar 3056-3066, Til 2977-2978, Tuitjer 1561-1571, Ueltschi 1821-1831, Ujlaky 808-818, Velders 2793-2814, Vogel 2766-2776, v. d. Waal 2782-2792, Wellens 1832, Zwarekant 2343-2353.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 3 (27)

★

Marto
1934

Esperanta teatro.

La grava sveda ĵurnalo „Dagens Nyheter", aperanta en Stokholmo, en sia numero de la 30-a de Januaro publikigis grandan ilustritan artikolon pri interesa plano.

La sveda reĝisoro Sandro Malmquist kaj lia trupo konsistanta el dek-kvin geaktoroj decidis fari rondvojaĝon tra la landoj de Eŭropo, por prezenti la modernan svedan teatran arton al la aliaj popoloj de Eŭropo. En la programo de Malmquist estas nur verkoj de Shakespeare.

Kiam la artistoj diskutis pri la grava demando: *en kiu lingvo ludi en la fremdaj landoj?*, oni ekpensis pri la internacia lingvo Esperanto. La geaktoroj konvinkiĝis pri tio, ke por tia celo estas elektebla nur la neŭtrala mondlingvo. Kaj nun ili ĉiuj fervore lernas Esperanton.

S-ro Malmquist jam komencis la preparadon de la vojaĝo, kiu kondukos el Stokholmo tra Tallinn, Riga, Varŝavo, Krakovo, Bratislava, Praha, Budapest, Vieno, Danzig, Malmö kaj Göteborg reen al Stokholmo. Li interrilatas kun la vizitotaj urboj kaj spertas ĉie grandan intereson kaj aprobon.

Laŭ la artikolo de „Dagens Nyheter" s-ro Edouard Herriot, la fama franca politikisto, entuziasmiĝis pri la plano kaj en radio-parolado alvokis la francan publikon por subteni la interesan kaj gravan entreprenon.

Simile la aŭstria komerca ministro s-ro Stockinger dum sia lastatempa vizito en Stokholmo deklaris sian grandan intereson kaj varman simpation por la plano de Malmquist.

Precipe ni, Esperantistoj, devas esti tre ĝojaj pro ĉi tiu unika maniero uzi nian lingvon, ĉar ĝi estas gravega el la vidpunkto de nia propagando.

Ni ofte demandas al ni: *kiamaniere plej efike propagandi nian lingvon?*

La plano de Sandro Malmquist donas la plej ĝustan respondon: *„Uzu Esperanton en seriozaj internaciaj aferoj!"*

Ni estas certaj pri tio, ke la Esperanto-prezentadoj de la sveda aktoraro vekos ĉe la publiko eksterordinare grandan intereson pri nia lingvo kaj konvinkos ĝin pri tio, ke per Esperanto la mondlingva problemo estas solvita.

Ni, Esperantistoj, ĝoje salutas kaj subtenos la planon de Malmquist. Multaj Esperantistoj revas pri tio, ke iam stariĝos teatro, en kiu la gravaj teatraj verkoj de la diversaj popoloj estos prezentataj en la mondlingvo. Tiu mond-teatro certe stariĝos. Sed ĝia tempo ankoraŭ ne alvenis. Ĝis tiam la Esperanto-teatro realiĝos per la entrepreno de Malmquist kaj per similaj entreprenoj de aliaj landoj.

Ni firme esperas, ke ĉi tiu bona ekzemplo trovos imitantojn kaj baldaŭ el diversaj landoj ekiros artistaj trupoj, por prezenti en Esperanto sian nacian dram-arton al la tutmonda publiko.

La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 2.50 nederl. guldenoj, por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Unu numero kostas -.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., ½ p. 45.-, ¼ p. 25.-, ⅛ p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE NIAJ KONKURSOJ

ATENTU! **Ni rimarkas, ke multaj partoprenantoj de niaj konkursoj ne atentas la regulojn. Ni ofte ricevas plurajn solvojn sur unu paperfolio, aŭ solvojn sen nomo kaj adreso de la solvinto. Ĉe ĉiu konkurso ni atentigas ĉiam pri la ĝeneralaj reguloj kaj ni insiste rekomendas plenumi la regulojn, ĉar la juĝanta komitato ne konsideras la nekonformajn solvojn.** — *La redakcio.*

74-a konkurso.

Okdek-sep personoj sukcesis aŭdi la dirajon, kiun la anoncisto de La Praktiko direktis al nia ŝatata legantaro en la Aŭgusta numero de la pasinta jaro. Sed el tiuj 87 personoj nur 55 aŭdis bone, ĉar 32 personoj ensendis aŭ tiajn tekstojn, kiuj enhavis pli ol 20 vortojn, aŭ tekstojn, kiuj ne rilatis al La Praktiko kaj al ĝiaj legantoj.

La 55 akcepteblaj solvoj estas tre interesaj, ĉar ili spegulas la dezirojn de nia legantaro. Tre ofta estas la deziro, ke *La Praktiko aperu dufoje en la monato*, kontraŭ la nuna abonprezo. Nu, tio estas ankaŭ nia arda deziro. Aliaj konkursantoj tute prave montras la vojon al tio: *„Varbu novajn abonantojn, por ke La Praktiko fariĝu pli ofta, pli granda kaj pli bona!"* La redakcio ricevis per ĉi tiuj solvoj multajn bonajn konsilojn. Ĝi danke akceptas ilin kaj klopodos baldaŭ efektivigi ilin.

Sed nun venas la grava demando: kiuj ricevu la promesitajn ses premiojn? La konkursa komitato deziras, ke la premioj apartenu al tiuj, kies solvoj ricevas la plej ĝeneralan aprobon de nia legantaro. Tial ni ĉi tie publikigas ĉiujn 55 taŭgajn solvojn kaj ni invitas la ŝatatan legantaron de La Praktiko: **bonvolu voĉdoni pri tio, kiuj 6 solvoj ricevu la premiojn! Ensendu sur aparta paperfolieto aŭ sur poŝtkarto la numerojn de la ses premiindaj solvoj.** Por ŝpari poŝtelspezojn, estas konsilinde sendi la voĉdonilon kune kun la solvoj de aliaj konkursoj.

1. La Praktiko de nun enhavos interesan daŭrigotan romanon!
2. La Praktiko fariĝos ĉiam pli bela kaj ampleksa, se ĉiu leganto varbos novajn abonantojn!
3. Ĉiu leganto de La Praktiko estas bonvena en la Esperanto-Domo en Arnhem!
4. Solvu la enigmojn de La Praktiko, ĉar ili estas agrablaj kaj instruaj!
5. Helpu interfratigi la homaron per Esperanto!
6. Por ke la abonprezo malaltiĝu estas necese, ke ĉiu leganto varbu abonantojn senĉese!
7. Legantoj de La Praktiko! Aliĝu al UEA!
8. De nun La Praktiko aperos dufoje en la monato kontraŭ la ĝisnuna abonprezo!
9. La Praktiko organizos grandan konkurson pri desegno de Esperanta emblemo aŭ sinjorina manlaboro!
10. De nun La Praktiko aperos ĉiusemajne, kontraŭ la ĝisnuna prezo!
11. De nun La Praktiko duonmonate vizitos vin!
12. Ne forgesu porti la verdan stelon!
13. Varbu novajn abonantojn! Rekompence vi ricevos belajn premiojn!
14. Per Esperanto vi povas krei komprenon kaj bonvolon inter la nacioj! Disvastigu ĝin!
15. Ĉar La Praktiko akiris multegajn abonantojn, ĝi aperos de nun trifoje en du monatoj!
16. Komercistoj! Anoncu en La Praktiko! Vi akiros novajn aĉetantojn!
17. Kara legantaro! Plenumu la deziron de la redakcio: LA VERDA STELO BRILU ĈIE!
18. La plej bona maniero perfektiĝi en Esperanto estas: viziti la Esperanto-Domon en Arnhem!
19. Hodiaŭ vespere prezentado de Esperanta parolfilmo! Abonantoj de La Praktiko havas senpagan eniron!
20. De la venonta jaro La Praktiko aperos dufoje en la monato, kontraŭ la nuna abonprezo!
21. Aŭskultu la jenajn kvin admonojn: Abonu La Praktikon! Solvadu la konkursojn! Portu la verdan stelon! Korespondadu! Geedziĝu nur Esperante!
22. Civitanoj! Esperantujo estas ankoraŭ maldense loĝata! Ĉiu el vi alportu nunjare almenaŭ unu novan Esperantiston!
23. Ĉar La Praktiko ĵus heredis grandan kapitalon, de nun ĉiu leganto senpage ricevos la gazeton!
24. La Praktiko bezonas novajn enigmojn! Kunlaboru!
25. Pasigu vian libertempon en la Esperanto-Domo en Arnhem! Tie vi perfektiĝos en la uzado de Esperanto!
26. Kiu solvas la 74-an konkurson, ĉiam senpage ricevos La Praktikon!
27. Ĉiu Esperantisto devas almenaŭ unufoje dum la vivo viziti la Esperanto-Domon en Arnhem!
28. Legu kaj diligente trastudu La Praktikon! Per tio vi kolektos baldaŭ riĉan trezoron!
29. De nun la jarabono de La Praktiko kostas nur 2.25 guldenojn!
30. Ĉiu Esperantisto devas legi kaj posedi la tre interesan Praktikon!
31. La granda heredaĵo, pri kiu La Praktiko skribis en la julia numero, falis en la akvon!
32. Laŭ peto de multaj abonantoj, La Praktiko aperos de nun en ĉiu dek-kvara tago!
33. Por ke ĉiu Esperantisto povu aboni La Praktikon, la jara abonprezo estos de nun nur 1 guldeno kaj 25 cendoj!
34. La redaktoro de La Praktiko petas la legantaron, ĉiam kaj ĉie porti la verdan stelon!
35. La premioj por la konkursoj de La Praktiko estos de nun pli multaj kaj pli valoraj!
36. Varbu novajn abonantojn, por ke La Praktiko pligrandiĝu kaj plibeliĝu!
37. La Praktiko en la estonteco aperigos por la komencantoj mallongajn, sed trafajn artikolojn pri la historio de Esperanto!
38. La Praktiko estas legata en ĉiuj kvin mondpartoj! Ĝi havas jam pli ol mil legantojn!
39. Centmil guldenojn ricevos tiu, kiu montros al ni gazeton pli belan, amuzan kaj utilan, ol La Praktiko!
40. Kiu pagas la abonprezon antaŭ la fino de la jaro, ricevos belan premion!
41. La legantaro de La Praktiko triobliĝis! Tial ni malaltigas la abonprezon!
42. Per la legado de La Praktiko vi perfektiĝos en Esperanto!
43. Ĉiu abonanto varbu unu novan, por ke La Praktiko aperu dufoje en la monato!
44. Varbu novajn abonantojn, por ke La Praktiko estu pli dika!
45. La Praktiko de nun havos 24 paĝojn!
46. Ĉiu bona Esperantisto devas havi la gravan libron „Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado"! Aĉetebla ĉe la eldonejo!
47. Iru amase al la kongreso! Montru, ke Esperanto vivas!
48. Pro la granda sukceso kaj disvastiĝo de La Praktiko, ni pligrandigos ĝin!
49. Kiu volas fariĝi perfekta Esperantisto, devas ĉiam legi La Praktikon!
50. La loĝantoj de la Luno deziras korespondi kun la legantoj de La Praktiko!
51. De nun La Praktiko aperos regule en la komenco de la koncerna monato!
52. Kiu varbas mil novajn tutjarajn abonojn, tiu ricevos kiel premion unu aŭtomobilon!
53. Solvu la konkursojn de La Praktiko! Tio estas amuza kaj utila okupo!
54. Se vi deziras instruiĝi kaj amuziĝi, partoprenu en la konkursoj de La Praktiko!
55. Aŭdu, aŭdu! Dum la jaro 1934 La Praktiko aperos dufoje en ĉiu monato!

75-a konkurso.

La legantoj de La Praktiko montris grandan lertecon, solvante ĉi tiun enigmon. La ĝustan solvon ensendis 190 personoj. La kaŝita frazo estas: **la problemo de la internacia lingvo estas definitive solvita per la lingvo Esperanto. Sed la venko de nia lingvo dependas de nia senhalta energia laborado; ĉar kvankam la homaro bezonas la mondlingvon, tamen ĝi akceptos la lingvon de Zamenhof nur tiam, kiam ĝia taŭgeco kaj utileco estos pruvitaj.** — La ses premiojn per lotado ricevis la sekvantaj solvintoj: S-ro **F. Balluffier** en Philippeville (Alĝerio). — S-ro **J. Estartûs** en Olot (Hispanujo). — S-ino **L. O. Jackson** en Seattle (Usono). — S-ino **E. M. Oeloendeda** en Sambodja (Borneo, Ned. Hindujo). — S-ro **L. Ponthir** en Jemeppe-sur-Meuse (Belgujo). — S-ro **A. H. van Rhee** en Utrecht (Nederlando).

ATENTU! **Se vi volas sendi monon al La Praktiko, bonvolu observi la sekvantajn:**

La monon oni povas sendi per *poŝtĉekkonto* (Wien A-156933, Praha 500362, Kopenhago 34941, Berlin 129527, Budapest 13201, Zagreb 41345, Riga 4870, Den Haag 162626, Warszawa 190203, Stockholm 74126, Bern III. 6761), *per poŝtmandato*, per *bankĉeko* aŭ per *papermono* en letero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj de la sube nomitaj landoj, kalkulante la valoron laŭ la suba tabelo:

1.— ned. guldeno valoras en:

Aŭstrio 3.70 ŝil., **Belgujo** 15 fr., **Britujo** 2 ŝil. 8 p., **Bulgarujo** 58 lev., **Ĉeĥoslovakujo** 17 kr., **Danujo** 3 kr., **Estonio** 2.60 kr., **Francujo** 10.35 fr., **Germanujo** 1.70 m., **Hispanujo** 5 pes., **Hungarujo** 3.30 p., **Italujo** 8 lir., **Jugoslavio** 30 din., **Latvujo** 2.20 l., **Norvegujo** 2.70 kr., **Polujo** 3.70 zl., **Rumanujo** 75 l., **Svedujo** 2.60 kr., **Svisujo** 2.10 fr.

Pro la freneza dancado de la mon-valoroj ĉi tiu tabelo validas nur ĝis la apero de nia sekvanta numero.

La sendo de poŝtmarkoj en letero okazas je la risko de la sendanto. Tial estas konsilinde uzi netravideblan koverton kaj ĉe pli granda sumo registrigi la leteron.

Jam nun preparu vin al Arnhem!

Neforgesebla libertempo en vera „Esperanto-lando"!

Gravaj kursoj, per kiuj vi perfektiĝos en Esperanto!

La datoj de la nunjaraj someraj kursoj de Andreo Cseh jam aperis en la Januara numero, sur la 3-a paĝo.

Detalaj informoj pri ĉiuj kursoj aperos en la proksima (Aprila) numero de La Praktiko.

Malaltigitaj prezoj en la hotelo de la Esperanto-Domo.

LECIONO PRI AŬTOMOBILOJ KAJ AERVETURILOJ.

1. personaŭtomobilo
2. karoserio
3. motoro
4. cilindro
5. malvarmigilo
6. ventolilo
7. kapoto (tegmenta ŝirmilo)
8. rado
9. radradio
10. pneŭmatika ringo
11. piedbreto
12. acetilenaparato
13. parafango (ŝirmilo kontraŭ la koto)
14. ventŝirmilo
15. direktilo
16. (aŭtomobil-) trumpeto
17. tahimetro (mezurilo de la rapideco)
18. oleo-kontrolaparato
19. lanterno
20. ŝoforo, konduktoro
21. oleujo
22. motorciklisto
23. okulŝirmilo
24. motorciklo
25. radrondo



26. benzinujo
27. gamaŝo
28. pedalo
29. ĉapo
30. ŝarĝaŭtomobilo
31. kovrilo
32. rimorko (alligita veturilo)
33. motorplugilo
34. aeršipgaraĝo
35. pordego
36. aviadilŝedo (aviadilejo)
37. aviadisto
38. aeršipo
39. aeršraŭbo
40. altendirektilo
41. flankendirektilo
42. (aeršip-, aerostat-) gondolo
43. pasaĝerejo
44. aviadilo a) monoplano b) biplano
45. direktilvosto
46. portila surfaco
47. aerostato
48. ŝnuraerostato
49. ŝoseo
50. kilometroŝtono, mejloŝtono

Tio, kion ni vidas sur nia bildo, montras kelkajn el la plej novaj kaj eminentaj eltrovaĵoj, unue modernajn veturilojn, kiuj veturas surtere helpe de motoroj, nome [1], [24], [30] kaj [33], due tiajn, kiuj ebligas veturi tra la aero, nome [38], [44], [47], kaj [48]. La ĉefaj partoj de la [1] estas la [2] kaj la [3]. La laste nomitan vi povas vidi sur nia bildo, ĉar ĝi ne estas kovrita per la [7], per kiu oni kutime kovras la maŝinajn partojn de la aŭtomobilo. Krom la [3] al ili apartenas la [4], la [5] kaj la [6]. La kvar [8] de l' aŭtomobilo kaj ties [9] devas esti tre fortikaj, kaj estas necese, ke ili havu tre bonajn [10], se oni volas eviti tro oftajn difektojn dum la veturado. La [11] samtempe — ambaŭflanken plilongigita — servas kiel [13]. Sur la [11] vi vidas la [12], kiu liveras la gason por la granda [19]. En la [2], en kiu la [20] sidas dum la veturado, vi vidas tri ilojn, kiujn li bezonas: la [15] por direkti la veturilon, la [16] por anonci la alvenon de l' aŭtomobilo kaj la [17]; krom tiuj la [18]. Dumnokte la [20] per la [19] heligas la vojon, sur kiu li volas veturi. Sur nia bildo vi vidas lin starantan malantaŭ la [1]; li tenas en la mano la [21] kaj kontrolas la [3]. —

Sur la [49], maldekstre de la [50], juna [22] veturas sur [24]. Li surhavas [23] kaj [29]. Liaj piedoj staras sur la [28], ĉirkaŭ siaj kruroj li havas [27]. Ankaŭ la [24] havas [3]; sed ĝi havas nur du [8], al kiuj ankaŭ apartenas [9], [10] kaj [25]. La [19] kaj [16] de la [24] estas pli malgrandaj ol tiuj de la [1]; la [13] de la [24] estas ne tiel larĝaj. La [26] super la [3] de la [24] liveras la materialon, per kiu la [3] estas provizata, nome la benzinon.

Kompreneble la aŭtomobiloj estas uzataj ankaŭ por transportaj aferoj. Do oni havas aŭtomobilajn veturilojn por tiu celo, kiujn oni nomas [30].

INTERPAROLO.

A. Ĉu estas vere, ke vi estas kontraŭulo de la aŭtomobila sporto? Tio ŝajnas al mi neebla, ĉar certe ĉiu devas konfesi, ke la aŭtomobilo estas tre bona kaj utila eltrovo. Helpe de la aŭtomobilo ni povas vojaĝi pli rapide ol per la fervojo, kaj precipe tio estas granda progreso, ke la aŭtomobilaj veturiloj ne bezonas relojn, kiel la fervojo. Aŭ ĉu vi neas tiun progreson?

B. Mi certe ne. Tamen mi ne ŝatas vojaĝi per aŭtomobilo. Ĉar tio ĉiam estas danĝera afero, plue oni tre ofte havas difektojn de la veturilo, per kiuj oni estas retenata tro longtempe. Kaj, ĉar kutime la aŭtomobilistoj rapidegas veturante, la ĝuo kaj plezuro de tiu, kiu vojaĝas aŭtomobile, ne estas tiel granda, kiel ekzemple, se oni vojaĝas rajdante aŭ veturante per ĉevaloj.

Ĉi tiu leciono estas prenita el la bonega praktika lernolibro: **THORA GOLDSCHMIDT: BILDOTABULOJ,** eldonita de la firmo *Ferdinand Hirt & Sohn* en Leipzig. La libro sur 104 paĝoj pritraktas ĉiujn temojn de la praktika vivo en similaj bildoj.

La libro estas **aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO** kaj ĝia prezo estas:

kartonita nur 1.90 ned. guld.
bindita „ 2.20 „ „

Al niaj abonantoj afrankita sendo!

Portreto
pri
Felikso kaj Leono Zamenhof.

Nia eminenta poeto D-ro K. Kalocsay en sia verko „Rimportretoj" per la sekvantaj versoj karakterizas la ĵus mortintajn du fratojn de la aŭtoro de Esperanto.

Feliks', Leono: frata duo,
Poetaj fratoj *Zamenhofaj.*
El la armeo de l' „Malnovaj",
Sed pretaj al la ĉiam-pluo.

Entuziasmaj pri artĝuo,
Du kuracistoj filozofaj,
Feliks', Leono: frata duo,
Poetaj fratoj *Zamenhofaj.*

Felikso (Fez) en La Revuo
Brilis per versoj rapidstrofaj,
Leon' tradukas en lertmovaj
Ritmoj de l' arta verskonstruo ...

Feliks', Leono: frata duo.

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Edziĝo. — S-ro *Julio Csapó*, vicdelegito de UEA en Timiŝoara (Rumanujo), fervora propagandisto kaj ŝatata instruisto de la Cseh-Instituto, la 4-an de Marto edziĝis kun f-ino *Erzsike Pokorny*, ankaŭ fervora Esperantistino. — La Praktiko kore gratulas!

Morto. — La 20-an de Februaro mortis en Veendam (Nederlando) s-ro *Pieter van Dokkum*, lernejestro, en la aĝo de 59 jaroj. — S-ro van Dokkum estis modele fervora kaj sindona propagandisto, kiu akiris multajn meritojn en la disvastigado de Esperanto en la nederlanda provinco Groningen. Li verkis ankaŭ Esperanto-lernolibron kaj estis membro de la nederlanda Ekzamena Komitato. Li estis fidela abonanto de La Praktiko. Ni kondolencas al la funebranta familio. — La red.

Antaŭkongreso en Oslo. — Dum la tagoj 2-3 Aŭgusto, antaŭ la nunjara universala Esperanto-kongreso okazonta en Stokholmo, estos antaŭkongreso en la norvega ĉefurbo. La riĉa programo entenas la vizitadon de la vidindaĵoj de Oslo kaj ĉirkaŭaĵo, ekskursojn, ŝipekskurson inter la norvega insularo, komunajn manĝojn kaj kabaredon kun dancado. Por detalaj informoj oni povas sin turni al la ĉefo de la antaŭkongresa komitato: s-ro Carl Stöp-Bowitz, Gjetemyrsveien 11, Oslo.

Postkongreso en Tallinn. — Post la Stokholma universala kongreso okazos postkongreso en la estona ĉefurbo Tallinn, dum la tagoj 12-14 Aŭgusto. Detalajn informojn oni povas ricevi de: Esperanto-Asocio de Estonio, Poŝtkesto 6, Tallinn.

Novaj gazetoj. — La 15-an de Februaro aperis la unua numero de *„Nia Gazeto"*, monata eldonaĵo de „L'Eclaireur de Nice et du Sud-Est". La nova gazeto aspektas kiel la ordinaraj nacilingvaj ĵurnaloj, ĉar ĝi havas la saman paperon kaj formaton. „Nia Gazeto" sur ok paĝoj donas multan interesan tekston kaj estante sendependa gazeto, ĝi parolas libere. La direktoro de „Nia Gazeto" estas s-ro Georges Avril en Nice kaj la ĉefredaktoro nia konata propagandisto S. Grenkamp-Kornfeld, membro de la Lingva Komitato. La abonprezo por unu jaro estas: en Francujo 10 fr.fr., en aliaj landoj 12, resp. 15 fr.frankoj. Adreso de la redakcio kaj administrejo: 29 avenue de la Victoire en Nice (Francujo). — *„La Kritika Observanto"* estas la titolo de nova revuo politika kaj kultura, aperanta kvaronjare. La redaktoro estas s-ro Gerhard Kumleben, 6 Sentier de la Sablonnière en Malakoff (Seine), Francujo. Prezo de unu numero: 1 fr.fr. La nova gazeto celas servi al la progreso de la tutmonda laborista movado, lojale kaj objektive kritikante al bazojn kaj tendencojn de la diversaj laboristaj organizaĵoj.

Itala Esperanto-Kongreso kaj turisma karavano. — La 19-a nacia kongreso de la italaj Esperantistoj okazos en Milano dum la tagoj 14-17 Aprilo. Post la kongreso okazos interesa rondvojaĝo tra la famaj italaj urboj Genova, Pisa, Romo, Napolo kaj Pompejo, kaj ekskurso al la lagoj de Lombardio. La rondvojaĝo finiĝos la 24-an de Aprilo. La partoprenantoj ĝuos tre grandan vojaĝ-rabaton. Detalajn informojn kaj programon oni povas ricevi de: Esperanto-Centro Itala, Gall. Vittorio Emanuele 92, Milano. La aranĝantoj kore invitas ĉiulandajn Esperantistojn.

SAT-kongreso. — La 14-a internacia kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) okazos en Valencia (Hispanujo) dum la tagoj 3-8 Aŭgusto de la kuranta jaro. La adreso de la Kongresa Organiza Komitato estas: Horno del Hospital 12-1, Valencia.

Propagando sur ŝipo. — Dum la lasta somero la pola marŝipo „Polonia" faris ekskursan vojaĝon al Nederlando kun 536 pasaĝeroj, inter kiuj troviĝis multaj Esp-istoj el la polaj urboj Krakovo, Sosnowiec kaj Varŝavo. Niaj fervoraj samideanoj multe propagandis sur la ŝipo, ili aperigis informajn artikolojn en la gazeto, kiun oni redaktis sur la ŝipo kaj la ŝipa orkestro regule ludis nian himnon kaj plurajn aliajn Esp-ajn kantojn. La tuta ŝipanaro havis multan kaj bonegan okazon por ekkoni kaj eklerni nian lingvon.

Helpo por praktika uzado de Esperanto. — En Antverpeno (Belgujo) fondiĝis „Komitato por Internacia Komerca Lingvo" kaj ĝi celas helpi ke Esperanto estu pli kaj pli multe uzata en praktikaj sferoj. La komitato okupas sin ankaŭ pri regula dissendado de Esperant-lingve presitaj reklamiloj, prospektoj k.t.p. al laŭfake elektitaj belgaj Esperantistoj. Interesiĝantoj turnu sin al la sekretariejo de la komitato. Adreso: Vleminckstrato 18 en Antverpeno.

La Bellamy-movado kaj Esperanto. — Kiel oni scias, la iama eminenta amerika pensulo Edward Bellamy (1850—1898) en siaj du famaj verkoj: Looking Backward (Rerigardo) kaj Equality (Egaleco) ellaboris socian sistemon, en kiu ne povas esti milito, senlaboreco kaj alia simila malfeliĉaĵo. En la internacia Bellamy-unuiĝo fondiĝis aparta Esperanto-sekcio, kiu volonte donas en Esperanto-lingvo informojn al ĉiu interesiĝanto pri la ideoj de Bellamy. Adreso: s-ro K. J. Vernoov, sekretario, 1e Jac. .v. Campenstraat 26huis en Amsterdam-Zuid, Nederlando.

Julio Baghy parolos per radio. — Laŭ iniciato de la societo „Kr. E. Do" en Dordrecht kaj s-ro J. de Ren en Leiden, nia konata poeto Julio Baghy parolos antaŭ la mikrofono de la N.C.R.V. Huizen, la 29-an de Marto vespere de la 6.45 ĝis la 7.00 horo.

La Esperantista Skolta Tendaro en ĉi tiu jaro okazos ĉe Banská Bystrica en Ĉeĥoslovakujo, apud la altmontaro Tatra, en la fino de Julio kaj komenco de Aŭgusto. La partoprenantoj ricevos gravajn rabatojn por la vojaĝo. Interesiĝantoj por informoj kaj aliĝo turnu sin al: Esperanto-fako de centro de Slovakaj Katolikaj Skoltoj, Kapitulská 18, Bratislava (Ĉeĥoslovakujo).

S-ro Henriko Seppik, la eminenta estona aktiva membro de la Cseh-Instituto, ellaboris modelan statistikon pri sia agado en Svedujo kaj Norvegujo dum la lastaj jaroj. Laŭ la statistiko li faris en Svedujo 101 publikajn prelegojn pri Estonio, 44 Cseh-metodajn provlecionojn, 45 Cseh-metodajn kursojn en 14 urboj kaj 3-foje parolis per radio. Ĉiujn tiujn aranĝojn partoprenis entute 17,400 personoj. En Norvegujo li faris 33 prelegojn, 15 provlecionojn kaj 17 kursojn en 10 urboj. La aranĝojn partoprenis entute 14,384 personoj. Dum tiu tempo li veturis en Svedujo proksimume 19,000 kilometrojn kaj en Norvegujo 6,500 kilometrojn. Krom tio li faris en Svedujo 130 artikolojn por 36 diversaj svedaj gazetoj kaj 23 artikolojn por 14 norvegaj gazetoj. S-ro Seppik havas fidelan akompananton kaj kunlaboranton en sia edzino Erika, kiu lastatempe faris 2 publikajn prelegojn, 5 provlecionojn kaj 6 kursojn, kun la partopreno de entute 1,069 personoj. — Ni kore gratulas al niaj senlacaj pioniroj kaj bondeziras por ilia plua laboro malfacila, sed glora.

Ekzamenoj en Nederlando. — Dum la pasinta jaro 1933 la du Esp-istaj unuiĝoj: „La Estonto Estas Nia" kaj „Nederlanda Katoliko" okazigis 12 Esperanto-ekzamenojn: 9 por diplomo A, kaj 3 por diplomo B. — Por A ekzameniĝis 595 kandidatoj, el kiuj sukcesis 421, t.e. pli ol 79 %. — Por la diplomo B ekzameniĝis 144 kandidatoj, el kiuj sukcesis 90, t.e. pli ol 62 % — Dum la tuta jaro do ekzameniĝis 739 kandidatoj. Tio estas pruvo de vigla Esperanta vivo en la malgranda Nederlando.

Imitinda ekzemplo. — Nia sindona propagandistino, f-ino Julie Šupichová en Praha, kiu malgraŭ progresinta aĝo kaj daŭra malsaneco kun senlaca energio laboras por Esperanto, dum la jaro 1933 aperigis en ĉeĥoslovakaj gazetoj 98 artikolojn pri Esperanto.

Alĝerio. — Nia fervora propagandisto, s-ro M. Salzmann el Lyon, aktiva membro de la Cseh-Instituto, la 20-an de Februaro alvenis en *Philippeville*. Post rapida organizo de bonsukcesa publika leciono, la 23-an de Februaro komenciĝis kurso kun 25 personoj. En la organizo de la kurso multan meriton akiris nia senlaca samideano Xavier Sattler, kasisto de la loka Esp-ista grupo.

Anglujo. — S-ro W. M. Appleby, nia populara propagandisto, komencis novan kurson en *Cheltenham*.

Argentino. — En la urbo *Tucumán*, ĉefurbo de la samnoma argentina provinco, fondiĝis Esp-ista grupo „La Vereco". La fondintoj estas novaj samideanoj, kiuj senĉese propagandas. Inter tiuj eksterordinare laboremaj tukumanaj samideanoj estas kelkaj signifaj personoj, kiuj donas moralan forton al la naskiĝanta loka movado. La adreso de la nova grupo estas: Maipú 771.

Aŭstrio. — Post la ĵus okazinta revolucio la aŭstria registaro ĉesigis multajn laboristajn organizaĵojn, inter ili ankaŭ la Aŭstrian Laboristan Esperanto-Ligon.

Belgujo. — En *Quiévrain* s-ro Noël Piette gvidas kurson por 30 personoj.

Ĉeĥoslovakio. — En *Veseli n.Mor.* post sukcesa provleciono kaj prelego s-ro Dolfa Bartošik komencis kurson. Inter la kursanoj estas 11 geinstruistoj. — En *Uherske Hradište* la daŭriga kurso de s-ro D. Bartošik finiĝis kun interesa kaj gaja amuzvespero. — La Esp-klubo „Nova Vivo" en *Radvanice* la 28-an de Jan. havis sian duan ĝeneralan kunvenon. Persistaj kaj oferemaj gesamideanoj faris en la pasinta jaro grandan kaj sukcesan laboron por Esperanto. Interalie la klubo aĉetis 200 Esperanto-librojn kaj sukcese aranĝis paroladon de s-ro Kola Ajayi. La estraro de la klubo estas: Ant. Glet prez., Jos. Dvoraĉek vicprez., Jos. Hanzelka sekr., J. Taraba kasisto, Jen. Seibertová protokolistino. S-ro Hanzelka gvidas 4-monatan Cseh-metodan kurson.

Danujo. — Dank' al la organizo de Dana Esperanto-Instituto, okazas nuntempe multaj kursoj en Danujo, gvidataj de instruistoj de la Cseh-Instituto. F-ino I. Galambos instruas en *Aabyhøj* kaj *Aarhus*. S-ro D. Ponti gvidas kursojn en *Aalborg*, *Brønderslev* kaj *Vraa*, f-ino G. Hansen en *Kolding*, s-ro G. Staberg (el Svedujo) en *Grenaa*, *Trustrup* kaj *Lyngby*, s-ro H. Grönborg en *Vejlby*, s-ro H. E. Sörensen an *Aars*, s-ro E. Juneby (el Svedujo) en *Karise*, *Köge*, *Faxe*, *Faxe Ladeplads* kaj *Storehedinge*. — En *Kopenhago* fondiĝis propaganda komitato gvidata de f-ino M. Noll kaj s-ro Aersöe, kiu preparas kurson gvidotan de f-ino M. Saxl. — En la novaj kluboj en *Ubby* kaj *Tömmerup* apud Kalundborg okazas daŭrigaj kursoj laŭ la bonega lernolibro de L. Friis, gvidataj de s-ro H. N. Nederland. La anoj fervore studas kaj korespondas. — En *Esbjerg* fondiĝis nova Esp-klubo kun 25 anoj. La prezidanto estas s-ro Buhl.

Francujo. — Nia eminenta propagandisto s-ro J. Glück finis sian kurson en *Cherbourg* kaj transiris al *Tours*. Tie li faris grandan publikan lecionon antaŭ 600 personoj, inter kiuj estis multaj gravuloj. Sekvis brila rezulto: kurso komenciĝis kun 82 personoj. La aranĝantoj meritas koran gratulon. — S-ro Jean Marchand gvidas kurson en *Parizo*. — S-ro W. F. Buenting el Batavia, organizinto de la Orienthinduja Centra Esp-Organizo, dum sia vojaĝo al Eŭropo atingis Francujon. Li vizitis la Esp-istojn en Marseille kaj Cannes.

Hindoĉinujo. — Esperanto vigle progresas. La 19-an de Dec. okazis en *Hanoi* la ĝen. kunveno de la Tonkina Esp-Grupo. Prezidis inĝ. Lan, direktoro de la Supera Agrikultura Lernejo ĉe la Indoĉina Universitato. La elektita estraro konsistas el: s-ro Guerineau estro de la Radio-stacio (sekr.), s-ino Brenachot (kasistino), s-ro P. T. Thanh (2-a sekr.), s-ro N. V. Nhan (sekr. de la 2-a komisiono). En Hanoi ĝis nun 200 personoj lernis Esperanton en 4 kursoj. En Februaro komenciĝis la 5-a kurso. La Grupo havas 12-paĝan bultenon, kiu regule aperas dumonate en granda formato. Nun la jenaj tri gravaj gazetoj aperigas regule artikolojn pri Esperanto: La Patrie Annamite, Ban-Tre, Ngo-Bao.

Nederlando. — En *Smilde* la sukcesplena kurso de s-ro F. A. G. Boermans finiĝis kun agrabla festvespero. — En *Assen* komenciĝis nova kurso sub gvidado de s-ro F. A. G. Boermans. — En *Leeuwarden* s-ro Y. v. d. Schaaff gvidas kurson por 19 poŝtistoj. — F-ino M. E. Giltay gvidas kurson en *Voorburg*. — En *Rotterdam* s-ro M. de Waard gvidas kvar novajn kursojn por senlaboruloj. La kursojn organizis la loka komitato por klerigo de senlaboruloj. — S-ro J. G. Raven gvidas kurson por senlaboruloj en *Rotterdam*. La kurso estas aranĝita de la „Laborista Gejunulara Centro". — La konata instrua instituto „Pont" en *Rotterdam* enkondukis Esperanton en sian programon. La unua Esperanto-kurso jam komenciĝis laŭ la Csehmetodo, sub la gvidado de s-ro E. Wensing. — En *Stavoren* kurson gvidas s-ro Arie Zondervan por 20 personoj, inter kiuj estas geinstruistoj, poŝtistoj kaj la staciestro. Fondiĝis ankaŭ Esp-Klubo. — En *Groningen* nia samideano s-ro G. Nivard, grafologo, faris interesan prelegon pri la grafologio, en la studklubo de komercvojaĝistoj. La faritaj analizoj de skribaĵoj de ĉeestantoj frapis la tutan publikon.

Norvegujo. — La urba biblioteko en *Hamar* posedas 30 Esperanto-librojn kaj abonas La Praktikon. — S-ro G. B. Eide gvidas kurson en *Trondheim* por 10 personoj. — En *Holmestrand* kaj *Horten* post la sukcesplenaj kursoj de f-ino M. Glaser fondiĝis Esp-kluboj, al kiuj aliĝis 98 % de la kursanoj. — La Esp-Klubo en *Oslo* la 13-an de Jan. havis sian novjarfeston. Post komuna manĝo la loka grupo de „Norvega Esperanto-Teatro" bone prezentis la teatraĵeton „Ĉi tie oni parolas Esperante!". Sekvis danco ĝis la dua horo. S-ro G. Bowitz kun sukceso finis kurson por studentoj. Novan kurson komencis s-ro kapitano R. Bugge Paulsen. — En *Hammerfest*, la plej norda urbo sur la Tero, fondiĝis Esperanto-klubo kun 18 membroj.

Palestino. — La 20-an de Januaro okazis en *Jerusalemo* la unua tutlanda Esperanto-kongreso kun granda sukceso. Samtempe oni honorigis la unuan palestinan pioniron de Esperanto, s-ron N. B. Havkin, okaze de lia 60-a naskiĝtago. En la kunveno partoprenis ĉ. 60 gesamideanoj el diversaj partoj de la lando. Oni priparolis ekspozicion de Esp-aĵoj kaj Mez-Orientan kongreson, aranĝotajn okaze de la Levanta foiro dum Aprilo. Ĉi tiu kunveno montras novan, viglan Esperanto-vivon en la sankta lando.

Portugalujo. — S-ro Antonio Barata gvidas kurson en *Vale de Figueira do Ribatejo*. La loka grupo aranĝis sukcesan ekspozicion de Esp-aĵoj.

Svedujo. — S-ro Tiberio Morariu komencis kurson en *Borås* por la anoj de la loka sekcio de la Sveda Nacia Junulara Federacio. — Dum sia restado en *Göteborg* ges-roj Henriko kaj Erika Seppik faris 19 lumbildajn paroladojn pri Estonio en la lokaj lernejoj. Ĉeestis entute pli ol 2000 gelernantoj kaj geinstruistoj, kiuj elmontris grandan intereson al la „vivaj geografiaj lecionoj". — Kun granda sukceso finiĝis la kursoj de ges-roj Seppik en *Falköping, Skara, Kvänum, Surte* kaj *Agnesberg*. Novaj kluboj fondiĝis en Agnesberg kaj Surte. Niaj diligentaj pioniroj komencis novajn kursojn en *Alvesta, Lessebo* kaj *Växjö*.

Svislando. — En *Sankt-Gallen* kurson komencis f-ino Alice Früh.

MARK TWAIN (1835—1910),

la fama amerika humoristo, ankaŭ kiel oratoro havis tre bonan nomon. Kiam li publike paroladis, liaj aŭskultantoj ne ĉesis ridi. En Ameriko ĉiu homo tiel bone sciis tion, ke kiam ajn li ie komencis paroladi, jam ĉe la unua vorto la publiko eksplodis en rido, eĉ se oni ankoraŭ ne konis lin persone. Foje oni invitis lin al iu malgranda urbo de la ŝtato Connecticut, por fari prelegon. Mark Twain akceptis la inviton, sed en la lasta momento intervenis malhelpo kaj li devis resti hejme. La societo, kiu la prelegon aranĝis, falis en tre malfacilan situacion. La prezidanto tiel solvis la problemon, ke li rapide serĉis alian verkiston por prelegi. Li trovis tian en la persono de iu sinjoro Hornet, kiu montris sin preta prelegi pri la malutiloj de la alkoholismo. Sed la informo de Hornet venis tiel malfrue, ke jam ne estis tempo por sciigi la ŝanĝon al la publiko. En la tuta urbeto neniu konis s-ron Langhorne (ĝi estis la vera nomo de Mark Twain). Kiam s-ro Hornet aperis sur la podio, la prezidanto prezentis lin al la publiko, sed neniu atentis la nomon, ĉar ĉiu sciis, ke la nomo „Mark Twain" estas nur pseŭdonimo. La ĉeestantoj simple opiniis, ke la vera nomo de Mark Twain estas: Hornet. Sinjoro Hornet ĝentile klinis sin, mute ĉirkaŭrigardis kaj komencis:

— Estimata ĉeestantaro! La malmodereco estas la malbeno de la lando.

La publiko ekridis. Hornet tuj komprenis, ke la ridadon ne povis kaŭzi liaj vortoj. Li pensis, ke io sur lia vestaĵo ne estas en ordo. Tial li flustre demandis al la prezidanto, ĉu li ne vidas ion, kio estas kontraŭ la etiketo. La prezidanto reflustris, ke ĉio estas en la plej bona ordo. La oratoro trankviliĝis kaj daŭrigis:

— La forta trinkaĵo postulas pli multajn viktimojn ĉe ĉiu malsano.

Nova, pli forta ridado. Hornet ne komprenis, kial ĝi okazas, sed tamen li daŭrigis:

— La drinkado detruas la familian feliĉon. (Granda ridado.) La drinkado pelas al morto eĉ la plej fortajn junulojn.

Je tiuj vortoj eksplodis ridegado, kiu ne volis finiĝi. Hornet estis en granda kaj kreskanta embaraso. Li opiniis, ke oni mokas lin. Tial li daŭrigis kun ŝajnigata trankvileco:

— Ni devas sufoki la serpenton de la drinkado.

Grandega rido. La tuta publiko, escepte la prezidanto, estis kvazaŭ freneza de bonhumoro kaj ridadis tenante la ventron. Tio estis jam iom troa. Hornet koleriĝis kaj ekscitite kriegis:

— Kion mi diras, estas la pura vero!

La aŭdantoj eĉ pli forte ridis. Hornet turnis sin al la plej proksime sidanta viro kaj demandis:

— Diru, sinjoro, kion ridindan vi trovas en miaj frazoj?

— Hahaha! Nur bonvolu tiel daŭrigi! — blekis la demandita persono.

— Sinjoroj, via konduto estas en la plej alta grado ofenda! — kriis Hornet furioze.

La ridado atingis la pinton. Unu el la aŭdantoj, kiu bonege amuzis sin, tiel instigis la parolanton:

— Brave, Twain, nur tiel daŭrigu!

Nur nun komencis vekiĝi en la prezidanto la konjekto. Li leviĝis kaj klarigis la miskomprenon. La ridado tuj ĉesis kaj ĉiu vizaĝo fariĝis serioza. Sed Hornet ne povis trankviliĝi. En la plej solena silento li deklaris, ke li ankoraŭ neniam estis en urbo, kiu enhavas tiom da azenoj kaj stultuloj, kiel ĉi tiu urbo. Post tiuj vortoj li rapide forlasis la salonon.

GEORGES CLÉMENCEAU (1841—1929),

la iama franca ĉefministro, estis foje demandata, ĉu ankaŭ li estis foje treege enamiĝinta? La granda politikisto respondis:

— Kompreneble jes. La amo estas tia infekta malsano, kiun ĉiu homo devas trapasi, almenaŭ unufoje en la vivo. Ĉi tiu malsano ordinare du homojn samtempe atakas. Kiu pli frue resaniĝas, por tiu la alia, kiu ankoraŭ suferas en la malsano, estas netolerebla. Sed feliĉe ankaŭ la resaniĝado plej ofte okazas paralele.

AL LA VENKO!

AL NIAJ LEGANTOJ!

Sur ĉi tiu paĝo ni regule publikigas informojn pri la gravaj progresoj de Esperanto kaj de tempo al tempo ni faros alfabetan registron pri ili, por helpi al niaj propagandistoj.

Ni petas niajn legantojn, ke ili traduku la informojn kaj klopodu publikigi ilin en siaj lokaj nacilingvaj ĵurnaloj. Per tio ili faras tre valoran propagandon.

Al la venko!

La redakcio.

202. **Ĉeĥa gazeto kun Esperanto-rubriko.** — La ĉeĥlingva gazeto *Ĉeské Slovo* en Januaro de la nuna jaro komencis regule aperigi ĉiusemajne Esperanto-angulon. La gazeto estas eldonata en 60,000 ekzempleroj.

203. **Hindoĉinaj policistoj lernas Esperanton.** — En Hanoi, ĉefurbo de Hindoĉinujo, funkcias speciala Esperanto-kurso por policistoj. En la kurso partoprenas 20 kriminalaj policistoj.

204. **Internacia Esperanto-kurso por poŝtistoj, telegrafistoj kaj telefonistoj.** — Simile, kiel en la pasinta jaro, ankaŭ en la nuna jaro okazos en la nederlanda urbo Arnhem speciala internacia Esperanto-kurso sub la gvidado de Andreo Cseh, La kurson aranĝas la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto kaj la Internacia Ligo de Esperantistaj P. T. T.-Oficistoj, en kunlaboro kun la nederlanda P. T. T.-direkcio, kiu invitis la alilandan poŝtistaron pere de la Universala Poŝta kaj Telegrafa Unio en Bern kaj konsentis doni specialan libertempon al partoprenontaj P. T. T.-geoficistoj. La kurso okazos en la tagoj 2—12 Julio. Por informoj kaj aliĝo oni turnu sin al la Intern. Cseh-Instituto de Esp., Riouwstraat 172, Den Haag.

205. **La Esperanto-stelo en episkopa blazono.** — La nova ĉeĥoslovaka katolika episkopo D-ro Antono Eltschkner metis la Esperantistan insignon en sian episkopan blazonon, kiel simbolon de la internacia frateco kaj paco. *(Vidu la bildon!)*

206. **Ilustrita revuo uzas Esperanton.** — La granda ilustrita revuo „Rusland van Heden", aperanta en nederlanda lingvo ĉiumonate en Amsterdam, klarigas ĉiujn siajn ilustraĵojn ankaŭ per Esperanto-lingvaj subskriboj. *(La adreso de la redakcio: Gerard Vanter, Nieuwe Heerengracht 17, Amsterdam.)*

207. **Esperanto-libroj en la ŝtata biblioteko de Hindoĉinujo.** — La Centra Hindoĉina Biblioteko en la urbo Hanoi aĉetis multajn Esperanto-lingvajn librojn beletristikajn kaj sciencajn.

208. **Esperanto-kurso en la latva poŝtista gazeto.** — La gazeto *„P. T. Dzive"* (Poŝtista kaj Telegrafista Vivo), monata organo de la latva P. T. T.-oficistaro, de Decembro 1933 regule publikigas Esperanto-kurson kaj ampleksan informaron pri la Esperanto-movado. Plue, la gazeto uzas Esperanton por kolekti informojn pri la eksterlanda P. T. T.-vivo. *(La kurson gvidas kaj la eksterlandan kronikon kompilas s-ro Ed. Dance en Valmiera, Latvujo. Li danke akceptas de kolegoj provizon de informa materialo.)*

209. **Filozofia vortaro en Esperanto.** — Ĵus aperis en la Esperanto-lingvo zorge ellaborita filozofia faka vortaro, kiu entenas la vortojn de la filozofiaj sciencoj en Esperanto kaj tradukoj en angla, ĉeĥa, franca kaj germana lingvoj, krom tio detalaj klarigoj Esperant-lingvaj. La libron, kiu pruvas la seriozan progresadon de la Esperanto-movado, verkis la ĉeĥoslovaka profesoro D-ro Stanislav Kamaryt.

210. **La Norddeutscher Lloyd eldonis novan Esperanto-lingvan prospekton.** — La grava germana ŝipkompanio „Norddeutscher Lloyd" en Bremen ĵus eldonis en Esperanto-lingvo luksan prospekton pri siaj ŝipvojaĝoj dum la jaro 1934. La prospekto entenas la programon kaj desegnitan veturplanon de 20 grandaj societaj vojaĝoj sur la maroj ĉirkaŭ Eŭropo.

211. **Biskvita fabriko produktas „Esperanto-kekson".** — Ĵus aperis sur la merkato nova fabrikaĵo sub la nomo „Esperanto-kekso", produktata de la biskvito-fabriko „Karolina" en Osijek (Ĵugoslavio).

212. **Hindoĉinaj gazetoj kun Esperanto-rubriko.** — La ĉiusemajna anam-lingva gazeto *„Ban-Tre"* (Junularo), fondita en Decembro 1933, enhavas en ĉiu numero Esperanto-rubrikon. — La plej grava ĉiutaga anam-lingva gazeto *„Ngo-Bao"* (Tagmezo), aperanto en Hanoi, de Decembro 1933 ĉiusemajne regule publikigas novaĵojn pri Esperanto en speciala konstanta rubriko.

213. **Norvega infan-gazeto kun Esperanto-kurso.** — La plej disvastigita infan-gazeto en Norvegujo: *„Norsk Barneblad"*, aperanta ĉiusemajne en nov-norvega lingvo, komencis publikigi kurson de la lingvo Esperanto. *(La kurson redaktas D-ro Ottmar Fischer. La adreso de la gazeto: Ö. Slottsgate 6 Oslo.)*

214. **Zamenhof-strato en Montbéliard.** — En la franca urbo Montbéliard la urbestraro donis al unu strato la nomon „Zamenhof-strato". La inaŭguro de la strato okazis en la monato Julio de la pasinta jaro.

215. **Esperanto-lingva romano aperis en ĉina traduko.** — La konata romano de la hungara verkisto Julio Baghy: „Printempo en la aŭtuno", verkita originale en Esperanto, ĵus aperis en la ĉina lingvo, tradukita de s-ro Baki verkisto en Ŝanghajo.

216. **Esperanto en japana apoteko.** — En la japana urbo Tojama la apoteko *Nomura* uzas la lingvon Esperanto sur la etiketoj de la produktaĵoj, kiuj estas vendataj al eksterlando. Ĉar la vortoj de Esperanto estas internacie faci komprenataj, ankaŭ neesperantistaj klientoj estas helpataj pe la Esperanto-lingvaj presaĵoj.

Ĉiu poŝtisto

en la tuta mondo devas lerni Esperanton!

Varbu partoprenantojn

por la internacia P.T.T.-kurso en Arnhem!

Legu la informojn sur la lasta paĝo!

la mondo ridas

La nunaj tempoj.

— Kia afero estas, ke vi postulas kvindek frankojn por gardi mian aŭtomobilon dum duona horo?

— Sed sinjoro, en la nunaj tempoj! Kiu garantias, ke vi revenos por ĝi?

(Vârt Hem)

Moderna miraklo.

— Admirindan aferon mi vidis hodiaŭ! La antaŭa parto serpento, la malantaŭa krokodilo!

— Neeblaĵo! Kie vi estis, ĉu en la akvario?

— Ne! En ŝuvendejo!

(Söndagsnisse)

Vivbazo.

— Diru al mi, Johano, el kio vi vivas, ĉar vi ja tute ne havas ian profesion?

— Se mi bone pripensas, ankoraŭ ĉiam el tiu florpoto, kiu dum la printempo falis sur mian kapon.

(Schweitzer Illustrierte)

Superflua.

— Mi volas aĉeti trinkvazon por mia hundo.

— Bonvolu, sinjorino! Jen, tre taŭga plado! Eĉ la surskribo staras sur ĝi: „La trinkilo de la hundeto", por ke hazarde oni ne uzu ĝin por alia celo.

— La surskribo estas superflua. Mia edzo neniam trinkas akvon, kaj mia hundo ne povas legi.

(Journal Amusant)

Konata vizaĝo.

— Vi ŝajnas esti tre konata al mi. Ankaŭ aliloke mi vidis jam vian vizaĝon...

— Pardonon! Mian vizaĝon vi povis vidi ĉiam nur sur mia kapo!

(London Opinion)

En restoracio.

— Diru, kelnero, kiam oni aĉetis ĉi tiun kankron?

— Pardonu, sinjoro, mi ne scias tion, ĉar nur de du semajnoj mi laboras en ĉi tiu restoracio.

(Le Journal)

Amerikaj turistoj.

— Kaj kiel vi povis dum tri tagoj rigardi la tutan urbegon Romo?

— Tre simple: mia edzino vizitadis la preĝejojn, mia filino la teatrojn kaj mi la trinkejojn.

(Il Travaso)

Solvo.

— Anjo, kion vi dirus, se mi nun ĉi tie antaŭ la tuta societo kisus vin?

— Ho, ne diru frenezaĵon! Mi estas tro varma, prefere ni eliru en la freŝan aeron.

(Schweitzer Illustrierte)

Certa doto.

— Mi aŭdis, ke vi donos al via filino unu milionon kiel doton. Ĉu vi heredis en la lastaj tempoj?

— Ne, sed mi aĉetis por ŝi unu loton de la ŝtata loterio.

(Ric et Rac)

Interparolo.

— Vi nur tiam estas al mi afabla, kiam vi bezonas monon!

— Sed karulo, mi ja ĉiam estas afabla al vi...

— Bedaŭrinde!

(Vârt Hem)

Lingvistiko.

— Ĉu via kara filino parolas ankaŭ fremdajn lingvojn?

— Jes ja! En dek-du lingvoj ŝi povas diri la jes-on, kiam oni petas ŝian manon.

(Judge)

Reĝustigo.

— Estas terure, kiel vi kondutas, Oskaro! Refoje viaj kolegoj forigis vin de la societa tablo pro la skandalo, kiun vi faris!

— Tute male! Ili foriris kaj mi restis!

(Tit Bits)

Bazo por kredito.

— Kion vi pensas, ĉu mia nova tajloro donos al mi krediton?

— Ĉu li jam konas vin?

— Ankoraŭ ne.

— Tiam vi provu! Verŝajne ĝi sukcesos.

(Berliner Illustrierte)

Librotenado.

— Sinjoro direktoro, sub kiu titolo mi devas enskribi viajn perdojn ĉe la ĉevalkuroj?

— Nu, enskribu ilin inter la „kurantaj elspezoj".

(Fliegende Blätter)

NOVAJ LIBROJ

Eŭgeno Mihalski: KANTOJ DE L' AMO KAJ SOPIRO. (Poemoj de naiva juno.) 48 paĝoj. Eldonis: N. Szapiro en Varŝavo, Nowolipki 8. Prezo: -.70 sv.fr. — Libreto entenanta 35 lerte verkitajn poemojn de la rusa Esperanto-poeto E. Mihalski, ano de la Lingva Komitato.

Victor van Nispen: PRI PIEDPILKLUDANTO. Tradukis el la holanda lingvo: Frato M. Bartholomeus. Kun desegnaĵoj de St. de Reuder. 96 paĝoj. Eldonejo: Piet Smits en Tilburg (Nederlando). Prezo: bindita 1.30 ned. guld. — Rakonto pri okjara knabo, kiu ricevas donace belan piedpilkon kaj pro ĝi trapasas diversajn aventurojn. La libro estas taŭga legaĵo por Esperantistaj infanoj.

Jón Svensson: NONI KAJ MANI. Rakonto por la junularo. El la germana lingvo tradukis Paul van den Hövel. 160 paĝoj. Eldonejo: Josef Habbel en Regensburg (Germanujo). Prezo: broŝurita 1 gmk., lukse bindita kun ora preso: 2 gmk. — Ĉi tiu ĉarma rakonto, verkita de jezuita pastro, priskribas la aventurojn de du islandaj knaboj sur la maro, kiuj en la vivdanĝero promesas fariĝi pastroj. Unu el ili, Noni, estas la aŭtoro mem. En la germana eldono la libro atingis grandan sukceson kaj sendube ankaŭ la Esperanta eldono plene plaĉos al la internacia publiko.

CURSO COMPLETO DE ESPERANTO. — Esperanto-lernolibro en portugala lingvo, aperanta en serio de apartaj kajeroj. Eldonas la Portugala Instituto de Esperanto en Lisboa (Rua Jardim do Regedor 5-4). La jus aperinta unua kajero entenas enkondukon verkitan de s-ro Roberto das Neves, pri la mondlingva problemo ĝenerale kaj pri Esperanto speciale. La prezo de la 30-paĝa kajero estas 2.50 eskudoj.

Jakob Rosenberg: INTERNACIA FRAZLUDO. — Kartaro por societa ludo, eldonita de la aŭtoro en Tallinn (Estonio), prezo 1 sv. franko. — Post la apero de la „Intima Frazludo", destinita speciale por la estona Esp-istaro, la agema aŭtoro kompilis novan frazaron por internacia uzado. Sur la 64 kartoj estas multaj demandoj kaj respondoj aranĝitaj laŭ alfabeto de la signo-vortoj. La kartaro bone helpos por vigligi la grupajn kunvenojn.

D-ro S. Chazan: SOCIALISMO, GIA IDEOLOGIO KAJ REALIGO. — 47 paĝoj. Eldonejo: N. Szapiro en Varŝavo. Prezo: -.70 sv.fr. — Objektiva kaj senpartia studo pri la diversaj socialismaj sistemoj. La libro estas tradukaĵo supozeble el la pola lingvo. La tradukinto ne estas nomita.

Ĉu vi volas havi belajn librojn?

Aĉetu libro-lotojn!

Legu la informojn sur la 11-a paĝo!

Bildo el „la plej esperantista urbo". — En la norvega urbeto Hamar, kiu havas nur 6000 loĝantojn, dum la lastaj du jaroj 450 personoj lernis Esperanton. Nia bildo montras la gajan publikon de la 5-a kursfina festo, kiu okazis la 10-an de Februaro, post la sukcesplenaj kursoj de nia talenta propagandistino f-ino Margarete Glaser el Berlino, aktiva membro de la Cseh-Instituto. — Inter la personoj, sidantaj sur seĝoj, de maldekstre la 6-a estas: kapitano Rolf Bugge Paulsen el Oslo, prezidanto de Norvega Esperantista Ligo; la 7-a: s-ino Thorsen; la 8-a: f-ino M. Glaser; la 9-a: s-ro Gustav Johannessen, prez. de la societo „La Norda Stelo" en Hamar. La societo ekzistas nur de du jaroj kaj havas 151 membrojn.

En la Pola Turing-Klubo formiĝis aparta Esperanto-sekcio, kies inaŭgura festo okazis la 23-an de Novembro en Varŝavo. Por la anoj de la Klubo komenciĝis Esperanto-kurso sub la gvidado de nia senlaca propagandistino f-ino Halina Weinstein, instruistino de la Cseh-Instituto. Nia bildo prezentas grupon el la partoprenintoj en la inaŭgura festvespero. En la sidanta vico de maldekstre la 5-a persono estas inĝ. W. Modzelewski, prezidanto de la Centra Estraro de la Klubo; la 6-a: D-ro W. Róbin, prezidanto de la Esperanto-sekcio; 7-a: f-ino H. Weinstein; 8-a: s-ro Jan Trzópek, vicprez. de la Esperanto-sekcio; 9-a: s-ro Tadeusz Szwajs; 10-a: s-ro Juljan Jarecki; 11-a: s-ro Borys Strelczyk. — La 22-an de Marto okazos en la Klubo „sveda vespero" sub la protektado de s-ro Einar Hennings, ministro de Svedujo en Polujo. Samtempe malfermiĝos Esp-a ekspozicio. La organo de la Klubo, „Turysta i Auto", havas konstantan Esperanto-rubrikon, kaj la oficejo de la Klubo uzas Esperanton en sia korespondado kun eksterlando.



Interfratiĝo per Esperanto. Ĉeĥa kaj hindaj skoltoj dum la pasintjara skolta mond-jamboreo en Gödöllö, Hungarujo.

Esperantistoj en Ede (Nederlando, apud Arnhem) antaŭ la propra klubdomo de la loka Esp-societo „La Verda Standardo". La domo enhavas kunvenejon por pli ol cent personoj.

Ges-roj Henriko kaj Erika Seppik (signitaj per × kaj × ×), la bone konataj estonaj geinstruistoj de la Cseh-Instituto, fervore laboras nuntempe en Svedujo. Nia bildo montras ilin kun la estraranoj de la klubo „Sepino", fondita honore al s-ino Seppik.

En Rotterdam (Nederlando) ekzistas fervora grupo de Esperantistaj tramistoj kaj aŭtobus-kondukistoj, kiuj uzas ĉiun okazon por propagandi la mondlingvon. Nia bildo prezentas kvar bravajn samideanojn, kiam ili alvokas la publikon lerni Esperanton.

Fraŭlino Ilonjo Galambos el Hungarujo, ŝatata instruistino de la Cseh-Instituto, de pluraj monatoj sukcesplene gvidas Esp-kursojn en urboj de Danujo.

D-ro Franz Christanell en Salzburg (Aŭstrio), malnova fidela disvastiganto de Esperanto, instruisto de la Cseh-Instituto, gvidas nuntempe kun multa sukceso Esp-kursojn en la universitato de Salzburg.

LA MONDO ESTAS INTERESA

Dancantaj vespertoj. — De tago al tago ni aŭdas mirigajn novaĵojn pri la dresado de bestoj kaj nun ni jam emas kredi, kesur tiu kampo ne ekzistas maleblaĵoj. Estas ja konate, ke oni sukcese dresas kaj instruas ne nur domajn bestojn, sed ankaŭ sovaĝajn, eĉ pulojn kaj similajn insektojn. Lastatempe en tiu fako admirindajn sukcesojn atingis la germana best-psikologo Albert Kroo, kiu faris interesajn psikologiajn eksperimentojn per vespertoj kaj sukcesis eduki du vespertojn ĝis tiu grado, ke ili povas fari laŭ muziko diversajn dancajn movojn.

★

La tomato ĉe la indianoj. — La terpomo, la maizo, la tabako, ĉiuj ĉi tiuj utilaj kreskaĵoj, el Ameriko venis al Eŭropo. Same ankaŭ la tomato. Sed la tomaton la indianoj tenis kiel ornaman kreskaĵon. Ili nomis ĝian ruĝan frukton „ampomo", sed tute ne manĝis ĝin. Ankaŭ tiuj blankuloj, kiuj ekloĝis en Ameriko, dum longa tempo ne manĝis ĝin, sed nur ĝian belecon ĝuis. Pli ol cent jaroj pasis, ĝis kiam fine ili gustumis ĝin kaj konstatis, ke ĝi estas bonega manĝaĵo.

★

Kantantaj hundoj. — La hundo estas la plej fidela kunulo de la homo, sed nenie ĝi estas pli utila, ol tie, kie la vivo estas la plej malfacila: en la regno de la eterna neĝo kaj glacio. Por la eskimoj la hundo estas ne malhavebla, preskaŭ sola dombesto. La tieaj hundoj estas tre similaj al la lupoj, pro la dika felo kaj suprenstarantaj oreloj. Al la eskimo-vilaĝoj estas granda bato, se ia malsano ekstermadas la hundojn. Ekonomia krizo kaj malsato estas la sekvo. La eskimo-hundoj estas tre inteligentaj. Laŭ ilia voĉo oni povas eltrovi, kion ili sentas. Ĉiam aliajn voĉojn ili aŭdigas, se ili estas koleraj, ĝojaj aŭ malsataj. Se unu el ili faras ian malbonaĵon, la ceteraj ĉiuj malaprobe murmuras, sciante, ke ili ĉiuj ricevos punon pro la kulpo de unu. Kiel la norvega esploristo Amundsen skribas, la eskimo-hundoj ofte dum pluraj horoj kune blekadas, „kvazaŭ ili estus bone instruita kanthoro". Samtempe ili komencas tiun kantadon, kvazaŭ iu nevidebla muzikestro direktus ilin, kaj samtempe ili finas ĝin. Ĝis nun oni ne sukcesis trovi la kaŭzon de tiu kantado. La plej verŝajna klarigo estas, ke tiamaniere ili amuzas sin.

★



La *fungo-domo* en Hollywood, Kalifornio. En ĉi tiu restoracio, konstruita en la formo de fungo, oni ricevas nur tiajn manĝaĵojn, kiuj estas faritaj el fungoj.

★

Olimpiado de simioj. — En Afriko, inter la marĉoj en la regiono de la lago Ĉad vivas la gento de la mahili-negroj. Tiu popolo estas fama pri tio, ke ĉe ĉiu domo oni tenas almenaŭ unu aŭ du malsovaĝajn simiojn. Ĉiujare dufoje oni aranĝas por la simioj laŭregulan konkurson. La maljunuloj de la gento elektas altan kokospalmon, en kies supro pendas unu kokosnukso. La celo de la konkurso estas, ke la simioj malsuprenportu la kokoson. Je donita signo oni liberigas la simiojn kaj tiu persono gajnas, kies simio kaptas kaj alportas la kokoson. La premio de la konkurso estas ofte tre altvalora: granda kvanto de faruno, bestoj, vitraj perloj kaj similaj. Inter la negroj estas kelkaj riĉuloj, kiuj pro sia pasio tenas tutan aron da speciale dresitaj simioj.

★

La mirinda vivo de la abeloj. — Jam de longe oni konstatis tion, ke en la regno de la abeloj regas severa divido de laboro. Apartaj abel-grupoj faras la diversajn laborojn, kiel ekzemple la purigadon, la flegadon, la gardadon, la vaks-faradon, la serĉadon de nutraĵoj, la konstruadon de vojoj k.t.p. En la lastaj jaroj per eksperimentoj oni konstatis ankaŭ tion, ke ĉiu labor-abelo dum sia vivo trapasas laŭvice ĉiun labor-grupon dum certa tempodaŭro. La transiro el unu grupo en alian estas kunligita kun difinitaj ŝanĝiĝoj en la organoj.

★

La bruo influas la vidpovon. — La rusa scienculo Kravkov faris interesajn eksperimentojn pri la kunligo inter la aŭdado kaj vidado. Li observadis dek homojn kaj konstatis, ke ĉe aŭdo de bruo ili havis ŝanĝiĝon en la vidpovo. Kiam per telefono pli forta sono tuŝis iliajn orelojn, ili vidis du nigrajn punktojn sur blanka fono pli klare, ol ordinare. Sed inter la samaj cirkonstancoj ili ne vidis tiel bone du blankajn punktojn sur nigra fono. Ĉi tiu influiteco de la vid-nervoj restas ankoraŭ dum kelka tempo post la forsono de la bruo.

★

La plej fekunda verkisto. — La plej fekunda verkisto de la mondo estis sendube la hispana Lope de Vega, kiu skribis dumil teatrajn verkojn. Se ni tiel kalkulas, ke li laboris kiel verkisto dum kvindek jaroj, tiam li devis ĉiujare skribi almenaŭ kvardek teatraĵojn. Tia fekundeco estas preskaŭ neimagebla.

LA VOJAĜOJ DE GULIVERO AL LILIPUTLANDO

de: JOS. A. DE ROOS

Prezo: afrankite 1.25 ned. guld.

Jus aperis:

PRI PIEDPILKLUDANTO

Verkis Victor van Nispen, ilustris St. de Reuder, tradukis Frato M. Bartolomeus.

Speciala libreto por junaj Esperantistoj.

Prezo: bindita, 1.30 guld., afrankite.

PRESEJO PIET SMITS en TILBURG (Nederl.)

Poŝtĉekkonto: 115243.

Belegaj libroj eldonitaj en Japanujo:

PRAKTIKA GVIDO DE LA KORESPONDO EN ESPERANTO. Verkis J. H. Iŝiguro en Tokio. 310 paĝoj. Kun multaj bildoj kaj faksimiloj. Lukse bindita. — *Prezo 2.50 guld.*

MODERNA VORTARO ESPERANTO-JAPANA. Kompilis J. H. Iŝiguro en Tokio. 520 paĝoj. La plej kompleta listo de la vortoj aperintaj ĝis nun en la Esperanta literaturo. Luksa mola tolbindaĵo kun ora preso. *Prezo 2.— guld.*

Aĉeteblaj ĉe La Praktiko.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉui demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respondmarkon.

S-ro R. P. en M. (Franc.) — *„Kial ili ne donis al mi tion, kio hodiaŭ estas postulata de mi?"* Ĉi tiu frazo estas korekta, sed ĝi estas du-signifa. Kiu estas la postulanto? Ĉu mi, aŭ ili? Se la kunteksto ne klarigas tion, vi devas uzi aktivan formon: „Kial ili ne donis al mi tion, kion ili hodiaŭ postulas de mi?", aŭ: „....., kion hodiaŭ mi postulas?"

S-ino N. K.-M. en U. (Ned.) — 1. „Li venis hejme." La frazo estas malĝusta. Oni devas diri: *hejmen*, ĉar ni parolas pri movo al la hejmo, kaj en Esp-o la vorto „al" estas anstataŭigata per la finaĵo „n". — 2. „La koloroj paliĝas pro la suno." En ĉi tiu frazo la prepozicio „pro" estas bona. La vorto „per" ne estas taŭga. — 3. „La flugmaŝino alteriĝis sur la marbordo." La frazo estas bona. Ke ni ne povas diri: „sur la marbordon", tion vi tuj vidos, se ni dissolvas la esprimon „alteriĝis". Jen: „La flugmaŝino *iris al la tero* sur la marbordo." Ne estas bona: „al la marbordo", sed bona estas ankaŭ: „ĉe la marbordo". — 4. Por la nederlandaj vortoj *sjoelbakken* kaj *sjoelen* laŭ nia scio ankoraŭ ne ekzistas Esp-a traduko. Ni esperu, ke la eminentuloj de la nederlanda Espmovado interkonsiliĝos kaj elektos taŭgan vorton. Ĝis tiam nenio malhelpos, ke vi uzu la vorton „ŝuli".

S-ro N. W. en P. (Franc.) — 1. Esperanton *konas* tiu persono, kiu estas informita pri la ekzisto kaj pri la ecoj de nia lingvo, kvankam ne komprenas ĝin. Esperanton *scias* tiu persono, kiu komprenas kaj uzas ĝin en parolo aŭ skribo. — 2. „Mi renkontis ilin akompanantajn iliajn amikojn." En ĉi tiu frazo estas eraro. Anstataŭ la vorto „iliajn" devas esti: „siajn". — 3. „Mia amiko skribis al mi, ke laŭ lia opinio mia letero enhavis erarojn." Ĉi tiu frazo estas tute bona. La esprimo „laŭ lia opinio" estas ĝusta. Se vi dirus: „laŭ sia opinio", tiam la letero havus la opinion.

S-ro B. G. en Ŝ. (Litovio). — 1. „Intersteno" estas la nomo de stenografia sistemo. — 2. „Skabeno" estas altranga urba oficisto, kun kiu la urbestro regas la urbon. Same kiel la ŝtato havas diversajn ministrojn, ankaŭ la urbo (en kelkaj landoj) havas skabenojn (ekz-e: de instruado, de financoj k.t.p.).

F-ino M. E. S. en L. (Angl.) — „Mi vidas ses sinjorojn sidantaj ĉirkaŭ ronda tablo." La frazo estas erara. Oni devas diri: *sidantajn*.

S-ino E. F. en K. (Germ.) — La vorto „kara" havas du signifojn: 1) amata ,proksima al la koro; 2) multekosta.

S-ro J. K. en P. (Sovjetunio). — Vi deziras, ke anstataŭ la senpaga koresponda anonceto ni sendu al vi senpage la luksajn bindotabulojn por la jarkolektoj 1932 kaj 1933. Ĉu vi serioze skribis tion, aŭ nur ŝercis?

S-ro M. T. en R. (Franc.) — Dankon pro via respondo. Nin tre ĝojigas via konstato, ke „La Praktiko ne povas plu kor-alkapti, ĉar ĝi jam de longe ĉiujn korojn plenakiris".

S-ro E. D. en V. (Latvio). — Ni volonte pruntedonos niajn kliŝojn, kontraŭ la repago de la sendkosto. Bonvolu elekti la taŭgajn. Ni estas feliĉaj pro via granda kontenteco pri La Praktiko.

S-ro G. B. en C.-C. (Usono). — Jes, vere, la valoro de la usona dolaro en la pasinta jaro multe falis. Antaŭe unu dolaro valoris 2.50 ned. guldenojn, sed hodiaŭ ĝi valoras nur 1.48 guld. Vi estas feliĉa, ĉar vi ne scias pri tio. Sed ni bone scias, ĉar per tiu valor-falo ni suferis gravan monperdon.

S-ro H. B. en B.-A. (Argent.). — Via informo, ke vi jam dufoje tralegis de la unua litero ĝis la lasta la Originalan Verkaron de Zamenhof, kiun vi gajnis kiel ĉefpremion en la konkurso de la eldonejo Hirt & Filo, konvinkas nin pri tio, ke vi estis la ĝusta persono, kiu devis ĝin gajni. Vi vidas, ke la sorto ne estis blinda. Via ago estas imitinda ekzemplo por ĉiu samideano.

S-ro A. B. en S. (Polujo). — La originalaj poemoj de via klubano s-ro B. W. atestas pri lerteco en la versfarado kaj pri riĉa idealista animo, sed estas ankoraŭ pluraj eraroj en la vers-tekniko. Li studu la Parnasan Gvidlibron kaj post la ĝustigo de la versoj via klubo bone povos uzi la poemojn por komuna kantado.

LIBRO-LOTERIO de LA PRAKTIKO

2000 premioj. — Per unu loto oni povas gajni du premiojn. — Unu loto kostas nur 0.10 guld. — 11 lotoj kostas nur 1.— guld. — Oni povas pagi per poŝtmarkoj. (vidu la valortabelon sur la 2-a paĝo). — La detalaj informoj aperis en la Januara numero.

LA LISTO DE LA PREMIOJ (DAURIGO:)

76 **Naturscienco, Mondkoncepto, Religio.** Scienca verko de D-ro. J. Reinke, el la germana lingvo tradukis E. Brenken. 164 paĝoj.

77 **Streĉita kordo.** Poemlibro de D-ro K. Kalocsay.

78 **El la „Camera Obscura".** Noveloj de Hildebrand. El la holanda lingvo tradukis H. C. Mees.

79 **La arto de memdisciplino.** Scienca verko de Prof. Baudouin.

80 **Pola Folkloro kaj Popolkanto.** Verkis S. Grenkamp.

81 **La Bulgara Lando kaj Popolo.** Kun etnografia landkarto. Verkis I. H. Krestanov.

82 **Bonhumoro.** Moralfilozofia eduka kaj kleriga verko de Paul Nyssens.

83 **La morto de Smail Aga Ĉengijiĉ.** Kroata nacia eposo. Kun multaj bildoj. Lukse bindita, kun ora preso.

84 **Preter la Vivo.** Poemaro de Julio Baghy.

85 **La vojaĝoj de Gulivero al Liliputlando.** Tradukita de Jos. A. de Roos. Kun belaj ilustraĵoj.

86 **Historio de la Mondlingvo.** Verko de Drezen. 240 paĝoj.

87 **Rumana Bonhumoro.** Bonhumoraj rakontoj tradukitaj el la rumana lingvo de Firu kaj Pragano.

88 **Eksiĝo.** Novelo de N. Jerušalmi. Tradukita el la hebrea lingvo.

89 **Jaĉjo Holm kaj liaj amikoj.** Rakonto por la junularo. 236 paĝoj. Lukse bindita.

90 **La Malŝparulo.** Teatraĵo en tri aktoj, de F. Raimund. Tradukita el germana lingvo.

Daŭrigota

GARDATAJ LOTOJ (daŭrigo). — Anwar 4205-4207, Babos 4272-4281, Beugelink-Bourguignon 4349-4359, Mac Bradaigh 1985-1988, Davison 4168-4178, „Estonto" 3832-3846, Fabricius 3992-3996, Fenton 4153-4159, Gostynski 4316-4326, Hara-Ŝozo 1866-1868, Hasle 1371-1372, de Heer 4179-4204, Kislinger 4160-4167, Kolodziej 1368-1370, Kutscher 4012-4022, Makjaniĉ 1979-1982, Matekoviĉ 4360-4368, Michalski 3732-3742, Muller 3997-3999, Muster 4115-4125, Nejedli 3880-3890, Persson 3918-3931, Poszler 4312, Ritonga 4208-4209, Soewarso 4211, Spaander 3976-3980, Sylow 3821-3831, Vernin 3902-3912, Vodegel 4210.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — Petu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

GRAVA ALVOKO. — Esperantistoj tutmondaj helpu nin! Sendu broŝurojn, gvidlibrojn, bildkartojn por nia aranĝota tutlanda ekspozicio. Inter ni ekzistas multaj skoltoj, kiuj ne kredas, ke Esperanto estas praktike uzata. Ni volas konvinki ilin. — Skolta Esperantista Rondo, Eötvös-u. 2, Szeged (Hungarujo).

PROPONO. — Kiu volas legi la tutan jarkolekton 1933 de „Esperanto", skribu al s-ro G. H. van Soest, instruisto en Arcen (Nederlando), por ricevi ĝin senpage.

PETO. — Ĉiulandanoj, sendu ekspozician materialon (Esp-ajn kaj naciajn libretojn, gazetojn, bildkartojn k.t.p.) al s-ro H. Thien, Heldstrato 27 en Winterswijk (Nederlando). Respondo garantiata.

BONHUMORO. Verkita de Paul Nyssens, laŭ lia originala franca libro, jus aperinta. Prezo: afrankite 1.25 ned. guld. Aĉetebla ĉe La Praktiko.

KORESPONDADO. — 7 gelernantoj de Esperanto, 20-25-jaraj, deziras korespondi kun la tuta mondo. Adresu al: s-ro Gustav Dismark, Sveaborg, FRITSLA (Svedujo).

LETERVESPERO okazos la 5-an de Aprilo kaj ni atendas leterojn kaj poŝtkartojn el ĉiuj lokoj de la mondo. Adresu al: „La Tagiĝo", Box 129 en Borås (Svedujo).

TURISMA EKSPOZICIO Esperanta malfermiĝos la 22-an de Marto en la Esperanta Sekcio de la Pola Turing-Klubo. Ni tre petas alsendi plej baldaŭ interesan materialon. Adreso: Pola Turing-Klubo, str. Kredytowa 5, Warszawa (Polujo).

PETO. — Grupoj, kiuj eldonas grup-gazeton, sendu al mi ekzempleron. Mi rekompencos per Esp-aj gazetoj. Adreso: s-ro Ernest Payen, 3 bis Rue Victor-Hugo, Anzin (Nord), Francujo.

FILATELISTOJ! — Kataluna filatelisto deziras korespondi kun fremdaj novaj gefilatelistoj. Adreso. s-ro Joan Miravitlles, Carrer Santa Llúcia 49, 3-1., Manresa (Katalunujo), Hispanujo.

LA NOVA LUMO. — Demandoj pri vegetarismo, antialkoholismo, nudismo, biciklismo k.t.p. troveblaj en la internacia korespondaĵo de La Nova Lumo. Prezo: 3 respondkuponoj, sendotaj al la redaktoro: s-ro Milan Miškoviĉ, Solunska 123 en Bitolj (Jugoslavio), kiu kiel montar-amanto korespondas kun ĉiuj landoj per leteroj kaj il. poŝtkartoj (poŝtmarko bildflanke). Kontraŭ 3 resp.-kuponoj li sendas serion de la tutmonda bildkolekto de La Nova Lumo. Kontraŭ 5 resp.-kup. li sendas la bildkolekton kun la intern. korespondaĵo aŭ kun la revuo La Nova Lumo.

FILATELISTOJ! — s-ro Th. J. A. Steur (adreso: van Bleiswijkstraat 60, Den Haag, Nederlando), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Korespondas holande, germane, france, angle kaj esperante.

TRADUKANTO estas serĉata por la holand-lingva libro: „De Wereldbeschouwing der Rozekruisers of Mystiek Christendom" de Max Heindel. La libro ampleksas 279 paĝojn, honorario por la tradukado ne estos pagata. Proponojn oni sendu al: Rotterdamsch Studiecentrum, Bergweg 308.b, Rotterdam.

Itala Esperanto-Centro

Milano, Galleria Vittorio Emanuele 92

ofertas:

Migliorini: ESPERANTA LEGOLIBRO, modela antologio, bind. sv. fr. 1.90
" " " broŝ. " " 1.20

Carlo Goldoni: KURIOZA OKAZAĴO, komedio, gaja novaĵo, lasta novaĵo, klasika verko, ilustrita, luksa eldono (afrankita) ..... " " 1.50

Touring Club Italiano: MILANO KAJ LAGOJ DE LOMBARDIO. — La plej luksa kaj valora gvidlibro ekzistanta en Esperanto, kun 9 bonegaj koloraj litografiaj landkartoj kaj 6 detalaj koloraj urboplanoj, tolbindita ..... " " 4.50

GVIDLIBRO TRA VENECIO, ilustrita, bela volumo ..... " " 2.20

„ITALAJ URBOJ", poŝtkartoj kun Esperanta teksto, serio de 25 kartoj ..... " " 0.90

!!!!! Mendu ĉe Esperanto-Centro Itala, Milano (adreso supre) !!!!! aŭ ĉe La Praktiko.

Aldonu 10%-ojn por la sendkostoj.

GRAFOLOGIO

Ĉiu homo estas scivola. Eĉ la legantoj de La Praktiko. Ili certe deziras koni la karakteron de si mem kaj de siaj amikoj. Por plezurigi nian legantaron, ni malfermas novan rubrikon sub la nomo GRAFOLOGIO kaj en ĝi ni donos grafologiajn analizojn de leteroj ensenditaj de niaj legantoj. Ni interkonsentis kun eminenta nederlanda grafologo, kiu estas preta kontraŭ tre malalta honorario fari koncizajn analizojn, kiuj aperos sub kaŝnomoj en ĉi tiu rubriko.

Niaj legantoj, kiuj volas profiti ĉi tiun favoran eblecon, atente observu la sekvantajn regulojn:

Skribu per via kutima, natura skribmaniero leteron de 10-15 linioj, kun laŭvola enhavo, en tiu lingvo, en kiu vi plej ofte skribas, prefere en via nacia lingvo. Subskribu vian nomon en la kutima maniero kaj indiku vian aĝon kaj sekson. Aldonu libere elektitan kaŝnomon, sub kiu poste la respondo aperos en La Praktiko. La leteron metu en koverton, fermu la koverton kaj skribu sur ĝi: „Al la grafologo de La Praktiko." La fermitan koverton kune kun 0.50 ned. guld. sendu en alia, pli granda koverto al la redakcio de La Praktiko. La sumeton de 0.50 guld. vi povas sendi ankaŭ per respondkuponoj (4 kuponoj) aŭ poŝtmarkoj de via lando. (Vidu la valortabelon sur la 2-a paĝo!)

Nia redakcio transdonos la fermitajn leterojn al la grafologo, kiu traktos ilin plej diskrete. — Oni povas ensendi por analizo ankaŭ skribaĵojn de aliaj personoj.

Se oni deziras grandan, detalan analizon, oni sendu 3 guldenojn. Tiam la respondo estos sendata en aparta Esperanto-lingva letero.

KONKURSOJ

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Januara numero!

88-a konkurso.

SILAB-ENIGMO.

Ban, bil, bri, bro, do, do, fes, fo, fra, go, gra, gri, gri, jo, joĉ, ko, ko, kra, kre, kud, lak, lar, laŭ, lo, lo, mas, met, mo, no, no, no, nuk, pra, pru, ri, ro, ro, ro, sab, so, so, tab, to, to, to, to, tro, za.

El la supraj 48 silaboj formu 24 dusilabajn vortojn kun la jenaj signifoj:

1. Knaba nomo.
2. Parto de la muro.
3. Frukto.
4. Meblo.
5. Muzikanta insekto.
6. Manĝaĵo.
7. Fari veston.
8. Reĝa seĝo.
9. Malmola frukto.
10. Granda sinjoro.
11. Financa instituto.
12. Mezuro de longeco.
13. Veturilo sur akvo.
14. Ruĝa tago en la kalendaro.
15. Sur la muro pendas.
16. La akvo fluas tra ĝi.
17. Ĉiam verda kreskaĵo.
18. La ŝipo havas ĝin.
19. Koloro.
20. Arbara frukto.
21. Speco de glavo.
22. Skribilo.
23. Trinkaĵo.
24. Vestpurigilo.

La mezaj literoj de la ricevitaj vortoj donas interesan proverbon.

Inter la ensendintoj de la ĝusta solvo ni disdonos 6 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la fino de Majo.

Bonvolu precize plenumi la konkursajn regulojn!

89-a konkurso.

ENIGMO

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 98 literoj.

91, 56, 27, 77, 24, 69 = nomo de mondparto
17, 94, 34, 2, 88, 26, 58 = nomo de metalo
68, 6, 40, 16, 73, 86, 60 = tempmontrilo
10, 98, 42, 55, 7, 80, 82, 57, 11 = profesio
14, 43, 66, 95, 59, 97 = bulba floro
29, 71, 24, 32, 78, 13, 63, 37 = orienta lando
76, 48, 20, 2, 83, 30 = manĝilo
33, 62, 18, 84, 46, 72, 58 = nomo de monato
51, 75, 3, 64, 31, 69 = malrapida besteto
1, 87, 54, 82, 12, 39, 22 = ne paroli
96, 53, 38, 50, 61, 30 = parto de la jako
70, 8, 44, 49, 23, 72, 81, 37 = pikanta manĝaĵo
79, 19, 65, 4, 89, 11 = nomo de arbo
93, 28, 47, 90, 9, 77 = parto de la scenejo
45, 2, 94, 5, 40, 91, 81, 69 = nomo de tago
85, 15, 74, 41, 92, 67 = ne diferencanta
52, 38, 82, 21, 35, 97 = manko de sango
25, 16, 84, 36, 55, 49, 11 = bruligilo

1—98 = **bela deklaro de Montesquieu, tre rekomendebla al la nuntempaj politikistoj.**

Inter la personoj bone solvintaj ĉi tiun enigmon, ni dislotos 6 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la fino de Majo.

Bonvolu atente observi la konkursan regularon.

Kupono por la 88-a	Kupono por la 89-a

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj

La Praktiko

ABONPREZO:
Por 1 jaro: 2.50 ned. guld.
„ 1/2 „ 1.25 ned. guld.

La abona jaro komenciĝas en Januaro kaj Julio.

La mendon kaj la pagon oni devas sendi samtempe al: **Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando.**

MANIEROJ DE PAGO:

1) Enpagu la monon al la **poŝtĉekkontoj** de la Int. Cseh-Instituto de Esp., en la jenaj landoj *(post la numeroj de la poŝtĉekkontoj estas la sumo sendota por unujara abono):*

Aŭstrio: Wien A-156933 *(8 ŝilingoj)*
Ĉeĥoslovakio: Praha 500.362 *(40 kronoj)*
Danujo: Kopenhago 34941 *(6 kronoj)*
Germanujo: Berlin 129527 *(4 markoj)*
Hungarujo: Budapest 13201 *(6 pengoj)*
Jugoslavio: Zagreb 41345 *(75 dinaroj)*
Latvujo: Riga 4870 *(5 latoj)*
Nederlando: Den Haag 162626 *(2.50 guldenoj)*
Polujo: Warszawa 190.203 *(8 zlotoj)*
Svedujo: Stockholm 74.126 *(5 kronoj)*
Svislando: Bern III. 6761 *(5 frankoj)*

2) Sendu **papermonon** en registrita letero.
3) Per **poŝtmandato.** Sur la kupono indiku la celon de la pago.
4) Per **UEA-kuponoj.** Valoro: 1 svisa franko = 0.50 ned. guld.
5) Per **poŝtaj respondkuponoj.** Unu kupono = 0.15 ned. guld.
6) Per **poŝtmarkoj** de la landoj: *Belgujo* (35 fr.), *Britujo* (5 ŝil.), *Bulgarujo* (140 levoj), *Estonio* (5 kr.), *Francujo* (25 fr.), *Hispanujo* (12 pes.), *Italujo* (20 lir.), *Norvegujo* (5 kr.), *Rumanujo* (150 leoj.). La sumoj montras la prezon de la jarabono. La poŝtmarkojn oni povas sendi en simpla letero kun netravidebla koverto.

PREMIOJ POR KOLEKTANTOJ DE ABONOJ:

N-ro 5. KONVERSACIA LITERATURO, N-roj 1—4.
„ 6. KONV. LITERATURO, N-roj 5—8 kaj kartona ujo.
„ 7. KONVERSACIA VORTARO, KONVERSACIA GAZETO, LA ENIGMOJ kaj GVIDLIBRO DE ARNHEM.
„ 13. Esperanta Kantareto.
„ 15. 25 poŝtkartoj kun la bildo de la Esperanto-Domo.
„ 16. 10 foto-poŝtkartoj pri la Esperanto-Domo kaj Arnhem.
„ 17. 5 poŝtkartoj kun la portreto de D-ro Zamenhof.
„ 18. „Esperantuja Kanto" kaj „Al la Esperanto-Domo" (du kantoj kun muziknotoj).
„ 19. Granda verda stelo kun la vortoj „ESPERANTO PAROLATA" (kun truoj, ringo aŭ piedo, laŭ elekto).
„ 20. Kvin simplaj Esp-insignoj (verda stelo kun pinglo, broĉo aŭ butono, laŭ elekto).

Ĉi tie detranĉu!

Mendilo de koresponda anonceto

Unufoja enskribo kostas -.45 ned. guld. (= 3 poŝtajn respondkuponojn). La **abonantoj** de LA PRAKTIKO povas unufoje en la jaro **senpage** anonci.

Bonvolu skribi tre klare, se eble, per skribmaŝino. Se vi skribas per mano, bonvolu imiti presitajn literojn.

Nomo: .....

Profesio: .....

Aĝo (laŭvole, sed konsilinde): .....

Adreso: .....

Deziras korespondi per ..... *kun la landoj:* .....

..... *pri la temoj* .....

Specialaj deziroj: .....

Ĉu vi promesas respondi almenaŭ unufoje al ĉiu, kiu al vi skribas? .....

La monon mi sendas samtempe per .....

Dato .....

.....
(subskribo)

Ĉi tie detranĉu

SE VI VOLAS,

ke la Praktiko fariĝu pli granda kaj pli bona,

varbu novajn abonantojn!

Bonvolu sendi la kolektitajn abonojn sur ĉi tiu papero. Skribu tre klare, se eble per skribmaŝino. Se vi skribas per mano, bonvolu imiti presitajn literojn.

Abonprezo kaj maniero de pago.

PREMIOJ:

Senpage ricevas La Praktikon tiu, kiu kolektas 7 abonojn. — Kiu kolektas malpli ol 7 abonojn, tiu povas elekti premiojn el la listo, po unu premion por ĉiu jarabono aŭ por du duonjaraj abonoj.

Kondiĉo: la kolektanto mem devas ensendi la mendon kaj la monon.

Ĉi tie bonvolu detranĉi

S-ro: 1
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 2
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 3
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 4
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 5
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 6
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 7
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: **SENPAGA**
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

Ĉi tie bonvolu detranĉi!

La sumon de ..... *mi sendas samtempe per* .....

Mi elektas la premio(j)n: .....

Dato: .....

.....
(subskribo)

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —.45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. — *La redakcio.*

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro
s-ino = sinjorino
f-ino = fraŭlino
dez. = deziras
koresp. = korespondi
interŝ. = interŝanĝi
L = letero
PK = poŝtkarto
PI = poŝtkarto ilustrita
PM = poŝtmarko
bfl. = la poŝtmarkon gluu sur la bildan flankon
k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

ANGLUJO

Bournville (Birmingham). — Gelernantoj de f-ino *Edna Prince* (12-30 jaraj), 84 Linden Road. — K.ĉ.l., precipe kun belgaj skoltoj, p.ĉ.t., precipe pri mondpaco kaj skoltismo. Certe respondos.

London, W.C. 1. — S-ro *Charles G. Stuart-Menteth*, 65-jara, 31 Upper Bedford Place. — K.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe pri filologio kaj poŝto. Oni bonvolu skribi sian adreson per presliteroj. Certe respondos.

Thorpe Bay (Essex). — F-ino *M. A. Crispin*, instruistino kaj skoltino, „Brome", Daines Way. — K.ĉ.l., precipe kun skolt(in)oj.

AŬSTRIO

Kalksburg apud Wien. — S-ro *Franz Walli*, 41-jara ĝarden-laboristo, Kollegium. — K.ĉ.l., PI pri preĝejoj, sanktulejoj kaj famaj monaĥejoj. Certe respondos almenaŭ unufoje.

BULGARUJO

Eski-Gumaja. — S-ro *Petko Titev*, oficisto en inĝenierejo. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Loveĉ. — S-ro *T. Deveĝiev.* — K.ĉ.l., nur kun virinoj. Respondos akurate.

Tirnovo. — F-ino *Nevena Angelova*, instruistino, Knaba Gimnazio. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos, almenaŭ unufoje.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Kleinkahn apud Bodenbach. — S-ro *Erwin Vana*, studanto. — L, PI, precipe kun ekstereŭropanoj. Certe respondos.

Novy Jičin. — S-ro *Ferd. Pokorny.* — PI k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Smolenice apud Trnava. — S-ro *František Zajic*, fakinstuisto, 29-jara fraŭlo. — L, PI, respondos almenaŭ unufoje.

Stare Mesto apud Uh. Hradište. — S-ro *František Kopriva*, oficisto, N-ro 71. L, PI, p.ĉ.t., precipe pri muziko kaj kanto. Certe respondos.

Uherske Hradište. — S-ino *Helena Kleinová*, Rostislavova 504. — L, PI.

Uherske Hradište. — F-ino *Františka Plachá*, 23-jara oficistino. — L, PI. Respondos almenaŭ unufoje.

Uherske Hradište. — F-ino *Kamila Šestakova*, oficistino — L, PI.

DANUJO

Fredericia. — F-ino *Sigrid Jensen*, 29-jara, Kirkestraat 10. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Fredericia. — S-ro *S. Nielsen*, instruisto, Sundegade 3. — Kun instruistoj el ĉ.l.

Fredericia. — S-ro *S. Thomsen*, Resedavej. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Karise. — 100 Cseh-kursanoj de s-ro Ernst Juneby dez. kor. k.ĉ.l. per PI. Adreso: s-ro *Frandsen*, instruisto.

Middelfart. — S-ro *E. H. Andersen*, Söndergade 57. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — F-ino *Else Larsen*, Vestergade 18. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — S-ro *H. Storgaard*, Algade 66. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — F-ino *Ellen Svendsen*, Idratsvej 2. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Randers. — S-ro *Axel C. Faŭsing*, 20-jara, Middelgade 7. II. — L, PI, PM, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

ESTONIO

Lihula. — S-ro *Anton Põvat*, frizisto, 20-jara fraŭlo. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Rakvere. — F-ino *Helene Ameelina*, Veemi 3. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Precipe kun svedaj gesamideanoj, kiuj partoprenos en la stokholma kongreso.

Vaivara. — S-ro *Johannes Essi*, fervoj-oficisto. — PI, k.ĉ.l., pri ĉasado, faŭno, naturo. Certe respondos samteme.

Viljandi. — 10 gekursanoj dez. kor. kun sud- kaj ekstereŭropaj landoj. Certe respondos almenaŭ unufoje. Adreso: s-ro *E. Anniko*, Suurturg 9-a.

FRANCUJO.

Anzin (Nord). — S-ro *Rémy Huin*, 17 Cité du Jard. — P.ĉ.t., nur kun francaj kolonioj.

Dardilly (Rhône). — S-ro *Fougerousse*, instruisto. — Dez. kor. kun instruistoj ĉ.l.

Dunkerque. — S-ino *Lucienne Vanhersecke*, 11 rue du Maréchal Pétain. — K.ĉ.l., p.ĉ.t., kun s-inoj.

Fives-Lille (Nord). — F-ino *Desenfans*, 64 rue de l'Alcazar. — Kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t., PM.

Malo-les-Bains (Nord). — F-ino *Vernay*, 25-jara poŝtistino, Avenue du Meridien. — K.ĉ.l., p.ĉ.t., prefere kun poŝtist(in)oj.

Périgné (Deux-Sèvres). — S-ro *Gaston Bonnin*, 22-jara instruisto. — L, PI kun Svedujo, Norvegujo, Sovjetunio, p.ĉ.t. Certe respondos.

Roubaix (Nord). — F-ino *Dussart*, 18-jara, 35 rue du Général Sarrail. — K.ĉ.l., escepte Francujo, p.ĉ.t. Respondo garantiata ĝis la 1a de Aprilo.

Saint-Cloud (Seine & Oise). — S-ro*Andreo Cunot*, 27-jara reklam-pentristo, 19 rue du Calvaire. — PI precipe kun Hindujo, Usono, Sudafriko, Persujo, Ĉinujo. P.ĉ.t. Interŝ. PM kaj fotojn. Certe respondos.

Saint-Saulve (Nord). — S-ro *F. Plantive*, 51 rue J. Jaurés. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Thiers (P. de D.) — S-ro *B. Gonon*, 101 rue Victor-Hugo. — Serĉas korespondantojn por novaj gelernantoj de la loka grupo.

GERMANUJO

Dortmund-13. — S-ro *Wilhelm Renz*, 27-jara fraŭlo, ministo, Lindenhorsterstrasse 201. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. PM.

Eberstadt a.d. B. — S-ro*Karl Schmidt*, 19-jara maŝinseruristo, Lämmchesberg 9. — K.ĉ.l. (escepte Germ.), p.ĉ.t.

Köln a/Rh. — „Kolonjaj Tramistoj" dez. kor. k.ĉ.l. Skribu al la prez. de la grupo: s-ro *William Kleinpell*, Gereonswall 85.

Neumark-Sa. — S-ro *Willy Falke.* — Serĉas fidelajn gekorespondantojn en Egiptujo, Afriko, Japanujo, Ĉinujo, Persujo, Turkujo, Hindujo, Ned. Hindujo. P.ĉ.t. Certe respondos.

Oederan (Sa.) — S-ro *W. Muster*, 26-jara uzinestro, Hainichenerstrasse 15. — K.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe kun f-inoj en Norvegujo, Svedujo, Italujo, Japanujo, Grekujo. Certe respondos.

HISPANUJO

Zaragoza. — *Esperanta Societo „Frateco"*, Strato Roda 14-16.

HUNGARUJO

Nagykörös. — S-ro *Nemes Szabó Károly*, 22-jara juristo, Rákóczi-u. 8. — L, PI (bfl.), k.ĉ.l. Interŝ. PM, fotojn. Honeste respondos.

Szeged. — S-ro *Stefano Csombai*, Tarján 18. — Dez. ricevi lingvo-librojn el Sovjetunio, presitajn antaŭ 1914. Reciprokas per lingvo-libroj aŭ hungaraj muziknotoj. Interesiĝas pri la lingvoj parolataj en Sovjetunio. PK. Certe respondos.

Szeged. — S-ro *Ernesto Farkas*, studento, Kecskeméti-u. 12. — PI (bfl.) kun Albanio, Aŭstralio, Afriko, Monako, Japanujo, Persujo, Andoro kaj San-Marino. Certe respondos.

IRLANDO

Belfast. — S-ro *A. R. Campbell*, 35-jara oficisto, 15 Delhi Street. — PI k.ĉ.l.

ITALUJO

Milano. — S-ro *Leone Costantini*, 85 Corso Garibaldi. — Dez. informojn el Ruslando pri ŝtatpruntoj, bankorganizado. Certe respondos.

JAPANUJO

Jokohama. — La anoj de la „Y. M. C. A.-Esperanto-Grupo" dez. kor. kun anoj aŭ Esp-grupoj de Y. M. C. A. Adreso: *Esperanto-Grupo, Y. M. C. A.*, Tokiua-ĉo.

JUGOSLAVIO

Trpajn (Dalmacio). — S-ro *Ante Makjanić.* — Konigas la spertojn pri kaptado de musteloj.

LATVUJO

Riga. — S-ro *P. Smitmanis*, 23-jara kontoristo, Zvaigznu iela 9-5. — K.ĉ.l.

Valmiera. — S-ro *Ed. Dance*, 37-jara poŝtoficisto. — L kun balkanaj, skandinavaj kaj ekstereŭropaj landoj, precipe kun kunlaborantoj de P.T.T.-fakrevuoj. Pri P.T.T.-aferoj.

NEDERLANDO.

Assen. — 14 partoprenintoj de Cseh-metoda kurso dez. kor. k.ĉ.l. Adreso: s-ro *F. A. G. Boermans*, Veenestraat 127.

Berlikum (Frislando). — F-ino *Salome v. d. Zee*, juna instruistino. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe resdondos.

Boxtel. — S-ro *Steph. C. Wellens*, 15-jara rom-katolika studento, Nieuwe Kerkstraat 51. — K.ĉ.l. escepte Sovjetunio, prefere kun Stambulo. Certe respondos.

Culemborg. — S-ro *N. v. d. Stroom*, Korte Achterweg 28. — Precipe kun ekstereŭropanoj. Certe respondos.

Den Haag. — S-ro *C. v. d. Linden*, katolika fervoj-oficisto, Scheldestr. 130. — Kun eksterlandaj kolegoj, p.ĉ.t. Nepre respondos almenaŭ unufoje.

Groningen. — F-ino *Truus Vos*, 20-jara oficistino, Roodeweeshuisstraat 13. — Interŝ. PM k.ĉ.l.

Haarlem. — S-ro *J. M. A. Minderhoud*, instruisto, Pegasusstraat 41. — K.ĉ.l. Certe respondos.
Kerkrade. — S-ro *J. J. Melchior*, 25-jara oficisto, Voccartstraat 7. — Kun progresintaj gesamideanoj en ekstereŭropaj landoj, p.ĉ.t.
Leeuwarden. — F-ino *Hinke Jansma*, Transvaalstraat 2. — Serĉas por si mem kaj por sia lernantino (kun mez-lerneja diplomo) korespondadon, k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Oosterbeek. — F-ino *A. M. E. Rusch*, 24-jara oficistino, Wilhelminastraat 31. — PI, k.ĉ.l. Certe respondos.
Oudorp apud Alkmaar. — S-ro *T. Nestra*, 25-jara agento, Friescheweg E 53. K.ĉ.l., pri motorbicikloj kaj motorsporto. PI bfl.
Rotterdam. — F-ino *Phine de Jong*, 21-jara stenotipistino, Boezemsingel 174. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
Wildervank. — S-ro *G. Kuiper*, 19-jara oficisto, A. 200. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
Witmarsum (Frislando). — S-ino *G. Nauta-Schuuring* serĉas korespondantojn por la anoj de la Esp-Grupo en Makkum. K.ĉ.l.
Zutphen. — S-ro *P. J. Bats*, butikisto, Laarstraat 105. — Dez. kor. k.ĉ.l., interŝ. PM. Certe respondos.

POLUJO

Bydgoszcz. — S-ro *Roman Michalski*, 13-jara gimnaziano, Dworcowa 86. — L, PI, k.ĉ.l., PM. Certe respondos.
Nowa-Wies apud Król-Huta. — S-ro *Bonifacy Makiela*, Ks. Skargi 6. — Interŝ. PM k.ĉ.l.

PORTUGALUJO.

Barreiro. — S-ro *Manoel Pinho Fernandes*, 24-jara fraŭlo, Avenida da Republica 34. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Nepre respondos al ĉiu.
Pôrto. — S-ro *D-ro Jorge Sanches de Castro e Santos*, 25-jara kuracisto kaj poeto, Rua do Bomfim 76-1. — L, PK, PI, k.ĉ.l., precipe kun Ĉinujo, Japanujo, Bulgarujo kaj aliaj slavaj landoj, Sovjetunio, Skandinavio. Pri medicino, poezio k.t.p. Interŝ. PI, PM k.t.p.

SOVJET-UNIO

Moskvo-1. — S-ro *F. Semenov*, Bd. Kozihinskij per. 28 kv. 57. — Dez. interŝ. Esp., germ., angl-, franc-, rus-lingvajn librojn kaj gazetojn eldonitajn en la Sovjet-Unio, kontraŭ nur eksterlandaj Esp-aj libroj. Interŝ. PM, PI. Koresp. p.ĉ.t.
Moskvo-9. — S-ro *Vitalio Kuznecov*, 23-jara kemiisto, Poŝtkesto 1258. — Dez. kor. precipe kun gajaj gesamideanoj, k.ĉ.l., ankaŭ pri teknikaj temoj. Respondos almenaŭ unufoje al ĉiu.

SVEDUJO

Eslöv. — S-ro *Allan Persson*, 20-jara muelisto kaj motoristo, Kvarnnäs. — PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.
Fjärås. — S-ro *Gunnar Nilsson*, 36-jara dompentristo. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Interŝ. plumdesegnaĵojn, fotojn k.t.p.
Folkesta. — S-ro *Gunnar Larsson*, Vegaholm. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
Göteborg. — S-ro *Ernst Andersson*, 34-jara laboristo en globlagro-fabriko, Holländareplatsen 40. — Dez. kor.
Kumla. — S-ro *Arvid Forsman*, poŝtoficisto. — L, PI.
Kvicksund. — *Esperanto-Klubo de Kviksundo.* — 26 klubanoj dez. kor., L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Lund. — S-ro *N. Gunnar Knutsson*, 27-jara masonisto, Arkivgatan 17. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.
Lund. — S-ro *Hans Petersson*, 30-jara sukerbakisto, Östr. Vallgatan 19. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
Skara. — *Esperanta Klubo de Skara*, Box 80. — La membroj dez. kor. k.ĉ.l. L, PI, interŝ. fotojn. Certe respondos.
Västerås. — S-ro *Gustaf Nilsson*, lokomotivisto, Kryddgårdsgatan 12. — Sendu 100 malsamajn PM el via lando kaj vi ricevos 100 samvalorajn el Svedujo.

USONO

Hollywood (Kalifornio). — S-ro *Prof. J. G. Van Zandt*, 1946 Vista del Mar Avenue.
Los Angeles (Kalifornio). — S-ro *Erik Ekström*, 2701 Palm Grove Ave.
Los Angeles (Kalifornio). — S-ro D-ro *A. S. Enbank*, 10730 So. Broadway.
Los Angeles (Kalifornio). — S-ino *Clara Jackson*, 5405 So. Central Ave.
Los Angeles (Kalifornio). — S-ino *Ethel W. Wright*, 1322 Allesandro Ave.
Los Angeles (Kalifornio). — S-ino *Lillian Latham*, 2902 Idell St.

! ! ! NOVAĴO ! ! !

La Praktiko publikigos de nun korespondajn anoncetojn

kun la portretoj de la anoncantoj.

Prezo de unufoja publikigo: 1.25 ned. guld. — Kune kun la pago oni sendu la anonctekston kaj bonan fotografaĵon.

NEDERLANDAJ ESPERANTISTOJ!

Tre utila estas por vi la nova libreto:
VADEMECUM VOOR DEN NEDERLANDSCHEN ESPERANTIST.
Ĝi enhavas ĉiujn informojn kaj adresojn pri la Esp-movado en Nederlando. **Prezo: afrankite 0.55 guld. Aĉetebla ĉe La Praktiko.**

VI TROVAS
ĈE NI
INTERESAJN
FACILLEGEBLAJN
MALMULTEKOSTAJN
ESPERANTO-ROMANOJN

H. A. Luyken:
STRANGA HEREDAĴO
Strangaj aventuroj, detektivaj okazintaĵoj, amaj intrigoj. Romano originale verkita.
Broŝ. RM 3.— *Bind. RM 4.—*

PRO IŜTAR
Romano el la antikva Babela historio.
Bind. RM 4.—

Wagnalls:
PALACO DE DANĜERO
Alloga rakonto pri la tempo kaj moroj de Ludoviko XV-a kaj de lia favoritino Madame la Pompadour. Aventuroj, intrigoj, festoj, ĝojoj ...sed la fino estas bona.
Tolbindaĵo RM 4.—

Ariŝima:
DEKLARACIO
Tiu romano montras, kiel japanaj junuloj pensas, suferas kaj agas. Legante vi sentas, ke la ekstrema oriento vin tuŝas.
Kart. RM 1.60

Jean Forge:
SALTEGO TRANS JARMILOJ
Vizito per tempomaŝino al la Roma imperiestro Nero. Plej amuza kaj alloga rakonto pri la renkonto de la moderna kaj antikva kulturoj.
Bind. RM 2.75

ABISMOJ
Migrado en la abismajn regionojn de la homaj animoj. Flua kaj facila stilo katenas la leganton ĝis la lasta paĝo.
Broŝ. RM 1.75 *Bind. 2.75*

„Ĉiu samideano, ankoraŭ ne leginta tiujn belegajn romanojn, povas havigi al si kelkajn horojn da honesta distraĵo kaj ĝudona legado."

Mendu ĉe via libristo aŭ senpere ĉe la eldonejo:
FERDINAND HIRT & SOHN, Esperanto-Fako, LEIPZIG C. 1, Salomonstrasse 15. (Poŝtĉekkonto: Leipzig 52372)



INSIGNOJ

AĈETEBLAJ ĈE LA ELDONEJO DE LA PRAKTIKO.

La bildoj montras la veran grandecon.

KLARIGOJ. — N-ro 1: simpla verda stelo el metalo, bele kolorigita. — Nroj 2—13 estas bele emajlitaj. — N-ro 2 estas havebla kun pinglo aŭ broĉo. N-ro 3 nur kiel kravatpinglo. La ceteraj N-roj estas livereblaj kun pinglo, broĉo aŭ butono. Ĉe la mendo oni indiku la deziratan. — Ĉe N-roj 3, 7 kaj 11 la verda stelo estas sur ronda blanka fono. — Ĉe N-roj 8, 9, 12 kaj 13 ĉirkaŭ la verda stelo estas blanka rando.

PREZOJ: N-ro 1 = 0.10 ned. guld. — N-roj 2 kaj 3 = po 0.20 guld. — N-roj 4—10 = po 0.35 guld. — N-roj 11—13 = 0.40 guld. — *Afrankita sendo ĉien.*

Ĉiuj insignoj estas bonkvalitaj produktaĵoj de bona fabriko.

La gajaj verkoj de

RAYMOND SCHWARTZ

estas aĉeteblaj ĉe: LA PRAKTIKO!

VERDKATA TESTAMENTO
libro de l' gaja muzo, 124 paĝoj ..... 1.25 ned. guld.

PROZO RIDETANTA
noveloj originale verkitaj, 176 paĝoj 1.50 „ „

ANNI KAJ MONTMARTRE
pariza romano, 126 paĝoj ..... 1.25 „ „

LA STRANGA BUTIKO
gaja verslibro, kun 22 bildoj, 128 p. 1.25 „ „

Ĉiuj kvar libroj kune: nur 5.— ned. guld.

POŜTISTOJ! TELEGRAFISTOJ! TELEFONISTOJ!

INTERNACIA ESPERANTO-KURSO

por la geoficistaro de Poŝto, Telegrafo kaj Telefono en ARNHEM, 2-12 Julio 1934.

Post la grandsukcesa unua internacia Esperanto-kurso por P.T.T.-geoficistoj, okazinta en la pasinta jaro, la *Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-oficistoj (ILEPTO)* kaj la *Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, en kunlaboro kun la Generala Direkcio de la Nederlanda P.T.T.*, organizas

la duan internacian kurson de Esperanto por la geoficistaro de P. T. T., kiu okazos en la Esperanto-Domo en Arnhem (Nederlando), dum la tagoj 2—12 Julio 1934.

La kurso estos gvidata de *Andreo Cseh*, laŭ lia konata metodo *(sen lernolibroj, sen uzo de nacia lingvo, sen hejma laboro, en praktika kaj amuza maniero)* kaj ĝi kapabligos al skriba kaj parola uzo de la lingvo Esperanto en simpla ĉiutaga interrilato, speciale sur la kampo de P.T.T.

La kurslecionoj okazos dum 10 labortagoj, matene de la 9-a ĝis la 13-a horo. Dum la posttagmezoj estos **ekskursoj studaj kaj plezuraj**, interalie al la granda nederlanda *radio-stacio en Kootwijk*, plenumanta la telegrafan servon kun Nederlanda Hindujo. En la vesperoj okazos **amuzaj aranĝoj.**

La kurso servos ankaŭ kiel ideala okazo por internacia interkonatiĝo kaj interamikiĝo de la diverslanda P.T.T.-kolegaro.

En la kurso partopreni povas **ĉiuj geoficistoj de la P.T.T., kune kun siaj familianoj.** Partopreni povas ankaŭ personoj, kiuj jam scias la lingvon Esperanto. **Kurskotizo** estas: 7.50 ned. guldenoj, por pluaj anoj de la sama familio nur 5.— guld. Kursanoj loĝantaj en la Esperanto-Domo pagas nur 5.—, resp. 3.50 guld.

La kursanoj povos loĝi en la **hotelo de la Esperanto-Domo,** kie plena pensiono (komforta ĉambro kun fluanta akvo kaj la tri manĝoj) je malaltigita prezo kostas por unu tago kaj unu persono: 3.50 Guld. (aparta ĉambro), 3.— Guld. (2—4 litoj en unu ĉambro), kaj 2.50 Guld. (5—10 litoj en unu ĉambro). Servmono: 10%.

Aliĝante oni sendu la kurskotizon kaj mendu la hotelon, pagante la pensionprezon por almenaŭ du tagoj.

Adreso por aliĝoj kaj informpetoj: *Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.* (Poŝtkonto: Den Haag 162626).

FAVOROJ. — Estas kreita *speciala fondo por subvencii* partoprenantojn, kies ekonomia stato ne ebligas la partoprenon. Petojn por subvencio oni sendu al la supra adreso, kiel eble plej baldaŭ. Ĉe la disdono de la subvencioj preferon ĝuos tiuj petantoj, kiuj aldonis al sia petskribo ankaŭ ian *ateston* aŭ *rekomendleteron* (de la oficeja estro aŭ de P.T.T.-fakorganizaĵo).

LIBERTEMPO. — La Ĝen. Direkcio de la Nederlanda P.T.T. decidis doni *ekstrajn libertagojn* al tiuj, kiuj intencas partopreni en la kurso.

PETO. — La legantoj de ĉi tiu anonco estas petataj vaste diskonigi la informojn pri la kurso en la nacia gazetaro, precipe en la fakaj gazetoj, kaj instigi siajn proprajn P.T.T.-estrarojn kaj fakorganizaĵojn, ke tiuj de sia parto delegu kaj subvenciu partoprenantojn. Donacoj por la subvencia fondo estas danke akceptataj. — Invitleteroj al la P.T.T.-direkcioj de ĉiu lando estas jam dissenditaj de la Nederl. P.T.T.-Direkcio, tra la Univ. Poŝta Unio en Bern.

Esperanto-Presejo PIER WESTERBAAN, Vaillantlaan 523—529, Den Haag (Nederlando).

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 4 (28)

★

Aprilo
1934

Sudo kaj Nordo

renkontiĝis en la brilo de la verda stelo, kiam nia senlaca rumana propagandisto s-ro Tiberio Morariu interkonatiĝis en Svedujo kun sia diligenta lernantino f-ino Lizzie Andersson. Baldaŭ aperis inter ili la reciproka simpatio kaj post kelkaj monatoj, en Junio de 1931, okazis la edziĝo, kiu por la tuta vivo kunligis du entuziasmajn kaj agemajn adeptojn de Zamenhof. Kaj nun ni estas feliĉaj publikigante ĉi tiun bildon, kiu prezentas al la tutmonda Esperantistaro la antaŭ nelonge alvenintan anon de nia internacia familio.

Dorica-Selma Morariu,
la filineto de gesinjoroj Morariu-Andersson:

La nomo de Tiberio Morariu estas tre bone konata antaŭ la Esperantistaro de la tuta mondo, ĉar jam de pluraj jaroj kun senlaca energio li laboras por nia lingvo. Pro tio la tuta samideanaro direktas intereson kaj simpation al li kaj al lia familio.

S-ro Morariu eklernis Esperanton en la jaro 1921 kaj la sorĉa forto de la Zamenhofa ideo tuj kaptis lian animon. Havante maloftan senton kaj talenton al lingvoj, li rapide perfektiĝis en Esperanto kaj de la jaro 1922 li dediĉas sin plene al la disvastigado de la mondlingvo. Kiel elokventa preleganto kaj talentoplena kursgvidanto li varbis kaj instruis multajn milojn da homoj en Rumanujo, Svedujo, Germanujo, Svisujo, Aŭstrio kaj Francujo. Ankaŭ sur la literatura kampo li akiris famon kaj laŭrojn, kiel eminenta stilisto. Liajn artikolojn, kiuj ofte aperis en diversaj gazetoj, karakterizas delikata spriteco kaj majstra uzado de nia lingvo. Liaj tradukaĵoj el la rumana literaturo (Niĉjo Mensogulo, Nobela Peko, Sonorilo kaj Kanono) estas premiitaj de nia Akademio.

S-ro Morariu trovis en sia ĉarma edzino eminentan kunlaborantinon. En Francujo, Aŭstrio kaj Svisujo ili kune instruis Esperanton, ĝis kiam aperis la cikonio kun la eta Dorica-Selma, kies baptopatrino estas la Nobel-premiita verkistino Selma Lagerlöf.

La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 2.50 nederl. guldenoj, por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Unu numero kostas -.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., ½ p. 45.-, ¼ p. 25.-, ⅛ p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE NIAJ KONKURSOJ

66-a konkurso. En la 18-a numero (Junio 1933) aperis ĉi tiu konkurso kaj en la 23-a numero (Novembro 1933) ni publikigis la envenintajn solvojn. Ĉar estis malfacila tasko elekti la premiindajn solvojn, ni alvokis nian legantaron por fari la juĝon per voĉdonado. El niaj legantoj 26 personoj bonvolis sekvi nian inviton kaj nun ni publikigas la rezulton de la voĉdonado.

La **unuan premion**, per 8 voĉoj, ricevis s-ro **K. Maas** en Amsterdam, pro la solvo publikigita sub n-ro 50. — La ceterajn 5 premiojn ricevis: 2. F-ino **C. J. Antonisse** en Scheveningen, Nederlando (N-ro 4, ricevis 6 voĉojn). — 3. S-ro **Cheminais** en Hautmont, Francujo (N-ro 59, ricevis 6 voĉojn). — 4. F-ino **Ella Rebane** en Viljandi, Estonio (N-ro 9, ricevis 6 voĉojn). — 5. S-ro **N. Schwartz** en Parizo (N-ro 6, ricevis 6 voĉojn). — 6. S-ro **J. F. Aleheras** en Buenos-Aires, Argentino (N-ro 34, ricevis 5 voĉojn).

La ceteraj voĉoj jene dividiĝas inter la nepremiitaj solvoj: Po **4 voĉojn** ricevis la n-roj 1, 2, 3, 5, 7, 20, 40, 46, 63. — Po **3 voĉojn** ricevis la n-roj 8, 13, 18, 19, 27, 28, 41, 51, 70. — Po **2 voĉojn** ricevis la n-roj 23, 30, 31, 36, 37, 38, 45, 49, 52, 54, 62, 68,, 69, 71. — Po **1 voĉon** ricevis la n-roj 11, 12, 17, 22, 24, 32, 43, 44, 47, 48, 58, 61, 65, 67, 72. La ceteraj solvoj ne ricevis voĉojn.

76-a konkurso. La 105 solvintoj de ĉi tiu financa problemo ensendis diversajn solvojn, el kiuj oni povas akcepti kiel ĝustajn la jenajn du solvojn:

1) **La horloĝisto perdis 80 guldenojn, t.e.: la 75 guldenojn, kiujn li redonis al s-ro Monfals, plus 5 guldenojn kiel valoron de la vendita horloĝo.**

2) **La horloĝisto perdis 100 guldenojn, ĉar li ricevis falsan bankbileton de 100 guld. anstataŭ bona. Laŭ alia klarigo: li redonis al s-ro Monfals 75 guldenojn kaj krom tio li perdis la valoron de la horloĝo, t.e. 25 guldenojn, ĉar tiun sumon li ricevus de alia, honesta aĉetanto.**

Tamen la konkursa komitato konsideras kiel ĝustan kaj premieblan solvon nur la unuan, ĉar ĝi estas konforma al la intenco de la redakcio. (Tial la redakcio atentigis pri tio, ke la horloĝo kostis al la horloĝisto nur 5 guldenojn!)

Kelkaj solvintoj opinias, ke la horloĝisto perdis 105 guldenojn, laŭ aliaj li perdis 155 guldenojn, kaj kelkaj personoj respondis, ke li perdis 180 guldenojn. Kaj fine unu persono skribis, ke la horloĝisto ne havis perdon, ĉar li gajnis vivsperton, kiu valoras eĉ pli ol 100 guld.

Post serioza ekzamenado de la solvoj, la konkursa komitato decidis doni la unuan premion al s-ro **K. Meiers** en Usma (Latvujo), pro la jena sagace kaj logike klarigita solvo: *„La horloĝisto momente suferis perdon de 80 guldenoj, sed poste li sendube sukcese fordonis la falsan monbileton, kiun li memkompreneble rericevis de la hotelpordisto. Li certe tiel agis, ĉar li estis malhonestulo, kion pruvas la fakto, ke li vendadis la horloĝojn kun tro granda profito. Do fine li tamen profitis 20 guldenojn."* La ceterajn kvar premiojn ricevis: S-ro **M. Cornet** en Tegelen (Nederlando), s-ro **L. Olivaud** en Nice (Francujo), s-ro **L. Ponthir** en Jemeppe (Belgujo) kaj s-ro **Noé Wilquin** en Parizo.

77-a konkurso. El la dek literoj, kiuj formas la nomon de nia gazeto: LA PRAKTIKO, entute 103 personoj faradis aliajn vortojn, por partopreni en ĉi tiu konkurso. Inter ili la rekordon tenas s-ro **V. Tartlan** en Valga (Estonio), kiu formis ne malpli ol 313 vortojn. Sendube li posedas bonegan vortaron kaj havas la kapablon kaj paciencon ĝin uzi. Do li ricevis la unuan premion. — La 2-a premio apartenas al s-ro **S. J. Ysselstein** en Schiedam (Nederlando), kiu faris 299 vortojn. Ankaŭ belega nombro! — La 3-an premion gajnis s-ro **H. Bobbiesi** en Buenos-Aires (Argentino) kun 250 vortoj. — La ceteraj premiitoj estas: 4. S-ro **H. Castanón** en Buenos-Aires (Argentino) kun 255 vortoj. — 5. S-ro **T. Ujlaky Nagy** en Kaposvár (Hungarujo) kun 253 vortoj. — 6. S-ro **K. Meiers** en Usma (Latvujo) kun 250 vortoj. — Al la ceteraj 97 personoj, kiuj ne ricevas premion, ni kore gratulas pro la pacienca laboro. Ili ne perdis la tempon, ĉar ili faris tre utilan ekzercon en la kono de la Esperanta vortaro.

78-a konkurso. La solvon de ĉi tiu enigmo ensendis 95 personoj. La kaŝita frazo de D-ro Zamenhof sonas jene: **„Pacience ni semu kaj semu, por ke niaj nepoj iam havu benitan rikolton."** La apartaj 29 vortoj estas: *Ponto, Amatoro, Citro, Insulti, Bzoko, Kuniklo, Oceanio, Esperas, Indiano, Privata, Escepto, Estingi, Amikino, Bruselo, Skarabo, Statuto, Ajivava, Sandalo, Senhara, Mahomet, Suferas, Papriko, Dormejo, Korniko, Skolopo, Enspezo, Ingveno, Niĉjo, Kadavro.*

Per lotado la 7 premiojn ricevis: S-ro **L. J. Burger** en Hago. — S-ro **A. Gerasimov** en Filipovo (Bulgarujo). — S-ro **H. Grabe** en Vlotho a. d. Weser (Germanujo). — S-ino **M. S. Hoestra** en Hago. — F-ino **N. Rademaker** en Leiden (Nederlando). — S-ro **H. Sijtstra** en Vriezenveen (Nederlando). — S-ino **W. de Virieu** en Saint-Raphael (Francujo).

La rezulto de la pluaj konkursoj aperos en la venonta numero.

Amuza Interesa Instrua

estas la nova Esperanta kartludo

„LEXICON"

kiu baziĝas sur la alfabeto kaj vortaro.

Speciale taŭga por kursoj kaj grupoj!

Prezo: en luksa ujo 1.35 ned. guld. Mendebla ĉe LA PRAKTIKO.

Jam 4,000,000 da homoj ludas per ĉi tiu sensacia novaĵo.

ATENTU! **Se vi volas sendi monon al La Praktiko, bonvolu observi la sekvantajn:**

La monon oni povas sendi per *poŝtĉekkonto* (Wien A-156933, Praha 500362, Kopenhago 34941, Berlin 129527, Budapest 13201, Zagreb 41345, Riga 4870, Den Haag 162626, Warszawa 190203, Stockholm 74126, Bern III. 6761), *per poŝtmandato*, per *bankĉeko* aŭ per *papermono* en letero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj de la sube nomitaj landoj, kalkulante la valoron laŭ la suba tabelo:

1.— ned. guldeno valoras en:

Aŭstrio 3.70 ŝil., **Belgujo** 15 fr., **Britujo** 2 ŝil. 8 p., **Bulgarujo** 58 lev., **Ĉeĥoslovakujo** 17 kr., **Danujo** 3 kr., **Estonio** 2.60 kr., **Francujo** 10.35 fr., **Germanujo** 1.70 m., **Hispanujo** 5 pes., **Hungarujo** 3.30 p., **Italujo** 8 lir., **Jugoslavio** 30 din., **Latvujo** 2.20 l., **Norvegujo** 2.70 kr., **Polujo** 3.70 zl., **Rumanujo** 75 l., **Svedujo** 2.60 kr., **Svisujo** 2.10 fr.

Pro la freneza dancado de la mon-valoroj ĉi tiu tabelo validas nur ĝis la apero de nia sekvanta numero.

La sendo de poŝtmarkoj en letero okazas je la risko de la sendanto. Tial estas konsilinde uzi netravideblan koverton kaj ĉe pli granda sumo registrigi la leteron.

AĈETU la bonajn kaj ŝatatajn librojn de la Internacia Eldonejo en Austin (Texas, Usono)!

Redaktanto: A. Kenngott, University of Texas

Tute en Esperanto:

INTERNACIA LEGOLIBRO, tre interesa legolibro ..... 2.50 sv. fr.
INTERNACIA TEATRAĴARO, kvin viglaj kaj facile ludeblaj teatraĵoj ..... 2.50 „ „
INTERNACIA FRAZARO (de diverslandaj aŭtoroj) ... 1.25 „ „
INTERNACIA DIALOGARO (de diverslandaj aŭtoroj) 1.25 „ „
ILUSTRITAJ RAKONTETOJ, praktika legolibreto ..... 1.25 „ „
ĈIUTAGA VIVO, praktika kursa ekzerca libreto ..... 1.25 „ „
INTERNACIA TEATRAĴETARO, ses mallongaj teatraĵoj, facile ludeblaj en kluboj ..... 1.25 „ „
LA FANTOMA EDZINO, de Eduard S. Payson, kun NE-NE-HOFRA kaj OLIBANO KAJ MIRHO, treege belaj rakontoj ..... 0.50 „ „
RÜBEZAHL, de Hilde Scholze. Belega poezia rakonto. Premiita ĉe la Katalunaj Florludoj en 1928 ..... 0.50 „ „
USONO, de A. Kenngott ..... 0.50 „ „

Parte en angla lingvo:

KENNGOTT's ESPERANTO KEY ..... 0.25 „ „
KENNGOTT's ESPERANTO LECTURE ..... 0.25 „ „
KENNGOTT's POCKET DICTIONARY (Esp.—Angl., Angl.—Esp.) ..... 1.25 „ „
KENNGOTT's ESPERANTO COURSE ..... 5.— „ „

Aĉeteblaj ĉe:

A. KENNGOTT, University of Texas, Austin (Texas, Usono),
PAUL GÖRING, Schmidtstrasse 1, Magdeburg-N. 9. (Germanujo).
LA PRAKTIKO, Riouwstraat 172, Den Haag (Nederlando).

ATENTU!

(Daŭrigo)

51. Akvarelo. Akvario.

Atentu, ne konfuzu ĉi tiujn similsonajn vortojn, ĉar grandega estas inter ili la diferenco:

Akvarelo estas pentraĵo farita per akvaj koloriloj.

Akvario estas vitra ujo kun akvo, en kiu vivas fiŝoj kaj aliaj akvaj bestoj kaj kreskaĵoj.

52. Alo. Flugilo.

En la naciaj lingvoj per la vorto *„flugilo"* oni nomas ne nur la membrojn de la birda korpo, sed ankaŭ la ekstremajn partojn de konstruaĵo, armeo, pordo k.t.p.

Sed en Esperanto **flugilojn** havas nur la birdoj, anĝeloj kaj aliaj vere flugantaj estaĵoj. La konstruaĵo, armeo k.t.p. havas **alojn.**

53. Algo. Alko.

Ĉi tiuj du vortoj signifas vivajn estaĵojn, sed granda estas inter ili la diferenco:

Algo = malgranda kreskaĵo vivanta en la akvoj.

Alko = norda cervo kun larĝaj kornoj.

54. Altano. Altaro.

Similaj vortoj, sed tre diferencaj en la signifo:

Altano = ebena teraso, kiu staras super la nivelo de la ĉirkaŭaĵo.

Altaro = diserva tablo, ĉe kiu oni faras la religian oferon.

55. Altano. Estrado. Podio. Tribuno.

Ĉi tiuj vortoj estas sinonimoj. Ili ĉiuj signifas konstruitan altaĵon, levitan plankon. La diferenco estas tio, ke la **altano** servas por ĉirkaŭrigardado („belvidejo"), sed la **estrado, podio** kaj **tribuno** servas por oratoro, prezidanto, artisto k.t.p.

56. Amaso. Maso.

Inter ĉi tiuj du vortoj ekzistas interna kaj ekstera parenceco. Do ili estas sinonimoj kaj paronimoj samtempe.

Amaso = granda nombro, neordigita kolekto de *apartaj* aĵoj, ekz-e: *hom-amaso, ŝton-amaso.*

Maso = kvanto de senforma *nedividita* materio. Ekz-e: *El tiu metala maso oni fandos sonorilon.*

57. Amputi. Imputi.

Bonvolu atenti, ke vi ne miksu ĉi tiujn du vortojn, ĉar la diferenco inter ili estas grandega:

Imputi = alkalkuli, aljuĝi; atribui respondecon. Ekz-e: *imputi al iu kulpecon pro io, imputi al iu ian diraĵon.*

Amputi = detranĉi parton de la korpo, ekz-e manon, piedon.

58. Amuzi. Distri.

Ĉi tiuj du vortoj estas sinonimaj.

Distri = deturni la spiriton de ĝia okupo aŭ de zorgoj. Ekz-e: la bruo distras la laborantojn; tiu, kiu travivis grandan ĉagrenon, faras vojaĝon por distri sin.

Amuzi = distri per gajigaj aferoj.

ATENTU! Ambaŭ verboj: *distri* kaj *amuzi* estas transitivaj. Tial oni ne povas diri: *hieraŭ mi bone amuzis.* Sed la ĝustaj esprimoj estas: *La ludo amuzis min; Mi amuziĝis; Mi amuzis min;* k.t.p.

59. Anaso. Ananaso.

La **anaso** estas birdo, sed la **ananaso** estas frukto. Do granda diferenco. Tial atentu la balbutantaj samideanoj, precipe kiam ili estas en la restoracio, ĉar ne estas agrabla surprizo ricevi ananason, kiam oni kun granda apetito atendas anas-rostaĵon.

60. Anonco. Reklamo.

Ambaŭ vortoj signifas publikan diskonigon pri komercaĵo aŭ alia afero proponata al la publiko. La diferenco estas tio, ke la **anonco** okazas per frazoj (buŝe aŭ skribe), sed la **reklamo** povas okazi ankaŭ per bildoj, signoj kaj agoj, kiuj taŭgas por direkti la atenton de la publiko al la koncerna afero. Do la anonco estas unu speco de la reklamo.

61. Anonci. Avizi. Informi. Konigi. Sciigi. Komuniki.

Ĉi tiuj vortoj estas sinonimaj kaj sendube oni bone komprenas ilin. Ni aldonas ĉi tie kelkajn klarigajn vortojn kaj konsilojn pri ilia uzado.

Sciigi = 1) Fari, ke iu estu scianta ion. Ekz-e: *Mi sciigis mian amikon pri mia nova adreso.* — 2) Fari, ke io estu sciata. Ekz-e: *Mi sciigis mian novan adreson al mia amiko.* Do ĉi tiu vorto estas uzata laŭ la jenaj du formuloj: *sciigi iun pri io* kaj *sciigi ion al iu.*

Informi (iun pri io) = doni al iu informojn (= sciigojn, klarigojn) pri io, kion li ankoraŭ ne sciis.

Konigi = fari, ke io estu konata al iu. Ekz-e: *La ĵonglisto post la prezentado konigis al la publiko la sekretojn de sia arto.*

Anonci = antaŭsciigi ion al iu, publike sciigi ion. **ATENTU!** Oni povas nur *anonci ion al iu,* sed ne: *anonci iun pri io.*

Avizi = sciigi iun pri io.

Komuniki (ion al iu) = fari, ke iu scio aŭ kono estu komuna inter la komunikanto kaj alia homo. Ekz-e: *La ministro komunikis sian planon al la reĝo.*

62. Antikva. Malnova.

La du sinonimaj vortoj ne estas tute egalaj. La vorto **antikva** signifas tian malnovan aferon, kiu apartenas al epoko jam de longe pasinta.

63. Antipatio. Apatio.

Apatio = senseneco, indiferenteco.

Antipatio = kontraŭsento, malsimpatio.

(Daŭrigota)

„Kun admiro kaj fiero en nia koro ni klinas la kapon antaŭ tiu grandioza verko, la trezoro Zamenhofa, la plej bela Esperanto-libro."

ENHAVO:

Antaŭparoloj. Gazetartikoloj. Traktaĵoj. Paroladoj. Leteroj. Poemoj.

Kolektitaj kaj ordigitaj de *prof. d-ro Dietterle.*

Kun 6 faksimilaĵoj kaj portreto de L. L. Zamenhof. 605 paĝoj. Luksa tolbindaĵo

R.M. 10.—

„Ĝi staras unika — la plej granda verko el la tuta originala Esperanta literaturo. Ĉiu biblioteko, ĉiu serioza Esperantisto, devus klopodi, se iel eble, havigi al si tiun ĉefverkon."

Mendu ĉe via libristo aŭ senpere ĉe la eldonejo:

FERDINAND HIRT & SOHN, Esperanto-Fako, LEIPZIG C 1

Salomonstrasse 15 (Poŝtĉekkonto: Leipzig 52372)

Amara ironio.

Versoj de poetoj pentras
Nian vivon: idilio,
Dum la bela mond' konsistas
Nur el vana fantazio.

Ĉio en la vivo estas
Nuda, vanta iluzio,
La poetoj ĝin deklaras:
Supertera poezio.

En la vivo ĉiu ĉasas
Al kolora utopio,
Sed post la atingo sekvas
Elreviĝo kaj nenio.

La poeta bildo estas
De la vivo parodio,
Ĉar en realeco restas
Nur amara ironio.

Amsterdam. *ADRIAAN KLOEK.*

Internacia konferenco pri: ESPERANTO EN LA LERNEJON KAJ PRAKTIKON

Vieno (Aŭstrio), 20—24 Majo 1934.

Sub la supra nomo Universala Esperanto-Asocio preparas gravan internacian konferencon kun la celo, ke ĝi antaŭenpuŝu nian movadon kaj la progresadon de nia lingvo. La konferenco okazos sub la protekto de *s-ro Vilhelmo Miklas*, prezidanto de Aŭstrio kaj sub la honora prezido de *D-ro E. Dollfuss*, kanceliero de Aŭstrio. La konferenco ĝuas plenan helpon de la aŭstria registaro, ekzemple la ministerio por komerco kaj trafiko disponigis la necesan monsumon por la preparaj laboroj kaj la kunsidoj okazos en ejoj disponigitaj de la registaro. Krom tio honora komitato, konsistanta el multaj eminentuloj, donas al la konferenco moralan apogon.

La Prepara Komitato, konsistanta el s-roj *D-ro Uebelhör*, sekcia ĉefo ĉe la kancelaria oficejo, *H. Steiner* reg. konsilanto, *R. M. Frey* kalkulkonsilisto kaj *R. Kreuz* direktoro de UEA, dissendis invitojn al kelkaj miloj da institucioj kompetentaj (instru-aŭtoritatoj, universitatoj, altlernejoj, instruistaj organizaĵoj, klerigaj asocioj, ministerioj, komercaj ĉambroj, foiroj, fervoj-direkcioj, poŝtdirekcioj, trafikaj unuiĝoj kaj entreprenoj k.t.p.)

La konferenco pritraktos ĉiuspecajn demandojn, kiuj rilatas al la instruado kaj praktika aplikado de Esperanto. Estas invititaj eminentaj fakuloj por prezenti temojn. La paroladoj kaj raportoj estos allasataj en ĉiuj lingvoj, sed la tradukado okazos nur en Esperanto.

La **kotizo** de partopreno estas 12 svisaj frankoj, kaj ĝi entenas ankaŭ la enirbiletojn al la diversaj aranĝoj amuzaj.

La **programo** antaŭvidas krom la laborkunsido ankaŭ oficialan akcepton flanke de la registaro partoprenon en la festprezentado de la „Vesperto" de Strauss, aŭtobusajn ekskursojn tra la urbo, kaj diversajn amuzajn aranĝojn.

La prepara komitato deziras, ke **la Esperantistaro faru ĉion eblan por la sukcesigo de ĉi tiu grava konferenco,** de kies sukceso dependas grava antaŭeniro de nia movado. La precipa bezono estas, ke multaj personoj partoprenu, speciale gravuloj el la interesataj sferoj kaj oficialaj reprezentantoj.

Por detalaj informoj kaj aliĝo oni adresu leterojn jene: *„Internacia Konferenco Vieno 1934", Neue Hofburg, Heldenplatz, Wien I. (Aŭstrio).*

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Edziĝo. — La 31-an de Marto okazis en Praha la geedziĝo de niaj ĉeĥaj gesamideanoj: s-ro *Jaroslav Baroch* el M.-Ostrava kaj f-ino *Anĉi Nyvltova* el Praha. — Koran gratulon!

Naskiĝo. — Al la Esp-ista familio Eŭgenjo kaj Kivel *Geršater* en Vilno (Polujo) la 30-an de Marto naskiĝis fileto, kiu ricevis la nomon Lazaro-Ludoviko, je la honoro de la aŭtoro de Esperanto. — Koran bondeziron!

Morto. — S-ro *Erik Brenner*, abonanto de La Praktiko, mortis en Riga (Latvujo).

— S-ro *Martin Kylstad*, abonanto de La Praktiko en Hamar (Norvegujo), mortis en Marto.

— F-ino *Desmarest*, vicprezidantino de la Nordfranca Esp. Federacio kaj prezidantino de la Esp-ista Grupo de Amiens (Francujo), kiu dum 25 jaroj senlace laboris por Esperanto, mortis la 10-an de Februaro.

Mortis s-ro Frans Schoofs. — La belgan Esperantistaron kaj same la tutmondan Esperanto-movadon trafis grava perdo: la 12-an de Marto mortis en Antverpeno post mallonga malsano kaj hirurgia operacio s-ro Frans Schoofs, en la aĝo de 46 jaroj. — S-ro Schoofs estis unu de la plej gravaj kaj meritplenaj figuroj en la Esperanto-movado. Kiel prezidanto de la Belga Ligo Esperantista, direktoro de la Belga Esperanto-Instituto kaj de la revuo „Belga Esperantisto", fondinto-prezidanto de la Esp-grupo „La Verda Stelo" en Antverpeno, li kun admirinda energio, talento kaj sindoneco kreskigis kaj florigis la belgan Esperanto-movadon. En la internacia movado li partoprenis plenumante en plej laŭdinda maniero la gravan oficon de sekretario de la Konstanta Reprezentantaro, kaj ankaŭ kiel Ĉefdelegito de UEA por Belgujo. La enterigo okazis la 15-an de Marto. — La redakcio de La Praktiko ankaŭ publike esprimas sinceran kunsenton al la malĝoja vidvino kaj al la funebranta belga Esperantistaro.

La universala kongreso en Stokholmo. — Ĵus aperis la 4-a bulteno de la organiza komitato. Ni ĉerpas el ĝi la jenajn interesajn novaĵojn: La svedaj fervojoj donis al la kongresanoj rabaton de 25 %, la belgaj fervojoj konsentis 35 %-an rabaton. — Kongres-karavanoj estas planitaj el Anglujo (Brita Esperantista Asocio, 142 High Holborn, Londono), el Danujo (s-ro M. Palmberg, Nyborggade 3, Aarhus), el Estonio (E.T.K., pk. 6., Tallinn), el Finnlando (s-ino T. Leivo, Siltavuoren ranta 4 A 16, Helsinki), el Francujo (s-ro P. Petit, 59 rue de Neuilly, Rosny-sous-Bois), el Germanujo (s-ro Fr. Ellersiek, Wilmsstr. 5, Berlino), el Italujo (Esperanto-Centro Itala, Gall. Vitt. Eman. 92, Milano), el Nederlando (s-ro J. Telling, Bellevoystr. 36, Rotterdam). — Allogaj postkongresaj vojaĝoj okazos al Laplando, al Jemtlando kaj al la insulo Gotlando. — Fakaj kunvenoj estas anoncitaj ĝis nun por: Bahaa-movado, Blinduloj, Esperanto-Institutoj, ILEPTO, Int. Pacifista Ligo, TAGE, TEJA, TEKA kaj Veqetaranoj. — Ĝis la fino de Marto aliĝis pli ol 1100 kongresanoj. — La adreso de la kongreso: XXVI-a Univ. Kongreso de Esperanto, Fredsgatan 4, Stockholm.

Antaŭkongreso en Malmö. — Antaŭ la nunjara universala kongreso, kiu okazos en Stokholmo, estos aranĝata internacia antaŭkongreso en Malmö, urbo en Sud-Svedujo, en la tagoj 2-3 de Aŭgusto. La aranĝantoj preparas interesan kaj allogan programon. La kotizo estas 5 svedaj kronoj. Informpetojn kaj aliĝojn oni sendu al adreso: „Esperanto-kongreso 1934" en Malmö (Svedujo).

Unua Proksim-Orienta Esperanto-Kongreso okazos en Tel-Aviv (Palestino) la 10—12-an de Majo 1934, kun interesa kaj riĉa programo, el kiu menciindaj estas: interkonsiliĝo pri la disvolvigo de la Esperanto-movado en la proksim-orientaj landoj, Palestina tutlanda Esp-konferenco, teatra prezentado, solena inaŭguro de Zamenhof-strato, ekskurso al Jerusalemo. La kongreso okazos samtempe kun la Levanta Foiro en Tel-Aviv, kaj la kongresanoj povos uzi la foirajn rabatojn de 25—50 % ĉe fervojoj kaj vaporŝipoj. Informojn donas kaj aliĝojn akceptas: s-ro P. Lahovicki, Del. de UEA, Kerem, Jerusalemo.

Franca Esperanto-Kongreso. — La 31-a nacia kongreso de la Societo Franca por la Propaqando de Esperanto okazos en la urbo Bordeaux dum la tagoj 19—21 de Majo, kune kun la regiona kongreso de la Sud-Okcidenta Federacio.

Esperanto-horo ĉe la Radio de Brno. — La proksima Esperanto-horeto de la „Radioĵurnalo" de Brno (Ĉeĥoslovakio) okazos la 25-an de Aprilo vespere de la 22.30 ĝis la 23.25 h. kaj elsendos ĝin ĉiui ĉeĥoslovakaj radio-stacioj, nome: Praha, Brno, Bratislava, Moravska Ostrava kaj Koŝice. La interesa programo enhavas: Leterkesto; Dvorak: Uverturo el la opero „La diablo kaj Kanjo"; Kion ni kuracas en la ĉeĥoslovakaj banlokoj? Dialogo inter s-ro San Serĉanto el Esperantujo kaj la sekretario de la banloka ekspozicio de Ĉeĥoslovakio; „Aprila pluvo — virina ploro" humora kabaredo de F. Kozik, kun fortepian-ludo de V. Tausky, kapelestro de la Landa Teatro de Brno. — Ni rekomendas al la legantaro nepre aŭskulti ĉi tiun interesan prezentadon, kaj post la aŭdo sendi dankleteron al: Radioĵurnalo, Kounicova 44, Brno.

Laborista kongreso. — La 19-a kongreso de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj sur nederland-lingva teritorio okazis la 1—2-an de Aprilo en Antverpeno (Belgujo). Partoprenis 550 personoj. La venontjara kongreso okazos en Bussum (Nederlando).

Blindula Esp-kongreso en Nederlando. — La kvina kongreso de la Nederlanda Societo de Blindaj Esp-istoj (NOSOBE) okazos la 12-an de Majo en Amsterdamo (Gebouw Hijstee, Heerengracht). La laborkunsido komenciĝos posttagmeze je la 2,30 kaj la festa kunveno okazos vespere je la 7-a horo. NOSOBE kore invitas ĉiujn interesiĝantojn por ĉi tiu festo de sia unua lustro. Informpetojn, salutleterojn kaj ev. donacoin oni povas sendi al la sekretario: s-ro I. A. de Vos, Frederiklaan 53 en Rijswijk (Z.H.) — NOSOBE ankoraŭ okupas sin pri la monkolektado por eldoni en blindul-skribo la grandan vortaron de s-ro van Straaten. Por tiu celo oni bezonas 3000 guldenojn, sed ĝis nun kolektiĝis nur 800 guld. Pri ĉi tiu entrepreno la sekretario volonte sendas je peto cirkuleron kun detalaj informoj.

La 3-a intima muzikvespero en Hago, aranĝata de s-ro H. Valckenier, okazos la 25-an de Aprilo vespere je la 8-a horo en „De Galerij" (Laan van Meerdervoort). En la komenco de la vespero s-ino Julia Isbrücker prezentos lumbildojn pri la Esp-aj kongresoj.

Nova gazeto. — Sub la titolo „Lingvo, Libro" aperis nova, kvaronjara gazeto, eldonata de Literatura Mondo en Budapest. Ĝi estas la daŭrigo de la ĝisnuna Bibliografia Gazeto de Literatura Mondo, kies kadroj montriĝis tro malvastaj por la ĉiam kreskanta nova literaturo de nia lingvo. La celo de la nova gazeto estas recenzi la novajn librojn kaj pritrakti stilajn problemojn de nia literaturo.

„La Junularo kaj la Mondpaco" estas la titolo de la pacqazeteto, kiu ĉiujare aperas en pluraj lingvoj okaze de la „Tago de Bonvolo", la 18-an de Majo, kiam la kimraj infanoj dissendas sian ĉiujaran pac-mesaĝon. En la pasinta jaro tiu gazeteto aperis ankaŭ en Esperanta lingvo kaj ĝi havis grandan sukceson. Oni klopodas ankaŭ en ĉi tiu jaro aperigi Esperantan eldonon, por ke Esperanto, la „pac-lingvo" tenu sian lokon. Ĉar por tio estas

necese, ke alvenu multaj mendoj, la eldona komitato alvokas ĉiujn geinstruistojn kaj aliajn gvidantojn de la junularo ke ili bonvolu baldaŭ helpi per antaŭmendo de kvantoj. La prezo estas: 1 ekzemplero = 0.10 sv. fr., 25 ekz. = 1.75 sv. fr. + 10 % por sendkostoj. Adreso: s-ino L. Romeyn, Statenlaan 6, Den Haag. (Poŝtĉekkonto: 100325).

Hindoĉinaj skoltoj lernas Esperanton. — En la hindoĉina urbo Haiphong 25 skoltoj kun sia trupestro fervore partoprenas en Esperanto-kurso. En Julio de ĉi tiu jaro okazos en Hue, ĉefurbo de la anamanoj, kunveno de la hindoĉina skoltaro. La Esp-istaj skoltoj intencas fari tie grandan propagandon. Ili alvokas la tutmondan Esperantistan skoltaron al kunhelpo. Oni bonvolu sendi propagandilojn kaj leterojn al: S-ro D. d. Thuc trupestro, 4 rue Nguyen-Trai en Hanoi, aŭ al: S-ro T. v. Khac trupestro, Institut de Recherches Agronomiques en Saigon (Hindoĉinujo).

Rezolucio de la Esp-Klubo de Los Angeles kontraŭ la superfluaj novaj vortoj. — La Esperanto-Klubo de Los Angeles en Kalifornio (Usono) en sia lasta monata kunveno voĉdonis rezolucion kontraŭ la facilanima enkondukado de superfluaj novaj vortoj en Esperanto. Laŭ la teksto de la rezolucio nia lingvo kapablas per la rimedoj troviĝantaj en la Fundamento de Zamenhof esprimi preskaŭ ĉiujn nuancojn de la homa penso, aplikante la sistemon de vort-kunmetado pere de la afiksaro. La rezolucio malaprobas la opinion, ke estas necese starigi apartan vortaron por la literaturo, kondamnas la uzadon de nenecesaj novaj radikoj kaj deziras, ke la oficialaj organoj kaj eldonaĵoj de la Esperanto-movado enhavu nur materialon aprobitan de la Esp-a Akademio.

Tutmonda studvojaĝo per Esperanto. — Nia irlanda juna samideano, s-ro R. Hull Wilkinson, sekretario de la „Progresa Esperanto-Klubo" en Belfast, preparas sin al tutmonda bicikla vojaĝo por studi la naciajn kutimojn kaj lingvojn. Lin akompanos la germana studento s-ro Rudolf Stein el Hannover, kiu en Belfast ellernis Esperanton kaj aliĝis al la nomita klubo. Dum la vojaĝo ili deziras ankaŭ propagandi Esperanton kaj ili volonte estos je la servo de la Esp-istaj societoj. Ili faros la vojaĝon per sia ŝparita kapitaleto kaj per honorarioj ricevotaj de britaj kaj irlandaj gazetoj, pro artikoloj skribotaj dum la vojaĝo. La unuaj trapasotaj landoj estas Nederlando kaj Germanujo. Detalajn informojn pri ĉi tiu vojaĝo oni povas ricevi de s-ro A. R. Campbell, 15 Delhi Street, Belfast (Irlando).

Presejo kun Esperanta nomo. — En Amsterdam ekzistas elektra presejo nomata „Presisto". Ĝia adreso: St. Willebrordusstraat 12.

Anglujo. — La „Londona Klubo" havas novan, belan ejon kaj en ĝi okazas viglaj kunvenoj kun interesaj paroladoj. — S-ino Nora Holmes en *Londono* gvidas kurson por senlaboruloj. La kurson, kiu bone progresas, aranĝis speciala societo, kiu organizas studojn kaj amuzojn por la senlaborularo.

Bulgarujo. — La 21-a kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio okazos la 22-24-an de Julio, en la urbo *Oreĥovo*.

Ĉeĥoslovakio. — En *Mlada Boleslav* okazis Esperanto-kurso, sub la gvidado de nia itala samideano E. M. Fasce el Ĝenovo. — En *Nemecka-Lutyne* s-ro K. Heĉko gvidas kurson por 20 personoj.

Danujo. — F-ino M. Saxl el Berlino la 8-an de Marto faris en *Kopenhago* grandsukcesan provlecionon. La loka gazetaro aperigis multajn artikolojn kun ilustraĵoj. Komenciĝis kurso, en kiu partoprenas tre interesita kaj serioza publiko. La loka Esperantistaro estas varme gratulinda pro la sukceso, en kiu gravan meriton havas la diligenta kaj lerta aranĝado. — En *Grenaa* okazis grandsukcesa „hungara vespero" kun parolado de f-ino Ica Galambos el Hungarujo. Post bonsukcesa provleciono komenciĝis du kursoj, gvidataj de s-ro G. Staberg el Svedujo.

Estonio. — S-ro Hendrik Rikand, post sukcesa kursgvidado en Latvujo, revenis al sia hejmlando kaj komencis gvidi kurson en *Tallinn*. — La 22-an de Marto la mikshoro de la Esp.-societo „Espero" en Tallinn aranĝis „vesperon de kantoj" en la salono de la urba konservatorio. La koncerto estis disaŭdigata per radio.

Francujo. — La kurso de s-ro J. Glück en *Tours* estis vera triumfo por Esperanto. Ĝi komenciĝis kun 42 personoj kaj finiĝis kun 104 personoj. En la kurso partoprenis multaj gravuloj kaj ĉiuj kun entuziasmo lernis la lingvon. Inter la kursanoj estis ankaŭ 82-jara maljunulo kaj 3-jara knabineto. Ĉe la adiaŭo granda emocio regis kaj el multaj okuloj larmoj fluis. S-ro Glück faris ankaŭ sukcesplenan paroladon pri Praha. Post la foriro de s-ro Glück komenciĝis daŭriga kurso kun 70 partoprenantoj. — Nia eminenta propagandisto, s-ro J. Glück, post la kurso en Tours transiris al la urbo *Thouars*, kie li gvidis kurson por 60 personoj. — La 6-an de Aprilo s-ro Glück faris provlecionon en la urbodomo de *Rouen* antaŭ 300 personoj. Prezidis s-ro M. Richard, profesoro ĉe la Supera Lernejo de Sciencoj. Alia provleciono okazis en la Supera Komerca Lernejo. Ambaŭ lecionoj estis grandsukcesaj kaj ili alportis pli ol 200 kursanojn. — En *Houilles* komenciĝis kurso sub la gvidado de s-ro R. Gazanhes. — Nia senlaca apostolino f-ino Lidja Zamenhof komencis novajn kursojn en la sudfrancaj urboj *Grasse* (kun 52 kursanoj) kaj *Vence* (kun 70 kursanoj).

Hindoĉinujo. — En Februaro komenciĝis en la urbo *Hanoi* nova kurso kun 64 partoprenantoj. — La 10-an de Februaro estis jarkunveno de la Tonkina Esp-Grupo. La nova vicprezidanto de la grupo estas s-ro N. C. Tieu, direktoro de la anam-lingva „Scienca Revuo". — Pluraj anamlingvaj gazetoj regule aperigas artikolojn por Esperanto.

Hispanujo. — Nia estona propagandistino f-ino Elinjo Pähn dum sia propaganda vojaĝo vizitis la urbojn *Madrid, Granada, Sevilla, Cordoba* kaj *Valencia*.

Irlando. — Nia samideano s-ro H. H. Stewart, UEA-delegito en *Belfast*, fervore propagandas nian lingvon. En la monato Marto li faris lumbild-prelegon. En la grava ĵurnalo „The Belfast Telegraph" aperis longa artikolo sub la titolo: Esperanto kiel faktoro de la mondpaco.

Italujo. — Okazas multaj viglaj Esperanto-kursoj, precipe en la organizaĵoj de Faŝista Postlaboro, en la urboj *Alessandria, Brescia, Lucca, Napoli, Romo, Sampierdarena, Torino, Trento, Trieste* kaj *Udine*.

Jugoslavio. — La 17-an de Februaro okazis en *Vukovar* la kursfina festo. La Esperantistoj de Osijek per speciala aŭtobuso vizitis ĝin. S-ro Dragutin Wranka komencis novajn kursojn en *Osijek*.

Madeira-insulo. — Nia nederlanda samideano s-ro B. J. Polak el Steenwijk dum la monato Marto vizitis la belegan insulon Madeira kaj havis grandan ĝojon trovi tie grupon de tre fervoraj Esperantistoj, en kies rondo li pasigis agrablajn horojn. De la urbo *Funchal* li faris kun la anoj de la „Madeira Luso Esperantista Instituto" aŭto-ekskurson kaj li vizitis ankaŭ la blindulan instituton „Luz nas Trevas", kies direktoro, s-ro Joao Joaquim de Jesus, kiu mem estas tute blinda, flue parolas Esperante kaj faras Esperantajn lernolibrojn en blinda skribo. S-ro Polak estas ravita de sia vizito kaj rekomendas al ĉiu samideano vojaĝi al Madeira kaj amikiĝi kun la tiea ŝatinda Esperantistaro.

Nederlando. — Dum la paskaj tagoj okazis en *Hilversum* kun granda sukceso la 6-a nederlanda Esperanto-kongreso. — En *Finsterwolde* komenciĝis kurso sub gvidado de f-ino W. M. de Vries. — S-ro A. Siitam el Estonio finis siajn sukcesajn kursojn en Nederlando kaj revojaĝis al Estonio. — S-ro Julio Baghy finis siajn kursojn en Norda Holando kaj post partopreno en la Nederlanda Esp.-Kongreso revojaĝis al Budapest. — F-ino J. Baudin el Ĝenevo gvidas kursojn en *Hilversum*. — S-ro S. Pragano finis sian unuan kurs-serion kaj komencis novajn kursojn en *Rotterdam* kaj *Dordrecht*. — En *Hago* okazis du sukcesplenaj kunvenoj por la Esp-istaro de Hago kaj ĉirkaŭaj urboj. En la kunvenoj, organizitaj de la societo „Fine Ĝi Venkos", estis prelegoj de s-roj A. Siitam (pri Estonio) kaj A. Cseh (pri la verko de Madách: „La Tragedio de la Homo"). — S-ro A. Vrolijk el Hago faris efikan propagandan prelegon pri Esperanto en *Scheveningen*.

Norvegujo. — La 5-an de Marto nia hinda samideano s-ro L. Sinha faris bonsukcesan publikan paroladon en la Universitato de *Oslo* pri „La fabelolando Hindujo" kun lumbildoj kaj prezentis hindajn kantojn. La 6-an de Marto okazis kunveno de la Esp-ista Klubo kun parolado de s-ro G. Raabe. — En *Tönsberg* la 7-Marto s-ro Sinha faris publikan paroladon pri „Pasinta kaj nuna Hindujo", antaŭ 500 personoj. — F-ino M. Glaser el Berlino komencis novajn kursojn en *Horten*. — La 25-an de Febr. la societo „La Norda Stelo" en *Hamar* aranĝis grandan Esperantistan ski-konkurson.

Palestino. — F-ino Thea Kohn la 5-an de Februaro komencis Esperanto-kurson en *Tel-Aviv*.

Polujo. — Nia senlaca pioniro, profesoro M. Sygnarski, komencis novan kurson en *Bydgoszcz*. En la sama urbo komenciĝis kurso por eksterlernejaj skoltoj, sub la gvidado de s-ro Felikso Klodzinski. — En *Czortkow* s-ro Vlodimiro Dymidas gvidis kurson por la 5-a klaso de la loka ukraina gimnazio. — En Varŝavo le 22-an de Marto okazis en la salonoj de la Pola Turing-Klubo grandsukcesa „Sveda Vespero" sub la protekto de s-ro Einar Hennings, ministro de Svedujo en Varŝavo. En la vespero, organizita de la Esperanto-Sekcio de la Pola Turing-Klubo, partoprenis kelkcent personoj, inter kiuj multaj el la sferoj diplomataj, artistaj, literaturaj, gazetaraj, politikaj kaj militistaj. — En *Szopienice* finiĝis kurso gvidita de s-ro Fr. Mikunda. La loka societo „Zamenhofa Espero" havas novan estraron, la prezidanto estas s-ro Mikunda, vicprez. s-ro Badura, sekr. s-ro A. Bozek. — En *Mielnica* ĉe la rivero Dniestro kurson gvidas s-ro S. Rosenstock. Nia fervora propagandisto havis en tiu urbo malfacilan preparan laboron, precipe pro la filo de la loka rabeno, kiu en publika kunveno akre atakis Esperanton.

Portugalujo. — En la Popoldomo de la urbo *Porto* funkcias du kursoj, unu por komencantoj kun 12 kursanoj, la alia por progresantoj kun 10 partoprenantoj. Oni preparas fondi Esp-grupon.

Svedujo. — En *Borås* finiĝis la sukcesplenaj kursoj de s-ro T. Morariu. Partoprenis ĉ. 150 personoj, inter kiuj estis la prezidanto de la Sveda Junulara Federacio kaj la skolta komandanto. Dum la dimanĉoj s-ro Morariu faris lumbildajn paroladojn pri Rumanujo, en *Ulricehamn, Varberg, Seglora, Gislaved, Göteborg* kaj *Mölnlycke*. — S-ro S. Stuit el Nederlando gvidas kursojn en *Valskog, Sätterbo* kaj *Skogsborg* por komencantoj kaj en *Arboga* por progresantoj, entute por pli ol cent personoj. — S-ro T. Czitrom el Budapest gvidis kursojn en *Härnösand* por komencantoj kaj progresantoj, kaj komencis novan progresan kurson en *Örnsköldsvik*.

ANONCETOJ KUN PORTRETOJ

Prezo de unufoja publikigo de unu portreto kun anonceto: 1.25 guld.

DU AMIKINOJ (22-jaraj), kiuj vizitos la kongreson en Stokholmo, serĉas korespondant(in)on en Stokholmo aŭ ĝia ĉirkaŭaĵo. — Adreso: F-ino El. Popping en Oosterwolde (Frislando), Nederlando.

AL LA VENKO!

217. Scienca revuo kun Esperanto-paĝoj. — La portugallingva scienca kaj socia revuo *„Pensamento"*, aperanta en Porto (Portugalujo), en ĉiu numero enhavas du paĝojn kun artikoloj pri Esperanto kaj informoj pri la Esperanto-movado. (*La Esperanto-fakon gvidas s-roj M. Freitas, L. Fernandes kaj Carlos Ramos. Adreso: „Pensamento", Apartado 19, Porto.*)

218. Aŭstria ministro en Esperanto parolis per radio. — La 11-an de Aprilo s-ro Fritz Stockinger, aŭstria ministro de komerco kaj trafiko, faris paroladon per la radiostacio de Vieno pri la internacia lingvo Esperanto kaj pri la internacia konferenco, kiu dum la tagoj 20-24 Majo en Vieno pritraktos la instruadon kaj praktikan aplikadon de Esperanto. La ministro faris unu parton de sia parolado en la lingvo Esperanto.

219. Fabriko uzanta Esperanton. — La firmo Wüster & K-o, fabriko de segiloj en Wieselburg (Austrio), ĵus eldonis sian novan prezliston en la lingvoj angla, franca, germana, itala, hispana kaj Esperanto.

220. Esperantistaj tramistoj en Köln. — La urbestraro de Köln (Germanujo) ordonis, ke tiuj tramistoj, kiuj kapablas paroli la internacian lingvon Esperanto, portu sur la brako rubandon kun la surskribo „Esperanto", dum la tempo de ĉiu okazaĵo (foiro, kongresoj, festoj k.t.p.), ĉe kiu partoprenas ankaŭ fremduloj.

221. Nova internacia turista gvidlibro. — La Internacia Turisma Ligo („Alliance Internationale de Tourisme") en Bruselo (Belgujo) ĵus aperigis la novan eldonon de sia konversacia libro por turistoj sub la titolo „Manuel de Conversation à l'usage des Touristes". La libro entenas la praktikan materialon en la lingvoj franca, flandra, germana, angla, itala, hispana, dana kaj Esperanto.

222. La aŭstria registaro eldonis novan Esperanto-lingvan prospekton. — Ĵus aperis nova, lukse presita turisma prospekto pri Aŭstrio en Esperanta lingvo. La tre belan prospekton, kiu enhavas multajn utilajn informojn por fremdaj vizitantoj, geografian karton kaj aron da artaj ilustraĵoj, eldonis la aŭstria ministerio por komerco kaj trafiko. (*La prospekto estas ricevebla ĉe la Fremdultrafika Varboficejo en Vieno I. kaj ĉe la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.*)

223. Novaj oficialaj poŝtkartoj en Brazilo, kun Esperanto-lingva teksto. — En la jaro 1933 la Brazila Poŝtdirekcio eldonis serion de 20 poŝtkartoj kun ilustraĵoj kaj Esperanto-lingvaj klarigaj tekstoj apud la portugala lingvo. Ĵus aperis dua serio de tiaj kartoj, konsistanta el 39 poŝtkartoj kun diversaj ilustraĵoj pri la ŝtatoj de Brazilo. Sur ĉiu karto estas videbla en Esperanto-lingvo la vorto „Poŝtkarto" kaj la klarigo sub la bildo. Sur kelkaj kartoj la klariga teksto estas nur Esperanto-lingva. Ĉi tiu fakto signas gravan etapon sur la venka vojo de la mondlingvo Esperanto. (*Rigardu la bildon! — Plenan kolekton de la poŝtkartoj oni povas ricevi kontraŭ 2 svisaj frankoj aŭ 10 respondkuponoj. Adreso: Brazila Ligo Esperantista, Av. Marechal Floriano 212, Rio de Janeiro, Brazilo.*)

224. La jugoslava vojaĝoficejo „Putnik" uzas Esperanton. — La granda vojaĝoficejo „Putnik" en Ljubljana (Jugoslavio) uzas Esperanton en la oficejo kaj en la korespondado. Tiucele ĝi instruigis Esperanton al unu el siaj korespondistinoj. La oficejo ankaŭ eldonis en 4000 ekzempleroj ilustritan prospekton pri Slovenio, parto de Jugoslavio. (*La prospekto estas ricevebla senpage ĉe la Vojaĝoficejo Putnik, Tyrševa 1, Ljubljana.*)

225. En Stokholmo 300 tramistoj parolas Esperante. — En la ĉefurbo de Svedujo jam de kvar jaroj okazas konstante oficialaj Esperanto-kursoj por la tram-konduktoroj. La rezulto de tiuj kursoj estas, ke nuntempe jam pli ol 300 tramistoj povas paroli Esperante.

226. Björnstjerne Björnson en Esperanto. — La verko „EN GLAD GUTT" de la fama norvega verkisto Björnstjerne Björnson ĵus aperis en Esperanta traduko sub la titolo: „GAJA KNABO". La libron eldonis la Norvega Esperantista Ligo en Oslo.

227. Esperanto en la listo de hoteloj kaj manĝejoj. — La Turisma Asocio de Hago ĵus eldonis broŝuron, kiu entenas la liston de la hoteloj, pensionoj, manĝejoj kaj kafejoj en Hago kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. En la broŝuro ĉiuj klarigoj estas troveblaj ankaŭ en la lingvo Esperanto apud la lingvoj nederlanda, angla, franca kaj germana. (*La broŝuro estas senpage ricevebla ĉe: V.V.V., Lange Voorhout 102, Hago.*)

228. La Levanta Foiro uzas Esperanton. — La Levanta Foiro, okazonta en Tel-Aviv (Paleŝtino) dum la 26 Aprilo — 26 Majo, uzas la internacian lingvon Esperanto. En la foira tereno funkcios speciala Esperanto-stando kun informservo por fremdlandaj vizitantoj. Dum la foiro okazos ankaŭ la Unua Proksim-Orienta Esperanto-Kongreso, en la konstruaĵoj de la foiro mem. La nunjara foiro estos kunligata kun la 25-jara fondiĝa festo de la urbo Tel-Aviv.

la mondo ridas

Per la telefono.

— Sinjoro doktoro, mi petegas, venu rapide! Mia fileto englutis mian krajonon!

— Jes, tuj mi iros! Sed ĉu vi jam provis fari ion?

— Certe! Mi skribas nun per la fontplumo. (Answers)

Miskompreno.

— Kiam mi vojaĝis en Afriko, precize je noktomezo mi aŭdis teruran blekon de leono. Mi elkuris el la tendo, prenis rapide la pafilon kaj mortpafis la leonon en nokta ĉemizo...

— Nu, tion mi tamen ne kredas! Kiel povis esti la leono en nokta ĉemizo?

(Saturday Evening Post)

Ĉe la radio.

— Ĉu vi aŭdas, avino? Estas Barcelono!

— Jes, mi aŭdas. Oni rompas nuksojn en la studio.

(Tit Bits)

Ĉe la te-tablo.

— Kia bonŝanco, ke mi renkontas vin, kara sinjoro Smith! Vi estas verkisto, vi do certe povos klarigi al mi, kiel oni povas presi libron, kiu ankoraŭ eĉ ne estas tranĉita?

(London Opinion)

Miskompreno.

— Imagu nur, dum la pasinta semajno mi falis sur la glacio kaj mi devis dum tri tagoj kuŝi.

— Terure! Kaj ĉu vi ne malvarmumis kuŝante tiel longe sur la glacio? (Life)

La ĝusta.

— Kion vi pensas, ĉu la riĉa Meier donos monon al mia eltrovaĵo?

— Mi ne tre kredas. Li estas tro malinteligenta por kompreni tiajn teknikajn aferojn.

— Ĝuste tian homon mi bezonas! (Fliegende Blätter)

Morala alteco.

— La plej granda malhonesteco estas skribi sennoman leteron kaj tiel kalumnii.

— Mi havas precize la saman opinion. Kiam mi skribas anoniman leteron, mi ĉiam subskribas la nomon de iu el miaj amikoj. (Politiken)



— Kaj al mi portu unu belan bovid-kapon, kian ĉi tiu sinjoro havas ...

(Ric et Rac)

Amikinoj.

— Ĉu vi scias, mia kara, ke via malnova ĉambristino nun ĉe mi servas?

— Ho, ĉu vere?

— Nu, tamen ne ektimiĝu, ĉar eĉ la duonon mi ne kredas el tio, kion ŝi rakontas pri vi. (Tit Bits)

Dum ĉasado.

Ĉasisto: Diablon! Denove forkuris la leporo. Mi opinias, ke mi pafis iom tro maldekstren.

Servisto: Ne, grafa moŝto, la pafo estis perfekta, nur la leporo estis iom tro dekstre.

(London Opinion)

Pacienco.

— Mi ne komprenas vin, sinjoro. Jam de du horoj vi staradas apud mi kaj rigardas, kiel mi fiŝkaptas. Kial ne fiŝkaptas ankaŭ vi, se ĝi tiel multe interesas vin?

— Ho, mi ne havas paciencon por sidi dum horoj kaj atendadi la fiŝojn.

(Hjemmet)

La nova sekretario.

— Ĉu oni povas paroli kun la sinjoro direktoro?

— Certe, sinjorino. Li estas ĉiam preta akcepti belajn virinojn.

— Tiam bonvolu anonci al li, ke lia edzino estas ĉi tie.

(Söndagsnisse)

Observu la regulon!

— Panjo, ni devas veki paĉjon!

— Kial, mia filino? Li ja tiel bone dormas!

— Jes, sed li forgesis enpreni la dormigilon.

(Buen Humor)

Semajnfino.

— Ĉu mi ne diris al vi, infanoj, ke vi portu de hejme ankaŭ unu bonan spongon?

— Ne estis hejme eĉ unu bona, ĉiuj estis plenaj de truoj.

(Die Woche)

Ĉe dentisto.

— Mi diras al vi, ke ĝi tre doloros. Sed estu forta dum la doloro, kunpremu la dentojn, kiel vera viro. Kaj nun malfermu la buŝon! (Answers)

NOVAJ LIBROJ

Julio Baghy: LA TEATRA KORBO. — Sub ĉi tiu titolo ĵus aperis nova libro, kiu entenas kolekton de noveloj de nia ŝatata poeto. La novelojn, kiuj parte jam aperis en Esperantaj gazetoj, karakterizas la sama riĉeco de ideoj kaj la sama majstreco en nia lingvo, kiujn ni ĝuis ĉe la aliaj verkoj de Baghy. La 112-paĝa libro, kies kovrilon ornamas desegnaĵo de J. Jonquière, estas eldonita de la geamikoj de la aŭtoro kaj estas administrata de s-ro J. de Ren en Leiden, Nederlando (Cobetstraat 70). La prezo estas: 0.75 ned. guld.

„LEXICON". Esperanta kartludo. Produktaĵo de la firmo J. Waddington. Por Esperanto eldonis: Brita Esp. Asocio en Londono. Prezo: 2 ŝ. 6 p. — Ĉi tiu nova kartludo konsistas el 52 kartoj, kiuj surhavas la literojn de la Esperanta alfabeto. La kartojn oni disdonas inter la ludantoj kaj ĉiu devas formi vortojn el siaj kartoj, laŭ speciala lud-regularo. La ludo estas ne nur interesa kaj amuza, sed ankaŭ instrua, ĉar ĝi ebligas bonegan ekzercon sur la kampo de nia vortaro. La bela kartaro, troviĝanta en luksa ujo, nepre meritas, ke ĉiu Esp-a societo kaj ĉiu samideano posedu ĝin. Ĝi forpelos en niaj kunvenoj la ofte spertatan enuon kaj en amuza maniero helpos progresi en la lingvo, kiel sprita instruilo. Al ĉiu kartaro estas aldonita aparta broŝureto kun la lud-reguloj.

Petro Danov: LA NOVA EVO. Unua volumo en la tria serio de la Esperanta Okulta Biblioteko „Nova Kulturo". 88 paĝoj. Prezo 1.50 sv. fr. Eldonejo: „Nova Kulturo", s-ro Atanas Nikolov en Sevlievo (Bulgarujo). — La libro entenas la filozofiajn, etikajn kaj religiajn instruojn de la nuntempa bulgara vivreformanto Petro Danov, fondinto de la religia societo de „blankaj fratoj".

Björnstjerne Björnson: GAJA KNABO. Rakonto. El la norvega originalo tradukis: Liv Sandberg kaj Dordi Johansen. 94 paĝoj. Prezo: 1.50 n.kr. Eldonis: Norvega Esperantista Ligo, Box 388, Oslo. — Ĉi tiu bela libro, ornamita per la portreto de la mondfama norvega aŭtoro, prezentas al ni en bonega traduko interesan rakonton, kiu karakterizas la vivon en la nordo. Niaj norvegaj ŝamideanoj estas dankindaj pro ĉi tiu riĉigo de nia mondlingva literaturo. La libro estas aĉetebla ankaŭ ĉe La Praktiko.

Aperis nova monata, grandformata, okpaĝa, ilustrita, sendependa internacia revuo:

„NIA GAZETO"

Direktoro: Georges Avril.

Ĉefredaktoro: S. Grenkamp-Kornfeld L.K.

Abonprezo: por 12 numeroj = 3.— sv. fr. (en Francujo 10.— fr. fr.)

Petu specimenon!

Adreso de la redakcio kaj administracio: 29 avenue de la Victoire, Nice (Francujo).

Moderna reklamo por Esperanto. — En Kopenhago oni aranĝis Esperanto-kurson sub la gvidado de f-ino M. Saxl. La lerta kurs-komitato faris grandskalan kaj tre efikan propagandon por la kurso. Nia bildo montras la palacon de la granda dana gazeto „Politiken", kie dum 14 vesperoj antaŭ multaj miloj da homoj brilis la surtegmenta lum-reklamo: „Lernu Esperanton! Senpaga provleciono la 8-an de Marto en Vesterport." En la dana ĉefurbo vekiĝis vigla intereso pri Esperanto. Grandsukcesa kurso komenciĝis kun ĉiam plimultiĝanta anaro kaj baldaŭ komenciĝos nova kurso.

F-ino Margarete Saxl, talenta propagandistino kaj instruistino, aktiva membro de la Cseh-Instituto. Dum la lastaj monatoj ŝi faris energian kaj sukcesplenan propagandan laboron en pluraj urboj de Danujo kaj nuntempe ŝi gvidas kurson en Kopenhago.



En Breda (Nederlando) kun sukceso finiĝis Esperanto-kurso por geoficistoj de la poŝto. Nia bildo montras la partoprenintojn, antaŭ la ĉefa enirejo de la nova poŝtoficejo. La instruanto estis s-ro F. J. v. d. Burgt (×), la organizanto: s-ro G. v. d. Heijden (××).

La anoj de la Esperantista klubo „Nova Vivo" en Radvanice (Ĉeĥoslovakujo), ĉiuj fervoraj legantoj de La Praktiko. La oka persono de dekstre estas s-ro Ant. Glet, prezidanto; de maldekstre la kvara: s-ro Jos. Hanzelka, sekretario; la tria persono de dekstre: s-ro Jan Taraba, oferema kasisto. La klubo havas bibliotekon kun pli ol 200 libroj.

La agema anaro de la Esperanto-Grupo (sekcio de LEEN) en Enschede (Nederlando), fondita en la jaro 1932. Inter la sidantoj de maldekstre la dua persono estas: s-ro Dorren kasisto, la tria: s-ro R. J. Kuiper prezidanto, la kvara: f-ino G. H. Benink el Almelo, ĉefestraranino de LEEN, la kvina: s-ro J. J. H. Teunissen, sekretario de la grupo.

La rusa pastro K. M. Kolobaŝkin, lia edzino, monahino Pavliŝĉeva kaj s-ino Ĉibisova, kiuj aranĝis la Esperanto-lingvan diservon okaze de la morto de nia rusa pioniro I. G. Ŝirjaev.



Ekzemplo pri lerta propagando por Esperanto. En la stratoj de la sveda urbo Borås tiamaniere oni faris reklamon por la kursoj de nia rumana instruisto T. Mòrariu.

Nia nederlanda leganto, s-ro B. J. Polak (en la mezo), jus vizitis la insulon Madeira kaj pasigis tre agrablan tempon en la societo de la tieaj gastamaj samideanoj.

S-ro A. van Straaten, aŭtoro de la nova granda Esp.-Nederlanda vortaro, gvidanto de la skriba kurso de la Centra Esperanta Propaganda Komisiono en Nijmegen (Ned.)

Ĉe la bulgara gejunularo estas vigla intereso pri Esperanto. Nia bildo montras la anaron de la Esperanto-grupo „Zamenhof" ĉe la komerca gimnazio en Tirnovo, iama ĉefurbo de Bulgarujo.

Niaj novaj fervoraj gesamideanoj en la urbo Philippeville (Alĝerio). Ili lernis Esperanton en la sukcesplena kurso de s-ro M. Salzmann el Lyon (staranta meze).

LA MONDO ESTAS INTERESA

Hirundo kaj vagonaro — Interesan okazaĵon observis antaŭ nelonge kelkaj germanaj fervojistoj. Unu hirunda paro konstruis sian neston en fervoja vagono, kiu staris ekster uzado en Berlino. Sed baldaŭ venis ordono por denove funkciigi la vagonon kaj oni direktis ĝin al Hamburgo. Dum la tuta longa veturo la hirunda paro kun kortuŝa fideleco gardis la elkovitajn idojn sidantajn en la nesto. La hirundoj flugis apud la vagonaro kaj konstante nutradis la idojn per bongusta muŝfrandaĵo.

★

Kio estas la plej bela en la mondo? — Je tiu demando respondi estas tre malfacile. Tial iu angla ĵurnalisto turnis sin foje kun tiu demando al plej kompetenta persono, al la profesoro de la estetiko ĉe la universitato de Oksfordo. S-ro Dunlop, la eminenta profesoro de la estetiko, ne rifuzis respondi. Li diris: „El la organoj de la homo estas du, kiuj donas estetikajn sentojn. Ili estas la okuloj kaj la oreloj. Tamen oni ne povas nei, ke ankaŭ per la flaro, gustumo kaj palpado oni povas akiri estetikajn ĝuojn. Por la okuloj plej belaj estas la brilaj koloroj de la naturo. La plej belajn kolorojn, kiujn homaj okuloj povas vidi, donas la floroj, la matenaj kaj vesperaj nuboj, la akvogutoj, la surfaco de la akvoj kaj la koloraj vitroj. Ne ekzistas diamanto aŭ brilianto, kiu povas brili en tiel grandiozaj, puraj kaj freŝaj koloroj, kiel la rosa guto en la matena sunradio. En la sunleviĝo kaj sunsubiro la Sinjoro mem flamas, same kiel en ĉiu floranta rozarbeto. Por la oreloj la plej bela estas la kanto de la najtingalo. Povas esti, ke ankaŭ la agrabla lunbrila somera vespero plialtigas ĝian belecon, sed malgraŭ ĉio oni devas miregi pri tio, ke tiu eta birdo sen ia akademia studo, sen ia ajn kono de muziknotoj kaj sen honorario prezentas tian grandiozan koncerton." — Kaj la beleco de la virino? — demandis la ĵurnalisto. „Ankaŭ la virino estas bela, — ridetis la maljuna profesoro, — sed oni ne povas nei tion, ke ĉe la beleco de la virino estas ankaŭ multaj elementoj de utileco. Tial tre prava estas tiu franca filozofo, kiu diris, ke por la bufo la plej bela estas la bufino. Pli alta grado de la „bela" estas la „majesta". Plej majesta estas la aspekto de la stelplena ĉielo. Sed ĉi tie jam ne la sentorganoj ludas la ĉefrolon, sed la pensado."

★



La mano de hinda fakiro. La fakiro ĵuris *neniam detranĉi la ungojn*, por plaĉi al Dio.

★

La pura oksigeno mortigas. — Kiel oni scias, unu kvinona parto de la aero estas oksigeno, la cetera parto estas grandparte nitrogeno. Se en fermita ejo ni per spirado konsumas la tutan oksigenon de la aero, ni sufokiĝas, ĉar la oksigeno estas absolute necesa al la vivo. Sed ankaŭ en nura oksigeno oni ne povas daŭre vivi. La angla scienculo Dickson faris interesajn eksperimentojn pri tio. Li tenis musojn kaj ratojn en pura oksigeno, sed la bestoj baldaŭ mortis. Estis nur escepto, se iu besto atingis en vivo la kvinan tagon. En la ordinara aero la nitrogeno, kiu mem estas indiferenta por la pulmoj, malhelpas la detruan efikon de la oksigeno. En la aero ekzistas ankaŭ aliaj gasoj, t.n. „nobelaj" gasoj („nobelaj", ĉar ili ne unuiĝas en kemia kombinaĵo kun aliaj elementoj), sed en tre malgranda kvanto. El tiuj nobelaj gasoj plej konata estas la heliumo, kiun industrie oni produktas el metano kaj kiun oni uzas por plenigi la balonojn de aerŝipoj, ĉar ĝi estas tre malpeza kaj ne estas bruligebla. En gasmiksaĵo konsistanta unu-kvinone el oksigeno kaj kvar-kvinone el heliumo, ni povas vivi same bone, kiel en la ordinara aero, ĉar ankaŭ la heliumo estas indiferenta por la homa korpo, same kiel la nitrogeno.

★

La verkisto Shakespeare kaj la nomo Shakespeare. — Multaj personoj opinias, ke kun la morto de la mondfama angla verkisto Shakespeare ankaŭ tiu nomo malaperis. Sed tio estas granda eraro. La vero estas, ke en Anglujo ankoraŭ hodiaŭ vivas multaj homoj kun tiu nomo, kaj ili eĉ ne estas posteuloj de la verkisto.

★

La stearina kandelo estas centjara. — La kandelojn oni kutimas fari el vakso, sebo kaj stearino. El vakso kaj sebo oni faris kandelojn jam en la antikva epoko, sed la stearina kandelo aperis nur poste, en la nova epoko. La manieron fari kandelon el stearino eltrovis la franca Milly, ĉambelano de la franca reĝo Karlo X-a. En la jaro 1831 kune kun la rusa Motard li fondis fabrikon apud Parizo por la fabrikado de tiaj kandeloj. Pro tio dum longa tempo oni nomis la stearin-kandelojn: Milly-kandeloj.

Kun rabato de 50%

vi povas aĉeti la libron:

„VERTAALDE ESPERANTO-EXAMENOPGAVEN"

Antaŭa prezo: 0.50 guld. Nun: 0.25 guld.

Mendu rapide ĉe LA PRAKTIKO, ĉar la kvanto ne estas granda.

Nova eldono de la libro „ESPERANTO-EXAMEN-OPGAVEN" kun la tradukoj estas en preparo. — Eldonejo de la Int. Cseh-Instituto en Hago.

LA VOJAĜOJ DE GULIVERO AL LILIPUTLANDO

de: JOS. A. DE ROOS

Prezo: afrankite 1.25 ned. guld.

Ĵus aperis:

PRI PIEDPILKLUDANTO

Verkis Victor van Nispen, ilustris St. de Reuder, tradukis Frato M. Bartolomeus.

Speciala libreto por junaj Esperantistoj.

Prezo: bindita, 1.30 guld., afrankite.

PRESEJO PIET SMITS en TILBURG (Nederl.)

Poŝtĉekkonto: 115243.

Vojaĝo al Aŭtarkistano.

En ĉi tiu interesa artikolo, aperinta en la angla ekonomia fakgazeto „Economist", la fabela barono Münchhausen rakontas siajn travivaĵojn en la lando Aŭtarkistano, kie la tuta ekonomia vivo estas organizita laŭ la principoj de la moderna doktrino „aŭtarkio" (ke ĉiu ŝtato mem devas produkti siajn bezonaĵojn kaj ke la importadon oni devas ĉesigi). La rakonto estas prava satiro pri tiuj landoj, kiuj nuntempe sekvas tiun politikon.

Barono Münchhausen plenigis sian glason kaj daŭrigis la rakonton:

Antaŭ kelkaj jardekoj Aŭtarkistano estis ankoraŭ unu el la gvidantaj komercaj ŝtatoj de la mondo. Nekredebla riĉeco regis en ĝi. Aŭtarkajn ŝipojn kaj aŭtarkajn produktaĵojn oni povis vidi en ĉiu parto de la mondo, kaj la plej bonaj varoj de ĉiuj aliaj landoj trovis en Aŭtarkistano vendoplacon. Tiam eksplodis la mondmilito, kiu renversis la internacian ekonomian sistemon. En Aŭtarkistano oni proklamis la devizon: „Aŭtarkujo apartenas al la aŭtarkoj!" La devizo rapide naskis fortan movadon, kiu baldaŭ ŝanĝis la tutan ekonomian politikon de la lando. Oni malpermesis, eĉ per morto punis la enportadon de fremdlandaj komercaĵoj. De tiu tago Aŭtarkistano apogis sin nur je sia propra produktado. Kaj nun mi rakontos al vi, kion mi vidis en tiu stranga lando.

La mar-vojaĝo al Aŭtarkistano estis trankvila. En la kvara tago ni ekvidis la insulon. Estis ĝuste sunleviĝo kaj la unuaj radioj de la suno falis sur gigantan muron, kiu ĉirkaŭis la tutan insulon. Sed ne tiu muro estis la plej rimarkinda aperaĵo. Multe pli surpriza estis la grandega nombro da fabrikaj kamentuboj, starantaj trans la muro. Sur ĉiu estis legebla la aŭtark-lingva surskribo: „Tohu-bohu", signifanta: Aĉetu nur aŭtarkajn varojn! Sed mi ne povis longe esploradi la detalojn de la muro, ĉar proksimiĝis ŝipeto por ekscii, kion ni volas en Aŭtarkistano. Nur post longedaŭraj, malfacilaj intertraktadoj ni ricevis fine la permeson alborđiĝi. Sed la permeso validis nur por unu tago kaj ĝi enhavis la kondiĉon, ke mi devas severe konformiĝi al la kutimoj kaj leĝoj de la lando. Sincere dirante mi esperis, ke oni plilongigos la permeson, kaj plena de scivolo mi eliris el la ŝipo.

La ŝipeto rapide kuris tra la haveno, kiu ŝajnis esti uzata nur por gardado de remboatoj, kaj mi ne povis observi ian signon de vivo. En la mezo de la kajo staris grandega statuo. Ĝi prezentis viron, kies eksteraĵo memorigis pri la borsaj agentoj de la malnova mondo. Miaj akompanantoj forte skandaliĝis, ĉar mi ne genufleksis antaŭ la statuo. Ili klarigis al mi, ke ĝi estas la statuo de Sankta Bankrotius, la patrono de la insulo, dio de la konjunkturo, centro de la aŭtarka religio. La ĉefa leĝo de ĉi tiu religio estas, ke la prezoj estu kiel eble plej altaj, ĉar la religia idealo estas, ke la prezoj altiĝu ĝis tiu grado, ke neniu povu plu ilin pagi.

Kontraŭ tio la salajroj devas esti kiel eble plej malaltaj. Se pro la altaj prezoj la produktaĵoj amasiĝas, oni oferas ilin al Sankta Bankrotius, bruligante ilin antaŭ la piedoj de la sanktulo, aŭ ĵetante ilin en la maron. Por ke la enĵetitaj varoj ne plenigu la havenon kaj ne pligrandigu iam la kultureblan teritorion de la insulo, tre sprita sistemo forbalaas ilin al la profunda maro.

Ankoraŭ sur la ŝipo kun surprizo mi rimarkis, ke la aŭtarkaj oficistoj portis paperajn vestojn, kaj sur la bordo mi vidis, ke ĉiu loĝanto estas tiel vestita. Poste mi trovis la klarigon. Aŭtarkistano ne havas alian krudan produktaĵon, ol la kotono, sed per genia metodo, eltrovita en la jaro 1933, oni aplikas la kotonon por voj-konstruado. Oni rakontis al mi, ke en Aŭtarkistano sub ĉiu vojo estas kotona tavolo du futojn dika, kio multe pliagrabligas la uzadon de la vojoj. Pro tio tiel multe altiĝis la prezo de la kotono, ke nur la plej riĉaj civitanoj de la lando povis al si permesi la lukson, uzi kotonajn vestaĵojn.

Post tio granda blekado kaj bruado kaptis mian atenton. Kiam oni vidis mian embarason, unu afabla oficisto klarigis al mi, ke oni portas al buĉejo la kutiman ĉiutagan bovo-amason, por fari el la bovoj — gluon. Li diris, ke ĉiumonate 50.000 sanajn bovojn oni transformas je gluo. „Sed kion vi faras kun tiom da gluo?" — demandis mi. „Kia demando!" — estis la respondo, — „ĉu vi ne scias, ke ĉirkaŭ la insulo estas larĝaj fosaĵoj plenigitaj per gluo? Ili malebligas al la fremduloj proksimiĝi al la muro kaj enpenetri en nian landon." Baldaŭ mi vidis, ke nur unu mallarĝa ponto pasas super tiu neordinara defendilo, kaj ankaŭ ni tra tiu ponto eniris en la landon. Se la fremdulo ĉe iu ajn alia punkto provas eniri, li engluiĝas kaj nesaveble pereas, kiel muŝo sur la muŝpapero.

Fine ni atingis la urbon. Ĉar hejme mi ne povis akiri aŭtarkan monon, ĉar Aŭtarkistano ne havas interrilatojn kun la eksterlando, mi tuj eniris en pli grandan bankon, por ŝanĝi monon. „Kiaj bildetoj estas ili?" — demandis la bankoficisto. „Ili ne estas bildetoj" — respondis mi, — „sed ili estas monbiletoj, valoraj monbiletoj kun cent-procenta ora kovraĵo." Mi rimarkis, ke mia klarigo estis por li sensenca. En Aŭtarkistano oni ne havas plu monon. La komerco okazas per interŝanĝado de la varoj mem. La kasisto konsilis, ke mi ŝanĝu mian ringon aŭ poŝhorloĝon, se mi deziras ion aĉeti. Sed li severe admonis min esti singarda, ĉar se la polico rimarkas, ke mi enportis kun mi ian fremdan produktaĵon, oni povos min ekzekuti.

Kiam mi elpaŝis el la banko, la agrabla odoro de freŝe muelita kafo tuŝis mian nazon, kaj mi eksentis malsaton. Mi demandis al la plej proksima policisto, kie mi povus trinki la plej bonan kafon? „Kafon trinki?" — demandis li kun mirigitaj okuloj kaj rigardis min kiel frenezulon. „La kafo estas ne por trinki, sed por nutri porkojn, aŭ por fari el ĝi gason. Sed oni ne povas ĝin trinki. Ĝi ja ne estas fluida." Vidante, ke ĉia diskuto estas vana, mi nur demandis, de kie venas tiu freŝa kaf-odoro? Li montris al grandega kamentubo kaj diris, ke ĝi apartenas al la nacia industri-evoluiga uzino de Aŭtarkistano. Tie per konstanta eksperimentado oni serĉas la plej bonajn manierojn por la utiligado de la enlandaj produktaĵoj. Nuntempe oni hejtas tie per kafo kaj la ricevitan varmon oni kondukas al la vitrodomoj de la tropaj fruktoj. Mi ne povis plu silenti. „Sed tio devas esti terure multekosta, — mi diris, — kial vi ne venigas la tropajn fruktojn el tiuj landoj, kie ili libere kreskas, interŝanĝante ilin kontraŭ via kafo, kiu nun forbrulas? Tiamaniere vi multe pli malkare akirus tiujn fruktojn!" La policisto dum momento rigide rigardis min kaj poste ordonis, ke mi sekvu lin. En la proksima policejo mi eksciis, ke mi pekis kontraŭ la leĝoj de Aŭtarkistano kaj ke mi faris krimon punatan per morto. Sed ĉar mi estis la sola eksterlandano, kiu de multaj jaroj povis enpaŝi en la landon, mi ricevis pardonon.

Ni ekiris al la haveno. Dum la iro mi rimarkis, ke la homoj antaŭ la domoj trinkas ion el taso kaj post ĉiu gluto ili kisas la muron. Mi opiniis, ke ĝi estas religia kutimo, sed pro singardo mi demandis iun. Tiu klarigis al mi, ke en la jaro 1933 oni sukcesis eltrovi, ke la cemento fariĝas pli fortika, se oni almiksas sukeron. Tial nun la sukeron oni uzas por dom-konstruado. Ĉar pro tio la prezo de la sukero troaltiĝis, la malriĉuloj devas lekadi la murojn, kiam ili havas apetiton al dolĉaĵo.

Post tio mi komencis kuri, por esti kiel eble plej baldaŭ ekster tiu lando, ĉar la frenezaĵoj de Aŭtarkistano jam atakis miajn nervojn.

Barono Münchhausen eltrinkis sian glason. Liaj amikoj admonis lin, ke li klopodu en la rakontado almenaŭ al iom da verŝajneco, ĉar li ankoraŭ neniam mensogis tiel ege, kiel nun. La barono amare ridis: „Vi pensas, ke mi mensogis. Jes, kelkloke mi iom plibeligis la historion, sed hodiaŭ mi rakontis al vi la veran veron. Jen, kiam mi mensogas, vi kredas al mi, sed kiam mi diras la veron, vi ne kredas."

Atentu!

Sur la lasta paĝo vi trovas la detalajn informojn pri la someraj kursoj en Arnhem!

LA REDAKCIO RESPONDAS

S-ro M. F. (Portug.) — 1. Kremacii = bruligi la homan kadavron. — 2. Flustri = mallaŭte paroli al la oreloj de la alia homo. — 3. Konkeri = akiri per milito. Ekz-e: dum la mondmilito la germana armeo konkeris Varŝavon.

S-ro M. A. P. en M. (Sovjetunio) — La mankantajn numerojn vi devas postuli ĉe SEU kaj ne ĉe ni, ĉar SEU sendis al vi tiun jarkolekton.

S-ro A. K. en W. (Aŭstrio) — Via abono estas pagita ĝis la fino de Junio 1934.

S-ro C. G. en D. H. (Ned.) — „Vireca virino" = virino, kiu havas virajn ecojn. „Ombreca figuro" = figuro kvazaŭ ombra, similanta al ombra figuro. Ombra figuro estas tiu figuro, kiu vere konsistas el ombro. Ekz-e la infanoj ofte ludas farante per la manoj ombrajn figurojn sur la muro. Sed „ombreca" estas tiu figuro, kiu kvankam ne estas farita per ombro, tamen similas al ĝi, havas la „econ" de la ombra figuro.

S-ro J. de W. en A. (Ned.) — 1. „Vi venu, infanoj!" En ĉi tiu frazo la vorto „vi" ne estas malbona, sed nur superflua. La regulo estas, ke en Esperanto oni devas ĉiam diri la subjekton aŭ la personan pronomon, ĉar la verbo mem ne montras al gramatikan personon. Sed ĉe la imperativa formo de la verboj ni povas forlasi la pronomon de la dua persono, ĉar la imperativo estas uzata ordinare al dua persono. Kiam ni uzas la imperativon ne al dua persono, ni devas diri la pronomon, ekz-e: *Ni ekiru! Ili venu!* — 2. „Mag ik uw courant lezen?" Bonaj tradukoj de ĉi tiu frazo: *Ĉu mi rajtas legi vian gazeton? Ĉu estas permesate legi...? Ĉu mi povas legi...? Ĉu vi permesas legi...?* La plej konsilinda estas la lasta formo. En la tria formo la verbo „povas" ne estas tute ĝusta, sed tamen ĝi estas uzebla. La vorto „darfi" ne estas oficialigita.

S-ro E. D. en V. — Vi skribis al ni: *„Mi receivis vian peton por novan abonpagon. Mi bedaŭras ke mi devas diri al vi ke la Praktiko estas tro facila for mi kaj mi desiras ne receivi la Praktikon pli longa."* Vidante viajn erarojn ni supozas, ke vi intencis skribi: „tro malfacila". Sed bedaŭrinde ni ne konas pli facilan Esperantan gazeton, ol La Praktiko.

S-ro H. W. W. en V. (Ned.) — „Kurento" = la elektra fluo en la kondukiloj.

S-ro R. P. en M. (Franc.) — Jes, en kelkaj punktoj Esperanto ŝajnas esti pli malfacila, ol iuj aliaj lingvoj. Ekzemple nia akuzativo ŝajnas esti superflua balasto. Sed en la vero ĝi estas tre utila, ĉar kompense la vortordo povas esti tute libera. Se ni ne havus la akuzativon, ni devus teni severan vortordon en la frazoj kaj la versfarado fariĝus tre malfacila, preskaŭ neebla. Kaj ne forgesu, ke ankaŭ en la franca lingvo ekzistas akuzativo (la personaj pronomoj!). La sama principo rilatas ankaŭ al la verboj. Se anstataŭ niaj verboparoj *pasi* kaj *pasigi*, *bruli* kaj *bruligi*, *komenci* kaj *komenciĝi* estus nur po unu vorto, kies transitiveco dependus nur de la ĉeesto de komplemento, la vortordo devus rigidiĝi, por ke la verbo ne estu miskomprenebla. Do ni konkludas, ke ĝuste pro ĉi tiuj ecoj Esperanto superas la aliajn lingvojn. Estas vere, ke tiuj ecoj prezentas kelkajn malfacilajojn por iuj nacioj, sed kio estas tio apud la grandega facileco de nia lingvo ĉe aliaj punktoj, kiu frapas ĉiun lernanton de Esperanto? La lerta propagandisto, aŭdinte tiajn plendojn, kontraŭmetu la facilajn flankojn de nia lingvo.

S-ro K. L. en G. (Sved.) — 1. Dek milionoj da litroj da akvo. — 2. „Mi lernas la lingvon Esperanto." „Mi vizitis la urbon Parizo." La frazoj estas bonaj. En ĉi tiu kazo la vortoj „Esperanto" kaj „Parizo" estas konsideataj kiel neŝanĝeblaj propraj nomoj difinantaj la substantivon kaj tial ili ne ricevas akuzativan finaĵon. Vi povas ankaŭ konsideri la frazojn kiel mallongigitajn formojn de: *Mi lernas la lingvon, kies nomo estas Esperanto,* kaj: *Mi vizitis la urbon, kies nomo estas Parizo.*

S-ro B. en Odessa. — Bedaŭrinde ni ne povas liveri librojn al via lando, ĉar via lando ne permesas, ke vi pagu al ni. La malnovajn numerojn de La Praktiko vi povas aĉeti ĉe SEU en Moskvo.

S-ro A. S. en R. (Bulg.) — Ni ĉiam en bona ordo sendis al vi la gazeton. Unufoje ĝi revenis kaj sur la banderolo estis misteraj vortoj verŝajne en bulgara lingvo. Ni donas al vi konsilon: faru Esperanto-kurson por la poŝtistoj de via urbo kaj ni garantias, ke vi poste ĉiam akurate ricevos viajn poŝtaĵojn.

S-ro A. J. de W. en D. (Ned.) — 1. „Li venas ĉe mi." „Li venas ĉe min." Ambaŭ frazoj estas malbonegaj. La sola ĝusta frazo estas: *Li venas al mi.* — 2. La ĝusta frazo estas: *Kiel nomiĝas vi?*

F-ino M. E. S. en L. (Angl.) — 1. „Li renkontis ilin akompanantajn siajn amikojn." La frazo estas tute klara: li renkontis kaj ili akompanis kaj la amikoj apartenis al ili, ne al li. — 2. „Tra la mondon." Vi estas prava, ĉi tie la litero „n" estas erara.

KONKURSOJ

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Januara numero!

90-a konkurso.

ENIGMO

Ĉiu nombro signifas unu literon. La sama nombro signifas ĉiam la saman literon. La solvo konsistas el 11 literoj.

7, 11, 4, 10, 8, 6, 4, 3 = granda rabobesto

9, 4, 10, 7, 2, 3, 6 = titolo de tre grava libro

8, 2, 9, 11, 4, 7, 3 = korpoparto

6, 1, 10, 4, 8, 11, 4, 2, 6, 3 = nomo de monato

8, 6, 5, 10, 3, 7, 1 = la plej grava meblo

10, 4, 7, 11, 8, 2, 6, 9 = nomo de kontinento

6, 10, 4, 7, 11, 3 = altvalora metalo

11, 8, 2, 9, 3, 7, 10, 4, 3 = nomo de tago

11, 8, 7, 4, 5, 9, 6 = la plej bona manĝaĵo

5, 9, 10, 8, 6, 3 = granda festo en la kalendaro

1 — 11 = **tre gravaj, interesaj kaj aktualaj vortoj.**

Inter tiuj, kiuj ensendas al la redakcio la ĝustan solvon de ĉi tiu facila enigmo, ni dislotos 13 premiojn. Ni akceptos la solvojn ĝis la fino de Julio.

Bonvolu precize plenumi la konkursajn regulojn!

91-a konkurso.

La 60 silabojn enmetu en la kvadratojn de la figuro tiel, ke en ĉiu kvadrato estu unu litero. Vi ricevos 19 vortojn kun la jenaj signifoj:



1. Sanigilarejo. — 2. Tre grava parto de nia korpo. — 3. Nomo de mondparto. — 4. Anoncisto. — 5. Ducifera nombro. — 6. Fari statuon. — 7. Blanka floreto. — 8. Parto de la lernolibro. — 9. Nigra birdo. — 10. Tre granda nombro. — 11. Ruliĝanta neĝo. — 12. Nomo de grava scienco. — 13. Ducifera nombro. — 14. Mortigilo. — 15. Kreskaĵo simila al melono. — 16. Nomo de antikva dio. — 17. Nomo de monato. — 18. Besteto simila al krokodilo. — 19. Rapida monta rivereto.

a a a al bo cer ci dek dek do do du ga geb go he ja ju ko ko ko ko kor ku kur kvar la la lan le li ma me mi nar ni no no nu o o ok pit po po ren ri ro ro ro rol skulp sto te ti to to to to van

La literoj en la dikaj kvadratoj donas gravan admonon, kiun ankaŭ la Esperantistoj devas observi.

Ni disdonos 5 premiojn al tiuj, kiuj bone solvas la enigmon. Estas sufiĉe, se oni ensendas nur la frazon el la dikaj kvadratoj. Ni akceptas solvojn ĝis la fino de Julio.

Bonvolu precize plenumi la konkursajn regulojn.

Kupono por la 90-a	Kupono por la 91-a	
		Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj al la redakcio

GRAFOLOGIO

En ĉi tiu rubriko la grafologo de La Praktiko donas karakter-bildojn laŭ ensenditaj leteroj. La informojn kaj regulojn bonvolu legi en la 27-a numero (Marto 1934) de La Praktiko sur la 12-a paĝo.

„Maljunulo." (60-jara sinjorino). — Se vi estas patrino, (la grafologo ne dubas pri tio, sed ĝi ne apartenas al la karaktero), vi estas bonega patrino, kiu bone prizorgis la infanojn. Vi estas sindona, delikata, ordema (pri tio povas konvinkiĝi viaj vizitantoj!). Sed malgraŭ ĉio dirita oni ofte povas aŭdi de vi: „Infanoj, estu saĝaj, aŭskultu kaj faru korekte, kiel mi diras al vi!" Do vi estas edukema. De tempo al tempo „la filineto venas supren", la juneco montriĝas kun dolĉaj memoroj. Vi estis obea infano kaj se via instruisto vin renkontas, li respektplene salutas vin. Ankoraŭ „ĉiam labori" staras sur via vivprogramo, kvankam la grafologo vidas signojn, kiuj montras la maljuniĝon. Vi estas ĝojiga parolantino, sed tamen oni ne povas diri pri vi, ke vi estas babilema.

„Rozo." (37-jara fraŭlino). — Bedaŭrinde la grafologo devas iomete averti vin. Ne estu kolera je li, ĉar li faras tion por via bono. Volonte vi volas esti bona kaj ĝentila, sed vi ne povas, ĉar tio estas malfacila kaj la fortoj mankas ĉe vi. Vi ne estas konstanta, sed daŭre ŝanĝiĝema. Tio estas granda ŝarĝo, kiu vin tute regas. Ne estu tiel akra, kiam oni diras al vi ion, kio ne plaĉas al vi. Ne forgesu, ke ankaŭ vi ofte diras al aliaj malplaĉajn parolojn. Pripensu dum momento, fraŭlino „Rozo", la vorton skribitan supre sur via karto. Ĝuste la printempo povas fari multon por vi kaj via interno bezonas tion, ĉu ne? Kial tiu multa dubo pri vi mem, tiu necerteco en la decidoj? Mi komprenas, ke via vivo multon postulas de vi, sed tamen trankviliĝu! Se vi unufoje venkis la nervojn, ĉio fariĝos pli facila, kaj tiam vi povos pacience elporti la malsukcesojn, kiuj nun estas iom netolereblaj.

„Vora Goes" (53-jara sinjoro). — Pristudante vian manskribon, la grafologo kiel unuan aferon rimarkas vian neforigeblan emon esti fiera. Via laboro okazas malrapide, sed kontraŭ tio la bonaĵo estas, ke vi bone plenumas la detalojn en la laboro. Vi havas grandan emon al aŭtoritato kaj refoje oni aŭdas vin diri: „Atentu, mi estas Vora Goes!" Neniam oni kontraŭdiras, ke vi bone ĝuas la vivon (Honni soit qui mal y pense!). Vi estas iom prokrastema; mi kvazaŭ aŭdas vin diri kelkfoje: „estas sufiĉe por hodiaŭ, venos pluaj taĝoj." Por la mallonga analizo estas necese aldoni ankoraŭ, ke vi estas iomete nekorekta. Tio ne rilatas vian vestaĵon, ĉar el tiu vidpunkto vi estas vera sinjoro.

„Rapido" (40-jara sinjorino). — Sendube oni povas nomi vin simpatia persono, sed por diri tion estas absolute necese koni vin profunde. Ne ĉiu homo tuj komprenas vin. La ĉefa kaŭzo de tio estas via nerveco, kiu faras vin indiferenta, iomete monotona en la okuloj de la aliaj homoj. Tiu, kiu vivas kun vi kaj scias en la ĝusta maniero trakti vin, ekkonas vian internan staton. Vi estas iomete malfacila, sed la vivo multon kunportis kaj ne ĉiu homo estas sufiĉe forta por toleri tion. Kiel grafologo mi volus admoni vian edzon (se vi havas ankoraŭ), ke li estu tre prudenta kun vi. Kaj al vi mem mi volas diri: estu trankvila, tenu kuraĝon!

„Muso" (40-jara-virino). — Persono, al kiu oni ne donu tro rapide sian tutan konfidon. Vera simpleco absolute ne estas trovebla en tiu malfacila, fantazia animo. Ŝi emas regi, ludi la rolon de aŭtoritato, sed tiam al ŝi mankas la vera takto. Kvankam ŝi estas virino, la grafologo ne trovas ĉe ŝi la virinan, delikatan amon; nur iomete, akompanatan de pasio. Ŝi havas sufiĉe klaran spiriton, sed ŝi ne estas vere sagaca. Ŝi estas ruza kaj tio postulas singardon ĉe la ĉirkaŭstarantoj. Jen sufiĉe por konciza analizo pri tia karaktero.

„Alger" (27-jara sinjoro). — Plezuriga persono, kun kiu estas bone amikiĝi, se oni estas tia, kia li estas, nome korekta kaj preciza. Klara spirito, kiu prizorgas precize la laboron, ankaŭ la detalojn. Estas certe, ke li komprenos vin. Li estas bonkora, jes. Sed ne trompu lin, ĉar tiam li estos furioza kaj ĵuros venĝon. Sen troigo, la grafologo kuraĝas prezenti lin al ĉiuj legantoj kaj legantinoj kiel gracian junulon. Sed atentu! Li estas samtempe ankaŭ sagaca, eĉ iomete ruza. Kiam li parolas, li estas kapabla ĉarmigi sian aŭdantaron, sed se necese, li silentas kiel tombo.

ATENTIGO: Se vi deziras ricevi detalan kaj kompletan analizon, bonvolu skribi novan leteron, sed tiu letero ne estu kopiaĵo el iu libro aŭ gazeto, sed via originala skribaĵo. La ceteraj kondiĉoj estas legeblaj en la 27-a numero de La Praktiko sur la 12-a paĝo.

LIBRO-LOTERIO de LA PRAKTIKO

2000 premioj. — Per unu loto oni povas gajni du premiojn. — Unu loto kostas nur 0.10 guld. — 11 lotoj kostas nur 1.— guld. — Oni povas pagi per poŝtmarkoj. (vidu la valortabelon sur la 2-a paĝo). — La detalaj informoj aperis en la Januara numero.

LA LISTO DE LA PREMIOJ (DAŬRIGO):

91 **Societa Ludaro.** Societaj ludoj por kunvenoj kaj ekskursoj.
92 **Alegorioj el la Naturo.** De M. Gatty. Tradukita el la angla lingvo.
93 **Kurioza okazaĵo.** Triakta komedio de C. Goldoni. Tradukita el la itala lingvo.
94 **Grekaj papirusoj.** De D-ro J. Penndorf.
95 **Tri rakontoj.** De Aleksandro Dumas. Tradukis E. Deligny.
96 **Analiza historio de la Esperanto-movado.** De E. Drezen.
97 **La Sankta Biblio.**
98 **Eŭgeno Onegin.** Romano en versoj, de A. S. Puŝkin.
99 **Rememoroj de Esperantisto.** Verkis A. D. Atanasov.
100 **La Nova Testamento.**
101 **La tragedio de la homo.** Ĉefverko de la hungara literaturo. Tradukis D-ro K. Kalocsay.
102 **Verdkata Testamento.** Gajaj poemoj de Raymond Schwartz.
103 **Evoluo de Telefonio.** De inĝ. J. R. G. Isbrücker.
104 **Hura!** Romano originale verkita de Julio Baghy.
105 **Roseroj.** Poemlibro de Adalberto Smit.
106 **Bareluloj kaj Fadenuloj.** Moderna fabelo de A. Maurois. Kun multaj ilustraĵoj.
107 **La Venecia Komercisto.** Dramo de Shakespeare. El la angla lingvo tradukis Wackrill.
108 **Revolucio en la lingvoscienco.** De A. P. Andreev.

Daŭrigota

GARDATAJ LOTOJ (daŭrigo). — Amor 5182—5203, Birzins 5116—5126, Breuker 5078—5088, v. Doorne 5204—5214, de Jong 1995—1996, Kullison 4310, Nhan 1869, 4500, Petrov 1994, Praks 4498, Smeehuyzen 5315—5325, Szyma 4413—4423, Ŝtamers 5012—5022, Wilquin 5105—5115.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — Petu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

VOJAĜONTOJ al Danujo en la monatoj Julio—Aŭgusto povos havi senpagan modestan restadon dum kelkaj tagnoktoj en privataj danaj hejmoj en Jutlando. Skribu unue al s-ro Harald Grönborg en Hasselager (Danujo).

KORESPONDO. — Finintoj de Esp-kurso deziras interŝanĝi belajn kaj artajn PI (bfl.) kun ĉiu klera simpatianto de belo kaj arto. Nepra respondo. Adreso: Esperantista Orkestro (la sola en la tuta mondo!), Tapineria 5—3, Valencia (Hispanujo).

PROPONO. — Holanda instruistino volonte volas korespondi kaj poste pasigi sian someran libertempon kiel paganta gasto ĉe eksterlandaj samideanoj. Adreso: F-ino A. Stapelkamp, Pol 639.I. en Aalten (Nederlando).

KORESPONDO. — Viglaj geesperantistoj en Sud-Germanujo atendas bildkartojn kaj leterojn el la tuta mondo ĝis fino de Majo. Certa respondo. Adresu al: S-ino E. Feigenbutz, instruistino, Jollystrasse 57, Karlsruhe (Germanujo).

GAJA JUNULO, 16-jara gimnaziano, dez. interŝanĝi leterojn kaj il. poŝtkartojn kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, precipe el Hungarujo, Francujo kaj Italujo. Certe respondos. Adreso: Lars-Eric Siltberg, Kung Magnus väg., Visby (Svedujo).

INĜENIEROJ deziras korespondi pri **Diesel-motoroj, Diesel-veturmovado, acetilena kaj elektra lutado,** kun samfakuloj. Skribu al: E. G., 7 rue du Clos, en Hautmont (Nord), Francujo.

LEGINDA LIBRO: Princo Serebrjanij. Historia romano verkita de grafo A. Tolstoj. El la rusa lingvo majstre tradukis s-ino M. Ŝidlovskaja. 284 paĝoj. Prezo kun sendkosto: 2.— ned. guld. Aĉetebla ĉe La Praktiko.

GEGAJULOJ en la klubo „La Stelo" aranĝos letervesperon la 24-an de Aprilo 1934. Bonvolu sendi skribaĵojn tuj. Respondo garantiata. Adreso: Eskilstuna Esperanto-Klubo „La Stelo" en Eskilstuna (Svedujo).

BONHUMORO, de Paul Nyssens, estas kuraĝiga kaj vigliganta verko. Agrable kaj profite vi ĝin legos. Prezo kun sendkosto: 1.25 ned. guld. Aĉetebla ĉe La Praktiko.

VIZITU POLUJON! — Se vi volas viziti Polujon, turnu vin al la Pola Turing-Klubo (str. Kredytowa 5, Varŝavo), kiu senprokraste sendos al vi detalajn informojn kaj prizorgos por vi malkaran vojaĝon kaj restadon en Polujo.

600 FLORBULBOJ por 4.50 ned. guld.

sen ia kosto por transporto kaj enpakado, per remburso aŭ post pago sur poŝtkonto 100122:

200 Gladiolus en 10 specoj, 100 Montbretia en 5 specoj, 100 Anemonoj, 100 Ranunculus, 80 Oxalis, 10 Lilium kaj 10 Dahlia.

Je peto ni afrankite sendas nian Esperantlingvan prezliston.

C. A. JUFFERMANS
en Hillegom (Nederlando)



Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —.45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. — *La redakcio.*

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon gluu sur la bildan flankon
s-ino = sinjorino	L = letero	
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	
dez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

MEMORIGO. — S-ro Adr. Verdegaal en Sassenheim (Nederlando) atendas respondon de: s-ro A. Slavov en Ruse, s-ro L. Kriibi en Antsla kaj s-ro I. V. Kulikov en Pokrovo.

BULGARUJO

Kilifarevo (Tirnovsko). — F-ino Kina Dermenĝieva, frizistino. — L, PI, k.ĉ.l.

Sviŝtov. — S-ro Kosju At. Dankov, lernanto, strato Vojniška 22. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Sviŝtov. — S-ro Kalju M. Kalev, lernanto en la ŝtata komerca gimnazio. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Dolni Lhota (apud Blansko). — S-ro František Jakubec, librotenisto. — L, PI kun Francujo, Hispanujo kaj Italujo pri popolaj kantoj. Kolektas popolkantojn en franca, hispana kaj itala lingvoj, kun melodioj, interŝanĝas Esp-igitajn ĉeĥoslovakajn popolkantojn kun melodioj. Certe respondos.

Nemecka Lutyne (apud Bohumin). — S-ro Karel Hečko, 20-jara oficisto. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Praha II. — F-ino Julie Šupichová, p. faka instruistino, Mala Štepanska 6/II. — Sciigas al multnombraj petintoj pri korespondado, ke ŝi **NE deziras korespondadi** per L, PK aŭ PI.

DANUJO

Fredericia. — S-ro Richard Hermann, Kongensgade 56. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Fredericia. — Multaj gelernintoj el la Cseh-metoda kurso de f-ino M. Saxl dez. kor. k.ĉ.l. Adreso: S-ro Sören K. Nielsen, Sundegade 3.

Haderslev. — Anoj de la Esp-Klubo dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Skribu unue al s-ro P. Frey, Clausensvej 26.

Hörning. — S-ro Rasmus Christensen, muelisto, Edslev Mölle. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Middelfart. — S-ro Gustav Bang, Algade 4. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — S-ro Paul Christensen, Algade 44. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — S-ro Ejgil Henriksen, Strandvej 46. K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — S-ro Carlo Jensen, Skovbrynet. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — S-ro Harald C. Jensen, Behrendtsvej 3. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — S-ro Jörgen Jensen, maristo, Knorregade 18. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — S-ro S. E. Jensen, Banegaardsvej 2. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — S-ro PeterNielsen, bank-asistanto, Hessgade 29. I. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — F-ino Runa Olsen, 23-jara kontoristino, Tvergade 2. A. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Middelfart. — S-ro Johannes Petersen, 22-jara fraŭlo, Nrd. Hougvej 91. — L k.ĉ.l., p.ĉ.t., ne pri politiko. Kun gehumoruloj kaj optimistoj. Certe respondos.

Middelfart. — S-ro Ove E. Rasmussen, Algade 77. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

ESTONIO

Löve. — S-ro Aksel Illisson, gimnaziano, Pori veski. — PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Interŝ. PM. Certe respondos.

Valga. — S-ro Ferdinando Kullison, 39-jara fervoja elektromekanikisto, Vaksali p. 10-1. — PI (prefere pri stacidomoj) k.ĉ.l. Koresp. pri fervoja servo.

FRANCUJO

Auzat-sur-Allier (Puy-de-Dôme). — S-ro H. Joubert, 45-jara ŝuvendisto. — L, PK, PI, k.ĉ.l., (prefere ekstereŭropaj), p.ĉ.t., interŝ. ideojn pri vivmaniero. Certe respondos.

Belfort (Territoire). — Belforta Esperantista Grupo, Maison du Peuple. — La geanoj de ĉi tiu sendependa grupo dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Champigny (Seine). — S-ro Raymond Lefebvre, 36-jara mekanikisto, 10 rue Jean Villemin. — L, kun ekstereŭropaj landoj, p.ĉ.t.

Chateaurenard de Provence. — S-ro Denis Faraud, Avenue d'Avignon. — PM, PI kun Rusujo, Latvujo, Litovio, Svedujo kaj ekstereŭropaj landoj.

Francheville (Rhône). — S-ro Fougerousse, 21-jara instruisto. — Dez. kor. kun geinstruistoj ĉ.l. Certe respondos.

Nice. — S-ro L. van der Linde, 50-jara, Chateau des Baumettes. — PK, PI, kun Svedujo, Danujo, Norvegujo kaj Nederlando. Certe respondos.

Raismes (Nord). — S-ro Jean Saunier, 19-jara, 2 Boulevard de la Gare. — L, PK, PI, k.ĉ.l., kun junaj f-inoj. Certe respondos.

Vellexon (Haute Saône). — S-ro Pierre Tronet, 39-jara. — L, PI, kun Rusujo, Japanujo kaj Usono, p.ĉ.t., precipe pri perpendola serĉarto.

Villeurbanne (Rhône). — S-ino Berrod, instruistino, Grupo J. Guesde. — Dez. kor. kun ĉiulandaj gekolegoj pri pacaj temoj. Nepre respondos.

GERMANUJO

Harburg-Wilhelmsburg I. — S-ro Friedrich Gerns, Lerchenweg 14. — L, PI bfl. K.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

HISPANUJO

Terrassa (Barcelona). — Laborista Esperantista Grupo, Sant Pere 56 p. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Respondo garantiata.

HUNGARUJO

Debrecen. — S-ro F. Ludoviko Szabó, 39-jara maŝinkompostisto (presisto), Sarok u. 12. — L kun presistoj kaj kompostistoj ĉ.l., p.ĉ.t. PI bfl. Certe respondos.

Moson. — S-ro Ludoviko Weisz, ĉefoficisto de MÁV (= Hungara Ŝtata Fervojaro). — PM k.ĉ.l., pecon por peco aŭ laŭ katalogo kun serioza filatelisto. Petas proponon.

IRLANDO

Belfast. — S-ro H. H. Stewart, Delegito de UEA, 64 Beverley Street. — Interŝ. anglalingvajn ilustr. gazetojn kontraŭ Esp-aj propagandaj presaĵoj en ĉiuj lingvoj.

ITALUJO

Torino 128. — S-ro Ronald Giorgis, 24-jara oficisto, 76 Via Genova. — L, precipe PI p.ĉ.t. Scias angle kaj france. Interŝ. PM. Certe respondos.

LATVUJO

Riga. — S-ino Alvine Birzina, Poŝtkesto 100. — L kun ekstereŭropaj landoj, p.ĉ.t., precipe pri popolmoroj. Nur kun virinoj. Certe respondos.

LITOVUJO.

Birzai. — S-ro P. Samulionis, studento de teologio-filozofio, R. Kat. Klebonija. L, PK, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Interŝ. PM, PI bfl. kaj fotojn. Precipe kun pastroj, filatelistoj kaj neeŭropanoj. Absolute certe respondos.

NEDERLANDO

Aalsmeer. — S-ro J. Schouten, 18-jara florkulturisto, Uiterweg 235. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Aalten. — F-ino A. Stapelkamp, Pol 639 I. — Dez. interŝ. ilustr. gazetojn kaj PI (ne bfl.).

Amersfoort. — S-ro J. de Way, 38-jara kavaleria serĝento, Sint-Radboudstraat 4. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Interŝ. PM kaj fotojn. Certe respondos.

Amsterdam-Noord. — S-ro Leo Kosmis, 20-jara metaltornisto, Floraweg 33. — L, PI bfl. kun Eŭropo, Sovjetunio kaj Usono, p.ĉ.t., nur kun gelaboristoj. Certe respondos.

Balkbrug. — S-ro D. Wassenaar, flegisto, I. 327. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Bellingwolde. — F-ino Antie Tuitjer, 22-jara. — Dez. kor. kun gesamideanoj.

Breda. — S-ro C. G. de Steur, 22-jara poŝtoficisto, Nieuwe Huizen 45. — K.ĉ.l., precipe kun Hungarujo.

De Krim (Ov.). — S-ino H. Struik. — PI k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Delft. — S-ro W. K. Goedheer, 43-jara instruisto, Corn. Trompstraat 57. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Den Haag. — S-ro J. C. Kuyper, poŝtoficisto, Loosduinschekade 356. — K.ĉ.l.

Den Haag. — S-ro J. Visse, poŝtisto, Potgieterstraat 41. — L, PK, PI (pri popolkostumoj), k.ĉ.l.

Den Haag. — F-ino Elly Vreedenburgh, 23-jara kemia inĝeniero, Galileïstraat 144. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Den Haag. — S-ro F. Weeke, 42-jara instruisto de gimnastiko, Meezenlaan 41. — L, kun Japanujo, Ĉinujo, Afriko, Egiptujo, Aŭstralio. Certe respondos.

Den Helder. — S-ro A. F. Taffijn, Dahliastraat 60. — Koresp. k.ĉ.l., interŝ. PI.

Eersel (N.Br.). — S-ro Frans van Woerkom, 24-jara manufaktur-komercisto, fraŭlo, Markt 149. — K.ĉ.l., p.ĉ.t., komence per PI. Certe respondos.

Eersel-Stokkelen (N.Br.). — S-ro Adr. Scheepens, 27-jara fraŭlo. —K.ĉ.l., p.ĉ.t., ankaŭ pri apologio, sociologio, ekonomio. Preferas ĉiumonatan korespondadon. Certe respondos.

Enschede. — S-ro M. v. d. Molen, 29-jara laboristo, Hooge Bothofstraat 138 A. — PI k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.
Kerkrade. — F-ino Maria Wijnen, 20-jara, Marktstraat 17. — L, PK, PI, k.ĉ.l. Certe respondos.
Leiden. — F-ino E. Bernard, Vreewijkstraat 27. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
Leiden. — F-ino M. J. M. Verhoog, 26-jara sekretariino, Hooge Rijndijk 193. — L, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.
Maastricht. — S-ro J. J. C. Wijnands, havenkontrolisto, 22-jara fraŭlo, Bosscherweg 103. — Dez. kor. kun fraŭlinoj. K.ĉ.l.
Roosendaal (N.Br.). — S-ro W. A. de Bruyn, supera instruisto, Voorstraat 104. — L k.ĉ.l. pri temoj, kiuj rilatas al familia vivo kaj geedzeco.
Rotterdam. — F-ino J. Maas kudristino kaj s-ro L. Maas kontoristo, Goudsche rijweg 169. — L, PI, k.ĉ.l., pri sporto, fotografado, religio k.t.p.
Voorburg (Zuid-Holland). — S-ro H. W. Wintermans, 20-jara kompostisto, Loolaan 45. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

NORVEGUJO

Tromsö. — 30 kursanoj dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Adreso: s-ro O. T. Nicolaisen, Cseh-kursa instruanto, Poŝtrestante.
Trondheim. — Cseh-metodaj kursanoj, framistoj, dez. kor. Gvidanto: s-ro G. B. Eide, Kongens gt. 35. I.

POLUJO

Nikiszowiec. — S-ro Jozefo Cieply, Dolna 3. — K.ĉ.l.
Warszawa. — F-ino Erna Finkelkraut, instruistino, strato Polna 66.m.1. — Dez. kor. kun partoprenontoj en la kongreso en Stokholmo.

RUMANUJO

Gherla (Transilvanio). — F-ino Izabella Hossu. — PK, PI, k.ĉ.l. Certe respondos.

SVEDUJO

Borås. — S-ro Erik Bergh, kontoristo, Vedensgatan 42. — PI, k.ĉ.l. Prefere kun pacifistoj.
Borås. — S-ro J. W. Friberg, komercisto, Parkgatan 52. — PI, k.ĉ.l.
Borås. — S-ro Anders Hallgren, 30-jara viandisto, Alideberg 8. — K.ĉ.l.
Borås. — S-ro Allan Hedman, 33-jara inĝeniero, Bengtsgatan 12. — K.ĉ.l.
Borås. — S-ro Sven Torsten Larsson, 25-jara frizisto, Stengärdsgatan 31. — L, k.ĉ.l.
Gällivare. — S-ro Gunnar Moosberg, 26-jara komizo. — Dez. kor. kun Sud-Ameriko, Japanujo, Italujo kaj Islando, p.ĉ.t. Ne kun filatelistoj.
Göteborg. — S-ro Ernst Holmberg, 45-jara konstru-laboristo, Johannes Kyrkogata 15. — Dez. kor.
Göteborg. — S-ro Gunnar Lindgren, 40-jara laboristo en globlagro-fabriko, Holländareplatsen 7, 1 i. 3 v. — Dez. kor.
Göteborg. — S-ro Karlo Wångberg, 26-jara pentristo, Karl Gustavgatan 59. — Dez. kor.
Hyllinge Gr. — Tri korespondemaj fraŭloj dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. La respondo estas certa. Adreso: s-ro Thure Wendt.
Kumla. — S-roj Tage Nordin (19-jara), Sven Persson (20-jara) kaj Nils Persson (25-jara), adreso de ĉiu: Box 729. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Ljugarn. — S-ro Sven Samelius, 18-jara. — PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Ne kun filatelistoj.
Västerås. — S-ro Gösta Tallgren, 20-jara fraŭlo, elektristo kaj skolta kapitano, Norra Ringvägen 45. — Dez. kor. k.ĉ.l., kun geskoltoj.

USONO

Los Angeles (Kalifornio). — S-ro Harry B. Blee, 2307 Berkeley Ave.
Los Angeles (Kalifornio). — F-ino Jewell Fouch, 2604 S. Figueroa Street.
Los Angeles (Kalifornio). — S-ino Ellen M. Glassen, 1322 West 22nd Street.
Los Angeles (Kalifornio). — S-ro E. F. Jackson, 1126 Formosa Ave.
Los Angeles (Kalifornio). — S-ino Marie Louise Kilbride, 641 S. Berendo.
Los Angeles (Kalifornio). — Kursanoj dez. kor. k.ĉ.l. Adresu al: s-ino M. L. Kilbride, 641 S. Berendo.
Los Nietos (Kalifornio). — S-ro Earl Seall, Box 62.
Pasadena (Kalifornio). — F-ino Myra Vilma Van Hayden, 1335 Linda Vista Avenue.

Redaktataj en bona zamenhofa lingvo kaj plenaj de interesaj verkaĵoj estas la gazetoj eldonataj de **Sennacieca Asocio Tutmonda:**

Sennaciulo - Sennacieca Revuo - La Lernanto

Petu specimenon! Petu ankaŭ nian novan librokatalogon!

Petu prospekton pri la 2-a eldono de la **PLENA VORTARO DE ESPERANTO.** Adreso:

S.A.T., 23 rue Boyer, Paris-20.

LIBROJ

aĉeteblaj ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO, Riouwstraat 172, DEN HAAG (Nederlando).

La Kurso de Andreo Cseh. La stenografita kaj poste mimeografita teksto de unu tuta kurso de Andreo Cseh, farita en Stokholmo en 1928. La kurso kaj enkonduko kun klarigoj pri la metodo kaj konsiloj al la instruantoj, krom tio aldonoj, entute 158 folioj, en eleganta kartona ujo, 7.75 G.
Konversacia Literaturo, 8 numeroj. Unu numero ..... —.10 „
Kartona ujo por la Konversacia Literaturo ..... —.10 „
Konversacia Vortaro, ŝercaj difinoj de la kursaj vortoj ..... —.15 „
Konversacia Gazeto. Unu numero kun plena informaro pri Esp., por enkonduki la novajn Esp-istojn en la movadon —.15 „
La enigmoj. Libreto plena de enigmoj. La solvantoj partoprenas en konkurso kun 1000 premioj ..... —.10 „

Fruictier-Grenkamp: **Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado** ... 2.50 „
Bastien: **Naŭlingva Etimologia Vortaro de Esp** ..... 2.50 „
Thora Goldschmidt: **Bildotabuloj** ..... 1.90 G., bind. 2.20 „
Isbrücker: **Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado.** Grava libro por preparo al ekzamenoj ..... —.75 „
Privat: **Historio de Esperanto 1-a parto** ..... 1.35 „
„ „ „ „ 2-a „ ..... 3.25 „
Privat: **Vivo de Zamenhof,** 1.35 G, bindita ..... 1.90 „
Privat: **Esprimo de sentoj en Esperanto** ..... —.75 „
Zamenhof: **Originala Verkaro.** Lukse bindita ..... 6.— „
Drezen: **Historio de la Mondlingvo.** 240 paĝoj. Entenas la plenan historion de la mondlingva ideo kaj konigas la div. artefaritajn lingvojn. Kun multaj bildoj. Simple bindita 2.75 G, tole bindita ..... 3.30 „
Drezen: **Analiza historio de la Esp-movado** ..... —.75 „
Drezen: **Skizoj pri la teorio de Esp.** Lingvosciencaj studoj ... —.50 „
Mair: **La prepozicioj kaj la akuzativo en Esp.** ..... —.60 „

Baghy: **Hura!** Originala romano, 3.70 G, bindita ..... 4.20 „
„ **Preter la Vivo.** Poemoj, 1.— G, bindita ..... 1.50 „
Madách: **La Tragedio de la Homo.** Ĉefverko de la hungara literaturo, en majstra traduko de K. Kalocsay ..... 2.— „
Sadoveanu: **Nobela Peko.** Trad. T. Morariu ..... —.50 „
Firu & Pragano: **Rumana Bonhumoro,** 1.— G, bindita ..... 1.50 „
Gysbrecht v. Aemstel. Trad. J. R. G. Isbrücker, 1.95 G., bind. 2.50 „
Majuraniĉ: **La morto de Smail-Aga Ĉengijiĉ.** Kroata eposo. Lukse bindita, kun artaj bildoj ..... 1.50 „
Puŝkin: **Eŭgeno Onegin.** Trad. el rusa, bind. ..... 1.85 „
Floretoj. Rakontoj por infanoj. Kun multaj koloraj bildoj ..... —.70 „
Bareluloj kaj Fadenuloj. De A. Maurois. Kun multaj bildoj ... 1.25 „
Princo Serebrjanij. Historia romano de grafo A. Tolstoj ... 2.— „
Jaĉjo Holm kaj liaj amikoj. Lukse bindita ..... 2.50 „
La vojaĝoj de Gulivero al Liliputlando. Kun bildoj ..... 1.25 „
Nyssens: **Bonhumoro.** Moralfilozofia eduka libro ..... 1.25 „
C. Goldoni: **Kurioza okazaĵo.** Komedio. Trad. el itala ..... —.75 „
A. D. Atanasov: **Rememoroj de Esperantisto** ..... —.50 „
A. D. Atanasov: **El la intima libro de la Verdurbaj Esperantistoj** ..... —.30 „
La Biblio (eld. de Brita Bibl. Soc.) en diversaj prezoj.
La Nova Testamento (Br. Bibl. Soc.) en diversaj prezoj.
Teksto el la Biblio en 630 diversaj lingvoj ..... —.50 „
Papini: **Historio de Kristo** ..... bind. 6.25 „
Wiseman: **Fabiola.** Rakonto el la katakomboj ..... 3.50 „
Katolika preĝlibreto ..... —.30 „
Praktika gvido en la korespondado. Lukse bindita ..... 2.50 „
Societa Ludaro. Ludoj por kunveno kaj ekskurso ..... —.35 „

Dirksen: **Methodisch Leerboek v. Esp.** ..... —.65 „
„ **Vertaalde Oefeningen** ..... —.35 „
Heilker: **Esp. Leerboek** (voor dipl. B.) ..... 2.25 „
Schidlof: **Vortaro Esp.-Ned. kaj Ned.-Esp.** ..... 1.50 „
van Straaten: **Granda vortaro Esp.-Ned. kaj Ned.-Esp.** ..... 4.90 „
Vademecum voor den Nederl. Esperantist ..... —.55 „
Esperanta flageto por biciklo ..... —.35 „
Gramofondisko kun Esp-lingvaj kantoj el la operoj „Carmen" kaj „Rigoletto" ..... 2.50 „

Krom tio ĉiuj aliaj libroj.

Afrankita sendo!

Kiel sendi la monon?

Rigardu sur la 2-a paĝo!

PENTEKOSTA LIBERTEMPO EN ARNHEM!



La Esperanto-Domo en la belega parko.

La Esperanto-Domo

kore invitas ĉiujn gesamideanojn, pasigi la pentekostan libertempon en agrabla samideana rondo.

Estos **riĉa amuza programo** kun ekskursoj, muziko, kanto, danco, kaj multa gaja ekzercado de nia kara lingvo.

En la Esperanto-Domo **la prezoj estas malaltigitaj kaj la mastrumado estas reorganizita** sub la estrado de niaj fervoraj kaj ŝatataj gesamideanoj ges-roj Moreau.

Prezoj: Ĉambro kun matenmanĝo: 2.50, 2.25 aŭ 2.— guld.; pensiono (ĉambro kaj la tri manĝoj): 3.50, 3.— kaj 2.50 guld. laŭ la rango de la ĉambroj (unulita, 2-4-lita, 5- kaj pli-lita). Apartaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj laŭ tarifo. Servmono 10 %.

Adreso: ESPERANTO-DOMO, Arnhem.

(Schaapsdrift 187. Telefono 26060. Atingebla per tramlinio 1, haltejo Huygenslaan.)

INTERNACIA KURSO POR KOMENCANTOJ

Arnhem, 20-31 Julio 1934.

La kurso, gvidota de *Andreo Cseh*, daŭros dum 10 labortagoj, kun 4 instruhoroj ĉiutage. La lecionoj okazos matene de la 9-a horo ĝis la 1-a horo. En la posttagmezoj estos plezuraj kaj studaj **ekskursoj.** En la vesperoj **amuzaj kaj seriozaj kunvenoj** kun prelegoj kaj paroladoj.

En la kurso partopreni povas ĉiu persono, kiu ankoraŭ ne scias Esperanton, kaj ankaŭ malnovaj Esperantistoj, kiuj deziras studi la kursmetodon.

Kotizo por la kurso kaj ĉiuj aranĝoj alligitaj: 10.— ned. guld. Plua persono el la sama familio pagas nur 7.50 guld.

Grave! Oni bonvolu diskonigi la suprajn informojn en la *nacia gazetaro*, precipe en la *instruistaj gazetoj* kaj fervore varbi kursanojn, por ke la kurso estu kiel eble plej internacia kaj ke edukiĝu multaj novaj instruistoj de Esperanto. (Ni antaŭdankas pro afable alsendotaj gazetnumeroj kun la koncerna artikolo.)

Bonvolu legi la informojn malsupre.

SEMINARIO POR CSEH-METODAJ INSTRUISTOJ

Arnhem, 20-31 Julio 1934.

Partopreni povas ĉiu persono, kiu estas aŭ deziras esti gvidanto de Cseh-metodaj kursoj. La programo de la Seminario estas:

A) Prelegoj de Andreo Cseh pri sia kurs-sistemo, pri la principoj de la metodo kaj pri la tekniko de la aplikado. — B) Konsiloj al instruantoj. — C) Praktikaj prov-ekzemploj. — Ĉ) Raportado de diverslandaj instruistoj pri siaj spertoj. — D) Diskutado. — E) Provlecionoj.

La prelegoj de la Seminario okazos en la posttagmezoj kaj vesperoj, alterne kun ekskursoj.

Kotizo por la Seminario kaj ĉiuj alligitaj aranĝoj: 5.— guld.

Komuna kotizo por la seminario kaj komenca kurso: nur 12.50 guld.

Bonvolu legi la informojn malsupre.

INTERNACIA PERFEKTIGA KURSO

Arnhem, 6-11 Aŭgusto 1934.

La kurson gvidos *Andreo Cseh* laŭ speciala sistemo kaj kun aplikado de helpiloj, disponigotaj al la kursanoj.

La lecionoj okazos ĉiutage en 4 horoj (matene de la 9-a ĝis la 1-a). En la vesperoj estos **instruaj prelegoj** (pri la historio kaj organizo de la Esp-movado, pri la Esp-a literaturo k.t.p.) kaj **amuzaj aranĝoj.**

La kurso okazos en internacia kunestado kaj tio ebligos la plej efikan praktikan ekzercadon de la lingvo. Por tio servas speciale la posttagmezaj komunaj **ekskursoj.**

Partopreno en ĉi tiu kurso estas tre rekomendata al personoj, kiuj preparas sin al ekzamenoj kaj al gvidantoj de daŭrigaj kursoj. Ili povos ĉerpi utilajn spertojn kaj konsilojn.

Kotizo por ĉiuj lecionoj, prelegoj kaj amuzaj aranĝoj. 6.— guld.

Bonvolu legi la informojn malsupre.

INTERNACIA KURSO POR GEJUNULOJ

Arnhem, 16-25 Aŭgusto 1934.

Ĉi tiu **komenca kurso** estas aranĝata kun speciale malaltaj prezoj por gejunuloj (ĝis la aĝo de 30 jaroj), precipe gelernantoj kaj gestudentoj.

La kurson gvidos Andreo Cseh. La lecionoj okazos matene. En la posttagmezoj kaj vesperoj estos **ekskursoj, ludoj kaj amuzaj aranĝoj.**

Kotizo por la kurso kaj ĉiuj aranĝoj: 5.— guld. Por tiuj, kiuj loĝas en la Esperanto-Domo, nur 3.— guld.

Pensionprezo en la Esperanto-Domo (loĝo kaj la tri manĝoj), speciale malaltigita por ĉi tiu kurso: nur 1.90 guld. Servmono 10 %.

INFORMOJ:

Ĉiuj kursoj, prelegoj kaj amuzaj aranĝoj okazos en la Esperanto-Domo.

La kursanoj povos loĝi en la **hotelo de la Esperanto-Domo,** kie *plena pensiono* (komforta ĉambro kun fluanta akvo kaj la tri manĝoj) kostas por unu tago kaj unu persono: en unu-lita ĉambro 3.50, en du- ĝis kvarlita ĉambro 3.—, en kvin- ĝis dek-lita ĉambro 2.50 guldenojn. (La litoj estas apartigitaj per ŝirmiloj). Servmono: 10 %.

Aliĝante oni sendu la kotizon kaj mendu la hotelon, pagante la pensionprezon por almenaŭ 2 tagoj.

Adreso por aliĝoj kaj informpetoj: *Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Rioumstraat 172, DEN HAAG, Nederlando. (Telefono: 556677. Poŝtĉekkonto: Den Haag 162626.)*

Estas konsilinde **baldaŭ aliĝi** pro la limigita nombro de la lokoj.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 5 (29)

★

Majo
1934

La Esperanto-Domo

en Arnhem sendas printempan saluton al la tutmonda Esperantistaro! En la mezo de la belega parko ĝi kore atendas ĉiun, kiu volas perfektiĝi en la mondlingvo kaj interamikiĝi kun gesamideanoj.

Multaj Esperantistoj revas pri la „Esperanto-lando", en kiu nia lingvo estos konstante parolata en la ĉiutaga vivo. Tiu bela revo, kvankam inter malvastaj limoj, realiĝis! En Arnhem per la Esperanto-Domo kreiĝis kvazaŭ „Esperanta insulo", kie Esperanto estas ekskluzive uzata kiel oficiala kaj sola lingvo. Ĉiu loĝanto de tiu domo parolas nur Esperante, en la hotelo kaj restoracio la manĝokartoj kaj ĉiuj surskriboj estas nur Esperantlingvaj kaj eĉ la policisto, kiu en la parko gardas la ordon, parolas Esperante. Tial ĉiu gasto de la Esperanto-Domo sentas sin en nova lando, en peco de la estonta mondo.



Kaj tio estas laŭ la intenco de la fondintoj: la urbestraro de Arnhem, kiu tiun belan grandan domon por la uzado disponigis, kaj de la Cseh-Instituto, kiu ĝin instalis kaj funkciigas.

Niaj novaj samideanoj post la fino de la elementa kurso ĉiam demandas: „Kaj nun kion ni faru? Kiel ni progresu kaj perfektiĝu en la nova lingvo? Montru al ni la vojon!"

Ekzistas multaj vojoj por la progresado: daŭriga kurso, korespondado, legado de libroj kaj gazetoj, vizitado de klubkunvenoj kaj kongresoj k.t.p. Sed la plej ideala maniero por la perfektiĝo estas: viziti la Esperanto-Domon kaj partopreni en ĝiaj aranĝoj.

La Esperanto-Domo estas dum la tuta jaro malfermita. Ĝia komforta moderna hotelo povas gastigi 50 personojn, kaj la diversaj aranĝoj (internaciaj kursoj, konferencoj, libertempaj kaj semajnfinaj kunvenoj k.t.p.) ebligas rapidan kaj efikan perfektiĝon en Esperanto.

Ĉiu Esperantisto almenaŭ unufoje en la vivo vizitu la Esperanto-Domon!

La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 2.50 nederl. guldenoj, por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Unu numero kostas -.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., ½ p. 45.-, ¼ p. 25.-, ⅛ p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita

GRAVA NOVAĴO!

La Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en kunlaboro kun la Direkcio de la Nederlanda Ŝtata Fervojaro organizas

Internacian Esperanto-Kurson por fervojistoj kaj tramistoj,

okazontan en la Esperanto-Domo en Arnhem dum la 19—29 Sept. 1934.

Detalaj informoj sekvos en la proksima numero de La Praktiko.

Ĵus aperis la nova eldono de la ŝatata kantareto:

„Esperanta kantokolekto"

de J. H. Vink

entenanta aron da tre ŝatataj Esperantistaj kantoj kun muziknotoj.

La libron ornamas kvin belaj tutpaĝaj bildoj.

Prezo: 0.25 ned.guld. Aĉetebla ĉe LA PRAKTIKO.

LA REZULTO DE LA KONKURSOJ

71-a konkurso. En la januara numero de La Praktiko ni publikigis la rezulton de ĉi tiu konkurso, kun la nomoj de la unuaj kvar premiitoj. Pri la aljuĝo de la ceteraj du premioj ni petis la legantaron de La Praktiko voĉdoni. Ĝis la fiksita templimo alvenis voĉdoniloj de 19 personoj. En la voĉdonado la plej multajn voĉojn (po 4 voĉojn) ricevis la solvoj publikigitaj sub n-roj 9 (ensendinto: s-ro **Ch. L. Waldkötter** en Leiden, Nederlando) kaj 41 (ensendis: s-ro **E. Pedersen** en Jyderup, Danujo), kaj sekve la nomitaj du solvintoj ricevis la premiojn. — Po 3 voĉojn ricevis la solvoj sub n-roj 3, 7, 17, 21. — Po 2 voĉojn ricevis la n-roj 5, 19, 28 kaj 33. — Po 1 voĉon ricevis la n-roj 2, 8, 13, 14, 15, 16, 25, 26, 27 kaj 32. — Ni dankas al la bonvolaj voĉdonintoj!

79-a konkurso. En ĉi tiu konkurso partoprenis 39 personoj. La ensenditajn solvojn ni transsendis al la aŭtoro de la konkurso: s-ro L. A. Ware, por ke li, kiel plej kompetenta persono, faru la juĝon. Post la ricevo de lia respondo ni publikigos la rezultaton.

80-a konkurso. Kvardek-unu diligentaj legantoj de La Praktiko solvis ĝuste la ŝak-enigmon de ĉi tiu konkurso. La solvo sonas jene: **„Iom post iom Esperantujo fariĝos edukejo de la estonta interfratigita homaro kaj en tio ĉi konsistos la plej gravaj meritoj de niaj kongresoj."** — La ses premiojn per lotado ricevis la jenaj solvintoj: S-ro **A. Carlin** en Trollenäs (Svedujo). — S-ro **N. Davidov** en Perovo (Sovjetunio). — F-ino **A. B. Holness** en New-Barnet (Anglujo). — S-ro **T. Kuipers** en Bennekom (Nederlando). — S-ro **M. Rumpel** en Würzburg (Germanujo). — S-ro **J. Wakkee** en Hago.

LA VERDA STELETO.

(Kanto de la Esp-istaro en Ipswich.)

Laŭ ario „Austria".

En graflando orienta de Anglujo kuŝas lok'
Bela niĉo, jen Ipsviĉo, ĉefurbego de Suffolk.
Sur Orvellaj riverbordoj, Ipsviĉanoj amas vin,
Ne tre riĉa, sed feliĉa, de antikva origin'.

En la urbo jam citita brilas forte verda stel'
Vigla grupo (jes, sen dubo!) marŝas brave al la cel'
Ho! kvinpinta verdsteleto, gegrupanoj amas vin,
Nun rapide kaj senbride marŝu vi al glora fin'.

En la grupo ĵus nomita Esperanto floras, ĉar
Ĉiu ano kun spontano ĝin parolas sen erar'.
Esperanto Zamenhofa, samcelanoj amas vin,
Vi progresos ĝis sukcesos ĝustatempe la destin'.

F. D. M.

(Klarigo: La urbo Ipswich en Suffolk, Anglujo, staras sur la bordoj de la rivero Orwell.)

NOVAJ LIBROJ

B. Radziminski: EN DOMO KAJ EN LERNEJO. Malgranda lernolibro de Esp. por poloj. 36 paĝoj. Prezo: 0.75 zlot. Eldono de la aŭtoro en Chelmno (Pomeranio, Polujo). — Klara kaj praktike aranĝita lernolibreto, destinita precipe por la lerneja gejunularo.

W. G. Adams: PIRAMO KAJ TIZBEO. Burleska tragedio. 16 paĝoj. Prezo: 2 respondkuponoj. Eldonis: Presejo Esperantista, 312 University Bldg., Seattle (Wash., Usono). — La libreto entenas en lertaj Esperantaj versoj la historion, kiun ni konas el la „Sonĝo de Someromeza Nokto" de Shakespeare. Ĝi estis jam sukcese prezentata en la Esp-ista Societo de Seattle kaj sendube multaj Esp-istaj grupoj en la tuta mondo prezentos ĝin por amuzi sian anaron.

Hristo Botjov: VERSAĴOJ. Tradukis Ivan Dobrev. Kun antaŭparolo de Zahari Zahariev. 48 paĝoj. Prezo: 24 levoj. Eldonis: Centra Librejo „Esperanto" en Sofio (Bulgarujo). — Dek-ok lerte esperantigitaj poemoj de la granda poeto kaj heroo de la bulgara nacio.

Amandio Soares: O RIO MARAVILHOSO (= la admirinda Rio de Janeiro). 270 paĝoj. Prezo: 8 respondkuponoj. — Memorlibro pri la brazila ĉefurbo, redaktita okaze de la inaŭguro de la granda monumento de Kristo sur la monto Korkovado en Rio de Janeiro. La libro entenas ĉapitrojn en diversaj lingvoj, inter kiuj ankaŭ en Esperanto, kaj multajn ilustraĵojn. Ĝi estas aĉetebla ĉe: Brazila Ligo Esperantista, Marechal Floriano 212, Rio de Janeiro (Brazilo).

Stjepan Mišak: KURSA LERNOLIBRETO. — Aperis la dua volumeto de ĉi tiu lernolibreto por turkoj. Pri la unua volumeto ni jam informis en la 26-a numero de La Praktiko.

Joŝi H. Iŝiguro: SKIZO DE ESPERANTO. 126 paĝoj. Prezo: 1 sv. fr. Eldonejo: Shoobundo en Tokio. Ĉefdeponejo: Kokusaigo-Kenkjuŝo, Daita II-784, Setagaya, Tokio. —. Ĉi tiu nova japanlingva libro de nia fekunda japana samideano entenas la gramatikon de Esperanto kaj ĉapitrojn pri nia lingvo, pri lingvistoj kaj Esp., kaj pri la ĉefaj eŭropaj lingvoj kaj Esp-o. La libro, kiu aperis en la serio de la „Bibliotheca Philologica", estas la 20-a verko de la aŭtoro.

ATENTU!

Se vi volas sendi monon al La Praktiko, bonvolu observi la sekvantajn:

La monon oni povas sendi per *poŝtĉekkonto* (Wien A-156933, Praha 500362, Kopenhago 34941, Berlin 129527, Budapest 13201, Zagreb 41345, Riga 4870, Den Haag 162626, Warszawa 190203, Stockholm 74126, Bern III. 6761), *per poŝtmandato*, per *bankĉeko* aŭ per *papermono* en letero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj de la sube nomitaj landoj, kalkulante la valoron laŭ la suba tabelo:

1.— ned. guldeno valoras en:

Aŭstrio 3.70 ŝil., **Belgujo** 15 fr., **Britujo** 2 ŝil. 8 p., **Bulgarujo** 58 lev., **Ĉeĥoslovakujo** 17 kr., **Danujo** 3 kr., **Estonio** 2.60 kr., **Francujo** 10.35 fr., **Germanujo** 1.70 m., **Hispanujo** 5 pes., **Hungarujo** 3.30 p., **Italujo** 8 lir., **Jugoslavio** 30 din., **Latvujo** 2.20 l., **Norvegujo** 2.70 kr., **Polujo** 3.70 zl., **Rumanujo** 75 l., **Svedujo** 2.60 kr., **Svisujo** 2.10 fr.

Pro la freneza dancado de la mon-valoroj ĉi tiu tabelo validas nur ĝis la apero de nia sekvanta numero.

La sendo de poŝtmarkoj en letero okazas je la risko de la sendanto. Tial estas konsilinde uzi netravideblan koverton kaj ĉe pli granda sumo registrigi la leteron.

! ! APERIS ! !

J. C. kaj J. R. G. Isbrücker:

Esperanto - examenopgaven voor diploma A en B met vertalingen.

128 paĝoj. — Prezo: -,90 guld. afrankite.

Mendu ĉe la eldonejo:

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto

Den Haag, Riouwstraat 172. (Poŝtkonto 162626).

Ĉi tiu nova, 4-a eldono, entenas ankaŭ la plej lastajn ekzamentaskojn el 1934!

FARU LA KONTROLON!

La solvo de la 16-a tasko:

LA SANGOMAKULO.

Estis vintra nokto. Malvarmega vento furioze blovis tra la kamparo kovrita de neĝo. Nek homo, nek besto povis resti ekstere. Nur inter la dikaj muroj de la antikva kastelo regis agrabla varmo. La geservistoj de la maljuna grafo kolektiĝis ĉirkaŭ la forno en la kuirejo kaj ĉe la flagrantaj flamoj de la brulantaj lignoŝtipoj ili varmigadis siajn tremantajn membrojn. De tempo al tempo pro la ventego ekkrakis la fenestroj kaj la fera koko sur la pinto de la kastela turo grincis kaj knaris. El la koridoro aŭdiĝis susuraj sonoj, kvazaŭ spiritoj pasus tra ili.

La geservistoj pasigis la tempon per interparolo, por forpeli la timon kaj enuon. La pli junaj petolis unu kun la alia, la pli aĝaj kun ĝemspiro parolis pri la longe pasintaj belaj malnovaj tempoj.

En momento la plej maljuna servisto, Georgo, kiu dum pluraj jardekoj fidele servadis la grafan familion, levis sian manon kaj ekparolis:

— Ĉu vi memoras?

— Pri kio, onklo Georgo? — demandis la aliaj.

— Pri la terura okazintaĵo, kiu antaŭ dek-tri jaroj detruis la familion de nia mastro kaj tenis la tutan regionon en timego.

Nur kelkaj malpli junaj geservistoj balancis jese la kapon kaj aŭdigis peste profundan ĝemon. La pli junaj, scivolaj pri interesa historio, vigle demandis:

— Kio okazis Kiel estis? Onklo Georgo, rakontu, rakontu!

La maljuna Georgo forviŝis larmogutojn en la anguloj de la okuloj, faris per la mano silentigan movon kaj metinte sian pipon sur la plankon, tremvoĉe ekparolis:

— Ĝi estis terura okazaĵo. Ankaŭ nun frostotremo trakuras mian dorson, se mi rememoras pri la afero. Viroj, estu fortaj aŭdante miajn vortojn! Knabinoj, se vi ne havas sufiĉe fortan koron, prefere eliru!

Kelkaj servistinoj ektremis, sed neniu kuraĝis eliri, ĉar ekstere estis tro malvarme. La maljuna Georgo daŭrigis:

— Estis vintra vespero kun diable malbela vetero, tute simila al la nuna. Mi ripozis jam en la lito, laca pro la tuttaga peza laboro. En momento eksonis la porda sonorilo. Mi rapide vestis min kaj eliris por malfermi la pordon. Ĉe la lumo de la lanterno mi ekvidis homan figuron en longa nigra mantelo kaj kun samkolora kapuĉo sur la kapo. Je mia demando li respondis, ke li estas barono Flugvent, malnova amiko de la grafo. Mi kondukis la frostantan gaston al la grafo, kiu baldaŭ ordonis al mi prepari por la fremdulo liton en la tura ĉambro. Plenuminte la ordonon mi enlitiĝis kaj trankvile dormis. Sed en la mateno terura novaĵo atendis nin: la mistera gasto kaj la juna kaj bela grafino, mia sinjorino, estis malaperintaj. Ni traserĉis la tutan domon, sed vane. Ni trovis ĉiun pordon bone ŝlosita kaj riglita, la neĝo ĉe la fenestroj kaj pordoj estis netuŝita, ĉirkaŭ la kastelo nenia postsigno de homa paŝo, do ili ne eliris. Sed en la tura ĉambro sur la planko estis granda freŝa sangmakulo. Tio montris, ke dum la nokto okazis io terura kaj mistera. La grafo duone freneziĝis pro la okazintaĵo kaj de tiu tempo li estas vivanta mortinto. Oni neniam retrovis la grafinon, sed kelkfoje dum la nokto oni aŭdas misterajn sonojn el la tura ĉambro, kvazaŭ iu frotus la plankon per malmola broso kaj unufoje mi kuraĝe enrigardis tra la ŝlosiltruo kaj la sango glaciiĝis en miaj vejnoj. Imagu, kion mi vidis: blanke vestita fantomo, la spirito de la grafino, kaŭris sur la planko kaj frotadis la sangomakulon.

La maljunulo eksilentis. La aŭskultantoj tremis pro timo kaj teruro. En ĉi tiu momento eksonis la sonorilo ĉe la pordo. Tri junaj servistoj eliris por vidi, kiu estas ekstere. Baldaŭ reveninte ili anoncis, ke iu vojaĝanto petas gastigon por la nokto, pro la malbona vetero. La maljuna Georgo diris:

— Estu! Konduku lin internen!

Post momento aperis ĉe la sojlo altstatura viro, tute kovrita per nigra mantelo kun kapuĉo. La geservistoj konsterniĝis. La fremdulo kun tomba voĉo salutis ilin kaj petis, ke oni preparu por li liton en la tura ĉambro, kiun li bone konas. La teruriĝo de la geservistoj kreskis. Nur Georgo restis kuraĝa. Li diris sekrete al la aliaj kvar servistoj:

— Bone! Ni plenumu lian deziron. Sed dum la tuta nokto ni gardostaros antaŭ la tura ĉambro.

Oni preparis la liton, la fremdulo eniris kaj enlitiĝis. La servistinoj en la kuirejo ĉe la forno frostotremis kaj klopodis kuraĝigi sin reciproke. La kvin viroj mute atendis en la koridoro antaŭ la tura ĉambro.

Alvenis la noktomezo. Kiam la dek-dua bato de la preĝeja horloĝo estis forsoninta, en la tura ĉambro komenciĝis mistera bruado. La viroj unu post la alia enrigardis tra la ŝlosila truo kaj kun supren starantaj haroj apogis sin al la muro, ĉar ili vidis la blanke vestitan fantomon, kiu kun granda klopodo frotadis la makulon sur la planko.

La maljuna Georgo restis ĉe la ŝlosiltruo por observi, kio okazos. Li vidis, ke la fantomo sensukcese frotadis la plankon, tamen la sangmakulo restis. Sed en momento la fremdulo leviĝis el la lito, paŝis al la makulo, malfermis ruĝan skatoleton, verŝis el ĝi delikatan pulvoron sur la sangmakulon, kovris la tutan per sia poŝtuko kaj per unusola rapida movo forviŝis la makulon, tiel ke la planko fariĝis tute pura sen la plej malgranda postsigno de la iama granda sangmakulo.

La kvin viroj subite malfermis la pordon kaj eniris en la ĉambron. La fantomo estis for, nur la fremdulo staris en la mezo de la ĉambro. La maljuna Georgo kun tondra voĉo alparolis lin:

— Kion vi faras ĉi tie, mistera homo?

— Pardonu, sinjoro, — respondis la fremdulo afable ridetante, — mi ne estas mistera homo, sed mi estas Simono Varlaŭd, reprezentanto de la firmo Formakul & Kompanio, fabrikanta la superunuarangan kaj plej altkvalitan pulvoron „Purig", kiu dum ero de sekundo forigas ĉiuspecan makulon kaj malpuraĵon de ligno, ledo, ŝtono, drapo, silko, veluro, papero kaj metalo kaj kies skatolo kostas nur 35 cendojn. Ĉu mi povas servi vin per specimena skatolo?

17-a tasko.

Ni prezentas ĉi tie al nia legantaro tekston, en kiu estas troveblaj multaj verboj en pasiva participo. Sed ĉie mankas la litero, kiu montras la tempon (a, i, o). — Nun vi povas en praktika maniero kontroli, ĉu vi bone komprenas la pasivajn participojn? Bonvolu ĉie kompletigi la vortojn, enskribante la mankantajn literojn. Poste ni publikigos la ĝustan kompletigon kaj vi povos kompari vian laboraĵon kun la ĝusta solvo.

ATENTU! *La sekvanta rakonto estas ankaŭ tasko por nia 92-a konkurso (vidu sur la 10-a paĝo!); per bona solvo vi povos gajni premion.*

LA SURPRIZO

(Vera historio)

Alberto estas estim...ta kaj ŝat...ta oficisto ĉe la famkon...ta entrepreno Flik & Plik, fond...ta en la jaro 1789 por la riparado de difekt...taj, sed ankoraŭ uz...taj pluvombreloj. Li estas dot...ta per multflankaj talentoj kaj li havas imponan titolon, fiks...tan per kontrakto: provizora honora vicsubhelppraktikantkandidatanstataŭanto. Sed se „la alia flanko de la medalo" estas rigard...ta, oni devas konstati, ke li ne estas nask...ta sub la „granda feliĉstelo". De la altestim...ta direktoro li estas pag...ta per multa honoro, sed malmulta mono.

En la lastjara vintro Alberto precipe forte sentis, ke li estas malfavor...ta de la sorto kaj forlas...ta de la providenco. Sed li tamen estis kontenta, ĉar li posedis du am...tajn kaj forte gard...tajn trezorojn: artoplene ellabor...tan horloĝon, hered...tan de sia mortig...ta avo, kaj bone eduk...tan edzineton, kiu laboris kiel definitive dung...ta, sed malbone pag...ta stenotipistino en la urba oficejo de trov...taj objektoj, kvankam ŝi havis de ĉiu homo admir...tan orkoloran hararon, longan ĝis la genuoj.

En la posttagmezo de la antaŭkristnaska tago Heleno, la ĵus menci...ta edzino de Alberto, estis hejme, ĉar la oficejo estis ferm...ta, kaj pensadis pri la far...ta kristnaska donaco por la am...ta edzo. Ŝi memoris pri la bela horloĝĉeno, ornam...ta per facet...taj ŝtonoj, en la butika fenestro de la juvelisto Falsor, en la plej multe tafik...ta strato de la urbo, kontraŭ la ĵus finkonstru...ta urbodomo, admir...ta de ĉiu fremdulo. Pri tiu ĉeno, fabrik...ta el oro, Alberto ofte diris: „Ĝi bonege taŭgas por mia hered...ta, zorge gard...ta kaj ĝis la morto pie konserv...ta familia horloĝo."

Heleno elprenis sian ŝpar...tan monon el la bone kaŝ...ta monkesteto kaj malĝoje vidis, ke estas nur unu dolaro kaj tridek cendoj. Tro malgranda sumo por la vid...ta kaj dezir...ta ĉeno. Ŝi ĉirkaŭrigardis en la malriĉe, sed bonguste mebl...ta ĉambro kaj ŝi ekvidis sin mem en la pasintjare aĉet...ta sed ankoraŭ ne finpag...ta granda spegulo. En la spegulo ŝi vidis sian plekt...tan harkronon kaj subite bonega ideo fulmis tra ŝia kapo. Ŝi rapide prenis sian iom eluz...tan mantelon kaj kuris al la lukse instal...ta salono de la frizisto Daŭrond. La elegante raz...ta, komb...ta kaj ŝmir...ta frizisto per larĝe malferm...taj okuloj admiris la dislig...tan belegan hararon kaj konsentis aĉeti ĝin per dudek dolaroj. Heleno ankoraŭ unufoje karesis per siaj zorge fleg...taj manoj la detranĉ...tajn harojn kaj kun feliĉa sento pensis pri la aĉet...ta kaj al Alberto donac...ta horloĝĉeno.

(Daŭrigo sur la 4-a paĝo.)

La frizisto post la rapide kaj lerte plenum...ta laboro kolektis la detond...tajn harojn, enmetis ilin en la ujon de la purig...taj objektoj kaj pagis al Heleno la promes...tan sumon.

Post kvarona horo Heleno gaje iris hejmen kun la aĉet...ta ĉeno. Sed vidante en la spegulo sian ŝanĝ...tan frizaĵon ŝi ektimis, ke la „bubo-kapo" ne plaĉos al Alberto, kiu ĉiam tre ŝatis la belegan kapornamon de Heleno.

Post kelkaj minutoj tra la malferm...ta pordo enpaŝis la surpriz...ta Alberto. Ekvidinte sian tond...tan edzinon li rigidiĝis kaj kun okuloj fiks...taj al ŝia kapo, konfuze palpis sian poŝon.

Heleno teruriĝis kaj tremante diris:

— Am...ta Alberto, ĉu vi koleras? Miaj haroj estas detranĉ...taj kaj vend...taj. Sed nun vi havas la ofte rigard...tan ĉenon por via horloĝo. Jen la ĉeno! Rigardu, rigardu!

Alberto tiris el la poŝo de sia flik...ta jako bele kolorig...tan skatolon ĉirkaŭlig...tan per orum...ta rubando kaj diris:

— Kaj mi volis vin surprizi per ĉi tiu kon...ta objekto!

Heleno malfermis la skatolon kaj kun surprizo vidis en ĝi la belegan kombilaron far...tan el testuda ŝelo, kiun ili jam kelkfoje admiris en la lumig...ta fenestro de la granda magazeno kaj trovis ĝin far...ta ĝuste por la grandioza hararo de Heleno.

— Belega ĝi estas! — kriis la surpriz...ta Heleno, — kre...ta precize por miaj detranĉ...taj haroj.

En tiu momento Heleno ekkomprenis la konduton de Alberto. Kaj ŝi komencis konsoli la ĉagren...tan edzon:

— Ne malĝoju, Alberto, denove longiĝos miaj haroj! Sed nun donu vian horloĝon, ni surmetu la ĉenon!

— Karulino, — respondis Alberto, — vi ne povas meti la donac...tajn kombilojn en vian hararon, kaj simile mi ne povas porti la ricev...tan ĉenon kun mia horloĝo.

— Kial? — demandis la terurig...ta Heleno.

— Ĉar same kiel viaj haroj transformiĝis je horloĝĉeno, ankaŭ mia horloĝo transformiĝis je kombilaro.

AL LA VENKO!

229. Internacia ekspozicio uzas Esperanton. — La Internacia Ekspozicio por Komerco kaj Industrio, okazonta en la urbo Tilburg (Nederlando) dum la 28. Junio. — 31. Julio 1934, uzas Esperanton kiel lingvon de korespondado, kaj en la ekspozicia tereno funkcios Esperanta informoficejo.

230. Nederlanda ĵurnalo publikigas Esperanto-kurson. — La ĵurnalo *„Boxtelsche Courant"*, aperanta en Boxtel (Nederlando), publikigas kurson de Esperanto kaj regulan rubrikon kun informoj pri la disvastiĝo de Esperanto. — *(La Esp-an materialon prizorgas s-ro Steph. Wellens.)*

231. Nova Zamenhof-strato. — La urbestraro de Tel-Aviv (Palestino) decidis nomi unu straton de la urbo je la honoro de la aŭtoro de Esperanto. La solena inaŭguro de la „Zamenhof-strato" okazos la 11-an de Majo, en la kadro de la Proksim-Orienta Esperanto-Kongreso kaj de la Levanta Foiro.

232. Granda firmo en Hindoĉinujo uzas Esperanton. — La granda meblofabriko „L'ébéniste" en Hanoi, ĉefurbo de Hindoĉinujo, uzas Esperanton en sia korespondado. Sur ĉiu negoca papero de la firmo estas videbla la verda stelo kaj la frazo: „Korespondado en Esperanto". *(La direktoro de la fabriko estas s-ro Trinh-Dinh-Kinh, vicdelegito de UEA. Adreso: 25 rue Fellonneau, Hanoi.)*

233. Turisma propagando per Esperanto. — S-ro K. M. Liniger, Delegito de Universala Esperanto-Asocio en Bern (Svislando), komisiite de la Svisa Fervojdirekcio kaj de la Svisa Trafikoficejo, faras dum la monatoj Aprilo kaj Majo 1934 rondvojaĝon tra Francujo, Belgujo kaj Nederlando, por fari Esperantlingvajn paroladojn pri la vojaĝado kaj turismo en Svislando. Li ilustras siajn paroladojn per lumbildoj, filmoj kaj gramofonaj diskoj.

234. Esperanto-kurso por fremdul-gvidistoj. — En Kopenhago komenciĝis speciala Esperanto-kurso por profesiaj fremdul-gvidistoj funkciantaj en la servo de turismaj oficejoj. — *(La kurson gvidas f-ino Margarete Saxl el Berlino, instruistino de la Int. Cseh-Instituto de Esp.)*

235. Turismaj prelegoj en Esperanto. — En Kopenhago la dana vojaĝa kaj turisma oficejo *„Oversöisk Passagerbureau"* aranĝis grandsukcesajn film-prezentadojn kun klarigaj paroladoj pri la Bavaraj Alpoj kaj Oberammergau. La filmojn disponigis la Germana Ŝtatfervoja Asocio, la paroladojn faris la Esperanto-instruistino f-ino M. Saxl el Berlino. La Esperanto-lingvaj paroladoj estis tradukataj en la danan lingvon. Pro la granda sukceso de la paroladoj oni intencas aranĝi pluajn similajn prezentadojn en pluraj urboj de Danujo.

236. Turisma oficejo uzas Esperanton. — Laŭ la deziro de la Franca Federacio de la „Sindikatoj de Iniciativo" por la aplikado de la lingvo Esperanto, la Turisma Oficejo de la urbo Cannes (Suda Francujo) enkondukis la uzadon de Esperanto. La geoficistoj f-ino Lecompte kaj s-ro Reichnecker estas je la dispono de la Esperante parolantaj vizitantoj.

237. Industria entrepreno uzas Esperanton. — En la urbo Nice (Francujo) oni ĵus instalis la marmor-prilaboran uzinon de la firmo Fiquet. La muntadon de la modernaj elektraj maŝinoj por la segado kaj polurigado de la marmoro efektivigis la inĝenieroj Bodnarskij kaj Ollivaud, kiuj interrilatis konstante en Esperanto, ĉar ili apartenas al malsamaj nacioj. Ankaŭ la ĝenerala sekretario de la firmo perfekte uzas Esperanton.

238. Nederlandaj transportlaboristoj por Esperanto. — La grupo Amsterdam de la Holanda Transportlaborista Sindikato decidis proponi al la kongreso de la sindikato, ke ĝi malfermu Esperanto-rubrikojn en la organoj de la sindikato.

239. Esperanto-lingva turisma prospekto pri Oslo. — La Turisma Unuiĝo de Oslo kaj Ĉirkaŭaĵo ĵus eldonis en Esperanto-lingvo bele ilustritan faldprospekton pri la norvega ĉefurbo. *(La prospekto estas senpage ricevebla. Adreso: Reisetrafikforening for Oslo og Omegn.)*

La pentekostan libertempon pasigu en Arnhem!

La Esperanto-Domo atendas ankaŭ vin!

INTERESA KAJ AGRABLA PROGRAMO:

Festvespero (19-Majo) kun gesinjoroj Raymond Schwartz el Parizo. — Ekskursoj. — Ludoj. — Gaja praktikado de Esperanto.

Prezo de unutaga plena pensiono (ĉambro kaj la tri manĝoj) en la komforta hotelo de la Esperanto-Domo: 3.50, 3.— kaj 2.50 guld. laŭ la rango de la ĉambro.

Rapide mendu vian ĉambron!

Adreso: ESPERANTO-DOMO, Arnhem. Telefono 26060.

la mondo ridas

Post festeno.

Edzino: La bankdirektoro estis terure malĝentila al siaj gastoj.

Edzo: Certe li havis multajn malagrablaĵojn en sia oficejo.

Edzino: Tio ne estas senkulpigo! Bone edukita homo elverŝas sian koleron kontraŭ sia edzino, sed neniam montras ĝin al siaj gastoj.

(Fliegende Blätter)

Precizeco.

Profesoro: Sinjoro kandidato, kiom da ostoj estas en via korpo?

Kandidato: Ducent-ok.

Profesoro: Erare! Nur ducent-sep. Tion vi ja povis lerni el mia libro.

Kandidato: Sed sinjoro profesoro, hodiaŭ matene mi englutis unu kokidan oston.

(Allers Familj Journal)

Skoto en la frizejo.

— Kiom kostas la hartondado?

— Unu ŝilingon.

— Kaj la razado?

— Kvar pencojn.

— Tiam mi petas, bonvolu razi mian kapon!

(The Humorist)

Inter kamaradoj.

— Jen matematika problemo: Se ĉi tiu ĉambro estas tri metrojn longa kaj kvar metrojn larĝa kaj se mi havas sur mi striitan pantalonon, kiom da jaroj mi havas?

— Kvardek-kvar!

— Vi precize eltrovis! Sed diru, kiel vi faris la kalkulon?

— Tre simple! En nia domo loĝas unu duonfrenezulo; li estas dudek-du-jara.

(The Humorist)

Familia vivo.

— Oskaro, la situacio estas jam vere neebla. Kiam vi vekiĝas, la infanoj estas jam en la lernejo, kaj kiam vi revenas el viaj eternaj konferencoj, ili jam de longe dormas. Vi tamen devas teni kontakton kun ili... Almenaŭ skribu al ili unu poŝtkarton!

(Söndagsnisse)

En kostumbalo.

— Rigardu nur, sinjoro Majer vestis sin kiel araba estro.

— Jes, vere! Li fumas egiptan cigaredon kaj dancas kiel kamelo.

(Le Rire)

Faka kompreno.

— Ni faris en la Alpoj belegan, sed tre danĝeran aŭtoekskurson. Imagu, kelkloke la vojo havis kvardek-gradan altiĝon!

— Terure! ... Kaj en la ombro?

(Allers Familj Journal)

Tenas la sekretojn.

— Ĉu via edzino povas teni la sekretojn?

— Perfekte! Jam de dek jaroj ni estas geedzoj, sed ankoraŭ eĉ unufoje ŝi ne malkaŝis al mi, por kio ŝi elspezis la multan monon!

(Tit Bits)

En boat-ekskurso.

— Diru, fraŭlino Lili, se vi nun falus en la akvon kaj mi savus vin, ĉu vi fariĝus mia edzino?

— Ĉu por tio mi devas unue fali en la akvon?

(Söndagsnisse)

La pura vero.

— Oni diras, ke la akvo de ĉi tiu kurac-fonto faras verajn miraklojn.

— Absolute! Ĝia posedanto estas jam milionulo.

(Il Travaso)

Post balo.

— Dankon, Alfredo, ĉar vi hieraŭ en la balo tiel diligente amuzis mian edzinon.

— Kompreneble, amiko. Estis ja bonfara vespero.

(Hjemmet)

Amika petolado.

— Sinjoro Turner diris, ke vi estas perfekta idioto.

— Espereble vi defendis min!

— Kompreneble! Mi diris al li, ke en la mondo ne ekzistas io perfekta...

Miskompreno.

— Dimanĉe dum mia tuta koncerto mi ludis nur por mia fianĉino!

— Terure! Ĉu nur ŝi sola estis en la salono?

(Fliegende Blätter)

Historiaj objektoj.

— Du belegajn antikvajn pentraĵojn mi gardas en mia hejmo.

— El kiu epoko estas ili?

— El tiu epoko, kiam mi ankoraŭ havis monon.

(Muskete)

Neebla.

— Aŭdu nur, mi konas sepdek-jaran virinon, kiu naskis ĝemelojn!

— Ne mensogu! Tio estas neebla!

— Tamen! Tute vera! Eĉ la tempon mi memoras ankoraŭ, precize antaŭ kvardek jaroj.

(Answers)

La senkulpigo.

— Kial vi rakontis al viaj amikoj, ke mi bonege kuiras? Vi ja bone sciis ankoraŭ dum mia fianĉina tempo, ke mi ne povas fari eĉ simplan ovaĵon?

— Jes, sed mi devis ion diri por mia senkulpigo...

(Schweizer Illustrierte)

Reciproka fido.

— Vi skribas al ni, ke vi pagos nur tiam, kiam ankaŭ ni egaligos vian postulon. Kun bedaŭro ni devas komuniki al vi, ke ni ne povas konsenti prokraston ĝis tia malcerta templimo.

(Hjemmet)

En restoracio.

Gasto: Ho, ĉe vi la kuirejo estas certe tre pura.

Mastro: Absolute, sinjoro! Dankon pro via afabla opinio. Sed kiamaniere vi konstatis tion?

Gasto: Ĉar ĉiu manĝaĵo havas freŝan sapo-guston...

(Tit-Bits)

Malgranda manko.

— Ĉu vi estas feliĉa kun via edzineto, Karlo?

— Nu, tiom, kiom... Kudri ŝi lernis, sed ŝi neniam kudras. Brodi, fliki ŝi scias, sed neniam faras. Nur kuiri ŝi ne scias, sed ĉiam ŝi mem kuiras.

(Vårt Hem)

Lulkanto.

— Kial ne kantas via edzino ian lulkanton, por ke la infaneto ne ploru konstante. Nun devas esti terure por la najbaroj.

— Tute ne! Antaŭe kantadis mia edzino, sed la najbaroj petis, ke prefere la infano ploru.

(Gringoire)

Nia fervora propagandisto, s-ro Julius Glück (×), gvidas grandsukcesajn kursojn en Francujo. La bildo prezentas la kursanaron en la urbo Thouars. Ĉi tiu kurso komenciĝis kun 37 kaj finiĝis kun 82 entuziasmaj gekursanoj.

Dum la paskaj tagoj okazis en Hilversum la Sesa Nederlanda Esperanto-Kongreso. Ĉi tiu bildo prezentas la Lokan Kongresan Komitaton, kune kun kelkaj urbestraranoj de Hilversum kaj kelkaj anoj de la ĉefestraro de L.E.E.N. (= „La Estonto Estas Nia", la neŭtrala organizaĵo de la nederlandaj esperantistoj). La nomoj de la personoj estas, de maldekstre al dekstre: En la unua vico: 1. S-ro J. Kardux, komunuma sekretario. 2. S-ro M. van Zinderen Bakker, prezidanto de la L.K.K. 3. S-ro B. H. Bakker, skabeno de la instruado. 4. S-ro Dreves Uitterdijk, la plej malnova Esp-isto en Nederlando, honora prezidanto de la kongreso. 5. S-ro J. V. Holleman, vicprezidanto de L.E.E.N. 6. F-ino E. J. Steinmeijer, anino de la L.K.K. 7. F-ino N. L. Daams, kasistino de la L.K.K. — En la dua vico: 8. S-ro Alessie, skabeno. 9. S-ro H. Wensel, kasisto de L.E.E.N. 10. S-ro E. de Wolf, redaktoro de „Ned. Esp-isto". 11. F-ino A. Hellinx, anino de la L.K.K. — Tria vico: 12. D-ro C. L. Jungius, sekr. de la L.K.K. — (Kliŝo de L.E.E.N.)



En la mondfama urbo Cannes (Francujo) Esperanto estas oficiale uzata. Ĉi tiu interesa bildo montras Esp-istan policiston (s-ron P. Faucon, delegiton de la Int. Polica Ligo) kun la verda stelo sur la brako. Apude signalfosto montranta ankaŭ Esp-lingve la direkton al la poŝtoficejo.

S-ro Ernst Juneby el Jönköping (Svedujo), ŝatata instruisto de la Cseh-Instituto. Dum la lastaj monatoj li gvidis sukcesplenajn kursojn de Esperanto en pluraj urboj de Danujo.

Dekstra bildo: *La partoprenantoj de la jarkunveno de la Nederlanda Esp.-Societo L.E.E.N. en Hilversum la 2-an de Aprilo. En la fono estas videbla la impona urbodomo. (Kliŝo de Nederl. Esp.)*



En Cannes (Suda Francujo), sur la mondfama „Croisette", ĉe la Zamenhof-strato promenas: f-ino Lidja Zamenhof, s-ro André Boyer fondinto-prez. de la loka Esp.-Grupo kaj ĝener. sekr. de la Provenca Federacio, s-ro A. Triou vicdel. de UEA kun sia Esp-ista fileto.

Bildo pri la kursfina festo okazinta la 10-an de Marto en Jägerndorf (Ĉeĥoslovakujo). En la mezo sidas la meritplena instruinto, s-ro Wilhelm Tandler, kiu per regulaj kursoj de jaro al jaro pligrandigas la anaron de la loka Esperanto-Grupo.

LA MONDO ESTAS INTERESA

Kiam oni edziĝu? — La germana scienculo Schweisheimer havas tre interesan teorion pri la edziĝo. Liaj esploroj kondukis lin al la konstato, ke en la homa organismo de tempo al tempo aperas ia „seksa harmonio", kiu estas tre favora por la edziĝo kaj tial estas konsilinde fari la edziĝon en tia tempo. La scienculo redaktis tabelon pri tiuj tempoj. Laŭ la tabelo la viro havas tiun harmonion en la aĝoj de 18, 27, 35, 45, 54, 63 jaroj, kaj la virino en la aĝoj de 14, 21, 28, 35, 42 kaj 49 jaroj. La plej perfekta edziĝo estas tiam, kiam 27-jara viro edziĝas kun 21-jara virino. La scienculo aldonas, ke ĉe la nomitaj nombroj en la realeco ofte okazas iom da forŝoviĝo, ekzemple la germanaj virinoj edziniĝas plejgrandparte en aĝo de 22-25 jaroj, en Anglujo plej ofte kun 26 jaroj kaj en Norvegujo kun 28 jaroj. La ĝenerala regulo estas, ke ju pli norde vivas iu popolo, des pli longe prokrastiĝas la edziĝo.

★

Oni trovis Ofiron, la landon de la trezoroj. — La Biblio rakontas pri la lando Ofiro, de kie la reĝo Salomono amase venigis al Jerusalemo la oron, eburon, diamanton kaj aliajn altvalorajojn, same la maloftajn arbojn kaj bestojn. En la pli novaj tempoj ofte oni serĉis tiun fabelan landon, sed ĉiam vane. La supozoj de la scienculoj estis diversaj. Kelkaj serĉis ĝin en Hindujo, aliaj en Arabujo, aliaj en orienta kaj suda Afriko. Sed ĉiu serĉado restis senrezulta. En la lastaj semajnoj la Prorok-ekspedicio fine sukcesis trovi en la interno de Abisenujo la postsignojn de la karavana vojo, sur kiu oni transportis la oron al Egiptujo. Oni trovis inter Kurmuk kaj Megali ankaŭ la malnovegan orlavejon, kiu laŭ la atesto de la hieroglifoj estis en funkciado jam en la tempo de la unuaj faraonoj. Tiu regiono, kiu iam devis esti fekundega kaj riĉega, nun estas tre mizera. En la dezerto vivas unu sun-adoranta primitiva gento kiu okupas sin per serĉado de oro en la malmultakvaj riveroj.

★

La eskimoj ne kisas, sed nur kunfrotas la nazojn.

★

Ruĝaj akvoj en Nova-Meksiko. — Nova-Meksiko estas unu el la ŝtatoj de Usono. Ĝi estas najbara kun Teksaso kaj Meksiko. Grandaj partoj de tiu ŝtato estas ankoraŭ nekonataj al la scienco. Tre interesa fakto estas, ke en ĝia regiono nomata „White Sands" ekzistas multaj fontoj kaj lagoj, en kiuj la akvo estas ruĝa. Se oni elprenas la ruĝan akvon, ĝi post kelka tempo fariĝas blanka, simila al lakto, kaj poste tute puriĝas kaj fariĝas travidebla, kiel la ordinara akvo. Per mikroskopa esplorado oni konstatis, ke tiu akvo estas plena de eksterordinare multaj vivantaj estaĵoj, el kiuj multajn ĝis nun tute ne konis la scienco. Sed estas strange, ke el tiuj estaĵoj neniu havas ruĝan koloron. Do la ruĝa koloro de la akvoj devas havi alian kaŭzon. La ŝtata kemia instituto de Nova-Meksiko ĵus sendis ekspedicion por esplori la sekreton de tiu fenomeno.

★

La kreskado de la homformaj simioj. — En la zoologia ĝardeno de Dresdeno dum pluraj jaroj oni observadis la evoluiĝon de la homformaj simioj. Oni konstatis, ke la orangutango tre malrapide kreskas. En aĝo de 2-3 jaroj ĝi aspektas ankoraŭ tiel, kiel en duonjara aĝo. Sed de la kvarjara aĝo ĝi rapide kreskas kaj havante 12-15 jarojn ĝi atingas la plenan evoluon. La ĉimpanzo kun 8 jaroj atingas la plenan aĝon.

★

Sinjoro Wells antaŭdiras mondmiliton. — La fama angla verkisto, H. G. Wells, dum sia ĵusa vojaĝo en Usono deklaris, ke la plej proksima mondmilito okazos en la jaro 1940. En Eŭropo la stato nuntempe ne estas militema, — diris Wells, — sed en Azio ĝis 1940 la situacio povos maturiĝi al milito. Sendube tiu batalo estos la lasta milito, kiu post multegaj suferoj fine alportos la savon al la tuta homaro. S-ro Wells plue deklaris, ke en Britujo ne estas bona grundo por la pacifismo, ĉar ĝi ne estas konforma al la anglo-saksa temperamento. Unu el la intervjuantaj ĵurnalistoj demandis al Wells: „Kiu lando de la mondo estas la plej stabila?" Wells respondis: „Islando".

GRAFOLOGIO

„Ankh". — Vi estas simpatia fraŭlino, sed mi devas aldoni, ke tiu persono, kiu volas amikiĝi kun vi, devas dediĉi tempon, ĉar diversaj trajtoj indikas, ke vi ne estas tiel facila, kiel vi eble aspektas. La kontraŭdirado apartenas al viaj plezuroj. Kiu tion ne volas kredi, tiu povas ricevi informojn ĉe via familia rondo. La kaŭzo de tiu obstineco estas via emo al fantazio, troviĝanta en via interno. Vi volas labori, sed ne tre rapide. Tion vi ne povas fari. Ŝajnas, ke la karaktero de via laboro ne permesas rapidecon. Vi havas klaran kapon, vi ne lasas facile konvinki vin. Tio estas bona por la grafologo, kondiĉe ke li havas pluan materialon, en formo de vera letero, ne en kopiita skribaĵo. Kial vi havas kelkfoje spiritan premitecon?

„Maya". — Ĉi tiu manskribo bone indikas, ke la skribintino laboras akurate, tutplene konvinkita pri tio, ke la bona laboro, speciale la ŝia, estas devo. Ŝi ne volonte malatentas la detalojn kaj pro la korekteco ŝi estas preskaŭ monotona. Se iu bezonas ion aranĝi, turnu sin trankvile al Maya; la grafologo estas certa, ke ŝi estas delikate arta. Plue, ŝi bone centrigas la pensojn, ne saltas de unu afero al alia. Ŝi parolas flue kaj ĉarme, sed atentu! Ne kredu, ke ŝi ne kuraĝas diri al vi la veron! Ho ve! Sed ŝi restas delikata. Same kiel ĉe „Ankh", ankaŭ ĉe vi la grafologo devas demandi: kial vi havas kelkfoje tiun melankolian emon? Ĉu estas eble, ke ekzistas anim-kontakto inter „Maya" kaj „Ankh"? Por bone kompreni tiun animon, la grafologo bezonas pli vastan materialon.

„Plezuro". — Trankvila persono, kiun neniu povas akuzi pri obstineco. Se li kelkfoje estas tia, tiam senkulpigu lin, ĉar okazas nur pro liaj nervoj kaj absolute sen lia intenco. Li volonte laboras, sed ne povas rapidi en la laboro. La profito de tio estas, ke lia laboro estas bone prizorgita. Kvankam viro, li havas en la interno virinajn ecojn. Li estas iom mola, sen vere vira energio. Pli atente esplorante la grafologo trovas, ke li estas sufiĉe fiera kaj aperas la signoj de sin-amo. Cetere li estas bona persono, kiu devas bone prizorgi sin, por konservi la fizikan forton.

„Hermien". — Jam kiel juna knabineto, kiam vi sidis ankoraŭ en la lerneja benko, vi estis bona, afabla infano. Sed, ho ve, kiam venis iu por vin inciti, vi tute ne restis facila. Kaj vidu, sinjorino, la infantempa interno restis ĝis nun; ĉar malgraŭ tio, ke vi estas bona, kaj ke vi volonte akceptas la vizitojn de viaj amikinoj, oni devas prudente trakti vin kaj ne tuŝi vin. Via laboro estas korekta, same kiel ĉio en via domo estas en bona ordo. Mi vidas vin sidi ĉe via bele ordigita teo-tablo, kiam vi volonte parolas kaj babilas kun viaj gastoj, pri la aliaj personoj, sed en deca maniero. En la imago mi aŭdas vin diri: „Ho, mi absolute certe scias, ke ... k.t.p." Akceptu la jenan konsilon de la grafologo: restu ĉiam trankvila! Tio estas bona por vi, precipe por viaj nervoj, kiuj ludas rolon ĉe vi. Mi volas ankoraŭ aldoni, ke vi estas korekta persono. Ĉu la plumo ne estis sufiĉe bona por skribi la adreson? Aŭ eble, ĉar vi prenis novan plumon!

La memoro.

(Soneto)

Denove dolĉa kaj feliĉa sent',
Disiĝas ombro de la temp' antikva,
La roza vojo bela kaj perdita
Kondukas min al nova ĝu-moment'.

Ĉu estas ĝi sekreta dia tent',
Je kiu flamas mia kor' vundita?
Ho ne! Memor' jam longe forgesita
Surprizis min subite en silent'.

Per foraj, palaj bildoj de l' real'
Vi vekas mian grandan amdoloron.
Forigu fine jam ĉi rememoron
Kaj kovru ĝin per via or-vual'.

Foriru, lasu min ripozi jam,
Ho, rememor' pri tiu arda am'!

Tiboro Ujlaky Nagy
Kaposvár (Hungarujo)

INFORMOJ

Naskiĝo. — Al nia ŝatata Esperantista familio *Schoutens-van Lammeren* en Malang (Nederlanda Hindujo) la 31-an de Marto naskiĝis fileto, kiu ricevis la nomon *Janĵo*. — Koran gratulon!

Novaj gazetoj. — La „Verdemularo", Esperantista grupo ĉe la Sun-Yat-Sen Universitato en Kantono (Ĉinujo) eldonas trimonatan gazeton sub titolo *„La Verdemulo"*. La unua numero, aperinta en Januaro, estas 42-paĝa kaj entenas plejparte sciencajn artikolojn. La abonprezo estas 1 svisa franko jare. — Sub titolo *„Interligilo"* la Orient-hinduja Centra Esperanto-Organizo komencis aperigi monatan organon. La redaktoro de la gazeto estas s-ro G. H. de Heer en Batavia (Java), la administranto s-ro C. P. Krüss en Meester-Cornelis (Java), Insulindelaan 20.

Elo Fraternal estas la titolo de nova pacifista gazeto, kiu aperas en portugala lingvo en Brazilo, kiel oficiala organo de la pacifista asocio „Vinculo Internacional de Amizade". La gazeto, kiu estas senpage disdonata al la publiko, aperigas ankaŭ Esperanto-lingvajn artikolojn kaj fervore propagandas Esperanton. La redakcio petas la tutmondan Esperantistaron al kunlaboro. Adreso: Rua Luiz Gama 18, Cidade do Salvador (Bahia, Brazilo).

La Levanta Foiro en Tel-Aviv (Palestino) efike subtenas Esperanton. Laŭ ĵus ricevitaj informoj ĝia direkcio disponigis apartan standon por Esperanto-ekspozicio kaj donas larĝan helpon al la baldaŭ okazonta Esperanto-kongreso. La Foiro en ĉi tiu jaro okazos dum la tempo 26. Aprilo— 26. Majo. Ĝi estas la sola internacia foiro en la tuta Mez-Oriento kaj ĝi estas kvazaŭ la pordego, tra kiu pasas la eŭropaj varoj al Egiptujo, Sirio, Irako, Transjordano, Cipro, Turkujo, Persujo kaj Arabujo. La foir-urbo Tel-Aviv, fondita en la jaro 1909, estas ekzemplo de rapida evolucio. En la jaro 1919 ĝi havis nur 3000 loĝantojn, sed hodiaŭ ĝi estas moderna grandurbo kun 80,000 loĝantoj.

Esperanto-ekspozicio. — Dum la granda Internacia Ekspozicio por Komerco kaj Industrio, kiu okazos de la 28-Junio ĝis la 31-Julio en Tilburg (Nederlando), la loka Esp-ista klubo „Ame kaj Pace" reprezentos Esperantujon per Esperanto-stando kaj informoficejo. Firmoj kaj unuiĝoj, kiuj havas ion taŭgan por ekspozicii, aŭ volas presigi anoncon en la disdonota propagandlibreto, turnu sin la la sekretariejo de „Ame kaj Pace", Bred. Weg 241 en Tilburg. La 8-an de Julio estos speciala Esperanto-tago, al kiu ĉiuj geesperantistoj estas invitataj.

„Kristo kaj la universala frateco". — Kiel ni jam publikigis en la januara numero de La Praktiko, sub la supra titolo oni anoncis internacian konkurson por la junularo. Laŭ ĵus ricevita informo el Ĝenevo, la konkurso vekis grandan intereson kaj nia alvoko al la Esp-ista junularo ne estis vana, ĉar ne malpli ol 70 Esp-istoj petis la konkursan regularon. La organizantoj de la konkurso plilongigis la templimon ĝis la fino de Majo.

„La Junularo kaj la Mondpaco", la porinfana pacgazeteto, aperis ankaŭ por ĉi tiu jaro Esplingve. Sur kvar paĝoj ĝi entenas interesajn legaĵojn rilatantajn al la pacproblemo. La redaktadon faris f-inoj C. kaj M. Keiser en Hago. (Ekzempleroj estas haveblaj ĉe s-ino Romeyn, Nassau Zuylensteinstraat 2, Hago. Prezo: 1 ekz. = 0.10 sv. fr., 25 ekz. = 1.75 sv.fr., 50 ekz. = 2.00 sv. fr.)

Ĉeĥoslovakujo. — En la urbo *Ĉeske-Budejovice* estas floranta Esp-ista vivo. La loka Esp-klubo „La Progreso" la 10-an de Marto havis sian ĝeneralan kunvenon, en kiu oni raportis pri grandskala propaganda laboro sukcesplene efektivigita. Oni fondis propagandan oficejon „Esperanto-Servo", kiu donas informojn kaj helpas vizitantojn. La oficejo kore invitas la Esp-istaron por viziti la urbon kaj ĝian belegan regionon. La adreso de la oficejo: „Esperanto-Servo", Schneiderova strato 256, Ĉeske-Budejovice. — En *Vodnany* la Esp-a klubo „La Progreso" aranĝis la 1-an de Aprilo la duan reprezentantan festvesperon kun granda sukceso. Paroladojn faris s-ro Prucha, s-ro Klimeŝ kaj s-ro Jirko. Sekvis riĉa muzik- kaj dancprogramo.

Danujo. — Nia fervora propagandisto kaj ŝatata instruisto s-ro D. Ponti el Nederlando ĵus finis kurson en *Silkeborg*. En la gazeto „Silkeborg Venstreblad" de 11-Aprilo aperis granda intervjuo preskaŭ tutpaĝa. Dum la tempo de la plurmonata kursgvidado s-ro Ponti faris multajn interesajn lumbild-paroladojn en diversaj urboj, pri Nederlanda Hindujo. — S-ro G. Staberg kun bona sukceso finis sian kurson kun 73 gekursanoj en *Galtrup*. Je la peto de la novaj Esp-istoj la ŝatata instruisto komencis daŭrigan kurson la 1-an de Majo. — En *Silkeborg* okazos dum la somero elementa Cseh-metoda kurso por diverslandaj geinstruistoj (komenco la 15-an de Julio) kaj prepara kurso por Cseh-metodaj instruistoj (komenco la 22-an de Julio), gvidotaj de f-ino M. Saxl el Berlino.

Francujo. — La kursoj de f-ino Lidja Zamenhof, organizitaj de la Provenca Federacio kaj viglaj lokaj grupoj, sukcesplene finiĝis kaj f-ino Zamenhof transiris al *Bordeaux*, kie ŝi komencis kurson la 8-an de Majo. — En *Elbeuf* la Popola Universitato aranĝis grandsukcesan „Esperantan vesperon", en kiu s-ro Jouis, prez. de la Normanda Esp. Federacio faris paroladon pri la nuna disvastiĝo de Esp-o kaj s-ro J. Glück faris entuziasmigan provlecionon. La 22-an de Aprilo la loka Esp-a Grupo aranĝis en la kunvenejo de la Industriista Asocio akcepton por s-ro Glück, kiu faris emociigan paroladon pri la malnovaj tempoj de nia movado. S-ro Glück ricevis inviton por gvidi kurson en Elbeuf. — En la florbatalo de *Vence* la unuan premion gajnis la Esperanto-ĉaro. — En *Saint-Raphaël* ĉe la florbatalo la duan premion ricevis la Esperanto-ĉaro.

Nederlando. — En *Arnhem* la 18-an de Aprilo okazis la kursfina festkunveno de la poŝtista kurso gvidita de s-ro H. J. F. Wansink. Ĉeestis ankaŭ s-ro M. W. Bos inspektoro de P.T.T. kaj ŝ-ro H. Rietema direktoro de la loka poŝtoficejo. La vespero estis amuza kaj gajega pro la riĉa programo de kantoj, deklamoj kaj teatraĵoj. — En *Alkmaar* la sukcesplenaj kursoj de Julio Baghy kreis viglan Esp-istan vivon. La anaro de la loka grupo duobliĝis. — La du kursoj de Andreo Cseh en *Hago* finiĝis per solena komuna finleciono. Sekvas daŭriga kurso sub la gvidado de s-ro F. Weeke.

Norvegujo. — En la urbo *Horten* f-ino M. Glaser el Berlino gvidas tri kursojn, komencan kaj daŭrigan por plenkreskuloj kaj komencan por infanoj. Partoprenas 54 personoj.

Svedujo. — En la urboj *Borås* kaj *Ulricehamn* s-ro Tiberio Morariu finis siajn kvar kursojn. „Verda Rondo" elektis s-ron Morariu kiel honoran membron. Favoraj raportoj pri la kursfinaj solenoj aperis en tri gazetoj. — S-ro Morariu lumbild-paroladis kaj novajn kursojn komencis en *Insjön*, *Leksand* kaj *Rättvik*.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — Petu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

KORESPONDO. — Esperanto- klubo deziras korespondi kun samideanoj de la tuta mondo, pri ĉiu temo. Respondo certa! Skribu al la sekretario: s-ro Willy Münchrath, Rosmarstrasse 85 en Frechen apud Köln (Germanujo).

SENDU unu guldenon al La Praktiko! Vi ricevos 11 lotojn de la Libro-Loterio de La Praktiko, per kiuj vi povos gajni 13 premiojn!

NOVA GRUPO. Skribu al UEA-delegito A. Kilde Jensen, Kedelsmedstr. 12 en Svendborg (Danujo).

ESP-ISTA LIBERTEMPEJO. — La internaĉia Esperantista Libertempejo en Lazne Belohrad (Ĉeĥoslovakio) okazos nunjare la trian fojon. La bela urbeto kun efika torfbanejo, ĉirkaŭita per arbarkovrita gigantmontaro, invitas korege ĉiujn samideanojn por Julio-Aŭgusto 1934.

BONHUMURO, de Paul Nyssens, estas nepre legenda libro. Bonhumoro estas socia forto, skribis Charles Wagner. Tion la aŭtoro pruvas, kaj li plie klarigas, kiel ĉiu povas plibonigi sian humoron kaj fariĝi pro tio pli forta kaj pli potenca. — Prezo kun sendkosto: 1.25 ned. guld. Aĉetebla ĉe La Praktiko.

GEGAJULOJ en la klubo „La Stelo" aranĝos letervesperon la 12-an de Junio 1934. Bonvolu sendi skribaĵojn tuj. Respondo garantiata. Adreso: Eskilstuna Esperanto-Klubo „La Stelo" en Eskilstuna (Svedujo).

ESPERANTO-KEKSO

Aĉetu nian specialan produktaĵon en skatoloj plaĉe envolvitaj per arte presita skatola bendo portanta la nomon „Esperanto" kun verda stelo kaj esp-a teksto. Ĝi taŭgas kiel propagandilo ĉe div. esp-aj kongresoj, kiel donaco, premio k.t.p. kaj estas vera ornamaĵo sur ĉiu esp-ista tablo. Unuopajn skatolojn ni sendas eksterlanden kiel „senvaloran specimenon" kontraŭ antaŭsendo de 4 internaciaj poŝtaj respondkuponoj. Por pli grandaj kvantoj postulu nian specialan oferton.

„KAROLINA"
fabriko de biskvito a. s.
OSIJEK (Jugoslavio).

LIMONADOJ, MINERALAJ AKVOJ
SENALKOHOLAJ VINOJ

Esperanto parolata!

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respondmarkon.

S-ro S. W. en S. (Ned.) — 1. La vorto „antaŭtableto" povas signifi malgrandan tablon, kiu staras ekzemple antaŭ spegulo kaj sur kiu oni tenas la kombilaron kaj ceteran plibeligilaron. — 2. La vorto „kapelo" povas signifi aŭ aparte starantan preĝejeton (ekzemple: kapelo sur la monto, en la tombejo), aŭ parton de granda preĝejo (ekz-e la katedralo havas kelkajn kapelojn kun altaroj), aŭ specialan ĉambron en palaco por la diservo (ekz-e en la reĝa palaco estas kapelo). — 3. La „ferio" estas libertempo difinita per la leĝo. — 4. *Hockey* = hokeo: *diocees* = diocezo: *rondschrift* = cirkulero. — 5. „Mefisto" estas la nomo de la diablo en la popola legendo kaj en la verko „Faŭsto" de Goethe. „Plastikaj artoj" estas tiuj artoj, kiuj reliefe reproduktas la formojn de objektoj, ekz-e la skulptado, ĉizado. — Ni tre ĝojas pro viaj bonegaj spertoj per la korespondado kaj ni kore gratulas pro via bonega propaganda laboro, kiun vi faras publikigante en via loka ĵurnalo la enhavon de nia rubriko „AL LA VENKO!"

S-ro J. B. S. en A. (Ned.) — La vorto „subvencio" signifas: oficiala monhelpo. En la holanda lingvo: subventie, subsidie, ondersteuning. Subvencii = doni subvencion, monhelpon.

S-ro G. D. en O. (Sovjetunio) — Ni ĝojas pro via kontenteco. Jes, vi rajtas aperigi la anoncetojn.

S-ro R. V. en D. (Ned.) — La ĝusta esprimo estas: „en la sekvinta tago". Se vi insistas pri la ĝusteco de via klarigo praviganta la formon „sekvanta", vi ne rajtos plu diri: „en la pasinta jaro mi faris belan vojaĝon", sed vi devos diri: „en la pasanta jaro"! Estas eraro opinii, ke la esp-a traduko de la Nova Testamento ne povas enhavi lingvan eraron. Ni petas, bonvolu serĉi similajn ekzemplojn ankaŭ en la Malnova Test. kaj komuniki ilin al ni, por komparo.

S-ro R. J. en T. (Norv.) — La ĝustaj frazoj estas: *La riparita aŭtomobilo veturas pli rapide. Riparite la aŭtomobilo veturas pli rapide.* (Riparite = kiam ĝi estas riparita. Do adverbo kaj ne adjektivo.) *Mokite* (= kiam li estis mokita, en stato de mokiteco) *la knabo forlasis la lokon. La mokita knabo forlasis la lokon.* — La adjektivon ni uzas aŭ kiel ec-montrantan aldonaĵon (ekz-e: la granda domo), aŭ kiel predikaton (ekz-e: la domo estas granda). Frazparton, kiu signifas lokon, tempon, manieron aŭ alian cirkonstancon, oni anstataŭas per adverbo. Observu la diferencon ĉe la jenaj ekzemploj: *La laborinta homo ripozas. Laborinte la homo ripozas.*

F-ino A. J. de H. en H. (Ned.) — Ni dankas pro viaj detalaj informoj pri la „Societo de Amikoj de Esperanto".

S-ro G. M. en M. (Sovjetunio) — La vorto „ĵamboreo" signifas loĝadon en tendoj. Ĝi devenas el sudafrika negra lingvo. Vi povas aboni La Praktikon ĉe SEU en Moskvo. Ankaŭ la malnovajn jarkolektojn.

S-ro L. de J. en R. (Ned.) — „Sinjoro Bakker mortis en tiu vilaĝo, kie mi naskiĝis." Vi pravas dirante, ke la vorto „kie" rilatas al loko. Kaj ĉar la esprimo „en tiu vilaĝo" signifas lokon, la vorto „kie" en ĉi tiu frazo estas ĝuste uzata. Tamen el stila vidpunkto preferinda estas la formo: „en kiu mi naskiĝis".

F-ino D. M. en S. (Ned.) — La esprimon „de beenen uitslaan" vi povas traduki per: *elĵeti la krurojn.*

Al pluraj. — Se oni deziras la publikigon de iu novaĵo en la rubriko „Informoj", oni bonvolu atenti la admonon ĉe la kapo de la rubriko: ensendi la tekston sur aparta paperfolieto.

S-ro A. C. en C. (Pol.) — Por abonpago ni akceptas nur neuzitajn poŝtmarkojn. Prefere pagu al nia pola poŝtĉekkonto.

KONKURSOJ

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Januara numero!

92-a konkurso.

GRAMATIKA TASKO.

Ĉi tiu numero de La Praktiko sur la 3-a paĝo entenas la 17-an taskon en la serio de niaj praktikaj gramatikaj lecionoj. Ĝia celo estas doni efikan ekzercon pri la pasivaj participoj.

La tasko de la konkurso estas: solvi la nomitan gramatikan taskon, kompletigante tiujn vortojn de la vera historio „LA SURPRIZO", en kiuj mankas la litero de la tempo.

Reguloj: *Oni devas reskribi la tutan rakonton, en la kompleta formo, prefere per skribmaŝino, surglui la konkursan kuponon, alskribi la nomon kaj adreson de la solvinto kaj ensendi ĝin al la redakcio.*

Inter tiuj personoj, kiuj ensendas la ĝustan solvon, ni disdonos 6 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la fino de Aŭgusto.

93-a konkurso.

Johano Verdemul
abonanto de La Praktiko
aktiva membro de U.L.D.N.R.A.

Jen la vizitkarto de nia fervora samideano s-ro Verdemul. La karto montras, ke li estas abonanto de La Praktiko kaj membro de supozeble grava societo. Sed kion signifas la misteraj literoj „U.L.D.N.R.A."?

La konkursa tasko estas: Bonvolu klarigi la nomon de la societo, laŭ la komencliteroj videblaj sur la vizitkarto.

Inter la personoj, kiuj eltrovas la ĝustan nomon, ni dislotos 5 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la fino de Aŭgusto.

Bonvolu precize plenumi la konkursajn regulojn.

94-a konkurso.

ENIGMO

16, 5, 4, 2, 8 — 3, 1, 9 — 11, 1 — 7, 5, 9, 13, 2 — 18, 3, 1, 9 — 5, 8, 13, 5, 6, 1, 4, 7, 2 — 14, 1, 6, 3, 12, 3, 4, 7, 5 — 13, 2, 8, 5, 10, 1, 22, 2 — 10, 5 — 11, 1 — 7, 15, 7, 1 — 21, 2, 9, 1, 6, 2 — 13, 5, 6, 10, 2, 8 — 8, 3, 1, 4 — 18, 1, 6, 1, 18, 7, 5, 6, 2, 4 — 3, 10, 5, 1, 4 — 7, 3, 1, 9 — 12, 3 — 14, 1, 6, 3, 12, 2, 8 — 17, 1, 9 — 4, 15, 6 — 11, 3, 4, 20, 16, 2 — 2, 4, 3 — 17, 1, 9 — 4, 5 — 19, 1, 7, 1, 11, 1, 10, 2, 8 — 13, 2, 6 — 12, 3 — 2, 4, 3 — 4, 15, 6 — 7, 3, 6, 1, 10, 2, 8 — 5, 11 — 12, 3 — 13, 6, 2, 14, 3, 7, 2, 4.

Metu literojn anstataŭ la nombroj. La sama nombro signifas ĉiam la saman literon. Kiel rezulton vi ricevos interesan frazon, kiun D-ro Zamenhof diris en unu el siaj kongresaj paroladoj pri la estonteco de nia lingvo.

Ŝlosil-vortoj:

1, 14, 6, 3, 18, 2 = nomo de kontinento.
9, 5, 6, 18, 6, 5, 10, 2 = nomo de tago.
12, 3, 6, 1, 14, 2 = stranga mambesto.
21, 5, 13, 1, 7, 2 = organo en la korpo.
17, 15, 4, 3, 2 = nomo de monato.
19, 15, 11, 20, 1, 6, 15, 17, 2 = nomo de lando.
16, 5, 8, 7, 1, 22, 2, 17 = en la ŝranko estas.

Inter la solvintoj ni dislotos 5 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la fino de Aŭgusto.

Atente plenumu la konkursajn regulojn!

Kupono por la 92-a	Kupono por la 93-a	Kupono por la 94-a

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj

ADRESOJ.

BULGARUJO

Ustovo (Paŝmakliisko). — S-ro Josif Taŝev, 21-jara instruisto. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. L, PK, PI, prefere kun f-inoj. Certe respondos.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Vodnany. — S-ro Gabriel Klimeŝ, 18-jara studento. — L, PI, PM, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

DANUJO

Fredericia. — S-ro Manfred Brodersen, maristo, ĉe s-ro Sören Nielsen, Sundegade 3. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Fredericia. — S-ro Erik Halager, instruisto, Kirstinebjerg. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Middelfart. — S-ro Harald C. Jensen, 20-jara oficisto, Behrendtsvej 3. — L, PI, k.ĉ.l. (ne kun Danujo), p.ĉ.t. Fotoj pri fremdaj landoj kaj popoloj. Nepre respondos al ĉiu.

Mors. — Sur la malgranda insulo Mors 75 gekursanoj de la sveda instruisto s-ro Gillis Staberg dez. kor. PK k.ĉ.l. Skribu klare! — Adreso: S-ino M. Jensen, Galdrup Skole, Mors.

FRANCUJO.

Nantes (Loire Inf.) — S-ro Robert Retault, 21-jara kontoristo, 14 rue Mercoeur. — L, PI, k.ĉ.l.

Soissons (Aisne). — S-ro J. Bourniche, eks-instruisto, 8 avenue Voltaire. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

GERMANUJO

Köln-Ehrenfeld. — La loka grupo de Germ. Esp.-Asocio dez. kor. k.ĉ.l. — Skribu al la prez. de la grupo: s-ro Carl Ulmen, Ehrenfeldgürtel 87.

HUNGARUJO

Szeged. — Junaj Esp.-istoj dez. kor., L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos. — Adreso: s-ro Imre Holczbauer, Petöfi Sándor sugárut 39.

JAPANUJO

Jokohama. — S-ro Mizuno Isao, 25-jara, 562 Ĉurumimaĉi, Curumi-ku. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Kanagaŭaken. — S-ro Jasuo Mitake, 20-jara studento, Hatanomaĉi 2 a 617, Nakagun. — L, PK, interŝ. PM, PI, k.ĉ.l. Certe respondos.

Kioto. — S-ro Kijoŝi Itoi, 26-jara belarta amelgluisto, Imakoji-Sitihonmatu-Nisi. — Dez. kor. kun Nederlandanoj.

Otaru. — S-ro Otokiĉi Eguĉi, 26-jara komercisto, Okusaŭa-ĉo II-18. — L, kun apotekistoj kaj galanteriistoj, p.ĉ.t. precipe pri vendkondiĉoj. Nepre respondos.

Takao (Insulo Formoso). — S-ro Kenzo Noda, 23-jara instruisto de japana lingvo, ĉe Mitsui Bussan Kaisha. — L, PI, kun okcidentaj landoj, pri kulturo, popolvivo k.t.p. Deziras viglan korespondadon kun gejunuloj kaj esperas longdaŭran korespondadon. Nepre respondos.

KOLOMBIO (Sud-Ameriko)

Bogotá. — S-ro José-Hernando Garcia-Lozada. — PK, k.ĉ.l., p.ĉ.t., interŝ. PM. Certe respondos unufoje el ĉiu.

LITOVUJO

Suostas (Birzu apskr.) — F-ino B. Steponaviĉiute, instruistino. — L, PI, k.ĉ.l. precipe kun orientaj kaj sudaj landoj. Certe respondos.

NEDERLANDO

Alkmaar. — F-ino J. C. Stoutjesdijk, 22-jara instruistino, Voordam 5. — L, PI (bfl.), k.ĉ.l. precipe malproksimaj, p.ĉ.t. Interŝ. tipajn malgrandajn objektojn. Absolute certe respondos al ĉiu.

Amsterdam-Zuid. — S-ro R. Alessie, 37-jara bankoficisto, Molenbeekstraat 18. — L, k.ĉ.l., p.ĉ.t., PM. Certe respondos.

Apeldoorn. — S-ro H. A. Rolloos, 23-jara oficisto, Arnhemscheweg 46. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Bleyerheide (Limburgo). — S-ro Frans Dekker, 28-jara fraŭlo, amatorfotografisto, Boschveldstraat 30. — L, k.ĉ.l., p.ĉ.t., prefere pri fotografado kaj sporto.

Den Haag. — F-ino Liesje Bos, 22-jara instruistino, Paulus Buysstraat 22. — PK, PI, kun Hungarujo, Svedujo, Sovjetunio, p.ĉ.t., precipe kun instruistinoj.

Den Haag. — S-ro E. v. d. Kooi, 20-jara kontoristo, Daguerrestraat 81. — PK, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Den Haag. — S-ro H. Merkus, oficisto, David Blesstraat 114. — Kun Islando, Persujo, Portugalujo, Egiptujo, Bulgarujo, Finnlando, Sovjetunio kaj Aziaj landoj. Respondos per L nur al PM-kolektantoj. — PI bfl. kaj PK k.ĉ.l.

Dordrecht. — S-ro C. Bax, 36-jara policisto, Weeskinderendijk 51 F. — L, PI, p.ĉ.t., k.ĉ.l. precipe kun Londonanoj, por viziti ilin en la somero. Certe respondos.

Leiden. — F-ino Bep Rijnders, 20-jara, Papengracht 20 A. — L, k.ĉ.l., pri la instruado kaj vivo en modernaj liceoj kaj gimnazioj; pri moderna arta muziko; sporto; pri literaturo kun Norvegujo kaj Svedujo.

Oosterbeek. — F-ino M. S. Rijks, 29-jara oficistino, Benedendorpsweg 162. — PI k.ĉ.l. Certe respondos.

Volendam. — S-ro H. Kroon, 18-jara stenotipisto, Noordeinde 7-216. — L, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

NORVEGUJO

Oklungen. — S-ro Kristian Lunde, instruisto. — Interŝ. PM k.ĉ.l.

POLUJO

Nowa-Wies (G. Slask). — S-ro Teo Tkaczek, 30-jara, Kop. Litandra 1. — Serĉas fidelajn gekorespondantojn. L, PK, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Precipe interŝ. fotojn. Certe kaj tuj respondos.

SOVJET-UNIO

Kiev. — S-ro Ensej Poliŝĉuk, Krasnoarmejska 84/5. — Dez. kor. pri politiko, arto, muziko, teatro, filmo, k.ĉ.l. Kontraŭ teatraj kaj filmaj revuoj donas PM, ĵurnalojn, librojn, muziknotojn, esp-aĵojn.

Nikolajev (Ukraino). — S-ro M. L. Ŝmunis, Puŝkinskaja 35. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Interŝ. PM, PI kaj ilustr. ĵurnalojn. Nepre respondos.

St. Slavjanka Okt. ĵ. d. (Leningrad obl.). — S-ro N. Jachontov, Ovraĵnaja ul. 10. — Dez. kor. k.ĉ.l. pri kino-arto, interŝ. kino-revuojn, portretojn de famaj kino-artistoj k.t.p. Nepre respondos.

SVEDUJO

Borås. — S-ro Sven A. Sköldberg, 37-jara suboficiro, Inf. Reg. 15. — Dez. kor. k.ĉ.l., precipe kun Nederlando kaj Belgujo, pri „tagvivo", „gravaj lokoj, ĉarmaj urboj kaj vilaĝoj". Dez. ekkoni vizitindajn lokojn.

Göteborg. — S-ro Ture Johansson, 18-jara komizo, Svangatan 9. — Dez. kor.

Sala. — S-ro Ernst Grandin, fervojisto, Väsbygatan 10. — PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Växjö. — S-ro Sverker Sjöström, 15-jara studanto, Bäckgatan 18. — PI, PM, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

JAĈJO HOLM KAJ LIAJ AMIKOJ

verkita de W. G. van Hulst

ilustrita de Isings

tradukita de H. C. van Leeuwen

Bele bindita. — Prezo: 2½ ned. guld.

S-ro Jakob, Direktoro de UEA, skribis al ni pri ĉi tiu libro:

„Ni volas esprimi al vi nian gratulon pro la belega eldonaĵo, tute laŭ la solida kaj serioza maniero en via lando."

HAVEBLA EN ĈIU LIBREJO

G. F. Callenbach — Eldonisto

Nijkerk (Nederlando)

„FLORETOJ"

PORINFANAJ RAKONTOJ TRADUKITAJ DE LA „VENDREDA KLUBO" EN WINSCHOTEN (Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj bildoj de C. Jetses

Prezo ..... 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la eldonisto:

J. B. WOLTERS

Groningen — Den Haag — Batavia.

LA VERDA STELO BRILU ĈIE!!!

GRAVA PROPAGANDILO!

Bele ellaborita granda verda stelo el metalo, kun reliefaj randoj kaj literoj. La bildo montras la veran grandecon.

Ĝi devas esti videbla sur ĉiu loko (butikoj, oficejoj, loĝejoj), kie nia lingvo estas uzata, por ke la samideanoj trovu tiujn lokojn kaj por ke la publiko vidu, ke Esperanto vivas.

Fabrikita en tri formoj:

a) Kun *truoj*, por fiksi al muro aŭ pordo,
b) Kun *ringeto*, por pendigi en fenestro,
c) Kun *piedeto*, por starigi en butika fenestro aŭ sur tablo.

Prezo kun sendkosto nur ..... —.35 ned. guld.
La tri diversaj formoj kune nur... 1.— „ „

Ĉe mendo de kvanto granda rabato!

Mendu ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

EKKONU

la **landon de la rozoj**, la Balkanan Svislandon, havigante al vi tuj la Esp-ajn verkojn:

LA BULGARA LANDO KAJ POPOLO, rabatita prezo: 3.— sv. fr.
BULGARA ANTOLOGIO, poezio kaj prozo „ „ 2.50 „ „
ESP.-BULGARA KAJ BULG.-ESP. VORTARO, rabatita prezo: 2.50 sv. fr.

Mendu ĉe la aŭtoro:
S-ro Iv. H. Krestanov, ul. 6 Septemvri N-ro 2, SOFIA (Bulgarujo).

DANKON

diras la **Esperanto-Domo en Arnhem** al la jenaj bonvolaj donacintoj por la biblioteko de la Esperanto-Domo:

1. **Kursanoj** dum la 7—17 Aŭg. 1933: 25.85 guld. — 2. **D-ro Malmanche** en Rueil-Malmaison (Francujo): 200.— fr. fr. — 3. **S-ro E. M. Fasce** el Genovo (Italujo): 3 libroj. — 4. **S-ro A. A. Saharov** en Moskvo: 4 libroj. — 5. **Literatura Mondo (s-ro V. Bleier)** en Budapest: 10 libroj en valoro de 25.— guld. — 6. **S-ro L. Moreau** en Arnhem: 10 libroj.

La biblioteko de la Esperanto-Domo estas je la dispono de la gastoj.

NE LIBERTEMPU SEN VIVO DE ZAMENHOF

Kun portreto de d-ro L. L. Zamenhof

109 paĝoj **De EDMOND PRIVAT**

ENHAVO:

I: La Gentoj en Litva lando. | II: Infano en Bjalistok. | III: Gimnaziano en Varsovio. | IV: Studentaj jaroj. | V: Doktoro Esperanto. - VI: Idealista profeto. | VII: Homarano. | VIII: Kongresaj Paroladoj. | IX: Lingvisto. | X: Verkisto. XI: Etika Pensulo. | XII: Homo ĉe Morto.

Kartonita: RM 2.25; Bindita: RM 3.15.

„La tuta verko ne estas simpla historio de Esperanto ĝis la morto de ĝia kreinto, sed detala priskribo de lia vivo, de liaj ideoj, idealoj kaj klopodoj. Profundan impreson faras la lasta ĉapitro, kiu rakontas pri la morto kaj enterigo de la Majstro."

HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO

De EDMOND PRIVAT

Vol. I: **Deveno kaj komenco: 1887—1900**

Dua eldono. 74 paĝoj. Kartonita RM 1.45. Luksa tolbindaĵo RM 2.25.

Vol. II: **La movado: 1900—1927**

199 paĝoj. Luksa tolbindaĵo RM 5.40.

„La du libroj helpu la novajn generaciojn iom pli funde koni kaj kompreni kiel semiĝis kaj kreskis el tero unu el la plej nurindaj greneroj de l'homa penso."

Mendu ĉe via libristo aŭ senpere ĉe la eldonejo:

FERDINAND HIRT & SOHN, Esperanto-Fako, LEIPZIG C 1
Salomonstrasse 15 (Poŝtĉekkonto: Leipzig 52372)

DU GAJAJ VESPEROJ

kun nia fama samideano

Raymond Schwartz

el Parizo

(aŭtoro de la konataj bonhumoraj verkoj, redaktoro de „La Pirato")

kaj lia edzino:

Marga Rineta

(konata el la Esp. kabaredo „Verda Kato" fondita de R. Schwartz).

Raymond Schwartz

1. En HAGO:

La 18-an de Majo, vendrede vespere je la 8-a horo, en la salono de „WEBO" (Wagenstraat 4) aranĝata de „Fine Ĝi Venkos".

Programo: „LA FACILA MUZO EN ESPERANTO", prezentota de Raymond Schwartz. — Kantoj de Marga Rineta. — „La rompita spegulo", teatraĵo prezentota de f-ino A. M. Habich, s-ro L. J. Burger kaj s-ro F. Weeke, anoj de „F.G.V."

Enirkartoj (prezo 55 cendoj) estas riceveblaj ĉe f-ino J. E. Rikkers (Ant. de Haenstr. 122), ĉe la Cseh-Instituto kaj vespere ĉe la salono de WEBO.

2. En ARNHEM:

La 19-an de Majo, sabate vespere je ja 8-a horo festvespero en la Esperanto-Domo.

Programo: „LA FACILA MUZO EN ESPERANTO" prezentota de Raymond Schwartz. — Kantoj de Marga Rineta. — Tombolo. — Amuzoj. — Ludoj. — Danco.

Biletoj (prezo 40 cendoj) mendeblaj ĉe la Esperanto-Domo. Telefono 26060.

Esperanto-Presejo PIER WESTERBAAN, Vaillantlaan 523—529, Den Haag (Nederlando).

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 6 (30) ★ Junio
1934

Filmo kaj Esperanto.

La norvega gazetaro fiere komunikas, ke oni preparas la filmadon de „Peer Gynt", mondkonata verko de la granda norvega poeto Henriko Ibsen. Granda filmentrepreno komencos la enludadon en la monato Julio, kaj la filmo estos la plej granda kaj multekosta filmo ĝis nun produktita en Eŭropo. — Vere, niaj norvegaj homfratoj rajtas esti fieraj.

Sed en la norvega publiko aŭdiĝas ankaŭ malkontentaj voĉoj. Kial? Jen: oni ludos la filmon en la lingvoj angla, franca, germana kaj sveda, kaj al Norvegujo oni liveros la svedan eldonon. Tio ofendas la nacian senton de la norvega popolo. La norvega ĵurnalo „Dagbladet" energie esprimas sian malaprobon kaj deziras, ke la norvegaj kino-teatroj ne prezentu la Peer-Gynt-filmon en fremda lingvo. Ĝi opinias, ke estas malhonorigo por la norvegoj, se la ĉefverkon de la plej granda norvega poeto oni prezentas en fremda lingvo en la patrujo de la aŭtoro mem.

„Esperantobladet", la organo de niaj norvegaj samideanoj, detale klarigas la aferon kaj kun ekscitiĝo skribas:

„Kia hontigo!. Kia humiligo! Ĉu ni estas tiom maldignaj? Ĉu ni estas subnormala nacio? En Germanujo oni postulas germane parolantan filmon, en Anglujo anglan kaj tiel plu. Sed ĉe ni, la posedantoj de Ibsen kaj Peer Gynt, la lingvo sonos en la lingvo de fremda nacio! Ĉu estas en tio ia racio?"

La gazeto „Dagbladet" opinias, ke per la bojkoto la afero estas solvita. Sed la redaktoro de „Esperantobladet" inteligente faras pluan paŝon. Li konstatas, ke la novan filmon oni ne povos enludi ankaŭ en la norvega lingvo, ĉar tiam ĝi fariĝus ankoraŭ pli multekosta kaj la malgranda norvega popolo ne povus ĝin pagi. Tial li proponas, ke la filmo estu farata en unu sola lingvo. Tiu sola lingvo devus esti nature la norvega lingvo, sed la aliaj landoj ne akceptus tian filmon. Kaj se oni elektus iun pli vaste parolatan lingvon, ekzemple la anglan, la problemo tamen ne estus solvita, sed nur transŝovita, ĉar tiam aliaj landoj rifuzus la filmon. Restas do unu sola solvo: paroligi la mond-filmojn en la neŭtrala mond-lingvo Esperanto. Tiam neniu nacio estos hontigata kaj maljuste traktata.

La argumentado de „Esperantobladet" estas tute korekta. Kaj ni firme esperas, ke la mondo iam alvenos al tiu klara kaj racia solvo. Sed bedaŭrinde ni ne povas multon atendi de la „sana racio" de la homaro, ĉar ĝi terure lame funkcias. Tamen ankaŭ aliaj, pli efikaj faktoroj laboras por Esperanto.

Dum la lastaj tempoj potence kreskadas la nacia sento. Ĝi kondukas al konfliktoj kaj tra ili al la ekvido, ke sur la lingva kampo regas anarĥio kaj maljusteco. Ni forte kredas, ke la nacia konscio mem baldaŭ postulos la alprenon de la neŭtrala internacia lingvo, por krei justecon kaj egalecon en la internacia vivo. Por tio faris Zamenhof Esperanton!

La Praktiko
GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 2.50 nederl. guldenoj, por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Unu numero kostas -.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., ½ p. 45.-, ¼ p. 25.-, ⅛ p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE LA KONKURSOJ

81-a konkurso. En la 23-a numero (Novembro 1933) de La Praktiko ni demandis nian legantaron pri la kaŭzo de la furiozo de sinjoro Johano Brilkap. Envenis entute 72 respondoj, inter kiuj multaj interesaj kaj spritaj. La konkursa komitato havis tre malfacilan taskon. El la multaj bonaj solvoj al kiuj doni la promesitajn sep premiojn? Fine la komitato tiel solvis la problemon, ke ĝi unue forjetis tiujn solvojn, kiuj pro nekonformeco al la konkursaj reguloj kaj kondiĉoj aŭ pro lingvaj eraroj ne meritis esti konsiderataj, kaj el la restintaj 53 bonaj solvoj per lotado elektis la sep premiotajn. Ĉi tie ni publikigas la nomojn de la gajnintoj kaj iliajn solvojn: S-ro **L. J. Burger** en Hago *(Brilkap estas poŝ-ŝtelisto kaj krias: „Tiom da peno por lada horloĝo, kiu eĉ ne funkcias!").* — S-ro **A. Humez** en Douai, Francujo *(„Malbenita horloĝo! Kiam vi montros la horon de la fina venko de Esperanto?").* — S-ro **J. Luze** en Ofenbach, Aŭstrio *(„Malbenita tempo! Mi tro malfrue naskiĝis por malkovri Amerikon, kaj ankaŭ Esperanton jam kreis alia!").* — F-ino **M. Molnár** en Szeged, Hungarujo *(„Ĝi ne estas horloĝo, sed terpomo!").* — S-ro **J. Ijben** en Hengelo-O, Nederlando *(Ĉar pro la malbona horloĝo li dufoje malfruis vagonaron por viziti Esperanto-kongreson.).* — F-ino **M. C. J. van der Graaf** en Dordrecht, Nederlando. Jen ŝia solvo:

Ĉiam dum la Ĉe-kurshoroj
Ŝajne tro rapidis ĝi.
Tial mi je ĝi koleras
Kaj ĝin nun frakasos mi.

— S-ro **T. Ujlaky Nagy** en Kaposvár, Hungarujo. Jen lia solvo:

Sinjor' Brilkap volis havi horloĝvitron nerompeblan.
Horloĝmajstro montris al li tiaspecan tre konvenan.
Sed li tamen malkonfidas, malgraŭ ke ĝi estas rava,
Kaj li jene konvinkiĝas, ĉu la majstro estis prava?

Ni publikigas ĉi tie ankaŭ kelkajn nepremiitajn, sed interesajn solvojn: *Li jus legis sur la fermilo de la horloĝo: „Antaŭ la uzo skuu ĝin!"* (S-ro G. Finkel en St.-Gallen, Svisujo). — *„En pruntejo ĝi ne valoras tiom, kiom la abono de La Praktiko kostas."* (S-ro P. Anton en Coenen, Germanujo.) — *Sinjoro Brilkap sentas sin feliĉa kaj tial ne bezonas horloĝon.* (S-ro B. Giedra en Ŝiauliai, Litovujo.) — *„Saĝuloj ne bezonas horloĝon."* (S-ro T. Corthals en Lede, Belgujo.) — *Ĉar li malfruigis de la Esperanta kurso.* (S-ro L. Maas en Rotterdam, Nederlando.) — *Ĉar li estas ebria.* (S-ro T. Kuipers en Bennekom, Nederlando.) — *Drinkejmastro, al kiu s-ro Monmank garantidonis senvaloran horloĝon: „Prenu diablo lin kaj lian horloĝon!"* (S-ro K. Meiers en Usma, Latvujo.) — *Ĉar li finkomprenis, ke Esperanto estas pli preciza aĵo, ol la horloĝo.* (S-ro A. Gerasimov en Filipovo, Bulgarujo.) — *Ĉar ĝi estas tro granda por enmeti ĝin en la poŝon.* (S-ro H. Rapaille en Fourmies,Francujo.) — *Brilkap atendis riĉan heredaĵon, sed ricevis nur malbonan horloĝon.* (S-ro J. C. Balke Jr. en Rotterdam, Nederlando.) — Ni kore gratulas al ĉiuj solvintoj.

82-a konkurso. La redakcio ricevis 113 solvojn, el kiuj 4 ne povas partopreni en la konkurso, ĉar ili ne estas konformaj al la konkursaj reguloj. La ĝusta solvo, la nomo de la grava dokumento, estas: **DEKLARACIO PRI ESPERANTISMO.** La 25 vortoj aparte estas: *Kadro, Greno, Ankro, Pilko, Flamo, Forko, Krano, Nacio, Briko, Broso, Pipro, Ĉerko, Grilo, Kreto, Masto, Kapro, Kremo, Larmo, Glavo, Lango, Vitro, Spiko, Vosto, Tempo, Kropo.* — La konkursa komitato dislotis la 8 premiojn kaj ilin ricevis la jenaj solvintoj: S-ro **L. Bechtold** en Lazne-Belohrad (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro **Cheminais** en Hautmont (Francujo). — S-ro **K. Dokter** en Groningen (Nederlando). — S-ro **G. v. d. Heijden** en Breda (Nederlando). — S-ro **S. S. de Jong Dzn.** en Huizum (Nederlando). — S-ro **O. Lyderich** en Skaarup (Danujo). — S-ro **H. Pitta** en Casanova (Brazilo). — S-ro **J. Soyeur** en Seraing (Belgujo).

ATENTU!

Se vi volas sendi monon al La Praktiko, bonvolu observi la sekvantajn:

La monon oni povas sendi per *poŝtĉekkonto* (Wien A-156933, Praha 500362, Kopenhago 34941, Berlin 129527, Budapest 13201, Zagreb 41345, Riga 4870, Den Haag 162626, Warszawa 190203, Stockholm 74126, Bern III. 6761), *per poŝtmandato*, per *bankĉeko* aŭ per *papermono* en letero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj de la sube nomitaj landoj, kalkulante la valoron laŭ la suba tabelo:

1.— ned. guldeno valoras en:

Aŭstrio 3.70 ŝil., **Belgujo** 15 fr., **Britujo** 2 ŝil. 8 p., **Bulgarujo** 58 lev., **Ĉeĥoslovakujo** 17 kr., **Danujo** 3 kr., **Estonio** 2.60 kr., **Francujo** 10.35 fr., **Germanujo** 1.70 m., **Hispanujo** 5 pes., **Hungarujo** 3.30 p., **Italujo** 8 lir., **Jugoslavio** 30 din., **Latvujo** 2.20 l., **Norvegujo** 2.70 kr., **Polujo** 3.70 zl., **Rumanujo** 75 l., **Svedujo** 2.60 kr., **Svisujo** 2.10 fr.

Pro la freneza dancado de la mon-valoroj ĉi tiu tabelo validas nur ĝis la apero de nia sekvanta numero.

La sendo de poŝtmarkoj en letero okazas je la risko de la sendanto. Tial estas konsilinde uzi netravideblan koverton kaj ĉe pli granda sumo registrigi la leteron.

LA MISVOJO.

Himno de la pesimistoj.

Dediĉita al la homoj, kiuj ĉiam plendas, sed nenion faras.

Post densa mallumo ekzistas abismo,
Al kiu la lingvo rapidas;
Ni semas malfidon per simpla sofismo,
Kaj certan disfalon ni vidas.
Kaj nin ne konvinkos eĉ pruvoj po miloj,
Aŭ klaraj rezonoj, aŭ bonaj konsiloj,
Ĉar ĉiel malhelpi jam de la komenco
Ni celas kun firma intenco.

Nur fuŝa, malbela, sen ia sukceso,
Ni vidas nepropran laboron.
Eĉ guto acida, falante sen ĉeso,
Doloras plej gajan la koron.
La moko, la rido, la indiferento,
Jen estas la iloj, en ĉiu momento,
Per kiuj ni provas, verŝante sarkasmon,
Velkigi la entuziasmon.

Ni plendas kaj plendas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj pasintaj pensante;
Cent horoj perdiĝas, mil horoj perdiĝas,
Ni plendas kaj plendas konstante.
„Laboru kaj fidu!" La homoj nin petas,
„Neniam!" en ĥoro ni krie ripetas,
Obstine gruntante — neniu nin dankos,
Sed tamen la plendoj ne mankos.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkintajn foliojn disĵetas,
Ni helpos la venton, kaj refortigitaj,
Ni plenan disfalon profetas.
Eĉ kiam la krizo jam estas pasinta,
Kaj fido en koron denove veninta,
Obstine ni tedas per malpropagando
La homojn tra tuta la lando.

Fernando Redondo (Hispanujo)

OPINIOJ PRI „LA PRAKTIKO".

„Mi gratulas al vi pro via instrua gazeto. En ĉiu monato mi ĝin avide atendas. Ĝia simpla stilo estas ja inspiro (ne ruĝiĝu, redaktoro!). Sed mi vere kredas, ke ĉiu numero estas ja liliputa ‚Fundamento' de nia lingvo." (S-ro J. H. en B., Irlando.)

„Kun viva ĝojo mi restas via abonanto. Ĉiu numero estas por mi fonto de ĝojo! Precipe ĉar mi havas gravan malsanon. La Praktiko helpas forgesi ĝin." (F-ino D. S. en U., Svislando.)

„Mi abonas vian treege instruan kaj amuzan gazeton. Mi varbis kiel abonanton la lokan klerigan asocion. Ĝia estraro treege interesiĝas pri La Praktiko pro ĝia bonega enhavo." (S-ro G. H. en M., Svedujo.)

„Akceptu mian koran dankon kaj la esprimon de mia sincera kontenteco je La Praktiko, kiu estas tiel bele kaj interese redaktata." (S-ro B. G. en Ŝ., Litovujo.)

„Sen ia ajn komplimento mi devas diri, ke nuntempe La Praktiko estas la plej valora Esperanta gazeto. Ĝia stilo kaj spirito estas modelaj, la enhavo tre riĉa kaj interesa por ĉiu. Ion pli bonan oni ne povas jam plu prezenti al si. La gazeto meritas, ke ĝin nepre abonu ĉiu Esperantisto. Estas dezirinde, ke La Praktiko aperu dufoje en la monato; la duoblan sumon oni volonte pagos por ĝi." (S-ro K. M. en U., Latvujo.)

„La Praktiko estas ĝoje atendata ĉiumonate kaj kontentigas ĉiujn abonantojn en nia urbo. Ĝi estas treege ŝatata kaj plaĉa perfektigilo en la vera senco de la vorto." (S-ro J. M. en L., Aŭstrio.)

„La klasika Esperanto-lingvo de La Praktiko tre plaĉas al mi. Tial mi decidis aboni ĝin." — (S-ro E. R. en S., Francujo.)

„Mi esprimas koran dankon pro la plibeligita ekstero de nia gazeto. Pri la enhavo mi ne diras eĉ unu vorton, ĉar ĝi estas unuaranga." — (S-ro P. P. en U., Latvujo.)

El la historio de la internacia lingvo.

Jam de la plej malnovaj tempoj la homoj ĉiam sentis, ke estas malfeliĉa afero havi en la mondo diversajn lingvojn. Ankaŭ la Biblio diras, ke la diverseco de la lingvoj estas puno de Dio. Kaj la antikvaj poetoj, kantante pri la feliĉa „ora epoko" ĉiam diras, ke dum tiu epoko la tuta homaro havis unu lingvon.

En la malnovaj tempoj kleraj homoj revis jam pri universala lingvo kaj en la pli novaj epokoj grandaj filozofoj, kiel ekz-e *Bacon, Comenius, Descartes, Leibniz,* klopodis verki sistemojn de universala lingvo aŭ universala skribo.

Ni konas entute 311 projektojn de mondlingvo, faritajn ĝis 1929.

La projektoj estas diversaj: 1) Bildskriboj kaj ciferaj lingvoj, 2) Lingvoj tute eltrovitaj, 3) Lingvoj faritaj sur la bazo de la naciaj lingvoj.

Al la *unua grupo* apartenas tiuj projektoj, kiuj ne proponis veran lingvon paroleblan, sed *nur skribon* similan al la ĉina skribo, kie ĉiu vorto havas apartan bildon aŭ signon. Tiujn signojn ĉiu popolo legus en sia propra lingvo. Same kiel hodiaŭ la samajn arabajn ciferojn 1, 2, 3 k. t. p. ĉiu popolo legas alimaniere en sia propra lingvo.

Ekzistas tiaj projektoj, en kiuj ĉiu vorto havas numeron kaj specialaj vortaroj por diversaj lingvoj montras la signifon. Tiel ekzemple se mi trovas en mia vortlibro, ke la cifero 1 signifas: „la", 21 = blanka, 22 = nigra, 143 = manĝas, 527 = kato kaj 863 = lakto, tiam mi facile komprenas la frazon: „1, 22, 527, 143, 21, 863".

Al la *dua grupo* apartenas *paroleblaj lingvoj,* kies vortoj ne similas al la vortoj de la naturaj lingvoj, sed la aŭtoro *arbitre* faris ilin per la kombinado de la literoj. Ni montras ĉi tie la plej interesan lingvon de tiu grupo: *Solresol,* kies aŭtoro estis la franco J. F. Sudre (1787—1862).

La bazo de la lingvo *Solresol* estas la nomoj de la muziknotoj: *do, re, mi, fa, sol, la, si.* Ĉiuj vortoj estas kunmetitaj el ĉi tiuj sep silaboj. Jen kelkaj ekzemploj:

si = jes	*dore* = mi	*redo* = mia
do = ne	*domi* = vi	*remi* = via
re = kaj	*dofa* = li	*refa* = lia

doremi = tago	*domisol* = Dio
dorefa = semajno	*solmido* = diablo
doresol = monato	*sollasi* = supreniri
dorela = jaro	*silasol* = malsupreniri

La lingvo Solresol estis tre malperfekta kaj tute ne taŭga por uzado, sed ĝia ideo estis tre interesa kaj sprita. Ĉar la vortojn de Solresol oni povas ne nur skribi kaj elparoli, sed ankaŭ kanti aŭ fajfi aŭ per muzik-instrumento ludi. Plue oni povas la vortojn skribi sur liniojn kiel muziknotojn aŭ anstataŭi ilin per ciferoj, ekz-e *doresol* = *125.* Oni povas esprimi la vortojn ankaŭ per sep diversaj koloroj kaj mansignoj. Solresol havis entute 11.732 vortojn (7 unusilabajn, 49 du-, 336 tri-, 2268 kvar- kaj 9072 kvin-silabajn).

Ĉar la eltrovitaj lingvoj estis tro neperfektaj kaj iliaj vortoj preskaŭ ne teneblaj en la memoro, oni komencis kompreni, ke la internacia lingvo devas esti simila al la ekzistantaj kaj uzataj lingvoj. Laŭ tiu principo oni faris la lingvojn de la *tria grupo* (ekz-e: Langue bleue, Latino sine flexione, Langue nouvelle, Novilatin, Pasilingua, Idiom neutral, *Esperanto* k.a.).

Inter la dua kaj tria grupoj kiel miksaĵo staras la lingvo *Volapük,* la plej konata kaj sukcesa lingvo antaŭ Esperanto. Ĝia aŭtoro estis la katolika pastro J. M. Schleyer (1831—1912). La vorto Volapük venas el la angla lingvo (*world* = mondo kaj *speak* = lingvo).

La gramatiko de Volapük estis tre simpla kaj facila, kaj ankaŭ vortojn oni facile faris per sufiksoj. Sed ĝi ne estis sufiĉe natura. Ekzemple la nomoj de la mondpartoj en Volapük: *Yulop* = Eŭropo, *Silop* = Azio, *Fikop* = Afriko, *Melop* = Ameriko kaj *Talop* = Aŭstralio. En ĉi tiuj vortoj la lasta silabo „*op*" estas la sufikso de la mondpartoj. La unua silabo estas prenita el la originala vorto. En Volapük oni tre malofte renkontas la literon „r", ĉar la ĉinoj ne povas ĝin facile elparoli. Anstataŭ „r" Volapük uzas plej ofte la literon „l". Pro tio la nomo de Ameriko en Volapük estas ne Merop, sed Melop.

Jen la teksto de la preĝo „Patro nia" en la lingvo Volapük:

„O Fat obas, kel binol in süls, paisaludomöz nem ola! Kömonöd monargän ola! Jenomöz vil olik, äs in sül, i su tal! Bodi obsik vädeliki givolös obes adelo! E pardolös obes debis obsik, äs id obs aipardobs debeles obas. E no obis nindukolös in tentadi; sod aidalivolös obis de bad. Jenosöd!

Post la malsukceso de Volapük aperis la lingvo *Esperanto,* kiel ideala mondlingvo en komparo kun ĉiuj aliaj projektoj. Post Esperanto oni faris ankoraŭ kelkajn mondlingvajn sistemojn (ekz-e Ido, Interlingua, Occidental, Novial), sed la praktiko montras, ke per Esperanto la mondlingva problemo por nia epoko estas solvita.

LERNU PER LA ERAROJ!

En ĉi tiu rubriko ni citas erarajn frazojn, kiujn ni trovis en diversaj libroj, gazetoj kaj aliaj presaĵoj. Ni deziras fari per tio utilan servon al niaj legantoj kaj al niaj — verkistoj.

Alkuris du hundoj kun svingantaj vostoj. — Ĉar „svingi" estas transitiva verbo, oni devas diri: „kun svingataj vostoj". La vosto ne povas svingi, sed la hundo svingas sian voston. Preferinda esprimo estas: „svingante la voston".

Mi devis la leterojn ricevpeti. — Kion signifas la vorto „ricevpeti"? En romanoj oni devas uzi nur facile kompreneblajn esprimojn.

Memoru min pri tio antaŭ la tagmanĝo. — Ĉi tie devas esti: „memorigu".

La polico telegrafis, ke mia aŭtomobilo staras negardita antaŭ la stacidomo. — En ĉi tiu frazo la ĝusta vorto estas: „negardata".

La garaĝisto veturis la aŭtomobilon ĉi tien. — La verbo „veturi" ne estas transitiva; tial oni devas diri: „veturigis".

La ŝoforo servis ĉe nobelulo. — La ĝusta vorto estas: „nobelo". Ĉi tiu vorto signifas personon kaj tial oni ne bezonas aldoni la sufikson „ul". Atentu pri la diferenco inter la du vortoj: „nobelo" kaj „nobla".

La kurtenoj estis malpuraj, sed la barono ne tion vidis. — La vortordo estas malbona. Devas esti: „... sed la barono ne vidis tion". En ĉi tiu frazo la vorto „ne" apartenas al la verbo „vidis" kaj tial ĝi devas stari antaŭ la verbo.

Ni nur atentos antaŭpagotajn mendojn. — En ĉi tiu frazo estas du eraroj: 1. La ĝusta vortordo estas: „ni atentos nur ..." — 2. La ĝusta vorto estas: „antaŭpagitajn".

Ni sendos kvitancon, se la unua libro ne jam aperis. — La ĝusta formo estas: „se la unua libro ankoraŭ ne aperis".

Dum tri monatoj mi instruis vin la tablo-servadon. — Tian dufojan akuzativon en unu frazo oni devas eviti. La bonaj formoj de ĉi tiu frazo estas: „Mi instruis vin pri la servado" aŭ „Mi instruis al vi la servadon".

Komunaj ekskursoj surteraj okazas de el kelkaj albordiĝhavenoj. — En ĉi tiu frazo sufiĉas unu prepozicio, aŭ „de", aŭ „el", ĉar la vorto „el" jam entenas la ideon de „de" (el = de en).

Nia scio limiĝas al nia propra lando, ĉar ni ne povas penetri trans lingvaj bariloj. — La fino de ĉi tiu frazo estas malbona. La bonaj formoj: „tra la lingvaj bariloj" aŭ „trans la lingvajn barilojn".

Benata estu la granda spirito, kiu ebligis nin ekposedi la tutan mondon. — Korekte: „kiu ebligis al ni ekposedi" aŭ „kiu ebligis, ke ni ekposedu".

(Daŭrigota)

AL LA VENKO !

PETO. Kara leganto! Bonvolu ĉi tiujn gravajn informojn traduki en vian nacian lingvon kaj transdoni ilin al la redakcioj de la ĵurnaloj en via urbo, por publikigo. Per tio vi faras por Esperanto tre valoran propagandan servon.

240. **Zamenhof-strato en Francujo.** — En la franca urbo Saint-Raphaël (Var) la 14-an de Aprilo oni inaŭguris la Zamenhof-straton, okaze de la kongreso de la Provenca Esperanto-Federacio.

241. **Esperanto en la anglaj lernejoj.** — En Anglujo nuntempe Esperanto estas instruata en 27 lernejoj, parte devige, parte fakultative. El tiuj lernejoj 14 estas popollernejoj kaj 13 mezlernejoj. La nombro de la lernantoj estas 1006 kaj ili havas la aĝon de 10 ĝis 14 jaroj.

242. **Internacia konferenco por Esperanto.** — Dum la tagoj 20—24 de Majo kunsidis en Vieno (Aŭstrio) internacia konferenco por pritrakti diversajn demandojn rilate al la instruado kaj praktika aplikado de la internacia lingvo Esperanto. En la konferenco partoprenis pli ol 200 personoj, inter kiuj pluraj reprezentantoj de registaroj, gravaj organizaĵoj kaj entreprenoj. La kunsidoj de la konferenco okazis en la palaco de la aŭstria parlamento. En la konferenco partoprenis ankaŭ la aŭstria kanceliero D-ro E. Dollfuss kaj pluraj ministroj. Dum la diskutadoj de la konferenco la lingvo Esperanto estis uzata kiel sola traduk-lingvo.

243. **Esperanto-lingva turisma prospekto pri Slovenio.** — La jugoslava vojaĝoficejo „Putnik" en Ljubljana ĵus eldonis belan ilustritan faldprospekton pri Slovenio, parto de la reĝlando Jugoslavio, en la internacia lingvo Esperanto.

244. **Esperanto-lingva turisma prospekto pri Debrecen kaj Hortobágy.** — La estraro de la fama hungara universitata urbo Debrecen ĵus eldonis en Esperanto-lingvo bele ilustritan faldprospekton pri la urbo mem kaj pri la apuda stepo Hortobágy, mondfama pro la miraĝo. *(La prospekto estas senpage ricevebla ĉe: Fremdultrafika Oficejo, strato Ferenc József 28, Debrecen, Hungarujo.)*

245. **Nova Zamenhof-strato.** — La urbestraro de Innsbruck (Aŭstrio) decidis nomi unu straton de la urbo laŭ D-ro Zamenhof, la aŭtoro de la lingvo Esperanto.

246. **Nederlandaj fervojistoj kaj tramistoj por Esperanto.** — La grupo Amsterdam de la Holanda Fervojista kaj Tramista Sindikato unuanime decidis proponi al la kongreso de la sindikato, ke ĝi publikigu en la sindikata organo specialan Esperanto-lingvan rubrikon.

247. **Franca urbo por Esperanto.** — La estraro de la urbo Auxerre (Francujo) en kunsido de la 4-a de Decembro 1933 unuanime esprimis la deziron, ke la lingvo Esperanto estu instruata en la lernejoj.

248. **La nederlanda poŝtdirekcio por Esperanto.** — La ĝenerala direktoro de la nederlanda P.T.T. la 16-an de Majo sub n-ro 306 decidis, ke tiuj P.T.T.-geoficistoj, kiuj deziras partopreni en la nunjara universala Esperanto-kongreso, okazonta en Stockholm la 4—11 de Aŭgusto, ricevos por tiu celo ordinaran libertempon.

249. **Grandsukcesa Esperanto-kurso por fremdul-gvidistoj.** — La Esperanto-kurso en Kopenhago, organizita por grupo de fremdul-gvidistoj deĵorantaj ĉe turismaj oficejoj, finiĝis kun tre granda sukceso. La kursanoj dum 10-leciona instruado tiel bone progresis, ke oni povis aranĝi en la fino de la kurso gravan konkurson: la kursanoj faris paroladojn en Esperanto pri la vidindaĵoj de Kopenhago. Ĉiu persono parolis dum 10 minutoj. La bonega rezulto tiel impresis la estraron de la Dana Turista Unuiĝo, ke ĝi intencas enkonduki oficialajn Esperanto-ekzamenojn por fremdul-gvidistoj. Estas interese, ke el tiuj kursanoj antaŭ la kurso neniu sciis eĉ unu vorton Esperante.

250. **Esperanto-kurso en la ĉefa ĵurnalo de Hindoĉinujo.** — La plej grava ĵurnalo de Hindoĉinujo, *„La Patrie Annamite"*, aperanta en franca lingvo en Hanoi, ĵus komencis la publikigadon de ampleksa Esperanto-kurso. La kurso konsistas el 22 lecionoj. *(La adreso de la gazeto: 44 rue des Paniers, Hanoi)*

251. **Esperanto en la radio dum 1933.** — Laŭ ĵus publikigita statistiko dum la jaro 1933 okazis entute 1774 Esperanto-lingvaj radio-disaŭdigoj, el kiuj 1311 estis paroladoj, 54 program-anoncadoj kaj 409 Esperanto-kursoj. La cititaj disaŭdigoj okazis en 14 landoj per 83 diversaj radio-stacioj.

252. **La foiro de Brugge uzas Esperanton.** — La direkcio de la 2-a Internacia Komerca kaj Industria Foiro en Brugge (Belgujo) starigis specialan Esperanto-fakon por uzi la internacian lingvon en la korespondado kaj propagando de la foiro. Dum la foiro, okazonta de la 11-a ĝis la 20-a de Aŭgusto, funkcios Esperanto-stando sur la foira tereno. *(La adreso de la foira sekretariejo: Hoogstraat 9, Brugge, Belgujo.)*

253. **Turisma prospekto pri Danlando.** — La Dana Turisma Unuiĝo (Turistforeningen for Danmark) ĵus eldonis en Esperanto-lingvo arte ilustritan faldprospekton pri Danujo, kun ellaboritaj vojaĝprogramoj. *(La prospekto estas senpage ricevebla. Adreso: Turistforeningen for Danmark, Vestre Boulevard 18, Kopenhago.)*

254. **La specimenfoiro de Rio de Janeiro uzas Esperanton.** — La ĝenerala direkcio de la Sepa Internacia Specimenfoiro de la urbo Rio de Janeiro (Brazilo), okazonta dum la tempo 12. Aŭg.—15. Nov. nunjara, ĵus eldonis en la lingvo Esperanto belegan multkoloran faldprospekton kun 36 ilustraĵoj kaj la plano de la foira tereno. *(Ekzempleron oni povas ricevi kontraŭ unu respondkupono. Adreso: Sekretariejo de la Internacia Foiro, Palacio das Feiras, Avenida das Naçoes, Rio de Janeiro.)*

255. **Atlaso pri mono kaj horo en Esperanto.** — La Komerca Banko de Basel, filio en Ĝenevo (Svislando), ĵus eldonis en la Esperanta lingvo praktikan atlaseton pri la tempkalkulo kaj monsistemoj en la landoj de Eŭropo. *(La atlaso estas donace sendata al petantoj.)*

256. **Esperanto-lingva var-marko.** — En Chicago (Usono) oni fabrikas ferajn fornojn, kies komerca marko estas la Esperanto-lingva vorto *„Usona"*.

Kien?

Al Arnhem

por libertempi „ESPERANTE"!

la mondo ridas

Dankema servistino.

— Fraŭlino Grete, ni pagos al vi nur dudek markojn monate, sed kompense ni traktos vin kiel nian infanon.

— Dankon, sinjorino, sed tiam mi ne povas resti ĉe vi. Mi ne volas, ke oni traktu min kiel infanon. Mi volas havi ĉiusemajne almenaŭ du liberajn elirojn.

(Fliegende Blätter)

En vendejo.

Sinjorino: Kio estas la diferenco inter tiuj du ŝtofoj, la tri-guldena kaj la kvar-guldena? Ili ŝajnas esti tute egalaj!

Komencanta vendistino: Ho, sinjorino, la afero estas tre simpla! Ĉe la kvar-guldena ni gajnas unu guldenon pli.

Bona diplomato.

— Ĉu vi fumas?
— Ne.
— Ĉu vi trinkas?
— Ne.
— Ĉu vi kartludas?
— Ne.
— Ĉu vi kutimas iri en teatron kaj kinon?
— Ne.
— Bonege! Tiam vi povas pruntedoni al mi cent kronojn.

(Söndagsnisse)

Distrita homo.

— Mi vidis jam multajn distritajn homojn en mia vivo, sed ankoraŭ neniam tian, kia estas tiu malfeliĉa kasisto Majer.

— Kion li faris?

— Imagu nur! Li forkuris al Ameriko, sed forgesis kunpreni la kason!

(Het Leven)

Kontenteco.

— Kiu homo estas pli kontenta, ĉu tiu, kiu posedas unu milionon da frankoj, aŭ tiu, kiu havas dek-du infanojn?

— ? ?

— Sendube la lasta; ĉar tiu, kiu posedas la milionon, deziras ankoraŭ pli, sed tiu, kiu havas dek-du infanojn, havas tute sufiĉe.

Vidpunktoj.

— Estas terure, ke en la mondo oni rakontas tiel multajn mensogojn!

— Jes, sed estus multe pli terure, se ĉio, kion oni rakontas, estus vera!

(Berlingske Tidende)

Naturscienco.

Instruisto: Ĉu la fiŝoj kreskas rapide aŭ malrapide?

Joĉjo: Rapide! Ĉar mia patro kaptis unu antaŭ nelonge kaj ĉiam, kiam li parolas pri ĝi, ĝi estas dek centimetrojn pli longa.

En la juĝejo.

— Kiajn pensojn vi havis, kiam vi ŝtelis tiun pelton?

— Sinjoro juĝisto, tre simple: mi pensis: se oni ne kaptos min, mi havos varman surtuton kaj se oni kaptos min, mi havos varman loĝejon.

Bona atesto.

Sinjorino: Kio? Ĉu vi deziras ateston? Ĝi ne estos rekomendo por vi!

Servistino: Ho, skribu nur, ke mi restis dum tri semajnoj ĉe vi; tio estos jam sufiĉa rekomendo.

(Het Leven)



Patra troigo.

— Ĉu vi vidas, Peĉjo? Ĝi estas pro la kaĉo kun lakto!

(Tit-Bits)

La krizo.

— En la pasinta monato tute griziĝis miaj haroj.

— Jes, kompreneble! Tiom da zorgoj nuntempe...

— Jes, jes... Mi ne havas jam eĉ por aĉeti la kutiman harkolorigilon.

(Illustration)

Vidpunkto.

— Kia afero! Tiel danĝera voj-kurbiĝo kaj nenia signalo!

— Pardonu sinjoro, ni starigis ĉi tie grandan, de malproksime videblan signalon, sed ĉar dum du jaroj ne okazis eĉ unu akcidento, ni transportis la signalon al alia loko.

(Answers)

Ŝanĝiĝo.

— Bonan tagon, sinjoro Braŭn! Kiel bone vi aspektas! ... Dum la du jaroj, kiujn vi pasigis eksterlande, vi tre ŝanĝiĝis!

— Pardonu, sinjoro, vi eraras. Mi ne estas Braŭn, sed Smit!

— Jen, mi prave diris, ke vi tre ŝanĝiĝis ... Eĉ via nomo ŝanĝiĝis.

(Vårt Hem)

La honto.

— Ĉu vi ne hontas fari falsan monon?

— Ankaŭ mi preferus fari veran monon, sinjoro juĝisto, sed mi ne povas.

La atesto.

Edzino de kuracisto al la maldungita malbona servistino: Vi povas kompreni, Manjo, ke post la okazintaĵoj mi ne povas doni al vi bonan ateston.

Servistino: Tiam bonvolu skribigi ĝin per la sinjoro doktoro, ĉar lian skribon neniu povos legi.

(Ulk)

Simboloj.

— Diru, paĉjo, kio estas la simbolo de la paco?

— La oliva branĉo, mia fileto.

— Kaj de la milito?

— La mirto!

(Lustige Blätter)

Kiu ridos laste?

Edzo: Karulino, ne koleru, sed mi devas ĉiam ridi, kiam mi ekvidas vian novan ĉapelon. Tiel strangan formon ĝi havas.

Edzino: Bone, sed rigardu ĝin ankaŭ tiam, kiam oni alportos al vi la fakturon pri ĝi.

(Lu)

Grava helpo.

Gastino (ĉenirante): Kion vi faras?

Dommastrino: Nenion. Kaj vi por kio venas?

Gastino: Por helpi al vi.

Moderna lernanto.

Instruisto: Kial Cortes bruligis siajn ŝipojn malantaŭ si?

Lernanto: Verŝajne, ĉar li alte asekuris ilin.

La sorto mokas.

Poeto: Imagu, hieraŭ telefonis al mi la plej granda eldonisto de la lando.

Amiko: Bonege! Kaj kion li diris?

Poeto: Erare ligita!

Infanoj inter si.

Kaj kial vi ne enmiksiĝis en la interbatadon?

— Ĉar mi vidis, ke la aliaj estas multe pli fortaj kaj tiam mi tuj ekmemoris, ke al bona knabo ne decas batadi.

(Dublin Opinion)

„SANOVITE" = la ideala nutraĵo. — Aĉetebla en ĉiu butiko.

S-ro Julius Glück, nia malnova meritplena pioniro, instruisto de la Cseh-Instituto, kiu nuntempe kun grandegaj sukcesoj portas tra Francland la triumfan standardon de la mondlingvo.

Bildo pri la granda kaj sukcesplena Esperanto-kurso en Galtrup (insulo Mors, Danujo), gvidita de nia lerta sveda propagandisto. s-ro Gillis Staberg, instruisto de la Cseh-Instituto (staras supre en la mezo, signita per ×). Per ĉi tiu kurso nia lingvo ricevis 73 novajn entuziasmajn anojn. Post la fino de la kurso s-ro Staberg komencis novan kurson, ĉar la intereso estas tre granda.

Esperantistoj troviĝas ĉie. Nia bildo montras gajajn geesperantistojn el la urboj Gällivare kaj Malmberget (norda Svedujo) dum ekskurso al la montego Dundret, kie oni povas ski-kuri ĝis la monato Junio. La bildon sendis la Esperantista klubo „La Nordbrilo" en Gällivare.

En Szeged (Hungarujo) sukcese finiĝis Esperanto-kurso por la skoltina trupo N-ro 116, kies estrinoj estas: f-inoj E. Dolch (×) kaj I. Czakó (××). La kurson gvidis s-ro Ernesto Farkas (en la mezo), kiu fervore disvastigas Esperanton en la skoltaj rondoj.

Kurso en Fredericia (Danujo). — S-ro D. Ponti el Nederlando, fervora disvastiganto de Esperanto (sidas en la mezo), gvidis en Fredericia sukcesplenan kurson. Dekstre de s-ro Ponti sidas f-ino M. Saxl el Berlino, kiu poste gvidis daŭrigan kurson. La kursoj edukis multajn fervorajn adeptojn de Esperanto.



F-ino May Bijleveld el Hago kaj s-ro J. X. do Couto el Rio-de-Janeiro, geinstruistoj de la Cseh-Instituto, gefianĉiĝis. La Praktiko kore gratulas.

Fervoraj laborantoj por Esperanto. S-ro A. Hellbom (Sundsvall, Svedujo), f-ino L. Fruchtówna (Polujo) kaj prof. M. Sygnarski (Bydgoszcz, Polujo).

Bildo pri la granda kurso de nia senlaca estona propagandisto s-ro Hendrik Rikand en Riga (Latvujo). S-ro Rikand sidas en la mezo (kun floroj). Maldekstre de li la dua persono estas s-ro A. Krauze prez.

Gajaj gesamideanoj en Mez-Britujo dum ekskurso ĉe Droitwich. En la mezo sidas kun gitaro s-ro W. M. Appleby, aŭtoro de ŝatataj Esp-istaj kantoj.

LA MONDO ESTAS INTERESA

Koro kun sep kugloj. — En la hungara vilaĝo Barlahida vivas la kamparano Julio Tóth, kiu portas en sia korpo sep pafilajn kuglojn. Dum la mondmilito en atako li ricevis tiujn sep pafojn. La kugloj trafis la ripojn kaj deglitis al la kor-radikoj, kie ili restis ĝis hodiaŭ. Ĉar ili „bone kondutas", la kuracistoj ne volas ilin tuŝi kaj elpreni. Dum la sama atako, post kiam ĉiuj aliaj kamaradoj falis kaj li restis sola, li ricevis ankoraŭ plurajn pafojn, el kiuj du kaŭzis gravegajn vundojn: unu kuglo disrompis lian maldekstran brakon kaj alia trafis la nukon, de kie ĝi deglitis al la ŝultro. Malgraŭ tio, ke lia korpo fariĝis kvazaŭ kribrilo, li mirakle saviĝis kaj hodiaŭ li estas la plej forta viro de la vilaĝo.

★

Kie oni murdas plej ofte? — Nuntempe la mondrekordon en la murdado tenas la ŝtato Ĉilo en Sud-Ameriko. Laŭ la oficiala statistiko en tiu lando en ĉiu tria horo oni murdas iun.

★

Ĉiu homo havas du vizaĝojn. — La franca scienculo Pierre Abraham publikigis sensaciajn rezultojn de siaj studoj pri la homa vizaĝo. Li konstatis, ke la du flankoj de la homa vizaĝo, la dekstra kaj la maldekstra, neniam estas egalaj. Se iun portreton oni tranĉas en du partojn laŭ la vertikala meza linio, kaj se poste oni rekompletigas ambaŭ partojn per la propra kontraŭflanka spegulbildo, oni ricevas du tute malsamajn portretojn. Post la ekzamenado de multegaj bildoj la scienculo trovis, ke la dekstra vizaĝo montras la internan homon kun la instinktoj kaj originala naturo, dume la maldekstra vizaĝo prezentas la socian homon, la eksteran, agantan homon. Cetere ŝajnas, ke la fotografistoj instinkte eltrovis tion, ĉar kiam ili devas fari profilan portreton, ili preferas fotografi la maldekstran vizaĝon. Ili diras, ke tiu flanko estas „pli taŭga". La scienculo ilustris sian studon per multaj bildoj, kiuj ĉiuj subtenas lian teorion. Ekzemple ĉe la negro la duobligita dekstra vizaĝo montras revadon kaj malfidon, sed la duobligita maldekstra vizaĝo ridetas al la eŭropa fotografisto. La dekstra vizaĝo de unu krimulo, kiu jam dudekfoje sidis en karcero, montras kruelan sovaĝulon, sed lia duobligita maldekstra vizaĝo prezentas malĝojan pentanton.

★



La elefantoj estas tre inteligentaj bestoj. Dum la seka parto de la jaro, en la senakvaj regionoj de Afriko, kiam ili soifas, ili boras truon en la tero, ĝis kiam ili trovas akvon.

★

La nevidebla ekzekutisto. — Antaŭ nelonge mortis en Parizo s-ro Bartolomé Geron, kiu dum la mondmilito havis la plej teruran profesion. Tiu mistera viro antaŭe estis infanteria oficiro, sed poste transiris en la servon de la sekreta sekcio. Li ricevis la taskon kontroli la spionojn kaj plenumi tiujn mort-kondamnojn, kiuj devis resti en sekreto antaŭ la publiko. Kiam pruviĝis, ke iu spiono faras falsan ludon aŭ ke iu nekompetentulo eksciis ion el la militaj sekretoj, la oficejo transdonis ties nomon al s-ro Geron, kiu tiam tuj komencis la hom-ĉasadon. Li interkoniĝis kun tiu persono, invitadis lin, kune amuziĝis, ĝis fine li en unu tago — donis al li la manon. Sed tiu manpremo estis fatala. Li havis en la mano tre malgrandan aparaton kun delikata tranĉileto, kiu nerimarkeble tuŝis kaj vundetis la manplaton de la viktimo kaj kaŭzis lian baldaŭan morton, per sangvenenigo. Estas memkompreneble, ke s-ro Geron ĉe tiuj ĉasadoj neniam uzis sian veran nomon. Li estis vera artisto en la transformiĝado. Post ĉiu ekzekuto li ŝanĝis ne nur sian nomon, sed ankaŭ ĉiujn siajn vestojn, sian frizaĵon kaj eĉ la aspekton de la vizaĝo, en tre lerta maniero.

★

Verda pluvo. — En la regiono de Trelisico en Italujo dum ĉi tiu printempo en la daŭro de pluraj horoj falis verdkolora pluvo, kiu verdigis la murojn de la domoj kaj la pavimon de la stratoj. Ĝis nun oni ne povis eltrovi la kaŭzon de tiu miriga okazaĵo.

★

La polico kontraŭ la modo. — Ne ektimu la legantino! Ne la nuna polico estas kontraŭ la modo. Sed estis tempoj, kiam la polico severe persekutis la obeon al la modo. Jen la teksto de dekreto el la jaro 1776: „Ĉiu virino, kiu tiamaniere logas en edziĝon iun ajn viran subulon de Lia Majesto, ke ŝi per ruĝa aŭ blanka koloro plibeligas sian vizaĝon, aŭ per bonaj odoroj, esencoj, artefaritaj dentoj, vato, altaj kalkanumoj, falsaj ŝuoj faras al si alian eksteraĵon, ol kian la naturo mem al ŝi donis, devas esti akuzata pri trompa erarigo. Kaj la edziĝo okazinta pro tia trompo estos deklarata kiel nevalida."

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Fianĉiĝo. — Nia konata samideano kaj kunlaboranto de La Praktiko, s-ro *Nico H. Slinger* en Alkmaar (Nederlando), kiu antaŭ kelkaj jaroj faris per Esperanto vojaĝon ĉirkaŭ la mondo, dum la pasinta monato Majo fianĉiĝis kun f-ino *Greta M. Verwey* en Alkmaar. — Koran gratulon!

— La prezidanto de la Esperanto-Klubo de Kopenhago, s-ro *Holger Aersöe*, fianĉiĝis kun f-ino *M. L. Willemoës-Jörgensen*, kursanino de f-ino M. Saxl. — Koran gratulon!

Internacia edziĝo. — Nia samideano s-ro *J. N. Hoogenhout Jr.* el Amsterdamo la 31-an de Majo edziĝis kun la hungara Esperantistino f-ino *Etelka Csóka*. La edziĝo okazis en la urbodomo de Rákospalota apud Budapeŝto (Hungarujo). — Koran gratulon!

Naskiĝo. — Al la familio de nia fervora samideano s-ro *F. Heinekamp*, posedanto de la Esperanto-presejo „Gelderland" en Arnhem, en la pasinta monato naskiĝis filineto. Koran bondeziron!

Jubileo. — Nia eminenta malnova pionirino, *f-ino Margareta Noll* en Kopenhago (Danujo), la 22-an de Majo festis sian 60-an naskiĝtagon. Ŝi estas estraranino de pluraj danaj Esperantaj organizaĵoj kaj estraranino de la Dana Esperanto-Instituto. Dum multaj jaroj ŝi sindone kaj senlace laboradis por nia afero.

La universala Esperanto-kongreso en Stokholmo promesas esti grandsukcesa. Aliĝis jam pli ol 1200 kongresanoj. La sveda registaro decidis doni al la kongresanoj la favoron, ke ili ne bezonos pasportan vizon. Ĉe la landlimo sufiĉos montri la pasporton kaj la provizoran kongreskarton. La sveda fervojdirekcio konsentis rabaton de 25 %. En la honora komitato la unuan lokon okupis la sveda princo Karlo. La sveda gazetaro kun granda intereso skribas pri la kongresaj preparoj.

Internacia Esperanto-Tago en Anzin (Francujo). — La 24-an de Junio okazos en Anzin grandiozaj festoj pro la ducentjara datreveno de la malkovro de la karbo en Norda Francujo. La feston partoprenos franca ministro kaj multaj eminentuloj. La loka Esperantista Grupo invitas al tiuj festoj la tutmondan Esperantistaron. La programo antaŭvidas diservon, oficialan akcepton ĉe la ministro kaj urbestro, estos plue festkunveno kun paroladoj, granda historia parado kun Esperanto-lingva interpretado, nokta festo. Detalajn informojn sendas: s-ro Ernest Payen, 3 bis Rue Victor-Hugo, Anzin (Nord), Francujo.

Internaciaj Feriaj kursoj de Esperanto okazos en la dana urbo Silkeborg, en la Esp-lernejo „Kornmod". De la 23-Julio ĝis la 2-Aŭgusto okazos samtempe du kursoj, unu kurso por progresantoj, sub la gvidado de f-ino M. Saxl el Berlino, s-ro

P. Frey kaj s-ro L. Friis. Tiu kurso pritraktos konversacion, literaturon, historion kaj gramatikon. La alia kurso estos prepara kurso por Ĉe-metodaj instruistoj kaj ĝin gvidos f-ino M. Saxl, komisiita por tio de la Ĉe-Instituto. Apartajn instruajn prelegojn donos s-roj Frey kaj Friis, f-ino M. Noll kaj s-ro A. Andersen. Detalajn informojn oni petu de la organizanto: s-ro L. Friis, sekretario de la Dana Esperanto-Instituto, Frodesvej 21, Aabyhöj (Danujo).

Unua Proksim-Orienta Esperanto-Kongreso. — Pli ol cent Esperantistoj el Palestino kaj Egiptujo partoprenis en la unua kongreso organizita de niaj palestinaj samideanoj, dum la 10—12 de Majo en Tel-Aviv. Samtempe okazis ankaŭ la dua jarkunveno de la palestinaj Esp-istoj, kiu starigis 5-membran komitaton por ellabori statuton de tutlanda organizo, kaj prizorgi la landan propagandon. La ĉefa programpunkto de la kongreso estis la solena inaŭguro de la Zamenhof-strato. La venontjara tutlanda kunveno okazos en Jerusalemo.

Germana Esperanto-Kongreso okazis je pentekosto en la urbo Würzburg. Pro la disiĝo de la germana Esperantistaro en du tendarojn, oni elektis provizoran gvidanton en la persono de s-ro inĝ. Walther (Dresden), kiu komencis intertraktadojn por reunuigi la germanlandan movadon.

Brita Esperanto-Kongreso. — La 25-a kongreso de britaj Esperantistoj okazis dum la pentekostaj tagoj en la bela banurbo Hastings, sub la patronado de la Duko de Connaught, la urbestro kaj aliaj eminentuloj. Grava punkto de la kongreso estis diskutado pri Esperanto en la edukado. S-ro M. C. Butler, eduka sekr. de B.E.A., faris paroladon pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Ĉe publika koncerto s-ro Boutwood paroladis pri kaj en Esperanto entaŭ dumil personoj.

Skota Esperanto-Kongreso. — La 18—21 de Majo okazis en Leven la 29-a kongreso de la skotaj Esperantistoj, sub la prezido de s-ro William Harvey. La sukcesplenan kongreson partoprenis kaj salutis la estraroj de du urboj.

Postkongreso en Helsinki. — La finnaj Esperantistoj aranĝos post la Stokholma kongreso komunan vojaĝon per ŝipo al la finna historia urbo Turku kaj de tie per fervojo al la finna ĉefurbo Helsinki, kie okazos postkongresa kunveno. La finna fervojaro donas por tiu vojaĝo rabaton de 25 %. Detalajn informojn donas: „Finna Turismo", Siltavuorenkatu 4.A.16. en Helsinki.

Nord-Nederlanda regiona kunveno. — Pluraj Esperantistaj kluboj de Norda Nederlando aranĝos ankaŭ en ĉi tiu jaro kongreseton regionan. Ĝi okazos en Veendam la 24-an de Junio. Riĉan amuzan programon prizorgas la kluboj de Groningen, Leeuwarden, Assen kaj Stadskanaal. La unua kunveno okazos en la salonego de „Veenlust" je la 10-a horo.

La brita kronprinco vizitis Esperanto-lecionon. — En la lasta Decembro la Princo de Kimrujo dum sia rondvojaĝo por inspekti laborejojn starigitajn por senlaboruloj, vizitis ankaŭ la centron en Bradford kaj ĉeestis Esperanto-lecionon. Kelkaj kursanoj parolis al li frazojn en Esperanto kaj la princo senpene tradukis la frazojn, helpe de sia kono de aliaj lingvoj.

Prelegvojaĝoj. — Nia simpatia hinda samideano s-ro L. Sinha, instruisto ĉe la lernejo de Rabindranath Tagore, jus finis sian grandsukcesan prelegvojaĝon tra Norvegujo. Li paroladis en 20 urboj pri sia hejmlando, Brita Hindujo, kaj prezentis naciajn kantojn. Ĉie grandega publiko aŭskultis lin. — La juna hinda Esperantisto, s-ro Haĝi Mustafa Raden el la insulo Javo, estas en Eŭropo kaj faras sukcesplenajn paroladojn pri Nederlanda Hindujo.

Piedvojaĝo al la Stokholma kongreso. — Nia juna nederlanda samideano, s-ro Hugo Govers, studento en Leeuwarden, komencis pilgriman piedvojaĝon al Stokholmo por partopreni en la mondkongreso. Li marŝos tra Germanujo, Danujo kaj Suda Svedujo kaj deziras viziti survoje la Esp-ajn klubojn kaj ankaŭ unuopajn samideanojn. Li estas preta prelegi en la kluboj pri Nederlando kaj pri la sekigado de la Suda Maro, kun lumbildoj disponigitaj de la Fremdultrafika Unuiĝo en Hago. Interesiĝantoj adresu la leterojn: al s-ro Hugo Govers, Kwartelstraat 48, Leeuwarden (Nederlando), de kie oni postsendas la poŝtajojn. S-ro Govers posedas la necesan vojaĝmonon kaj havas rekomendleteron de sia Esp-societo (Frisa Esp. Rondo), do li ne apartenas al la kategorio de la nuntempe oftaj mondvojaĝantoj, kiuj ofte en bedaŭrinda maniero tedas la samideanojn.

Ĉeĥoslovakio. — La kursoj de nia fervora itala propagandisto s-ro E. M. Fasce en *Turnov, Mlada-Boleslav* kaj *Bakov* bonege sukcesis. Lia instruado estis eminenta kaj tre plaĉis al la publiko. En *Turnov* oni preparas Esperanto-ekspozicion.

Danujo. — La 17-an de Majo okazis tre agrabla vespera kunveno por la Esperantistaro de *Kalundborg* kaj ĉirkaŭaĵo, en la hejmo de pastro N. Hansen. La pastro-domon plenigis pli ol 50 entuziasmaj gesamideanoj, kiuj multe ĝuis paroladon de s-ro Holger Hansen, kantojn de f-ino Melchior kaj violon-ludon de s-ro Petersen. — La kurso de f-ino M. Saxl en *Kopenhago* finiĝis per komuna festo. — F-ino Saxl komencis preleg-vojaĝon tra Danujo. Ŝi paroladas pri Bavarujo kaj la Pasion-ludoj de Oberammergau. — F-ino M. Saxl en Kopenhago konvinkis kelkajn lernejajn aŭtoritatulojn pri la subtenindeco de Esperanto. — En la somer-kurso de la junulara lernejo *„Egaa Efterskole"* s-ro Harald Grönborg el Hasselager komencis Esperanto-kurson por 57 knabinoj 14-18-jaraj.

Estonio. — S-ro Hendrik Rikand la 24-an de Aprilo komencis novan kurson en *Tallinn.*

Francujo. — La kurso de s-ro J. Glück en *Rouen* estis vera triumfo por Esperanto. Ĝi komenciĝis kun cent kaj finiĝis kun ducent kursanoj. Oni fondis viglan Esperanto-grupon. Daŭriga kurso funkcias kun 80 partoprenantoj. — En *Dunkerque* post bonsukcesa provleciono s-ro J. Glück komencis novan kurson por 50 personoj. Li faris tie ankaŭ prelegon pri Ĉeĥoslovakio, antaŭ 400 personoj. — La 6-an de Majo okazis en *Rouen* la 11-a kongreso de la Normanda Esperanto-Federacio kun granda sukceso kaj en la plej gaja spirito. La Esperantista vivo revigliĝis pere de la ducent entuziasmaj novaj geesperantistoj, edukitaj en la kurso de s-ro J. Glück. — La Esperantistoj de *Laon* kaj *Soissons* aranĝis renkonton en *Anizy-le-Château,* por interkonatiĝi kaj por parole ekzerci Esperanton. Ili vizitis la vastan kamparon de Pinon, detruitan dum la mondmilito.

Hungarujo. — En la urbo *Szeged* la Skolta Esperantista Rondo aranĝis grandsukcesan Esperanto-ekspozicion, por kiu kolektiĝis interesa kaj valora materialo el 48 landoj de la mondo. Inter la materialo estis 721 leterkovertoj kaj 1872 ilustritaj poŝtkartoj, plue granda nombro de libroj, gazetoj k.t.p. La ekspozicion aranĝis s-ro Ernesto Farkas, skoltoficiro. En la sama urbo finiĝis bonsukcesa kurso por skoltinoj kaj fondiĝis la unua skoltina Esp-a rondo en Hungarujo.

Nederlando. — En *Leeuwarden* komenciĝis Esp-kurso por flegistinoj, sub la gvidado de f-ino A. Wiersma. — En la lasta Esperanto-ekzameno okazinta en Hago partoprenis 105 kandidatoj kaj el ili sukcesis 79 personoj.

Norvegujo. — En *Flekkefjord* kun bona sukceso finiĝis la kurso de s-ro Arne J. Tharaldsen. — En *Tromsö,* la „norda Parizo", finiĝis du sukcesplenaj kursoj de s-ro O. T. Nicolaisen. La kursoj komenciĝis kun 15 interesiĝantoj kaj finiĝis kun 60 entuziasmuloj. Oni fondis du Esperanto-klubojn. — En la plej norda urbo de la mondo, *Hammerfest,* fondiĝis Esperanto-klubo, post kurso de s-ro O. T. Nicolaisen. — La 20-an de Majo okazis en *Oslo* la jarkunveno de Norvega Esp-ista Ligo. La kunveno akceptis proponon pri nova statuto kaj aliĝis al la japana rezolucio pri „vere internacia Esperanto", kun aldona atentigo pri la netuŝebleco de la Fundamento. N.E.L. ricevis novan estraron: s-ro E. Stjernesund prez., f-ino Liv Sandberg vicprez., s-ro A. Arnessen ĝen. sekr., s-ro Stöp-Bowitz sekr., f-ino D. Henriksen kasistino. Pluaj estraranoj estas: f-inoj Bekeng kaj Bye, s-roj Rian, Tharaldsen kaj Johannessen. Post la kunveno estis agrabla kunesto en la restoracio de Ekeberg.

Polujo. — En la Pola Turing-Klubo en *Varšavo* komenciĝis supera kurso de Esperanto sub la gvidado de f-ino Halina Weinstein. — En la urbo *Sosnowiec* dum la 16-22 de Majo okazis denove „monda ekspozicio pri arto". La granda materialo estis kolektata per Esperanto. — En *Bydgoszcz* kun bona sukceso finiĝis la kurso de s-ro F. Klodzinski por 81 geskoltoj.

Portugalujo. — En *Porto* komenciĝis vigla Esp-ista vivo. Fondiĝis Esp-ista rondeto ĉe la Popola Kooperativo kaj funkcias nova kurso kun 15 partoprenantoj. En la Tago de l' Bonvolo oni disdonis propagandilojn kun la portreto de D-ro Queiroz de Magalhais, mortinta pioniro de Esperanto. La Esp-Rondeto organizis bonsukcesan Bonvol-feston kaj sendis pac-saluton al Kimrujo.

Svedujo. — Gesinjoroj Henriko kaj Erika Seppik finis sian plurmonatan kursgvidadon en Svedujo kaj revojaĝis por la somera libertempo al sia hejmlando, Estonio. — S-ro Willy Burgemeister el Ĉeĥoslovakujo faris bonsukcesajn kursojn en *Gnosjö, Ljungby* kaj *Värnamo,* kaj apartan daŭrigan kurson *Värnamo.* Krom tio li faris dek sukcesplenajn paroladojn kun traduko de s-ro H. Schill. La 5-an de Majo estis agrabla finfesto.

Internacia konferenco pri: ESPERANTO EN LA LERNEJON KAJ PRAKTIKON

En la signo de sukceso okazis en Vieno dum la 20-24 de Majo la internacia konferenco kunvokita de la aŭstria registaro kaj Universala Esperanto-Asocio, por pritrakti diversajn demandojn rilate al la instruado kaj praktika aplikado de Esperanto.

En la konferenco, kiu kunsidis en la parlamenta palaco, partoprenis pli ol 200 personoj el 25 landoj, inter ili reprezentantoj de kelkaj registaroj kaj de multaj gravaj organizajoj kaj entreprenoj.

Dum la malferma kunsido post salutparoloj de sup. mag. konsilisto Stollwerk, anstataŭanto de la urbestro, kaj ministro Fritz Stockinger, plue de pluraj diplomatiaj reprezentantoj, okazis valoraj paroladoj. Landa instru-inspektoro kortega konsilisto D-ro Wollmann parolis pri „Esperanto kaj la lernejo". Kortega konsilisto Prof. inĝ. Petritsch pritraktis la aplikon de Esperanto en la scienco kaj tekniko. D-ro inĝ. Eŭgeno Wüster parolis pri la internacia normigo kaj la rolo de Esperanto en ĝi.

En la laborkunsidoj oni pritraktis la temojn: „Esperanto kiel unua fremdlingvo", „Esperanto kiel internacia praktika lingvo", „Esperanto kiel sola traduklingvo", „Esperanto kiel rekta lingvo de traktado" kaj „Esperanto en la lernejo". La kunsidoj akceptis multajn rezoluciojn en la intereso de Esperanto.

La konferencanoj estis akceptataj de la ŝtatprezidanto de Aŭstrio, s-ro V. Miklas. La instruministro s-ro Schuschnigg invitis la partoprenantojn al intima tetrinkado kaj la vicurbestro bonvenigis ilin en la urbodomo.

La 23-an de Majo vespere 18 diverslandaj konferencanoj per la radio-stacio de Vieno disaŭdigis siajn impresojn pri Vieno kaj pri la konferenco, en sia nacia lingvo kaj en Esperanto. La organiza komitato, gvidata de reg. kons. H. Steiner, kompletigis la programon per multaj agrablaj amuzaj aranĝoj.

La konferenco en la diskutado aplikis la modernan sistemon, ke la parolantoj rajtis uzi sian nacian lingvon kaj tiajn paroladojn oni tradukis nur en Esperanton. Tiu sistemo, racia kaj justa, multe kontentigis ĉiun partoprenanton kaj ebligis al la kunsidoj plenan komprenon kaj gravan tempoŝparon.

Espereble ĉi tiu konferenco donos gravan antaŭenpuŝon al la Esperanto-movado.

LA REDAKCIO RESPONDAS

S-ro P. T. en Bulgarujo. — 1. „La tragedio de la homo" ne estas romano, sed teatraĵo kun profunda filozofia enhavo. — 2. La „Literatura Mondo" aperas en ĉiu monato. La adreso de ĝia administrejo: Mester-ucca 53.V.5 en Budapest-IX (Hungarujo).

S-ro S. W. en S. (Ned.) — En la 4-a punkto de nia respondo al vi en la antaŭa numero enŝoviĝis eraro. Bonvolu legi: *rondschrift* = rondskribo; *rondschrijven* = cirkulero.

S-ro M. G. (Franc.) — *Mensoganta* = kiu nun mensogas. — *Mensogema* = kiu ofte mensogas, ŝatas mensogi, havas inklinon al mensogado. —*Mensoga* = rilatanta al mensogo. Ĉi tiu vorto havas tute ĝeneralan signifon. Ekz.: mensoga frazo, letero, rakonto, konduto k.t.p.

„Iom laca kaj eterna komencanto" en P. (Franc.) — 1. *„Kiam oni edziĝu?"* En ĉi tiu frazo la verbo estas tute bona. La frazo entenas deziron, konsilon: tial la imperativo estas ĝusta. — 2. *Eskudo* = nomo de portugala monero. — 3. Jes, la amerikan trinkaĵon vi povas nomi „koktelo". — 4. Vi diras, ke Esperanto estas malriĉa lingvo. Jes, sed tamen ne pli malriĉa, ol la aliaj lingvoj. Kiam aperas nova ideo, la franca lingvo enkondukas novan vorton, transprenas fremdan vorton. Same faras Esperanto. 5. La vorto „tejo", kiun vi trovis en la 4-a n-ro de „Nia Gazeto" (3-a paĝo, 3-a kolono, 38-a linio), ne estas neologismo, sed parto de alia vorto (supozeble „prefektejo"). Vi povas rimarki, ke antaŭ tiu vorto mankas unu tuta linio, evidente pro preseja eraro. La linio: „prefekto, tre ŝatata kaj estimata oficisto" pro eraro troviĝas en tiu alineo dufoje (2-a kaj 8-a linioj). En la presejoj ofte okazas tiaj eraroj, kiam oni faras korektojn en la pretaj kompostaĵoj. — 6. La aserto de „N. G.", ke nur la cirkuleroj de la Akademio enhavas lingvajn erarojn, estis laŭ nia opinio nur ŝerco.

S-ro D. I. en P. (Bulg.) — 1. La adreso de tiu piedpilkista trupo estas ĉe: s-ro J. van Schoor, J. de Geyterstr. 131/1 en Antverpeno (Belgujo). — 2. La nederlanda ekzamena komitato ne aranĝas skribajn ekzamenojn. La kandidatoj devas persone aperi antaŭ la komitato.

F-ino Y. I. en T. (Japanujo) — Ni dankas pro la afable senditaj ĉerizfloroj kaj ni ĝoje atendas vin en Arnhem. Bonan vojaĝon!

N. B. Z. en M. (Sovjet-Unio) — 1. Vi ne povas aĉeti libro-lotojn, ĉar vi ne povas pagi. Ni ne povas uzi viajn poŝtmarkojn. — 2. Ĉar vi abonas La Praktikon pere de SEU, vi havas rajton al senpaga koresponda anonceto.

S-ro J. C. B. en R. — 1. *„Li respondis, ke li estas barono Flugvent."* En ĉi tiu frazo la vorto „estas" estas bona. La formo „estis" estus malĝusta, aŭ ŝanĝus la signifon de la frazo: ke li ne estas plu barono Flugvent. — 2. *„Li vidis, ke la fantomo sensukcese frotadis la plankon."* La frazo estas bona. Vi povas diri ankaŭ: „frotadas". Sed ĉi tiu frazo ne estas komparebla kun la frazo en la antaŭa punkto. Tiu frazo estis citado (nerekta) de parolo de alia homo. — 3. *„Li iris por vidi, kiu estas ekstere."* La frazo estas tute bona. 4. *„Li vidis la fantomon, kiu energie frotadis la plankon."* La frazo estas tute bona. Vi povas uzi ankaŭ estantan tempon, sed tiam vi devas ŝanĝi la konstruon de la frazo jene: „Li vidis, ke la fantomo energie frotadas la plankon." — 5. *„Imagu, kion mi vidis: blanka fantomo sidis sur la planko."* La frazo estas bona. Se vi volas fari vian rakonton pli efika, vi povas diri ankaŭ: „sidas". — 6. *„De tiu tempo li estas vivante mortinta."* La frazo ne estas malkorekta. Sed pli oportune estas diri: „vivanta mortinto".

S-ro B. v. d. W. — Ni bondeziras por via poeta verkado.. La ensendita versaĵo ne estas ankoraŭ sufiĉe bona por publikigo.

S-ro K. P. en A. (Bulg.) — Oni ne povas ĉe ni per poŝtmarkoj aboni aliajn gazetojn.

LIMONADOJ, MINERALAJ AKVOJ
SENALKOHOLAJ VINOJ
Esperanto parolata!

KONKURSOJ

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Januara numero!

95-a konkurso.

SILAB-ENIGMO.

blin, blon, bran, da, da, do, do, do, faj, fas, fi, gas, go, ka, ke, ko, lak, len, lo, lo, lun, ma, ma, mig, mo, mo, mo, no, no, no, os, pen, plu, po, po, ri, ri, ro, si, ten, ti, to, to, to, to, tra, tro, un.

El ĉi tiuj 48 silaboj faru 24 dusilabajn vortojn kun signifo:

1. Blanka trinkaĵo.
2. Frukto.
3. Nomo de osto.
4. Parto de la domo.
5. Per la buŝo faras.
6. Granda akvo.
7. Interna parto de la korpo.
8. Legomo.
9. Korpoparto.
10. Labori per la kapo.
11. Domo el tukoj.
12. Doma besto.
13. Sur la fingroj estas.
14. La terkulturisto faras.
15. Elektra veturilo.
16. Nomo de tago.
17. Korpoparto.
18. Reĝa seĝo.
19. Harkoloro.
20. Grava objekto en la poŝo.
21. Ne manĝi.
22. Iri de loko al loko.
23. Ne povas vidi.
24. Tre forta trinkaĵo.

Post tio prenu el ĉiu vorto du najbarajn literojn. Ili kune donos frazon el la Esperantista himno.

Al la personoj, kiuj ĝuste solvis la enigmon, ni disdonos 8 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis la fino de Septembro.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn!

96-a konkurso.



En ĉi tiuj kvar bildetoj vi vidas la edifan historion de niaj du meritplenaj samideanoj.

La konkursa tasko estas: Bonvolu al ĉiu bildeto verki mallongan, sed elegantan kaj spritan klarigon en versoj, kaj doni nomojn al la du personoj. La maksimuma longeco de la solvo estu: kvar kvarliniaj strofoj. Pli longaj solvoj ne partoprenos en la konkurso. Ĉe la juĝo oni konsideros ne nur la lingvan ĝustecon, sed ankaŭ la mallongecon kaj spritecon.

Per 6 premioj ni rekompencos la plej bonajn solvojn. Ni akceptos solvojn ĝis la fino de Septembro.

Atente plenumu la konkursajn regulojn!

Kupono por la 95-a konkurso	Kupono por la 96-a konkurso

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj gluu ilin sur viajn solvojn.

LIBRO-LOTERIO de LA PRAKTIKO

Rapidu aĉeti lotojn, por ke la tirado povu baldaŭ okazi! Legu la detalajn informojn en la Januara numero!

LA LISTO DE LA PREMIOJ (DAŬRIGO):

109 Reaperantoj. Familia dramo de Henrik Ibsen. El la norvega lingvo tradukis Oscar Bünemann.

110 Homarisma Laboro. Unuaktaĵo de Kenelm Robinson.

111 La stranga butiko. Gaja verslibro de Raymond Schwartz. Kun 22 bildoj.

112 El la intima libro de la Verdurbaj Esperantistoj. Skizoj el la Esperantista vivo. De A. D. Atanasov.

113 Gysbreght van Aemstel. Tragedio de Vondel.

Daŭrigota

GARDATAJ LOTOJ (daŭrigo). — Bax 5424—5425, Berge 5671—5681, Ehešo 5759—5769, Fousek 5644—5654, Gasperini 5867—5877, Hansen 2217—2221, Iversen 2204—2214, Joho 5836—5846, Jüptner 5611—5621, Kaiser 5453—5463, Kegel 2225—2246, Kleven 5715—5758, Luze 5825—5835, Makjanič 5464—5465, Menalda 5363—5373, Muelisto 5470—5474, Nicolaisen 2215—2216, Nielsen 5502—5505, Pollak 5622—5643, Popper 5770—5824, Schwarzenbrunner 5655—5659, Smith 5507, T. N. Randers 5660—5670.



BELAJ OBJEKTOJ, TRE TAŬGAJ ANKAŬ POR DONACO

(la bildoj montras la veran grandecon)

aĉeteblaj ĉe LA PRAKTIKO

N-ro 19.	**Horloĝ-pendaĵo por sinjoroj**	—.75	ned. guld.
„ 20.	**Leter-malfermilo**	—.60	„ „
„ 21.	**Lego-signo**	—.50	„ „
„ 22.	**Cigaredo-estingilo**	—.60	„ „
„ 23.	**Cigaredo-estingilo**	—.70	„ „

Esperanto-krajonoj:

N-ro 63.	**Nigra krajono** kun surskribo „Esperanto"	—.15	„ „
„ 64.	**La sama,** sed taŭga por kopiado	—.20	„ „
„ 65.	**Giganta dika nigra krajono,** kun surskribo	—.40	„ „
„ 66.	**La sama,** sed ruĝa aŭ blua	—.50	„ „

La prezoj entenas la sendkostojn.

GRAFOLOGIO

En ĉi tiu rubriko la grafologo de La Praktiko donas karakter-bildojn laŭ ensenditaj leteroj. La informojn kaj regulojn bonvolu legi en la 27-a numero (Marto 1934) de La Praktiko sur la 12-a paĝo.

„Bewonderaar". — Bona persono, sed li havas nek grandan volon, nek grandan spiriton, eĉ ne grandan fizikan forton. La grafologo ne povas trovi veran viron laŭ ĉi tiu manskribaĵo, prefere li rigardas lin kiel iom virine formitan personon. Li multe parolas, jes, sed fortan vorton li ne elbuŝigas; estas nur infan-lingvo. Li estas sentema, tro sentema persono kaj lia sentemo estas grandparte pasio. Li ŝatas kontraŭdiri, kun mieno, kvazaŭ li scius ĉion. Por la priskribo de ĉi tiu karaktero oni povus uzi ankoraŭ multan laboron kaj tempon.

„Nik Nek". — Ĉu estas vere, ke estas 39-jara fraŭlo, kiu uzas ĉi tiujn movojn por produkti sian manskribon? Granda sin-amo montriĝas en la diversaj movoj. La grafologo vidas lin promeni dande vestita kun konduto de mond-posedanto. Li ŝatas la tutan mondon, almenaŭ tiel ŝajnas. Sed demandu tiujn, kiuj lin konas: ĉu li ĉiam tenas sian vorton, se li promesis ion? La mondo estas por li kiel granda lud-skatolo. Li estas bona; jes, mole bona. Ankaŭ sin-estimo apartenas al ĉi tiu karaktero. Donu la okazon al la grafologo, esprimi sin tute; li povas liveri la tutan viv-historion de ĉi tiu interno. Tia manskribaĵo apartenas al la plej facilaj por doni ĝustan analizon.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — Petu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

KORESPONDO. — S-ro Jac. van Luijt, desegnisto kaj projektisto, 23-jara fraŭlo, Bergstraat 20 en Eindhoven (Nederlando), deziras korespondi per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj, pri ĉiu temo, precipe pri belartoj, sed ne pri politiko, nur kun seriozaj geesperantistoj ĉiulandaj. Respondos ĉiam.

„BONHUMORO" estas la titolo de la tre leginda libro de Paul Nyssens. Ĉi tiu libro instruos vin esti ĉiam gaja, kaj sekve feliĉa. — 174 paĝoj. Prezo kun sendkosto: 1.25 ned. guld. Aĉetebla ĉe La Praktiko.

RUSA LINGVO. KORESPONDAJ LECIONOJ PER ESPERANTO. Informojn petu ĉe: Eŭgeno Blinov, Internacionalnij 14, Novogireevo (Moskvo), Sovjet-Unio.

KONGRESANOJ, kiuj survoje al Stokholmo vojaĝos tra Göteborg, estas petataj kontaktiĝi kun s-ro Erik Ekström (Vegagatan 10 en Göteborg). La lokaj Esp-istoj preparas sin por aqrabligi la viziton de la fremduloj. Detalaj informoj estos sendataj al ĉiu petanto.

SPERTA ESPERANTO-INSTRUISTINO instruas konversacion kaj preparas al la ekzamenoj A kaj B. — Adreso: f-ino Molly Keiser, 2e Schuytstraat 155, Hago.

FILATELISTOJ! Sendu al mi 100 ĝis 500 PM kontraŭ ĉeĥoslovakaj kaj hungaraj PM. De unu speco ne sendu pli ol 10 pecojn. Respondo garantiata. Mia adreso: Johano Windisch, Mačay-strato 2, Levice (Ĉeĥoslovakujo).

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —.45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. — *La redakcio.*

ŜLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon
s-ino = sinjorino	L = letero	gluu sur la bildan
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	flankon
dez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

MEMORIGO. — S-ro J. S. Takács en Debrecen (Hungarujo) estas petata, ke li respondu al s-ro P. Creemers en Obbicht (Nederlando), kiu en Februaro sendis al li leteron kun poŝtmarkoj.

BULGARUJO

Sviŝtov. — S-ro Vasil P. Stojanoff, 25-jara fraŭlo, poŝtoficisto. — K.ĉ.l., precipe kun poŝtaj geoficistoj. Certe respondos.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Görkau. — S-ro Stephan Wabra, kontoristo, Lindenstrasse 725. — L, PI, p.ĉ.t., k.ĉ.l., precipe kun Grekujo, Jugoslavio, Japanujo, Kanariaj insuloj.

Kunovice apud Uh. Hradiŝte. — S-ro Jan Tichon, librobindisto, 1021. — K.ĉ.l. Certe respondos.

Kunovice apud Uh. Hradiŝte. — S-ro Jan Essender, tajloro, Vésky 87. — Dez. kor. k.ĉ.l., precipe kun filatelistoj. Certe respondos.

Warnsdorf I. — S-ro Alois Stangler, 21-jara oficisto, Anton Rungestrasse 67. — L, PI (bfl), PM, k.ĉ.l., p.ĉ.t., Certe respondos.

DANUJO

Hasselager. — 57 knabinoj (15-18-jaraj), 10 geknaboj (12-14-jaraj), 4 geinstruistoj kaj 1 sinjorino tre dez. kor. kun ĉiulandaj gesamideanoj (nur ne pri amo!). Ĉiuj estas komencantoj. Skribu unue al: s-ro Harald Grönborg, instruisto.

Ormslev. — S-ro Viktor Iversen, 16-jara terkulturisto. — Dez. kor. p.ĉ.t. nur kun ekstereŭropanoj.

ESTONIO

Tallinn. — F-ino Mia Laarberg, oficistino, Postbox 1037. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., interŝ. PM. Promesas respondi almenaŭ unufoje al ĉiu.

Tapa. — S-ro Leonardo Walts, skolto, poŝtkesto 32. — Dez. kor. kun geskoltoj ĉiulandaj, pri la skoltmovado kaj pri Esperanto.

FRANCUJO.

Marseille. — S-ro Georges Molard, 40-jara kontisto, 13 Boulevard Netty, La Pomme. — PI kun Anglujo, prefere kun Londono.

Paris 13. — S-ro Ludoviko Stein, 35-jara profesoro de korpedukado, 18 rue Fagon. — L, k.ĉ.l., p.ĉ.t., interŝ. PM. Certe respondos.

JAPANUJO

Tokio. — S-ro Hisazumi Tagiri, 22-jara studento, 561 Nišigahara, Takinogaŭa. — PI, L, kun Ruslando, Egiptujo, Grekujo, Siamo, Italujo, Persujo, Turkujo. Neniam respondas al filatelistoj.

NEDERLANDO.

Amsterdam-N. — S-ro L. Kosmis, 20-jara metaltornisto, Floraweg 33. — L, PI, k.ĉ.l. Certe kaj tuj respondos.

Amsterdam-W. — S-ro Herman J. Bosschert, maŝinkompostisto kaj Ĉe-metoda instruisto, Vancouverstraat 13. II. — K.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe pri tipografio kaj Ĉe-metoda instruado.

Hilversum. — F-ino S. Visser, 22-jara, Galileïstraat 42. — L, k.ĉ.l., p.ĉ.t., prefere kun angloj. Certe respondos.

Kerkrade (Limburgo). — S-ro Fr. J. Haselier, 32-jara, Kohlbergsgracht 43. — PI (bfl.) kun ekstereŭropaj landoj.

Leeuwarden. — S-ro Hugo C. G. Govers, Kwartelstraat 48. — Dez. kor.

Obbicht. — S-ro P. Creemers, instruisto, Dorpstraat 72. — L, PI, interŝ. PM, k.ĉ.l. escepte Nederlando kaj Belgujo. Sendu unue.

Souburg (Zeeland). — S-ro J. A. J. Biese, 30-jara ĉarpentisto, Nieuwe Vlissingscheweg C 179 D. — PI (pri popolkostumoj), PM. Certe respondos.

Utrecht. — S-ro D. Cruyeners, fervoj-oficisto, Ondiep 53. — PI, k.ĉ.l. Certe respondos.

NEDERLANDA HINDUJO

Menado (Celebes). — S-ro J. J. Paäth, 20-jara nova Esp-isto, Kamp. Kiniar, Tondano. — L, PK, PI, interŝ. fotojn Ĉiam respondos.

Tandjong-Priok (Java). — S-ro H. de Wilt, ĉarpentisto, M/I Kota-Nopan. R.L. — Kolektas PM.

POLUJO

Królewska-Huta (G. Sl.) — Laborista Esperanto-Grupo, 3. Maja 6. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Królewska-Huta (G. Sl.) — S-ro Paŭlo Motz 29-jara instruisto, ul. Gimnazjalna 32. — Dez. kor. kun gepartoprenontoj en la Stokholma kongreso.

Tarnów. — Membroj de la Esp-Societo dez. interŝ. PM k.ĉ.l., pecon por peco aŭ alimaniere. — Sendu proponon al: f-ino I. Traumowna, Del. de UEA, strato Towarowa.

SOVJET-UNIO

Saratov. — S-ro N. A. Insarskij, Poĉtamt, Poŝtkesto 53. — Dez. kor. PM, Esp-aj glumarkoj, malnovaj papermonoj.

SVEDUJO

Gnosjö. — S-ro Helge Sjöberg, 24-jara pentristo, Fack 7. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Gnosjö. — S-ro Ernst Vahlgren, 27-jara ŝuisto, Fack 7. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

SCIIGO. La internacia Esperanto-kurso por fervojistoj, anoncita en la antaŭa numero de La Praktiko, okazos en la venonta jaro dum la 2—12 de Majo en Arnhem. Detalaj informoj aperos poste. La prokrasto okazas en interkonsento kun la nederlanda fervoj-direkcio kaj fervojistaj organizaĵoj, por pli facile havigi libertempon al la fervojistaro.

GRAVA POR VIAJ VOJAĜOJ DUM LA SOMERO!

La ŝatataj

FLAGINSIGNOJ

speciale taŭgaj por vojaĝo kaj kongreso, por montri la naciecon de la portanto.

Eleganta formo, bela emajlo.

Haveblaj en la ĉi tie desegnitaj formoj, kun pinglo, broĉo aŭ butono.

Prezo kun sendkosto nur:

—.50 ned. guld.

(Rabato al revendistoj)



Aĉeteblaj ĉe LA PRAKTIKO.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 7 (31) ★ Julio
1934

Novan urbestron

ricevis la nederlanda rezidenca urbo Hago, en la persono de *D-ro De Monchy*. Ĉi tiu nomo estas bone konata al la tutmonda Esperantistaro, ĉar la sama D-ro De Monchy estis ĝis nun la urbestro de la „Esperanto-urbo" Arnhem.



La transpaŝo de D-ro De Monchy al sia nova alta ofico plenigas ĉiun Esperantiston per sincera ĝojo, ĉar li estas ne nur favoranto de Esperanto, sed ankaŭ vera Esperantisto. Antaŭ kelkaj jaroj li ellernis nian lingvon kaj kelkfoje eĉ publike parolis en Esperanto, okaze de la internaciaj Esperanto-kursoj en Arnhem. Kiel komitatano de la Cseh-Instituto kaj regula leganto de La Praktiko, li estas ligita al ni en intima samideaneco.

Hodiaŭ, la 1-an de Julio, kiam D-ro De Monchy transprenas la estradon de Hago, nia gazeto aperas antaŭ li kun la esprimo de estimplena gratulo kaj kun la plej bonaj deziroj por lia nova labor-sfero.

S-ro Salomon Jean René De Monchy naskiĝis en Rotterdam la 9-an de Marto 1880, kiel filo de la tiutempa prezidanto de la Komerca Ĉambro en Rotterdam. La mezlernejajn studojn li faris en la Erasmiana Gimnazio en Rotterdam kaj poste li studis juron ĉe la universitatoj de Ĝenevo kaj Leiden. Liaj eminentaj kvalitoj kaj simpatia personeco kondukis lin rapide sur bela kariero. Estinte sekcia ĉefo ĉe la provinca parlamento de Sud-Holando, li fariĝis sekretario de la „Surinamo-komisiono" kaj en tiu kvalito faris oficialan vojaĝon al Surinamo, nederlanda kolonio en Sud-Ameriko. En la urbestra seĝo de Arnhem s-ro De Monchy sidis dum dek-du kaj duono da jaroj.

La Esperanto-movado ŝuldas multan dankon al D-ro De Monchy pro lia ĉiam montrita favoro, precipe pro la disponigo de la Esperanto-Domo, kaj esperas, ke li ankaŭ en sia nova ofico uzos sian povon por progresigi nian kulturan movadon. Li estas ja nia samideano.

La Praktiko

GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 2.50 nederl. guldenoj, por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Unu numero kostas -.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., ½ p. 45.-, ¼ p. 25.-, ⅛ p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

La Praktiko

ABONPREZO:
Por 1 jaro: 2.50 ned. guld.
„ 1/2 „ 1.25 ned. guld.

La abona jaro komenciĝas en Januaro kaj Julio.

La mendon kaj la pagon oni devas sendi samtempe al: **Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando.**

MANIEROJ DE PAGO:

1) Enpagu la monon al la **poŝtĉekkontoj** de la Int. Cseh-Instituto de Esp., en la jenaj landoj *(post la numeroj de la poŝtĉekkontoj estas la sumo sendota por unujara abono):*

Aŭstrio: Wien A-156933 *(8 ŝilingoj)*
Ĉeĥoslovakio: Praha 500.362 *(40 kronoj)*
Danujo: Kopenhago 34941 *(6 kronoj)*
Germanujo: Berlin 129527 *(4 markoj)*
Hungarujo: Budapest 13201 *(6 pengoj)*
Jugoslavio: Zagreb 41345 *(75 dinaroj)*
Latvujo: Riga 4870 *(5 latoj)*
Nederlando: Den Haag 162626 *(2.50 guldenoj)*
Polujo: Warszawa 190.203 *(8 zlotoj)*
Svedujo: Stockholm 74.126 *(5 kronoj)*
Svislando: Bern III. 6761 *(5 frankoj)*

2) Sendu **papermonon** en registrita letero.
3) Per **poŝtmandato.** Sur la kupono indiku la celon de la pago.
4) Per **UEA-kuponoj.** Valoro: 1 svisa franko = 0.50 ned. guld.
5) Per **poŝtaj respondkuponoj.** Unu kupono = 0.15 ned. guld.
6) Per **poŝtmarkoj** de la landoj: *Belgujo* (35 fr.), *Britujo* (5 ŝil.), *Bulgarujo* (140 levoj), *Estonio* (5 kr.), *Francujo* (25 fr.), *Hispanujo* (12 pes.), *Italujo* (20 lir.), *Norvegujo* (5 kr.), *Rumanujo* (150 leoj.). La sumoj montras la prezon de la jarabono. La poŝtmarkojn oni povas sendi en simpla letero kun netravidebla koverto.

PREMIOJ POR KOLEKTANTOJ DE ABONOJ:

N-ro 5. KONVERSACIA LITERATURO, N-roj 1—4.
„ 6. KONV. LITERATURO, N-roj 5—8 kaj kartona ujo.
„ 7. KONVERSACIA VORTARO, KONVERSACIA GAZETO, LA ENIGMOJ kaj GVIDLIBRO DE ARNHEM.
„ 13. Esperanta Kantareto.
„ 15. 25 poŝtkartoj kun la bildo de la Esperanto-Domo.
„ 16. 10 foto-poŝtkartoj pri la Esperanto-Domo kaj Arnhem.
„ 17. 5 poŝtkartoj kun la portreto de D-ro Zamenhof.
„ 18. „Esperantuja Kanto" kaj „Al la Esperanto-Domo" (du kantoj kun muziknotoj).
„ 19. Granda verda stelo kun la vortoj „ESPERANTO PAROLATA" (kun truoj, ringo aŭ piedo, laŭ elekto).
„ 20. Kvin simplaj Esp-insignoj (verda stelo kun pinglo, broĉo aŭ butono, laŭ elekto).

La jarkolektoj 1932 kaj 1933 de LA PRAKTIKO

estas ankoraŭ haveblaj, je duona prezo.

(Lukse binditaj jarkolektoj: po 3.— guld.)

ATENTU! **Se vi volas sendi monon al La Praktiko, bonvolu observi la sekvantajn:**

La monon oni povas sendi per *poŝtĉekkonto* (Wien A-156933, Praha 500362, Kopenhago 34941, Berlin 129527, Budapest 13201, Zagreb 41345, Riga 4870, Den Haag 162626, Warszawa 190203, Stockholm 74126, Bern III. 6761), *per poŝtmandato,* per *bankĉeko* aŭ per *papermono* en letero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj de la sube nomitaj landoj, kalkulante la valoron laŭ la suba tabelo:

1.— ned. guldeno valoras en:

Aŭstrio 3.70 ŝil., **Belgujo** 15 fr., **Britujo** 2 ŝil. 8 p., **Bulgarujo** 58 lev., **Ĉeĥoslovakujo** 17 kr., **Danujo** 3 kr., **Estonio** 2.60 kr., **Francujo** 10.35 fr., **Germanujo** 1.70 m., **Hispanujo** 5 pes., **Hungarujo** 3.30 p., **Italujo** 8 lir., **Jugoslavio** 30 din., **Latvujo** 2.20 l., **Norvegujo** 2.70 kr., **Polujo** 3.70 zl., **Rumanujo** 75 l., **Svedujo** 2.60 kr., **Svisujo** 2.10 fr.

Pro la freneza dancado de la mon-valoroj ĉi tiu tabelo validas nur ĝis la apero de nia sekvanta numero.

La sendo de poŝtmarkoj en letero okazas je la risko de la sendanto. Tial estas konsilinde uzi netravideblan koverton kaj ĉe pli granda sumo registrigi la leteron.

LIBROJ

aĉeteblaj ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO, **Riouwstraat 172, DEN HAAG (Nederlando).**

La Kurso de Andreo Cseh. La stenografita kaj poste mimeografita teksto de unu tuta kurso de Andreo Cseh, farita en Stokholmo en 1928. La kurso kaj enkonduko kun klarigoj pri la metodo kaj konsiloj al la instruantoj, krom tio aldonoj, entute 158 folioj, en eleganta kartona ujo,	7.75 G.
Konversacia Literaturo, 8 numeroj. Unu numero	—.10 „
Kartona ujo por la Konversacia Literaturo	—.10 „
Konversacia Vortaro, ŝercaj difinoj de la kursaj vortoj	—.15 „
Konversacia Gazeto. Unu numero kun plena informaro pri Esp., por enkonduki la novajn Esp-istojn en la movadon	—.15 „
La enigmoj. Libreto plena de enigmoj. La solvantoj partoprenas en konkurso kun 1000 premioj	—.10 „
Fruictier-Grenkamp: **Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado**	2.50 „
Bastien: **Naŭlingva Etimologia Vortaro de Esp**	2.50 „
Thora Goldschmidt: **Bildotabuloj** ... 1.90 G., bind.	2.20 „
Isbrücker: **Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado.** Grava libro por preparo al ekzamenoj	—.75 „
Privat: **Historio de Esperanto 1-a parto**	1.35 „
„ „ „ „ 2-a „	3.25 „
Privat: **Vivo de Zamenhof,** 1.35 G, bindita	1.90 „
Privat: **Esprimo de sentoj en Esperanto**	—.75 „
Zamenhof: **Originala Verkaro.** Lukse bindita	6.— „
Drezen: **Historio de la Mondlingvo.** 240 paĝoj. Entenas la plenan historion de la mondlingva ideo kaj konigas la div. artefaritajn lingvojn. Kun multaj bildoj. Simple bindita 2.75 G, tole bindita	3.30 „
Drezen: **Analiza historio de la Esp-movado**	—.75 „
Drezen: **Skizoj pri la teorio de Esp.** Lingvosciencaj studoj	—.50 „
Mair: **La prepozicioj kaj la akuzativo en Esp.**	—.60 „
Baghy: **Hura!** Originala romano, 3.70 G, bindita	4.20 „
„ **Preter la Vivo.** Poemoj, 1.— G, bindita	1.50 „
Madách: **La Tragedio de la Homo.** Ĉefverko de la hungara literaturo, en majstra traduko de K. Kalocsay	2.— „
Sadoveanu: **Nobela Peko.** Trad. T. Morariu	—.50 „
Firu & Pragano: **Rumana Bonhumoro,** 1.— G, bindita	1.50 „
Gysbrecht v. Aemstel. Trad. J. R. G. Isbrücker, 1.95 G., bind.	2.50 „
Maĵuranić: **La morto de Smail-Aga Ĉengijić.** Kroata eposo. Lukse bindita, kun artaj bildoj	1.50 „
Puŝkin: **Eŭgeno Onegin.** Trad. el rusa, bind.	1.85 „
Floretoj. Rakontoj por infanoj. Kun multaj koloraj bildoj	—.70 „
Bareluloj kaj Fadenuloj. De A. Maurois. Kun multaj bildoj	1.25 „
Princo Serebrjanij. Historia romano de grafo A. Tolstoj	2.— „
Jaĉjo Holm kaj liaj amikoj. Lukse bindita	2.50 „
La vojaĝoj de Gulivero al Liliputlando. Kun bildoj	1.25 „
Nyssens: **Bonhumoro.** Moralfilozofia eduka libro	1.25 „
C. Goldoni: **Kurioza okazaĵo.** Komedio. Trad. el itala	—.75 „
A. D. Atanasov: **Rememoroj de Esperantisto**	—.50 „
A. D. Atanasov: **El la intima libro de la Verdurbaj Esperantistoj**	—.30 „
La Biblio (eld. de Brita Bibl. Soc.) en diversaj prezoj.	
La Nova Testamento (Br. Bibl. Soc.) en diversaj prezoj.	
Teksto el la Biblio en 630 diversaj lingvoj	—.50 „
Papini: **Historio de Kristo** ... bind.	6.25 „
Wiseman: **Fabiola.** Rakonto el la katakomboj	3.50 „
Katolika preĝlibreto	—.30 „
Praktika gvido en la korespondado. Lukse bindita	2.50 „
Societa Ludaro. Ludoj por kunveno kaj ekskurso	—.35 „
Dirksen: **Methodisch Leerboek v. Esp.**	—.65 „
„ **Vertaalde Oefeningen**	—.35 „
Heilker: **Esp. Leerboek** (voor dipl. B.)	2.25 „
Schidlof: **Vortaro Esp.-Ned. kaj Ned.-Esp.**	1.50 „
van Straaten: **Granda vortaro Esp.-Ned. kaj Ned.-Esp.**	4.90 „
Vademecum voor den Nederl. Esperantist	—.55 „
Esperanta flageto por biciklo	—.35 „
Gramofondisko kun Esp-lingvaj kantoj el la operoj „Carmen" kaj „Rigoletto"	2.50 „

Krom tio ĉiuj aliaj libroj.

Afrankita sendo!

Kiel sendi la monon?

Rigardu maldekstre!

ATENTU!

(Daŭrigo)

64. Antologio. Krestomatio.

Ambaŭ vortoj signifas kolekton de prozaj aŭ poeziaj literaturaj pecoj. Se la kompilado de la libro okazis *laŭ beletristika vidpunkto*, ni nomas ĝin **antologio**. Sed se ĝi okazis *kun instrua celo*, ni parolas pri **krestomatio**. En Esperanto ni posedas la jenajn tiuspecajn librojn: *Belga Antologio, Bulgara Antologio, Hungara Antologio, Kataluna Antologio, Fundamenta Krestomatio, Matematika Krestomatio k.a.*

65. Apaĉo. Fripono. Kanajlo.

Ĉi tiuj tri funebraj sinonimoj signifas fihomojn. Inter la tri vortoj estas la jenaj diferencetoj:

Kanajlo = malnobla sentaŭgulo.
Fripono = ruza malhonestulo.
Apaĉo = danĝera grandurba kanajlo.

66. Aplaŭdi. Plaŭdi.

Tre similaj vortoj kun la sekvanta diferenco:

Aplaŭdas (= aprobe kunfrapas la manplatojn) la publiko, por montri sian kontentecon post plaĉa parolado aŭ prezentado.

Plaŭdas la akvo, kiam ĝi batiĝas al io. Ekz-e: plaŭdas la rivereto, la ondoj de la maro. La vorto „plaŭdi" estas onomatopea (= sonimitanta) vorto.

67. Apogi. Subteni. Defendi. Gardi. Ŝirmi. Protekti. Patroni.

Ĉiuj ĉi tiuj sinonimaj vortoj signifas helpan agon.

Apogi = firmigi la staton de unu objekto, pere de alia objekto. Ekz-e: *apogi la bastonon al la muro, apogi la kapon sur la manojn*. En metafora senco: helpi iun per la aŭtoritato de alia homo.

Subteni = porti, teni ion, estante sub ĝi. Ekz-e: *la muroj subtenas la tegmenton*. En figura senco ĝi estas samsignifa kun la vorto „apogi".

Defendi = helpi al iu kontraŭ atako.

Gardi = atenti pri iu kontraŭ minacanta danĝero aŭ malutilo.

Ŝirmi = gardi, precipe kontraŭ materia difekto.

Protekti = helpi iun per influo kaj aŭtoritato; gardi kontraŭ minaco. Ekz-e *la regnestro estas protektanto de la kongreso*.

Patroni = protekti kiel potenca aŭtoritato. Ekz-e societoj, festoj, kunvenoj k.t.p. havas patronojn.

68. Apostrofo.

Ĉi tiu vorto havas du signifojn:

1. Apostrofo estas la **malgranda komo supre ĉe la litero.** Ĝi montras la forigon de vokalo. Ekzemple: de l' mondo; la voj' elektita. — En ĉi tiu signifo la vorto „apostrofi" estas egala kun *„elizii"*.

2. Apostrofo estas nomata ankaŭ la **parola figuro,** kiam la oratoro alparolas forestantan personon aŭ senvivan objekton.

69. Arbo. Ligno.

La vorto **„ligno"** signifas la materialon, la malmolan substancon, el kiu konsistas la trunko kaj la branĉoj de la arbo. Ekzistas lingvoj, kiuj posedas nur unu solan vorton por ĉi tiuj du diversaj ideoj.

70. Arbo. Arbedo. Arbusto.

Arbo = ligna kreskaĵo, kiu havas altan trunkon kaj ĉe kiu la branĉoj aperas en certa distanco de la tero.

Arbedo = malgranda arbo, kiu disbranĉiĝas tuj ĉe la bazo, ĉe la tero. (Ekzemple la ribujo.)

Arbusto = arbeto pli malgranda, ol la arbedo. Ĉe la trunko ĝi estas ligneca, sed ĉe la supro jam herbeca. (Ezemple la frambujo, eriko.)

71. Ardi. Bruli.

Bruli = konsumiĝi per fajro. Ekz.: La kandelo brulas.

Ardi = esti varmega sen konsumiĝo. Ekz-e en la elektr lampo la fadeno ardas. Ĝi estas fajra, sed ne konsumiĝas, ĉa mankas la oksigeno.

ATENTU! Ĉi tiuj du vortoj estas ne-transitivaj. La objekt brulas aŭ ardas kaj la homo bruligas aŭ ardigas ĝin. Malbon estas la esprimo: „Mi brulis mian fingron." Korekte: „Mi bru ligis . . ."

72. Ardeo. Ardezo.

Ne interŝanĝu ĉi tiujn similsonajn vortojn.

Ardeo = granda marĉa birdo, parenca kun la cikonio.

Ardezo = griza ŝtono konsistanta el tavoloj. El ĝi oni fabrikas tegmentajn tegolojn kaj skrib-tabulojn por infanoj.

73. Argano. Gruo. Levilo.

Jen tri nomoj de la sama afero: aparato por levi kaj en la aero movi pezajn objektojn (ekz-e ĉe ŝipoj).

NOTO. La vorto „gruo" en la unua vico estas nomo de birdo-speco, kaj nur dua-vice ĝi signifas lev-aparaton, pro la simileco inter la levilo kaj la vivanta gruo. La vorto „levilo" havas ĝeneralan signifon. La „argano" kaj „gruo" estas specoj de levilo.

(Daŭrigota)

LERNU PER LA ERAROJ!

En ĉi tiu rubriko ni citas erarajn frazojn, kiujn ni trovis en diversaj libroj, gazetoj kaj aliaj presaĵoj. Ni deziras fari per tio utilan servon al niaj legantoj kaj al niaj — verkistoj.

Laŭ la nova leĝo oficisto, kiu dum ses monatoj estis malsana, povas esti maldungita aŭ pensiuligita. — La fino de la frazo ne estas bona. Korekte: „povas esti maldungata aŭ pensiata".

La solena enterigo de nia bedaŭrata samideano okazis en la loka krematorio, kie li krematoriĝis. — En ĉi tiu frazo estas du eraroj: 1) La vorto „krematoriĝis" estas malbona. Ĝuste: en la krematorio oni kremacias. Oni tre bone povas diri ankaŭ: „bruligas" aŭ „cindrigas". Do ĉi tiun frazon oni povus fini plej bone jene: „kie li cindriĝis". — 2) „Enterigi" signifas: meti en la teron. Tial ĉi tiu vorto ne taŭgas en ĉi tiu frazo. Oni devas diri: „La funebra ceremonio okazis ..."

El nia rondo foriris kamarado, kiun ni ĉiam memoros kiel vera esperantisto. — Ĉi tiu frazo finiĝas kun grava gramatika eraro. Devas esti: „kiel veran esperantiston". Por klare vidi la diferencon, bonvolu kompari la jenajn du frazojn: „Mi amas vin kiel patro" (t.e.: mi estas la patro), „Mi amas vin kiel patron" (t.e.: vi estas la patro).

Kelkaj landaj Esperanto-societoj pro manko da mono aŭ pro manko da membroj ne povas aliĝi al UEA. — En ĉi tiu frazo la prepozicio „da" estas malĝusta, ĉar ne temas pri kvanto. La ĝusta prepozicio ĉi tie estas: „de".

Nederlando rajtas havi lokon en la estraro de UEA, pro sia nombro da membroj. — La korekta formo estas: „nombro de membroj".

La cititaj faktoj konvinkigos vin pri nia malfacila situacio. — La ĝusta formo de la verbo estas: „konvinkos".

Ni ne ankoraŭ scias, kiom da komitatanoj havos Svedujo. — La ĝusta vort-ordo estas: „ni ankoraŭ ne scias".

Ni proponas elekti kiel spertuloj pri propagando aŭ kiel samideanoj internacie konataj, la jenajn sinjorojn. — Korekte: „kiel spertulojn", „kiel samideanojn internacie konatajn".

Ni elektis kiel sesa membro de nia komitato, sinjoron A.B. — La korekta formo: „kiel sesan membron".

Esperanto ebligas ĉiun popolon partopreni en la internacia kultura vivo. — Korekte: „ebligas al ĉiu popolo".

AL LA VENKO !

PETO. **Kara leganto! Bonvolu ĉi tiujn gravajn informojn traduki en vian nacian lingvon kaj transdoni ilin al la redakcioj de la ĵurnaloj en via urbo, por publikigo. Per tio vi faras por Esperanto tre valoran propagandan servon.**

257. **Francaj aviadistoj lernas Esperanton.** — Ĉe la Supera Aviadista Lernejo de Francujo komenciĝis Esperanto-kurso, oficialigita de la ministerio de l' aviado. Partoprenas 60 personoj. Ĉe la malfermo de la kurso prezidis generalo Gerard, direktoro de la lernejo, kaj paroladon faris generalo Delcambre, direktoro de la Nacia Meteorologia Oficejo.

258. **Nova Esperanto-monumento.** — La „Teksela Esperanto-Federacio" (insulo Texel, Nederlando), decidis starigi sur tiu multe vizitata insulo Esperanto-monumenton, kun la varma aprobo de la estraro de la urbo Den Burg, loko de la starigota monumento. — (*La Federacio petas por monhelpoj, por ke la monumento kiel eble plej baldaŭ estu starigebla. La adreso de la sekretario-kasisto: s-ro Joh. M. Duinker, Parkstraat 7/10, Den Burg, Texel, Nederlando. Poŝtkonto: 216684.*)

259. **82 brazilaj ĵurnaloj publikigas Esperanto-kurson.** — Je la propono de s-ro Ismael Gomes Braga, komerca delegito de Universala Esperanto-Asocio en Rio de Janeiro, 82 ĵurnaloj aperantaj en 75 urboj de Brazilo decidis publikigi Esperanto-kurson.

260. **Esperanto-lingva turisma prospekto pri Finnlando.** — La „Suomen-Matkat" (Asocio por Finnlanda turismo) ĵus eldonis arte ilustritan Esperanto-lingvan faldprospekton pri Finnlando, la lando de la 60,000 lagoj. *(La prospekto estas senpage ricevebla ĉe: „Suomen-Matkat", Aleksanterinkatu 7.A., Helsinki, Finnlando.)*

261. **Svedaj poŝtistoj lernas Esperanton.** — En Stokholmo, la urbo de la nunjara universala Esperanto-kongreso, komenciĝis pluraj Esperanto-kursoj por la poŝtoficistaro. En la kongresejo (la sveda parlamenta domo) funkcios speciala poŝtoficejo kun Esperante parolantaj oficistoj.

262. **Esperanto-lingva artikolo en franca gazeto.** — La gazeto „Lyon-Touriste", organo de la Iniciata Sindikato de Lyon kaj ĝia regiono, en sia lasta numero publikigis ampleksan ĉefartikolon en la lingvo Esperanto, ĉar la redakcio ricevis multajn turismajn demandojn el eksterlando en la lingvo Esperanto. — (*La sindikato volonte sendas senpage ilustritan prospekton al ĉiu petanto. Adreso: Place Bellecour en Lyon.*)

263. **Granda sveda gazeto kun Esperanto-lingva parto.** — Dum la nunjara universala Esperanto-kongreso en Stokholmo la grava sveda ĵurnalo „Dagens Nyheter" ĉiutage presos unu paĝon en la lingvo Esperanto, por la eksterlandaj partoprenantoj de la kongreso. La paĝo enhavos la tagajn novaĵojn kaj la kongresajn raportojn.

264. **La foiro de Marseille uzas Esperanton.** — La direkcio de la Internacia Foiro de Marseille (Francujo), kiu en ĉi tiu jaro okazos dum la 15—30 de Septembro, starigis Esperanto-fakon, kaj ĵus dissendis Esperanto-lingvajn invitilojn. *(La adreso de la foiro: Internacia Foiro de Marseille, Esperanto-Fako, 7 Quai des Belges, Marseille.)*

265. **Film-instituto uzas Esperanton.** — La hungara film-instituto „A falu Urániája", kiu produktas sciencajn kaj klerigajn filmojn, aplikas Esperanto-lingvajn klarigajn tekstojn sur siaj lumbild-serioj. Tiaj serioj jam aperis pri la hungara ĉefurbo Budapest, pri la hungara lago Balaton kaj pri la fama hungara stepo Hortobágy. *(Tiuj lumbild-serioj estas tre taŭgaj por vigligi la kunvenojn de la Esperantistaj societoj. Oni povas ricevi ilin prunte, kontraŭ la repago de la sendkosto. Detalaj informoj estas riceveblaj de: s-ro P. Balkányi, ĉefdelegito de UEA, Budapest 507.)*

266. **Nova Zamenhof-strato.** — La urbestraro de Clamart en Francujo ĵus decidis ŝanĝi la nomon de la „Rue de Vanves" je la nova nomo „Rue Zamenhof".

267. **Kelneroj lernas Esperanton.** — En Stokholmo, kie en ĉi tiu jaro okazos la 26-a universala Esperanto-kongreso, oni organizis specialan Esperanto-kurson por kelneroj. En la kurso partoprenas 66 kelneroj, apartenantaj al la plej popularaj restoracioj de la urbo.

268. **Gösta Berling en Esperanto.** — Ĵus aperis en Esperanto-lingva traduko la mondfama verko de Selma Lagerlöf: Gösta Berling. La tradukon faris la konata sveda Esperanto-verkisto Stellan Engholm, kaj la libro aperis en la eldono de la sveda Esperanto-Eldonejo en Stokholmo.

269. **Esperanta kabaredo per la radio-stacio de la Eiffel-Turo.** — La radio-stacio de la Eiffel-Turo en Parizo ĉiusabate dissendas Esperanto-lingvan kabaredan programon, kun partopreno de la konata Esperantista humoristo kaj poeto Raymond Schwartz.

270. **Policistoj en Stokholmo lernas Esperanton.** — En la sveda ĉefurbo komenciĝis Esperanto-kurso por 20 policistoj, kiuj dum la tie okazonta universala Esperanto-kongreso deĵoros en la plej multe trafikataj punktoj de la urbo.

La moderna matematiko:

LERNO + AMUZO

LIBERTEMPO EN ARNHEM

Faru ĉi tiun matematikan operacion, kaj vi estos feliĉa!

(Detalaj informoj pri ĉiuj kursoj aperis en la Aprila numero de La Praktiko, sur la lasta paĝo.)

la mondo ridas

Facile imagebla.

— Terure! Imagu, hodiaŭ anstataŭ salo mi metis erare apo-pulvoron en la supon de nia edzo!

— Ho, mi imagas, kiel forte koleris.

— Jes ja! Kaj kiel ŝaŭmis a buŝo, kiam li kriadis!

(Kasper)

Nova servistino.

— Diru, Minna, ĉu vi ne sci-, ke ĉe la bonaj familioj oni timas enporti la leterojn sur to?

— Jes, sinjorino, sed mi ne nsis, ke ankaŭ vi tiel deziras.

(Hjemmet)

Ne dezirata vizito.

Rabisto (post la absolva ju-: Mi tre dankas al vi, sin-, advokato, ke vi tiel bone endis min. Mi eĉ ne scias, esprimi mian dankon... mesu, ke mi vizitu vin bal-en via hejmo...

— Dankon, sed bonvolu pro-ti la viziton kiel eble plej e...

(Tit Bits)

Post edziĝfesto.

Mi aŭdis, ke vi malboni-ian stomakon en la edziĝ-no de via amiko.

Jes, terure mi malprofitis u knabo. Mi aĉetis por li an donacon per 20 markoj, festeno mi ne kapablis la valoron eĉ de 10 mar-aj nun mi povas pagi an-kuraciston.

(Nebelspalter)

Honesteco.

— Hieraŭ la kelnero erare redonis al vi kvaronan guldenon pli multe. Espereble vi ne retenis ĝin.

— Kiel vi povas pensi je tio! Mi trinkis ankoraŭ unu glason da biero...

(Judge)

Ĉe tajlorino.

— Sinjorina moŝto, vi estas tre malkontenta... tio signifas, ke vi ne mendos plu ĉe ni veston, ĉu ne?

— Mi certe neniam plu... Sed al miaj amikinoj mi ĉiam rekomendos vian firmon.

(Life)

En juĝejo.

Juĝisto: Vi asertas, ke vi donis al la atestanto nur kelkajn malfortajn frapetojn. Sed li diras la malon.

Akuzato: Kiel li povas diri tion? Ĉe la unua bato li jam fariĝis senkonscia.

(Het Leven)

Saĝa respondo.

— Ĉu vi povas naĝi?
— Jes.
— Kaj kie vi lernis ĝin?
— En la akvo.

(Il Travaso)

Per flora lingvo.

— Diru, Elli, ĉu vi venus kun mi al la granda vojaĝo de la vivo?

— Kial ne, se vi certigas la vojaĝkostojn?

(Le Rire)

La espero.

Tajloro: Kiam mi povas esperi la pagon de mia fakturo, grafa moŝto?

Grafo: Ĉiam, kara amiko, ĉiam!

(Answers)

Flato.

— Diru, kara amikino, ĉu mi ne estas kun ĉi tiu ĉapelo dek jarojn pli juna?

— Sed kiom da jaroj vi havas?

— Dudek-tri.

— Ĉu kun aŭ sen la ĉapelo?

(Saturday Evening Post)

Sur la strato.

— Kiom da jaroj vi havas, knabeto?

— Ses.

— Neeble! Nur ses-jara kaj jam tiel terure malpura!

(Politiken)

Gastamo.

— Diru, mia fileto, ĉu vi ne akompanus min ĝis la tramo?

— Ne eble, onklo, ĉar tuj post via foriro ni komencos manĝi.

(London Opinion)

La prauloj.

— Kiam mi vidas vin, Teobaldo, mi devas ĉiam pensi pri unu granda viro...

— Ĉu vere? Kaj kiu estas tiu? Kiu fama praulo de mia familio?

— Darwin!

(Vårt Hem)

OVAJ LIBROJ

enkamp-Kornfeld: ĈU VI AŬDIS TION? j. Prezo: -.60 ned. guld. Eldonis: Esperanto-, Poŝtfako 81, Venlo (Nederlando). — En bonaspekta libreto nia konata samideano mp-Kornfeld kolektis grandan aron da bonaj La libro estas komenco de libroserio mal-ta. Ĝi estas aĉetebla ankaŭ ĉe La Prak-

nto: LA SENKORPA MISTERO. Herol-sperantо, Köln (Germanujo) — 25-paĝa pruvanta la ekziston de Dio pere de la aj fenomenoj en la naturo.

IO NI AMUZU NIN? Societ- kaj danc-lektis J. Rosenberg kaj E. Malmgren. 39 ezo 1 sv. kr. Eldonis: Eldona Soc. Espe-Stokholmo. — La libreto enhavas multajn societajn ludojn kaj kanto-tekstojn kun la celo, ke la Esperantistaj grupoj per ili vigligu siajn kunvenojn kaj tiamaniere ekzercigu la lingvon per ludo kaj amuzo.

SVEDAJ NACIAJ KOSTUMOJ. Serio de 10 bildoj en poŝtkarta formato. Prezo: 1.50 sv. kr. Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1 (Svedujo). — La kartoj estas bele presitaj en koloroj laŭ arte pentritaj originaloj de Aina Stenberg. Ili prezentas kolekton de la provincaj kostumoj de Svedlando. Precipe la partoprenontojn de la Stokholma kongreso certe interesos ĉi tiuj kartoj.

BES-a ADRESARO de Esperantistoj el ĉiuj landoj. — Ĵus aperis la 12-a eldono de la populara jarlibreto de Bohema Esperanto-Servo en Potŝtejn (Ĉeĥoslovakujo). Sur 92 paĝoj ĝi entenas pli ol mil adresojn de Esperantistoj dezirantaj korespondadon aŭ interŝanĝadon internacian. La libreto enhavas ankaŭ 7 paĝojn kun multaj portretoj, kaj multajn anoncojn de Esperantaj eldonejoj. La bel-aspekta libreto, kies prezo estas 1 sv. fr., atestas la progreson de la interesa entrepreno de s-ro inĝ. L. Berger, fondinto kaj direktanto de B.E.S.

BILDKARTOJ PRI LUND. — Belajn ilustritajn poŝtkartojn kun Esperanto-teksto pri la malnova sveda universitata urbo Lund pretigis la tiea Esperanto-Klubo, por vendado precipe dum la antaŭkongreso. La tuta serio, konsistanta el 12 malsamaj kartoj, kostas 1.50 sv. kr. inkl. sendkostoj. Mendebla ĉe: s-ro Gösta Laurin, Kung Oskars Väg 3 en Lund (Svedujo).

Nova libro de Julio Baghy!

LA TEATRA KORBO

13 belaj rakontoj de nia ŝatata poeto.

110 paĝoj. — Prezo —.75 ned. guld.

Aĉetebla ĉe LA PRAKTIKO.

JAĈJO HOLM KAJ LIAJ AMIKOJ
verkita de W. G. van Hulst
ilustrita de Isings
tradukita de H. C. van Leeuwen
Bele bindita. — Prezo: 2½ ned. guld.
S-ro Jakob, Direktoro de UEA, skribis al ni pri ĉi tiu libro:
„Ni volas esprimi al vi nian gratulon pro la belega eldonaĵo, tute laŭ la solida kaj serioza maniero en via lando."
HAVEBLA EN ĈIU LIBREJO
G. F. Callenbach — Eldonisto
Nijkerk (Nederlando)

Unu el la plej interesaj kaj plej valoraj libroj de la mondliteraturo:
Emeriko Madách:
LA TRAGEDIO DE LA HOMO
ĉefverko de la hungara literaturo, en majstra traduko de D-ro Kolomano Kalocsay.
Ĉi tiu admirata verko en majstraj scenoj kondukas la leganton tra la historio de la homaro, de la mondkreo tra la diversaj kulturŝtupoj ĝis la mondpereo. La libron ornamas 20 belegaj tutpaĝaj desegnaĵoj de la mondfama pentristo M. Zichy.
Prezo: 2.— ned. guld.
Mendebla ĉe la eldonejo de La Praktiko.
Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj.

LITERATURO

La savintoj.

Estis por mi stranga sento, kiam la ĉarma junulino subite ĉirkaŭbrakis min kaj entuziasme kriis:

— Mia savinto! Al vi mi dankas, ke mi restis en vivo!

Kvankam la bela Gervaise nenion povis danki al mi, tamen en la granda surprizo mi ne povis fari ion alian, ol kisi ŝin, kaj post tio grandanime deklari:

— Por vi, kara Gervaise, mi estas preta al ĉio!

Tio okazis sub la jarcentaj kverkoj de la maljuna grafo D'Arincourt, en la parko de Bezières, en la plej poezia parto de la tago: ĉe la vesperiĝo. Mi kaj la dudekjara, orblonda filino de la grafo post la tagmanĝo faris rajd-promenon al la proksima arbaro, kaj de tie ĵus ni revenis. La supre skizita sentimentala sceno okazis antaŭ la somerdometo, en la ĉeesto de la grafo kaj lia edzino. Mi ne tre konis la lokajn cirkonstancojn, sed Gervaise povis konjekti, ke la gepatroj sidas sur la teraso de la somerdometo, kie ili kutime trinkis la posttagmezan teon. Pro tio nur mi konsterniĝis terure, kiam subite mi ekaŭdis la riproĉan voĉon de la moŝta patro:

— Sed Gervaise...!

Kaj la maljuna grafino kun forta indigno aldonis, je mia adreso:

— Sed sinjoro...!

Mi estis en senlima embaraso, sed Gervaise kuris al siaj gepatroj kaj en drama tono kriis:

— Ankaŭ vi ĉirkaŭprenu lin, ĉar se li ne estus min akompaninta, mi nun ne vivus!

Kaj ŝi rakontis, ke ŝia ĉevalo ektimiĝis kaj kuregis kun ŝi al la rivero, sed en la lasta momento mi haltigis la ĉevalon, riskante mian vivon.

Kun mirego mi aŭdis la fabelon, el kiu eĉ unu vorto ne estis vera. La maljuna paro kun pala vizaĝo rigardis al mi. Ili ne ĉirkaŭbrakis min, sed la grafo kun acida mieno donis al mi manpremon.

— Sed grafa moŝto, ĝi estas troigo ... ne estis ja serioza danĝero — balbutis mi konfuze.

— Vidu, patro, kia kavaliro estas Herbert, — diris Gervaise, rigardante al mi kun brilanta rideto, — li eĉ ne fieras pri sia heroaĵo.

Por esti mallonga: mia intencita du-taga restado en la kastelo plilongiĝis al du semajnoj, kaj oni rigardis min kiel fianĉ-kandidaton de la grafidino. Kiam mi riproĉis ŝin pro la aŭdaca mensogo, ŝi ridetante respondis:

— Stulta knabo! Ĉu vi pensas, ke mia patro edzinigus min, la milionulinon, al vi, malriĉa poeto, se mi ne eltrovas tiun fabelon?

Je tio mi devis konsenti, tiom pli, ke Gervaise estis belega knabino, kiun mi volonte estus preninta eĉ sen unu centimo da doto. Nur unu afero estis al mi nekomprenebla: kiel povis la grafo kredi, ke la dek-kvin-jara kaduka ĉevalaĉo de la knabino subite tiel sovaĝiĝis...

Le belaj du semajnoj pasis kaj mi revenis al Parizo. Post unu monato mi refoje estis survoje al Bezières. Kun feliĉa atendo mi alvenis: nun okazos nia oficiala fianĉiĝo. En la imago mi vidis, kiel la senbride afabla Gervaise ĵetos sin sur mian kolon post la longa foresto. Mi ĝuste transvestis min en la hotelo de la urbeto, kiam oni anoncis, ke iu sinjoro deziras paroli kun mi.

Mia vizitanto estis eleganta junulo kun vizaĝo brunigita de la suno. Li prezentis sin kiel markizo Médange kaj post la enkondukaj frazoj li diris, ke li venis, ĉar li aŭdis, ke mi estas konsiderata kiel fianĉo de la grafino Gervaise.

— Jes, mi estas, — diris mi, kaj fiere mi aldonis: — mi savis ja iam ŝian vivon; el la gorĝo de la morto mi rekaptis ŝin por mi.

La juna markizo kun malvarma trankvilo diris:

— Nur hodiaŭ mi sciiĝis pri tio kaj la celo de mia vizito estas demandi vin, ĉu vi vere insistas edzinigi la fraŭlinon? Ĉar sciu, ke ankaŭ mi savis la vivon de la grafidino. Ni boatveturis en la mezo de la lago. Venis uragano kaj la boato renversiĝis, sed mi savis ŝin. Ni havas egalajn rajtojn. Nur du solvoj ekzistas: aŭ unu el ni mortos, aŭ ni demandos al Gervaise, kiun ŝi elektas el ni?

— Kaj kio okazis post la savo? — mi demandis iom suspekteme. La markizo respondis:

— La gepatroj de Gervaise venis al la lago por nin renkonti. Tiam la anĝelo saltis al mia kolo, kisis min en ilia ĉeesto kaj deklaris, ke mi estas ŝia savinto.

— Konfesu, ke la tuta danĝero estis nura eltrovaĵo, — mi diris, je kio la markizo iom ruĝiĝinte, kun kompreno diris:

— Same, kiel la via.

— Jes, sed mi almenaŭ sidis sur ĉevalo!

— Kaj ĉu vi pensas, ke mi ne sidis en boato?

★

La rivaloj kune alvenis en la parko de la kastelo, por peti la decidon de Gervaise. Sur la teraso ili renkontis la knabinon, kiu kun eksploda ĝojo salutis ambaŭ virojn:

— Ho, kiel mi ĝojas pro via alveno! Mi montros al vi la savinton de mia vivo... Jen, tie li venas...

Larĝ-ŝultra kavaleria oficiro proksimiĝis al ili. Kiam atingis la societon, Gervaise prezentis lin:

— Kapitano Mertens... mia savinto... En la ĉasista dometo mi ekdormis, la lampo renversiĝis, en momento mi estis en flamomaro... li savis min el la fajro.

La du rivaloj unue kun konsterniĝo aŭskultis la detalojn de la plej nova savo. Post iom da tempo la markizo ekridis kaj mi sekvis lin. La kapitano ofendite demandis la kaŭzon de nia gajeco, je kio ni rakontis al li la historiojn de niaj heroaj savadoj.

Per la vespera vagonaro la tri savintoj kune vojaĝis reen al Parizo. Post duona jaro mi legis, ke Gervaise edziniĝis kun iu bankisto. Tiamaniere ŝi tamen sukcesis fariĝi edzino de heroo. Ĉar nuntempe en la bankista metio oni bezonas certan kvanton da heroeco...

Martin Dalton.

BUKEDO EL LA VERKOJ DE LA JUBILEANTA LEO BELMONT

KRIO DE MALESPERO.

La homo militas, la homo batalas;
Daŭriĝas kruela la bato!
Kaj homo post homo en sango ekfalas,
Trafita per mano de frato!

Daŭregan, frenezan, sovaĝan la baton
Nenio do povas reteni,
Dum homo en homo ne sentas la fraton,
Ne povas alian kompreni!

En ĉambro trankvila saĝulo sonĝema
Alvokas la amon la sunan,
Tagnokte dum jaroj laboras pacema,
Kreadas la lingvon komunan!

Kreaĵon mirindan, genian, moralan,
Donacas al mond', al homaro...
Kaj vokas en himno amason batalan,
Ke iru al ama altaro.

Sed vane en bruo alvoko ekfalas —
Perdiĝas la voĉ' de kompato!
La homo militas, la homo batalas,
Daŭriĝas kruela la bato!

Ho! kiam eksonos el koroj, el fondo,
Komuna, frateca belkanto,
Kaj stelo de paco eklumos al mondo
Kaj venkos spirit' — *Esperanto?!*

LEO BELMONT.

(Aperinta en „Sonoj Esperantaj", poemkolekto de Leo Belmont.)

MIA SONĜO.

Leo Belmont.

Mi havis strangan sonĝon, eble ĝi tute ne estis sonĝo.

Mi vidis grandan domon — teruran domaĉon.

La fenestroj en ĝi estis diverskoloraj.

Mi volis scii, kion faras la loĝantoj de tiu domo.

Mi supreniris al la tria etaĝo. Mi alfrapis la pordon. Malfermis al mi ia stranga sinjoro, kies vizaĝon en ruĝa duonlumo de la ĉambro mi ne povis bone vidi.

— Kiu vi estas? — mi demandis subite.

Li ĝoje ekfrotis la manojn:

— Mia nomo estas Marat. Mi hieraŭ transloĝiĝis ĉi tien. Sed morgaŭ mi jam iros tien... sur la straton. Rigardu, ĉio estas preta...

Li alkondukis min al la fenestro. La vitroj estis ruĝaj.

— Rigardu — li parolis al mi kun mistera rideto — flamas jam la revolucio... Ĉielo, folioj, domoj, pavimoj, homoj — ĉio ruĝa!...

Mi forkuris. Mi iris al mansardo. Loĝis tie poeto. Li akceptis min afable. Brilokule li alkondukis min al la fenestro, kiu havis multe da diverskoloraj vitroj. Li diris:

— Rigardu, kiel bela estas la mondo, kiel fabele kolora. Kiel mirinde brilas diverskolore la tero kaj la ĉielo. La vivo estas sorĉa ĉielarka fabelo. La tutan tagon mi skribas ĉi tie poemojn... mi estas feliĉa!

Mi forlasis lin kun kapo malgaje klinita. Mi sonorigis sur la unua etaĝo. Malfermis al mi galonumita lakeo. En lukse meblita kabineto mi ekvidis bankiston kun pala vizaĝo kaj kun sovaĝa malespero en la okuloj. Li sidis en apogseĝo ĉe malfermita kaso — malplena.

— Vidu — li ekbalbutis — antaŭ momento estis ĉi tie banditoj... ili forprenis... ili forprenis ĉion. Kiel nigra estas la mondo!...

Kaj li montris apatie al la fenestroj.

La vitroj en ili estis nigraj... Ĉio ekster la fenestroj ŝajnis envolvita per funebra nubo.

Mi direktis la paŝojn al la najbara loĝejo. Okupis ĝin granda eminentulo — burokrato. Post longdaŭra legitimado oni malfermis al mi la pordon. Ekgrincis rustiĝinta seruro. Mi ekmiris kaj demandis la loĝanton:

— Ĉu vi ne foriras?

Li ekmiris siavice:

— Kial?... Mi skribas reformplanojn...

— Ĉu de longa tempo?

— De pli ol 40 jaroj.

— Ĉu vi vidis, kio okazas surstrate?

— Kio?

— Mi vidis ne malproksime grandajn homamasojn. Ili iras — kaj ilia nombro kreskas ĉiam. En vejnoplenaj, lacigitaj manoj ili havas pezajn martelojn. Mi aŭdis, kiel ili parolis tra dentoj: ni iras detrui tiun malnovan domaĉon... ni purigos la placon... kaj poste ni starigos novan konstruaĵon...

Li ekinteresiĝis kaj alpaŝis al la fenestro.

— Kion vi diras? — li diris al mi kolere — Sur la strato estas nenio.

Mi alrigardis. La vitroj estis blankigitaj per kreto. Oni nenion vidis tra ili...

— La mondo estas blanka... hela — diris kun profunda konvinko la burokrato.

Mi vekiĝis.

Tondris...

Et la pola originalo tradukis en la jubilea jaro 1934: Anna Weinstein.

NOKTURNO I.

Leo Belmont.

La fenestron nokt' rigardas...
Vent... Kabano tremas pli...
Pro la pluvo vitroj larmas...
Karulin'!... Ĉu ploras vi?...

La nokt' same estis pluva,
Kiam vi forlasis min...
Vi, lilio ĉiam pura,
Ĝis ja venis la destin'!...

Ne ŝi estas... Pluvo ploras...
Se mi sentus vin ĉe mi!
Aŭdu! Ĉion mi pardonas...
Nur ne ploru... venu vi!...

En la jubilea jaro 1934 tradukis el la pola originalo Halina Weinstein.

Aperinta en „Rimoj kaj Ritmoj" (poemaro), 1900.

POŜTISTOJ!

La gekolegoj, kiuj en 1933 partoprenis en la unua internacia P.T.T.-kurso en Arnhem, aranĝos

REVIDAN KUNVENON

en la Esperanto-Domo en Arnhem, la 7—8 de Julio.

Programo: Sabate vespere festkunveno kun paroladoj kaj danco.

Dimanĉe ekskurso.

Ankaŭ aliaj Esp-istaj P.T.T.-geoficistoj estas kore bonvenaj!

VENU ĈIUJ! ĜIS LA REVIDO!

„DE P.T.T.-ESPERANTIST"

Methodische Esperanto-Leergang

met P.T.T.-uitdrukkingen en gesprekken

kompilita de s-ro J. B. B. Dufrenne

prez. de la Internacia Ligo de Esp-istaj P.T.T.-Oficistoj.

40 lecionoj, 128 paĝoj.

Prezo 0.50 guld.

Mendebla ĉe:

Oficejo de C.B.P.T.T. Marconistraat 96, Den Haag.

En Slikkerveer (Nederlando) jus finiĝis kurso por komencantoj, gvidita de nia eminenta rumana propagandisto, s-ro Sigismundo Pragano. Nia bildo montras la feliĉajn novajn gesamideanojn kaj plurajn anojn de la Riderkerka Grupo „La Verda Stelo", kiu la kurson organizis. — La signitaj personoj estas: 1: s-ro J. v. d. Waal, estrarano. 2: s-ro Emck, prezidanto. 3: s-ro Koerselman, lernejestro. 4: s-ro C. Pot, direktoro de la konata elektromotora fabriko Smit. 5: s-ro S. Pragano. 6: s-ro J. v. d. Es, sekretario. 7: inĝ. Boer, la unua Esp-isto en Slikkerveer. 8: s-ro P. Veltfuizen, estrarano 9: s-ro J. J. Pot, direktoro de la muzikinstituto „Klavarskribo".

La poeto Leo Belmont (staranta en la mezo) jubileas. — Nia eminenta samideano, sinjoro Leo Belmont en Varšavo, la fama pola verkisto kaj oratoro, en ĉi tiu monato festas la 50-jaran jubileon de sia literatura agado. Li fariĝis entuziasma Esperantisto en 1887, tuj post la apero de la unua libreto de D-ro Zamenhof, kaj de tiu tempo li senlace laboras por Esperanto. Liaj pol-lingvaj verkoj ampleksas pli ol cent grandajn volumojn. La kolekto de liaj Esperanto-lingvaj poeziaĵoj (originalaj kaj tradukaĵoj) aperis en 1908 en la libro „Sonoj Esperantaj". S-ro Belmont estas membro de la Esperantista Akademio. Ni kore gratulas al nia meritplena pioniro kaj deziras forton por plua agado.



La 3-an de Junio okazis en Debrecen la 9-a Hungarlanda Esp.-Kongreso. Nia bildo montras Esp-istajn skoltojn, kiuj en la stacidomo solene atendas la gastojn.

Kursanoj de s-ro Marcel Mathieu (signita per ×), instruisto de la Cseh-Instituto en Dijon (Francujo). La bonsukcesa kurso finiĝis la 6-an de Majo kun festeno kaj granda balo, en kiu partoprenis sub la verda standardo pli ol 200 dancantoj.



Bildoj pri la internacia konferenco „Esperanto en la lernejon kaj praktikon", okazinta en Vieno la 19—24-an de Majo. — **Maldekstra bildo:** *La granda kunsidejo de la aŭstria parlamenta palaco, plenplena de konferencanoj.* — **Dekstra bildo:** *S-ro Fritz Stockinger, ministro de komerco kaj trafiko, faras la malferman paroladon. Dekstre de li sidas reg. kons. H. Steiner, prezidanto de la konferenco; R. Kreuz, direktoro de UEA el Genevo; s-ro Werner protokolanto; kalkulkons. Frey; verkisto V. A. Psenner; kortega kons. d-ro Wollmann. — Maldekstre: d-ro Pohl, repr. de la instru-ministerio; d-ro Stollewerk, repr. de la urbestro; d-ro Zehden gazetara ref.; sekcia ĉefo d-ro Uebelhör; min. kons. inĝ. Deinlein; d-ro Lugmayr, ref. de popolklerigado.*

La anoj de la konferenco en Vieno ĉe la aŭstria ŝtatprezidanto, s-ro Wilhelm Miklas, protektanto de la konferenco (sidas en la mezo). Maldekstre de li: s-ro H. Steiner, prez. de la konf. kaj s-ro R. Kreuz. Dekstre: s-ro Uebelhör; s-ro Frey; prof. O. Bujwid el Krakovo; s-ino A. V. Morris, edzino de la usona ambasadoro en Bruselo; prof. M. Sygnarski el Polujo.

La konferencanoj post te-trinkado ĉe la instru-ministro. Sidas (de dekstre): s-ro Uebelhör (malantaŭ li staras s-ro Ed. Stettler prez. de UEA); s-ro Kreuz; d-ro K. von Schuschnigg ministro de instruado; s-ro Steiner; d-ro E. Dollfuss, kanceliero; prof. Bujwid; s-ro Frey (malantaŭ li s-ro Hans Jakob, dir. de UEA).

LA MONDO ESTAS INTERESA

Kiel granda estas la universo? — D-ro Edwin Hubble, la fama amerika astronomo, faris lastatempe gravajn esplorojn per la giganta teleskopo de la observejo sur la Wilson-monto en Kalifornio. Li elkalkulis, ke la diametro de la universo havas la longecon de 6000 milionoj da lum-jaroj (t.e. la distanco, kiun la lumo trakuras dum 6000 milionoj da jaroj). Plue li konstatis, ke la universo konsistas el 500,000,000,000,000 apartaj nebulaĵoj, el kiuj ĉiu estas 80-milion-foje pli luma kaj 800-milion-foje pli granda, ol nia Suno. La nebulaĵoj malproksimiĝas de nia Tero kaj ankaŭ inter si mem en kreskanta rapideco kaj kelkaj havas la rapidecon de eĉ 40,000 mejloj en unu sekundo. La distanco de la ĝis nun malkovrita plej malproksima kosma nebulo estas 450 milionoj da lumjaroj.

★

Kie oni trinkas la plej multan bieron? — Ĝenerale oni opinias, ke la germanoj trinkas la plej multan bieron. Sed tio tute ne estas vera. Laŭ la lastaj statistikoj Belgujo estas tiu lando, kies loĝantoj trinkas la plej multan bieron. En la dua vico staras Britujo, poste sekvas Aŭstrio, kaj nur la kvaran lokon okupas Germanujo.

★

La nevidebla pentraĵo. — Malfacilan taskon havis la londona juĝejo pro la sekvanta hereda kazo: La komercisto Riotau post la mondmilito retiris sin de la negocado kaj dediĉis sin plene al sia amata kolekto de pentraĵoj. Ĉiujare li elspezis milojn da funtoj por pligrandigi la valoran kolekton. En 1925 li decidis fari la testamenton. Ĉar li estis fraŭlo, li testamentis sian havaĵon al siaj du nevoj, Johano kaj Ludoviko. Sciante, ke Ludoviko havas pli multan komprenon pri la arto, li ordonis, ke la bildojn oni dividu inter la du nevoj, sed tiel, ke Ludoviko ricevu la pli valorajn kaj Johano la malpli valorajn. En 1932 s-ro Riotau mortis, oni malfermis lian testamenton kaj precize plenumis lian lastan volon. Johano ricevis 50 pentraĵojn, inter kiuj estis unu sen subskribo. Ĝi prezentis scenon el la franca revolucio. S-ro Riotau neniam ŝatis ĝin. Kiam Johano ekzamenigis tiun bildon per eksperto, okazis io neatendita. La eksperto dum horoj ekzamenadis la anoniman bildon, ŝajne senvaloran, kaj fine farigis pri ĝi foton per Röntgenradioj. Tiam evidentiĝis, ke sub la revolucia sceno estis alia pentraĵo, bela madona figuro, verko de granda itala majstro el la 16-a jarcento. Dum la franca revolucio oni simple surpentris alian bildon, kiel tio okazis en tiu tempo al multaj bildoj de sanktuloj. Nun oni forigis la supran farbon kaj Johano posedis la plej valoran pentraĵon de la tuta kolekto. Tiel stariĝis la malfacila jura demando: al kiu apartenas la bildo? Ludoviko ne sen rajto asertis, ke la supra, la delavita bildo apartenis al Johano, sed la malsupra, la valora bildo laŭ la klara intenco de la mortinto apartenas al li mem. La decido apartenas al la juĝisto, kiu devas havi la saĝecon de Salomono.

La plej malgrandaj homoj, „pigmeoj", vivas en Mez-Afriko. La bildo montras viron kaj virinon, kiuj staras apud mezkreska anglo. La viro estas 127, la virino 122 centimetrojn alta.

★

Kiom valoras la mond-fameco? — Unu franca ĵurnalo faris interesan enketon. Ĝi alvokis sian legantaron ensendi la nomojn de tiuj dek personoj, kiuj estas plej famaj, plej konataj. La redakcio ricevis grandegan amason da respondoj. Post la prilaborado de la respondoj evidentiĝis, ke la plej multajn voĉojn ricevis la jenaj personoj: Henri Bergson, Charles Pelissièr, Lenin, Maurice Chevalier, sinjorino Curie, Raymond Poincaré, Jean Jaurès, Trockij, Landru, Baudelaire, Mussolini kaj profesoro Freud. Ĉi tiu rezulto kaŭzis grandan surprizon, ĉar la redakcio atendis inter la plej konataj nomoj ankaŭ la nomojn de Chaplin, Voronoff, Hitler, Piccard kaj aliaj treege konataj personoj dum la lastaj tempoj. La redakcio eĉ komencis dubi pri tio ke la voĉdonintoj entute scias, je kiuj ili voĉdonis. Tial ĝi elsendis unu anon de la redakcio por demandi kelkajn voĉdonintojn. Li eksciis interesajn aferojn. Unu voĉdoninto opiniis, ke la filozofo Bergson estas komponisto, kiu jam mortis. Iu oficistino sciis pri Lenin nur tiom, ke li estas fama ruso, kaj pri sinjorino Curie ŝi diris, ke ŝi estas klera virino, kiu kun sia edzo faris grandajn esplor-vojaĝojn. Fine unu leganto deklaris, ke profesoro Freud estas simila homo al Hitler. La ĵurnalisto tuj ĉesigis la inform-serĉadon.

★

La blanka muso en la vizio. — La deliro estas terura malsano de drinkuloj. Ĉi tiu malsano kaŭzas ĉe la alkoholisto strangajn psikajn malordojn kaj viziojn. En tiuj vizioj aperas antaŭ la suferanta drinkulo ofte li mem, sed plej ofte okazas, ke en la lastaj horoj la malsanulo luktas kun gigantaj serpentoj kaj vidas ĉie blankajn musojn. Edgaro Poe, la fama poeto, mortis same pro tiu malsano. Ankaŭ li havis antaŭ la morto strangajn viziojn, el kiuj kelkajn li eĉ eternigis en siaj verkoj. Oni konas la ĝeneralan kutimon de la drinkuloj, ke ili ofte kvazaŭ kaptadas muŝojn ĉe la nazo, ĉar ili havas la senton, ke muŝoj eksidas sur la nazo. Ĉi tio estas unu el la simptomoj de la malpli grava alkohol-veneniĝo. La vizio pri blankaj musoj estas jam signo de grava, nekuracebla malsano.

★

Kiu ricevas la plej multajn poŝtaĵojn? — Laŭ informo de la itala gazetaro la papo estas tiu, kiu ricevas la plej grandan poŝton. Ĉiutage proksimume 27,000 poŝtaj sendaĵoj eniras en la Vatikanon. La duan lokon okupas la prezidanto de Usono, la trian la reĝo de Britujo. Ankaŭ Hindenburg, la prezidanto de Germanujo, ricevas konsiderindan kvanton. Sed la poŝto de la cititaj potenculoj fariĝas malgranda en komparo kun tiuj leter- amasoj, kiujn ricevadas ĉiutage la famaj film-steloj. Ĝis nun la rekordon tenas la fama film-aktorino Clara Bow en Ameriko, kiu en sia bona epoko ricevis en unu tago pli ol 35,000 leterojn. Jam en la vagonaroj kurantaj al Los Angeles oni elektis la leterojn al ŝi adresitajn, kaj apartigis ilin en specialajn poŝt-sakojn. La sakojn oni transportis al la film-oficejo, kie kelkaj sekretarioj de la filmstelo havis la dubindan plezuron malfermi tiujn leterojn kaj ... legi ilin.

La „SANOVITE" nutras, fortigas kaj faras bonan apetiton.

Al la venko!

Post multjara batalado
Falos ĉiu barikado;
Fine el multlingva mondo
Kreskos unulingva rondo.
Ni venkos!

La homaro, sopiranta,
Kaj la pacon esperanta,
Iam laŭdos Esperanton
Kiel veran pacfaranton.
Ni venkos!

Pligrandiĝos la frateco
Kune kun la amikeco
Per la verda stelkokardo
Kaj la Zamenhof-standardo.
Ni venkos!

MATHIEU CORNET
en Tegelen (Nederlando).

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Edziĝo. — F-ino *Margareto Janicsák* en Budapešto edziniĝis kun s-ro *Karlo de Szabó*, polica direktoro en Budapešto. — Koran gratulon!

— F-ino *Margot Rudloff*, abonantino de La Praktiko en Berlino, edziniĝis kun s-ro *Walter Kermann*. — Koran gratulon!

Morto. — En Boulogne-sur-Mer (Francujo) mortis *s-ino Lucien Sergeant*, vicprezidantino de la Nordfranca Esp-a Federacio. Ŝi estis malnova fervora Esp-istino, partoprenis nian 1-an universalan kongreson. La kaŭzo de ŝia morto estis embolio. La farita operacio ne povis helpi.

— S-ro *Léon Beaumel*, prez. de la Esp.-Grupo en Toulouse (Francujo), abonanto de La Praktiko, mortis en Toulouse.

— En Tallinn la 1-an de Junio subite mortis s-ro *Herman Prodel*, malnova ŝatata samideano, estinta estrarano de la Esperanto-Asocio de Estonio.

— La 13-an de Majo mortis en Malmö (Svedujo) s-ro *Anders Andersson*, en la aĝo de 77 jaroj. Li estis la plej maljuna Esp-isto en la urbo.

— La 22-an de Aprilo mortis en Örebro (Svedujo) s-ro *Ture Olsson*, en la aĝo de 29 jaroj. Li estis tre fervora laboranto por Esperanto.

— La 8-an de Junio mortis en Rauwerd (Nederlando) s-ro *J. H. Oterdoom*, protestanta pastro, abonanto de La Praktiko. Li estis tre agema propagandisto de Esperanto.

— *F-ino Eliza Ann Lawrence*, la „patrino de la brita Esperantistaro", honora vicprezidantino de la Brita Esperantista Asocio, mortis en Wimbledon la 4-an de Aprilo, en la aĝo de 82 jaroj.

F-ino Zamenhof parolos per radio. — Sabate, la 7-an de Julio vespere je la 20,10 horo f-ino Lidja Zamenhof faros Esperanto-lingvan paroladon pri la Ĉe-metodo, de la radio-stacio Lyon-la-Doua.

La kongreso en Stokholmo promesas grandan sukceson. La sveda ĉefurbo preparas sin al la plej bona akcepto de la ĉiulandaj gastoj. La kongresa komitato starigis Esperanto-kursojn por kelneroj, policistoj, poŝtistoj k.t.p. Ankaŭ grupo de aktoroj lernas Esperanton, por prezenti dum la kongreso en Esperanto-lingvo la komedion de Strindberg: „Ludi per fajro". Aliĝis jam pli ol 1300 kongresanoj. La kongresa komitato petas, ke oni kunportu nacian kostumon, por la internacia balo.

Propono pri nova internacia lingvo. — Profesoro Rodolfo Lenz opinias, ke Esperanto ne estas taŭga kiel internacia lingvo. (Ĉu li konas Esperanton? Laŭ niaj spertoj tiaj „opiniantoj" ne kutimas ĝin koni.) Li proponas, ke la tuta mondo lernu la lingvon „papiamento", kiun la indiĝenoj de la insulo Curaçao parolas. Ni petas la respektindan profesoron, ke li unue traduku en tiun lingvon la librojn, kiuj ĝis nun aperis en Esperanto, kaj post tio ni komencos pritrakti lian proponon.

Du nederlandaj karavanoj al Stokholmo. — Krom la ŝipa karavano, pri kiu ni jam raportis, iros al la Stokholma kongreso ankaŭ vagonara karavano, sub la gvidado de nia ŝatata kunlaboranto s-ro S. Pragano. Ĉi tiu karavano forveturos la 1-an de Aŭgusto vespere kaj ĝi pasos tra Hamburgo, Kopenhago kaj Malmö. La partoprenantoj de ĉi tiu karavano povos revojaĝi per la ŝipo. Detalajn informojn oni povas ricevi de la organizanto: s-ro Jakob Telling, ĉefdelegito de UEA, Bellevoijsstraat 36, Rotterdam.

Honorigo. — S-ro Ivan H. Krestanov, abonanto de La Praktiko en Sofio (Bulgarujo), fininte studon ĉe la diplomati-konsula fako de la Libera Universitato en Sofio, ricevis monpremion kaj laŭdon pro verkado de tezo: „Nuntempa Albanio".

La sveda „Eldona Societo Esperanto" dum la pentekosto havis sian jarkunvenon en Södertälje. La estrara raporto montris tre bonan rezulton. La vendado dum la pasinta jaro valoris 42,286.— svedajn kronojn; tiu sumo estas la plej granda ĝis nun atingita. En la pasinta jaro la societo eldonis 70,000 libro-ekzemplerojn, kaj ĝi baldaŭ eldonos Svedan Antologion.

Franca Esperanto-Kongreso. — La 31-a nacia kongreso de la francaj Esperantistoj okazis en Bordeaux dum la pentekostaj tagoj. La prezentitaj raportoj montris grandan vigliĝon kaj fortiĝon de la Esperanto-movado en Francujo.

Raymond Schwartz en Nederlando. — La nederlandaj Esperantistoj havis agrablan okazon interkonatiĝi kun nia fama samideano s-ro R. Schwartz, aŭtoro de la konataj bonhumoraj verkoj kaj redaktoro de La Pirato, kiu kune kun sia edzino kaj kun f-ino Marcelle Toth el Parizo pasigis la pentekostajn tagojn en Hago kaj Arnhem. En la nomitaj urboj okazis du grandsukcesaj kunvenoj, en kiuj ges-roj Schwartz prezentis gajajn kaj spritajn pecojn el la programoj de la iama Esperanta kabaredo „Verda Kato", kun muzika akompano de f-ino Toth.

Kie okazos la sekvontaj kongresoj? — La 27-a universala Esperanto-kongreso okazos antaŭvideble en Romo, en la proksima jaro. — La 28-an kongreson por la jaro 1936 intencas inviti la Esperantistaro de la mondfama franca urbo Nice.

S-ro Dolfa Bartoŝik, nia ŝatata ĉeha kunlaboranto, ĵus finis interesan kaj belan laboron: li ellaboris artoplenajn gravurajojn por ilustri kvar librojn, el kiuj tri estas bibliofilaj. Unu el la libroj estas la lukse eldonita poemaro de inspektoro V. Sehnal, iama forta kontraŭulo de Esperanto. Li nun dediĉis belan poemon al s-ro Bartoŝik, instigante lin elteni en la laborado por Esperanto. — S-ro Bartoŝik ricevis de la ĉehoslovaka instruministerio unu-jaran forpermeson por gvidi Ĉe-metodajn kursojn en eksterlando.

Ekzamenoj en Nederlando. — La Nederl. Ekzamena Komitato sciigas, ke la lastaj tri ekzamenoj havis la jenajn rezultojn: En Groningen por A-diplomo el 81 kandidatoj sukcesis 61; en Bergen-op-Zoom por A-diplomo el 32 kandidatoj sukcesis 24; en Hago por B-diplomo el 54 kandidatoj sukcesis 32.

Unua Nederlanda Kongreso de Katolikaj Esperantistoj okazos la 15—17 de Aŭgusto en 's-Hertogenbosch (Nederlando). Per ĝi estos festata la 25-jara ekzistado de la nederlanda katolika Esp.-ligo „Nederlanda Katoliko". La protektantoj de la kongreso estas ĉefepiskopo Jansen kaj episkopo Diepen. En la honora komitato estas pluraj episkopoj kaj ministroj. — La ampleksa programo enhavas multajn gravajn punktojn. Interesiĝantoj turnu sin al la sekretario: s-ro Nico Hoen (v. Noremborghstraat 99 en 's-Hertogenbosch). Ankaŭ alilandaj kongresanoj estas bonvenaj. Ĝis nun jam aliĝis multaj francaj kaj belgaj partoprenontoj. La kotizo estas 3 sv. fr. La adreso de la kasisto: s-ro M. v. d. Bruggen, Pensmarkt 12—14, 's-Hertogenbosch (nederlanda poŝtkonto: 5987).

Regiona kongreso en Francujo. — La kongreso de la Nordfranca Esp.-Federacio okazis la 10-an de Junio en la urbo Saint-Omer, kun granda sukceso. Partoprenis ankaŭ s-ro P. Petit, sekretario de la Franca Societo por la Propagando de Esp. S-ro E. Deligny, nia malnova meritplena pioniro, ĝisnuna prezidanto de la Federacio, estis elektata kiel honora prezidanto. La nova prezidanto de la Federacio estas s-ro Alberic Humez, la agema prezidanto de la Esp.-Grupo en Douai.

Blindula kongreso. — La 12-an de Majo okazis en Amsterdamo la 5-a kongreso de la nederlandaj blindaj Esp-istoj, sub la prezido de s-ro Israëls. La ĉefaj temoj estis: la eldono de brajle presita vortaro, por kiu celo oni diligente kolektas monon; plue aranĝo de loterio kun du premioj: ora kaj arĝenta poŝhorloĝoj. En la festkunveno paroladon faris f-ino J. Baudin el Svislando.

Per aŭtobusoj de Nederlando al Hispanujo. — La nederlandaj laboristaj Esperantistoj organizas aŭtobusan karavanon al la nunjara SAT-kongreso, kiu okazos dum la 3-8 de Aŭgusto en Valencia (Hispanujo). Ĝis nun aliĝis al tiu karavano pli ol 70 personoj. La partopreno (veturo tien kaj reen, manĝado kaj dormloko) kostas entute 65 guldenojn.

Nova junulara gazeto. — S-ino E. van Veenendaal-Bouwes en West-Graftdijk (Nord-Holando) intencas eldoni neŭtralan, interesan kaj malmultekostan Esperanto-gazeton por gejunuloj kaj petas la subtenon de ĉiu interesiĝanto.

Nova eldona entrepreno. — La presejo „Helmond" en la nederlanda urbeto Helmond decidis eldoni serion de interesaj romanoj sub la nomo „Ideala Esperanto-Biblioteko". La unua numero de la serio estos la romano Blua Sango de W. Wood, en traduko de W. van Zoest.

Brazilo. — S-ro inĝ. Couto Fernandes, prezidanto de Brazila Ligo Esp-ista, faris gravan paroladon pri „Esperanto en la poŝto kaj telegrafo" en la ĉeesto de multaj altranguloj kaj eminentuloj. Li prezentis al la estraro de la brazila poŝto la grandan kolekton de gazetartikoloj pri la brazilaj poŝtkartoj kun Esperanto-teksto.

Ĉeĥoslovakujo. — Kun bona sukceso finiĝis la kurso de s-ro D. Bartoŝik en *Veseli n/M.* Partoprenis interalie 11 geinstruistoj, kaj post la kurso fondiĝis Esp-ista Rondeto. En tiu regiono estas rimarkeble granda favoro al Esperanto. Lerneja inspektoro s-ro J. Bureš vizitis la kurson kaj esprimis tre laŭdan opinion.

Danujo. — La kursoj de s-ro G. Staberg en *Galtrup* finiĝis la 8-an de Junio, kun granda sukceso. Fondiĝis „Morsö Esperanto-Societo" kun 80 anoj. La societo eldonas propran maŝinskribitan gazeton „Verda Insulo", redaktatan de s-ro G. Staberg.

Francujo. — En *Puteaux* kurson gvidas s-ro R. Delattre.

Nederlando. — La 28-an de Majo kun bona sukceso finiĝis en *Assen* la kurso de s-ro F. A. G. Boermans. Post la finleciono estis agrabla kunesto, en kiu oni adiaŭis la kursgvidinton, kiu translokiĝis al Amsterdamo. — La 10-an de Majo okazis grandsukcesa Esperanto-ekskurso al la fama nederlanda insulo *Texel*. Partoprenis 117 personoj. La ekskurso estis filmata. Dum la ekskurso je la propono de s-ro J. M. Duinker la Teksela Esp.-Federacio decidis starigi Esperanto-monumenton. Por tiu celo oni bezonas 400 guldenojn. La kvarono de tiu sumo tuj kolektiĝis. — La 10-an de Junio okazis en *Hago* interurba Esp-ista kunveno, en kiu s-ino A. Blanco-Hoevers faris interesan lumbild-paroladon pri sia ĉirkaŭmonda vojaĝo, dum kiu ŝi ren-

kontis multajn Esp-istojn. — S-ro Y. v. d. Schaaff en *Leeuwarden* gvidas novan kurson por grupo de instruistoj.

Norvegujo. — La ĝenerala kunveno de la Norv. Esp-ista Ligo la 20-an de Majo unuanime akceptis la jenan rezolucion: „N.E.L. aliĝas al la rezolucio kaj deklaro de la 21-a Japana Esperanto-Kongreso en Kioto pri 'vere internacia Esperanto'. N.E.L. klare vidas la grandan danĝeron por nia lingvo, kuŝantan en la troa neologismemo kaj forte malrekomendas ĝin. Tute speciale ĝi atentigas pri la tendenco forigi la literon ĥ el la Esp-a alfabeto kaj pri la uzo de landnomoj finiĝantaj per -io, kiuj ambaŭ estas kontraŭfundamentaj kaj rigardindaj kiel neologismoj."

Svedujo. — En *Leksand* la 2-an de Junio D-ro Linge, lerneja inspektoro, vizitis la kurson de s-ro T. Morariu kaj esprimis sian plenan kontentecon. — La kursoj de s-ro T. Morariu finiĝis per gaja kunveno en Leksand. Specialan ĉarmon donis al la kunveno, ke la kursaninoj vestis sin per dalekarliaj (svedaj) naciaj kostumoj, kaj s-ino L. Morariu per rumana kostumo. — La 1-an de Julio ges-roj Morariu parolados en la somera kunveno de la societo „Excelsior" en *Lidköping*.

Svislando. — Grupo de nederlandaj Esp-istaj fervojistoj faris en la monato Majo viziton al Svislando. La svisaj samideanoj ĉie tre gastame akceptis ilin kaj multe agrabligis ilian viziton. La vojaĝo faris ankaŭ gravan propagandan efikon.

KONKURSOJ

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

ĜENERALAJ REGULOJ:

1. *En la konkursoj rajtas partopreni ĉiu, ankaŭ ne-abonantoj.*
2. *Ĉiun solvon oni devas sendi sur aparta papero aŭ poŝtkarto.*
3. *Ĉe ĉiu solvo oni devas aljgui la koncernan konkurs-kuponon.*
4. *Al la solvo oni devas aldoni sur la sama papero la precizan nomon kaj adreson de la solvinto, per tre klara skribo.*
5. *Ni rekomendas, ke pluraj personoj sendu siajn solvojn kune en unu koverto, por ŝpari poŝtkostojn. Adreso: LA PRAKTIKO, Rioouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando.*
6. *La nomoj de tiuj personoj, kiuj ricevis premiojn, aperos en LA PRAKTIKO. La premioj konsistas el libroj kaj aliaj Esperantaĵoj, sendotaj afrankite al la gajnintoj.*

97-a konkurso.

MATEMATIKA PROBLEMO.

(Ensendis s-ro L. Ponthir en Jemeppe s/M., Belgujo.)

Mi havas dufoje la aĝon, kiun vi havis, kiam mi havis la aĝon, kiun vi nun havas.

Kiam vi havos la aĝon, kiun mi nun havas, kune ni havos 63 jarojn.

Demando: Kiujn aĝojn ni havas nun?

Inter la ensendintoj de la ĝusta solvo ni disdonos 5 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis la fino de Septembro.

Bonvolu observi la konkursan regularon.

98-a konkurso.

ŜAK-ENIGMO

Ĉi tiu enigmo kaŝas poemeton de Julio Baghy. Ĝi konsistas el 74 literoj. Oni povas solvi la enigmon laŭ la ĉeval-salto sur la ŝak-tabulo. La komenco estas ĉe la stelo.

r	a	ŝ	d	p	o	k	a	l	a	u
r	u	e	j	a	o	a	ŝ	l	m	a
v	a	e	a	J	g	p	j	l	d	p
★	u	b	u	n	o	o	B	o	m	a
s	e	j	a	k	s	i	a	c	s	o
n	n	t	a	r	t	r	o	m	e	j
n	l	s	e	u	f	t	s	o	p	i

Inter la ensendintoj de la ĝusta solvo ni disdonos 5 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la fino de Septembro.

Atente observu la konkursajn regulojn!

99-a konkurso.

MOZAIK-ENIGMO

(De s-ro E. W. v. d. Burgh en Leiden.)



En ĉi tiu desegnaĵo metu unu literon al ĉiu angul-punkto, tiel, ke ĉiu figureto de la mozaiko formu unu vorton. La komencon de la vorto montras la sageto.

La figuretoj de la mozaiko donas la jenajn 59 vortojn: — 1. Granda akvo. — 2. Vira nomo. — 3. Parto de la floro. — 4. Bongusta mara fiŝo. — 5. Nomo de arbo. — 6. Speco de mara fiŝo. — 7. Knabo sen gepatroj. — 8. Malkomenco. — 9. Frato de la patro. — 10. Demanda vorto. — 11. Fortega besto. — 12. Loko sub la tero. — 13. Inter du landoj estas. — 14. Rivero en Afriko. — 15. Nomo de tre konata gazeto. — 16. Ĝi donas guston al niaj manĝaĵoj. — 17. Purigilo. — 18. Trinkilo. — 19. Prepozicio. — 20. Ne povanta paroli. — 21. La suno donas ĝin. — 22. Bulba floro. — 23. Parto de la buŝo. — 24. Prepozicio. — 25. Vira nomo. — 26. Inter du montoj estas. — 27. Patro de la patro. — 28. Kreskaĵo. — 29. Frukto. — 30. La najtingalo kaj la kantistino faras ĝin. — 31. Kolekti homojn. — 32. Ujo. — 33. Ruslanda ordono. — 34. Prepozicio. — 35. Malplezura sento. — 36. La patrino de la homaro. — 37. Movi supren. — 38. Sub la lokomotivo estas. — 39. Abomena mambesto. — 40. Organo en la homa korpo. — 41. Haŭtmalsano. — 42. Parto de la teatraĵo. — 43. Parto de granda konstruaĵo. — 44. Norda lando kun oro. — 45. Ĉirkaŭ la pentraĵo estas. — 46. Speco de teatraĵo. — 47. Tia besto estas la hundo. — 48. Parto de la homa korpo. — 49. Sur la pordo estas. — 50. La rado havas ĝin. — 51. Malkun. — 52. La plej ofta verbo. — 53. Montra vorto. — 54. Scienco pri la moralo. — 55. Havi prezon. — 56. Demanda vorto. — 57. Montra vorto. — 58. Per ĝi oni povas gajni. — 59. Sen alia homo.

La dika linio donas gravan admonon al la Esperantistoj.

Por ne difekti la gazeton, estas konsilinde kopii la desegnaĵon sur travideblan paperon kaj sur ĝi serĉi la solvon. Inter tiuj, kiuj ensendas la 59 vortojn kaj la gravan frazon, ni disdonos 5 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la fino de Septembro.

Precize plenumu la konkursajn regulojn.

Kupono por la 97-a	Kupono por la 98-a	Kupono por la 99-a

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj gluu ilin sur viajn solvojn.

LA REZULTO DE NIAJ KONKURSOJ

79-a konkurso. En la maja numero de La Praktiko ni jam komunikis, ke por ĉi tiu geometria konkurso envenis solvoj de 39 personoj, kaj ke ni transsendis la solvojn por prijuĝo al s-ro L. A. Ware en East-Orange (Usono), kiel plej kompetenta persono por tiu tasko. S-ro Ware ekzamenis la solvojn kaj decidis pri la disdono de la premioj. Laŭ la raporto de s-ro Ware oni ĝenerale faris la solvon en la jenaj du manieroj:



Figuro 1



Figuro 2

Klarigo al la figuro 1:

1) Faru la cirklon *abcĉg* kun centro *o* kaj radio *ao*.
2) Dividu ĝin en ses partojn *a, b, c, ĉ,* kaj tiel plu, per la radio *ao*.
3) Per la centro *a* kaj radio *ac* faru la arkon *cd*. Per la sama radio kaj centro *ĉ* faru la arkon *db*. La du arkoj sin krucas ĉe *d*.
4) Per la centroj *a* kaj *ĉ* kaj la radio *od* faru la arkojn ĉe *e*, kiuj krucas la arkon *bc* ĉe la mezo.
5) Simile estas trovata la punkto *g*. La serĉataj angulpunktoj de la kvadrato estas: *a, e, ĉ, g*.
6) Ĉi tiu solvo havas variaĵojn. Ekzemple: post la trovo de la punkto *e* per la radio *ao* fari la punkton *f*, por ricevi la kvadraton *aoef*.

Klarigo al la figuro 2:

1) Faru la jenajn cirklojn kaj arkojn:
   cirklon *1* kun centro *o* kaj radio *ao*
   arkon *b* „ „ *a* „ „ „
   „ *c* „ „ *b* „ „ „
   „ *3* „ „ *c* „ „ „
   „ *2* „ „ *ĉ* „ „ „
   „ *5* „ „ *d* „ „ „
   „ *4* „ „ *e* „ „ „
   „ *7* „ „ *f* „ „ „
   „ *6* „ „ *g* „ „ „
   „ *8* „ „ *ĝ* „ „ „
2) Nun la punktoj *a, o, ĉ, e, g, h* estas sur rekta linio.
3) Faru la arkon *9* kun centro *h* kaj radio *ĉh* (= *3r*), (*r* = *ao*).
4) Faru la arkon *10* kun centro *o* kaj radio *ah* (= *5r*) por trovi la punkton *h*.
5) Faru la arkon *11* kun centro *ĉ* kaj radio *hh*, por trovi la punkton *j*.
6) La punktoj *ĉ, h, h,* kaj *j* estas la serĉataj angulpunktoj de la kvadrato.

El la 39 ensenditaj solvoj nur 19 estis bonaj. La kvar premiojn ricevis la jenaj solvintoj, kiuj ensendis la plej bonajn solvojn: **1.** S-ro **A. Lienhardt** en Montigny-les-Metz (Francujo). — **2.** S-ro **Cheminais** en Hautmont (Francujo). — **3.** S-ro **E. W. v. d. Burgh** en Leiden (Nederlando). — **4.** S-ro **E. Amor Rolan** en Orense (Hispanujo).

Kun gratulo ni citas la nomojn (en alfabeta vico) de la ceteraj 15 ensendintoj de bonaj solvoj: S-ro inĝ. **E. Aprosio** en Piani di Camporosso (Italujo). — S-ro **A. Carlin** en Trollenäs (Svedujo). — S-ro **N. Davydov** en Perovo (Sovjet-Unio). — S-ro **H. Kaiser** en Köln-Ehrenfeld (Germanujo). — S-ro **G. Legros** en Condé-sur-Noireau (Francujo). — S-ro **J. v. Mourik** en Batavia (Nederlanda Hindujo). — S-ro **L. Ollivaud** en Nice (Francujo). — S-ro **L. Ponthir** en Jemeppe-sur-Meuse (Belgujo). — F-ino **N. Rademaker** en Leiden (Nederlando). — S-ro **H. Rapaille** en Fourmies (Francujo). — S-ro inĝ. **O. Rygg** en Trondhjem (Norvegujo). — S-ro **J. Schneider** en Burghausen (Germanujo). — S-ro **J. Soyeur** en Seraing (Belgujo). — S-ro inĝ. **Sabtaj** en Malakoff (Francujo). — S-ino **W. de Virieu Gerdès** en Saint-Raphaël (Francujo).

Al s-ro L. A. Ware ni kore dankas pro ĉi tiu interesa konkurso kaj pro la farita laboro.

83-a konkurso. Sesdek-ses personoj solvis ĉi tiun ampleksan gramatikan taskon, kiu aperis en la 24-a numero de La Praktiko. Ni promesis 10 premiojn al tiuj personoj, kiuj ensendas solvon tute similan al la solvo de la redakcio. Intertempe, en nia 29-a numero sur la 3-a paĝo, aperis la ĝusta solvo. La konkursa komitato komparis la ensenditajn solvojn kun la oficiala solvo kaj konstatis, ke neniu solvo estas tute simila. **Pro tio bedaŭrinde neniu povas ricevi premion.** Sed ni estas certaj, ke la solvintoj ne estas pro tio malfeliĉaj. Ni ja scias, ke ili faris la laboron ne por premio, sed por ekzerco. Ke la solvoj ne estas egalaj kun nia oficiala solvo, tio ankoraŭ ne signifas, ke ĉiu ricevita solvo enhavas erarojn. Ni trovis kelkajn solvojn, kiuj estas tute korektaj gramatike, sed kiuj kelkloke uzis alian, ankaŭ bonan, gramatikan formon.

Ni kore gratulas al ĉiu partopreninto de ĉi tiu konkurso, pro la farita granda laboro, kaj ni petas, ke ili komparu sian solvon kun la oficiala solvo, kaj tie, kie ili trovas diferencon, ili serĉu la klarigon en sia lernolibro aŭ en la kluba kunveno.

84-a konkurso. La redakcio ricevis de 110 personoj la solvon por ĉi tiu konkurso. La ĝusta solvo estas: **ESPERANTODOMO.** La konkursa komitato dislotis la promesitajn sep premiojn, kaj la bonŝancaj gajnintoj estas la jenaj personoj: S-ro **J. Bajema** en Leeuwarden (Nederlando). — S-ro **J. Bourniche** en Soissons (Francujo). — S-ro **F. Pokorny** en Novy-Jičin (Ĉeĥoslovakio). — S-ro **P. Princis** en Usma (Latvujo). — S-ro **H. Reschke** en Oliva (Danzig). — S-ro **V. Tartlan** en Valga (Estonio). — S-ro **A. Vegners** en Riga (Latvujo).

GEJUNULOJ!

Lernu la lingvon de la estonteco!
Venu kaj varbu kursanojn al la internacia Esperanto-kurso de Andreo Cseh en Arnhem, 16-25 Aŭgusto!

Jam aliĝis kursanoj el diversaj landoj.
Specialaj malaltigitaj prezoj!
Detalaj informoj troveblaj en la Aprila numero de La Praktiko sur la lasta paĝo!

LIBRO-LOTERIO de LA PRAKTIKO

Rapidu aĉeti lotojn, por ke la tirado povu baldaŭ okazi! Legu la detalajn informojn en la Januara numero!

LA LISTO DE LA PREMIOJ (DAŬRIGO):

114 **Nobela Peko.** Novelo de Sadoveanu. El la rumana lingvo tradukis T. Morariu.
115 **La teatra korbo.** Noveloj de Julio Baghy.
116 **Internacia teatrajaro.** Kvin teatraĵoj de diverslandaj aŭtoroj.
117 **Preter la vivo.** Poemaro de Julio Baghy.
118 **Internacia Frazaro.** De diverslandaj aŭtoroj.
119 **La tragedio de la homo.** De E. Madách, trad. D-ro K. Kalocsay.
120 **La malŝparulo.** Teatraĵo de F. Raimund.
121 **La morto de Smail Aga Ĉengijiĉ.**
122 **Kurioza okazaĵo.** Komedio de C. Goldoni.
123 **Rememoroj de Esperantisto.** De A. D. Atanasov.

Daŭrigota

GARDATAJ LOTOJ (daŭrigo). — Adamek 2253—2257; Ambroise 6240—6250; Bartošik 5944—5954; s-ino Bijleveld 5966—5976; f-ino Bijleveld 5977—5987; Deligny 6026—6036; Duin 6229—6235; Erichsen 6267—6277; Felix 6004—6014; Fraser 6141—6151; Galarova 5955—5965; Hoche 2222—2223; Jacobs 6037—6047; Klimeš 5878—5888; Lörtscher 6278—6288; Martensen 5988—5998; Perrochon 6207—6217; Ponthir 5900—5910; Smit 6236—6239; Soneson 5922—5943; Sörensen 6251—6255; Spielmann 6218—6228; Stenström 5911—5921; Tarnow 6256—6266; Thomas 6289—6299; Tömmerup 6333—6343; Vallé 2270—2271; Vrânceanu 6152—6173; Willers Holman 6048—6107.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respondmarkon.

S-ro Ch. en H. (Franc.) — 1. La vorto „pieco" ne estas neologismo, sed simpla derivaĵo de la radiko „pia". — 2. „Ŝvarmi" estas preseraro. Korekte: „svarmi". — 3. Via propono, ke ni publikigu liston de la uzataj, sed ne konsilindaj vortoj, estas tre bona. La tasko ellabori tian liston apartenas al la jus starigita „kontrola sekcio" de nia Akademio. Se la Akademio plenumos tiun taskon, ni volonte publikigos la liston.

S-ro S. W. en G. (Ĉeĥosl.) — La vorto „lexicon" ne estas Esp-a vorto. Tamen ĝi estas la nomo de la nova Esp-a kartludo, ĉar tiu kartludo estas ne Esp-a, sed angla eltrovaĵo kaj kiam oni faris la Esp-an eldonon, oni senŝanĝe transprenis ĝian originalan, leĝe registritan nomon. Sur la Esp-a eldono estas aldonita la Esp-lingva alnomo: „De A ĝis Zo".

S-ro J. W. en H. — Vi skribas: *„Estas ĉiam agrablaĵo por mi solvi la enigmojn de La Praktiko, eĉ se mi ne apartenas al la feliĉaj premiitoj. La laboro estas ĉiam instrua, sed mi opinias, ke multaj personoj ankoraŭ ne komprenas tion."* Ni ĝojas pro via tre ĝusta kompreno pri niaj konkursoj. Efektive, ni publikigas ilin kiel treege efikajn ekzercilojn. Niaj legantoj agus en sia propra intereso, se ili klopodus solvi ĉiujn enigmojn. Ne la premio estas la grava, sed la bonega lingva ekzerco.

S-ro P. F. S. en H. — Al s-ro F. Redondo vi povas adresi jene: Redakcio de Hispana Esperanto-Gazeto, Sagasta 10, Madrid.

S-ro S. J. H. en S. (Ned.) — Ni gratulas pro via poemeto. Ĝi estas lerte farita, sed estas en ĝi kelkaj malbonaj partoj, pro kio ni ne povas ĝin publikigi. Bonan daŭrigon!

S-ro O. K. en A. — Viaj poemoj estas tro malfortaj. Vi devas ankoraŭ multe ekzerci.

D-ro E. K. en B. (Hung.) — 1. Sindefendo = defendi sin mem. — 2. Avantaĝo = elöny; avantaĝe = elönyösen.

S-ro E. C. en R. (Ned.) — 1. Forigenda = kion oni devas forigi. — 2. Konfuzenda = kion oni devas konfuzi. — 3. Antaŭiĝi = iri antaŭen. — 4. Alinterna = kio estas al la interna flanko.

S-ro J. R. P. en S. C. — 1. La *kolimbo* estas mergulo (= merga birdo). — 2. Pri „akrido" kaj „lokusto" vidu la 38-an punkton en nia rubriko ATENTU! — 3. *Bizono* = amerika sovaĝa bovo. — *Uro* = eŭropa sovaĝa bovo. — 4. *Kulo* kaj *moskito* estas diferencaj, sed parencaj insektoj. — 5. Tropa, tropika, tropikala. Oni uzas la vortojn „tropa" kaj „tropika". — 6. *Psiko* = la spirito; *psikologio* = la scienco pri la psiko; *psikologo* = la scienculo de la psikaj aferoj. — 7. La vorto „amo" estas ĝenerala. La vorto „amoro" signifas nur la korpan amon. — 8. Pri *argano* vidu nian rubrikon ATENTU! — 9. *Jazo* kaj *ĝazbando* estas la nomoj de la moderna muziko. La Esp-ista Akademio ankoraŭ ne elektis la ĝustan formon, kaj verŝajne eĉ ne faros tion, ĉar ĝis kiam la tempo de la decido alvenos, tiu muziko estos jam elmodiĝinta kaj forgesita.

S-ro N. V. en B. (Rum.) — „Nia ŝtato jus eldonis novajn poŝtmarkojn." La frazo estas bona.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — Petu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

PETO. — Unu aŭ du nederlandaj knabinoj, 20-jaraj, estus tre dankemaj, se eksterlanda Esperantisto akceptus ilin kiel pagantajn gastojn. Adreso: S-ro Schoorl, Straatweg A 22 en Alkmaar (Nederlando).

OFICO SERĈATA. — Bonedukita nederlanda fraŭlino (23-jara), Esperantistino, posedanta diversajn diplomojn (real-lernejo, mastruma lernejo, stenografio, maŝinskribado), serĉas ian oficon en Nederlando, Svislando, Francujo aŭ suda Anglujo. Leterojn oni bonvolu sendi al La Praktiko sub la devizo: „Abonantino".

ADRESŜANĜO. — S-ro F. A. G. Boermans sciigas al siaj geamikoj, ke li de la 1-a de Junio loĝas en Amsterdam, Da Costastraat 15. II. (Malnova adreso: Veenestraat 127 en Assen.)

FILATELISTOJ! — Kiu sendas al mi 50—100 diversajn bonajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos de mi la saman nombron aŭ valoron de Nederlando kaj ĝiaj kolonioj. Interŝanĝado laŭ katalogo Yvert. — S-ro J. den Toonder Pz., Lange Zelke 3 en Vlissingen (Nederlando).

PETO. — La Bruĝa Grupo Esperantista organizas standon „Esperanto & Komerco" ĉe la Bruĝa Komerca Foiro (11—20 de Aŭgusto 1934) kaj petas alsendon de interesa ekspozicia materialo. Adreso: Ŝoseo de Blankenberge 44, Bruĝo (Belgujo). — Kartoj de aĉetanto, rajtigantaj al senpaga eniro, estas haveblaj por 1.— franko. Pagu al la poŝtĉekkonto N-ro 211492 de Ch. Poupeye en Bruĝo.

„BONHUMORO", la fama verko de Paul Nyssens, instruas al vi la arton esti ĉiam gaja, por havi feliĉan vivon kaj povi feliĉigi la aliajn homojn. — 174 paĝoj. Prezo kun sendkosto: 1.25 ned. guld. Aĉetebla ĉe La Praktiko.

BELAJ BILDKARTOJ. — Dek-du malsimilajn il. kartojn pri la sud-sveda universitata urbo Lund kun Esp-a teksto vendas: s-ro Gösta Laurin, Kung Oskars Väg 3 en Lund (Svedujo). Pagu per bankĉeko 1.50 sv. kr. aŭ sendu ses respond-kuponojn.

!! APERIS !!

ĉe la **Esperanto Instituto, poŝtfako 81, VENLO (Nederlando)** 48-paĝa ANEKDOTARO de S. Grenkamp-Kornfeld:

„ĈU VI AŬDIS TION?"

Libro por ĉies monujo! Prezo —.60 guld. + 10 %.

Ĉiuj pagoj estu je la nomo de la administranto: J. M. van Meegeren.

Poŝtĉekkontoj:

Venlo 230505 — Stockholm 74231
Bruxelles 350389 — Kobenhavn 24929

Aliaj pagoj ankaŭ permesataj, kaj bonvenaj.

Ĉiu Esperantisto devas posedi kaj legi la gravan libron:

Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado

verkita de *J. R. G. Isbrücker*, membro de la Esperanista Akademio.

Necesa por preparo al ekzamenoj!

Nova eldono, kompletigita per la faktoj ĝis la lastaj tempoj.

Prezo: 0.75 ned. guld.

Aĉetebla ĉe la eldonejo de La Praktiko.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj.

VORTARO

En ĉi tiu rubriko ni klarigas tiujn vortojn, kiujn niaj legantoj ne trovas en siaj ordinaraj vortaroj. Ensendante la vortojn oni bonvolu ankaŭ indiki la lokojn (libro, paĝo, linio), kie ili aperis.

Agnoski = rekoni kiel justan aŭ veran.
Alcedo = latina nomo (komplete: *alcedo hispida*) de fiŝmanĝanta mar-birdo. La Esp-a vorto: alciono.
Ampleksa = havanta grandan dimension, enhavon.
Anso = la pordo-fermilo, kiun oni movas per la mano. Ankaŭ la elstaranta tenilo de vazo, tirkesto k.t.p.
Apostato = homo, kiu publike forlasis sian religion.
Arbusto = arbeto, kies trunko estas ligneca ĉe la bazo kaj herbeca ĉe la supro.
Arogi = malmodeste postuli, pretendi ion.
Ascendi = supreniri
Avantaĝo = preferaĵo, supereca, profitiga kvalito.
Belono = nomo de fiŝa speco.
Blagi = trompi, mistifiki.
Boĝio = turnebla ĉaro (parto de lokomotivo kaj fervoja vagono)
Burgundujo = parto de Francujo, loĝata de la burgundoj, produktejo de la burgunda vino.
Dekokti = elboligi (per boligo ekstrakti la forton de kreŝkaĵo, en la farmacio)
Digna = meritanta respekton.
Ekino = mara erinaco (besto)
Faco = ebena supraĵo de objekto, en geometria formo.
Filistro = malvasthorizonta burĝo.
Garolo = nomo de birdo (latine: *garrulus*).
Geko = nomo de reptilia speco.
Glugi = aŭdigi la sonon „glug-glug" (ekz. la akvo en la buŝo, kiam oni gargaras).
Ĝazbando = la plej moderna muzikistaro.
Hematopo = nomo de birdo (latine: *haemotopus*).
Hirako = nomo de mambesto (latine: *hyrax*).
Ibekso = nomo de mambesto.
Iksodo = nomo de parazita insekto, fiksiĝanta al la haŭto de la bestoj.
Kalumeto = la pac-pipo ĉe la indianoj

LIMONADOJ, MINERALAJ AKVOJ
SENALKOHOLAJ VINOJ
Esperanto parolata!

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —.45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. — *La redakcio.*

ŜLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro
s-ino = sinjorino
f-ino = fraŭlino
dez. = deziras
koresp. = korespondi
interŝ. = interŝanĝi
L = letero
PK = poŝtkarto
PI = poŝtkarto ilustrita
PM = poŝtmarko
bfl. = la poŝtmarkon gluu sur la bildan flankon
k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

ARGENTINO

Juárez F. C. S. (Buenos Aires). — S-ro V. Roque Schettino, profesoro, Calle Chacabuco 464—468. — L, PI, PM, k.ĉ.l., p.ĉ.t., prefere kun fraŭlinoj. Ankaŭ kun geĝardenistoj. Interŝ. florsemojn, fotojn, bildojn pri pejzaĝoj, muziknotojn por piano. Respondo garantiata.

AŬSTRIO

Wiener Neustadt. — S-ro Stefano Szabo, Langegasse 11. — Serĉas gazetportretojn de ĉiulandaj politikistoj el ĉiu tempo. Koresp. k.ĉ.l. (ne kun germanoj).

BULGARUJO

Loveĉ. — S-ro Velko P. Velkov, fervoja oficisto. Gara. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. precipe kun fervojistoj pri fervoja servo.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Bakov n/J. — S-ro Fr. Pytloun. — Serĉas por novaj Esp-istoj korespondantojn. Interŝ. PM.
Jägerndorf. — S-ro Alfred Ŝiŝma, Bäckengasse 35. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.
Skreĉon apud Bohumin. — S-ro Paŭlo Trombik, juna fervoj-oficisto. N-ro 404. — L, PI, k.ĉ.l.

DANUJO

Kastrup-Amager. — S-ro Aage Nielsen, Kastrupvej 291. — L, PI, k.ĉ.l.
Kopenhago-N. — F-ino Kamma Budtz-Jörgensen, dent-kuracistino, Aaboulevarden 37. — L, PI, k.ĉ.l.
Kopenhago-V. — S-ro Folke l'Anglois-Nordgren, Helgolandsgade 1. — L, PI, k.ĉ.l.
Kopenhago-V. — S-ro Asger Lundbak, studento, Vodroffsvej 51. II. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
Usseröd pr. Kokkedal. — S-ro Stephan Fink-Jensen. — L, PI, k.ĉ.l.

ESTONIO

Peravalla. — S-ro Aŭgusto Näpp, 35-jara instruisto. — K.ĉ.l., precipe kun Usono, Centra- kaj Sud-Ameriko, Britaj kolonioj, Ĉinujo, Japanujo, Arabio, Siamo, Hindujo, Afriko, Egiptujo, Aŭstralio, Novzelando, p.ĉ.t. Certe respondos.

FRANCUJO.

Limoges (Haute-Vienne) — S-ro Marcel Mariaud, 13 Cité Beaublanc. Dez. interŝ. PI kaj monerojn, k.ĉ.l.
Montmorillon (Vienne) — S-ro Charles Canneton, horloĝisto, 8 rue du Vieux-Pont. — Dez. kor. por interŝ. PM. k.ĉ.l. Certe respondos.
Pizançon, Bourg de Peage (Drôme) — S-ro Valéry Rousset, 21-jara terkulturisto. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Nepre respondos.

HUNGARUJO

Kiskunfélegyháza. — S-ro Rudolfo Rosenberg, 24-jara juristo, Szent Imre herceg tér 3. — L, PI (bfl.). Precipe interŝ. amatorajn fotojn, k.ĉ.l. Respondo garantiata.

LITOVUJO

Joniskelis (Birzu aps.) — S-ro Baltrus Venislovas, 22-jara birdisto. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. (bfl.) Certe respondos.

NEDERLANDO

Alkmaar. — F-ino J. M. Kuyper, Straatweg A 22. — Dez. kor.
Alkmaar. — F-ino Jannie Mol, muzikistino, Kennemerstraatweg 199. — L pri muziko, literaturo, arto, fotografado, scienca filmo, hirologio, moroj kaj kutimoj, k.t.p. PI pri arto, belaj konstruaĵoj, naciaj kostumoj. Interŝ. PM.
Amsterdam-Centro. — S-ro G. Clobus, Hoogte Kadijk 165 huis. — L, PI, k.ĉ.l. Certe respondos.
Assen. — F-inoj Dijkstra, Rolderstraat 13. — Dez. kor.
Assen. — F-ino Jansen, Marktstraat 28. — Dez. kor.
Assen. — S-ino Jansen-Hoefsloot, Hertenkamp 8. — Dez. kor.
Assen. — F-ino A. Vrijhoeven, Oostersingel 19. — Dez. kor.
Den Haag. — S-ro J. Vloemans Jr., 18-jara, Valeriusstraat 116. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.
Haren (Groningen). — F-ino C. J. E. Meijer, Stationsweg 28. — Dez. kor.
Heiloo. — F-ino M. Koster, Straatweg A 110. — Dez. kor. Certe respondos.
Helden-Panningen. — S-ro A. Kluijtmans, Grashoek 953. — PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe kaj tuj respondos.
Helmond. — S-ro V. Latte Vanweddingen, redaktoro kaj verkisto, Redakcio „De Morgen". — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.
Veendam. — S-ro H. J. Dethmers, 27-jara bankoficisto, Nieuwelaan 60. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

POLUJO

Nowy-Bytom (G. Sl.) — S-ro Józef Szyma, ul. Niedurnego 8. — Dez. interŝ. PM pecon por peco kaj PI afr. bfl. kaj filatele, k.ĉ.l. (escepte Germanujo, Italujo, Belgujo, Francujo kaj Nederlando). Respondo kaj sendo de polaj PM al tiuj, kiuj sendas unue, estas garantiata.

SOVJET-UNIO

Omutninsk (Gorjkovskogo kraja). — S-ro G. Dehterev. — Dez. kor. kun Afriko, Ameriko, Aŭstralio, Azio, Albanujo, Aŭstrio, Belgujo, Finnlando, Germanujo, Grekujo, Islando, Italujo, Jugoslavujo, Litovujo, Norvegujo, Rumanujo, Saar, Svisujo, Turkujo. Per intersteno kaj pri slavaj lingvoj k.ĉ.l.

SVEDUJO

Snogeröd. — S-ro Sture Svensson, 23-jara junulo. — Dez. kor. k.ĉ.l. Certe respondos al ĉiu.

La portebla

TORPEDO

skribmaŝino

estas juvelo inter la skribmaŝinoj.

Liverata ankaŭ kun Esperanto-klavaro.

Petu sendevigan demonstracion!

Importisto por Nederlando:

OSCAR MARKX, Nic. Maesstraat 97, Amsterdam-Z.

Telefono: 22059.

„FLORETOJ"

PORINFANAJ RAKONTOJ TRADUKITAJ DE LA „VENDREDA KLUBO" EN WINSCHOTEN (Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj bildoj de C. Jetses

Prezo ..... 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la eldonisto:

J. B. WOLTERS

Groningen — Den Haag — Batavia.



INSIGNOJ

AĈETEBLAJ ĈE LA ELDONEJO DE LA PRAKTIKO.

La bildoj montras la veran grandecon.

KLARIGOJ. — N-ro 1: simpla verda stelo el metalo, bele kolorigita. — Nroj 2—13 estas bele emajlitaj. — N-ro 2 estas havebla kun pinglo aŭ broĉo. N-ro 3 nur kiel kravatpinglo. La ceteraj N-roj estas livereblaj kun pinglo, broĉo aŭ butono. Ĉe la mendo oni indiku la deziratan. — Ĉe N-roj 3, 7 kaj 11 la verda stelo estas sur ronda blanka fono. — Ĉe N-roj 8, 9, 12 kaj 13 ĉirkaŭ la verda stelo estas blanka rando.

PREZOJ: N-ro 1 = 0.10 ned. guld. — N-roj 2 kaj 3 = po 0.20 guld. — N-roj 4—10 = po 0.35 guld. — N-roj 11—13 = 0.40 guld. — *Afrankita sendo ĉien.*

Ĉiuj insignoj estas bonkvalitaj produktaĵoj de bona fabriko.

Gravaj libroj presitaj en Ruslando

estas aĉeteblaj ĉe La Praktiko:

Drezen: HISTORIO DE LA MONDLINGVO. — Granda libro (formato 17 × 26 cm.), kiu sur 240 paĝoj prezentas la plenan historion de la mondlingva ideo de la bibliaj tempoj ĝis hodiaŭ kaj konigas la kelkcent artefaritajn lingvojn. Kun multaj bildoj.

Prezo: *simple bindita 2.75 ned. guld.*
tole „ 3.30 „ „

Drezen: ANALIZA HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO. — Kun multaj portretoj. 96 paĝoj.

Prezo: *0.75 ned. guld.*

Drezen: SKIZOJ PRI LA TEORIO DE ESPERANTO. — Valoraj lingvo-sciencaj studoj pri la gramatiko, fonetiko, morfologio, sintakso, semantiko, etimologio kaj evoluo de Esperanto.

Prezo: *0.50 ned. guld.*

Mendu ilin ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

Afrankita sendo ĉien.

Luksa BINDO-TABULO por La Praktiko, el bela tolo kun ora preso.

(Nova, pli bonkvalita fabrikaĵo.)

Prezo kun poŝtkostoj: 1.25 ned. guld.

Havebla por la jarkolektoj 1932 (ruĝa) kaj 1933 (verda). Ĉe la mendo oni ne forgesu aldoni, por kiu jarkolekto oni deziras la bindaĵon.

BINDITAJ JARKOLEKTOJ de LA PRAKTIKO

en la supra bindaĵo,

unu jarkolekto (1932 aŭ 1933) afrankite: 3.— guld.

Esperanto-Presejo PIER WESTERBAAN, Vaillantlaan 523—529, Den Haag (Nederlando).

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 8 (32)

Aŭgusto
1934

la Praktiko

Esperanto necesa!

En la printempo de ĉi tiu jaro la granda germana ŝipkompanio Norddeutscher Lloyd en Bremen dissendis al la tutmonda Esperantistaro tre belan Esperanto-lingvan prospekton pri siaj ekskursaj ŝipvojaĝoj sur la maroj ĉirkaŭ Eŭropo.

Kun ĝojo ni rigardadis la luksan presaĵon kaj certe multaj gesamideanoj eksentis sopiron partopreni en la priskribitaj plezurvojaĝoj.

En la prospekto estis ankaŭ kelkaj projektoj pri vojaĝoj sur la Meza Maro, farotaj per la vaporŝipo „Dresden", dum la monatoj Julio kaj Aŭgusto. Al tiuj projektoj oni aldonis „Ŝanĝoj rezervitaj". Sed kun preseraro, tiel: „Sangoj rezervitaj." Ĉu hazarde aŭ pro antaŭsento? Ĉar la ŝipo „Dresden" ne plenumis la anoncitajn veturojn. En tiu tempo ĝi jam kuŝis sur la fundo de l' maro. En la monato Junio ĝi veturis sur la nordaj akvoj, plena de gajaj libertempantoj. Kiam ĝi volis eniri en norvegan fjordon, ĝi kuris sur rifon kaj pereis. La sorto konsentis pri la „rezervita ŝanĝo", eĉ pri la „sango", ĉar ĉe la katastrofo pluraj homoj mortis.

La pereo de la „Dresden" interesas nin ne nur kiel kunsentemajn homojn, sed ankaŭ kiel mondlingvanojn. Kial? Ĉar la kaŭzo de la katastrofo estis tiu sama malfeliĉaĵo, kontraŭ kiu ni fervore batalas: la manko de interkomprenilo. Laŭ la gazetaj sciigoj la germana ŝipestro kaj la norvega piloto pro nesufiĉa kono de la lingvoj miskomprenis unu la alian kaj pro tio la ŝipo iris sur malĝustan vojon.

Ŝajne tre malgranda kaŭzo, tamen kiel grava sekvo! Sed ĉi tiu ŝip-pereo estas ankoraŭ malgrandaĵo en komparo kun tiuj teruraj okazaĵoj, kiujn rekte aŭ nerekte kaŭzas la lingva diverseco. Kiom da malfacilaĵoj kaj malhelpoj ĉe ĉiu paŝo de la internacia vivo! Kiom da peno kaj klopodo pro la lingvo-lernado kaj tradukado! Kaj kiom da sufero, mizero kaj pereo pro la maljustaĵoj, kiuj pravigas sin per la lingva diverseco!

La baraktantaj homoj provas sin helpi, sed per malĝustaj rimedoj. La praktikistoj eksperimentas per teda kaj senfrukta instruado de malfacilaj lingvoj, per fiaskanta elektra traduk-aparato, eĉ per aplikado de desegnitaj bildetoj anstataŭ vortoj de parolebla lingvo. Per tio ili volas rekonduki nian progresintan kulturon al la ŝtupo de la ŝton-epoka homo, kiu surgratis sian primitivan penson sur la muskan vandon de la mizera groto. La idealistoj predikas belajn, sed senkorpajn vortojn, kiujn la homaro, bezonanta pli konkretan nutraĵon, ne povas asimili.

Sed ni, karaj gesamideanoj, kiuj sub la gvido de Zamenhof en admirinda maniero unuigas la idealon kun la praktiko, diligente malfermadu la blindajn okulojn, kaj konduku la homaron al la vera solvo: la lingvo Esperanto, kiu estas necesa, necesega! Ni ne lasu perei la ŝipon de la homara kulturo!

NOVAJ LIBROJ

JARLIBRO DE LA LINGVA KOMITATO KAJ AKADEMIO. — Ĵus aperis la nova jarlibro de niaj lingvaj institucioj por 1934. La 32-paĝa libreto enhavas la regularon de la Lingva Komitato, la adresaron de la membroj kaj la Zamenhofan sistemon pri la landnomoj. La prezo de la libreto estas 2 fr. fr. kaj ĝi estas aĉetebla ĉe la Esp-ista Centra Librejo (11 rue de Sèvres en Paris-6).

ABSOLUTISMO. — 16 paĝoj, verda kovrilo. Prezo 1 fr. fr. aŭ —.10 ned. guld. — La libreto enhavas la paroladon de E. Lanti, diritan en la kongreso de la Federacio de Laboristaj Esp-istoj, okazinta en Antverpeno en ĉi tiu jaro. Ĝi estas eldonita kaj vendata ĉe: SAT (67 avenue Gambetta, Paris-20) kaj FLE (Postbus O 50, Amsterdam-0). S-ro E. Lanti estis ĝis antaŭ ne longe gvidanto de SAT kaj li multe verkis Esperante. Sendube multaj Esp-istoj legos kun intereso liajn politikajn ideojn.

PLENA VORTARO DE ESPERANTO. 2-a eldono revizita kaj kompletigita. 512 paĝoj, formato 143 × 195 m/m. Prezo (en verda tut-tola bindo, kun ora surpreso): 60 fr.fr. plus afranko. Ĉefa agentejo: Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, Paris-20. Aliaj agentoj en diversaj landoj. — Ĵus aperis la dua eldono de nia plej grava vortaro, kiu nur en Esperanto klarigas ĉiun vorton. Ĝi estas verko de la antaŭ nelonge mortinta eminenta scienculo Prof. E. Grosjean-Maupin, sekcia direktoro kaj vicprez. de la Esp. Akademio, kaj de niaj konataj lingvistoj A. Esselin, S. Grenkamp-Kornfeld kaj Prof. G. Waringhien, membroj de la Lingva Komitato. La gravecon kaj utilecon de la Plena Vortaro pruvis la fakto, ke la unua eldono dum mallonga tempo elĉerpiĝis kaj tre multiĝis la postuloj por nova eldono. La aŭtoroj zorge revizis kaj kompletigis la grandan klarigan materialon kaj la nova eldono multe superas la unuan eldonon en precizeco kaj kompleteco. Ni devas aparte atentigi pri la valora indikado de la sinonimoj kaj pri la riĉa klarigado gramatika, precipe per multaj ekzemplaj frazoj ĉerpitaj el la verkoj de Zamenhof kaj aliaj eminentaj verkistoj. La libro devas esti en la posedo de ĉiu Esperantisto, kiu serioze okupas sin pri nia lingvo. Ĉar la bezono al tia vortaro estas treege granda, la aŭtoroj kaj eldonintoj de la libro meritas plenan laŭdon. — (Kun la Junia numero de La Praktiko ni dissendis detalan prospekton pri la Plena Vortaro al ĉiuj niaj abonantoj. La libro estas aĉetebla ankaŭ ĉe La Praktiko, prezo kun sendkostoj estas 6.50 guld.)

DUDEK-KVINA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. — En la serio de la „Oficiala Dokumentaro Esperantista" aperis la oficiala protokolaro de la kongreso en Kolonjo, kune kun la diversaj raportoj prezentitaj al tiu kongreso. La libro ampleksas 108 paĝojn kaj estas aĉetebla ĉe la Centra Oficejo de UEA en Ĝenevo.

Willy Wood: BLUA SANGO. Romano. El la nederlanda lingvo tradukis f-ino Willy van Zoest. 188 paĝoj. Prezo: 0.70 guld. Eldonis: Presejo „Helmond", Esperanto-fako, en Helmond (Nederlando). — Jen, aperis la unua numero de la nova entrepreno „Ideala Esperanto-Biblioteko", kiu intencas malmultkoste eldoni interesajn romanojn. Ĉi tiu unua libro prezentas sin tre bone, en plaĉa dukolora kovrilo kaj zorga preso. La dua numero de la serio estos: „La Morea-Perlo", verkita de Simson, tradukita de R. Delpasko. La prezo de 6 sinsekvaj romanoj estas 3.60 guld., de 3 romanoj 1.95 guld.

Selma Lagerlöf: GÖSTA BERLING. Trad. Stellan Engholm. Ilustrita de Einar Nerman. 552 + 16 paĝoj. Prezo broŝ. 6 sv.kr., bind. 7.50 sv.kr. Eldona Societo Esperanto en Stokholmo. — La plej fama verko de la mondkonata kaj Nobel-premiita sveda verkistino S. Lagerlöf aperis en majstra traduko kaj belega eksteraĵo. Ĉi tiu libro fariĝis mondfama pro la ĉarmega priskribo de la sveda provinco Vermlando, kaj pro la majstra analizo de la animoj. En la sveda lingvo ĝi atingis 34 eldonojn kaj estas tradukita en 37 lingvojn. Dank' al la talento de la tradukinto la verko konservis la specialan ĉarmon de la originalo. Tre belaj tutpaĝaj bildoj de la fama sveda artisto Nerman ornamas la elegante presitan libron, kiu aperas tre plaĉe en kvarkolora kovrilo. La bindita eldono havas oran silueton de la heroo, G. Berling. La libro estas grava gajno por nia movado kaj ĝi fariĝos sendube kara trezoro de multaj Esp-istoj. (Ĝi estas aĉetebla ankaŭ ĉe La Praktiko, prezo kun sendkostoj: broŝ. 2.80 guld., bind. 3.50 guld.)

QUE É O ESPERANTO? — 8-paĝa flugfolio pri Esperanto, en portugala lingvo, eldonita de la Brazila Esperantista Ligo (Avenida Marechal Floriano 212, Rio-de-Janeiro). Ĉi tiu utila nova propagandilo entenas la resumon de la gramatiko kaj artikolojn pri la historio, organizo kaj literaturo de Esperanto kaj informojn pri la praktika uzado de nia lingvo.

LA REZULTO DE LA KONKURSOJ

85-a konkurso. Ĉi tiu konkurso konvinkis nin pri tio, ke la legantoj de La Praktiko estas tre helpemaj homoj, precipe, kiam ili povas esperi premion. 55 personoj ensendis solvon, kun afablaj konsiloj al s-ro arkitekto P. Brikar. La konkursantoj donis diversajn ideojn, sed el la 55 solvoj nur 44 estas ĝustaj: **s-ro Brikar devas konstrui la domon de s-ro Dik Monsak precize sur la norda poluso,** ĉar nur tie rigardos ĉiu fenestro al la sudo! Kvar personoj ilustris sian solvon per bela desegnaĵo pri la konstruota interesa domo. La unuajn kvar premiojn la konkursa komitato aljuĝis al ĉi tiuj solvintoj. Pri la ricevontoj de la ceteraj du premioj la komitato decidis per lotado. Jen la listo de la premiitoj: 1. S-ro **L. J. Burger** en Hago. — 2. S-ro **J. C. Balke** en Rotterdam. — 3. F-ino **N. Rademaker** en Leiden (Nederlando). — 4. S-ro **H. Reschke** en Oliva (Danzig). — 5. S-ro **R. Dasen** en Genevo (Svislando). — 6. S-ro **N. Svensson** en Borås (Svedujo).

La 38 ceteraj (nepremiitaj) personoj, kiuj ensendis la ĝustan solvon, estas: S-ro **I. Aase Olsen** en Middelfart (Danujo). — S-ro **E. Amor Rolan** en Orense (Hispanujo). — S-ro **E. W. v. d. Burgh** en Leiden (Ned.). — S-ro **A. Carlsson** en Valdemarsvik (Sved.). — S-ro **M. Cornet** en Tegelen (Ned.). — F-ino **M. A. Crispin** en Thorpe Bay (Angl.). — S-ro **K. Eike** en Raymond (Usono). — S-ino **E. Feigenbutz** en Karlsruhe (Germ.). — **Gefratoj Fichtner** en Dresden (Germ.). — S-ro **J. Gassner** en Salzburg (Aŭstrio). — S-ro **C. Govers** en Den Helder (Ned.). — S-ro **J. U. Hommes** en Nijverdal (Ned.). — S-ro **H. Kaiser** en Köln (Germ.). — S-ino **N. Koudijs-Modoo** en Utrecht (Ned.). — S-ro **J. Kulikov** en Pokrovo (Sovjet-Unio). — S-ro **F. Kullison** en Valga (Estonio). — S-ro **T. Kuročka** en Prikolotnoje (Ukrainio). — S-ino **A. Lynch** en Ĝenevo. — S-ro **K. Meijers** en Usma (Latvujo). — S-ro **D. Nagy** en Satu-Mare (Rum.). — S-ro **H. N. Nederland** en Kalundborg (Dan.). — S-ro **L. Ollivaud** en Nice (Franc.). — S-ro **R. Olsson** en Sala (Sved.). — S-ino **G. Poldervaart-Nauta** en Hago. — S-ro **R. Prince** en Maubeuge (Franc.). — S-ro **P. Princis** en Usma (Latvujo). — S-ro **G. B. Rust** en Edgware (Angl.). — S-ro **S. Samelius** en Ljugarn (Sved.). — S-ro **V. F. Sirjaev** en Moskvo. — S-ro **V. Tartlan** en Valga (Est.). — S-ro **M. Thibault** en Revin (Franc.). — S-ro **A. Thompson** en Pudsey (Angl.). — S-ro **R. Tsuji** en Osaka (Japanujo). — S-ro **T. Ujiaky Nagy** en Kaposvár (Hung.). — S-ro **Ch. L. Waldkötter** en Leiden (Ned.). — F-ino **S. M. Wijers** en Hago. — S-ro **N. Wilquin** en Parizo. — S-ro **N. B. Zubkov** en Moskvo. — Ni kore gratulas al ĉiuj solvintoj!

La 11 maltaŭgaj solvoj prezentas interesajn kaj kelkfoje tre spritajn ideojn. El ili pluraj proponas apliki spegulojn, kiuj konduku la sunbrilon al ĉiu fenestro. Sed tia solvo ne estas konforma al la postuloj de s-ro Monsak.

S-ro H. R. desegnis strangan „helican" domon kun 4 etaĝoj, ĉe kiu la muroj ne estas ebenaj, sed helicaj, kaj tiamaniere ĉiuj fenestroj povas rigardi al sudo. Sed s-ro Monsak postulis konstrui kvadratan domon kun ordinaraj muroj.

Aliaj konkursantoj konsilas konstrui pendantan kaj turneblan domon, aŭ domon turneblan ĉirkaŭ akso sur radoj. En tiu grupo la plej sprita estas la projekto de s-ro **inĝ. F. Charlet** en Hautmont (Francujo). Jen lia solvo: *„Estimata sinjoro Brikar! Ĉar vi estas samideano, mi senpage liveras al vi mian multvaloran, geniplenan patentitan sistemon de MEMORIENTEBLA DOMO LAŬ UNIVERSA PEZOFORTO. Jen mia rimarkinda eltrovaĵo: Sur kvadrata bazo kuŝas grandega ferа ringo, kiu havas rondan sulkon. En la sulko ruliĝas ŝtalaj kugloj. Sur la kugloj kuŝas dua ringego, sur kiu estas konstruita la domo. La ruzaĵo en mia sistemo estas, ke la bazo ne estas tute horizontala, sed iom pli alta ĉe la norda flanko. La interno de la domo devas esti meblata tiel, ke la domo estu en kiu ajn pozicio en ekvilibro, se neniu persono estas en la domo. Kiam s-ro Monsak estas hejme, tiu ĉambro, en kiu li troviĝas, ĉiam rigardos al la sudo, ĉar pro la pezo de la korpo de s-ro Monsak la domo sur la ŝtalaj kugloj turniĝos kun la pezo al la sudo, aŭtomate kaj milde. Se s-ro Monsak transiros en alian ĉambron, la domo tuj ekmoviĝos por porti la milionulon al la sudo. Ĉi tiu sistemo ebligos ankaŭ tion, ke la vizitantoj jam de ekstere scios, en kiu ĉambro troviĝas s-ro Monsak, ĉu li dormas, manĝas aŭ laboras. Kritikemuloj povas diri, ke la moviĝadon de la domo konfuzos la edzino kaj la servistaro de s-ro Monsak. Je tio mi respondas: Unue, supozeble s-ro Monsak neniam havos edzinon, ĉar neniu virino volos edziniĝi al tia frenezulo. Due, la servadon oni faros per centra helica ŝtuparo, kiu ne ĝenos la intencatan ekvilibradon. Trie, ke eĉ se iu virino edziniĝus al s-ro Monsak pro lia monsako, li povos plipezigi sin mem plenigante ĉiujn siajn poŝojn per oraj dolaroj, kaj tiamaniere turni ĉiam la domon al sudo, kion ajn faros la edzino."* — Ni tre bedaŭras, ke ni ne povis premii ĉi tiun spritegan solvon. Sed ni esperas, ke s-ro Charlet sukcesos vendi ĝin je alta prezo.

S-ro A. Cheminais donas kelkajn proponojn, el kiuj unu konsilas konstrui ŝtalan domon, kiu turniĝu ĉirkaŭ centra akso, dek-ses-foje dum unu sekundo. Tiam, pro la konata fizika leĝo de la vidado, s-ro Monsak senĉese vidos la sunon. Sed li devos sidi en la centro de la domo en forta fera kaĝo, por ne forflugi pro la centrifuga forto.

Ni tre ĝojas pro la granda rezulto de ĉi tiu konkurso kaj kore gratulas al ĉiuj partoprenintoj, kaj aparte ni gratulas al s-roj Brikar kaj Monsak.

ATENTU!

Se vi volas sendi monon al La Praktiko, bonvolu observi la sekvantajn:

La monon oni povas sendi per *poŝtĉekkonto* (Wien A-156933, Praha 500362, Kopenhago 34941, Berlin 129527, Budapest 13201, Zagreb 41345, Riga 4870, Den Haag 162626, Warszawa 190203, Stockholm 74126, Bern III. 6761), *per poŝtmandato*, per *bankĉeko* aŭ per *papermono* en letero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj de la sube nomitaj landoj, kalkulante la valoron laŭ la suba tabelo:

1.— ned. guldeno valoras en:

Aŭstrio 3.70 ŝil., **Belgujo** 15 fr., **Britujo** 2 ŝil. 8 p., **Bulgarujo** 58 lev., **Ĉeĥoslovakujo** 17 kr., **Danujo** 3 kr., **Estonio** 2.60 kr., **Francujo** 10.35 fr., **Germanujo** 1.85 m., **Hispanujo** 5 pes., **Hungarujo** 3.30 p., **Italujo** 8 lir., **Jugoslavio** 30 din., **Latvujo** 2.20 l., **Norvegujo** 2.70 kr., **Polujo** 3.70 zl., **Rumanujo** 75 l., **Svedujo** 2.60 kr., **Svisujo** 2.10 fr.

Pro la freneza dancado de la mon-valoroj ĉi tiu tabelo validas nur ĝis la apero de nia sekvanta numero.

La sendo de poŝtmarkoj en letero okazas je la risko de la sendanto. Tial estas konsilinde uzi netravideblan koverton kaj ĉe pli granda sumo registrigi la leteron.



Kornludisto en svisa montaro. Desegnaĵo de M. Petzoldt.

ĈASKORNO.

Traduko de J. Ziermans.



Koloron pli
odoron ĝi
havigas al natur'; *(Ripetu!)*
kaj riveret'
al la trumpet'
respondas per murmur'. *(R.)*

3. Per trankvilec'
kaj vivgajec'
pro tiu melodi' *(R.)*
pleniĝas kor';
ĉagren', dolor',
nun iras for de mi. *(R.)*

Ĉi tiun ĉarman kanton kaj la bildon ni represas el la ŝatata „ESPERANTA KANTOKOLEKTO", kompilita de s-ro J. H. Vink en Leveningen, Nederlando. Havebla ĉe La Praktiko; prezo 0.25 guld.)

La kornludisto en la montaro.

Ĉu vi scias, kiel ĝi estiĝis? — demandis mia pola amiko, ĉe sian manon sur mian brakon kaj haltigante min. La alian li uzis por montri malproksimen, al montgiganto, kies grita pinto perdiĝis en la nuboj kaj ŝajnis unuiĝi kun la ĉielo. Ni promenis en la belega ĉirkaŭaĵo de Zakopane, kaj direktis min al la famkonata „Morskie Oko" (= mara okulo). Certe vi ne scias, — li jam aldonis, antaŭ ol mi povis ion diri. — Aŭdu: kiam Jesuo vivis sur la tero, ĉi tiu lando ŝajnis tute glata, ebena. Kaj la mondo tre ekamis lin, ĉar li estis la dia filo, kvankam la homoj malamis lin kaj krucumante mortigis lin. Kaj kiam liaj lastaj tagoj alvenis kaj li iris al la ĉielo, la tero ne volis lasi lin. La ŝtonoj, la sablo kaj la rokoj levis sin kaj sekvis lin al la ĉielo. Sed Jesuo ordonis al la tero halti, kaj li benis ĝin. Kaj sub la dia mano la leviĝinta tero rigidiĝis en la atingita alteco; sub lia beno ĝi verdiĝis, ornamis sin per floroj kaj arboj, kaj fariĝis nia kara hejmlando.

★

Nun mi devis haltigi mian amikon, ĉar en la ekstazo li tro alproksimiĝis al danĝera deklivo.

— Ĝi estas legendo, kiun la montaranoj rakontas inter si, — li diris.

— Kiel forte vi devas ami vian hejmlandon, ke vi eltrovis kaj flegas tiajn belegajn legendojn, — mi respondis.

Jes, la montaranoj amegas sian hejmlandon! Kelkfoje ili devas pro la viv-cirkonstancoj foriri malproksimen, tiel ke la reveno fariĝas malfacila; sed tiam restas ilia forta sopiro reveni almenaŭ por la fino de la vivo, por morti sur la hejma tero. Kaj kelkfoje la sopiro tiel forte kaptas ilin, ke nenio povas haltigi ilin. Svisa popolkanto rakontas pri sviso, kiu aŭdis en la malproksima lando kornludadon kaj tio tiel forte kaptis lian animon, ke li forkuris. Tiu poezia rakonto havas historian bazon, ĉar en la 18-a jarcento ekzistis en Francujo leĝo, kiu *je mortpuno* malpermesis jodli, ĉar la svisaj militistoj pro ĝi estis kaptataj de hejmsopiro!

Montoj kaj jodlado, ili ne estas disigeblaj. Preskaŭ samaj estas la instrumentoj en Svisujo kaj en la Himalajaj montoj; samaj estas la sonoj en la nordo kaj en la sudo.

La apuda bildo prezentas svisan montaranon kornludantan. Kaj tra la montar' kaj en arbar' sonadas kornblovad':

ridiao, ridio, ruidiaho, ruidio ...

J. Vink.

LERNU PER LA ERAROJ!

En ĉi tiu rubriko ni citas erarajn frazojn, kiujn ni trovis en diversaj libroj, gazetoj kaj aliaj presaĵoj. Ni deziras fari per tio utilan servon al niaj legantoj kaj al niaj — verkistoj.

La estraro konstatis, ke alvenis nur tri skribaĵojn pri la problemo. — La akuzativo estas treege malĝusta en la vorto „skribaĵojn". Bedaŭrinde tre ofte ni vidas tian eraron. Tiu vorto estas la subjekto de la frazo, do ĝi devas esti en nominativo. Multaj Esperantistoj falas en ĉi tiun eraron verŝajne pro tio, ke la subjekto ne staras en la komenco de la frazo.

Sinjoro B. malakceptas konsideri la Germanan, Italan kaj Polan Asociojn kiel kunfondintoj. — La lasta vorto devas esti: „kunfondintojn".

La Esperantista Grupo en la urbo W. estas renaskiĝita! — La lasta vorto estas tre malbona. Pasivan participon povas havi nur transitivaj verboj. Sed la verboj formitaj per la sufikso „iĝ" neniam estas transitivaj, kaj tial ili neniam povas ricevi la formon de pasiva participo. Oni devas do diri: „renaskiĝinta". Alia bona esprimo estas: „renaskita", ĉar la verbo „naski" estas transitiva.

Pasis dek jarojn, ke ni kunvenis en ĉi tiu urbo. — La ĝusta formo: „Pasis dek jaroj."

Konstatinde estas la neĉeesto de multaj aktivaj samideanoj. — Korekte: „Konstatinda estas la neĉeesto". Se oni preferas la adverban formon, oni devas diri: „Konstatinde estas, ke ne ĉeestis."

La antologio estas kolekto da poeziaĵoj. — Ĉi tie la ĝusta prepozicio estas: „de", ĉar ni ne parolas pri kvanto, kaj la vorto „kolekto" ne signifas mezuron.

Koran saluton kaj bondeziron
al la kongreso en Stokholmo kaj al la kongresanoj!
La Praktiko.

AL LA VENKO !

PETO. **Kara leganto! Bonvolu ĉi tiujn gravajn informojn traduki en vian nacian lingvon kaj transdoni ilin al la redakcioj de la ĵurnaloj en via urbo, por publikigo. Per tio vi faras por Esperanto tre valoran propagandan servon.**

271. **La greka registaro rekomendas la lernadon de Esperanto.** — La ministerio de kultoj kaj publika instruado de la helena respubliko per cirkulero de la 31-a de Majo 1934 sub n-ro 31008, subskribita de ministro I. Makropoulos, alvokas la ĝeneralajn inspektorojn kaj la direktorojn de la lernejoj, ke ili faciligu kaj rekomendu la lernadon de Esperanto kaj klarigu al la lernantaro la altan celon kaj atingitan pozicion de Esperanto.

272. **Esperanto-aleo en Arnhem.** — La urbestraro de Arnhem (Nederlando) en sia kunsido de la 23-a de Julio decidis doni al la vojo, kiu kondukas al la Esperanto-Domo de la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, la nomon „Esperanto-laan" (= Esperanto-aleo).

273. **Itala gazeto kun Esperanto-kurso.** — La „Giovanissima", ilustrita revuo por la faŝista edukado, aperanta en Romo, publikigas praktikajn lecionojn de Esperanto. La kurson redaktas prof. V. Musella en Napolo.

274. **Esperanto en oficiala reklamilo.** — Okaze de la nunjara internacia specimen-foiro en Budapest la hungara reĝa poŝtdirekcio eldonis 5-lingvan flugfolion pri la poŝtmarka muzeo de la hungara poŝto. La lingvoj estas: hungara, germana, franca, angla kaj Esperanta.

275. **Oficialaj rezolucioj por Esperanto en Francujo.** — La ĝenerala konsilantaro de la franca departemento Haute-Vienne kaj la urba konsilantaro de Limoges per rezolucioj esprimis la deziron, ke la lingvo Esperanto estu instruata en la lernejoj.

276. **Grandaj bankoj uzas Esperanton.** — La granda sveda banko „Skandinaviska Banken", kiu havas filiojn en la tuta Svedlando, pro la proksimiĝanta Esperanto-kongreso en Stokholmo organizis specialan Esperanto-kurson por tiuj siaj oficistoj, kiuj sin okupas je la ŝanĝado de fremdaj monoj. En la kurso partoprenas 17 personoj. Similan kurson aranĝis por 15 oficistoj la plej granda banko en Stokholmo: „Skandinaviska Kredit A.-B.

277. **Esperanto en 209 radio-stacioj.** — La 24-an de Junio la send-stacio de Huizen (Nederlando) disaŭdigis „mond-programon", kiun transprenis samtempe 209 radio-stacioj en la tuta mondo. La anoncado kaj klarigado de la programo okazis en ses naciaj lingvoj (nederlanda, franca, angla, germana, hispana, itala) kaj en Esperanto.

278. **Esperanto en turisma reklamilo.** — En la nederlanda urbo Rotterdam la Tram-direkcio kaj la Fremdultrafika Unuiĝo eldonis ilustritan prospekton pri rondvojaĝoj tra la urbo per aŭtobusoj. En la prospekto, kiu entenas ankaŭ la planon de la urbo, la tekstoj estas kvar-lingvaj (nederlanda, franca, germana, angla kaj Esperanta). En la pasinta jaro la sama prospekto aperis en tri lingvoj, sen Esperanto. *(La legantoj de La Praktiko estas petataj peti senpagan alsendon de la prospekto, por ke la eldonintoj vidu la praktikan uzadon de Esperanto. Adreso: V.V.V. Noordblaak 13, Rotterdam. — Ĉi tiu sukceso de nia lingvo estas ŝuldata al la Esp-societo „Merkurio" en Rotterdam.)*

279. **Turisma prospekto pri Tirolo en Esperanto.** — Ĵus aperis bele ilustrita kaj arte presita faldprospekto pri Tirolo, parto de Aŭstrio, en la lingvo Esperanto. La prospekto enhavas riĉan informan materialon, belegajn bildojn kaj la geografian karton de Tirolo. La prospekto estas eldonita de la Landa Trafik-Oficejo en Innsbruck. *(Oni povas senpage ricevi la prospekton. Adreso: Landesverkehrsamt für Tirol, en Innsbruck, Aŭstrio.)*

280. **Esperanto en turisma adresaro.** — Ĵus aperis la nova adresaro de konataj firmoj, eldonita de la Fremdultrafika Unuiĝo de Hago, Scheveningen kaj ĉirkaŭaĵo. La klarigoj kaj la titoloj de la adres-kolonoj estas presitaj ankaŭ en Esperanto. *(Oni povas senpage ricevi la adresaron ĉe: V.V.V., Lange Voorhout 102 en Hago.)*

281. **Zamenhof-bulvardo en franca urbo.** — La magistrato de la franca urbo Malakoff ĵus decidis ŝanĝi la nomon de la ĝisnuna „Rue de Clamart" je la nova nomo „Boulevard Zamenhof".

282. **Esperanto kiel unua fremdlingvo en prezlisto.** — La firmo Fratoj Busatis en Purgstall a.d. Erlaf (Aŭstrio), fabriko de segiloj, eldonis seslingvan prezliston, en kiu Esperanto okupas la lokon de unua fremdlingvo.

283. **Esperanto-lingva turisma prospekto pri Aachen.** — La Urba Kurac- kaj Fremdul-Oficejo de la germana urbo Aachen eldonis ilustritan faldprospekton pri la urbo kaj ĝiaj kurac-aranĝoj. *(La prospekto estas senpage ricevebla ĉe: Urba Kurac- kaj Fremdul-Oficejo, Nova Kazindomo, Monheims-Allee, Aachen, Germanujo.)*

284. **Esperantaj nomoj de komercaĵoj.** — La farmaciejo Bouge en Grasse (Francujo) produktas vinon kontraŭ anemio sub nomo *„Fortiga"* kaj rimedon kontraŭ gripo kaj malvarmumo, sub nomo *„Varma"*. Ambaŭ var-nomoj estas Esperanto-lingvaj.

285. **Ĵurnalo en Makassar kun Esperanto-kurso.** — La ĵurnalo „Berita Baroe", aperanta en la urbo Makassar (Celebes, Nederlanda Hindujo), publikigas kurson de la internacia lingvo Esperanto.

286. **Kemia fabriko uzas Esperanton.** — La firmo „Nederlandaj Termo-Kemiaj Fabrikoj" en Amsterdam aplikas Esperanto-lingvajn klarigajn surskribojn sur pakaĵoj de siaj produktaĵoj.

287. **Esperanto ĉe la sveda laboristaro.** — Laŭ la jarraporto de ABF (sveda laborista kleriga asocio) en Göteborg (Svedujo) pri la agadjaro 1933/34, Esperanto atingis la unuan lokon inter la organizitaj 201 kursoj. Laŭ la statistiko okazis 25 Esperanto-kursoj por 485 partoprenantoj, kontraŭ 17 kursoj de angla lingvo kun 334 partoprenantoj.

KURSOJ en ARNHEM!

6—11 Aŭgusto: Internacia perfektiga kurso de A. Cseh.
16—25 „ Kurso por komencantoj, de A. Cseh.

En la Esperanto-Domo agrabla libertempado dum la tuta jaro.

IDEALA ESPERANTO-BIBLIOTEKO

Willy Wood: BLUA SANGO, romano, 200 paĝoj.

Prezo: 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la eldonejo:
PRESEJO „HELMOND" en Helmond (Nederlando).

Gesinjoroj Morariu-Andersson, niaj konataj internaciaj geinstruistoj, gvidis dum la lastaj monatoj grandajn kursojn en Insjön, Leksand kaj Rättvik, urbetoj en la sveda provinco Dalekarlio. Nia bildo montras la partoprenintojn de la kursfina festo, okazinta en Leksand. En la mezo sidas ges-roj Morariu (s-ino Morariu en rumana nacia kostumo). — Kelkaj sinjorinoj portas svedajn naciajn vestojn de Dalekarlio.

S-ro Gillis Staberg el Skara (Svedujo), fervora propagandisto kaj instruisto de la Cseh-Instituto. Dum la lastaj monatoj s-ro Staberg gvidis sukcesplenajn kursojn en pluraj urboj de Danujo. Precipe grandan sukceson li atingis sur la insulo Mors. En la aŭtuno li gvidos novajn kursojn en Danujo.



La kongresa ŝipo „Prinses Juliana", per kiu pli ol 200 nederlandaj kaj francaj Esperantistoj veturos al Stokholmo, sub la gvido de s-ro J. Telling, ĉefdelegito de UEA por Nederlando.

Flegistinoj de la malsanulejo en la nederlanda urbeto Winterswijk (ĉe la germana limo) diligente lernas Esperanton de s-ro H. Thien, fervora propagandisto (meze).

*La 2-a internacia Esperanto-kurso por P.T.T.-geoficistoj okazis en la tagoj 2-12 de Julio en la Esperanto-Domo en Arnhem. Gi estis organizita en kunlaboro kun la Nederlanda P.T.T-Direkcio kaj I.L.E.P.T.O. (Intern. Ligo de Esperantistaj P.T.T.-Oficistoj). En la kurso partoprenis 62 personoj el ses landoj. Dum dek tagoj regis vigla Esperantista vivo en la Esperanto-Domo, kaj nia lingvo ricevis novajn fervorajn adeptojn. En la matenaj horoj estis kurs-lecionoj kaj posttagmeze agrablaj ekskursoj al la belega regiono de Arnhem, sub la gvidado de s-ro L. Moreau, administranto de la Esperanto-Domo kaj s-ro A. J. van Bethlehem. La kursanoj vizitis ankaŭ la distriktan telefoncentron kaj la radio-stacion en Kootwijk. En la festvespero partoprenis ankaŭ s-ro J. W. Groeneijk P.T.T.-inspektoro el Hago kaj la P.T.T.-estraro de Arnhem. La kursanoj ricevis ateston oficiale subskribitan ankaŭ de la P.T.T.-direkcio. — **Supra bildo:** la partoprenintoj de la kurso, inter ili s-ro J. B. B. Dufrenne, prez. de ILEPTO.(Foto-oficejo Gazendam, Arnhem). — **Malsupra bildo:** La forveturo de la kursanoj al Kootwijk per luksaj aŭtobusoj.*

En la franca urbo Saint-Raphaël dum la kongreso de la Provenca Esp-Federacio oni inaŭguris la Zamenhof-straton. La personoj (de maldekstre): s-ro G. Avril el Nice, dir. de „Nia Gazeto", s-ro Jaillardon, vicurbestro de St-Raphaël, s-ino L. Blacklock, f-ino L. Zamenhof kaj s-ro André Boyer, ĝen. sekr. de la Fed.

Bildo pri la 5-a kongreso de la Provenca Esperanto-Federacio, okazinta en Saint-Raphaël (Francujo). Inter la partoprenantoj estas videblaj: F-ino Lidja Zamenhof (1), kiu en Sud-Francujo gvidis Ĉe-metodajn kursojn por 472 personoj; s-ino L. Blacklock, prez. de la Fed., organizinto de la kongreso (2); s-ro André Boyer ĝen. sekr. (3); s-ro G. Avril vic-prez. de S.F.P.E. (4); s-ro Bourdelon nova fed. prez. el Marseille (5); s-ro E. Archdeacon prez. de S.F.P.E. (6).

Esperantista edziĝo. — La 23-an de Junio geedziĝis en Praha (Ĉeĥoslovakujo) s-ro Karlo Trnka kaj f-ino Marie Zavadilová, komitatanoj de la Katolika Esp. Klubo. (Dekstra bildo.) — La edziĝon benis kaj Esp-lingvan paroladon faris D-ro A. Eltschkner, helpepiskopo. (Sur la supra bildo, benanta la popolon.)

LITERATURO

DAŬRIGOTA.

I.

Du prahomoj interparolas.

— Admirindan aferon mi vidis trans la monto. La Ruĝa Ĉasisto eltrovis nekredeblan mortigilon. Li streĉis kordon inter la du finoj de fleksebla bastono. Se li tiras la kordon kaj subite relasas ĝin, unu pintigita vergo forflugas kun tiel granda forto, ke li povas per ĝi el granda distanco mortigi la beston. Li povas mortigi la beston, antaŭ ol ĝi povas proksimiĝi al li. Tio estas terura!

— Kiel terura? Ni devas ĝoji pro tio.

— Ĝi estas terura, ĉar li povas mortigi ne nur la bestojn, sed ankaŭ nin.

— Kion li povas, tion ankaŭ ni povas. Ankaŭ ni faros tian batalilon. El via rakonto sekvas, ke niaj popoloj ne povos plu ataki unu la alian. Ĉar ja ĉiu povas mortigi la alian, antaŭ ol veni en la proksimecon, kaj interbatali. Alvenis do la eterna paco.

II.

Du soldatoj, post sufiĉe longa tempo.

— Venis la fino al nia metio, kamarado!

— Kial la fino?

— Ĉar oni eltrovis ian nigran pulvoron. Oni prenas dikan, fanditan fer-tubon, kies unu fino estas fermita. Oni metas en la tubon iom de tiu pulvoro. Sur la pulvoron oni premas pezan feran kuglon. Se oni ekbruligas la nigran pulvoron, ĝi eksplodas kaj elpuŝas tra la nefermita fino la kuglon kun tia terura fortego, ke ĝi tra mejloj detruas kaj neniigas ĉion, homon, objekton, ĉion.

— Kaj kial ĝi faras finon al nia metio?

— Ĉu vi do ne komprenas? Ĉiu batal-scienco estas vana. La kuglo mortigas vin kune kun via ĉevalo, en la momento, kiam vi aperas. Ankaŭ la fortikaĵo estas senvalora, ĉar la kuglo disrompas la muron. Finiĝis ĉio, oni ne povas plu militi.

III.

Kelkcent jarojn pli poste. Antaŭ la mondmilito.

— Grandioza progreso! La homo povas flugi. Tio signifas la mondpacon.

— Kial ĝi signifas la mondpacon?

— Ĉar se ni imagas la militon de la estonteco, tiam la rezulto de la batalo ne dependos plu de la laŭregula armeo. Oni povos flugi super la teritorion de la malamiko kaj ĵeti malsupren bombojn, kiuj frakasos tutajn regimentojn. Dum unu sola horo finiĝos la milito. La epoko de la militado estas pasinta. La ŝtatoj devas trovi alian rimedon por solvi la internaciajn konfliktojn. Vivu la mondpaco!

IV.

Hodiaŭ. Du sinjoroj interparolas apud mi en la tramo.

— Kial vi parolas pri milit-danĝero? Nova mondmilito estas absolute malebla.

— Tute ne malebla. Ĝis kiam la germanoj kaj la francoj...

— Pardonu, ĝi estas tute malebla. Post la mondmilito pasis kelkaj jaroj, dum kiuj la tekniko ne ripozis. Ĉu vi scias, kiajn mortigajn gasojn oni eltrovis dum tiu tempo? Se matene je la naŭa horo oni deklaris la militon, tagmeze la malamika lando estas jam kovrita per tia gaso, kiu ekstermas eĉ la plej lastan ĝermon de la vivo. Komprenu, ke per tio malebliĝis ĉia militado. Mi ne volas troigi. Unu sola milito povas ankoraŭ veni, sed ĝiaj spertoj instruos la homaron pri tio, ke...

Mi ne povis aŭskulti pli longe, ĉar mi devis eliri el la tramo.

V.

La kvinan kaj la pluajn ĉapitrojn mi ne povas ankoraŭ publikigi. Poste, en ilia tempo. Se mia intertempe okazonta morto malhelpus min en la daŭrigo de ĉi tiu verko, ĝin daŭrigos mia filo, eventuale mia nepo aŭ ties filo.

Kiu finos ĝin? Neniu.

Z. Harsányi.

INFORMOJ

Morto. — S-ro *A. J. Witteryck*, honora prez. de Belga Ligo Esp-ista, fondinto de Bruĝa Grupo Esp-ista, meritplena pioniro de Esperanto, mortis en Assebroeck (Belgujo) la 3-an de Julio, en la aĝo de 69 jaroj.

— S-ro *Petro Thurzó*, malnova meritplena hungara pioniro de Esperanto, mortis en Gödöllö la 7-an de Julio, en la aĝo de 64 jaroj. S-ro Thurzó kreis antaŭ la mondmilito tre viglan Esp-istan vivon en Szeged kaj dum ses jaroj redaktis la gazeton „Hungara Esperantisto". Li estis delegito de UEA kaj honora membro de Hungara Esp. Societo.

Honorigo. — La franca ministro de publika sano promociis s-ron *Jean Couteaux*, ĝeneralan sekretarion de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto, kiel kavaliron de la Honorlegio.

La kongreso en Stokholmo. — Jam estas nenia dubo, ke la nunjara universala Esperanto-kongreso en Stokholmo estos grandsukcesa. Aliĝis ĝis nun pli ol 1600 kongresanoj. La granda intereso, kiun la sveda publiko kaj la sveda registaro montras al la kongreso, kuraĝigas nin esperi, ke ĉi tiu kongreso estos aparte grava en la historio de nia movado.

D-ro Privat parolos en la Stokholma kongreso. — En niaj universalaj kongresoj estis tradicio, ke la solenajn malfermajn kunsidojn ornamis la paroladoj de D-ro Zamenhof kaj post lia morto la paroladoj de nia eminenta oratoro D-ro Edmond Privat. En ĉi tiu jaro D-ro Privat, honora prezidanto de UEA, ne povos ĉeesti en la kongreso, sed li tamen faros en ĝi paroladon — per telefono. Li parolos en Svisujo kaj en la kongresejo oni aŭdigos lian parolon per laŭtiga aparato.

F-ino Lidja Zamenhof, filino de la aŭtoro de Esperanto, talenta instruistino de la Cseh-Instituto, finis sian grandsukcesan kurs-serion en Francujo. Dum la somero ŝi partoprenos en la kongreso en Stokholmo kaj vizitos sian hejmon en Polujo, kaj en la aŭtuno ŝi rekomencos la apostolan laboradon en Francujo. Ŝi gvidos kursojn en *Chateaurenard* (dum Oktobro), en *Orléans* (dum Novembro), en *Thiers* (dum Decembro) kaj en *Romans* (dum Januaro).

Universala Esperanto-Kongreso en Romo. — La itala registaro aprobis, ke la 27-a Universala Kongreso de Esperanto okazu en Romo en la unua semajno de Aŭgusto 1935. Itala Esperanto-Federacio kaj ties oficejo „Esperanto-Centro Itala" (Galleria Vittorio Emanuele 92 en Milano) jam komencis la organizajn laborojn kaj esperas, ke multaj gesamideanoj partoprenos el la tuta mondo.

Polica faka vortaro. — La Internacia Polica Ligo starigis apartan komisionon, kies tasko estas ellabori la polican fakan vortaron. La anoj de la komisiono estas: s-roj D-ro Locard kaj Schwartz (Francujo), Teuchner (Germanujo), Vavrosky (Ĉeĥoslovakujo), Adams (Usono), Passerini (Italujo) kaj Mancheno (Hispanujo). La ellaboraĵon oni prezentos al la Esp-ista Akademio por aprobo.

Nova aldono al la Universala Vortaro. — La oficiala vortaro de Esperanto konsistas el la Universala Vortaro, kiu aperis en la *„Fundamento de Esperanto"*, verkita de D-ro Zamenhof, kaj el la *Oficialaj Aldonoj*, kiuj entenas vortojn oficialigitajn de la Lingva Komitato. Ĵus aperis la Kvina Oficiala Aldono, publikigita en la bulteno „Oficialaj sciigoj de la Akademio" (N-ro 4, Junio 1934). La nova aldono entenas 5 vortojn *(bulteno, fono, kabineto, plagiato, slipo)* aldonitajn al la Universala Vortaro, kaj 3 teknikajn vortojn *(aviado, bremso, pilo)*, enkondukitajn en la Komunan Vortaron. Ni konsilas al niaj legantoj, ke ili notu aŭ signu ĉi tiujn vortojn en siaj vortaroj kiel oficialajn.

Esperantistaj ekskursoj. — S-ro J. H. Vink, estrarano de la Haga Esperanto-Unuiĝo „Fine Ĝi Venkos", kun la aprobo de la nomita unuiĝo, organizas du ekskursojn, por doni al la nederlandaj gesamideanoj agrablan kaj interesan okazon uzi la mondlingvon. La unua ekskurso la 5-an de Aŭgusto kondukos al Arnhem, por viziti la Esperanto-Domon kaj la belegan regionon de Arnhem. La partopreno (aŭtobuso, manĝo, gvidado) kostas 4.50 guld. — La dua ekskurso okazos dum la 13-17 de Aŭgusto per aŭtobuso al Luksemburgo, tra la bela montaro. La partopreno kostas 43 guld. kaj entenas ĉiujn elspezojn (veturo, loĝo, manĝoj, enirprezoj, servmonoj k.t.p.). Por detalaj informoj oni turnu sin al la organizanto: S-ro J. H. Vink, Amsterdamschestraat 25 en Scheveningen.

Faka vortaro pri aviado. — S-ro M. Lewin (30 Blenheim Gardens, London N.W.2.) kompilas liston de aviadaj terminoj en Esperanto kaj deziras interrilati kun ĉiulandaj samideanoj, kiuj interesiĝas pri tiu temo.

„Zamenhofa Esperanto" estas la titolo de nova perioda eldonaĵo, kiun nia eminenta samideano D-ro Pierre Corret, membro de la Esp-ista Akademio, redaktas kaj eldonas. Ĝi publikigas lingvajn artikolojn por „studo de Esperanto tia, kia ĝi estas en la Fundamento kaj en la verkoj de D-ro

Zamenhof". D-ro Corret citas el la Esp-a literaturo frazojn, en kiuj estas eraroj, fariĝintaj kutimaj ĉe kelkaj samideanoj. Ĉi tiu kritika laboro de D-ro Corret estas tre utila kaj ni esperas, ke ĝi multe helpos, por ke la Esperanto-lingvaj eldonaĵoj estu lingve pli korektaj. La abonprezo de dek sinsekvaj 4-paĝaj folioj de „Zamenhofa Esperanto" estas 5 francaj frankoj. Adreso: D-ro P. Corret, 197 Boulevard Brune, Paris-14, Francujo.

Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esp-ista. — La lasta numero (Julio 1934) de la Bulteno enhavas artikolojn pri kongresa radiofono (de E. Håkansson), „La kurbigita mondo" (de M. Vidmar) kaj pri „brûlado kaj eksplodo en la motoroj" (de M. D. Dupuis).

Mondvojaĝo. — Nia fervora samideano s-ro Xavier Sattler, kasisto de la Esperantista Grupo en Philippeville (Alĝerio), komencos baldaŭ grandan vojaĝon tra Egiptujo, Arabio, Hindujo, ĝis Haiti. Li intencas fari dum la vojaĝo ampleksan propagandon kaj viziti la samideanojn kaj Esp-istajn organizaĵojn en la nomitaj landoj. Ni deziras al s-ro Sattler agrablan vojaĝon kaj bonajn propagandajn sukcesojn.

Protokolaro pri la Internacia Konferenco en Vieno. — Oni intencas eldoni la protokolaron de la internacia konferenco pri „Esperanto en la lernejon kaj praktikon!", okazinta en Vieno antaŭ du monatoj. La libreto estos ĉ. 80-paĝa kaj entenos la protokolojn dulingve: Esperante kaj germane. Ĉar oni presos nur tiom da ekzempleroj, kiom estos antaŭmenditaj, estas konsilinde baldaŭ mendi la deziratan kvanton, ensendante samtempe la prezon: po 5 int. respondkuponoj. Adreso: Internacia Esperanto-Muzeo, I. Neue Burg, Wien (Aŭstrio).

Grava libro aperos baldaŭ. — La verkoj de la fama angla aŭtoro Charles Dickens estas tutmonde konataj. Pro tio estas sensacia novaĵo, ke unu verko de Dickens aperis nur antaŭ kvar monatoj en Anglujo. La titolo de tiu libro estas: „La vivo de nia Sinjoro, Jesuo". Dickens verkis ĝin en 1849, dudek-du jarojn antaŭ sia morto, sed ne intencis ĝin eldoni. Li destinis la verkon speciale kaj nur por siaj infanoj, por ke la familio havu daŭran memoron pri la pensoj de la patro. Post la morto de lia filo, Sir Henry Dickens, la familio permesis, ke la verko estu eldonata. Ĝi aperis unue en la grava angla ĵurnalo „The Daily Mail" kiel felietono, kaj poste en libro-formo. En la komenco de Aŭgusto ĉi tiu rapide mondfamiĝinta libro aperos ankaŭ en Esperanto, en la eldono de „The Esperanto Publishing Company Limited" en Londono. Laŭ ricevitaj informoj la nova libro estos unu el la plej belaj eldonaĵoj en Esperanto. Ĝi estos presata sur luksa papero kaj enhavos bildojn de mondfamaj pentristoj, ekz-e Raphael, Leonardo da Vinci kaj aliaj. La prezo estos ses britaj ŝilingoj, sendkosto ses pencoj. Ĝi estos mendebla ankaŭ ĉe La Praktiko (prezo kun sendkosto 2.60 guld.).

„Ludo de l'Piratoj". — La lasta numero de nia satira revuo „La Pirato", sprite redaktata de s-ro Raymond Schwartz, surprizis la abonantojn per interesa desegnita lud-plano. La ludantoj ĵetas kubojn kaj laŭ la ricevitaj punktoj progresas sur la numeritaj paŝoj de la plano, trapasante diversajn amuzajn kaj terurajn aventurojn, nu, kiel tio kutimas okazi al piratoj.

„La Juna Vivo", dusemajna organo por la junularo, pri kiu ni jam skribis en la antaŭa numero, aperis. La unuaj du numeroj entenas facilstilajn interesajn rakontetojn, kantojn, lingvajn ekzercojn kaj humoraĵojn por junaj Esperantistoj. La novan gazeteton redaktas kaj eldonas s-ino E. van Veenendaal-Bouwes en West-Graftdijk (N.H.), Nederlando. La jara abonprezo estas por Nederlando 0.75 guld., por la aliaj landoj 1.— guld. (Nederlanda poŝtkonto 209354.)

„Kristo kaj la universala frateco." — Antaŭ kelkaj monatoj ni informis nian legantaron pri la internacia konkurso farita sub ĉi tiu titolo. Laŭ informo ricevita de la organizantoj, la konkurson oni fermis la 31-an de Majo. Oni registris entute 250 manuskriptojn, el kiuj 8 estas Esperanto-lingvaj. La nombroj de alilingvaj ensenditaj verkaĵoj: angla 41, franca 38, germana 31, hungara 30, ĉeĥa 19, nederlanda 13, pola 13, greka 12, sveda 11, k.t.p. La juĝa komitato, elektita el diversaj nacioj, jam trifoje kunsidis. Oni publikigos la rezulton en la aŭtuno, okaze de la kunveno de la Ligo de Nacioj.

La konkurso pri la Jesu-Infano en Praha. — La Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo aranĝis internacian konkurson pri la temo: „Kiel oni honoras en la eksterlando la Jesu-Infanon de Praha?" La Ligo ricevis 16 konkursajn laboraĵojn el 12 landoj. La kvin premiojn ricevis: P. Henry Josef en Kozhansheri Travancore (Hindujo), P. Fernandez Marti Albanell en Barcelona (Hispanujo), f-ino D. Robert en Bruselo (Belgujo), P. Dom Wilfrid Broens en Tunapuna (insulo Trinidad) kaj P. Piotr Pieta en Kraczkowa (Polujo).

Internacia konferenco de IPE. — La organizaĵo de proletaj Esperantistoj „IPE" aranĝos internacian konferencon en Lille (Francujo), en la tagoj 12-15 de Aŭgusto.

Esperanto-kurso en malliberejo. — En Amsterdamo s-ro Hans Bakker gvidis Esperanto-kurson en la ŝtata malliberejo por 50 personoj, kiuj kun granda intereso kaj diligenteco lernis la mondlingvon. La okupiĝo pri Esperanto efikis al ili tre edife kaj feliĉige. La kurso finiĝis kun 23 personoj, ĉar la ceteraj intertempe liberiĝis.

Danujo. — Nia fervora propagandistino f-ino M. Saxl faris tra Danujo grandsukcesan preleg-vojaĝon. En 12 urboj ŝi parolis kun lumbildoj pri la Bavaraj Alpoj kaj Oberammergau. En kelkaj Esp-kluboj ŝi paroladis ankaŭ pri Berlino, Francujo, Nederlando kaj pri la Esperanto-Domo en Arnhem. — La 26-an de Junio f-ino Saxl vizitis la klubon en *Kalundborg* kaj faris valoran propagandan helpon. — La internacia komenca kurso de f-ino M. Saxl en *Silkeborg* okazis kun bona sukceso. Partoprenis 25 personoj el 4 landoj. En la superaj kursoj partoprenis 60 personoj el 9 nacioj.

Estonio. — La Esperanto-Societo en *Tartu* la 29-an de Aprilo festis la 20-jaran datrevenon de sia fondiĝo. Grava punkto en la festa programo estis la solena diservo, kiun Esperant-lingve faris prof. d-ro H. B. Rahamägi, dekano de la teologia fakultato, fariĝinta poste tut-estonia episkopo luterana, kaj pastoro A. Hinno. La diservo estis per radio disaŭdigata. En Tartu, la centro de la estona kultur-vivo, la jubileanta societo faris ĝis nun tre valoran kaj ampleksan laboron por Esperanto.

Francujo. — En *Dunkerque* s-ro J. Glück sukcesplene finis du kursojn. En la kursfina festo la urbestro mem faris tre varman laŭdan paroladon kaj transdonis al s-ro Glück la honoran medalon de la urbo. — En *Niort* okazis sukcesa kurso sub la gvido de s-ro J. Glück. Post la kurso fondiĝis grupo, kies prezidanto estas s-ro Joël Thézard, eminenta profesoro kaj verkisto.

Jugoslavio. — En *Beograd* la Esp-Societo komencis sian novan societan jaron per elekto de nova gvidanta komitato sub la prezido de s-ro R. Klajić, malnova pioniro de Esperanto. La societo kunvenas ĉiumarde en la hotelo „London". Fruktodona koresponda kurso funkcias sub la gvidado de s-ro Zivanović. La societo abonas por sia membraro kvin Esp-ajn gazetojn. Travojaĝantaj Esp-istoj estas kore bonvenigataj. — Nia fervora propagandisto, s-ro Dragutin Wranka, atingis rekordan sukceson per la instruado de Esperanto, en la urboj *Osijek, Vukovar kaj Belišće*. La tri paralelaj kursoj en Osijek finiĝis la 23-an de Junio per festo, kiu fariĝis grandioza manifestado por Esperanto. La dankema kursanaro transdonis al s-ro Wranka belan memordonacon.

Nederlando. — La 24-an de Junio okazis en *Veendam* la 5-a nord-nederlanda Esp-kongreso, sub la prezido de s-ro P. Korte. Partoprenis ĉ. 200 verdstelanoj el la tri nordaj provincoj de Nederlando, kaj ankaŭ f-ino Kirchberger el Leipzig kaj s-ro S. Pragano el Rumanujo. La kongreso tre bone sukcesis, dank' al la modela kunlaboro inter la neŭtralaj, laboristaj kaj katolikaj Esp-grupoj. — La Esp-grupo „Komprenado faras pacon" en *Haarlem* la 1-an de Julio festis sian 25-jaran jubileon. En la festkunveno paroladon faris f-ino Juliette Baudin el Ĝenevo. — La 23-an de Junio okazis ekzameno por A-diplomo en Maastricht. Partoprenis 32 kandidatoj kaj el ili sukcesis 20. — En la industria urbeto *Helmond* fondiĝis Esp-ista grupo sub la nomo „La Verda Stelo". Ĝi havas jam 41 anojn.

Nederlanda Hindujo. — En *Makassar* (suda parto de la insulo Celebes) s-ro P. Mamesah fervore disvastigas Esperanton. Li petas sendi propagandilojn kaj leterojn (adreso: Lariang Bangistrato, Makassar). La mahometana societo „Perpi" preparas kurson por siaj anoj.

Polujo. — En *Bydgoszcz* la Scienca Esperanta Rondo la 9-an de Julio komencis novan kurson sub la gvidado de prof. M. Sygnarski.

Rumanujo. — En *Cluj (Kolozsvár)*, ĉefurbo de Transilvanio, revigliĝis la movado. Fondiĝis Esp-ista grupo sub la estrado de s-roj D-ro Pocanschi, S. Csóra, A. Beier kaj A. Mihályi. La 11-an de Julio okazis bonsukcesa sveda vespero. La gazeto Munkás-Ujság publikigas artikol-serion pri Esperanto.

Prof. E. Asai en Nederlando.

La 28-an de Julio vizitis nian redakcion la japana scienculo, s-ro E. Asai, profesoro ĉe la Kolegio de Fremdaj Lingvoj en Osaka (Japanujo). S-ro Asai estas malnova Esperantisto. Vizitinte Nederlandan Hindujon li venis kune kun sia edzino al Nederlando, por fari lingvistikajn studojn ĉe la Universitato en Leiden. La 5-an de Aŭgusto gesinjoroj Asai vizitos la Esperanto-Domon en Arnhem.

S-ro Ivan H. Krestanov

el Pirdop (Bulgarujo), ŝtata lektoro de fremdlingvoj en Sofio, jus festis sian 30-jaran jubileon de Esperanto-fideleco. Esperanton li ellernis jam kiel lernanto, dum pasko de 1904, kaj dank' al ĝi travojaĝis preskaŭ la tutan Eŭropon, konigante la ĝojojn kaj suferojn de la bulgara popolo kaj la belecon de Bulgarujo, la lando de la rozoj. Li verkis la librojn „La bulgara lando kaj popolo" kaj „El la proksima Oriento" kaj kompilis la „Bulgaran Antologion". — La Praktiko kore gratulas.

La bongusta „SANOVITE" estas beno por la stomako kaj intestoj.

VORTARO

Ĝangalo = ĝunglo (ĵunglo), marĉa densejo en Hindujo
Kaki = eligi el la ventro la restaĵon de la digestitaj nutraĵoj
Kolapso = nomo de malsano (rapida senfortiĝo)
Kvaranteno = deviga restado ĉe la landlimo, pro suspekto de infekta malsano
Kesito = monunuo ĉe la antikvaj izraelidoj
Klimakso = gradado (figuro en la retoriko)
Kokoto = malmorala virino
Kvodlibeto = muzikaĵo aŭ literaturaĵo kunmetita el divers-specaj partoj
Mamono = la dio de la riĉeco
Mefito = mambestoj, kiuj elŝprucas malbonodoran likvaĵon por sin defendi
Monitoro = 1. nomo de besto; — 2. rivera militŝipo
Omaĝo = objekto donacata pro respekto
Paliativo = kuracilo, kiu por mallonga tempo malpliigas la malsanon, sed ne sanigas vere
Pandiono = aglo kaptanta fiŝojn
Pelargonio = nomo de floro
Pernoktero = speco de birdo
Perversa = inklina al kontraŭnaturaj, nenormalaj aŭ malbonaj agoj

LIBRO-LOTERIO de LA PRAKTIKO

Rapidu aĉeti lotojn, por ke la tirado povu baldaŭ okazi! Legu la detalajn informojn en la Januara numero!

LA LISTO DE LA PREMIOJ (DAŬRIGO):

124 **Jaĉjo Holm kaj liaj amikoj.** 236 paĝoj. Lukse bindita.
125 **Rumana Bonhumoro.** Trad. S. Pragano.
126 **Preter la vivo.** Poemaro de Julio Baghy.
127 **La tragedio de la homo.** Tradukis K. Kalocsay.
128 **Vienaj legendoj.** De A. Mair.
129 **Skizoj pri la teorio de Esperanto.** De Drezen.
130 **Hura! Romano,** de J. Baghy.
131 **Legendoj.** De Niemojewski.
132 **Elektitaj noveloj** de Turgenev.
133 **La nigra galero.** De Raabe.
134 **El la „Camera Obscura".** De Hildebrand.
135 **El la skizlibro.** De W. Irving.
136 **Ses noveloj.** De E. A. Poe.
137 **La firmao de la kato, kiu pilkludas.** De H. de Balzac.
138 **Orientaj fabeloj.** De Vlas Doroŝeviĉ.
139 **Noveloj** de H. Sienkiewicz.
140 **Ano de l' ringludo.** De Dinko Ŝimunoviĉ.
141 **Eksiĝo.** De N. Jerušalmi.

Daŭrigota

GARDATAJ LOTOJ (daŭrigo). — Adamek 6119—6129, Boazzo 6911—6913, Bourlier 6600—6610, Bourniche 6924—6928, Bumbieris 6905—6910, Canavaggio 6914—6918, Ebbinge 6421—6425, F. V. 6710—6720, „Gereon" 6545—6555, Germanton 6567—6577, Gluchowski 6485—6495, Heczke 6929—6933, Hottinga 5999—6003, Jacquillard 6442—6452, Kala 2261—2262, „Karlsruhe" 6633—6643, Keleti 6934—6938, Kmiecik 6611—6621, Kolodziejski 6900—6904, Kurzens 6388—6398, Leonard 6556—6566, Monod 6399—6409, Newerla 6589—6599, Nicolai 6463—6473, Nozawa 6431—6435, Paraige 6355—6365, P. P. Kraczkowa 6578—6588, Renz 6496—6500, Rokicki 6699—6709, Rousset 6474—6484, Santa 6501—6511, Schmidt 6644—6654, Sklenĉka 6677—6687, Snoek 6919—6923, Abdullah Soryo 2272—2273, Stampfer 6688—6698, Ŝejk Sulejman 6436—6440, Ŝtupar 6426—6430, TES 6666—6676, Tolnai 2258—2260, Velders 6721—6731, Virieu-Gerdès 6655—6665, Weinberger 6622—6632, v. Willigen 6512—6522.

KONKURSOJ

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Julia numero!

100-a konkurso.

(De s-ro E. W. v. d. Burgh en Leiden, Nederlando)





Kunmetu la supre starantajn litergrupojn tiel, ke ili donu la maldekstre videblan figuron. Se vi bone kunmetis ilin, vi trovos en ĉiu horizontala linio la nomon de unu metalo.

Inter tiuj, kiuj ensendas la nomojn de la ses metaloj, ni disdonos 6 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la fino de Oktobro. Bonvolu precize plenumi la konkursajn regulojn!

101-a konkurso.

(Al la legantaro de La Praktiko prezentas la eldonejo Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig.)

Estimata legant(in)o!

Ĉi tie vi vidas interesan bildon pri nia fervora samideano s-ro Gustavo Legemul, prezidanto de la Esperantista Societo „Ni Fosu Nian Sulkon" en Verdmur (Esperantujo). Kiel vi vidas, s-ro Legemul kun plena atento legas. Li legas tre interesan kaj bonstilan libron, kiun li portas kun si eĉ al la frizejo. La libro estas unu el la serio de „INTERNACIA MONDLITERATURO", eldonita de la konata eldonejo de belaj Esperantaj libroj, *Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig (Germanujo)*. S-ro Legemul legas precize tiun numeron de la nomita libro-serio, el kiu la eldonejo ĝis nun vendis la plej multajn ekzemplerojn.

La konkursa tasko estas: ELTROVU LA TITOLON DE LA LIBRO, kiun s-ro Legemul legas. La tasko estas tre facila. Se vi atente tralegas la liston de la „Int. Mondliteraturo" (ĝi estas trovebla en ĉi tiu numero de La Praktiko, sur la lasta paĝo), vi povas konjekti, kiu numero estas disvendita en plej granda kvanto.

La titolo de tiu libro estas deponita en fermita koverto ĉe la redakcio de La Praktiko.

La eldonejo *F. Hirt & Sohn* rekompencos per **10 premioj** tiujn, kiuj eltrovis la ĝustan titolon. Ĉiu premio estas unu numero de la *„Internacia Mondliteraturo"*. La gajnintoj mem povas elekti la deziratan numeron.

La solvojn oni skribu jene: *„S-ro Legemul legas la libron: ..... Se mi gajnas premion, oni sendu al mi al libron: ....."*

La solvojn oni devas sendi ne al la redakcio, sed rekte al: **Eldonejo Ferd. Hirt & Sohn, Esperanto-Fako, Salomonstrasse 15, Leipzig C 1 (Germanujo).**

Limtempo por la ensendo de la solvoj: la fino de Oktobro. La 1-an de Novembro okazos la disdono de la premioj. Se pli ol dek personoj ensendis la ĝustan solvon, oni decidos per lotado.

Kupono por la 100-a	Kupono por la 101-a

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj gluu ilin sur viajn solvojn.

LA REDAKCIO RESPONDAS

S-ro S. de J. en W. (Ned.) — La senpaga korespondanta anonceto estas persona favoro kaj tial oni ne povas transdonĩ ĝin al alia persono.

S-ro N. W. en P. (Franc.) — La vorto „endendi" estas tute korekta kaj vaste uzata, same kiel „emmeti", „enskribi" k.t.p. — „Po 4 voĉojn ricevis la jenaj numeroj..." En ĉi tiu frazo la akuzativo ne estas malĝusta.

S-ro A. S. en H. (Germ.) — La ĝeneva filio de la Komerca Banko de Basel skribis al vi, ke la Esperant-lingva atlaso pri mono kaj tempo estas elĉerpita, sed oni presos novan eldonon, kies prezo estos 1 svisa franko; se vi deziras ĝin ricevi, bonvolu sendi vian mendon kun la mono. Ankaŭ ni bedaŭras, ke la banko respondis al vi en franca lingvo, anstataŭ la neŭtrala internacia lingvo Esperanto.

S-ro E. C. en R. (Ned.) — Se vi deziras trovi spertan Esperantiston por korekti viajn tradukaĵojn, bonvolu publikigi anoncon en La Praktiko. Ni esperas, ke vi sukcesos.

S-ro G. C. v. D. en H. (Ned.) — Jes, vi rajtas uzi tiun stampilon.

S-ro S. R. en B. (Pol.) — Pri porinfana Esperanto-lingva gazeto vi trovas informon en ĉi tiu numero inter la „Informoj".

S-ro F. A. G. B. en A. — „La kurtenoj estis malpuraj, sed la barono ne vidis tion." Ĉi tiu frazo estas perfekte bona. La vorto „estis" estas tute korekta. Se vi tamen volas uzi estantan tempon, vi devas ŝanĝi la konstruon de la frazo jene: „La barono ne vidis tion, ke la kurtenoj estas malpuraj."

Al la ensendintoj de fotoj. — Nia redakcio ricevis centojn da fotoj por publikigo en La Praktiko. Ni volonte publikigus ĉiujn bildojn, por prezenti al nia legantaro la Esperanto-movadon kiel eble plej kompleta. Sed bedaŭrinde la limigita spaco de nia gazeto ne ebligas tion. Tial unue ni publikigas tiujn bildojn, kies ensendintoj mendis kvantojn de la numeroj entenontaj la koncernan bildon. Kaj poste aperos la aliaj bildoj, laŭvice, se ili estas taŭgaj por kliŝigo kaj sufiĉe interesaj por la legantaro. Do per mendo de kvanto oni povas rapidigi la aperon de la bildo. La prezo de 25 ekz-oj: la duoblo de la jarabona sumo; 40 ekz. = la trioblo de la jarabona sumo.

S-ro A. v. d. S. en Y. (Ned.) — Ni ĝojas, ke vi en tiel praktika maniero pruvis al vi la superecon de Esperanto pro la posedo de akuzativa formo en nia gramatiko.

F-ino S. Ĉ. en P. (Ĉeĥosl.) — Ni kore gratulas al vi, ĉar vi sukcesas preskaŭ la tutan enhavon de nia rubriko „AL LA VENKO!" publikigi en la naciaj gazetoj de via urbo. Vi donas bonegan ekzemplon al la tuta legantaro de La Praktiko. Ni tre laŭdas vian diligentan kaj inteligentan laboradon por Esperanto.

S-ro G. M. en M. (Sovjetunio). — 1. Kun viaj demandoj pri la portugala lingvo bonvolu turni vin al iu delegito de UEA en Portugalujo aŭ Brazilo. — 2. Niaj konkursaj reguloj en ĉi tiu jaro estas la samaj, kiel en la pasinta jaro.

S-ro H. R. en K. (Dan.) — 1. En la Fundamento tiu vorto havas la formon „hemio". Sed por plaĉi al homoj, kiuj malfacile elparolas la literon „h", oni enkondukis ankaŭ la formon „kemio". Nuntempe ambaŭ formoj estas uzataj. Simile okazis ĉe pluraj aliaj vortoj, kiuj entenas la literon „h". — 2. Zamenhof mem uzis la formon „koĉero". Ĝi signifas: veturigisto de kaleŝo. — 3. La vortaro de Verax enhavas la vorton „ŝero" kun la signifo: tondilo. Sed ĉar la vorto „tondilo" estas tute taŭga kaj sufiĉa, la vorto „ŝero" malaperis en la praktiko. — 4. Durada = du-rada (havanta du radojn). — 5. P_2O_5 = fosfika anhidrido (laŭ la vortaro de Verax). Fosfoza anhidrido = P_2O_3. — 6. HgO = hidrargika oksido. Hg_2O = hidrargoza oksigeno. La regulo estas: -ika = pli da oksigeno, -oza = malpli da oksigeno.

DANKON diras la Esperanto-Domo en Arnhem al **s-ro F. Azorin**, kiu afable donacis por la biblioteko ekzempleron de sia verko „Universala Terminologio de Arkitekturo", kaj al la **P.T.T.-kursanoj**, kiuj donacis 10 guldenojn por nova flago.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — Petu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

ALUMET-SKATOLETOJ. — S-ro Max Thiel, oficisto, Judengasse 9 en Salzburg (Aŭstrio), deziras interŝanĝi alumet-skatolajn etiketojn, kun ĉiuj landoj, kontraŭ il. poŝtkartoj aŭ aliaj egalvalorajoj.

PROPONO. — 20-jara katolika fraŭlino el Nederlando prezentas sin kiel fraŭlino por akompano aŭ ĉe infanoj. Parolas Esperante, germane kaj iom angle. Scias muzikon. Adreso: f-ino Th. Brouwer, Stationsrestaurant, Winterswijk (Nederlando).

GRANDA PETO al ĉiu, kiu povas sendi senpagan materialon (precipe afiŝojn, il. poŝtkartojn bildflanke afrankitajn!) por du ekspozicioj, kiujn organizos inter studantoj de pedagogia teknikumo, malgranda Esp-ista grupo en la mezo de Septembro. Ni respondos al ĉiu per il. poŝtkarto. — Adreso: Poŝtkesto 348 en Moskvo-9 (Sovjet-Unio).

STENOGRAFIO, SKRIBA KURSO. — Petu informojn de: s-ro B. P. Roubos, Noordendijk 90, Dordrecht (Nederlando).

PETO. — Kiu Esperantisto povus helpi unu aŭ du nederlandajn knabinojn 20-jarajn, per loko ĉe familio „au pair" (sen gajni) eksterlande? Ili estus tre dankaj. — Adreso: S-ro Schoorl, Straatweg A 22 en Alkmaar (Nederlando).

ATENTU! — Se vi deziras rimedon facilan kaj malmultkostan por progresigi nian aferon, samtempe bonefikante al vi mem, aĉetu kaj legu la libron „BONHUMORO" de Paul Nyssens. Prezo kun sendkosto: 1.25 ned. guld. — Aĉetebla ĉe La Praktiko.

LONDONO! — Por ekzerci kaj spertiĝi en Esperanto mi volonte gvidadus alilandajn gesamideanojn tra Londono dum la vesperaj liberaj horoj. Adreso: S-ro C. P. Cocks, 55 Bishopsgate, London, E.C.2.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —.45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. — *La redakcio.*

ŜLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon gluu sur la bildan flankon
s-ino = sinjorino	L = letero	
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	
dez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

MEMORIGO. — La jenaj anoncintoj estas petataj respondi: **S-ro Hara-Sozo** en Osaka (al s-ro Th. v. d. Klugt en Roelof-Arendsveen, Nederlando). — **S-ro N. Welander** en Billesholms-Gruva kaj **s-ro R. Alessie** en Amsterdam (al s-ro J. Santa en Kula, Jugoslavujo).

Brighton. — S-ro Edgar J. Smith, 21 Hampton Place. — Serĉas daŭran korespondadon kun po unu lingvosperta samidean(in)o en Romo kaj Ateno (PI, L) pri antikvaĵoj en Italujo kaj Grekujo; ankaŭ Esp-aj demandoj. Nepra respondo.

BELGUJO

Antwerpen. — S-ro Jules Ginsburg, 24-jara, Lange van Ruusbroecstraat 61. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Resp. sole kontraŭ respondkupono.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Jägerndorf. — F-ino Ida Proksch, Olbersdorferstrasse 31. — L, PI, kun ĉiuj negermanaj landoj. Promesas respondi almenaŭ unufoje al ĉiu.

Tetschen a/E. — S-ro Manfred Hoche, ĉe s-ro Hans Roppert, Bräuhausgasse 9. — Dez. interŝ. PM (peco kontraŭ peco, laŭ manko-listo) kaj PI (ne bfl.), k.ĉ.l. Certe resp.

Uh.-Ostroh (Moravio). — S-ro Karel Botek, librobindisto, Ostr.-Predmesti 617. — Dez. kor. kun kolegoj el ĉ.l., ĉar intencas vojaĝi fremdlanden. Certe resp.

Vodnany. — S-ro Rudo Prucha, Delegito de UEA. — Dez. interŝ. PM nur kun seriozaj filatelistoj, peco por peco aŭ laŭ katal. Michel. PI, jurnaloj, k.ĉ.l. Certe resp.

Vodnany. — S-ro Jaro Šváb, Bavorovská. — Dez. interŝ. PM, peco por peco, k.ĉ.l. Certe resp.

ĈINUJO

Shanghai. — S-ro Fang Ren Chyi, 31-jara oficisto, 383/3 Taku Road. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe resp.

DANUJO

Kalundborg. — F-ino Irma Hjórth, Tómmerup. — Dez. kor. k.ĉ.l., precipe kun f-inoj. Certe resp.

Odense. — S-ro Viggo Hansen, 28-jara, St. Jörgensgade 12. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t.

FRANCUJO.

Issoudon (Indre). — S-ro J. Vallé, instruisto, 22-jara fraŭlo, 53 rue de la Fraternité. — Dez. kor. kun ĉiulandaj personoj, kiuj partoprenos en la Esp-kongreso en Romo en 1935.

Louviers (Eure). — F-ino Blanche Canavaggio, instruistino, 7 rue de l'Ile. — Dez. kor. kun itala samideano parolanta france, por interŝ. ĵurnalojn aŭ librojn.

GERMANUJO

Karlsruhe a/Rh. — S-ino E. Feigenbutz, instruistino, Jollystrasse 57. — L, PI, p.ĉ.t. Kun fidelaj gekorespondantoj en Italujo, Grekujo, Jugoslavio, Afriko, Sud-Azio, Aŭstralio.

HISPANUJO

Valencia. — S-ro Fernando Boscá, 28-jara, naturscienca doktoro, Av. 14 de Abril 60. — L, PI, p.ĉ.t. Interŝ. PM, fotojn, bildgazetojn kaj malgrandajn naciajn tipajojn. Nur kun Turkujo, Albanujo, Azio kaj Oceanio. Certe respondos.

JAPANUJO

Hakodate. — S-ro I. Ishikura, poŝtoficisto, Hon-ĉio 1. — Dez. interŝ. PM (precipe memorajn kaj aerajn PM) kaj PI. Dez. kor. (precipe pri lernado de la angla lingvo, kun angloj kaj amerikanoj). Certe respondos.

Kioto. — S-ro Kiyosi Itoi, 26-jara tapetisto, Imakoji-Sitihonmatu-Nisi. — L, PK, PI, k.ĉ.l., precipe kun f-inoj, pri naciaj lokoj, kutimoj kaj vestajoj. Certe resp.

LATVUJO

Riga. — F-ino E. Zandaus, Balozu iela 4—4. — PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Riga. — S-ro R. Zandaus, Balozu iela 4—4. — PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

NEDERLANDO

Alblasserdam. — S-ro E. van Walsum Hzn., Wijk E. 86, Kinderdijk. — Dez. kor. per PI montrantaj vento-akvomuelejojn. Interŝanĝe sendas kartojn pri muelejoj de sia regiono. Nur kun eksterlandanoj.

Alkmaar. — F-ino N. Vellinga, Nieuwlandersingel 54. — Dez. kor. k.ĉ.l.

Amsterdam-Noord. — S-ro D. Takes, 35-jara tapetisto, Pirolastraat 12. — L, PK, PI, k.ĉ.l. Certe kaj tuj respondos.

Amsterdam-West. — S-ro G. J. J. Beems, Da Costakade 201. — Dez. kor. k.ĉ.l.

Den Haag. — S-ro B. Dijk, asekuristo, Mient 149. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. (ne pri religio kaj politiko). Certe respondos.

Heiloo. — S-ro P. Rem. Westerweg C. 75. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Leeuwarden. — S-ro W. Gombault, Franekerstraat 39. — Serĉas por siaj gelernantoj korespondantojn. K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Leiden. — S-ro A. Heijsen, Schelpenkade 39. — Dez. kor. pri agrikulturaj, ekonomiaj problemoj kaj pri internacia juro.

Roosendaal (N.Br.) — S-ro M. Deijkers, reprezentanto de bros-fabriko, Rozestraat 22. — Kor. k.ĉ.l. precipe pri bros-fabrikado. Dez. ricevi florsemojn de edelvejso kaj lotuso kun klarigo pri la kulturmaniero. Rekompencos laŭ la valoro.

Rotterdam. — S-ro J. P. Verheul, 24-jara junulo, Gaffelstraat 48.a. — L, PI (bfl.), k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Rotterdam-West. — F-ino A. Rebers, Hooidrift 33.a. — Dez. kor. kun Sud-Ameriko, p.ĉ.t. Certe respondos almenaŭ unufoje, sed ne al filatelistoj.

Schoorl. — S-ro G. Selhorst, botanikisto, Burgem. Peecklaan 228. — Dez. interŝ. semojn de vivantaj floroj, kun Afriko kaj Azio.

Woerden. — F-ino Jeanne Vroege, Zandwijksingel 12. — Dez. kor. k.ĉ.l. (ankaŭ kun holandanoj), p.ĉ.t.

POLUJO

Halemba (pow. Katowice, Silezio). — S-ro Franc Besler, senlabora seruristhelpanto, ul. Polna. — L, k.ĉ.l., pri edziĝtemo, kun f-inoj 18-25-jaraj, kun fotoj. Certe resp.

Kazimierz k/Strzemieszyc. — S-ro Marceli Denkovski, mineja maŝinisto, Kop. Juljusz. — PI kun Japanujo kaj Francujo.

RUMANUJO

Baia-Mara (Transilvanio). — F-ino Etelka Juda, instruistino, strada Sft. Nicolae 17. — Dez. kor. kun pli aĝaj gesinjoroj p.ĉ.t. Precipe kun la nordaj kaj sudaj partoj de la terglobo.

Câmpia Turzii (jud. Turda). — S-ro Zoltán A. Kreiter, 19-jara komercisto. Industria Sârmei. — L, PK, PI, PM peco por peco. Certe resp.

SOVJET-UNIO

Volovo-Livenskoje (C.Ĉ.O.) — Preposto K. M. Kolobaŝkin, dekano-parohestro. — Dez. kor. precipe kun pastroj, foto-amatoroj kaj abelistoj.

SVEDUJO

Göteborg. — S-ro Arno Becker, metallaboristo, Nyströmsgatan 10. — Dez interŝ. PI.

Göteborg. — S-ro Hjalmar Carlsson, Masthuggsliden 59.A. — Dez. kor. kun ekstereŭropaj gesamideanoj.

Göteborg. — F-ino Agda Olsson, Fabriksgatan 54. — Dez. interŝ. PI.

Göteborg 10. — S-ro Albert Svensson, transportlaboristo, Arendal. — Dez interŝ. PI.

Romano pri Afrika bieno.

Verkita de Olive Schreiner.

Tradukis el la angla lingvo S. A. Andrew.

Mondfama romano pri la vivo de nederland-devenaj loĝantoj en Sud-Afriko. La verko entenas belan amhistorion, originalan filozofion pri la vivo kaj realecajn priskribojn pri Sud-Afriko.

Eldonita de:

The Esperanto Publishing Company Ltd., London.

Havebla ĉe:

Brita Esperantista Asocio, 142 High Holborn, London W. C. 1.

kaj ĉe ĉiu Esperantista libro-vendejo.

Prezo: Bindita 6 ŝil.; broŝ. 4 ŝil. 6 pencoj. Afranko 6 p.

Aĉetebla ankaŭ ĉe LA PRAKTIKO (prezo kun sendkosto: bindita: 2.60 guld.; broŝurita: 2.— guld.)

La tuta mondo parolas al vi

pere de la kolekto de plej famaj verkoj

INTERNACIA MONDLITERATURO

1. Goethe: **Hermano kaj Doroteo.** El la germana lingvo.
2. Niemojewski: **Legendoj.** El la pola lingvo.
3. Turgenev: **Elektitaj noveloj.** El la rusa lingvo.
4. Raabe: **La nigra galero.** El la germana lingvo.
5. Hildebrand: **El la „Camera Obscura".** El la holanda.
6. Irving: **El la skizlibro.** El la angla lingvo.
7. Chamisso: **La mirinda historio de Petro Schlemihl.** El germ.
8. Stamatov: **Nuntempaj rakontoj.** El la bulgara lingvo.
9. Ŝalom-Alehem, Perec: **Hebreaj rakontoj.** El la hebrea.
10. Puŝkin: **Tri noveloj.** El la rusa lingvo.

11—12. Arišima: **Deklaracio.** El la japana lingvo.

13. Poe: **Ses noveloj.** El la angla lingvo.
14. Balzac: **La firmao de la kato, kiu pilkludas.** El franca.
15. Doroŝeviĉ: **Orientaj fabeloj.** El la rusa lingvo.
16. Sienkiewicz: **Noveloj.** El la pola lingvo.
17. Strindberg: **Insulo de feliĉuloj.** El la sveda lingvo.
18. Bertrana: **Barbaraj prozaĵoj.** El la kataluna lingvo.
19. Simunoviĉ: **Ano de l' ringludo.** El la kroata lingvo.
20. Eekhoud: **Servokapabla! Marcus Tybout.** El la franca.
21. Sadoveanu: **Nobela peko.** El la rumana lingvo.

Prezo de unu volumo (64-80 paĝoj, kartonita, en arta kovrilo, formato 15 × 19 cm.): RM 0.80.

„... kun vera ĝojo oni devas saluti ĉi tiun serion. Ni urĝe bezonas verajn librojn Esperantajn, ne originalajojn, sed tradukojn de la plej bonaj libroj el ĉiuj lingvoj. Se ni volas esperi, ke Esperanto havos signifon kiel internacia lingvo, ni devas en tiu lingvo posedi tradukojn de la mondfamaj verkistoj, mortintaj kaj vivantaj."

Mendu ĉe via libristo aŭ senpere ĉe la eldonejo:
FERDINAND HIRT & SOHN, Esperanto-Fako. Leipzig C 1,
Salomonstrasse 15. (Poŝtĉekkonto: Leipzig 52372.)

La cititaj libroj estas aĉeteblaj ankaŭ ĉe LA PRAKTIKO. (Prezo de unu volumo kun sendkosto: —.50 ned. guld.)

Esperanto-Presejo PIER WESTERBAAN, Vaillantlaan 523—529, Den Haag (Nederlando).

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 9 (33) ★ Septembro
1934

Esperanto-aleo

estas la nova nomo de la vojo, kiu kondukas al la Esperanto-Domo en la nederlanda urbo Arnhem. En la tuta mondo jam en pluraj dekoj da urboj ekzistas stratoj aŭ placoj, kiuj portas la nomon de nia lingvo aŭ de ĝia genia aŭtoro Zamenhof. Decas, ke ankaŭ la urbo Arnhem, tiom konata kaj ŝatata en la Esperantista mondo, donu tiun honoron al nia lingvo. Tial la Int. Cseh-Instituto proponis al la urbestraro de Arnhem, nomi je „Esperanto" la vojon, kiu kunligas la Esperanto-Domon kun la Velpa vojo (Velperweg), ĉefstrato en Arnhem. La urbestraro la 23-an de Julio akceptis la proponon kaj decidis doni al la vojo la nomon „Esperantolaan". La nederlanda vorto „laan" signifas: aleo.

S-ro L. Moreau, administranto de la Esperanto-Domo en Arnhem, kaj lia familio, antaŭ la nom-tabulo de la Esperanto-aleo.

Dum la monato Aŭgusto la urbestraro farigis la emajlajn tabulojn kun la nomo, kaj la 25-an de Aŭgusto okazis la solena inaŭguro. Multaj Esperantistoj kunvenis el Arnhem kaj el la ĉirkaŭaj urboj kaj vilaĝoj, por kune ĝoji kaj festi pro ĉi tiu nova venko de nia lingvo.

La Esperanto-aleo estas bela vojeto inter ĝardenoj kaj arbegoj, kies foliaroj formas verdan volbaĵon super la vojo. Okaze de la inaŭguro kelkaj diligentaj samideanoj mezuris la longecon de la Esperanto-aleo kaj trovis la interesan rezultaton, ke ĝi estas precize 365 paŝojn longa.

De nun la Esperanto-Domo havas la adreson: *Esperantolaan 3*, anstataŭ la ĝisnuna adreso: Schaapsdrift 187 (pro la vojo pasanta malantaŭ la Esperanto-Domo).

Ni ne forgesu, ke la Esperanto-stratoj en la diversaj urboj estas ne nur signoj de rekono kaj honoro al nia movado, sed ankaŭ tre efikaj propagandiloj por nia lingvo. Tial ni klopodu akiri multajn novajn Esperanto-stratojn. Nia devizo estu: *Esperanto-straton en ĉiu urbo!*

La Praktiko

GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. **Abonprezo por unu jaro: 2.50 nederl. guldenoj,** por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Unu numero kostas -.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., ½ p. 45.-, ¼ p. 25.-, ⅛ p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE NIAJ KONKURSOJ

74-a konkurso. En la Marta numero de La Praktiko ni jam publikigis la solvojn envenintajn por ĉi tiu konkurso kaj ni alvokis nian ŝatatan legantaron por fari la juĝon per voĉdonado. Nian alvokon sekvis dudek afablaj personoj kaj ni dankas al ili pro la helpo. — Plej multe da voĉoj (po 6 voĉojn) ricevis la jenaj kvin solvoj: **N-ro 1** (solvinto: s-ino **M. Alders-Backers** en Haarlem, Nederlando). — **No. 5** (s-ino **L. O. Jackson** en Seattle, Usono). — **N-ro 17** (s-ro **A. Gerasimov** en Filipovo, Bulgarujo). — **N-ro 49** (s-ino **C. van Bodegom** en Delft, Nederlando). Do al la nomitaj personoj apartenas la premioj 1—5. La sesa premio apartenas al unu el tiuj, kiuj ricevis po 5 voĉojn. La loto favoris la ensendinton de la solvo **N-ro 28** (s-ro **P. Korte** en Vlotho, Germanujo). — En la voĉdonado ricevis voĉojn ankaŭ la sekvantaj solvoj: **Po 5 voĉojn** ricevis la N-roj 21, 22, 28, 30. — **Po 4 voĉojn** ricevis: 8, 14, 19, 42, 53. — **Po 3 voĉojn** ricevis: 2, 4, 6, 23, 34, 39, 45, 50. — **Po 2 voĉojn** ricevis: 10, 12, 27, 36, 37, 47, 51, 54, 55. — **Po 1 voĉon** ricevis: 7, 13, 18, 24, 25, 26, 31, 38, 43 44 48 52.

86-a konkurso. La stranga aventuro de nia samideano Paŭlo Kalva (vidu la bildojn en la 25-a numero sur la 10-a paĝo!) donis inspiron al 39 legantoj de La Praktiko. La konkursa komitato post longa ekzamenado de la versaĵoj decidis doni la 6 premiojn al la jenaj konkursantoj, kiuj ensendis lerte verkitajn solvojn:

S-ro M. Cornet en Tegelen (Nederlando):

1. Struto trovas grandan ovon
Kaj ĝi faras miran movon.
2. Ĝi ne longe pensi povas,
Do sidiĝas kaj ekkovas.
3. Ovo kaŭzas, ho, teruron!
Struto faras nun forkuron.
4. Paŭlo Kalva pugnon faras,
Kun kovita kapo staras!

S-ro Devillers en Douai (Francujo) ensendis tri solvojn, el kiuj per la jena li meritis premion:

1. Ho!
Ovo!
2. Ekkovo!
Patrinrevo!
3. Elreviĝo!
Vekiĝo!
4. Homo!
Ho!!

S-ro inĝ. W. Gostynski en Krakovo (Polujo):

1. Promenante laŭ inklino
En oazo, strutedzino
Trovas ovon. Ho! Trezor!
Patrinece batas kor'.
2. Kovru ĝin per mola brust',
Zorge kovu sub arbust'.
Varma estas la akiro,
Sentas strut-edzin kun miro.
3. Uff! Okazas aĵ' terura:
Pikas, mordas ov' susura.
Savon! Helpu! Ve! Ho ve!
For! Kaj plu neniam re!
4. Kraĉas Paŭlo, pugnas manon
Kaj insultas birdan klanon:
„Stulta in'! Ne ŝovu nazon
Eĉ en strutan fremdan vazon!"

S-ro Sejgi Tameje en Jokohama (Japanujo):

1. Promenante Dam-Strutin'
Ĉarman ovon trovis nun;
Ĝi allogis tuje ŝin,
Ĉe herbej' en brila sun'.
2. Sur la ov' eksidis jam
Dam-Strutin' kun bona kor',
Sed tujege nia Dam'
Ekpafiĝis supren for!
3. Dam-Strutino post moment'
Batfalegis kun kapfrap';
Pentis ŝi, ke sen atent'
Sidis ŝi sur homa kap'.
4. Nia Paŭl' kun ega bru'
Saltis jen el dorma pac';
Ĉar ne povis dormi plu,
Blasfemadis kun grimac'!

S-ro Arthur Thompson en Pudsey apud Leeds (Anglujo):

1. Sinjorino Struto
Trovis blankan ovon;
Diris ŝi ravite:
„Ĝi bezonas kovon!"
2. Zorge ŝi sin pozis,
Kun plenkora fido;
Kriis en ekstazo:
„Venu, ho strutido!"
3. Sed, ho katastrofe!
„Ovo" sin saltigis,
Kompatindan birdon
Tute fortimigis.
4. Jen sinjoro Kalva
Forte ekkoleras;
„Ĉu el MIA kapo
Io AJN aperas?"

S-ro Ch. L. Waldkötter en Leiden (Nederlando):

1. Sur la sablo, sub arbusto
— Estis palmoriĉa lando —
Struta ino vidis ovon,
Kaj por kovi faris movon.
2. Kaj ĝi lokis sin per ventro
Sur la ovon, sen suspekto,
Kaj komencis plenumadon,
Sian inan ovkovadon.
3. Sed subite ĝi ekstaris
Kaj ekflugis, laŭte blekis,
Tre terure timigita
Kaj kruele ĉaspelita.
4. Estis de tutkalva Paŭlo
La tre glata blanka kapo,
Tio, kion ĝi ektrovis
Kaj kun ina am' ekkovis.

Ankaŭ inter la nepremiitaj solvoj troviĝas pluraj rimarkinde bonaj, sed bedaŭrinde mankas la loko por publikigi ilin. — Ni kore gratulas al ĉiuj niaj „poetoj"!

87-a konkurso. En la februara numero de La Praktiko ni publikigis la interesan planon de nia abonanto s-ro A. L. en M., starigi grandiozan monumenton por la memoro de D-ro Zamenhof. Kun plezuro ni konstatas, ke la ideo vekis grandan intereson, ĉar ni ricevis leterojn de 35 personoj, kun solvo de la konkursa tasko. Sed el la 35 solvoj bedaŭrinde nur 20 estas ĝustaj: **sur la memortabulo la nomo „Ludoviko Zamenhof" estas legebla 65,536-foje** (en la maldekstra triangulo 32,678-foje, kaj en la dekstra triangulo same). Nia konkursa komitato dislotis la ses premiojn inter tiuj, kiuj plej bone klarigis la procedon de la kalkulado. La premiojn gajnis: F-ino **M. A. Crispin** en Thorpe Bay (Anglujo). — F-ino **H. F. Haalebos** en Leiden (Nederlando). — S-ro **P. H. Mooij** en Hago. — S-ro **H. Rapaille** en Fourmies (Francujo). — S-ro **M. Thibault** en Revin (Francujo). — F-ino **L. Verhoog** en Leiden (Nederlando).

La ensendintoj de la 14 nepremiitaj bonaj solvoj estas: S-ro **J. Bajema** en Leeuwarden (Nederlando). — S-ro **K. Bledsoe** en Seattle (Usono). — S-ro **L. J. Burger** en Hago, kiu sendis la solvon en versa formo:

De nombrado, kalkulado ĝis ekstremo lacigite,
De l' gigante granda nombro de la solvo konsternite,
Trovas antaŭ sveni mi ankoraŭ tempon por konfes':
Jen problema solvo: 65536.

— S-ro **E. W. v. d. Burgh** en Leiden (Nederlando). — **Gefratoj Fichtner** en Dresden (Germanujo). — S-ro **inĝ. W. Gostynski** en Krakovo (Polujo). — S-ino **M. Jakubcová** en Dolni Lhota (Ĉeĥoslovakio). — S-ro **E. Lipp** en Swietochlowice (Polujo). — S-ro **L. Maas** en Rotterdam (Nederlando). — S-ro **H. N. Nederland** en Kalundborg (Danujo). — S-ro **L. Ollivaud** en Nice (Francujo). — S-ro **G. Peynsaert** en Aalst (Belgujo). — S-ro **L. Ponthir** en Jemeppe-sur-Meuse (Belgujo). — S-ro **E. Susi** en Valga (Estonio). — Ni kore gratulas al ĉiuj solvintoj, kiuj sendube faris grandan laboron.

La malbonaj solvoj indikas la jenajn malĝustajn nombrojn: 4-foje; 17-foje; 32-foje; 33-foje; 272-foje; 328-foje; 956-foje; 2176-foje; pli ol 10,000-foje; 73,216-foje; 601,080,000-foje; 601,080,390-foje.

Ni citas el la leteroj de la konkursantoj kelkajn interesajn frazojn:

„Mi preferas gajni premion, ol vidi mian nomon sur la monumento."

„Mi ne promesas legi la nomon de nia Majstro triomfoje, ĉar la eternigo de mia momo ne kompensus mian freneziĝon."

„Mi devigas min legi la nomon 65,536-foje. Konforme al la belga leĝo, kiu permesas labori dum 8 horoj en la tago, mi bezonos por tiu tasko 2 tagojn, 2 horojn kaj 12 minutojn (= 18 h. 12 min.)."

„De hieraŭ matene je la oka horo ĝis hodiaŭ vespere je la oka horo mi senhalte laŭte legis la nomon LUDOVIKO ZAMENHOF, entute 65,536-foje, ne manĝante, ne trinkante kaj ne dormante. La ses plej gravaj personoj de mia urbo Revin: la urbestro, la parohestro, la lernejestro, la du kuracistoj kaj la notario bonvolis, unu post la alia, dum po ses horoj, fari la kontrolon. En ĉi tiu momento la nomitaj eminentuloj redaktas solenan dokumenton pri mia heroaĵo. Do mi plenumis la kondiĉon kaj mi petas s-ron A. L., ke li gravurigu mian nomon sur la monumentego. M. Thibault."

„Mi petas s-ron A. L. informi min pri la loko de la monumento, ĉar mi deziras viziti ĝin. Mi decidis legi la nomon unufoje ĉiutage. Tio signifas, ke mi finos la legadon en la jaro 2114. F-ino M. A. Crispin."

„Sinjoro A. L., via ideo estas grandioza! Mi admiras vin! Mi fervore komencis kalkuli: Ludoviko Zamenhof. Post unu tago mia tuta familio kalkulis kaj kalkulis, sed ili ĉiuj preskaŭ freneziĝis. Ĵus mi atingis la 662-an fojon, sed mi ne povas plu! Mi esperas, ke vi trovos pli kuraĝajn homojn, por ke vi povu starigi la monumenton!"

„Mi esperas, ke ĉe la inaŭguro de la monumento ĉeestos tiom da personoj, kiomfoje la nomo de la Majstro estas legebla. Ĝi estos grandega propagando por nia lingvo, grandega honoro por Zamenhof kaj meritita sukceso por la nobla stariginto de la unika monumento. Se tiam ĉiu ĉeestanto nur unufoje legos la nomon, ili ĉiuj kune plenumos la kondiĉon de s-ro A. L."

Fine kun ĝojo ni konkludas, ke la plano estas realigebla, ĉar troviĝis promesantoj plenumi la kondiĉon. Ni petas ilin korespondi pri la detaloj de la plenumo rekte kun la aŭtoro de la plano: **s-ro Albert Lienhardt** (12 rue Pougin en Montigny-les-Metz, Moselle, Francujo), al kiu nia redakcio kore gratulas.

ATENTU! **Se vi volas sendi monon al La Praktiko, bonvolu observi la sekvantajn:**

La monon oni povas sendi per *poŝtĉekkonto* (Wien A-156933, Praha 500362, Kopenhago 34941, Berlin 129527, Budapest 13201, Zagreb 41345, Riga 4870, Den Haag 162626, Warszawa 190203, Stockholm 74126, Bern III. 6761), *per poŝtmandato*, per *bankĉeko* aŭ per *papermono* en letero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj de la sube nomitaj landoj, kalkulante la valoron laŭ la suba tabelo:

1.— ned. guldeno valoras en:

Aŭstrio 3.70 ŝil., **Belgujo** 15 fr., **Britujo** 2 ŝil. 8 p., **Bulgarujo** 58 lev., **Ĉeĥoslovakujo** 17 kr., **Danujo** 3 kr., **Estonio** 2.60 kr., **Francujo** 10.35 fr., **Germanujo** 1.85 m., **Hispanujo** 5 pes., **Hungarujo** 3.30 p., **Italujo** 8 lir., **Jugoslavio** 30 din., **Latvujo** 2.20 l., **Norvegujo** 2.70 kr., **Polujo** 3.70 zl., **Rumanujo** 75 l., **Svedujo** 2.60 kr., **Svisujo** 2.10 fr.

Pro la freneza dancado de la mon-valoroj ĉi tiu tabelo validas nur ĝis la apero de nia sekvanta numero.

La sendo de poŝtmarkoj en letero okazas je la risko de la sendanto. Tial estas konsilinde uzi netravideblan koverton kaj ĉe pli granda sumo registrigi la leteron.

ATENTU!

(Daŭrigo)

74. Aritmetiko. Matematiko.

La du vortoj estas nomoj de du parencaj sciencoj.
Matematiko = la scienco pri la kvantoj kaj grandecoj.
Aritmetiko = la scienco pri la nombroj. Do la aritmetiko estas parto de la matematiko.

75. Arko. Arkeo.

Arko = kurba linio, parto de la cirklo. (Ekz-e: ĉielarko, triumfarko, triumfa arko k.t.p.)
Arkeo = la ŝipo de Noa dum la diluvo.

76. Aroganta. Impertinenta.

La du vortoj signifas abomenajn ecojn de bedaŭrinde multaj homoj. Jen la diferenco inter la du vortoj:
Impertinenta estas tiu, kiu malĝentile kaj maldece kondutas al persono, kiun li devas respekti.
Aroganta estas tiu, kiu elmontras malĝentilan kaj ofendan rantecon.

77. Aromo. Gusto. Odoro.

La diferenco inter la nomitaj aferoj estas, ke:
1. la **odoro** estas sentata per la nazo;
2. la **gusto** estas sentata per la lango;
3. la **aromo** estas sentata per ambaŭ organoj, per la nazo kaj per la lango.

NOTO. La odoro kaj la gusto povas esti bonaj aŭ malbonaj. Sed la aromo estas nur bona, delikata.

78. Arterio. Vejno.

Ambaŭ vortoj signifas sango-kanalojn („sango-vazojn" aŭ „sango-tubojn") en la homa kaj besta korpo. La diferenco estas la jena:
La arterioj kondukas la ruĝan, freŝan sangon el la koro al la diversaj partoj de la korpo.
La vejnoj rekondukas la bluan, lacan sangon al la koro.

79. Artifiko. Mistifiko.

Atentu, ne konfuzu ĉi tiujn vortojn, ĉar estas diferenco inter ili:
Artifiko = arte lerta farmaniero, ekz-e la agado de la ĵongloisto.
Mistifiko = ŝerca trompado al kredema homo.
La artifiko povas esti uzata kiel mistifikilo. Sed la artifiko havas ankaŭ malhonestan specon, kiel trompa ruzaĵo, ekz-e ĉe advokatoj.

(Daŭrigota)

LERNU PER LA ERAROJ!

En ĉi tiu rubriko ni citas erarajn frazojn, kiujn ni trovis en diversaj libroj, gazetoj kaj aliaj presaĵoj. Ni deziras fari per tio utilan servon al niaj legantoj kaj al niaj — verkistoj.

Ni sciigas al vi la ricevon de via mendilo kaj de via deponaĵo. — Anstataŭ la vorto „deponaĵo" estas preferinde uzi ĉi tie: „antaŭpago".

Vin dankante pri la al ni donita ordono ni salutas vin. — Ĉi tiu frazo korekte kaj elegante sonas: „Dankante pro via mendo ni salutas vin."

Fraŭlino M. J. geedziĝis kun sinjoro K. S. — En ĉi tiu frazo la vorto „geedziĝis" estas malbona, tre malbona. Laŭ la logiko la viro edziĝas (= fariĝas edzo) kaj la virino edziniĝas (= fariĝas edzino). La du personoj kune geedziĝas (= fariĝas geedzoj). Unu persono ne povas geedziĝi, sed nur edziĝi aŭ edziniĝi. La korekta formo estas do: „Fraŭlino M. J. edziniĝis".

La kronprinco enamiĝis en amerika aktorino. — Ĉi tie la prepozicio „en" estas maltaŭga. Evidente la skribinto ne komprenas bone la vorton „enamiĝi". Ĝi signifas: „fali en amon". Sekve la ĝusta esprimo estas: „enamiĝis al aktorino".

Anjo revenis de ĉe dentisto kun sia frateto. — La vorto „ĉe" en ĉi tiu frazo estas superflua. Korekte: „revenis de dentisto".

La rustigita seruro ekgrincis. — La vorto „rustigita" ne taŭgas ĉi tie, ĉar ĝi signifas, ke oni intence rustigis la seruron. Sed ordinare la seruroj rustiĝas. Do la ĝusta esprimo estas: „rustiĝinta".

Mi ricevis gratulesprimojn okaze de mia elekto kiel sekretarion. — Korekte: „kiel sekretario".

Ni ne ŝatas voĉdoni pri aranĝoj, kies celo aŭ kialo ni ne plene komprenas. — Laŭ la gramatiko de Esperanto devas esti: „kies celon aŭ kialon".

Kia valoro havas tia referendumo? — Devas esti: „kian valoron".

Ni preferas lekturon de nuntempaj verkistoj. — La vorto „lekturo" ne apartenas al la vortaro de nia lingvo. La ĝusta Esperanta vorto estas: „legaĵo". Ni devas eviti superfluajn novajn vortojn. Precipe en porinfana gazeto.

Ĉiu membro rajtos aĉeti librojn per rabato de 40 %. — En ĉi tiu frazo la prepozicio „per" ne estas ĝusta. Oni devas diri: „kun rabato". La libron oni aĉetas ne per la rabato, sed per la mono.

En la brita militŝiparo estas 90 pastroj. Ili estas tre bone salajritaj. — En ĉi tiu frazo la lasta vorto devas esti: „salajrataj", ĉar la salajrado estas konstante daŭranta.

!! DONACO !!

La konata nederlanda **eldonejo JOH. YKEMA en Hago,** kiu eldonis plurajn Esperantajn librojn, prezentas al la legantaro de La Praktiko la jenan proponon:

Ĉiu persono, kiu aĉetas unu ekzempleron (binditan aŭ broŝuritan) de la bela libro:

LA VILA MANO

originala romano de H. J. Bulthuis
(membro de la Lingva Komitato),

RICEVOS DONACE 5 LOTOJN
DE LA LIBRO-LOTERIO DE LA PRAKTIKO.

LA VILA MANO estas interesa romano en bonega stilo, rekomendata al ekzamen-kandidatoj en Nederlando. Ĝi ampleksas pli ol 300 paĝojn kaj estas ilustrita per belaj plum-desegnoj de la nederlanda artisto Tjeerd Bottema.

Prezo: broŝurita 2.75 guld.
bindita 3.25 guld.

Sendu la mendon kaj monon al:
Int. Cseh-Instituto de Esp., Riouwstraat 172
DEN HAAG, Nederlando.

AL LA VENKO !

PETO. **Kara leganto! Bonvolu ĉi tiujn gravajn informojn traduki en vian nacian lingvon kaj transdoni ilin al la redakcioj de la ĵurnaloj en via urbo, por publikigo. Per tio vi faras por Esperanto tre valoran propagandan servon.**

288. **La 26-a Universala Kongreso de Esperanto** kun granda sukceso okazis en Stockholm, dum la 4—11 de Aŭgusto, sub la prezido de s-ro rektoro S. Jansson kaj s-ro advokato T. Julin. La prezidanto de la honora komitato, konsistanta el la ĉefaj gravuloj de Svedujo, estis la sveda princo Karlo. En la kongreso partoprenis pli ol dumil personoj el 35 landoj kaj estis reprezentataj 16 registaroj. Per la vivplenaj kunsidoj, teatraj prezentadoj, somera universitato, fakaj kunsidoj kaj amuzaj aranĝoj la kongreso donis novan elokventan pruvon pri la perfekta taŭgeco de Esperanto sur ĉiu kampo de la internacia vivo, kaj ankaŭ pri la grava progresado kaj konstanta fortiĝo de la Esperanto-movado, malgraŭ la kreskantaj ekonomiaj kaj politikaj malfacilaĵoj. La proksima Esperanto-kongreso okazos en Romo (en Aŭgusto 1935) kaj la sekvonta en Vieno (1936).

289. **Esperanto-lingva prospekto kaj urboplano pri Hago.** — La „Haga Unuiĝo por Fremdultrafiko" ĵus eldonis plurkolore presitan planon pri la nederlanda rezidenca urbo Hago, kun riĉa informaro Esperantlingva pri la vidindaĵoj de la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. — *(La prospekto estas senpage ricevebla ĉe la eldoninta unuiĝo. Adreso: Lange Vorhout 102, Den Haag.)*

290. **Esperanto ĉe la elektrotekniko.** — La kunveno de la Nomenklatura Sekcio de la Internacia Elektroteknika Komisiono, kunveninta en Parizo dum la 25—30 de Junio, decidis eldoni fakan vortaron pri elektrotekniko en Esperanto. En la diskutado pri la propono partoprenis sinjoroj Lombardi (prezidanto), Janet, Brylinski, Morillo kaj Van de Well, ĉiuj favore al Esperanto.

291. **Reĝo kiel honora prezidanto de Esperantista societo.** — La belga reĝo Leopoldo 3-a estas honora prezidanto de la Belga Esperantista Ligo. Li estis honora prezidanto de la Ligo jam antaŭe, kiel duko de Brabanto. Post la okupo de la reĝa trono per letero li sciigis la Ligon, ke li daŭrigas la apogon al Esperanto, restante plue, ankaŭ kiel regnestro, honora prezidanto.

292. **Esperante parolanta filmo.** — Dum la ĵus okazinta universala Esperanto-kongreso en Stockholm oni prezentis la sonfilmon „Morgaŭ ni komencos la vivon". La filmo estis fabrikata originale en germana lingvo kaj poste oni aldonis la Esperanto-lingvan parolon, sub la gvidado de la film-verkisto Jean Forge. Ĉi tiu filmo estas la unua kompleta Esperanto-lingva sonfilmo. La prezentado de la bonega filmo havis grandan sukceson kaj ĝi sendube sukcesplene tramigros la tutan mondon. Oni intencas fondi akcian societon por produkti pluajn Esperantajn sonfilmojn kaj disvastigi ilin tra la tuta mondo, precipe en landoj de malgrandaj lingvoj.

293. **Esperanto oficiala lingvo en Budaista kongreso.** — La Dua Kongreso de Tutpacifikaj Junularaj Budaistaj Asocioj, okazinta dum la 18—24 de Julio nunjara en la japanaj urboj Tokio, Kioto kaj Osaka, akceptis Esperanton kiel oficialan kongreslingvon, flanke de la lingvoj japana, ĉina kaj angla. En la kongreso partoprenis 644 personoj el Japanujo, Ĉinujo, Mongolujo, Usono kaj Hindujo.

294. **Universala kongreso de laboristaj Esperantistoj.** — La 14-a universala kongreso de laboristaj Esperantistoj kaj de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) okazis dum la unua semajno de Aŭgusto en la urbo Valencia (Hispanujo), sub la prezido de s-roj Azorin (Cordoba), Bout (Rotterdam) kaj Olson (Stockholm). Partoprenis 376 kongresanoj el 13 landoj. Krom la solena malferma kunsido, okazinta en la Universitato, kaj pluraj laborkunsidoj funkciis ankaŭ „Laborista Altlernejo" kun prelegoj de diversnaciaj fakuloj. La urbestraro aranĝis por la kongresanoj solenan akcepton en la urbodomo.

295. **Esperanto en la brita Bankista Almanako.** — En la oficiala eldonaĵo „Bankers' Almanac & Year Book" troviĝas tabelo de la numeraloj kaj komercaj esprimoj en 11 diversaj lingvoj. En dua loko, post la angla lingvo, estas presita la Esperanto-kolono. *(La tabelo komenciĝas sur la 2230-a paĝo de la libro, kiu estas uzata de ĉiuj bankistoj.)*

296. **Zamenhof-strato en Valencia.** — En la urbo Valencia (Hispanujo) la urbestraro nomis unu straton je D-ro Zamenhof, aŭtoro de Esperanto. La solena inaŭguro de la stratnomo okazis la 5-an de Aŭgusto en la kadro de la 14-a universala kongreso de laboristaj Esperantistoj.

297. **Kafejo „LA ESPERO" en Hago.** — En la urbo Hago (Nederlando) malfermiĝis nova kafejo, kies nomo estas „La Espero", kaj kies mastrino komprenas Esperanton. La adreso de la kafejo estas: Fahrenheitstraat 271.

298. **Hindoĉina gazeto kun Esperanto-rubriko.** — La franclingva gazeto *L'Annam Nouveau*, aperanta duonsemajne en Hanoi, depost Majo 1934 enhavas regulan Esperanto-rubrikon en ĉiu numero. — *(La gazeto jam aperigis en la jaro 1932 Esperanto-kurson en 10 lecionoj. La novan rubrikon gvidas nia fervora propagandisto s-ro N. Nhân, sub kaŝnomo „S-ano Homo".)*

La portebla

TORPEDO

skribmaŝino

estas juvelo inter la skribmaŝinoj.

Liverata ankaŭ kun Esperanto-klavaro.

Petu sendevigan demonstracion!

Importisto por Nederlando:

OSCAR MARKX, Nic. Maesstraat 97, Amsterdam-Z.

Telefono: 22059.

Novaĵo!

GRAMOFONA DISKO

kun la plej ŝatataj Esperantaj kantoj:

LA ESPERO kaj LA TAGIĜO

belega kanto de la sveda operetkantisto Gösta Kjellertz kun akompano de orkestro.

Aĉetebla ĉe LA PRAKTIKO.

Prezo: 2.— ned. guld.

la mondo ridas

Patra admono.

— Paĉjo, Henriko hodiaŭ deklaris, ke mi estas tre interesa kaj bela knabino!

— Kaj vi volas pasigi la vivon kun tia viro, kiu jam nun komencas mensogi al vi?

(Nebelspalter)

Faka kono.

— Terura knabo vi estas, Karlo! Jam la dekan fojon mi alparolas vin, kaj vi tute ne reagas. Kio fariĝos el vi, se vi ne ŝanĝiĝos?

— Kelnero!

(London Opinion)

Nedetruebla ilo.

— Jes, sinjoro, ĉi tiu hakilo estas jam pli ol sepdek-jara. Ankoraŭ mia avo komencis labori per ĝi. De tiu tempo ni senĉese uzas ĝin.

— Neeble! Dum tiel longa tempo ĝi ne povis resti en tiel bona stato. Ĝi ja aspektas kiel nova!

— Nu jes, ni ŝanĝis kvarfoje ĝian tenilon kaj trifoje ĝian feron, sed ĝi estas ankoraŭ tamen tiu bonega malnova hakilo, kiun mia avo aĉetis en la foiro.

(Tit Bits)

Familia sceno.

Bopatro: Estas nekomprenebla, ke vi ne povas vivi en harmonio kun mia filino. Ŝi ja konstante klopodas eltrovi ĉiun vian deziron.

Bofilo: Jes, vere, sed kiam ŝi eltrovis, ŝi tuj faras precize la malon!

(Aftenposten)

Spiritismo.

Ĉefo: Diru al mi, Johano, ĉu vi kredas en la spiritoj?

Kontoristo: Ne, sinjoro ĉefo, mi tute ne kredas!

Ĉefo: Do tiam kiel vi povas klarigi al mi, ke hieraŭ serĉis vin ĉi tie via onklo, kaj vi en la sama tempo estis ĉe lia enterigo?

(Life)

Bona konservado.

— Mi aŭdis, ke dum via eksterlanda vojaĝo vi renkontis nian amikinon Lil. Ĉu ŝi konservis sian brilan figuron?

— Kion signifas konservi? Ŝi duobligis ĝin!

(Die Woche)

Preparaj ekzercoj.

— Sed Roberto, kiel mi povu fidi en via promeso, ĉar vi ja al multaj knabinoj promesis jam edziĝon?

— Kredu, Manjo, ke tiam mi faris nur preparajn ekzercojn por peti vian manon.

(Tatler)

Fiereco.

— Mia filo estas denove hejme. El la kvarmonata malliberigo oni cedis al li du monatojn, ĉar li tre bone kondutis en la karcero.

— Vidu, najbarino, mi ĉiam diris, ke vi povas esti fiera je via filo, tiel bona knabo li estas.

(Politiken)

Praktikaj knabinoj.

— Sankta Dio! Kio okazis al miaj ĉapeloj?

(Lustige Blätter)

Bestamiko.

— Ĉu vi amas la bestojn, sinjoro Majer?

— Treege! Precipe la kankrojn, ostrojn kaj la rostitajn kokidojn.

(Kasper)

Reala kalkulo.

Unua edzo: Mia edzino estas vera anĝelo! Imagu, hieraŭ vespere, kiam mi lacege hejmenvenis, jam estis preparita mia apogseĝo ĉe la forno, tie estis la vespera gazeto kaj eĉ unu kruĉo da freŝa biero!

Dua edzo: Kaj kiom kostis ŝia nova pelto?

(Interessante Blatt)

En restoracio.

— Kelnero, jam de duona horo mi atendas la menditan rostaĵon!

— Jes, mi scias, sinjoro! Se ĉiu gasto estus tiel pacienca, kiel vi, nia profesio estus paradizo...

(The Humorist)

Kapturniĝo.

— Sed Anjo, kiel vi povis lasi, ke la kamenpurigisto kisu vin?

— Vere, sinjorino, ankaŭ mi mem ne scias tion, sed en unu momento ĉio fariĝis nigra antaŭ miaj okuloj.

(Judge)

En la lernejo.

Instruisto: Kiel vi kuraĝas ridi pri mi, sentaŭguloj?

Lernantoj: Ni ne ridas pri vi.

Instruisto: Nu, mi ne scias, ke estas alia ridindaĵo ĉi tie.

GAJA LERNOLIBRO
120 gajaj bildoj
Kurso en amuza maniero
RM 1.75 aŭ 7 poŝtaj respondkuponoj

GAJAJ VESPEROJ
amuza kaj interesa enhavo
gajaj kaj instruaj grupkunvenoj
RM 1.— aŭ 4 poŝtaj respondkuponoj

GAJAJ HOROJ
spritaĵoj — enigmoj — gajaj preseraroj k.t.p.
RM 0.50 aŭ 2 poŝtaj respondkuponoj

Ĉiu poŝtoficejo vendas respondkuponojn. — 1 respondkupono = afranko de eksterlanda letero.

Mendu ĉe: C. WALTER, Hohenzollernstrasse 11, Berlin W. 10 (Germanujo).
Poŝtĉeko: Berlin 85766

„FLORETOJ"

PORINFANAJ RAKONTOJ TRADUKITAJ DE LA „VENDREDA KLUBO" EN WINSCHOTEN (Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj bildoj de C. Jetses
Prezo ..... *0.70 ned. guld.*

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la eldonisto:
J. B. WOLTERS
Groningen — Den Haag — Batavia.

La parolado de D-ro Edmond Privat al la Stokholma Kongreso.

Karaj kongresanoj!

Kun vi per la sento kaj momente ankaŭ per la voĉo mi plej kore salutas vin ĉiujn, el Ĝenevo, la sidejo de l' Universala Esperanto-Asocio.

Samtempe mi salutas tiun neforgeseblan Svedujon, kiu vin gastigas hodiaŭ, kaj la reĝinon de la nordaj urboj: Stockholm la belegan.

Nenie pli taŭge vi povus ja kunveni ol en tiu mirinda ĉefurbo de libera popolo, kiu fiere klopodas plialtigi kaj pliprofundigi sian spiritan edukon, dum ĝi progresigas la materian teknikon. Ĝuste tiuj atingas la plej altan gradon de civilizo, kiuj scias konservi tian ekvilibron kaj ne permesi, ke la homaj eltrovaĵoj formanĝu la homon mem, sed male, ke ili submetiĝu kaj nur servu al lia feliĉo.

Kiu konas ne nur la svedan industrion en la grandaj fabrikoj, sed ankaŭ la svedajn hejmojn kun la bluokulaj patrinoj, teksantaj la doman ŝtofon apud la blonda bubo en lulilo, tiu sentas ke ilia nacio ja ŝatas la komforton de moderna civilizo kaj la oportunaĵojn de materia tekniko, sed ke ĝi ne vendus pro tio sian animon kaj scius ankaŭ sen tio savi kaj daŭrigi sian intiman feliĉon.

Facile estas vidi, kiom la svedoj respektas la homan dignecon sub ĉiuj laborvestoj kaj kiel ili konstante klopodas plibonigi sian ekonomian organizon por faciligi la vivon al ĉiuj familioj, ne nur per la kooperativa fruktokorbo de la dommastrino, sed ankaŭ per la instruaj volumoj de la popola librejo kaj per la kajeroj de la vesperkursoj.

Inter la fremdaj lingvoj instruataj en tiuj kursoj, Esperanto jam de kelkaj jaroj atingis tre gravan lokon, ĉe ofte la unuan pro ĝia rilata granda facileco kaj reguleco. Per ĝi multaj svedoj lernis ekkoni iom de niaj diversaj kulturoj kaj rapide komprenis ĝuste tion, kio karakterizas la rolon de internacia helpa lingvo.

La grandaj nacilingvoj allogas la eksterulojn pro neceso profesia aŭ pro la deziro ekkoni tiujn potencajn kulturojn, kiujn ili reprezentas. Sed kiel ekscii ankaŭ ion pri tiaj multaj nacioj, kies lingvo ne estas eksterlande tiom konata kaj lernata? Oni kutimas ilin nomi malgrandaj, sed iuj el ili estas tre gradaj, ekzemple la ĉina aŭ pola, kaj ili kune formas la plimulton de la homaro.

Svedujo estas ekzemplo de tre alta kulturo, kiun la homaro ne povus ignori sen grava perdo valora por la komuna tuto. Necesa kordo por la kanto de la harpo! Nu, Esperanto ĝis nun tute nature kaj ĉiam pli videble servas kiel perilo kaj konigilo de tiaj kulturoj kaj trovis en ĉiuj tiaj nacioj kreskantan nombron de adeptoj. La plej talentaj el ili tradukis en la helpan lingvon la plej belajn verkojn de sia hejma literaturo. Floras ĉe la esperantistaro antologioj katalunaj, flandraj, polaj, hungaraj, kroataj kaj bonegaj tradukaĵoj el finna, estona, litova, bulgara, japana aŭ ĉeha lingvoj.

Estis ĉiam specialaĵo de niaj universalaj kongresoj, prezenti ne nur impresan ekzemplon de internacia kunveno kun lingva unueco kaj egaleco, sed ankaŭ scivoleman pilgrimadon en la folkloron de tiu aŭ alia nacio, konservinta sian ĉarman tradicion kaj koloron en propraj kutimoj, en popolarto, en popolkantoj kaj vilaĝaj kostumoj.

Kiu ĉeestis plurajn Esperanto-kongresojn, tiu povis konstati ĉiam la du regantajn entuziasmojn de la partoprenantoj: unuflanke la ĝojon senti sin egalaj en kompreno kaj en uzo de unu sola helplingvo, donanta al la kunveno la econ de familia renkonto for de ĉiu lingva baro, ĝeno, supereco aŭ malsupereco; kaj aliflanke la plezuron ekkoni pli proksime unu novan membron de la homa familio, unu plian popolon por ŝati kaj admiri, eĉ por ami en ĝia malkovrita intimeco kaj amika gastigado.

Tiu rimarkinda intereso pri naciaj kutimoj de ceteraj nacioj, tiu scivolemo pri ilia vivo kaj popolarto ĉiam estis disvastigata per Esperanto samtempe kun la kompreno pri homara unueco kaj solidareco, tiu beninda sento, kiu nature kunflugas sur flugiloj de internacia lingvo.

Sed tiu sento pri unueco ĉiam sin ligis kun la ŝato al diverseco. Neniam ĝi similis al unuigo detrua kaj frostiga, kiu fortranĉus per maŝina falĉilo ĉiujn florojn de la kampo por atingi severe tonditan kaj unuforme razitan ebenaĵon.

Ĉar la internacia lingvo ĉiam fidele kreskis en sia rolo helpa, neniam anstataŭa, ĝi profitis el la trezoroj ĉie malfermitaj al ĝi, kiel profitas abeloj el la diversaj floroj por sia bonodora mielo. Esperanto ne malriĉigis siajn lernintojn, sed riĉigis ilin per amika ŝlosilo por malfermi multajn korojn kaj kompreni la valoron de ĉiuj, eĉ plej malgrandaj, naciaj kulturoj.

En nia tempo, la nacioj emas aserti sian rajton kaj fieri pri la propra personeco kaj tradicio. Tip estas natura fenomeno post epoko de subigoj aŭ malegalaĵoj. Nura danĝero estas, ke ĉiu aŭdu nur sin mem kaj ne komprenu, ke sama fiero kaj sama vivovolo estas egale naturaj ĉe la najbaro.

Aldoni la komprenan modon al la aserta modo, jen la speciala rolo kaj tradicio de la helpa lingvo, kreskinta sur la bazo semita antaŭ duoncentjaro de klarvida geniulo.

Kompreni la senton de la ceteraj, tio estas komenco de amikeco. Kiu spertis tion en egaleco lingva kaj facileco komunika, tiu ekhavos por sia popolo pli altan ambicion ol nuran fierecon pri si mem, li volos ke ĝi fariĝu io pli solida ol nacio timata; li volos, ke ĝi estu amata membro de la homara familio. Tion oni atingas ne per vanteco aŭ fanfarono, sed per servigo de siaj propraj ecoj kaj valoroj al la bono kaj harmonio de la tuta familio.

Unueco en diverseco kaj diverseco en unueco, tio estas la spirito disvastigata de modesta lingvo kun modesta rolo, sed kun jam profunda sperto. Vivante sub ĝia stelo dum unu semajno, vi similas al homoj starantaj sur monto ĝuste sub blua spaceto de l' ĉielo aliloke kovrata de minacaj nuboj.

Foje la montaranoj supreniras eĉ pli alten kaj la maro de nuboj fermiĝas sub ili. Rigardante malantaŭen kaj malsupren, ili vidas sub si la grizan oceanon kaj ridas je ĝia minaco.

Morgaŭ vi ĉiuj reiros hejmen, kiel la montarano reiras malsupren en la valon, kaj retroviĝas sub la griza ĉielo kun minacantaj nuboj. Tiam ne forgesu la spertojn de tiu ĉi semajno! Memoru, ke super tondraj nuboj estas ebleco de blua ĉielo!

Fine la homoj faras mem grandparte sian sorton kaj blovigas mem la ventojn, kiuj kovras aŭ purigas ilian ĉielon. Se vi spertis, ke la disvastiĝo de Esperanto kiel helpa lingvo blovigas freŝan kaj utilan venton de bonvolo kaj kompreno, tiam ebligu aliajn homojn partopreni la saman ĝojon kaj kune prepari la novan estontecon. Ne lasu vin subpremi de pezaj atmosferoj! Post mallumo venas lumo, post ventego venas bela ĉielo. Post ĵaluzo venos klarigo. Post suspekto — kunlaboro.

Vi plendas, ke iaj sciencistoj laboras por pretigi plej modernajn ilojn de mortigo kaj detruo; sed vi mem ja posedas admirindan ilon de kompreno kaj konstruo. Konkurencu do la malbonon per la bono kaj tenu la vivigan ilon eĉ pli preta ol la mortigajn! Vivu Esperanto, kreanto de unueco kaj savanto de diverseco!

NOVAJ LIBROJ

ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO, Volumo I., A—J. Redaktis L. Kökény kaj V. Bleier, la lingvo-fakon: K. Kalocsay. Iniciatinto-ĉefredaktoro. I. Sirjaev †. Kunlaborantoj entute 107 konataj Esperantistoj el ĉiuj tendencoj de la movado. Sur 272 dense presitaj tekstopaĝoj preskaŭ 1100 titolvortoj kaj sur 112 bildopaĝoj preskaŭ 300 bildoj. Formato 23 × 15 cm. Presita sur senligna papero. Prezo kun la baldaŭ aperonta dua volumo, kiu enhavos proksimume 350 teksto- kaj 160 bildpaĝojn, broŝ. 30.— sv.fr., bind. 34.— sv.fr. plus 10 % por sendkostoj. Pagebla en du partoj. Eldonis Literatura Mondo en Budapest, Hungarujo, Mester-u. 53.V.5. La du volumoj kune estas la sesa verko de AELA por 1933. — La Esperantistaro rajtas festi, ĉar fine ĝi posedas la verkon, kies aperon la Esperantistoj de ĉiuj tempoj arde deziris, kaj pro kies manko multaj propagandistoj de nia lingvo suferis. Trafoliumante la dikan volumon oni admiras la diligentan kaj lertan laboron, kiu produktis ĉi tiun riĉan trezoron de informoj pri ĉiu flanko kaj detalo de nia movado. Koncizaj, sed enhavriĉaj artikoloj informas nin pri ĉiu iom grava persono de nia movado, pri la Esperantistaj organizaĵoj, eldonaĵoj, eĉ pri la pli gravaj lingvaj aferoj kaj okazaĵoj. Speciale interesaj kaj valoraj estas la historiaj artikoloj pri la movado en la apartaj landoj, pri la kongresoj, insigno k.t.p. La libro estas ankaŭ impona dokumento kaj pruvo pri la forteco de nia movado. La tutmonda Esperantistaro ŝuldas profundan dankon al la meritplenaj redaktantoj kaj eldonejo, kaj certe elmontros sian dankon per grandnombra aĉetado. La Enciklopedio devas esti trovebla en la biblioteko de ĉiu Esperanto-klubo kaj de ĉiu serioza samideano. — La Enciklopedio estas mendebla ankaŭ ĉe La Praktiko.

Paul Gille: SKIZO PRI FILOZOFIO DE LA HOMA DIGNO. El la franca originalo tradukis E. Lanti. Kun antaŭparolo de la tradukinto. 148 paĝoj. Formato 13 × 19 cm. Prezo: kartonita 12 fr. fr., bindita 17 fr. fr. Eldonis: SAT, 67 avenue Gambetta, Paris-20. — Bonege tradukita interesa studo de la eminenta aŭtoro P. Gille, profesoro ĉe la Belga Instituto por Altaj Studoj. La apero de ĉi tiu serioza verko estas aplaŭdinda gajno por nia literaturo. — Aĉetebla ankaŭ ĉe La Praktiko. Prezoj: kart. 1.35, bind. 1.90 guld.

Stellan Engholm: INFANOJ EN TORENTO. Skizo. Originale en Esperanto. 114 paĝoj. Formato 13 × 19½ cm. Prezo: broŝ. 2 sv.fr., bind. 3.50 sv.fr. plus 10 % por sendkostoj. Eldonis: Literatura Mondo en Budapest. — La konata aŭtoro de la libro „Al Torento" donas en ĉi tiu novelo legindan priskribon de la vivo de infanoj en industriaj urboj en proleta medio. La lingve unuaranga kaj belaspekta libro estas la kvara verko de AELA por 1934. — Aĉetebla ĉe La Praktiko, prezo kun sendkosto 1.10 resp. 1.95 guld.

A. Isbah: KUN PAFILO KAJ LIBRO. El la kvara kompletigita ruslingva eldono tradukis V. Zamjatin. Antaŭparolo de Felikso Kon. Formato 13 × 17 cm. 266 paĝoj. Prezo 1.25 guld. Eldonis: EKRELO en Amsterdam (Postbus Z.5.), por la Sovjet-Unio: CK de SEU en Moskvo 1, Spiridonovka 15. — La dika volumo en realaj koloroj pentras la vivon de sovjeta ruĝarmeano. Interesa legaĵo por tiuj, kiuj deziras koni la situacion en la postmilita Rusujo. — Mendebla ĉe La Praktiko. prezo kun sendkosto 1.40 guld.

Viktoro Rákosi: FOR LA VIANDON! El la hungara lingvo tradukis Ladislao Spierer. 46 paĝoj. Eldonis: A. Prazák en Jablonné n. Orl. (Ĉeĥoslovakujo). Prezo: 5 ĉ. kr. aŭ 2 respondkuponoj. — La libreto enhavas kvin bonhumorajn rakontojn de la fama hungara humoristo, en lerta traduko.

Jakob Rosenberg: MULTIPLIKA TABELARO. Ĉi tiu dukolore presita kaj bele tolbindita libreto entenas la multiplikajn tabelojn de 2-oble 1 ĝis 150-oble 100. Per la uzado de la libreto oni povas eviti la lacigan kalkuladon. La kompilinto kaj eldoninto de la libreto estas nia konata estona propagandisto, s-ro J. Rosenberg (Hollandi tänav 11-4, Tallinn, Estonio), kiu ĝis nun eldonis jam naŭ Esperanto-librojn. La prezo de la Multiplika Tabelaro estas: 1.20 sv.fr.

DANKON diras la Esperanto-Domo en Arnhem al la **partoprenintoj de la internacia perfektiga kurso,** kiuj donacis sonorilon por la kurs-salono kaj 12 guldenojn por la bezonaĵoj de la Esperanto-Domo; al **s-ro J. B. B. Dufrenne,** kiu donacis al la biblioteko ekzempleron de sia verko „De PTT-Esperantist"; al **s-ro S. Grenkamp,** tiu donacis al la biblioteko ekzempleron de sia verko „Pola Folkloro kaj Popolkanto".

LA DUDEK-SESA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN STOKHOLMO

Ĉi tiu impona bildo montras la grandan anaron de nia nunjara mondfesto, okazinta dum la 4—11 de Aŭgusto en la belega ĉefurbo de Svedujo. Dumil gesamideanoj el ĉiuj partoj de la mondo kunvenis, por atesti tion, ke la granda ideo de D-ro Zamenhof plenumiĝis: sur la neŭtrala lingva fundamento la popoloj jam faras la rondon familian.

Stokholmo preparis al la mondpopolo indan akcepton. La urbo estis ornamita per verdstelaj flagoj, la kunvenoj okazis en la plej imponaj konstruaĵoj: la parlamentejo kaj la grandioza Koncerta Domo, la urbestraro akceptis kaj regalis la kongresanojn en la mondfama urbodomo. Esperante parolantaj policistoj, tramistoj, bankoficistoj, poŝtistoj, kelneroj k.t.p. faciligis kaj agrabligis la restadon en la kongresa urbo.

La solena malferma kunsido, kiu plenigis la salonegon de la Koncerta Domo, estis grandioza manifesto pri la grandeco kaj forteco de nia movado. La ĉefguberniestro de Stokholmo, s-ro Torsten Nothin, per varmaj vortoj bonvenigis la kongresanojn kaj esprimis respekton al la laboro de la Esperantistaro. Poŝt la malferma parolado de la honora prezidanto, s-ro rektoro S. Jansson, entuziasmigan surprizon faris al la kongresanoj la belega parolado de la plej eminenta Esperanta oratoro D-ro Edmond Privat, kiu el la svisa urbo Lausanne per radio faris sian tradician kongresan paroladon.

Dum la kongresa semajno riĉa programo donis okazon al la diversflanka uzado de nia internacia lingvo. En la interkonatiĝa vespero oni povis revidi malnovajn amikojn, persone interkonatiĝi kun korespond-amikoj, paroli kun samideanoj el la plej malproksimaj landoj, k.t.p. Dimanĉe matene oni povis aŭdi nian lingvon en preĝejoj kaj ankaŭ la Somera Universitato donis pruvon pri la vivo kaj taŭgeco de nia lingvo, kiam Prof. Migliorini el Romo, Prof. Collinson el Liverpulo, Prof. Musella el Napolo kaj aliaj scienculoj faris interesajn prelegojn. En la Fakaj Kunsidoj la anoj de diversaj organizaĵoj (instruistoj, poŝtistoj, vegetaranoj, junuloj. bahaanoj k.t.p.) priparolis la uzadon de Esperanto kaj la farotan propagandon.

La laborkunsidoj sub la prezido de s-ro T. Julin, s-ro E. Stettler kaj generalo Bastien, per ofte ekscitaj diskutoj, donis la bildon de vera vivo. Grava ŝanĝo okazis: oni forigis la ĝisnunan estraron de UEA kaj elektis novan, kiu intencas labori en „nova spirito".

Internacia balo, teatra prezentado, literatura vespero, Esperant-lingva sonfilmo kaj multaj belaj ekskursoj (Uppsala, Saltsjöbaden, Laplando k.t.p.) amuzis kaj plezurigis la kongresanojn, kiuj forlasis Stokholmon kun la plej belaj memoroj pri modele organizita kaj grandsukcesa kongreso.



Bildoj pri la Stokholma Kongreso. — 1. La kongresa ŝipo de la nederlandanoj kaj francoj, dum la veturo al Stokholmo. — 2. Oni ludas sur la ferdeko. — 3. S-ro C. Jacobs el Heemstede faras sur la ŝipo Esperanto-lecionon. — 4. La prezida tablo kaj la oficialaj delegitoj dum la solena malferma kunsido, en la Urba Koncerta Domo. — 5. Kelkaj eminentaj gesamideanoj ĉe la domo de rektoro S. Jansson, sveda pioniro de Esperanto, honora prezidanto de la kongreso. — 6. La kongresanoj vizitas la urbodomon de Stokholmo. — 7. Dum promeno en la bela Svedujo. La personoj: s-ro Tiberio Morariu, lia edzino, lia fratino f-ino Eŭgenia Morariu (Cluj), f-ino Elly Isbrücker (Hago), f-ino M. Vermaas (Rotterdam).

La Esp-societo de Tartu (Estonio) en ĉi tiu jaro festis sian 20-jaran jubileon. Nia bildo prezentas la membrojn de la societo en la universitata preĝejo, okaze de la festa diservo. La sidantaj personoj de maldekstre: s-ro R. Peerna, organisto, prof. d-ro H. B. Rahamägi ev.-lut. episkopo de Estonio, s-ro J. Jaanisto prez. de TES, pastro A. Hinno prez. de la Esp.-grupo „Suno" en Petseri, s-ro J. Rosenberg pioniro de Esp.

En la dana urbo Silkeborg dum la monato Julio la Dana Esp.-Instituto okazigis sukcesplenajn internaciajn kursojn, en kiuj partoprenis 73 personoj el 9 nacioj. En la kursoj instruis: f-ino M. Noll, f-ino M. Saxl, s-ro Friis, s-ro Frey kaj s-ro Jörgensen. La bildo montras la anojn de la perfektiga kaj prepara kurso por Ĉe-metodaj instruistoj.

En la Esperanto-Domo en Arnhem dum la somero estis vigla Esperantista vivo. La bildo montras grupon el 12 nacioj, okaze de la internacia perfektiga kurso de Andreo Cseh.

Kiel fariĝas la nova vortaro? — Ĉi tiu interesa bildo prezentas nian meritplenan latvan pioniron, s-ron Talivaldo Indra en Riga, kiu ellaboris la Latvan-Esperantan vortaron. Li staras apud la turo de 50 diversaj vortaroj (el ili 25 Esperantaj), kiujn li uzis dum sia laboro.



Grava momento en Arnhem. — Sur la muro de la Esperanto-Domo la urba laboristo fiksas la nom-tabulon de la nova „Esperantolaan" (= Esperanto-aleo).

LITERATURO

Feliĉa juneco.

Mi kutimas vespermanĝi en malgranda restoracio de la Latina Kvartalo. La konstantajn gastojn mi jam konas pli-malpli bone. La du ĉambretojn plenigas maldikpoŝaj homoj de la artoj, similaj al mi: pentristoj, skulptistoj, muzikistoj, filmaktoroj kaj tiel plu. La gastinoj estas modelinoj kaj aktorinetoj. La kuirejo estas bona, la vinoj bonegaj.

En unu vespero nekonata viro eksidis ĉe mia tablo. Antaŭ la eksido li petis de mi permeson al tio, kaj fininte la manĝadon li komencis interparoli kun mi. Li laŭdis la bonan vinon, proponis al mi el sia tabako ... mi rimarkis, ke io pezas sur lia koro ... li bezonas aŭskultanton. Mi ne kuraĝigis lin, ĉar mi ne volonte interkonatiĝas kun fremduloj, sed fine li tamen ekparolis pri sia vera temo.

— Ĉu vi kredas al mi, — li demandis ridetante, — ke mi hodiaŭ kiel pilgrimanto venis al ĉi tiu loko, al kiu min ligas la plej bela memoro de mia feliĉa juneco?

— Ĉu vere ... — mi diris kun ĝentila miro, je kio mia nova konato jene daŭrigis:

— Eble vi opinias, ke la vorto „pilgrimo" ne estas ĝusta en mia kazo, ĉar oni kutimas pilgrimi nur al tiuj lokoj, kien la religia pieco kondukas. Kaj ĉi tiu loko estas, ĉu ne vere, nur manĝejeto en Parizo? ... Sed mi povas vin certigi, ke kun vera pia sento mi venis ĉi tien, kie precize antaŭ tridek jaroj mi estis lastfoje.

Li trinkis unu gluton el la bona ruĝa vino kaj daŭrigis:

— La loko iom ŝanĝiĝis dum la tridek jaroj, sed ne tro ... ĉe la kaso sidas alia posedantino ... novspeca estas la lumigado, nova estas la ligna kovraĵo de la muroj, la planko, la koloro de la tablotukoj. En tiu tempo mi estis studento de artoj, plena de ideoj, ambicioj, esperoj. Mi malestimis la filistrojn, en mia fiera juneco mi nenion respektis, nur la arton ... kaj fraŭlinon Heddy.

Li eksilentis por kelkaj momentoj, silente suĉis sian anglan pipeton, poste ridetante rigardis en miajn okulojn kaj diris:

— Mi ne povas legi la pensojn, sed mi sentas, ke vin strange impresas, ke mi ... la grasiĝinta „burĝo", parolas tiel. Jes ja, ... la bela juneco! Do ... Heddy estis la plej ĉarma, plej gaja, plej bonmora papilio de la studenta kvartalo. Ŝi ensorĉis ĉiun, ni ĉiuj adoris ŝin kaj ŝi estis egale afabla al ni ĉiuj. Oni ne povis diri, ke ŝi preferas iun el ni, kaj neniu el ni povis proksimiĝi al ŝi. Ĉiu knabo esperis, ke se iam aperos en la animo de Heddy la granda amo, lin ŝi elektos. Ni adoris ŝin ... kaj atendis.

— En unu vespero ... precize hodiaŭ estas la trideka datreveno de tiu vespero ... mi invitis fraŭlinon Heddy al vespermanĝo por festi mian naskiĝtagon. Ĉi tie ni sidis duope, ĉe ĉi tiu sama tablo ... pro tio mi elektis hodiaŭ ĉi tiun tablon. Mi mendis luksan vespermanĝon, ĉar mi sukcesis vendi unu el miaj pentraĵoj al mia dom-mastrino, riĉa maljuna vidvino. Ĉi tiun saman ruĝan vinon ni trinkis kaj ni estis en belega humoro. Mi sentis, ke „nun aŭ neniam". Mi komencis paroli al Heddy pri la amo. Kolorriĉe, per poeziaj vortoj mi pentris al ŝi nian feliĉan estontecon. Mi diris al ŝi, ke se ŝi estos mia edzino, mi kapablos krei grandajn verkojn ... ŝi estos la edzino de la plej fama franca pentristo! Kaj tiam ... larmoj aperis en la okuloj de Heddy kaj ŝi komencis paroli. Ŝia voĉo tremis, kiam ŝi ekparolis, kaj mi kun feliĉo aŭskultis.

„Marcel — ŝi diris —, vi estas la plej lerta komikisto de Parizo. Jam de longe mi ne amuziĝis tiel bone, kiel nun, je via ĉarma ŝerco! Tiel solene, kun tia serioza mieno vi deklamis, ke oni povus kredi, ke vi serioze pensas, kion vi diris. Sed nun ni iru al iu gaja loko por danci!"

„Sed mi ĉion tute serioze diris, Heddy!" — kriis mi konsternite.

„Tiam eĉ pli rapide ni iru danci, por ke vi eldancu el via kapo tiun stultan ideon, — diris la knabino. — Marcel, vi bone scias, ke vi neniam fariĝos fama pentristo. Vi ne havas talenton, nur ĉarma, bona knabo vi estas, sed el tio oni ne povas vivteni edzinon."

Kaj ŝi ridegis tiel, ke torentis la larmoj el ŝiaj okuloj. Poste ŝi kaptis mian brakon, subite serioziĝis kaj diris:

„Sufiĉis el la ŝerco, Marcel! Se mi fojé decidos edziniĝi, mi ne ligos min al artisto, sed mi elektos por mi iun solidan, bone enspezantan viron."

Mi sentis min mortvundita, profunde malhonorigita, kaj mi eksplodis:

„Vi malestimas mian arton, pro kiu mi rifuzis la proponon de mia onklo, ke mi fariĝu desegnisto en lia murpaper-fabriko kaj iam eĉ kunposedanto de la fabriko? Ĉu vi do pensas nur pri la mono?"

„Memkompreneble! Sen mono ne ekzistas feliĉa geedza vivo. La malriĉeco mortigas la amon", — diris Heddy.

„Dankon pro la leciono! — mi kriis kun profunda amareco —, ankoraŭ hodiaŭ vespere mi diros eternan adiaŭon al la arto kaj al vi. Mi iros al Marseille, mi fariĝos laboristo en la fabriko de mia onklo kaj mi ne trankviliĝos, ĝis kiam mi estos riĉulo. Ĉar mi vidas, ke nur la mono havas valoron!"

— Mi plenumis la promeson. Mia onklo akceptis min kun etenditaj brakoj. Dum unu jaro liaj murpaperoj fariĝis famaj en la tuta Francujo ... Mi desegnis la projektojn. En la komencaj tempoj dum sendormaj noktoj persekutadis min la artistaj ideoj, sed poste iom post iom mi amikiĝis kun la nova medio kaj mi kutimiĝis al la bona, varma sento, kiun oni havas palpante monon en sia poŝo. En la unuaj jaroj tiu penso instigis min al la laboro, ke riĉiĝinte mi iros al Parizo por reserĉi kaj edzinigi fraŭlinon Heddy. Ĉar la amanto estas stranga homspeco ... mi ne povis amare pensi pri ŝi.

— Sed la tempo multon ŝanĝas. Mi edziĝis kun la sola filino de mia onklo, mi havas du infanojn kaj ... mi estas riĉa. Mia edzino multege helpis min per sia bonega financa kompreno. Senfine valora estas la simpla, hejmeca franca virino.

— Hodiaŭ matene pro komercaj aferoj mi venis al Parizo. Legante la gazeton mi rimarkis, ke hodiaŭ estas la dek-sepa de Majo, la trideka datreveno de tiu mia naskiĝtago, en kiu Heddy rifuzis min. Mi decidis fari pilgrimon ĉi tien, al la scenejo de tiu grava okazaĵo. Sinjoro, jen la fino de mia historio, — li aldonis ridetante.

— Kaj ĉu vi revidis ĉi tie iun el la malnovaj tempoj? — mi demandis.

— Neniun, tute neniun, — diris li iom revante kaj li aldonis: — ankaŭ fraŭlinon Heddy mi ne vidis de tiam.

Post kiam li foriris, ankaŭ mi pagis. Mi haltis ĉe la kaso kaj interŝanĝis kelkajn ĝentilajn vortojn kun la dika posedantino. Dum la interparolo mi rimarkigis:

— Interesa figuro estis mia kunmanĝanto.

— Ankaŭ mi rimarkis lin, — respondis la posedantino —, ĝis nun mi ne vidis lin en nia manĝejo. Li tre memorigis min pri unu juna pentristo, kiu antaŭ multaj jaroj freneze enamiĝis al mi... Tiutempe mi estis modelino kaj facilanima, kiel la aliaj. Mi priridis la knabon kaj je tio li ofendiĝis kaj forlasis min. De tiam mi ne aŭdis pri li ... Sed sciu, sinjoro, mi ne kredas, ke el li fariĝis io ... ne el tia materio li estis kreita ... Dankon ... bonan vesperon, sinjoro.

Luigi Danieli.

Preparu vin al la

Esperantista Kristnaska Libertempo

en la Esperanto-Domo en Arnhem!

Detalaj informoj en la sekvontaj numeroj.

LA MONDO ESTAS INTERESA

La 91-a elemento. — La Amerika Kemia Societo ĵus publikigis, ke oni sukcesis apartigi la aktinion, kiu estas la plej malofta metalo de la Tero. Unu unco de ĝi (ĉ. 10 gramoj) kostas 200.000 britaĵn funtojn. La aktinio eligas el si radiojn, kiuj estas multe pli fortaj, ol la radioj de la radiumo. La merito de la apartigo apartenas al s-ro Brosse, profesoro ĉe la universitato de Ĉikago. Antaŭ nelonge li prezentis al la publiko la dekon-graman kvanton de aktinio, kiun li sukcesis ekstrakti el unu tuno da uran-erco. La kostoj de la ekstraktado atingas la sumon de 5000 dolaroj. Ĉi tiu rezulto estas tre grava el scienca kaj medicina vidpunktoj, ĉar la aktinio nur dum 32,000 jaroj perdas per la elradiado la duonon de sia kvanto, kontraŭ la radiumo, kiu jam en 1600 jaroj perdas sian duonon. La aktinio estas multe pli malofta, ol la radiumo. Ĝia efikpovo 140-foje superas tiun de la radiumo.

★

Oni detruis en Brazilo 30 milionojn da sakoj da kafo! — Laŭ la raportoj de la ĵurnaloj ĝis nun en Brazilo oni detruis tridek milionojn da sakoj da kafo, por plialtigi la prezojn de la kafo. La pezo de la detruita kvanto de kafo estas proksima al dumil milionoj da kilogramoj.

★

Tamen al la maŝinoj apartenas la estonteco. — Nuntempe la maŝinoj havas multajn malamikojn. Oni asertas, ke la maŝinoj estas la kaŭzo de la multa mizero de la moderna epoko, ĉar la maŝinoj forprenas la laboron kaj per tio la panon de la homoj, kondukas milionojn da homoj al senlaboreco kaj per tio iom post iom detruos la tutan homaron. Sed la franca ekonomo Guillmont havas alian opinion. Li energie defendas la maŝinojn kontraŭ la akuzoj. Interalie li diras: „Kiu ne volas havi maŝinojn, aŭ volas malpliigi ilin, tiu komparu Ĉinujon kun Ameriko. En Ĉinujo estas malmultaj maŝinoj, en Ameriko multaj. En Ĉinujo oni investas en maŝinojn ĉiujare nur tiel malgrandan sumon, ke el ĝi falas sur unu homon nur 0.10 ned. guld. Sed en Ameriko la investita sumo estas po jaro kaj homo ĉirkaŭe 60 guldenoj. La menciitaj sumoj esprimas samtempe ankaŭ la diferencon inter la ĉina kulio kaj amerika laboristo, kaj inter la ĉina kulturo kaj amerika kulturo. Ĉiu favoranto de la kulturo deziras maŝinojn, kiel eble plej multajn maŝinojn, eĉ tiam, se momente laŭŝajne la maŝinoj estas la kulpuloj pro la malfacilaĵoj. Sed la vera fonto de la ekonomiaj problemoj estas tio, ke la grandaj industriaj ŝtatoj perdis grandan parton de siaj eksterlandaj vendo-teritorioj kaj ankoraŭ ne sufiĉe organizis siajn enlandajn kampojn.

★

Araneo mortigis serpenton. — En la amerika urbo Baltimore okazis dum la monato Aŭgusto interesa batalo inter araneo kaj serpento. La batalo, kiu tenis en ekscito la tutan loĝantaron de la urbo, daŭris dum kvar tagoj. Kvankam la araneo ne estis pli granda, ol la okulo de la serpento, ĝi sukcesis tamen iom post iom enretigi la multe pli grandan kontraŭulon. Fine la serpento ne povis plu sin movi kaj estis kondamnita al la malsat-morto. Sed la best-protekta asocio pro kompato mortigis la serpenton. La araneon oni lasis en vivo.

★

Kuraĝaj prezentadoj per fal-ŝirmiloj. — Okaze de la lasta flug-tago en la Sovjet-Unio oni aranĝis grandstilajn eksperimentojn per fal-ombreloj. Pluraj centoj da viroj kaj virinoj en la sama momento elsaltis el aeroplanoj flugantaj en grandega alteco, kaj ĉiuj sen akcidento atingis la teron. Poste sekvis aliaj eksperimentoj: el unu grandega flugmaŝino oni deĵetis vivantajn bestojn. En la elĵetita kaĝo estis hundoj, porkoj, bovidoj kaj kokinoj, kaj ili ĉiuj sendifekte alteriĝis. Post tio oni deĵetis 300 „termos"-botelojn plenigitajn per varmaj trinkaĵoj. Fine venis la plej surpriza produktaĵo: orkestro konsistanta el dek muzikistoj elsaltis kun paraŝuto. La muzikistoj dum la tuta ŝvebado daŭrigis la ludadon.

★

Nova mara monstro. — La kapitano de la franca pasaĝera ŝipo „Cuba" post sia lasta transveturo de la oceano prezentis raporton, en kiu li komunikas, ke la 1-an de Julio frumatene en la proksimo de la Azoraj insuloj sur trankvila maro li ekvidis maran monstron, kiu havis la longecon de 25 metroj. La monstro havis longan kolon, malgrandan kapon kaj du rondajn ĝibojn. Tri ŝipistoj klare vidis, kiam la monstro plurfoje suprensaltis el la akvo. Ĉiufoje longa, kurba kolo leviĝis alten kaj la okuloj de la besto direktiĝis al la ŝipo.

★

Oni fotografis la kosmajn radiojn. — Okaze de la lasta balona veturo al la stratosfero en Ameriko oni atingis tre bonajn sciencajn rezultatojn. En la alteco de 18,000 metroj oni sukcesis fari perfektajn fotografaĵojn pri la kosmaj radioj.

★

Ĉesis la plej malnova gazeto de la mondo. — Antaŭ kelkaj semajnoj ĉesis aperi en Pekingo la gazeto „Peking Bao", kiun oni fondis en la jaro 400 post Kristo, dum la regado de la imperiestro Tin-Kvang-Ĉang. La nomita regnestro eltrovis en Ĉinujo la liter-fandadon kaj la menciitan gazeton oni presis de la komenco per plumbaj kaj arĝentaj literoj. La „Peking Bao" aperadis sur ses kunbroĉitaj paĝoj, en la komencaj jarcentoj kun intertempoj, sed de la 18-a jarcento ĉiutage. Dum tiu longa tempo iuj imperiestroj plurfoje malpermesis la aperigon de la gazeto, sed ĉiam troviĝis nova posedanto, kiu kuraĝis denove eldoni ĝin. Sed nun, post 1535-jara ekzistado, ĝi definitive ĉesis.

Kial dormas ?

la gesamideanoj en la klub-kunvenoj

Ĉar ili ne ludas per la „LEXICON"

(nova instrua kaj amuza kartludo)

Prezo: 1.35 guld, (9 respondkuponoj).

Mendu ĝin tuj ĉe LA PRAKTIKO!

! ! APERIS ! !

J. C. kaj J. R. G. Isbrücker:

Esperanto - examenopgaven voor diploma A en B met vertalingen.

128 paĝoj. — Prezo: -,90 guld. afrankite.

Mendu ĉe la eldonejo:

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto

Den Haag, Riouwstraat 172. (Poŝtkonto 162626)

Ĉi tiu nova, 4-a eldono, entenas ankaŭ la plej lastajn ekzamentaskojn el 1934!

MOMENTON!

malgrandaj bildoj pri grandaj homoj

SOKRATO (468—399 a. Kr.)
estis unu el la plej grandaj filozofoj de la antikva epoko. Foje iu facilanima malŝparulo plendis al li pri manko de mono kaj petis prunton. La saĝulo respondis:

— Pruntu monon de vi mem, malpliigante viajn elspezojn.

ELIHU ROOT,
estinta militafera ministro de Usono, enirinte foje en sian oficejon, vane serĉis sian paperkorbon. Per la sonorilo li vokis sian serviston kaj demandis:

— Kiu formetis mian paperkorbon?

— Sinjoro Riley, — respondis la servisto.

— Sinjoro Riley? ... Kiu estas tiu?

— Li estas tiu, kiu purigadas ĉi tiun ĉambron, — respondis tuj la servisto.

Post kelkaj minutoj denove sonorigas la ministro.

— Malfermu la fenestron! Kiu fermis ĝin en ĉi tiu varmego?

— Sinjoro Lanz, — respondis la servisto.

— Sinjoro Lanz? Ĉu ankaŭ tia ekzistas? Kiu estas li?

— La purigisto de la fenestroj.

— Tiel? ... Nun aŭskultu! — diris la ministro, — mi ĉi tie ne konas nur sinjorojn, ĉi tie ne ekzistas sinjoroj, ĉi tie ĉiu havas baptonomon. Ĉu vi komprenas?

— Jes!

Post dek minutoj eksonas la voĉo de la servisto, kiam li enkrias en la ĉambron de la ministro:

— Elihu, iu deziras paroli kun vi!

FRANÇOIS RABELAIS (1490—1553)

estis fama franca satiristo. Kiam li kuŝis mortante, la ĉeestantaj familianoj petis, ke li faru rapide la testamenton. Rabelais cedis al la petado kaj faris skribaĵon pri sia lasta volo. Kiam post lia morto la parencoj kun scivolo malfermis la testamenton, ili trovis nur la jenan surprizan, mallongan kaj ironian tekston:

„Multegon mi ŝuldas kaj nenion mi havas. Kio el mia havaĵo post tio restas, mi donas al la malriĉuloj."

ALEKSANDRO HUMBOLDT
(1769—1859)
estis granda natur-scienculo kun universala talento. Foje en societo unu sinjorino demandis al li:

— Kio estas via opinio pri la tablodancigado? (La konata fenomeno, ke la tablo faras movojn, se pluraj personoj tenas sur ĝi siajn manojn.)

Humboldt respondis mallonge per la proverbo:

— „La pli saĝa cedas!"

THOMAS CARLYLE (1795-1881).
la fama angla historiisto, ne havis serenan naturon. En iu tago li estis tre malbonhumora kaj je la demandoj de sia edzino donis la respondojn malafable kaj kolere. La edzino komencis plori:

— Kaj mi memoras, — diris ŝi ploregante, — kion vi iam diradis, ke mi estos ĉiam via reĝino.

— Tio estas vera, — respondis grumble la scienculo, — sed kiam oni rimarkas, ke la raziloj estas uzataj por pintigo de krajonoj kaj la pipo por enbatado de najloj en la muron, tiam oni komencas orientiĝi al la respublika regsistemo.

KONKURSOJ

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Julia numero!

102-a konkurso.

KOMPLIKA PROBLEMO.

(Ensendis s-ro G. Papaud en Orléans, Francujo.)

En fervoja vagono sidas tri laboristoj: **hejtisto, maŝinisto** kaj **ĉasgardisto,** kies nomoj estas: **Smith, John** kaj **Robinson.** Sed oni ne scias, kiu estas la hejtisto, la maŝinisto k.t.p.

En la sama vagonaro estas ankaŭ tri pastroj: s-ro Smith, s-ro John kaj s-ro Robinson.

Pastro Robinson loĝas en Leeds. La ĉasgardisto loĝas precize mezvoje inter Leeds kaj Sheffield. Pastro John perlaboras en unu jaro 99 funtojn, 18 ŝilingojn kaj 1 pencon. Tiu pastro, kiu loĝas plej proksime al la ĉasgardisto, perlaboras en la jaro ekzakte trioble pli, ol la ĉasgardisto.

La samnomulo de la ĉasgardisto loĝas en Sheffield kaj la laboristo Smith venkas la hejtiston, kiam ili kune ludas bilardon.

La konkursa tasko: Diru la nomon de la maŝinisto!

Ĉi tiu problemo je la unua vido ŝajnas esti tre malfacila. Tamen post ne longa pripensado oni facile solvas ĝin. Por niaj ne britaj legantoj ĉi tiu konkurso estas utila ankaŭ tial, ke ili povas lerni ion pri Britujo. Leeds kaj Sheffield estas gravaj industriaj urboj en Anglujo. Por povi solvi la problemon, oni devas koni la britan mon-sistemon. Jen ĝi: **1 funto = 20 ŝilingoj; 1 ŝilingo = 12 pencoj.**

Inter la ensendintoj de la ĝusta solvo ni disdonos 5 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la 15-a de Decembro.

Bonvolu precize plenumi la konkursajn regulojn!

103-a konkurso.

ENIGMO.

8.14 — 3.2.12.9.15.9.5 — 6.7 — 7.6 — 16.9.16.9.7.9.1 —

— 7.14.15.18.13.9.15 — 16.4.3.6.15 — 16.9.3 — 11.2 —

— 10.14.4.1 — 13.9.11.6.12.4 — 7.6 — 15.9.8.9.15 —

12.2 — 7.6 — 2.17.2.3.15.4.7.9 — 11.6.1 — 5.2.3.13.6.12.4

— 6.7 — 7.14 — 4.15.4.6.15.14.8.2.

Anstataŭ la nombroj metu literojn. La sama nombro signifas ĉiam la saman literon. La rezulto donos interesan frazon de la profeto Cefanja en la Malnova Testamento.

Ŝlosil-vortoj:

1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 2, 8, 9 = sankta urbo.

10, 9, 11, 9, 7, 6, 12, 9 = dolĉa manĝaĵo.

13, 14, 15, 9 = forta trinkaĵo.

10, 6, 16, 2, 7, 9 = ĝi estas sur la kapo.

17, 6, 18, 9 = parto de la semajno.

Al la solvintoj ni disdonos 8 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis la 15-a de Decembro.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn!

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Morto. — En Stokholmo dum la kongreso mortis subite *s-ino Henriette Torgny nask. Westergren*, edzino de redaktoro Gustaf Torgny el Skara (Svedujo).

— En Arboga (Svedujo) perdis la vivon pro drono la fervora nova Esperantisto s-ro *Lars Eriksson*. Ĉe la enterigo paroladon faris lia Esperanto-instruisto, s-ro Sipke Stuit el Nederlando.

UEA havas novan estraron. — La kongreso de Universala Esperanto-Asocio en Stokholmo havis gravajn kunsidojn. Ĝi elektis novan estraron, konsistantan el la jenaj personoj: Prezidanto: s-ro generalo Bastien (Parizo); vicprezidanto: s-ro inĝ. J. R. G. Isbrücker (Hago); membroj: s-ro prof. St. Kamaryt (Bratislava, Ĉeĥoslovakujo), s-ro E. Malmgren (Stokholmo), s-ro inĝ. D-ro Orengo (Milano), s-ro reg.-kons. H. Steiner (Vieno) kaj s-ro D-ro A. Vogt (Stuttgart). La ĝisnuna prezidanto, s-ro Ed. Stettler (Bern) estis elektata kiel honora prezidanto.

„Nova Krestomatio". — La fekunda Esperanto-eldonejo „Literatura Mondo" en Budapest preparas la eldonon de nova, granda krestomatio, kiu speguloS la lingvan kaj literaturan evoluon de Esperanto dum la lasta kvaronjarcento (1905—1930). La libro estos 480-paĝa kaj ĝin redaktos D-ro Kolomano Kalocsay en Budapest kaj D-ro Emil Pfeffer en Vieno. La redaktoroj petas la tutmondan Esperantistaron, ke oni atentigu la redakcion pri literaturajoj, kiuj estas indaj preni lokon en la nova krestomatio.

Mondfama sportisto lernas Esperanton. — S-ro Kin, studento en Koreo, kiu en la Olimpiado de Los Angeles venkis en la Maraton-kurado, kaj nun preparas sin al la Olimpiado en Berlino, partoprenas en Esperanto-kurso, por uzi la mondlingvon dum sia proksima vojaĝo al Eŭropo. Niaj japanaj samideanoj komencis propagandon, por ke ĉiuj japanaj sportistoj, kiuj iros al Berlino, lernu Esperanton. Tiujn klopodojn oni povos bone helpi, skribante instigajn leterojn al s-ro Kin (Daini Kootoo-Gakuin, Waseda Universitato, Japanujo). Estas dezirinde, ke en ĉiu lando komenciĝu sistema propagando ĉe la sportistoj, por ke dum la berlina Olimpiado oni uzu Esperanton.

Malaperinto trovita per Esperanto. — En la 787-a numero de „Heroldo de Esperanto" s-ro Br. Fröhlich el Hannover (Germanujo) priskribas interesan sukceson atingitan per Esperanto. Loĝanto de Hannover serĉis amikon, kiu malaperis antaŭ pli ol tridek jaroj. S-ro Fröhlich petis polajn Esperantistojn por serĉadi la malaperinton. Antaŭ la forpaso de du monatoj nia pola samideano s-ro B. Gluchowski, instruisto en Varŝavo, sciigis ĉiujn detalojn pri la intertempe mortinta malaperinto kaj ties familio.

„Verda monato". — La Federacio de Laboristaj Esperantistoj en Nederlando decidis organizi „verdan monaton" dum la nunjara Septembro, por grandskala propagando de Esperanto. La nomita Federacio estas modele organizita kaj gvidata kaj apartenas al la plej fortaj Esperantistaj organizaĵoj de la mondo. Ĝi posedas nuntempe 86 lokajn sekciojn kaj ĉ. 3000 membrojn, kaj esperas, ke per la „verda monato" tiuj nombroj grave plialtiĝos.

Nederlanda gazeto kun kongres-raporto. — La ĵurnalo „De Morgen", eldonata de la presejo „Helmond", publikigis dum tri tagoj ampleksan raporton pri la 26-a univ. Esperanto-kongreso en Stokholmo. La interesaj numeroj estas ankoraŭ haveblaj ĉe la eldonejo. Adreso: „De Morgen" en Helmond. La raporto estas nederland-lingva.

Interesa maniero lerni Esperanton. — Nia germana samideano, s-ro Aŭgusto Weide el Hamburgo, partoprenante someran kurson en Arnhem, rakontis la jenan interesan kazon. Li petis f-inon Greta Schlüter, kiu eĉ unu vorton ne sciis el Esperanto, kopii la kurslibron de Andreo Cseh. La fraŭlino plenumis la taskon kaj kiam ŝi redonis al s-ro Weide la kurslibron kaj la faritan kopion, je lia granda surprizo — ŝi parolis Esperante. Ŝi lernis la lingvon per la kopiado de la kurso.

Bulgarujo. — La 21-a bulgara Esperanto-kongreso sukcesplene okazis en Orehovo apud la Danubo, sub la prezido de nia malnova pioniro s-ro Ivan H. Krestanov, la 20-23-an de Julio. La kongreso, kiu faris unu kunsidon ankaŭ sur la danuba Esperanto-insulo, akceptis plurajn utilajn rezoluciojn pri la diskonigo kaj enkonduko de Esperanto. La nova prezidanto de la Bulg. Esp. Asocio estas s-ro P. Jordanov. La venontjara kongreso okazos en Varna ĉe la Nigra Maro.

Ĉinujo. — En la antikva urbo *Suĉuo* (Soochow), kuŝanta inter Nankino kaj Ŝanhajo, kelkaj fervoraj gesamideanoj fondis la Suĉuan Esperanto-Asocion en la jaro 1931. Dum la lastaj monatoj la asocio aranĝis kelkajn kursojn, kiuj alportis plurajn novajn anojn. Nuntempe estas kurso en la Si-Ĉo-Dan templo, gvidata de s-ro Jizo. La prezidanto de la asocio estas s-ro Hanjunmeo, la sekretario s-ro Uanjaŭbino. La adreso de la asocio: ĉe s-ro Jizo, 3 Siao Chiao Chang en Soochow.

Danujo. — La internaciaj kursoj en *Silkeborg*, aranĝitaj de la Dana Esperanto-Instituto, finiĝis kun granda sukceso. Partoprenis entute 73 personoj el 9 nacioj. En la kursoj, kiuj okazis en la lernejo „Kornmod", instruis f-ino M. Noll el Kopenhago (historio de Esperanto), s-ro L. Friis el Aabyhöj (lingvaj studoj), s-ro Frey el Haderslev (Esperanta literaturo), s-ro P. Jörgensen el Skanderborg (fonetiko) kaj f-ino M. Saxl el Berlino (prepara kurso por Ĉe-metodaj instruistoj kaj konversacia instruado). — La Dana Esp.-Instituto preparas multajn kursojn por la nova instru-sezono, gvidotajn de eksterlandaj Ĉe-metodaj instruistoj.

Hindoĉinujo. — La 13-an kaj 20-an de Majo okazis en Hanoi ekzamenoj por elementa diplomo kaj atesto pri kapableco. La plej gravaj ĵurnaloj de la lando regule publikigas artikolojn pri Esperanto.

Japanujo. — En Koreo aperas Esperanta gazeteto hektografita sub titolo „Epokisto". Ĝia redaktoro estas s-ro Cukasa Hajaŝi en Kinsen, Keihoku, Koreo, Japanujo.

Nederlando. — En la ekzameno en Utrecht (7-Julio) el la 38 kandidatoj sukcesis 27. — En la ekzameno en Deventer (14-Julio) el 28 kandidatoj sukcesis 21. — En Leeuwarden (21-Julio) en la ekzameno por A-diplomo el 24 kandidatoj sukcesis 17. — F-ino M. Saxl, talenta instruistino de la Cseh-Instituto, venis al Nederlando por gvidi kursojn. Ĝis la kristnasko ŝi gvidos kursojn en ses urboj de norda Nederlando (aranĝas la Frisa Esp.-Rondo en Leeuwarden) kaj post la kristnasko en ses urboj de meza Nederlando (aranĝos s-ro L. Moreau en Arnhem, Esperanto-Domo). — En *Rotterdam* komenciĝos Esperanto-kurso por komencantoj sub la gvido de Andreo Cseh. La publika provleciono okazos la 27-an de Septembro.

Nederlanda Hindujo. — La gazeto „Pewarta Borneo" aperanta en malaja lingvo en la urbo Samarinda (Borneo), la 28-an de Julio publikigis artikolon pri la historio de la mondlingvoj, transprenitan el La Praktiko.

Turkujo. — En la urbo *Adana* (iama Antiochia) vigle propagandas nia samideano S. Mišak. Li presis lernolibretojn kaj intencas fondi Esperanto-domon.

Usono. — En la urbo *Seattle* estas vigla Esperantista vivo. La loka Esp-ista societo havas novan vastan ejon en granda konstruaĵo en la koro de la urbo (312 University Building, 1305 Third Avenue). La klubejo enhavas grandan salonon por pli ol cent personoj, malgrandan kursĉambron kaj legejon. La societo aranĝas regule kursojn kaj amuzaĵojn por perfektigi en la parola uzo de nia lingvo. La eksa ĝen. sekr. kaj nuna nacia organizanto de EANA (Esp.-Asocio de Norda Ameriko), s-ro Thomas F. Gaines, estas en propaganda vojaĝo por organizi novajn klubojn. Li faris entuziasmigajn paroladojn en Seattle kaj regiono, fondis novajn grupojn kaj revigligis plurajn velkintajn. Nun li estas en la Pacifika Nordokcidento kaj iros poste al Kalifornio.

LA ESPERANTO-DOMO EN ARNHEM.

Dum ĉi tiu somero la Esperanto-Domo en Arnhem gastigis multajn gajajn gesamideanojn, kiuj venis por progresi en Esperanto aŭ por pasigi agrablan libertempon. La gastoj el 12 diversaj landoj formis veran internacian familion, kvazaŭ „Esperantan landeton". La plejmulto de la gastoj partoprenis en la internaciaj kursoj de Andreo Cseh, sed pluraj venis kun siaj familioj nur por pasigi la libertempon en Esperantista rondo, en la komforta kaj malmultekosta hotelo de la Esperanto-Domo, ekzemple ges-roj **Wiersma** el Zwolle (Nederlando) kun du infanoj, ges-roj **Paijmans** el Hago kun du infanoj, ges-roj **Piette** el Blanc-Misseron (Francujo) kun filo, ges-roj **Bourlier** kun tri filoj el Beauchamp (Francujo).

El la malproksimaj gastoj de la Esperanto-Domo ni povas citi la sekvantajn: Prof. E. **Asai** kaj edzino el Osaka (Japanujo), s-ro **Tio Oen Giok** el Nederlanda Hindujo, f-ino L. **Peineau** el Nantes (Francujo), f-ino M. **Saxl** el Berlino, s-ro E. **Krantz** el Göteborg (Svedujo), s-ro C. P. **Sörensen** el Odense (Danujo), f-ino M. E. **Smith** kaj f-ino M. A. **Crispin** el Thorpe Bay (Anglujo), s-ro R. **Meyer** el Harburg (Germanujo), s-ro W. **Ems** el Düsseldorf (Germanujo), ges-roj **Boileau** el Parizo, s-ro **Landerouin** el Parizo, s-ro E. **Haudenschild** el Bern (Svislando), f-ino M. **Pellet** el Beauchamp (Francujo), s-ro A. **Weide** el Hamburg (Germanujo), s-ro M. **Dupuis** el Rouen (Francujo), s-ro M. **Ballighien** el Bachy (Francujo), s-ro C. **Vincent** el Cherbourg (Francujo), s-ro inĝ. d-ro E. **Aprosio** (Italujo), f-ino **Pochou** (Francujo), s-ro **Béquet** (Francujo), s-ro **Derbes** (Francujo), s-ino **Saudin** (Francujo), s-ino **Lambert** (Francujo), s-ino kaj f-ino **Tonderie** (Francujo), s-ro P. **Scholtz** el Szentes (Hungarujo) kaj aliaj.

La Esperanto-Domo fariĝas pli kaj pli objekto de intereso kaj ŝato. La direkcio de la Cseh-Instituto kaj la fervora administranto de la Esperanto-Domo, s-ro L. Moreau kune kun siaj edzino kaj filo klopodas fari ĉion, por ke la restado de la gastoj estu instrua kaj ĝuplena.

Krom la unuopaj vizitantoj venis al la Esperanto-Domo ankaŭ grandaj karavanoj el la nederlandaj urboj Zwolle, Hago, Leiden, Heerlen kaj Slikkerveer, por vidi tiun faman punkton de Esperantujo.

La Esperanto-Domo estas konstante malfermita kaj ĝia hotelo funkcias sub la lerta kaj atenta gvidado de gesinjoroj Moreau.

NUR DORMU...!

Nur dormu, etulino,
nur dormu, mia flor'
vin lulas la patrino
kun amoplena kor' —
ha, hojda, hojda, hoj!

En sonĝo aperados
al vi la anĝelar',
kantante ekdancados
belega dancopar' —
ha, hojda, hojda, hoj!

Okulojn fermu vi jam,
plej kara etulin'
kaj dormu ho ĝis kiam
mateno vekos vin —
ha, hojda, hojda, hoj!...

J. V. Dolinsky.

LIBRO-LOTERIO de LA PRAKTIKO

Rapidu aĉeti lotojn, por ke la tirado povu baldaŭ okazi! Legu la detalajn informojn en la Januara numero!

LA LISTO DE LA PREMIOJ (DAŬRIGO):

142 **Ĉu vi aŭdis tion?** Spritaĵoj kolektitaj de S. Grenkamp.
143 **La submarinistoj.** Romano de A. S. Novikov-Priboj.
144 **Gysbreght van Aemstel.** Tragedio, de Vondel.
145 **Blua sango.** Romano de W. Wood.
146 **Solidareco.** Novelo de V. Kuzmiĉ.
147 **Internacia dialogaro.** Kolektita de A. Kenngott.
148 **Ĉinaj noveloj.** De O. Erdberg.
149 **Rememoroj de Esperantisto.** De A. D. A.
150 **Ĉe abismo.** Rakontoj. de H. M. Frima.
151 **La malŝparulo.** Sorĉfabelo. De F. Raimund.
152 **El la intima libro de la verd-urbaj Esperantistoj.** De A. D. Atanasov.
153 **Superforta ambicio.** De A. A. Saĥarov.
154 **Apud landlimoj.** Skizoj.
155 **Rübezahl.** Poezia rakonto de H. Scholze.
156 **El la „Camera Obscura".** De Hildebrand.
157 **Kial venkis Esperanto?** De prof. L. Ĵirkov.
158 **La himno.** Novelaro. De M. Ljubin.
159 **Vienaj legendoj.** De A. Mair.
160 **La firmao de la kato, kiu pilkludas.** De H. de Balzac.

GARDATAJ LOTOJ (daŭrigo). — Albrecht 6523—6533; Alksnis 6947—6948; Ambots 5506; Ambroise 6842—6852; Ameeline 6939—6941; Bauknecht 6743—6753; Dance 6886—6896; v. Dijk 6853—6863; Illingworth 5466; Meyer 394—397, 399; „Normandio" 6942—6946; Princis 6831—6841; Roth 6875—6885; S. D. M. 6864—6874; Veidemanis 6949—6950; Vonk 6754—6764.

LA REDAKCIO RESPONDAS

S-ro A. J. en L. (Svisujo) — Ni volonte publikigas la konsilon, ke oni prefere uzu la plej naturan kaj facilan vortordon: subjekto-verbo-komplemento. Tio estas gravega en nia movado, ĉar en nia publiko estas multaj komencantoj, kaj al ili ni devas prezenti facilajn tekstojn.

S-ro H. K. en V. (Ned.) — Ĉar via manskribo ne estas sufiĉe klara, ni timas, ke la anoncintoj, al kiuj vi skribis, ne ricevis vian leteron aŭ ne povis legi vian adreson kaj tial ne respondis al vi. Ni konsilas, ke vi denove skribu al ili, prefere per skribmaŝino.

S-ro N. V. en B. (Rum.) — 1. Jes, la libro de Benson en la vortara parto donas ankaŭ la rumanan tradukon de la vortoj. — 2. La tirado de la libro-loterio okazos en Decembro de ĉi tiu jaro.

S-ino E. F. en K. (Germ.) — 1. Post la prepozicio „ĉirkaŭ" povas esti akuzativo, se la frazo respondas je la demando: „kien?". Jen la ekzemplaj frazoj: „La seĝoj staras ĉirkaŭ la tablo" (Kie?); „La servisto metis la seĝojn ĉirkaŭ la tablon" (Kien?). — 2. Post la prepozicio „kontraŭ" povas esti akuzativo, kiam ĝi signifas lokon kaj respondas je la demando „kien?". Ekzemploj: „Kontraŭ mia domo staras preĝejeto" (Kie?); „La laboristoj portis miajn meblojn kontraŭ mian domon" (Kien?); „Batali kontraŭ iu" (sen akuzativo, ĉar ne estas loko). — 3. „Venu ĉe mi!" La frazo estas malbona. Korekte: „Venu al mi!" — 4. „La vorto staras ekster la temo." La frazo estas bona. — 5. „Li iris ekster de la vilaĝo." En ĉi tiu frazo la vorto „de" estas superfluaĵo. Ĝi nur malklarigas la frazon.

F-ino L. F. en S. (Pol.) — Dankon pro la poemoj kaj humoraĵoj. Ni elektos el ili.

S-ro H. R. en T. (Est.) — La ĝenerala regulo estas, ke antaŭ la propraj nomoj oni ne uzas la vorton „la". Tamen oni uzas ĝin antaŭ la nomoj de montoj *(la Alpoj, la Karpatoj, la Blanka Monto, la Vogezoj, la Himalajo)*, maroj *(la Nigra Maro, la Atlanta Oceano, la Norda Maro)*, riveroj *(la Rejno, la Danubo, la Nilo)* k.t.p. En ĉi tiu afero Esperanto sekvas la kutimon de tiuj lingvoj, kiuj posedas la artikolon. Al vi, kies lingvo ne havas artikolon, tiu kutimo ŝajnas esti ridinde neregula, kaj tre malfacila por la lernantoj de Esperanto. Vi estas prava. Sed aliflanke la kutimo estas tiel ĝenerala kaj enradikiĝinta, ke ni ne vidas eblecon ŝanĝi ĝin. Restas kiel sola solvo: sekvi tiun kutimon. Same kiel vi devis ellerni la germanan kaj la francan lingvojn kune kun ilia artikol-uzado, klopodu ellerni la similan kutimon de Esperanto. Ne serĉu regulojn, ĉar ili estas tro komplikaj kaj nur malfaciligas la lernadon. La ĝusta vojo estas: multa, multega legado de bona literaturo verkita de aŭtoroj, kies nacia lingvo posedas artikolon; tiamaniere vi kutimiĝos al la ĝusta uzado. Cetere bonvolu legi la konsilojn de D-ro Zamenhof en la „Lingvaj Respondoj".

S-ro J. J. en K. (Hung.) — Kun ĝojo ni legis vian inteligentan „babiladon".

Japana leganto. — En la ŝak-enigmoj de La Praktiko la ĉeval-movo povas okazi en ĉiu direkto. — Ni ne indikas en La Praktiko la japanan egalvaloron de la nederlanda guldeno, ĉar ni ne akceptas japanan monon aŭ japanajn poŝtmarkojn. Vi povas pagi per poŝtaj respondkuponoj. Ni akceptas unu kuponon en la valoro de —.15 ned. guld.

S-ro P. R. en L. (Ned.) — Por informoj pri UEA bonvolu turni vin al la nederlanda ĉefdelegito de UEA: s-ro Jakob Telling, v. Bellevoysstraat 36, Rotterdam. Li sendos al vi presaĵojn kun detalaj informoj kaj respondos je viaj demandoj.

S-ro S. P. L. en L. (Angl.) — Certe multo ŝanĝiĝus, se — laŭ la propono de s-ro F. R. — en la proksima milito la maljunuloj irus sur la batalkampon kaj la juna generacio restus hejme por labori kaj ... vivi. Tamen ni preferas, ke ĉiuj, junaj kaj maljunaj, restu hejme kaj iru al la batalo nur tiuj, kiuj opinias, ke la milito estas utila afero.

S-ro S. W. en G. (Ĉeĥosl.) — Neglekti = malzorgi, flankelasi, neatenti ion. — Ni rekomendas al vi aĉeti la Plenan Vortaron, kiu entenas multajn vortojn, kiujn vi ne trovas en viaj tri vortaroj. Prezo 6.50 guld., mendebla ĉe La Praktiko.

S-ro R. G. en T. (Ital.) — Kun via anonceto vi sendis malpurajn, uzitajn poŝtmarkojn, kiuj estas tute senvaloraj. Por pago ni akceptas nur neuzitajn, t.e. nestampitajn, poŝtmarkojn. Ankaŭ vian leteron vi afrankis per poŝtmarko jam uzita. Tio estas danĝera, ĉar la poŝtistoj kelkfoje havas bonajn okulojn.

LIMONADOJ, MINERALAJ AKVOJ SENALKOHOLAJ VINOJ

Esperanto parolata!

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — Petu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

STENOGRAFIO, SKRIBA KURSO. — Petu informojn de: s-ro B. P. Roubos, Noordendijk 90, Dordrecht (Nederlando).

KORESPONDO. — Studenta Esp-ista rondeto ĉe Ĝardenista Instituto deziras korespondi kun ĉiuj landoj per leteroj kaj il. poŝtkartoj pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi ilustritajn gazetojn kaj ĵurnalojn. Respondo garantiata. Adreso: K-do L. Babkin, per Esp.-Rondeto, Institut Sadevodstva im. Miĉurina, en Miĉurinsk (Sovjet-Unio).

KORESPONDO. — Du amikinoj deziras korespondi kun du germanaj kamaradoj 25-30-jaraj. Adreso: F-ino Runa Olsen, Tvargade 2.A., Middelfart (Danujo).

LETERVESPERO. — La Esp-klubo „La Aglo-ŝildo" en Örnsköldsvik (Svedujo) aranĝos letervesperon la 25-an de Oktobro kaj petas alsendi L kaj PI el ĉiuj landoj. Oni adresu al: s-ro I. Ekman, Box 825 en Örnsköldsvik, Svedujo. Certa respondo.

KURAĜIGA KURSO. — Kursus voor hen, die Esperanto geleerd hebben, maar het nog niet voldoende kunnen spreken en schrijven. Maandagsavonds van 8—9½ uur; van 1 October tot 1 April. Kosten f 10.—. Elisabeth M. Mannoury (B-Diploma), Eendrachtstraat 27, Amsterdam-Zuid. Tel. 23138.

FRAŬLINO D. WEINERT en Philadelphia, bonvolu sendi al mi vian adreson. — Thea Brouwer.

BONA AFERO por vi! Ekkaptu ĝin! Se vi aĉetas kaj legas la libron „BONHUMORO" de Paul Nyssens, vi havigas al vi bonefikojn moralajn kaj fizikajn, kiuj valoras la dekoblon de via elspezo. Prezo kun sendkosto 1.25 ned. guld. — Aĉetebla ĉe La Praktiko.

ESP-EKSPOZICIO okazos en la fama urbo Suĉuo (Soochow) de Ĉinujo. Bonvolu sendi al ni gazetojn, librojn (novajn kaj malnovajn), dokumentojn, afiŝojn, poŝtkartojn kaj alian materialon pri Esp-o. Antaŭdankon pro via afabla helpo! Adreso: Suĉua Esperanto-Asocio, 3 Siao Chiao Chang, Soochow (Ĉinujo).

PETO. — Kiu volas helpi junan germanon, gastigante lin dum kelkaj monatoj? Li volonte rekompencos per laboro. Proponojn (el ĉiuj landoj) oni bonvolu tuj direkti al: Ragnhild Sörensen, Forsögsstationen, Hornum (Danujo).

SINJORINO (liberala) deziras kunloĝantinon en sia domo. Adreso: S-ino C. A. Olland-Lamèris, Burgemeesterpark 3, Driebergen (Nederlando). — Esperanto parolata.

ĴURNALISTOJ, VERKISTOJ kaj skribemaj amatoroj tutmondaj estas petataj sendi tradukotajn artikolojn internacie interesajn kaj ĉiuspecajn prozajn literaturaĵojn en Esperanta, franca kaj rumana lingvoj. Pagi komence mi ne povas, ĉar provizore ankaŭ mi laboras senpage; mi povos rekompenci nur per specimenoj el tiu grava hungarlingva gazeto, en kiu la artikoloj aperos. Almenaŭ unufoje ĉiu ricevos respondon. — Adreso: s-ro Eŭgeno Kormos en Chiend (jud. Turda, Transilvanio, Rumanujo).

LEGINDA LIBRO: Princo Serebrjanij. Historia romano verkita de grafo A. Tolstoj. El la rusa lingvo majstre tradukis s-ino M. Ŝidlovskaja. 284 paĝoj. Prezo kun sendkosto: 2.— ned. guld. Aĉetebla ĉe La Praktiko.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —.45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. — *La redakcio.*

ŜLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

-ro = sinjoro
-ino = sinjorino
-ino = fraŭlino
ez. = deziras
oresp. = korespondi
interŝ. = interŝanĝi
L = letero
PK = poŝtkarto
PI = poŝtkarto ilustrita
PM = poŝtmarko
bfl. = la poŝtmarkon gluu sur la bildan flankon
k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

MEMORIGO. — La jenaj anoncintoj estas petataj respondi: **S-ro K. Dobrzalski** en Chelmno (al s-ro A. Barata en Vale de Figueira do Ribatejo, Portugalujo). — **S-ro José Hernando** en Bogotá kaj **s-ro Kristian Lunde** en Oklungen (al s-ro O. Ackerman en Eindhoven, Nederlando).

ARGENTINO

árez F. C. S. (Buenos Aires). — S-ro V. Roque Schettino, profesoro, Calle Chacabuco 464—468. — L, PI, PM, k.ĉ.l., p.ĉ.t., prefere kun fraŭlinoj. Ankaŭ kun geĝardenistoj. Interŝ. florsemojn, fotojn, bildojn pri pejzaĝoj, muziknotojn por piano. Respondo garantiata.

AŬSTRIO

inz. — S-ro Reinhold Jäger, oficisto, Bethlehemstrasse 50. — L, PI, k.ĉ.l. Certe respondos.

BULGARUJO

bĉilare (Gorno-Orehovsko). — S-ro Kr. St. Gajdarov, 24-jara studento ĉe fizika-matematika fakultato. — Serĉas sincerajn gekorespondantojn. K.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe ĉiam respondos.

ĈEĤOSLOVAKUJO

ohumin II. — S-ro Stefano Adámek, 25-jara fervojisto, N-ro 183. — Dez. kor. kun Ĉinujo, Japanujo, Afriko, Aŭstralio, Hindujo, Egiptujo kaj aliaj ekstereŭropaj landoj. Certe respondos almenaŭ unufoje al ĉiu.

DANUJO

alborg. — S-ro Börge Andersen, Kildevaldsvej 18, Vejgaard. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
alborg. — F-ino Kathrine Lund, instruistino, Hadsundvej 14. II., Vejgaard. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
alborg. — S-ro Poul Nielsen, 28-jara, Danmarksgade 71. — L, PK, k.ĉ.l. precipe kun Francujo kaj Japanujo, p.ĉ.t., prefere kun fraŭlinoj.
alestrup. — S-ro Sören Krogh, instruisto, Fjelsö Skole. — Dez. kor.
arhus. — S-ro D-ro Hans Egerrup, kuracisto, Söndergade 76. — Dez. kor.
Christiansfeld. — S-ro Alfred Jörgensen, lernejestro. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
redericia. — F-ino Jessie Strand, Norgesgade 36. I. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
redericia. — F-ino Edith Tobiesen, Köbmagergade 62. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
illeröd. — F-ino Ola Jensen, instruistino, Faurholm Skole. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
Copenhago-S. — S-ro Edmund Lund, doganisto, Amagerbrogade 85. II.
Copenhago-V. — S-ro Leonid Vasiljev, Frederiksberg Allee 7. I.
ejre. — S-ro Julius Faurholt-Hansen, instruisto, Osted. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
Rönde. — F-ino Margrethe Knudsen, 19-jara gimnazianino, Gymnasiet. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
Vejle. — F-ino Agnes Jörgensen, instruistino, Odinsgade 38. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
Vivild. — F-ino R. Jörgensen, instruistino, Vivild Skole. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

ESTONIO

Tallinn. — S-ro Nikolai Lieventhal, 18-jara studanto, Endla 22. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. speciale sportaj, lingvaj, geografiaj, etnografiaj, turismaj. Petas afranki per pli interesaj PM. Certe respondos.

FRANCUJO.

Hirson (Aisne). — S-ro René Moinet, barbisto, 78 rue de Charleville. — L, PI, k.ĉ.l. Certe kaj tuj respondos.
Saint-Amand en Puisaye (Nièvre). — S-ro Lucien Boulmier, 30-jara, La Griotterie. — L, PI, k.ĉ.l., kun laboristoj.

HUNGARUJO

Budapest VII. — S-ro Tibor Ujlaky Nagy, militlernejano, Hajtsár-u. 72. III. — Dez. kor. kun italaj junuloj samprofesiaj, por lerni la italan lingvon per Esp. Certe respondos.

JUGOSLAVIO

Kula (Dun. ban.) — S-ro Simo Braun. — Dez. interŝ. P.M. k.ĉ.l. Sendu almenaŭ 100 nedifektitajn. Peco por peco aŭ laŭ Michel. Certe respondos.

NEDERLANDO.

Amersfoort. — S-ro J. v. d. Klift, 35-jara nova Esp-isto, dresisto ĉe la kavalerio, St. Andriesstraat 26, Cigarmagazeno „Flora". — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. L, PI, interŝ. fotojn kaj diversajn malgrandajn objektojn. Certe respondos.
Bussum. — F-ino C. W. de Stürler, studentino, Vondellaan 7. — Dez. kor. k.ĉ.l.
Den Haag. — S-ro W. H. Stein, lernanto, Emmastraat 172. — Dez. kor.
Eindhoven. — S-ro Otto F. Ackerman, flegisto, Corn. Dankertstraat 11. — Dez. interŝ. PM p.p.p. aŭ laŭ Michel k.ĉ.l. Certe respondos.
Scheveningen. — F-ino Annie Ligtvoet, 21-jara oficistino, Kanaalweg 27. — L, PI, k.ĉ.l., pri libroj, belaĵoj de landoj kaj urboj, pri ĉio, kio progresigis la evoluon. Interŝ. PM.
Winterswijk. — S-ro H. Thien, instruisto, Heldstraat 27. — PI kun ekstereŭropanoj.
Zaandam. — Gekomencantoj de Esp. klubo dez. kor. kun gejunuloj ĉiulandaj. Skribu al: s-ro Jac. Vonk, Zuiddijk 244.

POLUJO

Janów apud Katowice. — S-ro Fr. Denkowski, str. Planty 3. — L, PK, kun lokoj, kie ekzistas karbminejoj. Certe respondos.
Klecko (pow. Gniezno). — S-ro Benno Tissler, 20-jara fraŭlo. — Dez. kor., precipe pri lernado de la moderna helena lingvo, kun gefraŭloj en Grekujo.
Nowy-Bytom (G. Sl.) — S-ro Erwin Bober, 23-jara vendisto, Miarki 15. — L, PI, k.ĉ.l. Certe respondos.

PORTUGALUJO.

Vale de Figueira do Ribatejo. — S-ro Antonio Barata, 44-jara tajloro. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

SOVJET-UNIO

Gorkij. — S-ro Sergo Kuroedov, 20-jara elektro-inĝeniero, Avtozavod, Admcentr, dom 2 URZ'a kv. 9. — Dez. kor. k.ĉ.l., kun laboristoj kaj inĝenieroj de aŭtomobilaj uzinoj.
Poltava (Ukrainio). — S-ro V. P. Isaev, instruisto, Kotlarevska 8. — Dez. kor. k.ĉ.l. pri lingvoscienco, literaturo, politiko kaj religio.
Stalingrad. — S-ro K. Ĉencov, Bajkalskaja 44. — Dez. kor. kun foto-amatoroj ĉiulandaj.
Stalingrad. — S-ro A. Nosov, Bajkalskaja 44. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

SVEDUJO

Älvkarleö. — S-ro Gösta Ahlstrand, instruisto. — Dez. kor. pri infan-kaj novelliteraturo de la diversaj landoj. Mi speciale interesiĝas pri tiaj mallongaj fabeloj kaj noveloj, kiuj taŭgas por arta laŭtlegado antaŭpublika. Eventualajn tradukojn el la nacia lingvo esperanten de literaturaĵoj uzeblaj de mi por tiu celo mi pagos. — Mi aĉetas librojn de la balt-germana verkisto Manfred Kyber post oferto (novajn aŭ malnovajn ekzemplerojn). Serĉas biografiajn informojn pri tiu verkisto.
Gävle. — S-ro Henning Drougge, S. Kopparslaggat. 43. — Dez. kor. kun ekstereŭropanoj.
Jädersbruk. — S-ro K. Haglund, instruisto. — Dez. kor. k.ĉ.l.

SVISLANDO

Leysin. — S-ro René Buchenel, 22-jara instruista studento en Ĝenevo, Beau-Site. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Nepre respondos.
Zürich. — S-ro Kurt Wälterlin, 22-jara studento de juro, Goldauerstrasse 32. — Serĉas daŭrajn kaj fervorajn gekorespondantojn de ĉiuj rasoj, religioj, profesioj kaj politikaj vidmanieroj. L k.ĉ.l., p.ĉ.t. Interŝ. PM. Respondo garantiata.

USONO

Los Angeles (Kalifornio). — F-ino Georgia Isabell Kersch, 682 Shato Place. — Dez. kor.
Los Angeles (Kalifornio). — F-ino Mable E. Nesbitt, 2512 S. Rimpaw Blvd. — Dez. kor.

NEDERLANDAJ ESPERANTISTOJ!
Tre utila estas por vi la nova libreto:
VADEMECUM VOOR DEN NEDERLANDSCHEN ESPERANTIST.
Ĝi enhavas ĉiujn informojn kaj adresojn pri la Esp-movado en Nederlando. **Prezo: afrankite 0.55 guld. Aĉetebla ĉe La Praktiko.**

LERNOLIBRO LAŬ REKTA METODO - NUR EN ESPERANTO

Arthur Degen:

Esperanto-Lernolibro

POR POPOLLERNEJOJ KAJ INFANKURSOJ
LAŬ REKTA METODO

verkita laŭ komisio de la Esperanto-Asocio de Germanaj Instruistoj.

Kun multaj — ankaŭ multkoloraj — bildoj de la fama pentroartisto Ernst Kutzer.

Tiu ĉi lernolibro celas vivecon per abunda ilustro, per dialogoj, per kantoj kaj ludoj, per ŝercoj kaj dancoj.

Unua parto: 1-a kaj 2-a lernjaroj. — 1930. — 67 paĝoj. — Kartonita RM 1.80.

Oni pagu per poŝtmandato. Germanoj uzu nian poŝtĉekkonton: Leipzig 52372. Poŝtajn respondkuponojn ni akceptas sur la bazo: 4 respondkuponoj = RM 1.—.

Instruistoj ricevas unu ekzempleron je la favorprezo de RM 1.— = sv. fr. 1.25. — Vi ricevas unu ekzempleron senpage je enkonduko de ĉi tiu nova metodo kaj mendo de almenaŭ dek ekzempleroj.

FERDINAND HIRT & SOHN, Esperanto-Fako, LEIPZIG C 1, Salomonstrasse 15.

Ideala lingva ekzercilo:

La enigmoj

Broŝuro plena de enigmoj por lerni novajn vortojn.
La solvoj entenas interesajn kaj sciindajn frazojn pri Esperanto.

1000 premioj al la solvintoj

Ĉiu deka solvinto ricevas premion.

Opinio pri la broŝuro: *„La solvado de la libreto kaŭzis al mi streĉan, sed tre interesan kaj instruplenan laboron."* (S-ro K. H. en R.)

Prezo: —.10 ned. guld.

Aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

La enigmojn solvis:

Per **dikaj literoj** *ni presas la nomojn de tiuj, kiuj gajnis premion.*

(Daŭrigo) — 271. F-ino E. Vilumson en Riga (Latvujo). — S-ro St. Milla en Kula (Jugosl.). — F-ino M. Verspaille en Aalst (Belg.). — S-ro R. Bernard en Bois-Colombes (Franc.). — S-ro E. Luraschi en Buenos-Aires (Argent.). — S-ro J. S. Mambu en Sambodja (Borneo, Ned. Hindujo). — F-ino S. Bernard en Bois-Colombes (Franc.). — S-ro Tacuru Dôke en Sendai (Japanujo). — S-ro J. Lemière en Bois-Colombes (Franc.). — **280. S-ro Bricaud en Grand-Montrouge (Franc.).** — S-ro A. Guérin en Bois-Colombes (Franc.). — F-ino E. Vérot en St.-Etienne (Franc.). — S-ro Jaffrelot en La Pecq (Franc.). — F-ino D. Streuli en Uetikon a/See (Svis.). — S-ro R. Gazanhes en Carrières (Franc.). — F-ino H. Maripuu en Kuresaare (Estonio). — S-ro O. Rygg en Horten (Norvegujo). — S-ro O. Schojbert en Timiŝurbo (Rumanujo). — S-ro F. Ślogar en Zagreb (Jugoslavio). — **290. S-ro B. Noveljič en Knin (Jugosl.).** — F-ino C. A. Huber en Velp (Nederl.). — S-ro B. Kameneff en Dijon (Franc.). — F-ino E. v. Zuiden en Hoogeveen (Nederl.). — S-ro J. Wakkee en Hago. — S-ro L. W. Stegeman en Meppel (Nederl.). — S-ro A. Quispel en Rotterdam (Nederl.). — S-ro I. Mišin en Moskvo. — S-ro E. L. Southwick en Braintree (Usono). — S-ro M. Carlsen en Lillestrøm (Norvegujo). — **300. S-ro A. Csapó en Timiŝurbo (Rumanujo).**

(Daŭrigo sekvos.)

ELDONAĴOJ DE

Societo Sankta Miĥaelo (S. S. M.)

			afrankite
La Universala Reĝeco de Kristo, enciklika letero, trad. el latina J. Schmidt	fr.	fr.	1.50
Parvuli, de Bessières, trad. el franca Ramo	„	„	1.50
Kiel mortis la unuaj Kristanoj, de Kraszewski, trad. Em. Robert	„	„	1.50
Nova Afriko, de Ch. Monens, trad. de Floriano	„	„	1.50
La Origino de la Religio, ilustrita, originala verko de Jos. Schmidt	„	„	3.—
Klari, de Myriam Catalany, trad. Em. Robert	„	„	8.—
Fabiola, de Kardinalo Wiseman, trad. Ramo	„	„	35.—
Gvidfolio pri Lourdes	„	„	1.—

Mendu kaj pagu ĉe:

F-ino M. Larroche, 55, rue de Vaugirard, Paris-6.

POŜTA ĈEKKONTO: PARIS 738-67.

Esperanto-Presejo PIER WESTERBAAN, Vaillantlaan 523—529, Den Haag (Nederlando).

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 10 (34) ★ Oktobro
1934

Skoltestroj kontraŭ Esperanto.

Dum la somero de ĉi tiu jaro la supera estraro de la tutmonda skolta movado havis kunvenon en la svisa urbo Kandersteg. Ĝi sukcesis enskribi sian nomon en la historion de la mondlingva movado, sed ne sur honora paĝo. Ĉar la ĉefaj skoltoj de la mondo decidis: *malrekomendi al la skoltoj la lernadon de Esperanto!*

Tiu decido estas tre surpriza ne nur por ni, Esperantistoj, sed por ĉiu pensanta homo. Ĉar la tuta mondo konas la skoltismon kiel altspiritan movadon, kiu rajte fieras pri siaj principoj kaj precipe pri tiu punkto de la regularo, kiu proklamas la internacian fratecon. Tial la ekstera publiko prave atendas, ke la skoltaro realigu tiun principon, ekzercante la internacian fratiĝon kaj uzante ĉiun helpan rimedon. Kaj ĉu oni povas diskuti pri tio, ke la komuna lingvo, kaj precipe la neŭtrala Esperanto, estas la plej potenca fratigilo?

Bedaŭrinde ĉi tiu manifestiĝo de la skolta estraro ne estas la sola, malgraŭ la fakto, ke mem lordo Baden Powell, la patro de ĉiuj vivantaj kaj mortintaj skoltoj, iam rekomendis al la skoltoj lerni Esperanton.

Ni memoras, ke antaŭ du jaroj la ĉefa estro de la hungaraj skoltoj faris la jenan deklaron: *„Por la hungaraj skoltoj estas pli utile koni nur sesdek anglajn vortojn, ol paroli Esperante!"*

En la unua momento oni pensas, ke tiaj decidoj kaj deklaroj naskiĝas el nescio kaj stulteco. Sed se oni konsideras, ke tiuj skoltestroj estas kleraj homoj, ĝuantaj ofte tre altan rangon kaj gravan socian pozicion, kaj ke ili sendube konas la respondecon de publika aganto, oni facile havas la tenton serĉi alian kaŭzon.

Ne estas sekreto, ke en pluraj landoj la skoltaro staras sub militista gvido kaj estas kvazaŭ parto de la armeo. Kaj ni scias pri lando, kies skoltaro eĉ forstrekis el sia regularo la „internacian" paragrafon.

Ĉu ni devas konkludi, ke ankaŭ la skoltismo, kiel preskaŭ ĉiu afero en la mondo, estas nur ilo en la manoj de inteligentaj politikistoj, kiuj eĉ kontraŭ la intencoj de la fondinto uzas ĝin por antaŭenŝovi sian lingvon kaj sian imperialismon? Ĉu ni kredu al nia sagaca amiko, kiu diris, ke la skolt-trupoj estas la ovoj, el kiuj naskiĝos la estontaj armeoj?

For la nigran penson! Nia simpatio al la skoltaro igas nin esperi, ke je nia dolora demando venos ĝojiga respondo. Ni esperas, ke forta kaj kuraĝa respondo venos el la vicoj de la simplaj skolt-fratoj mem, kiuj kun pura menso kaj libera aĥimo volas realigi tiun idealon, kiu ilin logis al la skolta flago.

Dum la samaj tagoj, en kiuj la skoltestraro kondamnis Esperanton, nia ŝatata *„Skolta Esperantista Ligo"* ĝuis neforgeseblan internacian tendaron. Ĝia brava laboro kresku kaj al Esperanto gajnu la tutan skoltaron!

Praktiko

GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 2.50 nederl. guldenoj, por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Unu numero kostas -.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., ½ p. 45.-, ¼ p. 25.-, ⅛ p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE LA KONKURSOJ

ATENTU! **Ni rimarkas, ke multaj partoprenantoj de niaj konkursoj ne atentas la regulojn. Ni ofte ricevas plurajn solvojn sur unu paperfolio, aŭ solvojn sen nomo kaj adreso de la solvinto. Ĉe ĉiu konkurso ni atentigas ĉiam pri la ĝeneralaj reguloj kaj ni insiste rekomendas plenumi la regulojn, ĉar la juĝanta komitato ne konsideras la nekonformajn solvojn.** — *La redakcio.*

88-a konkurso. La ĝusto solvo de ĉi tiu silab-enigmo estas: **Ĉiu birdo kantas laŭ sia beko.** La 24 vortoj aparte estas: *Joĉjo, Briko, Pruno, Tablo, Grilo, Lardo, Kudri, Trono, Nukso, Graĵo, Banko, Metro, Pramo, Festo, Bildo, Krano, Laŭro, Masto, Griza, Frago, Sabro, Kreto, Lakto, Broso.* — La 6 premiojn per lotado gajnis la sekvantaj solvintoj: S-ro **A. Codé** en Beverwijk (Nederlando). — S-ro **W. Feenstra** en Assen (Nederlando). — S-ro **F. Fischer** en Vieno (Aŭstrio). — S-ro **J. M. A. Minderhoud** en Haarlem (Nederlando). — S-ro **A. A. Saharov** en Moskvo (Sovjetunio). — F-ino **F. P. Termaat** en Delft (Nederlando).

89-a konkurso. La bela deklaro de Montesquieu, kiu estas tre rekomendinda al la nuntempaj politikistoj, kaj kiu estis kaŝita en ĉi tiu enigmo, jene sonas: **„Se mi konus ion utilan al mia patrujo kaj ĝi montriĝus malutila al Eŭropo kaj al la homaro, mi konsiderus ĝin kiel krimon."** La 18 ŝlosilvortoj aparte estas la jenaj: *Eŭropo, Arĝento, Horloĝo, Inĝeniero, Tulipo, Japanujo. Kulero, Januaro, Limako, Silenti, Maniko, Mustardo, Saliko, Kuliso, Vendredo, Simila, Anemio, Alumeto.* — Precize 100 legantoj de La Praktiko ensendis la ĝustan solvon. La sorto tiel decidis, ke la sekvantaj solvintoj ricevu la 6 promesitajn premiojn: S-ro **Eiichi Imura** en Tokio (Japanujo). — S-ro **Garriguenc** en Vesoul (Francujo). — F-ino **T. v. Hoeven** en Wons (Nederlando). — S-ino **N. Koudijs-Modoo** en Utrecht (Nederlando). — S-ino **Rougier** en Marseille (Francujo). — S-ro **G. B. Rust** en Edgware (Anglujo).

90-a konkurso. La rezulto de ĉi tiu konkurso alportis al la redakcio de La Praktiko grandan trompiĝon. Ni atendis, ke amase venos la bonaj solvoj, ĉar la enigmo estis tiel ege facila. Sed entute nur 10 legantoj ensendis sian solvon aŭ — opinion. El tiuj dek personoj nur ses donis la ĝustan solvon: **APRILA ŜERCO.** Jen la honora listo de la solvintoj: S-ro **J. C. Balke Jr.** en Rotterdam (Nederlando). — S-ro **E. W. v. d. Burgh** en Leiden (Nederlando). — S-ro **E. A. Koot** en Utrecht (Nederlando). — S-ro **L. Martensen** en Hamburg (Germanujo). — S-ro **P. Princis** en Usma (Latvujo). — F-ino **N. Rademaker** en Leiden (Nederlando). — Ni malavare promesis disdoni 13 premiojn, sed ni povas disdoni nur ses, al la cititaj solvintoj. Plua persono, f-ino **Ç. E. v. Voorthuijsen** en Leiden (Nederlando), ensendis kiel solvon: „Apriltrompo". Kvankam ĝi estas nur unu vorto, tamen ĝi estas kunmetita el du, kaj konsistas el 11 literoj. Pro tio ni akceptas ĝin kiel bonan solvon, kaj ĝia ensendintino ricevas la 7-an premion. La ceteraj tri personoj skribis, ke ili vane klopodis solvi la enigmon. Unu el ili, f-ino **F. Lörtscher** en Herisau (Svislando), skribis: *„Mi trastudis la tutan vortaron, sed bedaŭrinde mi ne sukcesis."* Ni supozas, ke el niaj legantoj ankoraŭ multaj penadis por solvi la enigmon, sed ne sukcesinte ili ne kuraĝis tion konfesi al la severa redakcio. Al f-ino Lörtscher ni donas la 8-an premion. Ŝi meritas ĝin, ĉar ŝi „trastudis la tutan vortaron" kaj kuraĝis konfesi sian malsukceson.

91-a konkurso. La silab-enigmon de ĉi tiu konkurso bone solvis 78 personoj. La grava admono, kiun la dikaj kvadratetoj de la figuro donis, estas: **Por la paco laboru pace!** La 19 vortoj aparte estas: *Apoteko, Stomako, Ameriko, Heroldo, Dek-kvar, Skulpti, Galanto, Leciono, Korniko, Miliono, Lavango, Algebro, Dudek-ok, Ponardo, Kukurbo, Jupitro, Januaro, Lacerto, Torento.* — Per lotado la 5 premiojn ricevis la jenaj solvintoj: S-ro **V. Baltrus** en Joniškelis (Litovio). — S-ro **A. Ebbinge** en Hengelo-O. (Nederlando). — S-ro **Fang Ren Chyi** en Shanghai (Ĉinujo). — S-ro **V. Latte Vanweddingen** en Helmond (Nederlando). — S-ro **A. Lechelle** en Valenciennes (Francujo).

ATENTU! **Se vi volas sendi monon al La Praktiko, bonvolu observi la sekvantajn:**

La monon oni povas sendi per *poŝtĉekkonto* (Wien A-156933, Praha 500362, Kopenhago 34941, Berlin 129527, Budapest 13201, Zagreb 41345, Riga 4870, Den Haag 162626, Warszawa 190203, Stockholm 74126, Bern III. 6761), *per poŝtmandato,* per *bankĉeko* aŭ per *papermono* en letero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj de la sube nomitaj landoj, kalkulante la valoron laŭ la suba tabelo:

1.— ned. guldeno valoras en:

Aŭstrio 3.70 ŝil., **Belgujo** 15 fr., **Britujo** 2 ŝil. 10 p., **Bulgarujo** 58 lev., **Ĉeĥoslovakujo** 17 kr., **Danujo** 3.10 kr., **Estonio** 2.60 kr., **Francujo** 10.35 fr., **Germanujo** 1.85 m., **Hispanujo** 5 pes., **Hungarujo** 3.30 p., **Italujo** 8 lir., **Jugoslavio** 30 din., **Latvujo** 2.20 l., **Norvegujo** 2.80 kr., **Polujo** 3.70 zl., **Rumanujo** 75 l., **Svedujo** 2.70 kr., **Svisujo** 2.10 fr.

Pro la freneza dancado de la mon-valoroj ĉi tiu tabelo validas nur ĝis la apero de nia sekvanta numero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtaj respondkuponoj. 1 kupono = —.15 ned. guld.

POR DAŬRIGAJ KURSOJ

KAJ KLUB-KUNVENOJ

bonegaj lerniloj estas la ekzercaj folioj de la Cseh-Instituto pri la malfacilaj punktoj de nia gramatiko. Jen la listo de la diversaj taskoj:

N-ro 174	**Somera vojaĝo.** (La akuzativo.) Unu ekz.	—.02	guld.
„ 175	**La potenco de la virino.** (Aktiva participo.)	—.02	„
„ 176	**La ĝenia ideo.** (Tra, trans.)	—.02	„
„ 177	**La du komercistoj.** (De, da.)	—.02	„
„ 178	**La du biletoj.** (Por, pro, per, pri)	—.02	„
„ 179	**La du profesoroj.** (Si, sia.)	—.02	„
„ 180	**La jubilea libertempo.** (Tio, tiu.)	—.02	„
„ 181	**La karaj parencoj.** (La prepozicioj.)	—.02	„
„ 182	**La surprizo.** (Pasiva participo.)	—.02	„
„ 183	**Kredo helpas.** (La artikolo „la".)	—.02	„
„ 184	**La benko.** (Aktiva participo.)	—.02	„
„ 185	**La danĝeraj bestoj.** (Se, kiam.)	—.02	„
„ 186	**La sorto mokas.** (Kun, per.)	—.02	„

La prezoj ne entenas la afrankon.
Ĉe mendo sufiĉas citi la numerojn de la taskoj.
(Kopirajto rezervita!)

Specimena kolekto, entenanta po unu ekzercan taskon, kostas afrankite —.30 ned. guld. (2 resp.-kup.).

Mendu ĉe LA PRAKTIKO.

Novaĵo! *Por la ekzamenoj!*

Ĵus aperis la libro:

La Esperanta Literaturo

Demandaro
kaj resumoj de originalaj verkoj.

Tre utila libro por ĉiu Esperantisto, precipe por tiuj, kiuj preparas sin al ekzamenoj.

La aŭtoro, s-ro *M. de Waard,* estas konata Esperanto-instruisto. Dum la lasta jaro li faris bonegajn prelegojn pri nia literaturo en diversaj urboj de Nederlando.

La 64-paĝa libro entenas praktike aranĝitan demandaron kaj enhav-resumojn de multaj originalaj Esperanto-verkoj.

Prezo: —.75 ned. guld.

Mendu ĉe la eldonejo:

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto
Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando.

AL NIAJ LEGANTOJ!

Ni publikigas ĉi tie la plej novan ĉapitron de la historio de la Esperanto-movado. Ĝi estas skribita de s-ro inĝ. J. R. G. Isbrücker, la nova vicprezidanto de U.E.A., aŭtoro de la ŝatata lernolibro: „HISTORIO KAJ ORGANIZO DE LA ESPERANTO-MOVADO". Ĉi tiu ĉapitro estas aldono al la 13-a paragrafo de la citita libro. Publikigante ĝin ni deziras ankaŭ fari komplezon al tiuj el niaj legantoj, kiuj aĉetis la libron. Ili povas nun eltranĉi ĉi tiun ĉapitron kaj enmeti ĝin en la libron, kiel kompletigon.

La redakcio.

13/a. PRI LA ORGANIZA PROBLEMO POST LA KONGRESO DE PARIZO.

Dum du jaroj la konsekvencoj de la decidoj, faritaj en Parizo, maltrankviligis la animojn en la Esperanta movado kaj ofte minacis detrui ĝian internan pacon.

La Komisiono, elektita por la ellaboro de nova Statuto, en kiu *U. E. A.* rifuzis partopreni, finis sian laboron en Novembro 1932 kaj proponis la fondon de *„Universala Federacio Esperantista" (U. F. E.)* Tiu Federacio estus organizaĵo formota de la *Naciaj Asocioj*, kiu samtempe transprenus la taskojn kaj grandparte la organizan sistemon de *U. E. A.* kaj do ne lasus lokon al *U. E. A.* kiel memstara organizaĵo. La *U. F. E.*, formale starigita de la komenco de 1933, havis ne tre prosperan kaj mallongan vivon. *U. E. A.* rifuzis partopreni en ĝi; granda parto de la *Naciaj Asocioj* restis firme aŭ provizore ekster ĝi kaj nur relative malmultaj Societoj, sub la gvido de la ĝisnuna *I. C. K.*, akceptis la novan organizan formon. En kunveno de *U. F. E.* en *Genève* en Majo 1933 partoprenis nur tre malmultaj reprezentantoj de landaj Asocioj.

La danĝero, ke tiel la movado disfalos en du konkurencajn kaj eble malamikajn partiojn, grupiĝantajn ĉirkaŭ la malnova *U. E. A.* kaj la nova U. F. E., estis evidenta. Feliĉe dum la sama kunveno en *Genève* la reprezentantoj de *U. F. E.* trovis okazon por interparoli kun la gvidantoj de U. E. A. kaj per bona volo de ambaŭ flankoj oni venis al *„Plano de Genève"*, kiu almenaŭ promesis pli bonan ŝancon al harmonia solvo de la problemo.

Kunvenis la *Kongreso de Kolonjo* en Aŭgusto 1933 kaj kunsidis la reprezentantoj de *Naciaj Asocioj* kaj de *U. E. A.* por ellabori definitivan interkonsenton. En multaj longaj kunvenoj, alte en la turo de la kongresa konstruaĵo, okazis la malfacilaj kaj penplenaj intertraktoj, sed fine, dum la ferma kunsido de la Kongreso, la reprezentantoj povis solene subskribi protokolon, kiel resumon de la faritaj decidoj, kiu ricevis la nomon de *„Interkonsento de Kolonjo"*.

La esenca enhavo de la Interkonsento estas la jena:

U. E. A. estas la tutmonda organizaĵo de la Esperanta movado. Al ĝi la *Naciaj Asocioj* povas aligi siajn membrojn kolektive por malalta kotizo de duona svisa franko. Flanke de tiu „simpla" membreco, la *Naciaj Asocioj* akcelos la aliĝon de „aktivaj" membroj de *U. E. A.*, laŭ la kondiĉoj de la ĝisnunaj ordinaraj membroj de *U. E. A.* La gvidado de la nova *U. E. A.* estos en la manoj de *Internacia Komitato*, konsistanta el:

a) membroj, elektotaj de la *Naciaj Asocioj*, aligintaj siajn membrojn;

b) membroj, elektotaj de la delegitoj en aliaj landoj;

c) membroj, alelektotaj de la nomitaj du kategorioj, ĝis triono de ilia propra nombro.

Centra Estraro, elektota de la Komitato, funkcios kiel administra estraro.

Dum la Kongresoj okazos kunsidoj de la *„Konsilantaro de la Esperanto Movado"*, por aŭskulti raportojn k.t.p. Ĝi konsistos el la *Komitatanoj*, la *Ĉefdelegitoj*, la *Honoraj Membroj*, la *Dumvivaj Membroj* k.t.p.

Ŝajnis, ke la Kolonja Interkonsento malfermos la vojon al pli trankvila estonteco en la movado, sed la faktoj ne realigis tiun esperon. *U. E. A.* adaptis sian Statuton al la nova situacio kaj la Estraro preparis skriban voĉdonon por la elektoj de la Komitatanoj de la kategorio c) kaj de la Centra Estraro. Sed denove venis opozicio, ĉefe de la franca nacia Societo, kiu postulis ripeton de la voĉdonado en la *Kongreso de Stockholm* anstataŭ la skribaj elektoj. Polemikoj en cirkuleroj kaj gazetoj anoncis novajn malfacilaĵojn dum la estonta Kongreso.

En Aŭgusto 1934 pli ol 2000 partoprenantoj en la *Kongreso de Stockholm* dum krizaj ekonomiaj cirkonstancoj denove donis belan pruvon pri la kreskanta forto de la Esperanta movado. Sed en la Komitataj kunvenoj ree naskiĝis la internaj konfliktoj. Okazis la elektoj por la alelektotaj membroj de la Komitato, kiuj donis tute alian rezultaton ol la antaŭaj skribaj voĉdonoj. *Karsch*, la ĝisnuna vicprezidanto de *U. E. A.*, Dro *Privat*, la redaktoro de la gazeto Esperanto kaj *Andreo Cseh*, ĉiuj de longa tempo anoj de la Komitato, ricevis la plej malmultajn voĉojn kaj pro tio ne estis reelektataj en la Komitato. La Prezidanto de *U. E. A.*, *Stettler*, trovis en tio kaŭzon por demeti la prezidantecon kaj forlasis la salonon. Lin sekvis *Karsch* kaj *Hans Jakob*, direktoro de *U. E. A.* En la kongresa kunsido, kie tiuj decidoj estis konigataj, ili kompreneble vekis grandan konsterniĝon. Speciala kunveno, kunvokita por klarigi kaj diskuti la situacion, vidis grandan tumulton, aŭdis ekscititajn kaj eĉ ofendajn vortojn. Nur kun granda peno oni sukcesis trankviligi la animojn kaj revoki la deziron al paca kunlaboro.

Dume la nova estraro de *U. E. A.*, sub prezido de generalo *Bastien*, staras antaŭ grandaj malfacilaĵoj, kaŭzataj de la malbonaj financaj cirkonstancoj de *U. E. A.* La deficitoj de la lastaj jaroj kaj la gravaj monperdoj pro la kurzfaloj elĉerpis ĝian tutan kapitalon kaj nur per seriozaj ŝparoj oni povos restarigi la ekvilibron en ĝia budĝeto.

Kiel lokoj por la estontaj kongresoj estis fiksataj:

27. Romo 1935
28. Vieno 1936

kaj eble sekvos:

29. Varŝavo 1937

Por la jaro 1934 estas ankoraŭ menciinda la *Internacia Konferenco: Esperanto en la lernejon kaj la praktikon*, kiu okazis en *Vieno* dum la Pentekostaj tagoj. Rimarkinda estas la oficiala rekono, kiun ĝi spertis flanke de la aŭtoritatoj en Aŭstrujo.

La portebla

TORPEDO

skribmaŝino
estas juvelo inter la skribmaŝinoj.

Liverata ankaŭ kun Esperanto-klavaro.

Petu sendevigan demonstracion!

Importisto por Nederlando:

OSCAR MARKX, Nic. Maesstraat 97, Amsterdam-Z.

Telefono: 22059.

AL LA VENKO!

PETO. **Kara leganto! Bonvolu ĉi tiujn gravajn informojn traduki en vian nacian lingvon kaj transdoni ilin al la redakcioj de la ĵurnaloj en via urbo, por publikigo. Per tio vi faras por Esperanto tre valoran propagandan servon.**

299. **Esperanto-kurso per radio.** — La ĉeĥoslovakaj radio-stacioj de Brno, Praha (Straŝnice), Koŝice kaj Moravská-Ostrava elsendos kun komenco de 2-Oktobro ĉiumarde kaj ĉiuvendrede Esperanto-kurson por komencantoj. La kurso daŭros dum du monatoj kaj estos aŭdebla dum la vesperaj horoj 19.15—19.30 laŭ MET.

300. **Fervojista gazeto por Esperanto.** — La organo de la *Nederlanda Centra Ligo de Fervojistoj, Tramistoj kaj Personaro de A.T.O. kaj Van Gend & Loos* komencis la publikigon de artikol-serio por veki intereson ĉe sia membraro pri la mondlingva movado kaj Esperanto. — *(La adreso de la redakcio: Stationsstraat 22 en Utrecht.)*

301. **Esperantista Skolta Tendaro.** — Dum la 16—31 de Julio okazis la 12-a internacia tendaro de Skolta Esperantista Ligo, organizita per la Esperanto-fako de la Centro de Slovakaj Katolikaj Skoltoj. La loko de la grandsukcesa tendaro estis sur la monto Kordiky apud Banska Bystrica en Slovakio.

302. **La Spiritista Mondkongreso por Esperanto.** — La Internacia Spiritista Kongreso, okazinta en la urbo Barcelono, ĉefurbo de Katalunujo, en Septembro de ĉi tiu jaro, unuanime voĉdonis rezolucion, kiu rekomendas la lernadon de Esperanto kaj ĝian uzadon en la internacia interrilatado kaj kongresoj de la spiritistoj.

303. **La foiro de Reichenberg uzas Esperanton.** — Dum la lasta foiro de Reichenberg (Ĉeĥoslovakio) la lingvo Esperanto estis multe uzata. Funkciis aparta Esperanto-fako, kiu per informado kaj tradukado servis al la eksterlandaj vizitantoj. Sur la foira tereno kaj en la foira katalogo multaj surskriboj estis faritaj ankaŭ en Esperanto. La foiro de Reichenberg jam de 15 jaroj uzas Esperanton kun kreskanta sukceso.

304. **Fabriko uzas Esperanton.** — La firmo *„Fotochema"* en Hradec-Králové (Ĉeĥoslovakio), fabriko de fotografaj paperoj, plakoj kaj filmoj, aperigis Esperant-lingvan prospekton pri siaj produktaĵoj, konataj sub la marko *„Foma"*.

305. **Fondiĝis societo por Esperante parolantaj filmoj.** — Dum la monato Aŭgusto fondiĝis en Stokholmo la *„Societo Mondo-Filmo"*, kies celo estas produkti Esperante parolantajn filmojn, fari Esperanto-sinkronizon por alilingvaj filmoj, kaj disvastigi tiajn filmojn tra la mondo. La film-entrepreno jam ligis al si la konatan film-aŭtoron Jean Forge-Fethke kaj kontraktis kun la mondfama film-reĝisoro Dagobert Kossmann. La estraro de la akcia societo estas: s-roj E. Malmgren, Hj. Lindstedt kaj H. Nordkvist en Stokholmo. — *(Interesiĝantoj povas sin turni al la prezidanto: s-ro E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stokholmo.)*

306. **Internacia ĵurnalo enkondukis Esperanton.** — La semajna ĵurnalo *„European Herald"*, eldonata en Londono kaj ĝis nun redaktita en la lingvoj angla, germana, franca, hispana kaj itala, decidis aldoni Esperanton al la uzataj lingvoj. La Esperanto-lingva parto komenciĝis kun la numero de la 28-a de Septembro 1934. La gazeto estas vendata en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo. — *(La Esperanto-parton de la gazeto oni daŭrigos nur, se montriĝos intereso ĉe la Esperantistaro. Se la intereso estos granda, oni pligrandigos la Esperanto-parton. Oni povas ricevi specimenon kontraŭ unu respondkupono. Adreso: „European Herald", 110 Fleet Street, London E.C.4. La Esperantan parton redaktas s-ro Fred Wadham, L.K., brita ĉefdelegito de U.E.A.:)*

307. **Esperanto-horoj ĉe la ĉeĥoslovakaj radio-stacioj.** — La radio-stacio de Brno elsendos ankaŭ en ĉi tiu sezono per ĉiuj ĉeĥoslovakaj sendostacioj regule ĉiumonate Esperanto-horojn. La enhavo estos parte amuza, parte informa kaj instrua, kun partopreno de eminentaj ĉeĥoslovakaj scienculoj kaj artistoj. La Esperanto-horoj okazos en ĉiu unua merkredo de la monato vespere je la 22.15 h. laŭ MET.

308. **Elektra baterio kun la nomo „Esperanto".** — La grava ĉeĥoslovaka firmo Pála en Brno fabrikas novan elektran baterion, al kiu ĝi donis la nomon *„Esperanto-Palaba"*. Ankaŭ la klariga teksto sur la baterio estas Esperanto-lingva.

309. **Gravaj komercaj firmoj uzas Esperanton.** — Okaze de la nunjara universala Esperanto-kongreso en Stokholmo la jenaj gravaj firmoj eldonis Esperanto-lingvan prospekton: *A. S. Nordiska Kompaniet* en Stokholmo (la plej granda magazeno de Skandinavio), *Akcia Societo „Real"* en Stokholmo (vendejo de skribmaŝinoj) kaj *Tekn. Fabriko F. Ahlgren* en Gefle (Svedujo), fabrikanta la mondkonatan brustpastelon „Läkerol".

310. **Esperanta libro tradukita en 12 lingvojn.** — Grandan sukceson atingis la libro *„Fine mi komprenas la radion"*, radio-teknika verko de inĝ. Eŭgeno Aisberg en Parizo. El la Esperanto-lingva originalo oni tradukis ĝin en la lingvojn bulgara, ĉeĥa, estona, franca, germana, greka, hungara, itala, latva, rumana, rusa kaj slovena.

Granda propagand-vespero
por Esperanto en Hago

la 17-an de Oktobro vesp. je la 8-a horo, en „Diligentia", Lange Voorhout 5. Enirprezo 25 c.

Parolos:

Mr. Dr. S. J. R. de Monchy, urbestro de Hago.

Ir. M. H. Damme, ĝen. direktoro de la Nederlanda Poŝto, Telegr. kaj Telef.

S-ro E. Asai, prof. de filologio ĉe la Universitato de Osaka (Japanujo).

Andreo Cseh donos Esperanto-lecionon.

Venu kaj venigu viajn ne-esp-istajn konatojn, precipe la malamikojn de Esperanto!

LINGVAJ VESPEROJ
en Hago.

Speciala kurso de Andreo Cseh por teoria kaj praktika perfektiĝo en Esperanto.

(Analizo kaj kritiko de tekstoj, pritraktado de gramatikaj problemoj, priparolo de demandoj pri la historio, organizo kaj literaturo de Esperanto, respondo je demandoj, k.t.p.)

La kurso daŭros de Oktobro ĝis Aprilo, en **ĉiu vendredo vespere je la 8-a horo,** en la kurs-salono de la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, **Riouwstraat 172.**

Oni povas aliĝi, prenante karton por 12 vesperoj, prezo 5.50 guld. *(La karto validas por 12 libere elektotaj vesperoj, ankaŭ ne sinsekvaj. La karto estas transdonebla al alia persono.)*

La komenco de la kurso: la 12-an de Oktobro.

la mondo ridas

Miskompreno.

Edzino: Rigardu, Arturo, kia modela paro loĝas en la domo kontraŭ ni! La edzo ĉiutage jam ĉe la pordo kisas sian edzinon, kiam li hejmenvenas. Kial vi ne faras same?

Edzo: Kion vi pensas? Mi ja tute ne konas tiun virinon.

(Svenska Dagbladet)

Nokta marĉando.

— Monon aŭ vivon!

— Monon mi ne havas, sed en prenu ĉi tiun lotbileton, per tiu vi povas gajni eĉ la ĉefpremion.

— Kaj se mi ne gajnos?

— Tiam notu mian adreson kaj venu inter la horoj tria kaj kvara, kaj vi ricevos komenson.

(Ric et Rac)

Amikinoj renkontiĝas.

— Preskaŭ nekredeble, kara Helenjo, ke jam de kvin jaroj ni ne revidis nin!

— Vere, ankaŭ mi ne renonus vin, se mi ne vidus sur vi tiun belegan mantelon, kiun ni portis ankaŭ tiam!

(Answers)

Agrabla interkonatiĝo.

— Tre agrable, sinjoro Smit. Mi ofte aŭdis pri vi.

— Pardonu, sed neniu homo povas ion pruvi.

Minaco.

— Nur tion mi volas ankoraŭ diri al vi, sinjoro trinkejmastro, ke se vi rifuzos al mi la manon de via filino, pro la malĝojego mi komencos drinki, ... sed ne ĉe vi!

(Fliegende Blätter)

Rapide respondas.

Knabineto (tenante en la mano bankbileton): Sinjoro butikisto, ĉu mia panjo ŝuldas al vi dek ŝilingojn?

Butikisto: Jes, certe! ... Sed diru nur, kiu estas via patrino?

(Tit Bits)



La fanatikulo.

— Portu unu litron da vino, sed antaŭe bone lavu la botelon. Ĉar akvo estis en ĝi.

(Il Travaso)

Ŝanĝiĝas la tempoj.

— Kiam ni estis novaj geedzoj, ĉiumatene per kiso mi vekis mian edzon.

— Kaj nun?

— Li aĉetis vekhorloĝon.

Bona rekomendo.

— Mi venis por vidi la gardhundon, kiun vi rekomendis al mi por aĉeti.

— Mi bedaŭras, sinjoro, sed hieraŭ nokte oni forŝtelis ĝin.

Difinoj.

— Patro, kio estas „debitoro"?

— Estas homo, kiu ŝuldas monon al alia homo.

— Kaj kio estas „kreditoro"?

— Iu, kiu kredas, ke li ricevos la monon.

(Vårt Hem)

La malbonaĵo.

— Terure! La portreto de via fianĉo estas en la gazetoj, la polico lin serĉas. Kara amikino, mi treege kompatas vin!

— Jes, ankaŭ mi ekkoleris, kiam mi ekvidis tiun bildon... Ĝi estas fotografaĵo de antaŭ tri jaroj. En la vero li aspektas multe pli bone.

(Passing Show)

Ŝparado.

— Manjo, vi estas terura persono. Jam plurfoje mi diris al vi, ke oni devas esti ŝparema, kaj vi denove bruligas samtempe du kandelojn.

— Sed sinjorino, ĝi estas nur unu kandelo! Mi tranĉis ĝin en du pecojn!

(Answers)

La kaŭzo.

— Sinjoro advokato, mi volas disiĝi de mia edzino.

— Bone! Kaj pro kiu kaŭzo?

— Ĉar ni estas geedzoj!

(London Opinion)

NOVAJ LIBROJ

K. R. C. Sturmer: EL LA NOTLIBRO DE PRAKTIKA ESPERANTISTO. — Aranĝis por presO: V. Bleier, K. Kalocsay kaj L. Totsche. 125 paĝoj. Prezo: bind. 4 sv.fr., broŝ. 2.50 sv.fr. Eldonis: Literatura Mondo en Budapest. — Nia konata angla samideano s-ro Sturmer dum la astaj jaroj kolektis en sia notlibro multajn interesajn rimarkojn kaj opiniojn pri nia lingvo, nia movado kaj pri diversaj aferoj kaj okazaĵoj rekontataj en la vivo. Ĉi tiu nova libro entenas elekton el tiuj notoj. Sendube ĉiu samideano kun aparta intereso legos la libron, ĉar en ĝi oni retrovas multajn temojn, kiuj okupas la Esperantistan publikon. La libron ornamas arta kovrilo.

Antoni Slonimski: MIA VOJAĜO EN SOVETIO. El la pola originalo tradukis S. Grenkamp-Kornfeld. Formato 13 × 20 cm., 144 paĝoj. Kliŝita kovrilo. Prezo: bind. 4.20 sv.fr., broŝ. 2.70 sv.fr. plus 10 % por sendkostoj. Eldonis: Literatura Mondo, Mester-u. 53.V.5. en Budapest. — La libro entenas tre interesan vojaĝpriskribon de la eminenta pola verkisto kaj ĵurnalisto Slonimski, kiu antaŭ kelkaj jaroj faris longan mondvojaĝon, kaj atente observis la vivon en la nuntempa Rusujo. En la bonega traduko de Grenkamp la libro prezentas instruriĉan legaĵon, kiu katenas la intereson de ĉiu scivola nuntempano. Ĝi estas la kvina libro de AELA por la jaro 1934.

Charles Dickens: LA VIVO DE NIA SINJORO JESUO. El la angla lingvo tradukis Montagu C. Butler. 118 paĝoj, formato 18 × 24 cm. Luksa eldonaĵo, tole bindita. Prezo 6 ŝil., afranko 6 pencoj. Eldonis: The Esperanto Publishing Company Ltd., 142 High Holborn, Londono. — Estis por la tuta mondo sensacia novaĵo, ke la fama angla verkisto Dickens postlasis manuskripton pri la vivo de Jesuo. Li verkis ĝin speciale por siaj infanoj kaj ne intencis ĝin eldoni. En ĉi tiu jaro la familio de Dickens permesis la publikigon kaj la libro aperis en la angla lingvo kaj Esperanto. La Esperanta eldono aperas en luksa eksteraĵo, ilustrita per bildoj de famaj artistoj (Hunt, Rafael, Jalabert, Leonardo da Vinci k.a.) kaj ornamita per faksimilo de unu paĝo el la originala manuskripto. La tradukon atentoplene plenumis nia eminenta samideano M. C. Butler, redaktoro de „La Brita Esperantisto". La impona libro tre taŭgas kiel legaĵo kaj donac-objekto.

Kan Kikuĉi: AMO DE TOOJUUROO. El la japana lingvo tradukis Joŝiŝi Ŝimomura. 88 paĝoj, formato 12 × 20 cm. Prezo: 1.20 sv.fr. plus 10 % por sendkostoj. Eldonis: Literatura Mondo en Budapest (Hungarujo). — La libro entenas tri dramojn de eminenta japana verkisto. Dank' al nia mondlingvo ni povas ĝui ĉi tiujn perlojn de la orienta literaturo. La valoron de la libro pliigas, ke la tradukon faris naciano de la originala lingvo, kiu kapablis en la traduko redoni la ĝustan sencon kaj spiriton de la originalo. La titoloj de la tri dramoj estas: *Amo de Toojuuroo, Pli bone ol venĝi* kaj *La miraklo.*

Theodor Storm: IMENLAGO. El la germana lingvo tradukis Alfred Bader, kun ĉinlingvaj klarigoj de Cajfonso. 80 paĝoj, formato 13 × 19 cm. Prezo: 0.90 sv.fr. (3 respondkuponoj). Eldonis: Ĉina Mondlingva Librejo, 15 Shang Sieh chiai, Peiping (Ĉinujo). — La konata novelo, kiu jam aperis en la jaro 1907 ĉe la eldonejo Hachette en Parizo, ĵus estis denove eldonata en Ĉinujo. La tekston akompanas ĉinlingvaj klarigoj de gramatikaĵoj. Estas ĝojige vidi, ke en Ĉinujo nia lingvo progresas.

Olive Schreiner: ROMANO PRI AFRIKA BIENO. El la angla originalo tradukis Stephen A. Andrew. 270 paĝoj, formato 13 × 19 cm. Prezoj: bind. 6 ŝil., broŝ. 4 ŝ. 6 p.; afranko 6 p. Eldonis: The Esperanto Publishing Company Ltd., 142 High Holborn, Londono. — La klera aŭtorino prezentas al ni en ĉi tiu multe legata verko interesan romanon, kiu ludas en Sud-Afriko. Ni vidas la vivon de la buroj kaj negroj, kaj ni ĝuas delikatan historion kun multa filozofia enhavo. La libro, kiu

laŭ la deklaro de pluraj gravuloj de la brita historio apartenas al la ĉefverkoj de la mondliteraturo, certe estos ŝatata legaĵo por ĉiu Esperantisto, sed precipe por niaj nederlandaj samideanoj, ĉar en la herooj de la romano ili retrovas samnacianojn, kiuj iam elmigris el Eŭropo por fondi novan hejmon.

A. G. J. van Straaten: EL DIVERSAJ LINGVOJ. Esperanto leer-leesboek. 180 paĝoj, formato 16 × 24 cm. Prezo 1.50 guld. plus sendkosto. Eldonis: Centra Esperanta Propaganda Komisiono en Nijmegen (Nederlando). — En ĉi tiu granda kaj dika libro nia konata nederlanda samideano, s-ro v. Straaten, gvidanto de la nederlanda skriba Esperanto-kurso kaj kompilinto de la granda Esperanto-vortaro por nederlandanoj, kolektis plurajn literaturajn tekstojn kaj aldonis al ili gramatikajn klarigojn, tiel, ke la libro servas samtempe kiel lernolibro de Esperanto. La verkon kompletigas gramatikaj ĉapitroj kaj la listo de ĉiuj vortoj troveblaj en la tekstoj. Partoprenantoj de la skriba kurso ricevas la libron favorpreze (por 1.25 guld.).

Upton Sinclair: JIMMIE HIGGINS. Tradukis el la angla originalo Karl Fröding. 372 paĝoj. Formato 13 × 19 cm. Prezo: broŝ. 22.50 fr.fr., bind. 29 fr.fr. plus 10% sendkosto. Eldonis: SAT, 67 avenue Gambetta, Paris-20. — La bele presita dika volumo entenas la faman romanon de la konata amerika aŭtoro pri laboristo kaj liaj travivaĵoj tra la diversaj okazaĵoj en la moderna laborista vivo. La bone tradukita libro estas interesa kaj instrua legaĵo por ĉiu, kiu interesiĝas pri la aferoj de la nuna epoko. — La libro estas aĉetebla ankaŭ ĉe La Praktiko. Prezoj kun sendkosto: broŝ. 2.50, bind. 3.20 guld.

Jaroslav Haŝek: LA TRAVIVAĴOJ DE LA BRAVA SOLDATO ŜVEJK DUM LA MONDMILITO. El la ĉeĥa originalo tradukis Jozefo Ŝtadler. 152 paĝoj. Formato 13 × 19 cm. Prezo: broŝ. 12.50 fr.fr., bind. 17.50 fr.fr. plus 20% por sendkosto. Eldonis: SAT, 67 avenue Gambetta, Paris-20. — Ĉi tiu bela libro entenas la unuajn dek ĉapitrojn de la famiĝinta verko, kiu donas impresan spegulbildon pri ĉio, kio okazis en la dummilita vivo. — Mendebla ĉe La Praktiko, prezo 1.40 resp. 1.95 guld.

LINGVA KVARONHORO. Lingvaj problemoj klarigitaj de Paul Nylén. En sveda lingvo. 47 paĝoj. Prezo 1 sveda krono. Eldonis: Eldona Societo Esperanto, Stokholmo. — Ĉi tiu libreto entenas tiujn lingvajn klarigojn, kiujn s-ro Paul Nylén, vicprezidanto de la Esp. Akademio, donis dum la lastaj jaroj en la Stokholma Esperanto-Grupo, en la kadro de la tie aranĝataj „lingvaj kvaronhoroj". La libreto estas tre utila por tiuj, kiuj serioze studas Esperanton, kaj precipe al la kursgvidantoj.

Antono Hekler: ARTHISTORIO, I. La Esperanto-eldonon prilaboris A. Kampiss. Tradukis K. Kalocsay. 100 tekstopaĝoj kaj 112 bildopaĝoj kun 146 bildoj. Prezo: bind. 15 sv.fr., broŝ. 13 sv.fr. Eldonis: Literatura Mondo en Budapest. — Per ĉi tiu bela libro, aperinta en la serio de AELA por 1934, la fekunda eldonejo de Literatura Mondo komencas la aperigon de priarta serio en la programo de AELA. La riĉe ilustrita libro entenas la valorplenan verkon de A. Hekler, profesoro de arthistorio ĉe la universitato de Budapest. Ĉi tiu unua volumo pritraktas la arton eŭropan kaj tiujn malnovepokajn artojn, kiuj estas ĝiaj rektliniaj antaŭuloj (roma, greka, persa k.t.p.), ĝis la renesanco. La poste aperonta dua volumo enhavos la arthistorion de la renesanco ĝis la nuna tempo. La nomo de la tradukinto estas garantio pri bonega lingvo kaj stilo. La eldonejo per ĉi tiu eldonaĵo alportas rimarkindan riĉigon al nia movado.

J. B. B. Dufrenne: DE P.T.T.-ESPERANTIST. Lernolibro de Esperanto por nederlandaj P.T.T.-istoj. 102 paĝoj. Prezo 0.50 guld. Eldonis: C.B.-P.T.T. (Centra Ligo de la Nederlanda P.T.T.-personaro) en Hago, Marconistraat 96, — La nova lernolibro estas represo de la kurso, kiu aperis en la fak-organo de la nomita Ligo dum la lastaj jaroj. Ĉar la kurso estis verkata speciale por poŝtoficistoj, ĝi entenas la fak-esprimojn kaj multan ekzercan materialon konforman al la bezonoj de poŝtistoj.

Rob. Langenegger: 12 POEMOJ. — 14-paĝa mimeografita libro, kiu entenas 12 lerte verkitajn poemojn de nia samideano R. Langenegger, kiujn li dediĉis al sia iama Esperanto-instruanto s-ro H. Kürsteiner en Sankt-Gallen (Svislando). La libreto estas ricevebla ĉe la aŭtoro, Sömmerlistrasse 4.a. en Sankt-Gallen.

W. Sieroszewski: MARŜALO JÓZEF PILSUDSKI. Biografio. 53 paĝoj, formato 15 × 21 cm. Eldonis Pola Esperanto-Asocio. — Kun arta gusto eldonita bela libro pri la granda pola gvidanto Pilsudski. La aŭtoro estas prezidanto de la Pola Literatura Akademio. La tradukon faris kaj komentariojn aldonis nia fervora pola samideano s-ro Mgr. Fil. B. Strelczyk.

Josef Zauner: LA EŬROPANISMO. 32 paĝoj. Prezo —.30 sv. fr. Eldonis: „UŜE-EĤO" en Timiŝoara, Strada Lonovici 4, Rumanujo. — La redaktoro de la bonega gazeto „UŜE-EĤO" en ĉi tiu libreto klarigas la programon de la „Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo", en praktika formo de demandoj kaj respondoj. La enhavon ilustras kelkaj interesaj bildoj pri la nuntempa politika kaj ekonomia stato de la malsana Eŭropo.

M. Rollet de l'Isle: L'INITIATION A L'ESPERANTO. 2-a eldono. 77 paĝoj. Eldonis: Belga Esperanto-Instituto, 11 rue du Petit-Chien, Antverpeno (Belgujo). — La klera prezidanto de la Esperantista Akademio en ĉi tiu libro donas altnivelan kaj multflankan informaron pri nia lingvo kaj movado. Apartaj ĉapitroj en konvinka maniero klarigas la necesecon, utilecon, superecon de Esperanto, kaj la historia parto tre detale konigas ĉion sciindan pri la ĝisnuna vivo de nia lingvo.

BILDKARTOJ PRI TEKSELO. La nederlanda eldonejo „N.V. v/h. Langeveld & de Rooij" en Den Burg (insulo Texel, Nederlando), eldonis serion de belegaj ilustritaj poŝtkartoj, kiuj prezentas tipajn vidaĵojn kaj birdo-specojn, kiuj abunde vivas sur tiu insulo. La teksto de ĉiu karto estas du-lingva: nederlanda kaj Esperanta. La serio entenas pli ol 70 diversajn bildojn. La prezo de unu karto estas —.05 guld. La eldonejo meritas tutkoran gratulon ne nur pro la beleco de la bildkartoj, aspektantaj kiel fotografaĵoj, sed ankaŭ pro la inteligenta ideo apliki la internacian lingvon sur la kartoj. Efektive, la kartoj estas aĉetataj ankaŭ de multaj eksterlandanoj, kiuj vizitas la faman insulon, kaj ankaŭ multaj nederlandanoj sendas ilin al alilandaj korespondantoj. Tiamaniere la kartoj servas ankaŭ kiel efikaj propagandiloj. Ni varme rekomendas al la samideanoj, ke ili uzu ĉi tiujn belajn kartojn en sia internacia korespondado.

INTERNACIA LIBERTEMPEJO EN LAZNE BELOHRAD. — Ilustrita faldprospekto pri la banloko Lazne Belohrad en Ĉeĥoslovakujo, kie en la lastaj someroj okazis Esperantistaj libertempaj kunvenoj. Eldonis la loka Esperantista klubo.

NORDA LITERATURO. Kolekto de literaturaj verkoj el Norda Eŭropo. Redaktas T. Indra, ĉefdelegito de U.E.A. por Latvio. Unua kajero. 84 paĝoj, formato 14 × 20 cm. Eldonas: K. Strazds, poŝtkesto 51 en Jelgava (Latvio). — Nova eldona entrepreno, kiu intencas je malalta prezo eldoni literaturaĵojn el la nord-eŭropaj lingvoj. La serio estas abonebla, la prezo de unu kajero (ĉ. 80 paĝoj) estas por la Baltaj landoj —.50 lato, por aliaj landoj —.65 sv.fr. Ĉi tiu unua kajero entenas bone tradukitajn novelojn el la lingvoj latva, litova kaj estona, kaj kelkajn bildojn pri la latva ĉefurbo Riga.

LA INSULO TEKSELO. 8-paĝa bele ilustrita fald-prospekto pri la nederlanda insulo Tekselo, fama pro siaj naturbelaĵoj. Eldonis la Teksela Esperanto-Federacio „Kune ni venkos", Parkstraat 7/10, Den Burg (Texel, Nederlando). La prospekto estas senpage sendata al interesiĝantoj. La interesan kaj bonstilan tekston de la prospekto verkis s-ro M. J. Oele.

Karl Nebenzahl: LA INFLUO DE VEGETARISMO AL LA MORALA KAJ SOCIA PROGRESADO. 34 paĝoj. Prezo 2 fr. fr. Eldonis: „Vegetarano", Bukureŝto, str. Dr. Istrate 10 (Rumanujo). — Ĉi tiu libreto estas la unua numero en la nova biblioteko de „Vegetarano", dumonata vegetarisma gazeto, redaktata de s-ro I. Ionesku-Kapatzana en Bukureŝto. La aŭtoro rekomendas la vegetarismon, klarigante ĝin el sociaj vidpunktoj.

Stjepan Miŝak: MALGRANDA ADAMO. Esperanta legolibreto por komencantoj. 38 paĝoj. Prezo 25 piastroj aŭ 2 respondkuponoj. Eldonis la aŭtoro. Ŝabaniye Mahallesi 68 en Adana (Turkujo). — Facila rakonto pri la ideoj de Esperanto. Por faciligi la komprenon, la vort-partoj estas per streketoj dividitaj.

ESPERANTA MONDKARTO. — La Centra Esperanta Propaganda Komisiono en Nijmegen (Nederlando), organizanto de la grandsukcesa nederlanda skriba kurso, eldonis plurkolore presitan belan mondkarton, sur kiu la geografiaj nomoj estas Esperant-lingvaj. Ĉirkaŭ la bildo estas en la nederlanda lingvo propagandaj tekstoj. La mondkarto estas senpaga premio al la partoprenantoj de la skriba kurso. La adreso de la eldonejo: Centra Esperanto-Kurso, Nijmegen (Nederlando).

Ĉiu Esperantisto devas posedi kaj legi la gravan libron:

Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado

verkita de *J. R. G. Isbrücker*, membro de la Esp. Akademio, vicprez. de UEA.

Necesa por preparo al ekzamenoj!

Nova eldono, kompletigita per la faktoj ĝis post la Stokholma kongreso.

Prezo: 0.75 ned. guld.

Aĉetebla ĉe la eldonejo de La Praktiko.

Esperanto-kursoj en Hago!

La 24-an kaj 27-an de Oktobro komenciĝos du novaj kursoj de Andreo Cseh por komencantoj.

La vespera kurso okazos en ĉiu merkredo je la 8-a horo.

La posttagmeza kurso okazos en ĉiu sabato je la 2½ horo.

Kursejo: Riouwstraat 172 en Hago. (Senpaga gardejo de bicikloj.)

La kursoj daŭros dum 12 semajnoj. Kotizo 7.50 guld., por plua persono el la sama familio 5 guld. — Aliĝi oni povas ĉe la Int. Cseh-Instituto de Esp., Riouwstraat 172, Hago. Telefono: 556677.



Bildo pri la solena malferma kunsido de la 14-a kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), en la Universitato de Valencia (Hispanujo). — En la unua semajno de Aŭgusto okazis la 14-a SAT-kongreso de la laboristaj Esperantistoj. Partoprenis en ĝi 376 personoj el 13 landoj. La kongreso, kies kunsidojn prezidis s-ro F. Azorin (el Cordoba), s-ro Bout (el Rotterdam) kaj s-ro Olson (el Stokholmo), havis grandan sukceson. La 4-an de Aŭgusto la urbestro aranĝis por la kongresanoj solenan akcepton en la urbodomo. En la „Dua Laborista Altlernejo Esperantista" valorajn prelegojn faris f-ino E. Pähn, s-ro J. Grau Casas, s-ro Bartelmes kaj s-ro Pāris. En la kongreso rimarkinda estis la partopreno de multegaj nederlandoj, kiuj vojaĝis per aŭtobusoj.

Hungaraj skoltoj, fervoraj pioniroj de Esperanto, en la hungara urbo Törökszentmiklós. En la mezo sidas s-ro Paŭlo Heczke, instruisto, Delegito de U.E.A., senlaca disvastiganto de Esperanto.

Bildo pri la inaŭguro de la nom-tabulo de la nova „Strato de D-ro Zamenhof" en la urbo Valencia (Hispanujo). La inaŭguro okazis la 5-an de Aŭgusto, en la kadro de la 14-a SAT-kongreso. Ĉe la ceremonio paroladojn faris la reprezentanto de la urbestraro kaj s-ro L. Hernandez, prez. de la Org. Komitato.

Interesa bildo pri la progresado de Esperanto. — En Nederlando estas kutimo vendi haringojn sur la stratoj. La vendistoj iras kun siaj vend-veturiloj tra la stratoj kaj la malsataj preterpasantoj haltas kaj kontentigas sian apetiton. Nia bildo prezentas la veturilon de haring-vendisto en la urbo Rotterdam, kun la Esperanto-lingva surskribo „Plej bonaj haringoj". La bildon, kiu estas farita sur la Heemraadsplein, placo en Rotterdam, ni ricevis de la ilustrita revuo „Groot-Rotterdam".

S-ro P. L. Wright en Londono, prezidanto de Brita Esperantista Asocio. Kiel fervora disvastiganto de Esperanto, li gvidas nuntempe tri Cseh-metodajn kursojn en la brita ĉefurbo.

Grupo de K.E.L.I. en la Stokholma kongreso. — La Kristana Esperantista Ligo Internacia, kiu unuigas en si la kristanajn, sed ne katolikajn Esperantistojn, en Stokholmo havis apartajn kunvenojn. La bildo montras grupon de diverslandaj anoj de K.E.L.I. En la mezo staras s-ro Paul Hübner el Quedlinburg (Germanujo), prezidanto de K.E.L.I., senlaca aganto por Esperanto.



Internacia postkongreso en Tallinn (Estonio). — Post la Stokholma kongreso multaj kongresanoj uzis la okazon por vidi en la nordo Finnlandon kaj Estonion. Per la ŝipo „Aranda" oni vojaĝis unue al Finnlando kaj vizitis la urbojn Turku kaj Helsinki. De tie oni transveturis al la estona ĉefurbo Tallinn, kie okazis grandstila kaj tre sukcesa postkongresa festo kun solena kunveno en la kulturdomo „Estonia", riĉprograma art-vespero kaj ekskursoj kun la grandnombra kaj gastama loka samideanaro. La bildo montras la solenan kunvenon en la granda koncertsalono de „Estonia".

Jen la ĉarma anaro de „Nia Klubeto" en la nederlanda urbo Bergen (Nord-Holando). La bravaj gesamideanetoj diligente lernis Esperanton en la kurso de f-ino Hendriks (sidanta en la mezo) kaj jam korespondas kun svedaj infanoj. Ĉu ekzistas en la mondo klubo de pli junaj Esp-istoj?

La partoprenantoj de la postkongreso antaŭ la teatro „Estonia" en Tallinn.

„Lernu Esperanton!", propaganda surskribo sur la veturilo de nia fervora samideano s-ro A. Cléty, tolaj-vendisto en Dunkerque (Francujo).

En la franca urbo Hyères (depart. Var) la societo „La Verda Stelo", membro de la Provenca Esperantista Federacio, la 16-an de Septembro aranĝis grandsukcesan Esperanto-tagon, sub la prezido de la urbestro. Nia bildo prezentas grandan kunvenon en ĝarden-teatro. Sur la scenejo estas videbla s-ro Georges Avril, vicprezidanto de la Societo Franca por la Prop. de Esp., faranta paroladon al la publiko.



Nia fervora juna samideano, s-ro Siem de Waal en la nederlanda urbo Den Burg (sur la insulo Texel), kiu dum la somero de ĉi tiu jaro faris biciklan vojaĝon de 4600 kilometroj. Li vojaĝis bicikle al la kongreso en Stokholmo kaj revene li pasis tra la urboj Berlino, Parizo kaj Bruselo. Li intencas en la venonta jaro fari similan vojaĝon per biciklo al la kongreso en Romo.

Kunveno de Orientbohemaj Esperantistoj en la banloko kaj internacia libertempejo Lázne Belohrad (Ĉeĥoslovakio). En la mezo staras s-ro E. M. Fasce el Italujo, Esp.-instruisto.



En la nunjara flor-konkurso de la urbo Bergen (Nederlando) la tiea Esp. societo partoprenis per ĉi tiu belega „Venecia gondolo", farita el 9400 rozoj. Ĝi ricevis premion.

La fama supera lernolibro:

PAUL FRUICTIER:

KOMPLETA GRAMATIKO

KAJ

VORTFARADO DE ESPERANTO

reviziita kaj kompletigita de

S. GRENKAMP-KORNFELD, L.K.

estas aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

Prezo: 2.50 ned. guld.

Al la abonantoj afrankita sendo.

Unu el la plej interesaj kaj plej valoraj libroj de la mondliteraturo:

Emeriko Madách:

LA TRAGEDIO DE LA HOMO

ĉefverko de la hungara literaturo, en majstra traduko de D-ro Kolomano Kalocsay.

Ĉi tiu admirata verko en majstraj scenoj kondukas la leganton tra la historio de la homaro, de la mondkreo tra la diversaj kulturŝtupoj ĝis la mondpereo. La libron ornamas 20 belegaj tutpaĝaj desegnaĵoj de la mondfama pentristo M. Zichy.

Prezo: 2.— ned. guld.

Mendebla ĉe la eldonejo de La Praktiko.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj.

LITERATURO

DE KIAM ESTAS NIGRA LA ŜLOSILTRUO?

De Francisko Móra.

Ĉi tiu historio unue havis la titolon: *„La diplomato kaj la diablo"*. Sed mi ŝanĝis ĝin, por ke neniu opiniu, ke mi ne estimas la rangon. Kaj en la fino klariĝos, kial estas la diplomato pli altranga, ol la diablo, kaj pruviĝos ankaŭ tio, ke mi estas multe pli respektema homo, ol kiel oni pri mi supozas.

Tiel okazis, ke la diplomato komencis grandegan ion. Grandan entreprenon, kiu eternigos lian nomon en la historio kaj kiu havigos al li la plej belan formon de la senmorteco: ke je la centjara datreveno de lia morto li estos la tezo de abiturienta ekzameno, kaj tiamaniere ankaŭ en la morta stato li havos la plezuron, ke iu junulo sin mortpafos pro li. Do, la diplomato volis komenci militon, ĉar tiu vojo kondukas plej certe al la senmorteco, kiu estas pavimita per kranioj.

Sed en tiuj tempoj la popoloj tute ne emis ludi militon, kaj tial ĉiuj klopodoj de la diplomato restis vanaj.

„Si nequeo superos, Acheronta movebo" *), li rememoris pri siaj mezlernejaj studoj, kiam li jam estis laca pro la vanaj preĝoj por iom da milito. Li decidis do, ke li aperigos la diablon, kiel li tion vidis en la „Faŭsto".

La diablo, kiu cetere konstante premenadas ĉirkaŭ la diplomatoj, ne atendis multan vokadon, sed je la unua invita vorto li prezentis sin en sia tuta infera pompo. Li portis kun si ankaŭ la bovo-ledon, sur kiun oni kutimas skribi la kontrakton faritan kun la diablo.

Diablo kaj diplomato facile komprenas unu la alian. Tial ili rapide faris kaj subskribis la kontrakton. En la unua paragrafo de la kontrakto staris, ke la diablo faros militon por ĝojigi la diplomaton. La dua paragrafo tiel sonis, ke post la milito la diablo rajtos forporti la diplomaton, kondiĉe, ke ili renkontiĝos en Romo, kaj ke la diablo sukcese plenumos liajn tri dezirojn.

La diablo estis tre kontenta pri la kontrakto, sciante, ke la diplomato ne povos eviti lin. Sed ankaŭ la diplomato ridis sekrete, ĉar li decidis, ke li neniam vojaĝos al Romo. (En tiu tempo oni ankoraŭ ne sciis, ke „ĉiu vojo kondukas al Romo".)

Kion faris la diablo, kion ne, tio jam ne apartenas al mia rakonto. Ni kontentiĝu per la scio, ke li sukcesis frenezigi la popolojn. Okazis tiel granda milito, ke la surtera sango-torento ankaŭ en la infero formis riveregon, longan je dudek-kvin kilometroj kaj profundan je dudek-kvin metroj. Sepcent-sepdek-sep diabloj forĝis la novajn kaldronojn por boligi la divers-rangajn krimulojn, antaŭnotitajn en la infera oficejo.

La diablo treege atendis la diplomaton, sed ĉi tiu ne falis en lian reton. La diversaj armil-fabrikistoj kaj milit-liverantoj, kiuj antaŭiris por okupi loĝejojn en la infero, preparis por la diplomato apartan, lukse ornamitan kaldronon. Sed la diplomaton defendis la kontrakto, eĉ ne parolante pri la historia senmorteco, kiun li jam akiris per la milito. Oni pentris lian portreton per oleo kaj brodis ĝin sur poŝtukojn, oni nomis pri li ordenon, sapon, ŝu-ŝmiraĵon kaj stratojn, kaj kiam li eldonis sian memor-libron, eĉ la Eskima Akademio elektis lin kiel honoran membron.

Oni devas scii, ke la diplomato en sia memor-libro pruvis, ke dum dudek jaroj li malhelpadis la eksplodon de la milito. Sekve de tio la tuta homaro ovaciis lin: la milit-partianoj pro la milito, la pac-partianoj pro la dudek-jara malhelpado. La diplomato aperis en ĉiu festeno, aranĝita por lia honoro tra la tuta mondo. Nur al Romo li neniam iris. Tien li sendis nur intervjuojn.

Sed ankaŭ la diablo ne stultiĝis. Se li ne povis venigi la diplomaton al Romo, li venigis Romon al la diplomato.

Foje en tiu urbo, kiu por eterne gloriĝis per sia granda naskito, oni konstruis novan hotelon. Ĝian konstrumanieron oni kopiis el la „Mil kaj unu noktoj". Kompreneble, amerika riĉegulo konstruis la admirindan hotelon, ĉar tiom da mono, kiom ĝi kostis, estas imagebla nur en dolaroj. (Tiam la dolaro ankoraŭ ne perdis sian valoron!) Ankaŭ tio estas memkomprenebla, ke ĉiu sentis sin tre honorata, kiu ricevis inviton al la solena inaŭguro de la hotelo. Kaj plej komprenebla estas tio, ke ankaŭ la diplomato ricevis inviton. Ĉar nenie en la mondo ekzistas diplomato, kiu rifuzus la inviton de amerika mon-sako, ankaŭ nia diplomato prezentis sin. Tiom pli, ke li aŭdis, ke la salonojn de la hotelo ornamas primilitaj pentraĵoj kaj ke sur unu muro ankaŭ li estas eternigita, kiel eminenta ano de la homaro.

Ĉe la festena tablo la diplomato sidis — memkompreneble — sur la ĉefa loko, kontraŭ sia propra bildo, kiu prezentis lin en diplomata uniformo, kiam li rajdas sur blanka ĉevalo al la packonferenco. (Sur la pentraĵo la pacon prezentis giganto, fortege ĉenita al la tero.) Multegaj tostoj sonis kaj ĉiuj lin ovaciis.

Fine, kiam la horloĝo batis la noktomezon, ekstaris la dommastro, la ruĝhara amerikano, kaj levante sian glason diris:

— Mi havas la honoron informi la estimatan gastaron, ke la nomo de nia hotelo estas „Romo"!

En tiu momento estingiĝis la elektra lumo, sed tamen ne fariĝis mallume, ĉar sur ĉiuj teleroj, glasoj, forkoj, tranĉiloj kaj buŝtukoj ekbrilis la fosfora surskribo: ROMO. Kaj la diplomato, rigardante al la amerikano, rimarkis, ke tiu havas ĉevalajn hufojn en la lakaj ŝuoj, kaj ke du kornoj elstaras el lia granda ruĝa hararo.

— Mi perdiĝis, — pensis li, vidante la infere ridetantan vizaĝon de la diablo.

En momento la diablo etendis sian manon al la diplomato kaj diris:

— Ĉu via moŝto estas jam preta?

— Ankoraŭ ne! Se mi ne eraras, laŭ la sekreta kontrakto,

*) Se mi ne povas trovi helpon en la ĉielo, la inferon mi movos. (Latina citaĵo.)

kiun ni faris sur la bazo de la internacia juro, mi ankoraŭ havas rajton al tri deziroj.

— Mi estas je via dispono, — ridaĉis la diablo.

— Unue, mi deziras promen-rajdi sur ĉi tiu blanka ĉevalo, — montris la diplomato al la kontraŭa muro.

Tuj la ĉevalo staris ĉe la tablo kaj komencis manĝi el la granda bombonujo. En la alia momento ĝi jam galopis ĉirkaŭ la urbo, kun la diplomato sur sia dorso. La diplomato plenforte spronadis la ĉevalon, por ke ĝi sovaĝiĝu kaj forgalopu en la sepan landon, sed la ĉevalo, naskita en la infero, obeis al la infera disciplino kaj post tri minutoj staris jam denove sur sia loko, kiel mur-pentraĵo. Kaj la diablo kun terura rikano turnis sin al la diplomato:

— Ĉu mi rajtas scii la duan deziron?

La ruza diplomato venigis de la episkopo sitelon da benita akvo kaj kun delikata rideto flustris al la diablo:

— Bonvolu tuj salti en ĉi tiun akvon. Certe utilos al vi iom da refreŝiĝo en ĉi tiu infera varmego.

La diablo ekflaris la akvon kaj konsterniĝis. Tamen li ensaltis en la sitelon, sed post momento li elsaltis, kelkfoje ternis kaj ekparolis:

— Sed nun venu! Ni ne tiradu vane la tempon!

Nun la diplomato klare vidis la vesperto-ungojn de la diablo. Li frosto-tremis kaj balbute, kiel en la komenco de sia kariero, diris:

— Mia ... tria ... deziro ... estas tio, ... ke vi ... pro ĉiu mia mensogo ... elŝiru ... unu el viaj haroj.

Je tio la diablo aŭdigis teruran kriegon, ke eĉ en la sepa ĉambro sufokiĝis la kelneroj, kiuj en tiu momento ŝteltrinkis el la ĉampanboteloj.

— Ne! — kriis la diablo, — ĉi tiun deziron mi ne povas plenumi, ĉar eĉ unu harero ne restus sur mia korpo, kaj sen haroj mi ne povus plu reiri al la infero!

Kaj la diablo ekkuris al la pordo. En la granda embaraso li ne trovis la anson kaj ne povis malfermi la pordon, kaj tial li rapide traŝovis sin tra la ŝlosil-truo.

Oni diras, ke de tiu tempo estas nigra ĉiu ŝlosil-truo. Kaj same oni diras, ke de tiu tempo la diplomatoj timas neniun, ĉar ili bone scias, ke eĉ la diablo ne forportas ilin, malgraŭ la ĝenerala deziro de la homaro.

El la hungara lingvo tradukis:
Eŭgeno Kormos.

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Naskiĝo. — En la familio de s-ro *C. R. Ege*, policestro en Hobro (Danujo), prezidanto de la loka Esp-societo, naskiĝis knabeto. En la bapto li ricevis la nomojn Ole Esper.

Fianĉiĝo. — S-ro *K. R. C. Sturmer*, nia konata angla samideano en Londono, fianĉiĝis kun f-ino *Edna Woods*.

Edziĝo. — S-ro *Raimund Cech*, fervora propagandisto de Esperanto en Vieno (Aŭstrio), edziĝis kun f-ino *Ricci Schicketanz*.

— En Zemun (Jugoslavio) la 2-an de Septembro edziĝis la surdmuta Esperantisto s-ro *Mateo Janoŝeviĉ* kun la surdmuta f-ino *Jelka Ivanĉeviĉ*.

— S-ro *Mair Aŝeroĵ* kaj f-ino *Rebeca Levi* geedziĝis en Plovdiv (Bulgarujo).

— S-ro *Emile Cuomo*, delegito de UEA en Philippeville (Alĝerio) kaj sekretario de la loka Esperanto-Societo, la 29-an de Septembro edziĝis kun f-ino *Manfredine Camilleri*.

Morto. — La 27-an de Aŭgusto mortis en Praha (Ĉeĥoslovakujo) *D-ro A. Bischitzky*, kuracisto. Li estis dum multaj jaroj sindona kaj fervora pioniro de Esperanto, prez. de la Ĉeĥoslovaka Ligo de Homaj Rajtoj kaj prez. de la Societo de Germanlingvaj Esp.-istoj en Praha. Ankaŭ sur la literatura kampo li eternigis sian nomon, tradukante el Goethe (La suferoj de la juna Werther), Hebbel (Maria Magdalena) kaj aliaj.

— En Varŝavo mortis s-ro *H. Bronstein*, fervora pioniro de Esperanto, en la aĝo de 42 jaroj. Dum 25 jaroj li senlace laboris por nia lingvo, instruante, verkante kaj tradukante.

— Dum la somero mortis en Würzburg *D-ro Heinrich Orthal* en la aĝo de 56 jaroj. Li estis dum multaj jaroj fervora samideano, kunfondinto de la Esp-Grupo en Nürnberg.

— En Aŭgusto mortis en Praha la blinda Esperantistino *s-ino E. Suchardová-Wildmannová*, post grava malsano. Ŝi estis sekretariino de SOČNE en Praha.

— En Potsdam (Germanujo) mortis *s-ino Traute Schmidt*, fervora samideanino, edzino de nia entuziasma samideano Geo Schmidt.

Mortis la bofrato de D-ro Zamenhof. — Dum la lasta tempo la Morto tro diligente falĉadas en la familio de nia Majstro. Post la morto de la du fratoj de D-ro Zamenhof, Felikso kaj Leono, la 23-an de Junio mortis en Varŝavo (Polujo) *s-ro Henriko Hermelin*, edzo de Aŭgusta Zamenhof, fratino de la aŭtoro de Esperanto. Li estis patro de f-ino Emilia Hermelin, agema samideanino, partopreninta en 1930 la duan internacian pedagogian kurson de Andreo Cseh en Arnhem. — La Praktiko kore kondolencas al la tuta familio.

Internacia gefianĉiĝo. — S-ro *Ivan Dahlquist* el Munkedal *(Svedujo)* fianĉiĝis kun la germana f-ino *Erna Ringmann* el Berlino.

— Nia agema sveda samideano, s-ro *Gillis Staberg* el Skara (Svedujo), instruisto de la Cseh-Instituto, fianĉiĝis kun sia dana kursanino f-ino *Marie Thomsen* en Nyköbing (insulo Mors, Danujo).

La universala kongreso en 1935. — La Esperanto-Centro Itala fervore komencis la preparon de la venontjara mondkongreso. Ĝi estos unika en la historio de niaj kongresoj. Laŭ la ĝis nun starigita plano la kongreso komenciĝos la 3-an de Aŭgusto en Firenze per la solena malfermo de la Somera Universitato. De tie la kongresanoj veturos per speciala vagonaro al Romo, kie la 5-an de Aŭgusto estos la solena malferma kunsido de la kongreso. Du tagojn poste oni transmetos la kongreson al Napolo, kie ĝi finiĝos la 10-an de Aŭgusto. Post la kongreso okazos komunaj ŝipveturoj al Malto, Tripolo, Palermo kaj Ĝenovo. Sur la ŝipo oni daŭrigos la prelegojn de la Somera Universitato. La aranĝoj finiĝos la 17-an de Aŭgusto en Ĝenovo. Ĝis nun niaj kongresoj okazis en urboj. La proksima okazos en lando.

La „Internacio de Proletaj Esperantistoj" (IPE) en la tagoj 12—15 de Aŭgusto havis konferencon en Lille (Francujo). Partoprenis 73 personoj el 9 landoj. Post tritaga laboro okazis ekskurso kun la loka laboristaro. El la rezulto de la konferenco menciindaj estas la rezolucioj pri la neceso altigi la lingvan nivelon, uzi en la gazetoj simplan stilon kaj klarigi la uzatajn neologismojn. Oni fiksis la bazan taskon de IPE en la interfabrikeja korespondado. La Plena Kongreso de IPE okazos en la jaro 1935 en Antverpeno (Belgujo).

Ido-mondkongresoj. — La adeptoj de la formortanta mondlingva projekto „Ido" en ĉi tiu jaro havis kunvenon en Belgujo. Ili tiel decidis, ke la proksima kongreso okazos aŭ en Londono, aŭ en la hungara urbo Szombathely.

La Brita Brodkasta Korporacio ne ŝatas Esperanton. — Niaj britaj samideanoj jam de multaj jaroj senlace klopodadas ĉe la brita radio por enkonduki Esperanton en la disaŭdigado. Kvankam antaŭ dek jaroj la Londona stacio dissendis kelkajn Esperanto-parolojn, en la lastaj jaroj la Korporacio obstine kontraŭstaras la petojn. La Brita Esperantista Asocio lastatempe denove sendis al ĝi petskribon kun propono disaŭdigi paroladojn pri Anglujo kaj la angla vivo. Sed la B.B.K. respondis: *„Ni bedaŭras, ke ni ne povas plenumi vian peton. La tempo disponebla por alilingvaj dissendoj estas jam limigita, kaj estas nia principo preferi lingvojn, kiuj havas nacian fundamenton."* Ni komprenas. La angla lingvo prave timas la konkurencon de tiu sola lingvo, kiu havas ŝancon fariĝi mondlingvo, ĝuste pro tio, ke ĝi havas ne nacian, sed universalan fundamenton.

La Libro-Loterio de La Praktiko. — Nia intenco estas okazigi la tiradon la 9-an de Decembro, antaŭ la Esperantista Libro-Tago. Sed bedaŭrinde el la 10,000 lotoj ĝis nun vendiĝis nur ĉ. 7000, kaj ni havas ankoraŭ ĉ. 3000 lotojn por vendi. Ni tre ĝojus, se niaj legantoj helpus en la finvendo de ĉiuj lotoj, por ke ni povu okazigi la tiradon en la intencata dato, kaj por ke la gajnantoj povu ricevi la premiojn ĝis la Libro-Tago. — Unu loto kostas nur -.10 guld., 11 lotoj kostas 1 guldenon. La detalaj informoj pri la loterio aperis en la Januara numero de La Praktiko, sur la lasta paĝo.

Marista Ligo Esperantista. — Dum la universala Esperanto-kongreso en Stokholmo, la 10-an de Aŭgusto, oni refondis la fakan unuiĝon de la Esperantistaj maristoj, sub la nomo: Marista Ligo Esperantista. Ĝi celas disvastigi Esperanton inter la maristoj kaj ŝipkonstruistoj. La ligo serĉas delegitojn en ĉiu havenurbo, por gvidi la propagandon inter la maristaro kaj helpi vizitantajn liganojn. La jara kotizo estas unu svisa franko. Interesiĝantoj skribu al la sekretario: s-ro Holger Ekblad, Villa Skogbacka, en Kvicksund (Svedujo).

„LA PRAKTIKO" kiel lernilo. — Nia redakcio ricevis el diversaj landoj entuziasmajn leterojn pri tio, ke en kursoj kaj grupkunvenoj oni sukcesplene uzas la numerojn de LA PRAKTIKO. Oni spertas, ke ĉiu numero de nia gazeto enhavas abundan materialon por lerno, kaj kio ĉefe gravas, la materialo prezentiĝas en facila, amuza formo. Kiel ekzerca legaĵo, la diversaj numeroj de LA PRAKTIKO estas ideala materialo, pro la varia kaj interesa enhavo, kaj ankaŭ pro la malalta prezo de la malnovaj numeroj. — (Efektive, ĉiu numero de LA PRAKTIKO egalvaloras kun bona legolibro. La prezo de malnova numero estas nur —.10 guld, ĉe mendo de kvanto kun plua rabato.)

La Esperanto-monumento de Texel. — Laŭ la komunikoj de la kasisto la kaso de la monumento ĝojige kreskas. S-ro S. de Waal transdonis la sumon de 28.27 guld., kiun li kolektis dum sia bicikla vojaĝo. El la gajno de la festvespero de Den Burg la kaso ricevis 104.90 guld. Per tio la kaso posedas nun 377.67 guldenojn, sed oni bezonas entute 400—500 guldenojn. Pluajn donacojn danke akceptas la kasisto: s-ro J. M. Duinker, Den Burg (Texel). La numero de lia poŝtkonto: 216684.

Belgujo. — La Esp. Propaganda Instituto de Aalst en kunlaboro kun la loka sekcio de la Flandra Turista Unuiĝo organizas kurson en *Haaltert* (apud

Aalst) en la Katolika Popolrondo. La kurso komenĉigos la 6-an de Oktobro kaj ĝin gvidos s-ro R. De Kegel, instruisto de la Cseh-Instituto. Ĉe la publika prov-leciono la enkondukan paroladon faros s-ro Leo Calloens, prezidanto de la Flandra Ligo Esperantista.

Ĉeĥoslovakio. — La 20-an kaj 21-an de Oktobro okazos en *Gablonz a/N.* labora kunsido kaj amika kunveno de la distrikta Esperanto-asocio de Reichenberg kaj la 25-jara fondiĝfesto de la grupo „Izermontaro". Informojn oni povas ricevi de s-ro Franz Hub, Friedhofstrasse 14 en Gablonz a/N. — La Esp.-Klubo en *Kolin* la 29-an de Sept. festis sian 10-jaran jubileon, en la kadro de Regiona Labora Konferenco de la centro- kaj orientbohemaj Esp-istoj.

Danujo. — En *Holbaek* komenciĝis kurso sub la gvidado de s-ro instruisto Holger Hansen. — En la Laborista Vesperlernejo de la urbo *Silkeborg* la 24-an de Sept. komenciĝis kurso. Instruas s-ino Helene Jörgensen kaj s-ro Stig Skole. — La Esp-Klubo de *Kopenhago* organizis kurson, kiu komenciĝis la 27-an de Sept., sub la gvidado de s-ro Leonido Vasiljef, instruisto de la Cseh-Instituto. — S-ro Gillis Staberg, sveda instruisto de la Cseh-Instituto, komencis kursgvidadon sur la insulo *Mors*.

Francujo. — F-ino Lidja Zamenhof, instruistino de la Cseh-Instituto, la 5-an de Oktobro komencos gvidi kurson en la sud-franca urbo *Châteaurenard*. Post tiu kurso ŝi iros al *Orléans* kaj *Thiers*.

Jugoslavio. — S-ro Dolfa Bartoŝik, ĉeĥoslovaka instruisto de la Cseh-Instituto, je la invito de la Amika Rondo Esperantista en *Novi-Sad*, alvenis por gvidi Esperanto-kursojn en pluraj urboj de la Danuba regiono de Jugoslavio.

Nederlando. — F-ino Juliette Baudin el Ĝenevo, instruistino de la Cseh-Instituto, revenis al Nederlando kaj gvidas kurson en *Amsterdam*. — F-ino M. Saxl, la konata internacia instruistino de la Cseh-Instituto, sukcesplene komencis sian laboron. La Frisa Esperanta Rondo organizis bonsukcesajn propagand-vesperojn en *Leeuwarden, Heerenveen, Drachten, Sneek, Harlingen* kaj *Buitenpost*. En tiuj urboj jam komenciĝis la kursoj kun pli ol 220 kursanoj. La lokaj gravuloj kaj la gazetaro bonvole donis efikan helpon. — En *Amsterdam* la 24-an de Sept. komenciĝis kurso por knaboj, sub la gvidado de s-ro J. Wanders. — Dum la unuaj du semajnoj de Septembro vizitis Nederlandon la konata Esperantisto s-ro S. Grenkamp, membro de la Lingva Komitato kaj redaktoro de „Nia Gazeto". Li faris tre interesajn kaj grandsukcesajn paroladojn pri sia vojaĝo de Tunizio ĝis Stokholmo kaj pri sia patrolando Polujo, en la urboj *Hago, Rotterdam, Arnhem, Deventer, Utrecht, Bergen, Haarlem, Slikkerveer* k.a. — S-ro J. H. Vink aranĝis la 9-an de Sept. interesan kaj agrablan aŭtobusan ekskurson de Hago al Nord-Holando, por rigardi la sekigajn laborojn ĉe la Suda Maro, kaj viziti la Esperantistojn en la diversaj lokoj de Nord-Holando. En la ekskurso partoprenis ankaŭ s-ro S. Grenkamp el Parizo. — En Exloërmond s-ro J. Hogenkamp, lernejestro, gvidas kurson por senlaboruloj. — En *Rotterdam* la Esp-klubo „Merkurio" organizas kurson gvidotan de Andreo Cseh. Post diligenta kaj lerta preparo sub la energia gvidado de s-ro W. Schmidt, la 27-an de Sept. okazis propaganda vespero en la Komerca Altlernejo. La sukceso superis ĉiun atendon. Amasiĝis pli ol 700 personoj. Ĉar la luita salono povis enhavi nur 300 personojn, oni devis rapide pretigi duan salonon, sed tamen multaj personoj devis resti sur la koridoroj. En la du salonoj alterne okazis parolado de s-ino Julia Isbrücker kaj provleciono de Andreo Cseh. Tuj aliĝis al la kurso pli ol 120 personoj. La gazetaro, por kiu okazis aparta informa konferenco, publikigis tre favorajn raportojn. — S-ro inĝ. J. R. G. Isbrücker, la nova vicprezidanto de UEA, faris interesajn paroladojn en *Hago* kaj *Arnhem* pri la Stokholma kongreso, ĝiaj decidoj, kaj pri la vojaĝo de la nederlanda ŝipkaravano al Stokholmo. — En *Rotterdam* s-ro H. J. Kloosterman gvidas du kursojn, el kiuj unu por senlaboruloj. — En la urbo *Den Burg* (insulo Texel) la 13-an de Sept. okazis bonege sukcesinta festvespero, en kiu partoprenis 370 personoj. Parolis s-ro Siem de Waal pri sia 4600-kilometra bicikla vojaĝo al Stokholmo tra 7 landoj. S-ro M. J. Oele parolis pri la aŭtobusa vojaĝo al la SAT-kongreso en Valencia. Oni montris diversajn filmojn, interalie ankaŭ pri Esp-ista ekskurso al la insulo Tekselo. — En *Hago* la Katolika Laborista Esp.-Soc. „Inter Paco kaj Amo" aranĝis bonsukcesan propagandvesperon kaj komencis kurson. Ĝi okazas ĉiulunde en la kursejo de la Cseh-Instituto, sub la gvidado de f-ino S. Wijers.

Norvegujo. — F-ino M. Glaser, Cseh-instruistino el Berlino, komencis kurson en la urbo *Mandal*.

Polujo. — En *Bydgoszcz* s-ro prof. M. Sygnarski komencis kurson por 63 lernantoj de la gimnazio.

Rumanujo. — En *Gherla* kurson gvidas s-ro Simono Csóra por 20 personoj. — En *Cluj* ges-roj Morariu vizitis la Esperantistaron. Oni preparas kursojn. — La ilustrita revuo „Realitatea Ilustrata" aperanta en Bukureŝto, publikiĝis grandan ilustritan artikolon pri la mondlingva projekto „Basic english" kaj pri la supereco de Esperanto, kaj forte rekomendas lerni Esperanton, kiel solan kaj jam praktike utiligatan mondlingvon.

Svedujo. — S-ro Henriko Seppik, kiu dum la somero kondukis la estonan karavanon al Stokholmo, komencis kursojn en *Arboga* kaj *Medåker*. — S-ino Erika Seppik gvidas kursojn en *Valskog* kaj *Kungsör*. — S-ro Tibor Czitrom el Hungarujo gvidas kursojn en *Linköping* kaj *Norrköping*.

KONKURSOJ

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Julia numero!

104-a konkurso.

MISTERA MIKSAĴO

(Ensendis S-ro A. Lienhardt en Montigny-les-Metz, Francujo.)

Sur la tablo staras du grandaj glasoj. En unu estas ekzakte unu litro da ruĝa vino, en la alia glaso estas precize unu litro da blanka vino. Per mezurilo ni elprenas la dekonan parton de la ruĝa vino kaj transverŝas ĝin en la blankan vinon. Bone kirlinte la miksaĵon ni elprenas el ĝi per la sama mezurilo dekonan litron kaj ĝin transverŝas al la ruĝa vino.

LA KONKURSA TASKO: Bonvolu respondi, kiu aldonvino estas nun pli multa, ĉu la ruĝa aldon-vino en la blanka vino, aŭ la blanka aldon-vino en la ruĝa vino?

La solvo estas malfacila, sed ne tre. Laŭ la aserto de fama matematikisto tiu persono, kiu kapablas rapide doni la ĝustan respondon, posedas la talenton de bona matematikisto. Do niaj legantoj povas juĝi pri sia talento.

Tiuj el niaj legantoj, kiuj ne estas sufiĉe fortaj en la kalkulado, povas solvi la problemon en praktika maniero: faru la eksperimenton transverŝante la vinojn kaj poste komparu la kolorojn de la miksaĵoj. Se vi ne havas sufiĉe bonajn okulojn, vi povas trinki la miksaĵojn kaj kompari iliajn gustojn.

En la respondo oni nomu ankaŭ la manieron, laŭ kiu oni trovis la solvon: ĉu per kalkulado, per rigardado aŭ per gustumado?

Inter la ensendintoj de la ĝusta respondo ni disdonos 6 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 15-a de Januaro.

Bonvolu precize plenumi la konkursajn regulojn!

105-a konkurso.

ENIGMO

Ĉi tiu enigmo kaŝas interesan kaj oftege pruvitan opinion pri la amikoj. Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 103 literoj. Jen la ŝlosil-vortoj:

3, 102, 48, 56, 10, 43, 70, 60, 36 = nomo de sezono.

30, 99, 76, 83, 91, 35, 61 = migra birdeto.

93, 85, 39, 89, 103 = nomo de monato.

78, 20, 50, 15, 92 = imitema besto.

94, 22, 65, 14, 52, 100, 57, 17 = altvalora ŝtono.

47, 11, 59, 5, 72, 95, 17, 64, 36 = stranga besteto.

42, 80, 32, 19, 40, 67, 61 = bongusta frukto.

87, 8, 90, 27, 71, 34, 94, 17 = frukto en malmola ŝelo.

41, 21, 63, 54, 38, 16, 92 = mondparto.

46, 75, 7, 73, 18, 84, 103 = parto de la jaro.

25, 68, 81, 49, 37, 44, 36 = pago al oficisto.

69, 2, 74, 29, 56, 33, 12, 61 = orienta lando.

1, 31, 96, 55, 17 = floro kun forta odoro.

79, 58, 98, 13, 51, 103 = utila besto.

88, 45, 4, 77, 101, 92 = manĝaĵo.

53, 66, 24, 9, 50, 36 = poemo en la biblio.

60, 26, 6, 23, 61 = oni faras el ĝi ĉapelon.

7, 86, 28, 97, 62, 82, 32, 2 = donacema.

Inter la ensendintoj de la ĝusta solvo ni disdonos 6 premiojn. Solvoj estas akceptataj ĝis la 15-a de Januaro.

Bonvolu atente plenumi la konkursajn regulojn!

Kupono por la 104-a	Kupono por la 105-a

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj gluu ilin sur viajn solvojn.

LA MONDO ESTAS INTERESA

Kiel alte flugas la migrantaj birdoj? — nu germana astronomo dum la obrvado de la Luno rimarkis tra la telespo tre alte flugantajn birdojn. Komence ne dediĉis atenton al la afero, sed kiam plurfoje ripetiĝis, li decidis elkalkuli la tecon de la flugado, per astronomia kallado. La rezulto de liaj kalkuladoj estis, la divers-specaj migraj birdoj flugas al nova hejmo en alteco inter 650 kaj 00 metroj.

La vort-riĉeco de la lingvoj. — La ameca profesoro D-ro Robert Ramsay faris teresan statistikon pri la vort-trezoroj de diversaj lingvoj. Laŭ liaj kalkuloj la plej a lingvo de la mondo estas la angla gvo, ĉar ĝi havas pli ol 250,000 vorjn. Tamen el tiuj vortoj proksimume ,000 jam ne estas plu uzataj. La duan kon okupas la germana lingvo, kun 4,704 vortoj, el kiuj tamen nur 71,075 tas simplaj vortoj; la ceteraj estas kunetaĵoj. La tria plej riĉa lingvo estas la ngara, kiu posedas pli ol 120,000 vorjn. Sekvas la malnova greka lingvo kun 96,438 vortoj, poste la franca lingvo kun 93,032 vortoj. La itala lingvo havas nur 64,642 vortojn. La admirata latina lingvo estas malriĉega en komparo kun la cititaj kulturlingvoj, ĉar ĝi havas nur 51,666 vortojn.

La tertremo favore influas la radion. — Okaze de la lasta tertremo ĉe la regiono de Panamo la sudafrika scienculo D-ro Lunt faris eksperimentojn per radioaparato kaj sukcesis ricevi eksterordinare bonan kunligon kun Siberio. Por la eksperimento li uzis dissendan stacion de 3 vatoj, kun ondolongo de 21 metroj. El siaj spertoj D-ro Lunt konkludas, ke la tertremoj produktas en la atmosfero tiajn cirkonstancojn, kiuj estas tre favoraj por la radio-sendado.

La plej kara ĉapelo de la mondo. — S-ro William Leeds, la populara parolisto de la amerika radio, povas fanfaroni pri tio, ke li posedas la plej valoran pajloĉapelon de la tuta mondo. Antaŭ nelonge li asekuris ĝin je 15,000 dolaroj. S-ro Leeds portas sian rimarkindan ĉapelon ĉiam kun si, dum la vintro kaj somero, kaj eĉ en la studio li tenas ĝin sur la kapo. La ĉapelo tial estas altvalora, ĉar ĝi estas vera aŭtogram-kolekto. Okazis foje, ke iu fama eksterlanda profesoro faris radioparoladon. Kiam li volis foriri, s-ro Leeds petis aŭtogramon. Ĉar mankis papero kaj la profesoro rapidis, la eltrovema parolisto rapide metis sian blankan pajloĉapelon antaŭ la scienculon. De tiu tago li fervore kolektadas la aŭtogramojn kaj la ĉapelo estas jam preskaŭ plena de altvaloraj kaj tial asekurindaj nom-subskriboj.

Por kio oni elspezas pli multe? — Iu angla gazeto faris statistikon pri la sumoj elspezataj por lukso kaj amuzo. La statistiko montras interalie, ke la virinoj de la tuta mondo dum unu jaro elspezas por kosmetikaĵoj preskaŭ trioble tiom da mono, kiom da mono enspezas dum unu jaro ĉiuj kino-teatroj de la mondo kune. La virinoj elspezas por kosmetikaĵoj en la jaro pli ol cent milionojn da britaj funtoj, sed por la kino la tuta homaro (virinoj kaj viroj) elspezas en unu jaro nur kvardek milionojn da funtoj.

GRAFOLOGIO

En ĉi tiu rubriko niaj legantoj povas ricevi afologiajn karakter-bildojn. Oni ensendu mane ribitan leteron, indiku la sekson kaj aĝon, notu kaŝnomon, sub kiu la analizo aperu, kaj aldonu sumon de -.50 guld. por la kostoj.

„La vero". — La vero estas, ke vi estas simpla, na kaj ordema persono. Sed mi dubas pri tio, tio estas kaŭzita de tio, kion vi opinias. Jam via juneco, tiel ŝajnas al la grafologo, vi ne tis tia persono, kiun oni timis pro lia konduto. le! Atentu, kion la grafologo rimarkas en via algranda skriba laboraĵo: kontrolo, ripoza konolo, kun la fruktodona rezulto, ke vi malŝatas ri erarojn, kaj se vi faris, subite venas la deziro rigi ilin; kaj la rezulto estas plenumata sen tendo. Jen, laŭ la grafologo tio estas ĉe vi spirita ezonaĵo! Via skribaĵo plurloke indikas, ke via nimo preferas la spiritan riĉecon, ol la materian. estu tiel! Mia respondo je via demando estas: ame kiel nenio estas perfekta en ĉi tiu mondo, el ne ankaŭ la grafologio. Mi tute ne dubas pri o, ke vi restos fidela Esperantisto. Vi povus esti edagogo.

„Jomo". — La grafologo asertas, ke neniu venos, u kuraĝas diri: sinjoro „Jomo" estas mallaborema ersono. Laborante li uzas ĉiam la saman takton, el, ke lia skribo donas iom la impreson pri motona sekureco. Kiam sinjoro „Jomo" laboras, e vizitu lin kaj ne proponu al li, ke li akomanu vin promeni. La grafologo aŭdas lian resondon: „Ne ne! Mi ne estas preta." Kaj li trankile laboras plue. Estas interese vidi, kiel precize volas prizorgi ĉiun detalon. Sed li devas esti om rapida. Li estas bona homo, kaj li ne rifuzas elpon, se li povas fari. Sed nun la vera bonaĵo: estas sufiĉe severa, memstara, kaj kvankam ne goista, tamen li sufiĉe prizorgas sin mem. Se li ne sukcesos en io, emzemple ĉe ekzameno, ne estas lia kulpo, sed de la nevidebla fatalo. Li havas kapablon esti pedagogo.

„Kredo 304". — Ke vi ne povis rezisti al la tento analizigi vian karakteron, tio estas io, kion la grafolo sentis, vidante kaj pristudante vian skribaĵon. La fantazio ja formas grandan parton de via interno; kaj estas konata fakto, ke la fantazio kaj la scivolo puŝas unu la alian. Vi parolas kaj rakontas en facila maniero, kaj multe. Sed diru nur, ĉu estas ĉiam vera tio, kion vi rakontas? Vi estas bona persono, ofte eĉ tro bona, ĉar tro mola. Simpla vi tute ne estas kaj vi eĉ ne povas esti tia, ĉar via imago ne laboras en la ĝusta maniero. En via familia rondo oni neniam kaŝas, ke vi estas ŝanĝema. Multo okazas en via animo, kio neniam eliras. Malgraŭ via citita emo al parolo kaj rakontado, vi povas silenti kiel tombo.

„Ma J." — La skribinto devas esti sendube bona kaj simpatia persono, sed se li fariĝus mia amiko, mi volus lin peti: ĉu vi volas esti iomete malpli moviĝema? Mi bone komprenas, ke en via aĝo estas tre malfacile ŝanĝi la karakteron. Sed la nervemeco, kiu speguliĝas en via tuta skribaĵo, konsilas al la grafologo, doni al vi averton. Vi ŝatas la plezurojn, nu bone! Sed ne forgesu, ke ankaŭ la ripozo estas valora afero, precipe por homo, kia vi estas. Mi ne volas forgesi, ke vi volonte laboras, kaj ke vi nenion forgesas, kvankam tio kostas. Kaj nun lastan averton: (ni restos amikoj, ĉu ne?) ĉu vi ne povus fariĝi iomete pli ordema? La malordemo ne estas via natura kaj originala kutimo, sed ĝin kaŭzas via moviĝemo.

„Pacifisto". — Jen, vi uzas ĉi tiun kaŝnomon, kaj vere, via tuta manskribo montras pacemecon. Via interno estas virinece bona, sed feliĉe, la grafologo povas aldoni, ne mola. Mi ne vidas veran agitadon. Prefere vi faras ĉion en trankvila maniero, intertempe donante multan zorgon al la detaloj. Pli profunde pristudante vian manskribon mi vidas ĉe vi la sanktan emon, volonte protekti aliajn homojn. Tio estas tre bona ĉe junulo en via aĝo. Tiu sento de protektemo estas ĉe vi akompanata de diskreta formo de fiereco. Tio estas pura signo, ke via imago laboras korekte. Estas dezirinde, ke multaj tiaj junuloj vivu en la mondo. Averto: se ĉi tiun leteron vi skribis ne post laciga laboro, tiam estu singarda, ĉar la skribo indikas, ke vi bezonas regulan ripozon. Akceptu kun amikeco ĉi tiun bonintencan averton.

Mr. GUILLAUME,

la grafologo de La Praktiko. Li faras la grafologiajn analizojn de niaj legantoj, kun granda atento kaj plena diskreteco. En la internacia ekspozicio en Tilburg (Nederlando) lia grafologia oficejo vekis ĝeneralan intereson kaj atenton.

LA REDAKCIO RESPONDAS

S-ro S. C. W. en S. (Ned.) — 1. Perforeeren = trui, perfori. *Zegelrecht* = mark-imposto. *Maat* (muz.) = takto. *Priesterkoor* = pastra horo. *Leekenapostolaat* = laika apostolado. *Stemmig* = modesta. *Onder de hamer komen* = esti metata en aŭkcion. — 2. La diferencon inter la vortoj *flugmaŝino, aeroplano* k.t.p. vi trovas en la 21-a numero de La Praktiko (Septembro 1933) sur la 3-a paĝo. — 3. *Korpa amo* = lichamelijke liefde (in tegenstelling van geestelijke liefde). *Moninverto* = geldinversie. — 4. La ceterajn vortojn serĉu en nia rubriko „Vortaro". Vi bezonas aĉeti la Plenan Vortaron, en kiu vi trovas la plejmulton de la demanditaj vortoj. Aĉetebla ĉe La Praktiko, prezo kun sendkosto 6.20 guld.

S-ro R. G. en T. (Ital.) — La hispanaj poŝtmarkoj, per kiuj vi pagis, estas senvaloraj, ĉar jam uzitaj. Nur la UEA-kupono estas bona. La anonco aperos.

S-ro F. P. en W. (Belg.) — Laŭ nia scio ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto speciala fak-vortaro pri arthistorio kaj prahistorio. Povas esti, ke ĝi aperos nur tiam, kiam ankaŭ nia epoko apartenos al la prahistorio... Ni rekomendas al vi legi la bonegan libron „Arthistorio", jus eldonitan en Budapest. Ĝi estas mendebla ĉe La Praktiko. En tiu libro vi trovas ĉiujn fak-vortojn kaj vi praktike ellernos ilin.

S-ro H. N. N. en T. (Dan.) — La vortoj *„tiel"* kaj *kiel"* signifas manieron kaj gradon. La vortoj *„tiom"* kaj *„kiom"* signifas kvanton kaj nombron. Pro tio ofte ambaŭ vortoj, kun „el" kaj „om", estas uzeblaj. Ni konsilas la jenajn formojn: *Kiel longa estis la vojo? — Kiomjara vi estas?* (La formo „kieljara" estas malbona.) — *Kiel multaj homoj venis? — La akvo leviĝis tiel alten. — Ili forrestis tiel longe.*

S-ro K. L. en G. (Sved.) — La vortoj *kio, tio, ĉio, io* kaj *nenio* ne estas substantivoj, sed substantivaj (substantivecaj) pronomoj.

S-ro E. C. en R. (Ned.) — La strangaj vortoj, kies signifon vi demandas, estas verŝajne rezultoj de preseraroj. Se vi indikus la lokojn, kie vi trovis ilin, ni povus trovi la klarigojn. — *Bulpiedoj* = balpooten (de tablo aŭ ŝranko).

S-ro U. T. en Japanujo. — *Alkledo* = ledo de alko (norda cervo). — *Tukumana* = adjektiva formo de la urbonomo Tucumán (en Argentino).

S-ro E. A. en L. C. S. C. (Franc.) — Por abonpago vi sendis servo-kuponetojn de UEA, sed ili ne havas mon-valoron. Ili nur pruvas, ke vi estas ano de UEA. Por unujara abono sendu neuzitajn francajn poŝtmarkojn en valoro de 25 frankoj.

S-ro A. C. en S. (Polujo) — Vi sendis al ni tute senvalorajn uzitajn poŝtmarkojn anstataŭ la abonmono. Tiamaniere oni ne povas aboni La Praktikon.

F-ino M. F. J. Z. en V. (Ned.) — La „respondkupono" estas papereto aĉetebla en la poŝtoficejoj kaj valoranta la koston de afranko por unu letero al eksterlando. Detalajn klarigojn kun bildoj vi trovas en la 8-a numero de La Praktiko (Aŭgusto 1932) sur la 8-a paĝo.

S-ro C. A. en T. (Franc.) — 1. „Vi estas la plej lerta komikisto de Parizo." En ĉi tiu frazo la prepozicio „de" estas ĝusta. Vi estas prava, oni povas uzi ankaŭ la prepozicion „en". — 2. Ni ne konas esceptojn ĉe la uzado de la vorto „plej".

S-ro B. G. en M. (Litov.) — 1. *Aranĝi* = meti en la ĝustan ordon. Ekz.: aranĝi la liton = meti la litajojn en la ĝustan ordon. *Prepari* = antaŭaranĝi; fari la necesajn agojn, por ke io efektiviĝu. La du vortoj ofte havas la saman signifon. Ekz.: aranĝi aŭ prepari la kongreson. — 2. *Angviso* = nomo de besto, simila al serpento. — 3. *Miopa* = vidanta nur de proksime. — 4. *„Drivas"* objekto sur la akvo, kiam la akvofluo aŭ la vento movas ĝin. — 5. Jes, la fabrikisto transdonas siajn varojn *„komisie"* aŭ *„por komisia vendado"* al la komercisto.

S-ro M. T. en R. (Franc.) — Dankon pro la senditaj enigmoj. Ni elektos la uzeblajn.

F-ino E. J. en B.-M. (Rum.) — En la urbnomo „Den Haag" la vorteto „Den" estas artikolo („la"). Tamen en Esperanto oni ne diras „La Hago", sed nur: „Hago". En la nederlanda lingvo oni ne kutimas forlasi ĝin.

Al pluraj. — Ni interŝanĝas La Praktikon nur kun egalvaloraj Esperanto-lingvaj gazetoj. Kontraŭ nacilingvaj gazetoj, reklamiloj kaj flugfolioj kaj senvaloraj paperetoj ni ne sendas La Praktikon.

S-ro A. C. B. en S. (Angl.) — La Praktiko estas abonebla ankaŭ ĉe Brita Esperantista Asocio en Londono. Abonprezo por unu jaro: 5 ŝilingoj.

S-ro C. N. L. en B. (Ned. Hind.) — Ni povas ĝojigi vin per nia konstato, ke vi videble progresas en nia lingvo. Ni konsilas, ke vi legu multe kaj korespondu en Esperanto.

S-ro L. R. en P. (Franc.) — 1. Ni konsilas, ke anstataŭ multe studadi la gramatikon de Esperanto, prefere uzadu ĝin praktike per legado kaj korespondado. Tiam vi retrovos la ĝojon kaj kuraĝon. — 2. La diroj de iuj tro kritikemaj samideanoj, ke *„Esperanta literaturo ne ekzistas"* kaj ke *„la Akademiaj cirkuleroj enhavas erarojn"*, estas nur nepripensitaj troigoj aŭ intencitaj kiel spritaĵoj. Mankoj ekzistas ĉie, do ankaŭ en nia movado. Sed la afero de internacia lingvo estas tiel grandioza, ke ni devas malatenti aŭ forigi la mankojn kaj plenforte labori por la venko de Esperanto. — 3. *Siziĥa laboro* = laboro simila al la laboro de la mitologia Sizifo, reĝo de Korinto, kiu devis en la infero suprenruli grandan rok-pecon sur la pinton de monto. Ĉar la roko ĉiam reruliĝis de la montpinto, li neniam povis fini tiun vanan laboron. — 4. „Erota" = erotika. — 5. „Statetoj". Preseraro; ĝuste: ŝtatetoj. — 6. „Dikatoro". Preseraro; ĝuste: diktatoro. — 7. „Multiu samideano" estas forjetinda provaĵo anstataŭ la bonaj esprimoj: „Multaj samideanoj" aŭ „multe da samideanoj". — 8. „Iduso" estas la nomo de la 15-a tago de la monato en la antikva roma kalendaro. — 9. „Pensio" = salajro pagata al maljuniĝinta, ne plu laboranta oficisto. „Pensiono" = domo, kie oni manĝas kaj loĝas. — 10. „Sembara". Preseraro; ĝuste: senbara. — 11. La vorto „kardinala" estas internacie uzata en la signifo de „gravega", „ĉefa". Tamen en Esperanto ni ne uzu ĝin en tiu signifo. — 12. „Larmoj fluis tra ŝiaj vangoj." Estas pli bone diri: „sur ŝiaj vangoj", ĉar la vorto „tra" signifas eniron kaj eliron, sed la larmoj ne eniras en la vangojn, nek eliras — 13. La vorto „ne" devas stari ĉiam antaŭ tiu vorto, kiu estas neata. Jen via ekzemplo:

a) Mi **ne manĝas** pomon.
b) Mi manĝas **ne pomon** (sed piron).
c) **Ne mi** manĝas pomon (sed mia frato).

Ĉar en Esperanto ne ekzistas fiksa vort-ordo, vi povas laŭvole ŝanĝi la ordon, sed la vorto „ne" devas resti ĉiam antaŭ tiu vorto, al kiu ĝi apartenas kaj kun kiu ĝi formas unu ideon. — 14. Estas eraro instrui, ke la prepozicioj estas anstataŭeblaj per akuzativo. Jes, kelkfoje, malofte. La bona konsilo estas: uzu prefere prepozicion, ol akuzativon. — 15. Ke en Esperanto la akuzativo ne estas deviga, sed oni devas ĝin uzi nur kiam la frazo ne estas sufiĉe klara, estas granda sensencaĵo. Verŝajne vi miskomprenis tiun profesorinon. Supozeble ŝi aludis al kazoj, en kiuj oni dubas pri la ĝusteco de la akuzativo. Ekzemple: „skribi sur la papero" aŭ „skribi sur la paperon". Ne legu plu tiajn gramatikajn harfendadojn, sed koncentrigu vian atenton kaj energion al la disvastigado de Esperanto. — 16. Disputoj kaj malkonkordoj ĉie kaj ĉiam ekzistas. Nobla homo levas sin super ilin kaj iras rekte al la celo. — 17. Ni ne serĉis kaj ne serĉos la erarojn en la Enciklopedio. Ni estas certaj pri tio, ke ĝiaj redaktintoj faris konscience kaj honeste sian eblon. Eĉ se ĝi havas erarojn, kio ĉe ĉiu homa verko estas memkomprenebla, ĝi meritas sian prezon. Ĝi estas nepre aĉetinda por ĉiu vera Esperantisto. Se ĝi ne enhavus eĉ unu eraron, ĝia prezo devus esti multe pli alta, kaj tiam ni ne povus aĉeti ĝin.

VORTARO

Anso = la prenilo sur la pordo, per kiu oni fermas ĝin.
Antagonisto = kontraŭulo, kontraŭbatalanto.
Atrakcio = allogaĵo.
Baledo = teatra danco kun muziko kaj mimiko, sen parolo.
Baroka = nomo de stilo en la kunstru-arto.
Bukso = nomo de ĉiam verda arbeto (lat. *buxus*).
Ekslibriso = surskribo aŭ bildo en libroj, montranta la posedanton.
Eparĥio = episkopa teritorio (ĉe la greka eklezio).
Erao = epoko, laŭ kiu oni kalkulas la tempon.
Frekventi = regule vizitadi (ekz. lernejon, prelegaron).
Galvana = speco de elektra fluo.
Geniuso = genio = dio ĉe la antikvaj romanoj; ŝirmanta spirito.
Geto = juda kvartalo (*ghetto*).
Helica = ŝraŭb-forma.
Kalcio = nomo de kemia elemento.
Kalikoto = nomo de kotona teksaĵo.
Kanvaso = speco de lina tolo.
Kekso = kuko (*cakes*).
Malakito = bela ŝtono, uzata por fari juvelojn.
Malvo = kreskaĵo kun belaj floroj (lat. *malva*).
Maronitoj = nomo de kristana sekto en la regiono de la Libanona montaro.
Mesaĝisto = portanto de informo.
Nestoro = plejaĝulo.
Opriĉniko = membro de la korpogvardio de la caro Ivano IV-a.
Perdriko = nomo de kampa birdo (lat. *perdrix*).
Pilo = kemia fonto de elektra energio.
Raguo = manĝaĵo (vianda, fiŝa aŭ legoma) kuirita en spicita saŭco
Refreno = rekantaĵo ĉe poemoj
Relajsi = transpreni radio-disaŭdigon de unu stacio al alia
Roboto = deviga laboro; maŝin-homo, fabrikita por laboro
Seanco = spiritista kunsido
Sekalo = speco de greno (lat. *secale*).
Sekvestri = laŭleĝe malliberigi objekton (ekz. la posedaĵon de ŝuldanto)
Sino = ĉe sidanta homo tiu angulo, kiun formas la femuroj kaj la trunko (ekz.: la infano sidas en la sino de la patrino)
Skinko = nomo de besto
Slojdo = hejma industria manlaboro (en Svedujo)
Sparko = elektra fajrero
Statuto = fundamenta regularo de societo
Ŝanceli = starantan objekton puŝadi tien kaj reen
Ŝanelo = la plej profunda parto de rivero
Ŝulo = ludo, ĉe kiu oni ŝovas lignajn disketojn sur breto
Talaro = longa oficiala robo de juĝistoj, advokatoj, profesoroj, pastroj.
Teroro = regado per timigo.
Tigo = la trunketo de la herbecaj kreskaĵoj.
Tomahaŭko = la milita hakilo de la indianoj
Torturi = kruele turmenti
Totano = nomo de birdo, parenca kun la skolopo
Tribo = popoleto konsistanta el parencaj familioj
Trogo = longforma ujo, el kiu la porkoj manĝas
Uromastiko = nomo de besto
Vertrago = speco de hundo, kun longaj piedoj

FILATELISTAJ ESPERANTISTOJ!!! ATENTU!!!

Se vi volas interŝanĝi poŝtmarkojn kun alilandanoj, sendu vian adreson al: **I.P.I., poŝtfako 2, en CUYK a/M.,** Nederlando. (Adm.: F-ino S. Ebben.)

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

ARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — etu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. ilthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

EGINDA LIBRO: Princo Serebrjanij. Historia nano verkita de grafo A. Tolstoj. El la rusa gvo majstre tradukis s-ino M. Ŝidlovskaja. 284 ĵoj. Prezo kun sendkosto: 2.— ned. guld. Aĉetebla La Praktiko.

VI ESTAS prospera, kontenta, amata, kiel vi iras? Se ne, legu la libron „BONHUMORO" Paul Nyssens, kaj via vivo fariĝos pli feliĉa. — ĝo kun sendkosto 1.25 ned. guld. — Aĉetebla La Praktiko.

LIBRO-LOTERIO de LA PRAKTIKO

Rapidu aĉeti lotojn, por ke la tirado povu baldaŭ okazi! Legu la detalajn informojn en la Januara numero!

LA LISTO DE LA PREMIOJ (DAŬRIGO):

161 Ĉinaj noveloj. De O. Erdberg.
162 Solidareco. Novelo de V. Kuzmiĉ.
163 Rememoroj de Esperantisto. De A. D. A.
164 Preter la vivo. Poemaro de Julio Baghy.
165 La morto de Smail Aga Ĉengijiĉ.
166 La Reĝo Judea. Dramo. Verkis „K. R." El la rusa lingvo tradukis V. Devjatnin.
167 La vizio. La veŝto. De B. Prus.
168 La mistero. Unu horo. De P. Romanov.
169 Fraŭlino Ida. La vojo malsupren. Trad. el la hungara lingvo.
170 La hontemulo. Unua kiso. De H. Bang. Trad. el la dana lingvo.
171 Amo kaj pano. Aŭtuno. De A. Strindberg. Trad. el la sveda lingvo.
172 La problemo de internacia lingvo. De Drezen.
173 La senkorpa mistero. De Batalanto.

GARDATAJ LOTOJ (daŭrigo). — Boyer 6962—6972; Dauge-Monin 7001—7011; Giedra 5348—5362; Nejedli 6978—6988.



zo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —.45 ned. guld. (= 3 ndkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.

voro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

AVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ je je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. redakcio.

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

= sinjoro
= sinjorino
= fraŭlino
= deziras
. = korespondi

interŝ. = interŝanĝi
L = letero
PK = poŝtkarto
PI = poŝtkarto ilustrita
PM = poŝtmarko

bfl. = la poŝtmarkon gluu sur la bildan flankon
k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

MORIGO. — La jenaj anoncintoj estas petataj respondi: S-ro Isao ino en Jokohama kaj s-ro José Hernando en Bogotá (al f-ino D. Streuli Uetikon a/See, Svislando). — S-ro A. Purlys en Telŝiai kaj s-ro akács en Debrecen (al s-ro H. Merkus en Hago).

BELGUJO

ourt (Namur). — S-ro F. Penninck, 37-jara impost-oficisto, 13 rue de avaux. — Kun ekstereŭropaj landoj, p.ĉ.t. (ne pri politiko, ne PM!). erte respondos.

ĈEĤOSLOVAKUJO

dorf (Krnov).. — S-ro Wili Cibulka, teks-oficisto, Joh. Mihatschgasse — Dez. kor. pri diversaj fak-temoj kun teks-oficistoj el Sovjetunio, ersujo, Suda kaj Centra Ameriko, Ĉinujo, Turkujo, Afriko k.a.

DANUJO

y (Selando). — S-ro Aage Söndergaard, 20-jara ĝardenisto, Virumvej 9. — PI. Rapide respondos.

FRANCUJO.

(Seine et Loire). — S-ro E. Ridard, Chevannes. — K.ĉ.l.
ndelys (Eure). — S-ro Louis Caron, librovendisto, Place de l'Église. — ez. interŝ. malgrandajn fotografaĵojn kaj koresp. pri malnovaj kasteloj, moj, pagodoj k.t.p.

GERMANUJO

bei Bitterfeld. — S-ro Otto Mennicke, 25-jara fraŭlo, Gartenstrasse — L, PI, k.ĉ.l. kun natur-geamikoj. Interŝ. kaj kolektas PM, turismajn ospektojn, Esp-aĵojn.

JAPANUJO

apud Akasi. — La membroj de la „Japana Koresponda Grupo" dez. r. kun ekstereŭropaj samideanoj. Adreso: S-ro Sumio Okabe.

NEDERLANDO

cht. — F-ino Janny van Beek, 16-jara lernantino en duagrada lernejo, llensstraat 58. — PI, k.ĉ.l.
aan Zee. — S-ro E. J. van Zurk, 22-jara oficisto, M. de Ruiteraat 33. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe resp.

Paterswolde (Gem. Eelde). — F-ino Bep Sieling, instruistino, Huize „'t Onland", Villapark. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Roelofarendsveen. — S-ro P. J. Spruyt, sekr. de la Esp-klubo „Sen Batalo Ne Venko", B. 234. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Rotterdam. — F-ino M. Vermaas, 23-jara masaĝistino kaj instruistino de saniga gimnastiko, Nieuwe Binnenweg 340. — Dez. kor. k.ĉ.l., precipe kun samprofesiul(in)oj.

Utrecht. — S-ro J. N. H. Wouterse, pentristo, Amsterdamsche straatweg 456. — L, PI, kun Sovjetunio kaj ekstereŭropaj landoj, prefere kun Palestino.

Voorburg (Z.H.) — S-ro J. Brouwer, Buitenruststraat 6. — Dez. kor. kun sudeŭropaj landoj kaj Sud-Ameriko. Ne kun filatelistoj. Certe respondos.

Voorburg (Z.H.) — F-ino M. F. J. Zaat, piano-instruistino, Westeinde 89. Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

PORTUGALUJO.

Santa Comba Dao. — S-ro Cesar Anjo (filo), 19-jara medicina studento. — Dez. kor. k.ĉ.l., prefere kun studentinoj. Certe respondos.

RUMANUJO

Fratelia B., via-lânga Timiŝoara. — S-ro Aleksandro Gál, Strada X., N-ro 45. — PI, p.ĉ.t., kun Azio, Afriko kaj Aŭstralio. Certe respondos.

SOVJETUNIO

Leningrad. — S-ro Lenty Tregubenko, inĝeniero, Poŝtkesto N-ro 1. — Dez. ricevi gramofonajn katalogojn kaj ĵurnalojn dediĉitajn al gramofonoj kaj apartenaĵoj. Certe respondos kaj rekompencos.

SVEDUJO

Strömsnäsbruk. — Dek anoj de daŭriga kurso deziras korespondi. Unufoja respondo certa. Adreso: S-ro Albin Soneson.

Por la ekzamenoj !

Jen tri gravaj libroj, kiujn ĉiu ekzamen-kandidato devas posedi:

Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado. Verkis s-ro *J. R. G. Isbrücker*, vicprezidanto de UEA, membro de la Esp-ista Akademio. — Prezo: —.75 guld.

La Esperanta Literaturo. Kun demandaro kaj resumoj de originalaj verkoj. Verkis s-ro *M. de Waard*. Esperanto-instruisto. — 64 paĝoj. Prezo: —.75 guld.

Esperanto-Examenopgaven voor dipl. A en B, met vertalingen. De *J. C.* kaj *J. R. G. Isbrücker*. — 128 paĝoj. — Prezo: —.90 guld.

Aĉeteblaj ĉe la eldonejo:

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto
Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando.

Pagi oni povas nur:

PAGO DE LA KOTIZO OKAZAS PLEJ FACILE
al la konto de la pola poŝtŝparkaso sub la nomo
POCZTOWA KASA OSZCZEDNOSCI-WARSZAWA
laŭ jenaj numeroj en jenaj landoj:

Aŭstrio: Wien	No. 79.500
Belgujo: Bruxelles	No. 244.200
Ĉeĥoslovakio: Praha	No. 89.600
Danujo: Kjöbenhavn	No. 14.972
Francujo: Paris	No. 600.12
Nederlando: 's Gravenhage	No. 145.510
Jugoslavujo: Beograd	No. 65.049
Latvujo: Riga	No. 4.030
Svislando: Bern	No. III.6.500
Svedujo: Stockholm	No. 4.312
Italujo: Roma	No. 1/10110

SUR ĈIUJ ENPAGILOJ DEVAS ESTI LA JENA TEKSTO: ADM. LITERATURA MONDO KRAKOW NR. 403.148

EN ALIAJ LANDOJ ONI PAGU

AŬSTRALIO: L. E. Thomson, Esperanto ĉe Commonwealth Guvernement Savings Bank Account Nro 496.567.
ESTONUJO: Hilda Dresen, Tallinn, Postkast 6.
HUNGARUJO: Poŝtĉekkonto de Bleier Vilmos Nro 25168.
POLUJO: Administracja Literatura Mondo, Krakow Nro. 403148.
RUMANUJO: Rumana Esperanto-Instituto, Cluj str. Bravilor 15.
JAPANUJO: Japana Esperanto Instituto, Tokio, Hongoo-Motomaĉi I, kaj Tokio-Do. Esperanto Fako, Tokio, Kudan, Koojimaĉi.

El ĉiuj aliaj landoj oni sendu poŝtmandatojn al Pocztowa Kasa Oszczednosci, Krakow, kto Adm. Literatura Mondo nro 403148 Polujo.

Ni akceptas ankaŭ internaciajn respondkuponojn poŝtajn en la valoro de 0.30 sv. fr. po unu.

Aliĝojn kaj pagojn cetere akceptas la reprezentantoj de Literatura Mondo kaj plejparto de la esperantistaj librovendistoj.

300 BILDOJN KAJ 1100 TITOLVORTOJN

en densega komposto prezentas al vi la

UNUA VOLUMO

de

Enciklopedio de Esperanto

sur 272 teksto- kaj 112 bildopaĝoj grandformataj.
La dua volumo ampleksos proksimume 540 paĝojn.
Prezo 30.— frankoj svisaj broŝurita kaj 34.— frankoj svisaj bindita.
Aldonu 10 % por sendkostoj.
LA PREZO ESTAS PAGEBLA EN DU EGALAJ PARTOJ.
Tuj post pago de la unua duono ni ekspedas la unuan volumon.
El landoj, tie ĉi ne menciataj: per bankĉekoj, Postal Orders, aŭ poŝtmandatoj al
P. K. O. Kraków, Polujo, Adm. Literatura Mondo, Nro 403.148.
aŭ per internaciaj poŝtaj respondkuponoj. Unu kuponon ni akceptas en la valoro de 0.30 sv. fr.
Eldonis **Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj Budapest, IX, Mester ucca 53. V. 5. Hungarujo.**
Mendantoj de tri ekzempleroj ricevas unu senpagan.
Novaliĝantoj al Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj rajtas ricevi ambaŭ volumojn por 14.— sv. fr.

Vi trovas ĉe ni interesajn facillegeblajn malmultekostajn esperanto-romanojn!

WAGNALLS:
Palaco de danĝero
Alloga rakonto pri la tempo kaj moroj de Ludoviko XV-a kaj de lia favoritino Madame la Pompadour. Aventuroj, intrigoj, festoj, ĝojoj,... sed la fino estas bona.
Bindita RM 4.— (2.40 guld.)

ARISIMA:
Deklaracio
Ĉi tiu romano montras, kiel japanaj junuloj pensas, suferas kaj agas. Legante vi sentas, ke la ekstrema Oriento vin tuŝas.
Kartonita RM 1.60 (1.— guld.)

JEAN FORGE:
Saltego trans Jarmiloj
Vizito per tempomaŝino al la Roma imperiestro Nero. Plej amuza kaj alloga rakonto pri la renkonto de la moderna kaj antikva kulturoj.
Bindita RM 2.75 (1.65 guld.)

Abismoj
Migrado en la abismajn regionojn de la homaj animoj. Flua kaj facila stilo katenas la leganton ĝis la lasta paĝo.
Broŝurita RM 1.75 (1.05 guld.)
Bindita . RM 2.75 (1.65 guld.)

H. A. LUYKEN:
Stranga Heredaĵo
Strangaj aventuroj, detektivaj okazintaĵoj, amaj intrigoj. Romano originale verkita.
Broŝurita RM 3.— (1.80 guld.)
Bindita . RM 4.— (2.40 guld.)

Pro Iŝtar
Romano el la antikva Babela historio. — Flua lingvo, facila stilo kaj romaneca temo estas la grandaj preferoj de ĉi tiu romano, kiun oni legas kun granda ĝuo.
Bindita RM 4.— (2.40 guld.)

Ĉiu samideano ankoraŭ ne leginta ĉi tiujn belegajn romanojn, povas havigi al si horojn de honesta distraĵo kaj ĝudona legado.

Mendu ĉe via libristo aŭ senpere ĉe la eldonejo:
FERDINAND HIRT & SOHN, ESPERANTO-FAKO
LEIPZIG C 1, Salomonstrasse 15 (Poŝtĉekkonto: Leipzig 52372)
La libroj estas mendeblaj ankaŭ ĉe LA PRAKTIKO!

Esperanto-Presejo PIER WESTERBAAN, Vaillantlaan 523—529, Den Haag (Nederlando).

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 11 (35)

★

Novembro
1934

„Nomen est omen."

Ĉi tiu latina frazo instruas, ke la nomoj ofte havas trafan signifon. Perfekte plenumiĝis ĉi tiu diro antaŭ nelonge en Nederlando. Jen la amuza kaj instrua historio:

Dum ĉi tiu jaro en kelkaj nederlandaj urboj aperis malbone vestita juna samideano, kiu ĉie prezentis sin kiel „sinjoro Garázda", hungara Esperantisto el la urbo Tsjakow. Bone parolante nian internacian lingvon li sukcesis enŝovi sin en la fidon kaj amikecon de multaj samideanoj. La afablaj nederlandaj Esperantistoj, kiuj ĉiam estas pretaj helpi fremdajn samideanojn, ne rifuzis al li la petitan gastigon kaj eĉ monprunton.

Dum sia bela mondvojaĝo sinjoro Garázda trapasis ankaŭ la nederlandan rezidencan urbon Hago, kaj vizitis tie la konatan Esperantistan familion Isbrücker. La mastrino, sinjorino Isbrücker, kondukis lin en la salonon kaj interparolis kun li pri Hungarujo, lia bela hejmlando, kaj pri lia interesa vojaĝado tra la fremdaj landoj. S-ro Garázda montris sin bone dresita gasto; li superŝutis Nederlandon kaj ĝian gastaman popolon per ĉiuj komplimentoj kaj laŭdoj. Ankaŭ s-ino Isbrücker volis pruvi, ke ŝi estas bona, atentema gastigantino. Por fari al la hungara gasto agrablan surprizon en la malproksima fremdlando, ŝi iris al la telefona aparato kaj vokis min, kies gepatra lingvo estas la hungara, por ke mi hungarlingve salutu per la telefono mian samlingvanon.

Aŭdinte la nomon de la gasto, mi iom surpriziĝis, kvankam lia nomo estis tute hungara vorto. Sed la nomo de la urbo ne estis konata al mi. Kaj en Hungarujo certe ne ekzistas loko kun la nomo Tsjakow (laŭ la ortografio de s-ro Garázda mem en la gastolibro de la familio Isbrücker), ĉar tian vorton ne toleras la hungara lingvo.

Mi faris al s-ro Garázda kelkajn demandojn en la hungara lingvo, sed li respondadis al mi en Esperanto, per frazoj tute ne rilatantaj al miaj demandoj. Mirante pri tiu stranga fenomeno, mi demetis la telefonilon.

Tuj post la telefonado s-ro Garázda — laŭ la rakonto de s-ino Isbrücker — subite adiaŭis kaj forrapidis.

Post kelkaj tagoj ni legis en gazeto, ke s-ro Garázda sen sia volo fariĝis gasto de la — policejo, kie evidentiĝis, ke li en la privata vivo nomiĝas sinjoro P. D. C. Groen, loĝas en Amsterdamo kaj estas pursanga nederlandano.

Sed kial mi diris, ke *„nomen est omen"*? Ĉar la artista nomo de nia entreprenema samideano, la hungara vorto „Garázda", signifas: *fripono*. Kial li prenis al si tiun danĝeran nomon? Mi ne scias. Supozeble iu ŝercema hungaro rekomendis al li tiun vorton, kiel trafan nomon.

Esperantujo estas granda. Ĝi havas tre diversajn civitanojn. Tial estas bone atenti!

Andreo Cseh.

La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 2.50 nederl. guldenoj, por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Unu numero kostas -.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., ½ p. 45.-, ¼ p. 25.-, ⅛ p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita

ESPERANTISTA KRISTNASKA LIBERTEMPO

en la Esperanto-Domo en Arnhem, 24. Dec. 1934 — 1. Jan. 1935

Ĉiu Esperantisto estas tutkore invitata.

PROGRAMO:

24. Dec. Alveno de la gastoj. Vespere intima familia kunesto.
25. Dec. Mateno libera. Posttagmeze komuna promeno. Vespere intima kunesto, ludoj.
26. Dec. **Kunveno de la „Nederlanda Esperanto-Gruparo". Vespere festkunveno kun parolado.**
27—29. Dec. Dum la tago **amuzaj kaj instruaj konkursoj** (gramatiko, vortaro, societaj ludoj k.t.p.) **kun premioj. Vespere paroladoj.**
30. Dec. Promenoj. Vespere intima kunveno.
31. Dec. Promenoj. Vespere **jarfina kunveno kun parolado** kaj ludoj.
1 Jan. Promenoj. Kunveno kun ludoj.

La paroladojn en la vesperoj faros konataj en- kaj eksterlandaj samideanoj, inter kiuj: *Andreo Cseh, P. Heilker, f-ino M. Saxl* k.a.

La Esperanto-Domo estas **riĉe ekipita per ĉiuspecaj societaj ludiloj** (ŝako, damo, ŝulo, domino, diversaj kvartet- kaj kartludoj k.t.p.) kaj posedas **belan bibliotekon.** La domo estos dum la tuta tempo **bone hejtata** per centra varmigo. Ĉiu gasto sentos sin en varma kaj ĉarma hejmo, en paca kaj amika, vere Esperantista atmosfero.

Kotizo ne estas! — Pensionprezoj: 3.50 guld., 3 guld. kaj 2.50 guld., laŭ la rango de la ĉambro. Estas rekomendinde aliĝi frue kaj mendi ĉambron. Adreso: Esperanto-Domo, Esperantolaan 3, Arnhem. — Telefono 26060. Poŝtkonto 13848.

Ankaŭ eksterlandaj gastoj estas kore invitataj!
Venu grandnombre! En ĝojo kaj harmonio ni finu ĉi tiun jaron!

L. MOREAU, administranto de la Esperanto-Domo.

„FLORETOJ"

PORINFANAJ RAKONTOJ TRADUKITAJ DE LA „VENDREDA KLUBO" EN WINSCHOTEN (Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj bildoj de C. Jetses

Prezo ..... 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la eldonisto:

J. B. WOLTERS

Groningen — Den Haag — Batavia.

ATENTU! **Se vi volas sendi monon al La Praktiko, bonvolu observi la sekvantajn:**

La monon oni povas sendi per *poŝtĉekkonto* (Wien A-156933, Praha 500362, Kopenhago 34941, Berlin 129527, Budapest 13201, Zagreb 41345, Riga 4870, Den Haag 162626, Warszawa 190203, Stockholm 74126, Bern III. 6761), *per poŝtmandato,* per *bankĉeko* aŭ per *papermono* en letero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj de la sube nomitaj landoj, kalkulante la valoron laŭ la suba tabelo:

1.— ned. guldeno valoras en:

Aŭstrio 3.70 ŝil., Belgujo 15 fr., Britujo 2 ŝil. 10 p., Bulgarujo 58 lev., Ĉeĥoslovakujo 17 kr., Danujo 3.10 kr., Estonio 2.60 kr., Francujo 10.35 fr., Germanujo 1.85 m., Hispanujo 5 pes., Hungarujo 3.30 p., Italujo 8 lir., Jugoslavio 30 din., Latvujo 2.20 l., Norvegujo 2.80 kr., Polujo 3.70 zl., Rumanujo 80 l., Svedujo 2.70 kr., Svisujo 2.10 fr.

Pro la freneza dancado de la mon-valoroj ĉi tiu tabelo validas nur ĝis la apero de nia sekvanta numero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtaj respondkuponoj. 1 kupono = —.15 ned. guld.

LA REZULTO DE LA KONKURSOJ

92-a konkurso. La redakcio ricevis de 45 personoj la solvon de ĉi tiu gramatika tasko, aperinta en la 29-a numero (Majo 1934) de La Praktiko. Ni kore gratulas al ĉiuj diligentaj solvintoj, pro la plenumita laboro. La ĝusta solvo aperas en ĉi tiu numero de La Praktiko, sur la 3-a paĝo. Por povi disdoni la promesitajn 6 premiojn, nia konkursa komitato ekzamenis la ensenditajn solvojn. Evidentiĝis, ke nur 2 solvoj estas tute egalaj kun la oficiala solvo. Do nur la ensendintoj de tiuj du solvoj povis ricevi premion. Ili estas: S-ro **K. Mejers** en Usma (Latvujo) kaj s-ro **P. Princis** en Usma (Latvujo). — Inter la nepremiitaj solvoj estas kelkaj tre bonaj, kiuj nur en unu aŭ du vortoj diferencas de la oficiala solvo. Ili estas de: F-ino **M. A. Crispin** en Thorpe Bay (Anglujo), f-ino **A. B. Holness** en New Barnet (Anglujo), s-ro **Hj. Olsson** en Trälleborg (Svedujo) kaj s-ro **R. Prince** en Maubeuge (Francujo).

93-a konkurso. En la 29-a numero de La Praktiko ni publikigis la vizitkarton de nia fervora juna samideano, sinjoro Johano Verdemul, kaj ni demandis, kion signifas sur la vizitkarto la mallongigo „U.L.D.N.R.A.", kies aktiva membro estas s-ro Verdemul.

Nia redakcio ricevis respondon de 26 personoj. Estas tre interese vidi, kiel klarigas niaj legantoj tiujn misterajn literojn. Jen kelkaj klarigoj:

Universala Ligo De Nederlandaj Radio-Amatoroj.
Universala Ligo De Neŭtralaj Radio-Asocioj.
Unua Ligo De Nederlandaj Radio-Amatoroj.
Universala Lingva Delegacio Neŭtrala Rusa Asocio.
Universala Ligo De Nigraj Radikalaj Abstinenculoj.
Universala Ligo De Naciaj Raportistaj Asocioj.
Universala Ligo De Ne Raciaj Apokopemuloj.
Unua Ligo De Nederlandaj Raciaj Aŭtoritatuloj.
Unika Legenda Daltonisma Narkotika Rudimenta Astrologaro.
Universala Ligo De Neŭtralaj Ripoz-Amantoj.
Unuigi La Diversajn Naciojn Reĝigante Amon.
Universala Ligo De Nudisma Racia Asocio.
Unu Lingvo Direktu Nian Rondon Amike.
Unu Lingvo Devus Nin Reciproke Asocii.
Universala Ligo De Ne Regule Abonantoj.
Unuiĝo Landa De Nederlandaj Radio-Amatoroj.
Universala Ligo De Niaj Revuo-Abonantoj.
Universala Ligo De Nedogme Religiaj Asocioj.
Universala Ligo De Neniam Remilitantaj Amikoj.
Unua Ligilo De „Nepre-Respondo" Asocio.
Urba Ligo De Nešanceleblaj Religiaj Agantoj.
Unuiĝo Libera De Nepre Ridemaj Amemuloj.
Unuiĝo Lingva De Naciaj Radio-Abonantoj.
Universala Ligo De Nia Rebusa Asocio.
Unio de Literaturaj Disputoj ĉe Norda Radio-Asocio.
Universala Ligo De Neŭtralaj Riĉiĝintaj Almozpetantoj.

La solvojn ni transsendis al s-ro Verdemul, por ke li diru, kiu klarigo estas la ĝusta. Post sepfoja urĝigo kaj admono fine ni ricevis de li respondon. Jen la enhavo de lia letero: *„Estimata Redakcio, Mi ne povas esprimi, kiel multe flatas min, ke la tutmonda Esperantistaro okupas sin pri mia modesta persono. Nun mi vidas, ke mi estas grava persono. Mi trarigardis la solvojn, sed kun bedaŭro mi konstatas, ke neniu konkursanto eltrovis la veran nomon de la societo, kies fervora kaj diligenta aktiva membro mi estas. La ĝusta solvo estas:* **Universala Ligo De Ne Respondantaj Anoncintoj.** *Mi kondolencas al la nenion gajnantaj konkursantoj kaj mi salutas vin samideane: Johano Verdemul."*

Ankaŭ nia redakcio tre bedaŭras, ke la promesitaj 5 premioj ne estas disdoneblaj, kvankam inter la solvoj estas kelkaj tre spritaj. Do ni tenos la premiojn por aliaj konkursoj.

Al s-ro Verdemul ni dankas pro la afable donita klarigo, sed ni insiste alvokas ĉiujn niajn legantojn, precipe tiujn, kiuj publikigis korespondan anonceton, ke ili **ne aliĝu al U.L.D.N.R.A.!!!**

94-a konkurso. La solvon de ĉi tiu enigmo ensendis ne malpli ol 121 legantoj de La Praktiko. La interesa frazo, kiun D-ro Zamenhof diris en unu el siaj kongresaj paroladoj, sonas jene: **„Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo; oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton."**

La konkursa komitato dislotis la kvin premiojn. La gajnintoj estas: S-ro **N. Marijnissen** en Roosendaal (Nederlando). — F-ino **D. Streuli** en Uetikon a.See (Svislando). — S-ro **Hisazumi Tagiri** en Tokio (Japanujo). — S-ro **C. Vernay** en Rosendael (Francujo). — S-ro **N. Vrânceanu** en Braila (Rumanujo).

Proksimiĝas SANKTA NIKOLAO!

Kion donaci?

Rigardu sur la lasta paĝo!

FARU LA KONTROLON!

(Praktika gramatika leciono)

La solvo de la 17-a tasko:

Estimata kaj ŝatata. Famkonata. Fondita. Difektitaj. Uzotaj.)otita. Fiksitan. Rigardata. Naskita. Altestimata. Pagata. — Malfavorata. Forlasita. Amatajn. Gardatajn. Ellaboritan. Here-itan. Mortigita. Edukitan. Dungita. Pagata. Trovitaj. Admi-atan. — Menciita. Fermita. Farota. Amata. Ornamita. Facetitaj. 'rafikata. Finkonstruita. Admirata. Fabrikita. Heredita. Gar-ata. Konservota. — Ŝparitan. Kaŝita. Vidita. Dezirata. Meblita. ĉetita. Finpagita. Plektitan. Eluzitan. Instalita. Razita. Kom-ita. Ŝmirita. Malfermitaj. Disligitan. Flegataj. Detranĉotajn. ĉetota. Donacota. — Plenumita. Detonditajn. Purigotaj. Pro-esitan. — Aĉetita. Ŝanĝitan. — Malfermita. Surprizota. Ton-tan. Fiksitaj. — Amata. Detranĉitaj. Venditaj. Rigarditan. — likita. Kolorigitan. Ĉirkaŭligitan. Orumita. — Konata. — aritan. Lumigita. Farita. — Surprizita. Detranĉitaj. — Ĉagre-tan. — Donacitajn. Ricevitan. — Terurigita.

18-a tasko.

Ni prezentas ĉi tie al niaj legantoj novan gramatikan taskon. estas tre simila al nia 14-a tasko, kiu aperis en la 15-a numero Marto 1933) de La Praktiko.

La 14-a tasko postulis mallongigi la donitan tekston, uzante tivajn participojn. Sed ĉi tiu tasko, male, postulas, ke oni *igu la aktivajn participojn,* anstataŭigante ilin per klarigaj zoj kun simplaj verboformoj. Jen kelkaj ekzemploj:

1) **Vivanta** muso estas pli forta, ol **mortinta** leono = Tiu so, **kiu vivas,** estas pli forta, ol tiu leono, **kiu mortis.**

2) La saĝuloj **manĝante** ne parolas = La saĝuloj ne parolas, m **ili manĝas** (aŭ: dum la manĝado).

3) **Manĝonte** lavu la manojn kaj **manĝinte** lavu la buŝon! = ntaŭ **ol vi manĝos,** lavu la manojn kaj **post kiam vi manĝis,** vu la buŝon!

4) Mia frato, **havanta** multan monon, aĉetis aeroplanon. = ia frato, **kiu havas** multan monon, aĉetis aeroplanon.

5) Mia frato, **havante** multan monon, aĉetis aeroplanon. = ia frato, **ĉar li havas** (aŭ: **kiam li havis**) multan monon, aĉe-s aeroplanon.

Komparante (= *se vi komparas,* aŭ: *kiam vi komparas*) la stajn du ekzemplojn, vi povas rimarki la gravan diferencon ter la adjektivaj kaj adverbaj participoj. La adjektivan par-cipon oni devas anstataŭigi per frazo montranta **econ de la ubjekto.** Sed la adverban participon oni anstataŭigas per frazo ontranta **cirkonstancon** (tempon, kaŭzon k.t.p.) **de la ago.**

Dum la solvado de la tasko memoru pri la jenaj formuloj: *Vojaĝonte* = antaŭ la vojaĝo. *Vojaĝante* = dum la vojaĝo. *Vojaĝinte* = post la vojaĝo. La solvo aperos en La Praktiko.

Ni rekomendas tralegi ankaŭ la klarigojn, kiujn ni donis ĉe a 14-a tasko.

ATENTU! — *La sekvanta rakonto estas ankaŭ tasko por ia 106-a konkurso. (Vidu sur la 12-a paĝo!) Per bona solvo i povas gajni premion.*

LA KOFRO.

(Vera historio.)

La heroo de la ĉi tie sekvanta historio estas nia popularа amideano, sinjoro Jozefo Ŝercmaĥer, naskiĝinta kaj loĝanta en la ĉefurbo de la lando plej multe suferinta pro la mondmilito. Frue orfiĝinte li travivis ĉiujn malfacilaĵojn, akompanantajn malriĉajn solulojn. Sed havante bonan cerbon kaj ĉion venkantan optimismon, li kreis por si pozicion, donantan honoron kaj kom-fortan vivon.

Fininte la jurajn studojn kaj farinte la advokatan ekzamenon, s-ro Ŝercmaĥer ekloĝis en la kvartalo promesanta la plej grandan klientaron. Tiel trovinte, ke la domo estas tro malplena, li komencis serĉi vivkunulinon havantan la necesajn kvalitojn. Partoprenante foje en studenta balo li ekvidis la belan fraŭlinon Ŝnurheĥt, dancantan kiel feino. Elverŝonte antaŭ ŝi la enhavon de sia koro, li singarde kolektis la necesajn informojn ĉe amikoj konantaj ŝian familion. Ricevinte la trankviligan informon, ke ŝiaj gepatroj loĝas en la urbeto Kotmont, kuŝanta tricent kilo-metrojn malproksime de la ĉefurbo, li decidis viziti ilin por peti ŝian manon.

Forvojaĝonte al Kotmont, s-ro Ŝercmaĥer banis sin, razis sin kaj vestis sin per la kostumo donanta al li la plej agrablan ek-steraĵon. Atinginte la stacidomon li aĉetis la plej freŝan gazeton, aperintan antaŭ kelkaj minutoj kaj raportantan pri la plej lastaj okazintaĵoj. Dezirante havi dum la vojaĝo bonan humoron kaj kuraĝon, enironte en la vagonaron li trinkis unu glason da potence ŝaŭmanta biero.

Enpaŝinte en la vagonaron s-ro Ŝercmaĥer rimarkis, ke jam ĉiuj sidlokoj estis okupitaj de homoj dormetantaj, manĝetantaj aŭ kartludantaj. Eĉ en la koridoroj de la vagonoj estis videblaj homoj starantaj aŭ sur pakaĵoj sidantaj. Traesplorinte la tutan vagonaron kaj konvinkiĝinte pri tio, ke ne estas plu eĉ unu libera sidloko, s-ro Ŝercmaĥer okupis starlokon en la koridoro de la vagono portanta la surskribon: „Al Kotmont". Tra la fenestroj de la baldaŭ ekirinta vagonaro li rigardis la rapide preterflugantan pejzaĝon. Intencante forpeli la enuon, li decidis legi. Elpreninte la gazeton el la poŝo kaj ĝin eklegonte li ekbruli-gis cigaron. Trankvile fumante la agrable odorantan cigaron li avide legis la artikolojn pritraktantajn la teatrajn kaj sportajn novaĵojn.

Baldaŭ aperis la konduktoro, faranta la kontroladon de la biletoj. Rigardinte la bileton de s-ro Ŝercmaĥer, li diris:

— Sinjoro, via bileto estas en ordo, sed la kofron, kuŝantan apud vi sur la planko, bonvolu meti sur la pakaĵbreton en la kupeo.

La konduktoro plueniris kaj s-ro Ŝercmaĥer, remetinte la bileton en la poŝon, daŭrigis la legadon.

Post kelkaj minutoj revenis la konduktoro. Vidante, ke s-ro Ŝercmaĥer ne enmetis la kofron, kaj dezirante akurate plenumi sian ofican devon, li paŝis al li kaj diris:

— Sinjoro, petinte vin enmeti la kofron kaj uzonte pli severan rimedon, mi atentigas vin pri la kvara punkto de la severa regu-laro pendanta sur la vando de la vagono. Ĝi minacas per mon-puno la pasaĝerojn lasantajn siajn pakaĵojn en la koridoro.

— Jes, mi scias, — respondis s-ro Ŝercmaĥer, ne perdinta sian trankvilecon.

Sed la konduktoro, vidante, ke s-ro Ŝercmaĥer restas senmova, minace diris:

— Sinjoro, oni devas obei la regularon, celantan la komforton de la vojaĝantoj. La kofro, kuŝanta en la koridoro, malhelpas la trairantajn personojn.

— Jes, mi scias, — respondis s-ro Ŝercmaĥer, ne ĉesante legi la gazeton.

La konduktoro, perdinta la paciencon, komencis krii:

— Sinjoro, kontraŭstarante al la regularo vi riskas ricevi severan punon. Tuj enportu la kofron!

— Portu vi! — respondis s-ro Ŝercmaĥer, ne interrompante la legadon.

La konduktoro, fariĝinta furioza, komencis akre insulti la trankvile plue legantan s-ron Ŝercmaĥer. Fariĝis granda skan-dalo. Sed vane. Fine, ĉe la proksima stacio, la ruĝiĝinta kaj raŭkiĝinta konduktoro kuris al la staciestro staranta sur la pe-rono. Raportinte pri la okazintaĵo li petis la staciestron fari protokolon kaj eljeti la obstiniĝintan pasaĝeron. La staciestro, vidanta, ke rapida ago estas necesa, prenis paperon, inkon kaj

plumon, kaj kuris en la vagonon. Eldemandinte s-ron Ŝercmaĥer pri lia nomo, profesio, religio, naskiĝa loko kaj dato, adreso, familia stato, politika aparteno, ekonomia situacio, aparteno al kulturaj, sportaj, bonfaraj kaj aliaj societoj kaj kluboj, vojaĝcelo, nombro de liaj dentoj, kaloj kaj patrinmakuloj, kaj skribinte konscience kaj akurate ĉiun respondon en la protokolon, fine li demandis:

— Kaj kial vi ne volas enporti la kofron en la kupeon?

S-ro Ŝercmaĥer, aŭdinte la gravan demandon, solene respondis:

— Ĉar ĝi ne estas mia kofro!

★

La gazetartikoloj, priskribintaj la pravan konduton de s-ro Ŝercmaĥer, fondis por li brilan advokatan karieron kaj havigis al li ankaŭ la manon de la bela kaj riĉa fraŭlino Ŝnurheĥt.

AL LA VENKO!

PETO. Kara leganto! Bonvolu ĉi tiujn gravajn informojn traduki en vian nacian lingvon kaj transdoni ilin al la redakcioj de la ĵurnaloj en via urbo, por publikigo. Per tio vi faras por Esperanto tre valoran propagandan servon.

311. Polaj radio-stacioj regule disaŭdigas en Esperanto. — La estraro de la Pola Radio *(Polskie Radjo)* decidis disaŭdigi ĉiusemajne Esperanto-lingvajn prelegojn de eminentaj kompetentuloj pri la socia kaj kultura vivo de Polujo. La disaŭdigoj okazos provizore de la stacioj en Varŝavo kaj Krakovo. — *(La detalan programon de la disaŭdigoj, kiuj okazas en diversaj tagoj kaj horoj, oni povas ricevi de la Pollanda Esperanto-Delegitaro, Lubicz 34, Kraków. — Petojn kaj proponojn pri la programo, same dankleterojn, oni adresu al: Polskie Radjo, Warszawa, Polujo.)*

312. Esperanto-ekspozicio en Lyon. — Dum la 15—23 de Septembro en la kadro de la internacia radio-ekspozicio, en la foira palaco de Lyon okazis vasta Esperanto-ekspozicio, organizita de la „Esperantista Amikaro de Lyon". La ekspozicion inaŭguris s-ro Emile Bollaert, prefekto de la provinco Rhône, kun generalo Marin, reprezentanto de la militguberniestro. Multaj gravuloj vizitis la ekspozicion, inter ili ankaŭ ministro E. Herriot.

313. Grandaj Esperanto-kursoj en norda Nederlando. — En Frislando, norda provinco de Nederlando, komenciĝis grandaj Esperanto-kursoj sub la gvidado de la konata Esperanto-instruistino f-ino Margarete Saxl el Berlino. La kursoj, organizitaj de la „Frisa Esperanta Rondo" en Leeuwarden, okazas en la urboj Leeuwarden, Heerenveen, Sneek, Buitenpost, Drachten kaj Harlingen, kaj partoprenas en ili preskaŭ tricent personoj.

314. Grandskala propagando por Esperanto en Hago. — La 17-an de Oktobro la Haga Esperanto-societo „Fine Ĝi Venkos" aranĝis en la salono de „Diligentia" grandskalan propagandan vesperon, en kiu antaŭ pli ol sescent personoj efikajn paroladojn faris *D-ro de Monchy*, urbestro de Hago, *inĝ. Damme*, ĝen. dir. de la Nederlanda P.T.T. kaj *prof. E. Asai* el Osaka (Japanujo). Post la paroladoj, kiuj konvinke elmontris la necesecon kaj praktikan valoron de Esperanto, okazis publika leciono de Andreo Cseh. Dum unu semajno en la kvar plej grandaj kino-teatroj de Hago oni prezentis parolantan filmeton pri la Esperanto-kurso de Andreo Cseh kaj reklaman tekston pri aranĝotaj kursoj. La 24-an kaj 27-an de Oktobro komenciĝis en la Int. Cseh-Instituto de Esperanto du kursoj kun pli ol cent partoprenantoj.

315. Grandioza Esperanto-kongreso. — Laŭ la decido de la nunjara Esperantista mondkongreso, okazinta en Stockholm, la 27-a universala kongreso de Esperanto okazos en Italujo, dum la tagoj 3-17 de Aŭgusto 1935. Ĉi tiu kongreso estos unika en la historio de la kongresoj, ĉar ĝia loko estos ne unu urbo, kiel ĝis nun, sed la kunsidoj kaj la aliaj kongresaj aranĝoj okazos en pluraj urboj, eĉ en ŝipo sur la maro. La kongreso komenciĝos en Firenze, la ĉefaj kunsidoj estos en Roma, kaj poste la kongreso estos daŭrigata en Napoli kaj de tie sur speciala ŝipo, kiu veturados sur la Mediteranea Maro (al la insuloj Sicilio, Malta, Elba, al Tripoli en Afriko) kaj finiĝos en Genova. La kongresa programo entenas krom la kunsidoj ankaŭ riĉan amuzan programon (ekskursoj al Pompei, Capri, Vesuvo, dezerto en Afriko k.t.p., internacia kostumbalo) kaj la 11-an someran universitaton en Esperanto, kies prelegoj okazos grandparte en la ŝipo dum la mar-veturado. La organizon de la kongreso plenumas aparta komitato sub la prezido de generalo markizo C. C. di Montezemolo. La adreso de la organiza oficejo estas: Esperanto-Centro Itala, Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano.

316. Esperanto-kurso per franca radio-stacio. — Ĉe la stacio „Radio Côte d'Azur" en Nice (Francujo) komenciĝis Esperanto-kurso, gvidata de s-ro Georges Avril, redaktoro, vicprezidanto de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto.

317. Esperanto-lingva teksto en poŝta stampo. — Okaze de la nunjara internacia specimenfoiro de Rio de Janeiro (Brazilo), la poŝtoficejoj de Rio de Janeiro uzis poŝtan stampilon, kiu entenis la jenan Esperanto-lingvan reklamteksto: „Internacia specimena foiro. Rio de Janeiro. Turisma urbo."

318. Turisma organizaĵo uzas Esperanton. — La ĵus kreita granda turisma kooperativo „Detur" en Varŝavo (Polujo) turnis sin al la Esperantistaro per cirkulero, en kiu ĝi proponas siajn turismajn servojn. Ĝi korespondas en Esperanto, ellaboras en Esperanto laŭdezirajn vojaĝplanojn kaj disponigas Esperante parolantajn gvidistojn. — (La adreso: „Detur", Sienna 4, Warszawa, Polujo.)

319. Gvidlibro kun parto en Esperanto. — Okaze de la festa semajno de la belga urbo Gent, 14—22 de Julio, oni eldonis festan gvidlibron en 10,000 ekzempleroj, en la lingvoj franca, flandra kaj Esperanto.

320. Rezolucioj en Francujo por Esperanto. — La ĝeneralaj konsilantaroj de la francaj departementoj Yonne kaj Haute-Garonne, same la urbaj konsilantaroj de Auxerre, Buxy, Chalon-sur-Saône, Montceau-les-Mines kaj Nevers per rezolucioj esprimis sian deziron, ke la instruado de Esperanto estu enkondukata en la lernejojn.

321. Esperanto-kurso en hinda gazeto. — La gazeto „Berita Baroc", aperanta en Makassar (Nederlanda Hindujo), publikigas kurson de la lingvo Esperanto.

322. Decido de franca urbestraro por Esperanto. — La konsilantaro de la franca urbo Romans en sia lasta kunsido okazinta la 12-an de Oktobro voĉdonis rezolucion, kiu esprimas la deziron, ke la lingvo Esperanto estu instruata en ĉiuj lernejoj de la urbo.

323. Esperanto-lingva prospekto pri ekspozicio. — Dum la tempo 15 Marto—19 Majo de 1935 okazos en la nederlanda urbo Heemstede apud Haarlem tutmonda florekspozicio sub la nomo „Flora". Ĵus aperis pri la preparata ekspozicio ilustrita faldprospekto en la lingvo Esperanto.

la mondo ridas

Ŝparo.

— Jen, paĉjo, la dek cendoj, ujn vi donis por la poŝt-arko.

— Nu, kaj kion vi faris kun letero? Ĉu vi ne ĵetis ĝin en leterkeston?

— Jes, paĉjo, mi enĵetis ĝin, d tiel, ke la poŝtisto ne vidis, ne estas sur ĝi marko.

(Arlequin)

Indigniĝo.

— Eriko, hodiaŭ frumatene is la kudristino kun la fak-o. Ŝi postulis tujan pagon, ankaŭ ŝi devas pagi urĝan don.

— Bela afero! Ŝi ŝuldas kaj devas pagi?

(Vårt Hem)

Infanoj inter si.

— Kaj ĉu tio estas vera?

— Jes, tute vera! Mia panjo s, ke ĝi tiel estas, kaj se ŝi s, ke ĝi tiel estas, ĝi certe estas, eĉ kiam ĝi tute ne s tiel.

(Lustige Blätter)

Troa delikateco.

— Jen, tie iras via kuracisto. vi ne volas lin saluti?

— Ne, ne, ni forturnu nin! as tre ĝene renkonti lin, ĉar de longe mi ne estis mal-a.

(Pages Gaies)

La ĝusta kuracilo.

— Ĉu ekzistas kuracilo kon-ŭ la amo vekiĝinta je la unua ardo?

— Jes, ... la dua rigardo.

(Le Rire)

Komerca sekreto.

Direktoro: Mi tuj maldungos tiun vojaĝiston. Al ĉiuj niaj klientoj li rakontas, ke mi estas stultegulo.

Vicdirektoro: Li estas tre lerta viro, ni ne agu tro rapideme! Mi jam admonis lin, ke li ne disrakontu niajn komercajn sekretojn.

(The Humorist)

Obeema malsanulo.

— Kia afero estas tio, sinjoro Braŭn? Vi havas forpermeson pro malsano, kaj dum la tuta tago bilard-ludas en la kafejo?

— Jes, sinjoro ĉefo; miaj okuloj estas malfortaj kaj la kuracisto ordonis rigardi konstante verdan koloron.

(Tit Bits)

Malbona memoro.

— Kial estas la nodo sur via poŝtuko?

— Por memorigi min, ke mi volas forlasi la alkoholon.

— Sed ĵus vi trinkis glason da brando!

— Jes, bedaŭrinde, mi rimarkas la nodon ĉiam nur tiam, kiam post la trinko mi viŝas la buŝon per la tuko.

(Berlingske Tidende)



La kaŭzo.

— Kaj kial vi ne volas diri, kiom da jaroj vi havas?

— Ĉar mi havas ĝuste tiom, kiom mia edzino...

(Dimanche Illustré)

Danĝera aludo.

— Patro, ni lernis hodiaŭ, ke la bestoj ĉiujare ricevas novan pelton.

— Silentu, knabo; via patrino estas en la najbara ĉambro kaj povas aŭdi ĉion.

Inter amikinoj.

— Oskaro diris al mi hieraŭ, ke mi estas lia sola sonĝo.

— Interese! Al mi li diris, ke nuntempe li havas terurajn sonĝojn.

(Politiken)

Oficistinoj.

— Kiel plaĉas al vi, Helenjo, via nova ĉefo?

— Li estas afabla viro, sed li havas la mankon, ke li parolas ĉiam nur pri oficialaj aferoj.

(Muskete)

Ofenda komparo.

— Paĉjo, ĉi tiu porkido havas tute tian vizaĝon, kian onklo Paŭlo.

— Fi, knabeto, tian aferon vi ne devas diri!

— Kial ne, paĉjo? La porkido ne komprenas ĝin!

(Herold)

En la lernejo.

— Kiel povas esti, Karlo, ke nun via matematika tasko estas tute bone solvita?

— Mia paĉjo forvojaĝis!

(Everybody's Weekly)

En oficejo.

Ĉefo: Terure malrapida bubo vi estas! Ĉu nenio estas, kion vi povas rapide fari?

Kurknabo: Jes, mi rapide laciĝas.

(Tit Bits)

La portebla

TORPEDO

skribmaŝino

estas juvelo inter la skribmaŝinoj.

Liverata ankaŭ kun Esperanto-klavaro.

Petu sendevigan demonstracion!

Importisto por Nederlando:

OSCAR MARKX, Nic. Maesstraat 97, Amsterdam-Z.

Telefono: 22059.

Belega libro! *Favora prezo!*

LA REĜO JUDEA.

Dramo en kvar aktoj kaj kvin bildoj.
Verkita de „K. R."

El la rusa originalo tradukis: V. Devjatnin.

La Esp-an tekston trarigardis magistro de teologio kaj Akademiano Prof. A. Dombrovski.

Rekomendita de Esp. Literatura Asocio.
(182 paĝoj, formato 13 × 18 cm.)

La literoj „K. R." kaŝas la nomon de iama rusa grandduko, kiu per ĉi tiu verko famiĝis kiel poeto.

Prezo: 1.25 ned. guld.

Favorprezo ĝis la 1-Jan.-1935: 0.75 guld. (afrankite).

Mendebla nur ĉe LA PRAKTIKO en Hago.

KURSGVIDANTOJ!

Uzu kiel lernilon kaj ekzercilon la malnovajn jarkolektojn (1932 kaj 1933) de LA PRAKTIKO. Vi estos ravitaj!

Jen opinio de kursgvidanto: *„La jarkolektoj de La Praktiko estas admirindaj dum uzado en kurso."* (S-ro A. B en C., Francujo.)

La prezo de unu jarkolekto (1932 aŭ 1933): la duono de la ordinara abonprezo. Rigardu la tabelon de la abonprezoj en la Julia numero sur la 2-a paĝo. Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj.

GRAMOFONA DISKO

kun la plej ŝatataj Esperantaj kantoj:

LA ESPERO kaj LA TAGIĜO

belega kanto de la sveda operetkantisto Gösta Kjellertz kun akompano de orkestro.

Aĉetebla ĉe LA PRAKTIKO.

Prezo: 2.— ned. guld.

LA MENSOGO.

I.

Antaŭ sep jaroj mi interkonatiĝis kun simpatia junulo el Ameriko, kiu ĉi tie, en Budapeŝto, pasigis la someron. De Vieno li veturis ĉi tien sur la Danubo, per sia fald-boato. Li havis miel-blondajn harojn, molan ĉemizon kun elfaldita kolumo, brilantajn, blankajn dentojn. En iu societo oni interkonigis nin. Kelkfoje li vizitis nin. Ankaŭ ni lin, unufoje. Nur pri tiom mi memoras. Poste li forvojaĝis. Ni interŝanĝis niajn vizitkartojn kaj ni promesis, ke ni skribos unu al la alia, sed ni neniam skribis.

II.

Antaŭ nelonge mi ricevis leteron el unu hotelo de nia urbo. Alia amerikano skribis ĝin, kiu vizitis Budapeŝton kun sia edzino. Multegaj amerikanoj ekzistas en la mondo. Menciinte mian miel-blondan amikon li demandis, kiam li povos min persone saluti. Li aldonis, ke li estas eĉ parenco iomete kun mia amiko. Ĉar intertempe mia miel-blonda amiko edziĝis, sed ankaŭ disiĝis, kaj li — la skribinto de la letero — estas bofrato de la eksedzino de mia amiko.

III.

La kunligo ŝajnis al mi iom tro malproksima kaj nefirma. Mi respondis, ke ni kiam ajn tre volonte akceptos ilin, kaj ke ni tre deziras aŭdi ion pri nia amiko, sed en ĉi tiu momento nia tuta familio kuŝas pro hispana gripo. Mi opiniis, ke per tiu senkulpa mensogeto mi forigis ĉiun pluan zorgon.

IV.

Mi eraris. Post unu semajno la amerikano en afablega letero interesiĝis pri tio, ĉu ni jam resaniĝis. Mi trankviligis lin per egale afablega letero, ke ni estas sanegaj. Kaj mi eĉ invitis ilin por temanĝo, en la semajnfino.

V.

Sed tiam ni ĉiuj vere estis malsanaj. Tamen estis neeble denove senkulpigi nin per malsaneco. Ili certe pensus, ke ĝi estas fripona mensogo. Do mi telefonigis al ili, ke ni devis urĝe forvojaĝi. Sed nun mi tre hontis. Mi mem anoncis min. En longa, humila, pardonpeta letero mi petegis, ke ili venu, ke ili mem fiksu la tagon kaj horon, por ni tio estas tute egala, ni nepre atendas ilin. Alvenis la tre atendita respondo: ili venos dimanĉe posttagmeze je la sesa horo.

VI.

Mi kondutas ĉiam tre ĝentile al la eksterlandanoj. Mi amas kaj kompatas ilin. Esti ie fremdulo, estas preskaŭ organa difekto. Estante malproksime de mia hejmlando ankaŭ mi sentas min kriplulo. Ĉiupaŝe mi faletas, mi ne konas la homojn, la kutimojn, la tagan kurzon de la vortoj kaj esprimoj. Pentoplene, min punante mi atendis la gastojn. Sed en tiu tago mi estis superŝutita de laboro. Pli kaj pli febre mi laboris, kun inspiro kaj energio. Malespere mi rigardis al la rapidantaj montriloj de la horloĝo. Pasadis la tempo kaj mi estus oferinta mian vivon, por ke la vizito ne okazu.

VII.

Kion mi povus fari? Malsano kaj urĝa forvojaĝo estis jam eluzitaj pretekstoj. Dum kelka tempo mi senfrukte ribeladis. Fine, dum la frua posttagmezo, mi trovis la savan ideon. Ĉi tiuj bravaj amerikaj geedzoj ne konas min, nur unu konaton de mi, kiun mi mem apenaŭ konas. Do mi vokis telefone unu el miaj kamaradoj, senofican inĝenieron, kiu dum du jaroj vivis en Anglujo, kaj mi petis lin, ke li anstataŭu min. Komence li rifuzadis. Mi promesis al li pagon laŭ horoj. Tiam li konsentis. Poste mi telefonis al unu instruistino de la angla lingvo, por ke ŝi prenu sur sin la oficon de la dom-mastrino, por la duoblo de sia ordinara lecionmono. Ankaŭ ŝi konsentis.

VIII.

Posttagmeze je la kvara horo ili ambaŭ aperis ĉe mi, kiel dungitaj murdistoj. Mi prezentis ilin reciproke kaj klarigis iliajn rolojn: ĝenerale ili kondutu tiel, kiel mi kaj mia edzino kondutus en simila situacio. Plej ofte ili diru: „jes". Sed kelkfoje ankaŭ: „ne". Pri la vetero ili diru: „bela", pri la ĝenerala stato de la mondo: „terura". Ili montru al la gastoj nian loĝejon, eventuale ankaŭ nian albumon kun la familiaj portretoj. La teo jam bolis. Mi forlasis ilin kaj suprenkuris en la subtegmentan kabineton, por laboregi plu.

IX.

La temanĝo sukcesis super ĉiu espero. La intima societo ĝis la deka horo restis kune, kaj apenaŭ povis disiĝi. Mia kamarado, la inĝeniero, kun modesteco akceptis la laŭdojn, mian verkistan agadon li nomis sensignifa neniaĵo, li kondukis la gastojn en mian laborĉambron — hazarde ĝi estis la manĝoĉambro, sed tio ne estis grava — kaj kun la revema rideto de la amika rememorado li aŭskultis pri la travivaĵoj de mia miel-blonda amerika amiko. La lingvo-instruistino talente ludis la rolon de la komprenema edzino. Ŝi senĉese interrompis lian parolon kaj diligente kontraŭdiradis al li.

X.

En la posta tago la servisto de la hotelo portis al ni leteron kaj belegan branĉon de blanka siringo. La dankemaj amerikanoj sendis ilin. Ili certigis al ni, ke dum la tuta vivo ili ne havis tiel agrablajn horojn, kaj kvankam ili jam aŭdis multe da belo kaj bono pri ni, tamen ili ne povis supozi, ke mi estas tiel brile sprita, tiel ensorĉante afablega, kaj ke mia edzino estas tiel hejmeca kaj gastama.

XI.

La amerikanoj revojaĝis hejmen. Tie ili rakontis al mia miel-blonda amiko pri nia afabla akcepto, kaj mia miel-blonda amiko en sentoplena letero dankis pro nia boneco. De tiam ni estas en konstanta korespondado. Nia amikeco ĉiam pli kaj pli profundiĝas. Ĵus mi aŭdis, ke ankaŭ la inĝeniero ofte renkontiĝas kun la lingvo-instruistino.

XII.

La mensogo estas nur polvero. Mi esperis, ke ĝi forflugos en la aeron. Ne tiel okazis. Ĝi kreskas kaj kreskas. Senpacience mi atendas la pluan evoluon.

D. Kosztolányi.

LA MONDO ESTAS INTERESA

Kiel orientiĝas la poŝt-kolomboj? — Jam en la antikvaj tempoj oni sciis, ke kelkaj kolombo-specoj havas bonegan kapablon de orientiĝo kaj ke ili povas reflugi al sia hejmo eĉ el grandegaj distancoj. La konnercistoj de la antikva epoko tiamaniere ricevis informojn pri siaj ŝipoj veturantaj ĉur la maroj. La ĉinaj bankoj kaj la japanaj redakcioj ankoraŭ nuntempe multe uzas poŝt-kolombojn por ricevadi informojn kaj novaĵojn. Ankaŭ Napoleono kun refero aplikis la poŝtkolombojn dum siaj militiroj. La familio Rotschild ŝuldas sian riĉiĝon rekte al la kolomboj, ĉar unu tiutempa Rotschild per poŝtkolomboj eksciis antaŭ ĉiuj aliaj personoj en Londono la rezulton de la batalo ĉe Waterloo, kaj rte ekspluatis tiun informon en la borso de Londono. En la mezo de la pasinta jarcento unu germana apotekisto, kiu okupis sin pri bredado de poŝtkolomboj, okazis de epidemio per poŝtkolomboj ricevadis urĝajn receptojn, kaj per la kolomboj sendis eĉ medikamentojn, en malgrandaj kvantoj. La poŝtkolombo, se oni laŭade alkutimigas ĝin, eĉ de mil kilometroj retrovas sian hejmon. La scienculoj nge serĉadis la sekreton de tiu admirinda kapablo. Laŭ kelkaj scienculoj la centro de la orientiĝa povo devas esti serĉata en la orelaj sulkoj de la kolombo, laŭ aliaj scienculoj en la muka membrano de la kolombo. Ŝajnas, ke la lasta supozo estas la pli ĝusta. Almenaŭ tion montras la eksperimento de la belga kolombo-bredisto Wead. Li elsendis du poŝtkolombojn en la distanco de 100 kilometroj de la hejmo. Al unu kolombo li ŝtopis la orelojn, al la alia la naztruojn, per kokainita vato. La unua kolombo hejmenflugis dum unu horo. Sed la dua, kun la ŝtopita nazo, atingis la hejmon nur post 65-hora erarvagado, tre malgrasiĝinta. Estas do verŝajne, ke la kolombo per sia speciala flarpovo en la alteco distingas la ventojn kaj per tio orientiĝas. La poŝtkolombo flugas dum unu horo eĉ 150 kilometrojn, se ĝia vojo estas mallonga.

La knabino kun la Röntgen-okuloj. — Nesolveblan problemon prezentas al la kuracistoj la eksterordinara kazo de f-ino Hilda Applee, filino de angla komerca vojaĝisto. Per la nuraj okuloj ŝi povas vidi tra la homa korpo. Ŝi mem rakontis: „Kiam mi unuafoje rimarkis, ke mi vidas en alia maniero, ol la aliaj homoj, mi ektimis. Mi banis infaneton kaj mi vidis tra ĝia haŭto. Mi klare vidis la skeleton de la malgrandulo. Poste mi komencis eksperimenti. Mi prenis katon, rigardis ĝin dum kelkaj minutoj kaj tiam mi vidis tute klare la skeleton kaj la internajn organojn. Tamen mi povas vidi nur tra vivantaj organismoj, ne tra senvivaj objektoj." — Hilda Applee trapasis poste severan ekzamenadon en okulkliniko. Oni metis antaŭ ŝin ekzotikajn bestojn, kiujn ŝi ne konis, kaj ŝi devis priskribi la skeletojn. Ĉiuj eksperimentoj perfekte sukcesis, sed la scienculoj ne povis klarigi la fenomenon. Ŝiaj okuloj cetere estas tute normalaj. Ĉi tiu kazo ne estas unika. Antaŭ kelkaj jaroj oni eksperimentis kun la hispano Argamasailla de la Cerda en Madrido. Ankaŭ li havis „Röntgen-okulojn", sed li ĉefe kapablis vidi tra metaloj. Li povis ekzemple precize vidi la enhavon de fermita arĝenta skatolo. Li indikis la precizan horon, rigardante tra la ora kovrilo de la horloĝo. Ankaŭ tiun fenomenon la scienculoj kapablis nur konstati, sed ne klarigi.

La plej grasa viro de la mondo. — Al Francujo apartenas la gloro posedi la plej grasan viron de la mondo. Lia nomo estas Arsène Remond kaj li pezas 312 kilogramojn. Jen kelkaj ciferoj pri la amplekso de liaj membroj: lia brust-vasteco estas 215 centimetroj, la femura perimetro 99 centimetroj, tiu de la tibikarno 84 centimetroj. Okaze de intervjuo s-ro Remond deklaris al la ĵurnalistoj, ke ĝis nun li tenas la mondrekordon, sed li havas unu rivalon en Ameriko, kiu faras ĉiun klopodon por superi lin. Sed li ne timas, ĉar ankaŭ li mem faras ĉion por ne esti superebla. Cetere li plendas pro la ombraj flankoj de la gloro. Ne nur la manĝado kostas al li tre multe, sed ankaŭ por la vestoj li devas elspezi kvaroble tiom, kiom la ordinaraj homoj. El tiom da ŝtofo, kiom li bezonas por la pantalon-tuboj, alia viro farigas tutan kostumon.

INTERNACIA ESPERANTO-KURSO

por la geoficistaro de fervojoj, tramoj kaj aliaj trafikiloj. En ARNHEM, 2-12 Majo 1935.

Post la sukcesplenaj internaciaj kursoj por poŝtistoj, okazintaj en 1933 kaj 1934, la *Internacia Cseh-Instituto de Esperanto*, en kunlaboro kun la *Direkcio de la Nederlanda Fervojaro* kaj kun *fak-ligoj en Nederlando*, organizas

specialan internacian kurson de Esperanto por la geoficistaro de fervojoj, tramoj kaj aliaj trafikiloj, — kiu okazos en la Esperanto-Domo en Arnhem (Nederlando), dum la tagoj 2—12 Majo 1935.

La kurso estos gvidata de *Andreo Cseh*, laŭ lia konata metodo (*sen lernolibroj, sen uzo de nacia lingvo, sen hejma laboro, en praktika kaj amuza maniero*) kaj ĝi kapabligos al skriba kaj parola uzo de la lingvo Esperanto en simpla ĉiutaga interrilato.

La kurslecionoj okazos dum 10 labortagoj, matene de la 9-a ĝis la 13-a horo. Dum la posttagmezoj estos **ekskursoj studaj kaj plezuraj.** En la vesperoj okazos **amuzaj aranĝoj.**

La kurso servos ankaŭ kiel ideala okazo por internacia interkonatiĝo kaj interamikiĝo de la diverslanda kolegaro.

En la kurso partopreni povas **ĉiuj geoficistoj de fervojoj, tramoj kaj aliaj trafikiloj, kune kun siaj familianoj.** Partopreni povas ankaŭ personoj, kiuj jam scias la lingvon Esperanto. **Kurskotizo** estas: 7.50 ned. guld., por pluaj anoj de la sama familio nur 5 guld. Tiuj kursanoj, kiuj loĝas en la hotelo de la Esperanto-Domo, pagas nur 5.—, resp. 3.50 guld.

La kursanoj povos loĝi en la **hotelo de la Esperanto-Domo,** kie plena pensiono (komforta ĉambro kun fluanta akvo kaj la tri manĝoj) kostas por unu tago kaj unu persono 3.50 guld. (aparta ĉambro), 3.— guld. (2—4 litoj en unu ĉambro), kaj 2.50 guld. (5—10 litoj en unu ĉambro). Servmono 10 %.

Aliĝante oni sendu la kurskotizon kaj mendu la hotelon, pagante la pensionprezon por almenaŭ du tagoj.

Adreso por aliĝoj kaj informpetoj: *Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Rioumstraat 172, Den Haag, Nederlando.* (Poŝtkonto: Den Haag 162626.)

LIBERTEMPO. — La Direkcio de la Nederlanda Fervojaro decidis doni *kvar ekstrajn libertagojn* al 25 konduktoroj, por faciligi ilian partoprenon en la kurso.

PETO. — La legantoj de ĉi tiu anonco estas petataj vaste diskonigi la informojn pri la kurso en la nacia gazetaro, precipe en la fakaj gazetoj, kaj instigi siajn proprajn fervojajn, tramajn k.t.p. estrarojn kaj fak-ligojn, ke tiuj rekomendu kaj faciligu la partoprenon al siaj geoficistoj kaj membroj, donante al ili libertempon kaj subvencion.

Grandstila varbado por Esperanto dum la foiro de Reichenberg. — La Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakio dum la lasta internacia specimenfoiro en Reichenberg (Ĉeĥoslovakio) faris grandstilan propagandon por nia lingvo. — La unua bildo montras grandan semaforon sur la foira tereno, kun la germanlingvaj vortoj: „Libera vojo al Esperanto." — La dua bildo prezentas la grandan ruĝkoloran reklam-kolonon, kiu portas la tekston: „La ŝlosilo por la plej granda simpligado en negoco kaj trafiko kun eksterlando estas Esperanto." — Sur la tria bildo ni vidas interesan parton de la Esperanto-stando en la foira ekspozicio. Maldekstre antaŭ la geografia karto de Eŭropo kuŝas la sama komerca letero de la foiro en 19 diverslingvaj tradukoj, por atingi 19 landojn. Dekstre la sama letero en la sola Esperanto-lingvo iras al la 19 landoj. — Ankaŭ la foira direkcio mem, kiu jam de 15 jaroj uzas Esperanton por sia reklamo kaj korespondado, aplikis nian lingvon dum la foiro. Oni povis vidi plurlingvan tabulon, sur kiu ankaŭ en Esperanto staris la surskribo: „Informoj por eksterlandanoj." La diversaj oficejoj de la foiro havis ankaŭ Esperanto-lingvajn surskribojn, kaj la foira katalogo enhavis plurloke la admonon: „La moderna komercisto uzu Esperanton! Informojn donas la Esperanto-Fako de la Foiro." Samtempe la Ligo aranĝis en la plej granda hotelo de la urbo, „Imperial", ekspozicion de turismaj reklamiloj en Esperanto. — La modele organizita moderna reklamo faris grandan impreson al la diverslandaj vizitantoj de la foiro.

La domo de nia fervora samideano, s-ro Alberic Humez, honora membro kaj delegito de UEA en Douai (Francujo), prezidanto de la Esperanto-Federacio de Norda Francujo, estas vera Esperanto-domo. Ĝin ornamas la verda stelo kaj la Esperanta flago. — Antaŭ la pordego staras gesinjoroj Humez. — (Foto Cockell.)

En Arnhem ĉe la kruciĝo de la „Esperanto-aleo" kaj la fervojo la urbestraro starigis emajlajn tabulojn kun atentigo en la lingvoj nederlanda kaj Esperanta. Nia bildo montras foston kun tiaj tabuloj. La supran difektis knabaĉoj.

Sukcespiena festvespero aranĝita de nia fervora pioniro s-ro H. Grönborg en Kattrup (Danujo), je la honoro de 33 britaj Esperantistoj, kiuj post la Stokholma kongreso vizitis la danajn Esperanto-grupojn en Kattrup kaj Hasselager.

La Esperanto-societo „Merkurio" en Rotterdam per 8 tiaj reklam-tukoj varbis por la nova kurso. Aliĝis 194 pers.

La lerte aranĝita stando de la Esp.-Asocio de Estonio, en la tutlanda Komerc-Industria Foiro (1-10 Septembro). — La nigraj punktoj sur la geografia karto de Eŭropo montras la lokojn, kie UEA havas delegitojn.

Nova internacia edziĝo per Esperanto. — Nia bildo prezentas nian novan internacian paron, gesinjorojn Reuschenbach-Knudsen, dum la edziĝa vojaĝo, en la Stokholma Esperanto-kongreso, antaŭ la urbodomo de Stokholmo. — S-ro J. Reuschenbach, komercisto en Cleve (Germanujo), dum la universala Esperanto-kongreso en Oxford (Anglujo) interkonatiĝis kun f-ino Mary Knudsen, kontoristino en Vestervig (Danujo). La edziĝo okazis la 1-an de Aŭgusto de la nuna jaro. La ŝatataj geedzoj estas ambaŭ fervoraj adeptoj de Esperanto.

Bela ekskurso de la Amika Rondo Esp-ista en Novi-Sad (Jugoslavio) al la pentrinda montaro Fruška Gora. De maldekstre la tria staranto: s-ro D. Bartošik, Ĉe-instruisto el Ĉeĥoslovakio, malantaŭ li s-ro Teglaŝ, prez. de la Laborista Esp.-Soc. De dekstre la dua: s-ro M. Vrtunski, sekr.

„Sur la manoj tra la vivo!" — Niaj simpatiaj gesamideanoj, f-ino Gertrud Andersson kaj s-ro Nils Sandberg en Ulricehamn (Svedujo), abonantoj de La Praktiko, gefianĉiĝis.

XXVII-a Universala Kongreso de Esperanto.

Roma, 3-10 de Aŭgusto 1935.

XI-a Somera Universitato en Esperanto. - Kongresa krozado sur la Mediteranea Maro (10-17 Aŭg.).

Esperanto-Centro Itala, la organizanto de nia venontjara mondkongreso, fervore eklaboris. Ĵus ĝi dissendis la unuan oficialan informilon, kiu donas bildon pri grandioza kongresa aranĝo, entenanta riĉan programon laboran, festan, instruan kaj amuzan. El la informilo ni elĉerpas por la legantaro de La Praktiko la jenajn gravajn sciindaĵojn:

Patronado. — La potenca asocio „Touring Club Italiano" aliĝis al la Patronada Komitato.

Loka Kongresa Komitato. — La organiza komitato estas formita; prezidanto: generalo markizo Carlo Cordero di Montezemolo; vicprez.: prof. D-ro G. Canuto; administra direktoro: inĝ. D-ro R. Orengo.

Organiza oficejo: Esperanto-Centro Itala, Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano (Italujo). Telegramadreso: „Esperanto", Galleria 92, Milano. — Poŝtĉekkonto: Esperanto-Centro Itala, Milano, N. 3.18715.

Kotizoj. — La baza kotizo estas 100.— liroj. Fruaj aliĝantoj ricevas grandajn rabatojn, maksimume 30 %. Oni akceptas ankaŭ Helpkongresanojn, kiuj ne partoprenos, sed ricevos la kongresajn dokumentojn, kontraŭ kotizo de 40 liroj.

Donacoj. — La organiza komitato petas donacojn por la kongresa kaso kaj aparte por la blindula kaso, por ebligi al blindaj Esperantistoj senpagan partoprenon.

Rajtoj de la kongresanoj. — La kongreskarto rajtigas al partopreno en ĉiuj kunsidoj de la kongreso, prelegoj de la somera universitato, oficialaj akceptoj, festoj kaj similaj aranĝoj. Ĉiu kongresano ricevos grandajn rabatojn por la kongresa krozado kaj por ĉiuj turismaj aranĝoj. Inter la aliĝintoj ĝis la fino de Januaro, oni dislotos 10 premiojn, inter kiuj estas unu senpaga bileto por la ekskurso al Pompei kaj Capri.

Somera universitato. — Ĝian organizon prezidas D-ro Bruno Migliorini, profesoro de la universitato de Fribourg, vicprez. de la Esp. Akademio.

Kongresa krozado. — Ripoza vojaĝo per granda ŝipo sub Esperanta flago, sur la Mediteranea Maro, de Napoli al Siracusa, Malta, Tripoli en Afriko, Palermo, insulo Elba, Genova. En la ŝipo okazos pluraj prelegoj de la somera universitato. Kunvojaĝos ankaŭ italaj ĵurnalistoj, por raportadi al la gazetaro.

Turismaj aranĝoj. — La komunajn vojaĝojn tra Italujo aranĝas la L.K.K. en akordo kun U.E.A. je favoraj prezoj, klopodante ĉiurilate kontentigi la partoprenantojn.

Fervoja rabato. — La kongresanoj ĝuos rabaton de 50 % sur la itala fervojaro.

Prezoj. — Ordinara hotelĉambro kostas 8—14 lirojn, en unuaranga hotelo 20, en luksa hotelo 30 lirojn (sen matenmanĝo). Matenmanĝo kostas ĉ. 4 lirojn, tagmanĝo aŭ vespermanĝo 7—15 lirojn. Monkurzo: 1 ned. guldeno = 8 liroj.

Aliĝoj. — Aliĝis jam 70 kongresanoj el 14 landoj.

Provizora programo:

3. Aŭg. — Alveno de la karavanoj al Firenze. Ekskursoj tra la urbo kaj regiono. Oficiala akcepto. Malfermo de la Som. Univ. (prelego pri Dante). Interkonatiĝa vespero.
4. Aŭg. — Diservoj. Vojaĝo al Roma. Kunsidoj de la komitatoj (U.E.A. kaj L.K.K.).
5. Aŭg. — Vizito al la Vatikana Urbo. Solena malfermo de la kongreso. Oficialaj akceptoj. Vespere amuza kunveno.
6. Aŭg. — Vizito al la Roma Forumo, tie prelego kaj komuna fotografado. Libervolaj ekskursoj al Ostia, Lido, Littoria, Tivoli k.t.p. Literatura vespero.
7. Aŭg. — Laborkunsido de UEA. Fakaj kunsidoj. Libervolaj ekskursoj. Vizito al muzeoj k.t.p. Vespere internacia balo kun konkurso de naciaj kostumoj.
8. Aŭg. — Kunsidoj. Vojaĝo al Napoli.
9. Aŭg. — Tuttaga ekskurso al Pompei kaj Capri. Prelegoj de la Som. Univ. Mara noktfesto.
10. Aŭg. — Ekskursoj al la kratero de la Vesuvo kaj al Sorrento. Ferma kunsido de la kongreso. Forveturo al Siracusa.
11. Aŭg. — Prelego de la Som. Univ. Vizito al Siracusa.
12. Aŭg. — Vizito al la insulo Malta. Prelego kaj festo sur la ŝipo.
13. Aŭg. — Alveno al Afriko. Vizito al Tripoli, al la araba urbo kaj al la Oazo de Tripoli. Ekskurso al la dezerto, afrika nokto en la dezerto.
14. Aŭg. — Vojaĝo sur la maro. Prelegoj. Amuzoj en la ŝipo.
15. Aŭg. — Vizito al Palermo.
16. Aŭg. — Prelego sur la ŝipo. Vizito al insulo Elba.
17. Aŭg. — Alveno al Genova. Fermo de la Som. Univ. Oficiala akcepto en Genova. Libervolaj ekskursoj.

Interesiĝantoj petu la detalajn informojn rekte de la organiza oficejo (adreso supre).

Ĉi tiu kongreso estos unikaĵo ne nur inter la Esperantaj kongresoj, sed ankaŭ inter ĉiuj ĝis nun okazintaj kongresoj ĝenerale. Ĝi promesas ne nur neforgeseblan travivaĵon por ĉiu partoprenanto, sed ankaŭ potencan propagandon por nia lingvo. Tial estas dezirinde, ke la Esperantistaro en granda nombro partoprenu kaj kunhelpu al kiel eble plej grandioza sukceso.

Jam nun mendu la luksan bindo-tabulon por la nuna jarkolekto de La Praktiko!

(El bela tolo, kun ora surpreso.)

Prezo kun sendkosto: 1.25 guld.

Ni tre petas baldaŭ mendi, por ke ni sciu, kiom da bindo-tabuloj ni devas fabrikigi.

Bindotabuloj por la jarkolektoj 1932 kaj 1933 estas ankoraŭ haveblaj, prezo po 1.25 guld. — Binditaj jarkolektoj kostas po 3.— guld.

NOVAJ LIBROJ

E. K. Drezen: NORMIGO DE SCIENC-TEKNIKAJ KONCEPTOJ, TERMINOJ KAJ SIMBOLOJ. 108 paĝoj, formato 13 × 19 cm. Prezo 2 rubloj. — Ruslingva scienca verko eldonita en Moskvo. La aŭtoro estas la konata verkisto E. Drezen, membro de la Esp. Lingva Komitato, gvidanto de la Esperanto-movado en la Sovjet-Unio. En la fino de la libro oni trovas la resumon de la enhavo, laŭ la ĉapitroj, en la lingvoj franca kaj Esperanto. Imitinda ekzemplo por ĉiuj sciencaj verkoj!

B. Radziminski: PODRECZNIK JEZYKA ESPERANTO. 64 paĝoj, formato 13 × 18 cm. Eldono de la aŭtoro, Chelmno (Polujo). — La dua eldono de la lerte redaktita praktika Esperanto-lernolibreto por poloj. La aŭtoro estas diplomita instruisto de Esperanto ĉe la 2-a kadeta korpuso en Chelmno.

M. de Waard: LA ESPERANTA LITERATURO. 64 paĝoj, formato 13½ × 19½ cm. Prezo: kartonita —.75 ned. guld. Eldonis: Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, Hago. — La kandidatoj de la Esperanto-ekzamenoj ĉiam sentis la mankon de studlibreto pri la literaturo de nia lingvo. Ĉi tiu nova libro volas esti la atendita helpilo. Ĝi entenas en praktika aranĝo 100 demandojn kaj la grupigitajn respondojn. La libron kompletigas enhav-resumoj de pluraj konindaj originalaj verkoj kaj la ekzamenaj postuloj de la du ekzamen-komitatoj funkciantaj en Nederlando. La libro estas tre utila informilo pri la potence kreskanta Esperanta literaturo, por la tutmonda Esperantistaro.

Ivan Vazov: NOVAJ BULGARAJ RAKONTOJ. Tradukis: Georgi Atanasov. 64 paĝoj. Prezo 18 levoj. Eldonejo: Centra Librejo „Esperanto" en Sofio (Bulgarujo). — La libreto entenas ok interesajn rakontojn de la fama bulgara verkisto.

LIBRO-LOTERIO de LA PRAKTIKO

Detalaj informoj en la Januara numero. — La tirado okazos en la mezo de Januaro 1935; la tago estos publikigata en la venonta numero. — Estas ankoraŭ ĉ. 2500 vendotaj lotoj. Rapidu aĉeti ilin!

LA LISTO DE LA PREMIOJ (DAŬRIGO):

174 **Tri rakontoj.** De A. Dumas.
175 **Garboj.** Legolibro.
176 **Ĉinaj noveloj.** De O. Erdberg.
177 **Rememoroj de Esperantisto.** De A. D. A.
178 **Kial venkis Esperanto?** De Prof. L. Ĵirkov.
179 **El la intima libro de la Verd-urbaj Esperantistoj.** De A. D. A.
180 **La submarinistoj.** De Novikov-Priboj.
181 **Legendoj.** De A. Niemojewski.
182 **Elektitaj noveloj** de Turgenev.
183 **La nigra galero.** De W. Raabe.
184 **El la „Camera Obscura".** De Hildebrand.
185 **El la skizlibro.** De W. Irving.
186 **Ses noveloj.** De E. A. Poe.
187 **La firmao de la kato, kiu pilkludas.** De H. de Balzac.
188 **Orientaj fabeloj.** De V. Doroŝeviĉ.
189 **Noveloj.** De H. Sienkiewicz.
190 **Ano de l' ringludo.** De D. Ŝimunoviĉ.

GARDATAJ LOTOJ (daŭrigo). — Charlet 7163—7217; Fejér 7103—7113; Indra 7051—7061; Luczynski 7130—7140; A. Pritca 7218, 7229; Tartlan 7062—7072; de Vrieze 7141—7162; van Zurk 7040—7050.

NUN AĈETEBLAJ VERKOJ DE J. ROSENBERG:

Societa ludaro ..... —.60 sv. fr. (—.35 guld.)
Internacia frazludo ..... 1.— „ „ (—.60 guld.)
Multiplika tabelaro ..... 1.20 „ „ (—.70 guld.)

Por afranko oni aldonu 10 %.

(La guldenaj prezoj entenas ankaŭ la sendkostojn.)

Oni mendu ĉe:

Intern. Cseh-Instituto de Esp., Hago;
Universala Esperanto-Asocio, Ĝenevo;
Jakob Rosenberg, Hollandi t. 11—4 en Tallinn (Estonio).

Tiuj, kiuj plene trastudis la

VERKOJN de D-ro ZAMENHOF,

fundamento ĉiama kaj ĉiea por la unueco de nia lingvo, estas kompreneble la plej lertaj Esperantistoj.

Skribu do al la

ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO
11 rue de Sèvres, Paris (6),

kiu eldonas tiujn librojn kaj kiu volonte sendas senpage sian katalogon pri interesaj libroj.

VENTEG' AŬTUNA...

Sovaĝanseroj flugas for
en nokto la senluna —
Ploregas, ĝemas mia kor'
kun frosta vent' aŭtuna.

Ho, estis tempo sen dolor'
— feliĉa kaj trankvila —
ĝi vivas nur en la memor'
kun varma suno brila!

Ĝardenon havis mi kun flor'
— belege brilis suno —
perdiĝis baldaŭ la odor'
en vento de aŭtuno....

Ekfontis jen pezega plor'
el nubo la malhela —
Sovaĝanseroj, flugu for
kun nia sort' kruela....

J. V. Dolinsky.

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Fianĉiĝo. — Nia konata propagandisto s-ro Aleksandro Siitam en Tallinn (Estonio), instruisto ĉe la Cseh-Instituto, fianĉiĝis kun f-ino *Dagmar Wendach*, perfekta Esperantistino en Tallinn.

Edziniĝo. — Nia fervora pola propagandistino kaj poetino, f-ino *Leonja Fruchtowna* („Lena"), instruistino de la Cseh-Instituto, edziniĝis kun s-ro *Mihaelo Neumann*, advokat-kandidato en Jaslo (Polujo).

S-ro S. Pragano, la eminenta rumana instruisto ĉe la Cseh-Instituto, post trijara kursgvidado en Nederlando kaj Anglujo revojaĝis al Rumanujo, por plenumi la devigan militistan servon.

Propagandvojaĝo. — Nia agema nederlanda propagandisto, s-ro Sipke Stuit el Leeuwarden, instruisto de la Cseh-Instituto, kiu en la lastaj monatoj gvidis multajn sukcesajn kursojn en Svedujo, kaj forvojaĝis al Francujo por fari tie publikajn paroladojn pri Nederlando kaj Svedujo. Li preparis literalie specialan prelegon pri la nederlanda centro-arto en la 17-a jarcento, kun belaj ilustraĵoj. „Frisa Esperantista Rondo" kies ano li estas, varme rekomendas al la francaj samideanoj, utiligi la helpon de s-ro Stuit por la movado. Lia konstanta adreso estas: Internacia Traduk-Oficejo, Frans Hals-straat 41 en Huizum (Frislando), Nederlando. La portreton de s-ro Stuit La Praktiko jam publikigis en la 25-a numero (Januaro 1934).

Novaĵoj de la Esp. Akademio. — S-ro generalo Bastien, pro sia elekto kiel prezidanto de UEA, rezignis pri la ofico de direktoro de la Sekcio „Komuna Vortaro". En lian lokon oni elektis s-ron W. Bailey. — La Akademio elektis kiel korespondantojn: f-inon Lidja Zamenhof, s-ron inĝ. D-ron Orengo kaj s-ron R. Kreuz. — La Sekcio de Kontrolo starigis normajn lingvajn diplomojn por determini la relativan valoron de la landaj diplomoj. — La Akademio turnis sin al ĉiuj Esp-aj eldonejoj, petante, ke ili sendu al la Akademio po unu ekzempleron de ĉiuj siaj eldonaĵoj.

Morto. — En Apeldoorn (Nederlando) la 15-an de Oktobro mortis f-ino *Martina Kramers* en la aĝo de 71 jaroj. Ŝi estis unu el la plej fervoraj kaj sindonaj disvastigantoj de Esperanto en Nederlando, ageme partoprenanta en ĉiu laboro kaj ofero por nia movado.

— La 21-an de Septembro mortis en Lübeck (Germanujo) s-ro D-ro fil. *Albin Möbusz*, meritplena pioniro de Esperanto en Germanujo, estinta estrarano de la Germana Esperanto-Asocio, verkinto de pluraj konataj Esperantaj libroj.

— En Tallinn (Estonio) la 4-an de Septembro mortis pro terura akcidento nia simpatia juna samideano s-ro *Henriko Glöckner*, en la aĝo de 23 jaroj. Li falis en kaldronon de bolanta celulozo, en la fabriko, kie li laboris.

— La 29-an de Oktobro mortis s-ro *Alfred-René Trotin* en Lille (Francujo), en la aĝo de 67 jaroj.

— La 18-an de Septembro mortis subite en Viljandi (Estonio) nia agema samideanino f-ino *Selma Rosenblatt*, konata kiel ŝatata deklamistino.

Novaj gazetoj. — Dum la lasta monato atingis nian redakcion la unuaj numeroj de tri novaj gazetoj: NOVA HORIZONTO, duonmonata propaganda gazeto, parte en rumana lingvo, redaktata de s-ro D. Nicorescu en Roseti-Ialomita (Rumanujo). — NIA STELO, dumonata organo de la Esp.-grupo „Török Péter"; redaktas s-ro J. Mátyás. Adreso: Vigkedvü 4, Debrecen (Hungarujo). — JEZYK MIEDZYNARODOWY, pollingva monata gazeto por propagando de Esp. inter la laboristaro, redaktata de s-ro W. Lekowski. Adreso de la red. kaj adm.: Marszalkowska 81—33 en Warszawa (Polujo).

„Skoltestroj kontraŭ Esperanto". — Sub ĉi tiu titolo ni publikigis artikolon sur la 1-a paĝo de la 34-a numero (Oktobro 1934) de La Praktiko. Nia ŝatata samideano s-ro F. Douglas Murphy, redaktoro de la „Skolta Bulteno", turnis sin al la Internacia Skolta Oficejo en Londono, por ricevi klarigon pri la priparolita decido. S-ro Hubert Martin, direktoro de la nomita Oficejo donis al s-ro F. D. Murphy la jenan klarigon: „Sekve al la fakto, ke la Esperantistaro konstante petegas al ni instigi la studadon de Esperanto al skoltoj prefere al iu alia lingvo, la afero estis konsiderata de nia Internacia Komitato dum ĝia lasta kunveno, kaj ĝi decidis unuvoĉe, ke ĝi ne povas tion fari, pro tio, ke ĝi ne opiniis, ke ĝi havas sufiĉan praktikan valoron por meriti tian paŝon." — Ni dankas al s-ro Murphy pro la klopodo ricevi precizan informon. Ni volonte publikigas la ricevitan informon kaj petas, ke aliaj gazetoj represu ĝin.

„La Verda Stacio" estas la karesa nomo de la radio-stacio en Brno (Ĉeĥoslovakujo), kiu regule disaŭdigas agrablan Esperanto-horeton kun interesa kaj valora programo. Post la lasta disaŭdigo la stacio ricevis 255 Esperanto-lingvajn leterojn el 19 landoj.

„Esperanto kaj la komerco". — Nia agema propagandisto, Frato Vigberto van Zon en Reusel (Nederlando), aperigis novan eldonon de la utila nederland-lingva flugfolio „Esperanto en de Handel". Ĝi estas mendebla ĉe li mem (poŝtkonto 126878 de Pensionaat St. Cornelius en Reusel), prezo de 10 ekz. —.25 guld., 100 ekz. 1.50 guld. Frato van Zon eldonis ankaŭ du aliajn flugfoliojn („Esp. kiel helpilo de lingvolernado" kaj „Esp. utila por la katolika eklezio"), kiuj estas aĉeteblaj por la sama prezo.

Psika Esperanto-Ligo. — Sub ĉi tiu nomo fondiĝis en Anglujo nova organizaĵo, gvidata de s-ro A. W. Thomson. La celo de la ligo estas studado de spiritualismo kaj psikaj fenomenoj. Interesiĝantoj povas sin turni al adreso: BM/AVOTO, London, W.C.1.

Belgujo. — La Belga Esperanto-Instituto en *Antverpeno* malfermis Esperanto-Domon, kie oni povas aĉeti Esperanto-librojn k.t.p. Ĝia adreso estas: Willemsstraat 21. — En *Brugge* la 5-an de Oktobro komenciĝis kurso. — La 24-a belga Esperanto-kongreso okazos en Brugge je pentekosto de 1935.

Britujo. — En *Bishop Auckland* s-ro Russell W. Hamilton komencis Ĉe-kurson por 26 personoj. — La Esp.-Societo en *Partick* (Skotlando) la 19-an de Okt. festis sian 25-jaran jubileon. La prezidantino, f-ino Nicol, ornamis ĉiun gaston per verda kaj arĝenta stelo, kaj oni laŭtlegis poemon verkitan de f-ino I. Scott, estinta sekretariino, loĝanta nun en Usono.

Danujo. — S-ro D. Ponti el Hago gvidas kursojn en *Randers* kaj *Langaa*. — S-ro Gillis Staberg el Skara (Svedujo) gvidas kursojn en *Nyköbing* kaj *Vejerslev*. Aparta kurso funkcias por geinstruistoj en Nyköbing, organizita de la Geinstruista Societo de la insulo Mors. — En *Silkeborg* s-ro S. B. Skole, rektoro de la lernejo „Kornmod", enkondukis Esperanton kiel devigan fakon. — En *Aarhus* komenciĝis kurso sub la gvidado de s-ro Aŭg. Weide el Hamburgo. — S-ro Juneby el Svedujo gvidas kursojn en pluraj lokoj.

Francujo. — F-ino Lidja Zamenhof gvidis bonsukcesan kurson en la sudfranca urbo *Châteaurenard*. La kurso komenciĝis kun 46 personoj kaj finiĝis kun 70, el kiuj 10 venis el la urbo Avignon. — La 21-an de Okt. f-ino Zamenhof kun s-ro Bourdelon vizitis la urbon *Avignon* por propagandparolado kaj provleciono. La ĉeestanta publiko (ĉ. cent personoj) estis tre kontenta. Tuj fondiĝis Esp-

grupo kun 20 membroj. — F-ino L. Zamenhof komencis kurson en *Orléans*. — En Douai la 24-an de Okt. okazis publika parolado pri Esperanto, de s-ro Albéric Humez, kiu komencis kurson. — En *Houilles* kurson gvidas s-ro R. Gazanhes.

Germanujo. — Nia angla samideano s-ro O. B. Price-Heywood, instruisto de la Cseh-Instituto, gvidas kurson en *Berlino* por la anoj de la Societo de Amikoj (kvakeroj). — En *Karlsruhe* la 15-an de Okt. komenciĝis kurso en la Katolika Junul-Domo, sub la gvidado de s-ino E. Feigenbutz.

Hispanujo. — La „Sociedad Esperantista Gaditana" en *Cadiz* malfermis novajn kursojn por komencantoj kaj progresantoj, sub la gvidado de s-ro F. G. Merchán. La malferman paroladon faris s-ro F.Oliván, del. de UEA en Cartagena. Li publikigis plurajn efikajn propagandajn artikolojn en diversaj hispanaj gazetoj.

Hungarujo. — En *Gyöngyös* s-ro B. Kraus komencis viglan propagandon kaj kurson ĉe la lingvolernejo Hugai.

Jugoslavio. — Nia ĉeĥoslovaka propagandisto s-ro D. Bartošik post sukcesplenaj provlecionoj komencis kursojn en Novi-Sad. Partoprenas serboj, germanoj kaj hungaroj.

Nederlando. — La „Unua Nederlanda Transportlaborista Esp.-Grupo" aranĝis en *Amsterdam* Esperanto-ekspozicion. Ĝian sukceson montras la fakto, ke al speciala kurso, gvidata de s-ro Muller, aliĝis 122 personoj. — S-ro S. Pragano dum sia vojaĝo de Anglujo al Rumanujo vizitis la urbojn *Hago, Arnhem, Deventer* kaj *Dordrecht* kaj faris kelkajn sukcesplenajn paroladojn. — En *Utrecht* kurson gvidas f-ino J. Baudin el Ĝenevo. — En la Popol-Universitato de *Alkmaar* daŭrigan kurson gvidas s-ro A. Pascha. — En *Rotterdam* s-ro W. W. Emeis, instruisto de la Cseh-Instituto, gvidas kurson por oficistoj. La kurson organizis la loka sekcio de la Centra Nederlanda Ligo de Oficistoj. — En *Frislando* sukcesplene progresas la ses kursoj de f-ino M. Saxl. La nombro de la kursanoj altiĝis al preskaŭ tricent. — En *Rotterdam* la nombro de la kursanoj de A. Cseh kreskis de 120 al 194. — En *Winterswijk* s-ro H. Thien komencis kurson por 14 personoj. — En *Hago* post la grandsukcesa propaganda vespero de „Fine Ĝi Venkos" komenciĝis du kursoj sub la gvidado de A. Cseh. Partoprenas 104 personoj. — En *Amsterdam* s-ro J. B. B. Dufrenne, prez. de ILEPTO, gvidas kurson por 20 poŝtistoj. — En la societo „Fine Ĝi Venkos" en *Hago* interesajn prelegojn faris s-ro P. H. Mooij (pri sia vojaĝo al Laplando) kaj s-ro A. Vrolijk (pri: „La ideo de Zamenhof, lia penso, lia koro."). — En *Amsterdam* f-ino Th. Tushuizen gvidas du kursojn, unu por blinduloj kaj unu por junuloj. — En *Rotterdam* s-ro M. de Waard gvidas kurson por senlaboruloj.

Nederlanda Hindujo. — Gesinjoroj Schoutens, ŝatataj geinstruistoj de la Cseh-Instituto, komencis en *Malang* (insulo Java) grandskalan propagandon. Post aranĝo de granda ekspozicio, publikaj paroladoj kaj radio-parolado komenciĝis kurso ĉe la Popola Universitato, kun 50 partoprenantoj.

Norvegujo. — En *Oslo* ĉe la „Senpaga Instruado de l' Studentoj" du kursojn gvidas f-inoj Eva kaj Liv Sandberg, por 60 personoj. — En *Gjövik* por 40 personoj kurson gvidas s-ro Jens Schjerve.

Polujo. — En *Radom* s-ro J. A. Felter gvidas kurson. — En *Javorovo* du kursojn gvidas f-ino Fanjo Steiger.

Svedujo. — La Esp.-distrikto Blekinge aranĝis propagandan semajnon por la tuta provinco, dum kiu okazis ekspozicioj kaj propagandaj kunvenoj. Post interesaj prelegoj de s-ro H. Fox (pri Danzig, Zoppot, la „norda Monte-Carlo") kaj radio-parolado pri „6000 kilometroj kun tendo kaj biciklo tra Svedujo" komenciĝis kursoj en *Kallinge, Karlskrona, Nättraby* kaj *Ronneby*, por cent partoprenantoj, sub la gvidado de s-ro H. Fox. — S-ro T. Morariu komencis plurajn kursojn en *Stockholm* kaj *Växjö*. — S-ro H. Seppik gvidas ok kursojn en *Göteborg* kaj *Mölnlycke*.

Svislando. — En *Ĝenevo* la laborista Esp.-grupo „Zamenhof" (antaŭa nomo „Progreso Laborista") kune kun la Laborista Universitato de Ĝenevo aranĝis kurson, kiu komenciĝis la 28-an de Sept. sub la gvidado de nia fervora propagandistino s-ino Henriette Ith, instruistino de la Cseh-Instituto. Partoprenas 38 personoj. La kurson la 26-an de Sept. enkondukis propaganda vespero, en kiu docento Ch. Baudouin, la konata scienculo, faris paroladon pri „personaj spertoj pri Esperanto".

ESPERANTO-DOMO
ARNHEM

Ni aranĝas en la Esperanto-Domo **konstantan ekspozicion** de ĉiuspecaj Esperantaĵoj: libroj, gazetoj, broŝuroj, reklamiloj, afiŝoj, propagandiloj, lerniloj, flugfolioj, ilustritaj poŝtkartoj k.t.p.

Ni kore petas la tutmondan samideanaron alsendi taŭgajn objektojn por tiu celo.

Al ĉiu persono, kiu sendas ion, ni respondos per bela foto-karto pri la Esperanto-Domo.

Adreso: **Esperanto-Domo, Arnhem** (Nederlando).

L. Moreau, administranto.

KONKURSOJ

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Julia numero!

106-a konkurso.

GRAMATIKA TASKO.

Ĉi tiu numero de La Praktiko sur la 3-a paĝo enhavas la 18-an taskon en la serio de niaj praktikaj gramatikaj lecionoj. Ĝi temas pri la aktivaj participoj.

La tasko de la konkurso estas: bonvolu solvi la nomitan gramatikan taskon, transformante en la vera historio „LA KOFRO" ĉiun aktivan participon je senparticipa esprimo.

REGULOJ: Oni devas reskribi la tutan rakonton en la nova formo, prefere per skribmaŝino, surglui la konkursan kuponon, surskribi la nomon kaj adreson de la solvinto kaj ensendi ĝin al la redakcio.

Inter la ensendintoj de la plej bonaj solvoj ni disdonos 6 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la 15-a de Februaro.

107-a konkurso.

INTERESA NOMBRO

(Ensendis S-ro A. Lienhardt en Montigny-les-Metz, Francujo.)

La tasko de ĉi tiu konkurso estas: **Bonvolu skribi sur paperon la plej grandan nombron, kiu estas skribebla per tri ciferoj!**

Kiel vi vidas, ĉi tiu konkurso estas ridinde facila! Ni esperas, ke ĉiu leganto de La Praktiko partoprenos en la konkurso. Sendu do rapide vian paperon kun la nombro kaj ne forgesu aldoni la kuponeton kaj vian adreson.

Car antaŭvideble ni ricevos treege multajn solvojn, ni disponigas 15 premiojn por la ensendantoj de la ĝusta solvo. Ni akceptas la solvojn ĝis la 15-a de Februaro.

Atente plenumu ĉiujn konkursajn regulojn!

108-a konkurso.

SILAB-ENIGMO.

AK AL AN AN AR BA CEP CER ĈA DE DI DO ER ES GE GO ĜAR ĜE ĜEN IN KO KO KO KUN LA LI LO LO LO LO LO MA MA MI MO NA NO NO NO OK OR PA PA PE PE PEN PER RO RO RO RO RO RO SA SE SE SER SU TA TAJ TI TO TO TO TO TO TO TO TO TO TU UR VES VUL ZA

El la supraj 75 silaboj formu 25 tri-silabajn vortojn kun la jenaj signifoj:

1. Homo vivanta en soleco.
2. Sur la kapo estas.
3. Parto de la jaro.
4. Ĉiela estaĵo.
5. Malrapida besteto.
6. Nomo de tago.
7. Nomo de metalo.
8. Loko de la floroj.
9. Pikanta kreskaĵo.
10. Kvarpieda longa besteto.
11. Granda muzik-instrumento.
12. Parolanta birdo.
13. Kreskaĵo kun acidaj folioj.
14. Fluganta mambesto.
15. En la preĝejo estas.
16. Parto de la minuto.
17. En Esperanto ne estas.
18. Senpieda besto.
19. Faranto de vestoj.
20. Tero en la maro.
21. Besteto sur la kapo.
22. Interesa legaĵo.
23. Artisto en la teatro.
24. Grandega birdo.
25. Manĝata birdo.

La komenc-literoj de la ricevitaj vortoj donas tre pravan proverbon.

Inter la ensendintoj de la ĝusta solvo ni dislotos 6 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la 15-a de Februaro.

Bonvolu precize plenumi la konkursajn regulojn!

Kupono por la 106-a konkurso	Kupono por la 107-a konkurso	Kupono por la 108-a konkurso

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj gluu ilin sur viajn solvojn.

LA REDAKCIO RESPONDAS

En ĉi tiu rubriko ni klarigas tiujn vortojn, kiujn niaj legantoj ne trovas en siaj ordinaraj vortaroj. Ensendante la vortojn oni bonvolu ankaŭ indiki la lokojn (libro, paĝo, linio), kie ili aperis.

S-ro V. M. en T. (Sovjet-Unio). — Dankon pro la senditaj verkajoj. Bedaŭrinde ili ne estas taŭgaj por La Praktiko, kvankam ili montras lerecon en la uzado de nia lingvo, kaj ankaŭ interesajn ideojn.

S-ro J. A. F. en R. (Pol.) — Via tradukaĵo enhavas plurajn erarojn. Tial diligente ekzercu plugante kaj tradukante.

S-ro G. C. T. en S. (Ned.) — La prefikso „mis" signifas: erare, malĝuste. Ĝi estas egala kun la nederlanda prefikso *„mis"*, sed ne kun *„wan"*.

S-ro J. J. en K. (Hung.) — 1. Via opinio pri nuj skoltestroj estas tre prava: oni devas koni la veron, pri kiu oni decidas. — 2. Bonvolu pagi referencon al nia poŝtkonto.

S-ro N. U. en J. (Stovjetunio.) — La prepozicion „I" oni uzas por esprimi movon al io. La ĝustaj primoj estas: *Mi gratulas al vi. Mi abonas la gazeton. Mi iris al la lernejo. Mi amas vin. Mi metis libron sur la tablon.*

S-ro C. A. en T. (Franc.) — „La ĉevalo forlopis en la sepan landon." „Eĉ en la sepa mbro." En popolaj fabeloj estas kutimo uzi la vorton „sepa" por esprimi: tre malproksima.

S-ro M. T. en R. (Franc.) — Via poŝtestro erŝajne ne estis prava, postulante de vi punmankon.

S-ro H. J. (Islando). — 1. „Mi estas 30 jarojn a." La frazo estas bona. — 2. „Mi povas naĝi i mi ĝin lernis en la akvo." La frazo estas bona. — 3. Pri la respondmarkoj („respondkuponoj") talajn klarigojn kun ilustrajoj vi povas trovi en 8-a numero de La Praktiko (Aŭgusto 1932) - la 8-a paĝo.

S-ro V. P. en E. (Dan.) — 1. Pri la sufiksoj „ĵ" kaj „iĝ" vi trovas detalajn klarigojn kaj altajn ekzemplojn en la Plena Vortaro. — La qvo „Volapük" tre klopodis eviti la literon „r", i tamen ĝi havas kelkajn vortojn kun „r".

Al kelkaj. — La konkursan kuponon oni devas ai sur tiun paperon, sur kiu estas skribita la lvo. Neniam gluu ĝin sur apartan paperpecon sur la koverton!

S-ro S. P. L. en L. (Angl.) — Kun intereso ni ĝis vian teorion, ke ne nur la miksado de sango bonigas la rason, sed ankaŭ la miksado de ideoj, j ke la homa raso korpe, mense kaj anime pliniĝos per la internaciaj edziĝoj inter la Esperantoj. Estus do utile, se vi observadus niajn interciajn geedzojn, por kolekti pruvojn por via teorio.

S-ino M. K. en A. — Vi estas prava. En la olo de tiu libro estas gramatika eraro. Devas ti: „Ĉirkaŭ la mondo kun la verda stelo." Simile ara estas la titolo de la alia libro: „Saltego trans rmiloj". La ĝusta esprimo estas: „trans jarmilojn". n la libro „Aŭstralio" la titolo de tiu ĉapitro vus esti: „Tra la kontinento" kaj ne „trans". Jes, i korekta estus la titolo: „La vivo de Zamenhof."

S-ro A. C. en H. (Franc.) — 1. „Oni trovis talfadenojn, pruvantaj, ke jam ekzistis telefono." n ĉi tiu frazo estas eraro. La ĝusta vorto estas: *ruvantajn*". — 2. „Timiĝi" kaj „ektimi" signifas saman aferon. La lasta formo estas pli simpla j tial preferinda. — 3. „Mi petis monon de s-ro ." Se ni transformas ĉi tiun frazon en pasivan rmon, ni ricevas la frazon: „Mono estas petita de de s-ro A." Por eviti la dubon ni uzu aktivan rmon. — 4. „La elekto respektive alelekto." La rto „respektive" ĉi tie estas bona. — 5. La ista frazo estas: „Mi pli multe amas vin, ol ne povi pardoni al vi." En pli kompleta formo: „Mi pli multe amas vin, ol tiel, ke mi ne povas pardoni al vi." — 6. Viaj rimarkoj pri tiuj kriplaj frazoj estas tre pravaj. Estas tre bedaŭrinde, ke multaj samideanoj skribas tiel malzorge, eĉ en multe legataj kaj rekomendataj gazetoj.

„Insula Dei". — Je via demando pri la bezono aŭ nebezono de akuzativo ni povos respondi nur, se vi sendos al ni la frazojn, ĉe kiuj vi havas dubon. — Ni tre bedaŭras, ke tiuj eldonintoj de turismaj prospektoj ne sendis la petitajn presaĵojn kaj ne respondis je viaj leteroj. Bonvolu noti iliajn nomojn en la malhonora listo de la fuŝuloj.

Al pluraj. — Kiam vi demandas la signifon de maloftaj vortoj, ne troveblaj en la vortaroj, bonvolu indiki precize la lokon, kie vi trovis la vorton (titolo de la libro aŭ gazeto, paĝo, linio). Ofte oni povas klarigi la vorton nur konante la tutan frazon. Kaj ofte ni trovis, ke la demandita vorto ne estis „neologismo", sed nur senkulpa preserareto.

HAGAJ GESAMIDEANOJ!

Sankta Nikolao kaj **Nigra Petro** (abstinenculoj) vizitos vin per aŭto; 1.— guld. por unu vizito. — Bonvolu skribi al: s-ro J. Worms, Zusterstraat 180, Hago.

AVERTO.

Ni ricevis plurajn gravajn plendojn de konataj kaj honorindaj Esp-istoj (f-ino Lidja Zamenhof, s-ro K. Minor, s-ro F. E. Wadham, f-ino L. Briggs kaj Brita Esp-ista Asocio) kontraŭ la firmo *„Populara Esperanto-Biblioteko"* en Amsterdam, pro nepago de la kontraktitaj tradukistaj honorarioj, nelivero de aŭtoraj ekzempleroj, nerespondo je leteroj kaj neplenumo de mendoj. Kun la nomita firmo, kiun ankaŭ ni helpis, akirante al ĝi la manuskripton de „Quo Vadis?" kaj rekomendante ĝin en niaj kursoj, ankaŭ ni havis tre malbonajn spertojn. Tial ni sentas, ke estas nia devo, baziĝanta sur la necesa solidareco inter la honestaj Esperantistoj, averti kontraŭ la nomita firmo. — Aliaj gazetoj estas petataj represi.

Hago, 30-Oktobro-1934.

Int. Cseh-Instituto de Esp.

Interesa, bone redaktita kaj regule aperanta estas la dumonata

SCIENCA GAZETO

Enhavas multegon da informoj popularsciencaj sur 20 dense presitaj paĝoj.

Jarabono: unu dolaro (3 sv. fr.)

Provnumero: unu respondkupono.

Mendu tuj ĉe:

Amerika Esperanto-Instituto
556 State St.
Madison (Wis.), Usono.

ATENTU!

Mi interŝanĝas

poŝtmarkojn de la tuta mondo, pecon por peco, aŭ laŭ katalogoj Michel, Yvert. Ankaŭ pli grandan kvanton mi povas ŝanĝi, kvanton por kvanto, aŭ laŭ interkonsento.

Mi aĉetas

ankaŭ poŝtmarkojn en ĉiu kvanto, precipe flugpoŝtajn kaj novaĵojn. Ĉiun demandon aŭ proponon mi certe tuj respondas.

V. ZÁMOSTNY, Praha XI.,
PALACKÉHO TR. 28., Ĉeĥoslovakujo.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — Petu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

PAGANTA GASTO. — Nederlanda fraŭlino deziras pasigi kelkan tempon ĉe eksterlandaj samideanoj, kiel paganta gasto. — Adreso: Kennemerstraatweg 199, Alkmaar (Nederlando).

FILATELISTOJ! Mi interŝanĝas kun ĉiuj Eŭropaj landoj, peco por peco, malpli kvanto 500—1000, aŭ laŭ mankolisto laŭ Michel. Mi garantias nur por registritaj sendaĵoj. Afranku filatele! Adreso: S-ro Julio Szegö, tabakvendisto, Kula (Dun. ban.), Jugoslavio.

PETO. — Kiu samideano povas havigi laboron al 29-jara germana maŝinteknikisto, aŭ anoncus por li en sia nacia gazeto? Informoj ĉe La Praktiko.

HELPU progresigi Esperanton en Centra Azio! Por ekspozicioj kaj kursoj bonvolu sendi gazetojn, librojn, reklamilojn, poŝtkartojn, glumarkojn kaj aliajn Esp.-aĵojn. Kun ĝojo mi respondos al ĉiu. Adreso: S-ro A. P. Drosdow, Poĉtamt, Posterestante, Taschkent, (Centra Azio), Sovjet-Unio.

POR FARIĜI pli sperta Esperantisto kaj pli efika propagandisto, vi devas pli multe legi! Legu librON, kiu samtempe bonefikas al vi mem: **„BONHUMORO"** de Paul Nyssens. Prezo kun sendkosto 1.25 ned. guld. — Aĉetebla ĉe La Praktiko.

POŜTKART-VESPERO. — La Esperanto-Klubo de Motala (Svedujo) aranĝos poŝtkart-vesperon la 10-an de Januaro. Sendu belajn ilustritajn poŝtkartojn! Adresu al: S-ro Carl Hallros, ĝardenisto, Bispmotala Handelsträdgård, Motala. — Respondo garantiata.

JAPANOJ! — Du junaj nederlandaj instruistoj, kiuj elektis Japanujon, kiel temon por la ĉefinstruista ekzameno, deziras korespondi kun japanaj intelektuloj. Adresoj: S-ro D. Braakensiek, Asterstraat 19 kaj s-ro P. de Jong, Beukenkampstraat 4, ambaŭ en la urbo Den Helder (Nederlando).

DANAJ AERPOŜTMARKOJ. — Aerpoŝtletero kun la tuta nova aerpoŝtmarka serio, registrita, kostas nur 2.50 danajn kronojn aŭ 9 poŝtajn respondkuponojn. Mendebla ĉe: s-ro E. Hansen, Villa „Perm", Holbäk (Danujo).

POŜTMARKOJN ĉiulandajn (escepte germanajn, ĉeĥoslovakajn, svedajn, hungarajn) laŭkvante interŝanĝas: S-ro Enrico de Montagù, Corso Italia 31, Milano (Italujo). Respondo garantiata.

NE-KATOLIKOJ, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, senpage povas ricevi ilin de Fr. M. Monulfus, sekretario de la Internacia Katolika Informejo en 's-Hertogenbosch (Nederlando).

LETERVESPERO. — La Esp-ista societo „Zamenhofa Espero" la 15-an de Decembro aranĝos Zamenhof-feston kunligitan kun letervespero. Ni petas ĉiulandajn gesamideanojn, ke ili bonvolu alsendi kiel eble plej multajn ilustritajn poŝtkartojn. Respondo garantiata. Adreso: s-ro Aŭgusto Bozek, Janowska 2, Szopienice (Polujo).

VOJAĜANTAJ GESAMIDEANOJ! — Ĉiuj eksterlandaj geesp-istoj, vojaĝantaj en Danujo, ĉiam povos loĝi senpage dum kelkaj tagnoktoj en danaj kamparanaj hejmoj en la ĉirkaŭaĵo de la urbo Aarhus. — Skribu al s-ro Harald Grönborg en Hasselager (Danujo) pri via alveno.

OFICO SERĈATA!

Juna nederlanda fraŭlino, lernanta Esperanton, proponas sin kiel helpantinon ĉe infanoj aŭ en la mastrumado. Estas preta fari ĉian laboron. — Adreso: F-ino M. Veldman, Heerenstraat 9.a. en Leiden (Nederlando).

KORESPONDU!

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —.45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. — *La redakcio.*

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon
s-ino = sinjorino	L = letero	gluu sur la bildan
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	flankon
dez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

MEMORIGO. — La jenaj anoncintoj estas petataj respondi: F-ino **Dussart** en Roubaix; f-ino **E. Zandaus** en Riga; s-ro **A. Illisson** en Löve; f-ino **M. Laarberg** en Tallinn; s-ro **K. Schmidt** en Eberstadt (al s-ro B. Venislovas en Joniškelis, Litovujo). — S-ro **J. Van Zandt** en Hollywood kaj s-ro **R. Campbell** en Belfast (al s-ro H. Kroon en Volendam, Nederlando).

BELGUJO

Edegem. — F-ino Stassen, Boerenlegerstraat 31. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t.

BULGARUJO

Plovdiv. — S-ro Todor N. Ivanov, 20-jara junulo, Instruista Instituto. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Kittlitz. — S-ro Franco Knobloch, 22-jara vendisto. — PI, PM, p.ĉ.t., kun Portugalujo, Hispanujo, Belgujo, Grekujo, Rumanujo, Norvegujo kaj ekstereŭropaj landoj.

DANUJO

Engesvang. — S-ro Viggo Pedersen, Lejrer, Kompedar. — L, p.ĉ.t., k.ĉ.l., kun gejunuloj.

ESTONIO

Tôrva. — S-ro Lembit Tangson, Keskkool, Puiestee t. 1. — L, PK, k.ĉ.l., precipe Azio, Afriko, Sudameriko, p.ĉ.t., interŝ. PM, PI (bfl.).

FRANCUJO.

Gouhenans (Haute Saône). — S-ro Paul Rouge, nova Esp-isto. — PI, k.ĉ.l., prefere kun s-inoj.

HISPANUJO

Valencia. — S-ro Francisco Gomez, Cadiz 54. — Kiu sendos 50, 75 aŭ 100 malsamajn PM el sia lando (escepte Germanujo kaj Aŭstrio), certe ricevos la saman kvanton de hispanaj PM.

HUNGARUJO

Debrecen. — S-ro Francisko Fürjes, Sebes-u. 12. — Interŝ. PM, kvanton por kvanto. Koresp. Esp-e, france kaj germane. Sendu unue. Nepre respondos.

IRLANDO

Carraig Dubh (Melfield). — S-ro Lorcán ÓhUiginn, instruisto. — Serĉas 40 katolikajn korespondantojn (ĵurnalistojn, instruistojn, geskoltojn, malpli junajn f-inojn, filatelistojn k.t.p.) por siaj diversaĝaj gelernantoj. K.ĉ.l., p.ĉ.t. En la unua letero bonvolu uzi simplan lingvon. Certa resp.

ITALUJO

Torino 128. — S-ro Ronald Giorgis, Via Genova 76. — Dez. interŝ. PM, k.ĉ.l. Certe respondos.

KANADO

Vancouver (B. C.). — S-ro Hal Odlum, 23-jara oficisto, kanadano, 1880 Grant Street. — L, PI, k.ĉ.l., precipe ekstereŭropaj, pri literaturo, naturo, sporto, knabaj organizaĵoj k.s. Interŝ. PM.

NEDERLANDO

Alkmaar. — S-ro C. Melio, Zocherstraat 14.a. — Dez. ricevi PI, prefere kun kostumoj. Certe respondos.

Amsterdam-C. — S-ro G. Ellerman, c/o American Consulate General, 473 Keizersgracht. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Arnhem. — S-ro C. B. W. Stakman, juna kontoristo, Bachlaan 8. — L, PK, PI, k.ĉ.l. (ne kun filatelistoj), p.ĉ.t. Certe resp.

Den Haag. — S-ro C. J. v. d. Zijden, Zwarteweg 24. — L, PI, interŝ. aerajn PM kun seriozaj filatelistoj. Ankaŭ kun jazzmuzikamantoj. Certe resp.

Drachten. — S-ro J. D. de Vrieze, 36-jara, Noordkade 19.I. — L, PK, PI, k.ĉ.l. Precipe kun amatoraj fotografist(in)oj por interŝ. fotojn, pecon por peco. Certe respondos.

Egmond aan Zee. — F-ino Annie Schaak, Boulevard 8. — Dez. kor. k.ĉ.l.

's-Hertogenbosch. — S-ro W. A. Hoevenaars, 22-jara studanto, Willem van Nassaulaan 42. — PI, k.ĉ.l. Dez. kor. kun angla- kaj germana-lingvaj personoj, por lerni tiujn lingvojn per Esp.

's-Hertogenbosch. — S-ro H. Rietveld, Geert van Woustraat 71. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Ooltgensplaat (Z.H.) — F-ino Riek de Vos, 22-jara poŝtoficistino, Oudendijk B.8. — L, PK, PI, k.ĉ.l., ankaŭ kun Nederlandanoj.

Winsum (Groningen). — S-ro B. Luit, poŝtoficisto. — L, PK, PI. Certe respondos.

POLUJO

Radom. — S-ro S. Wolinski, Dowkontta 4. — Dez. kor. k.ĉ.l. Certe resp.

Szopienice (G. Sl.) — S-ro Ignaco Kotarba, 25-jara mekanikisto, ul. Sobieskiego 6. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe resp.

Tarnów. — F-ino Irena Traumówna, Del. de UEA, ul. Towarowa 338. — Interŝ. PM kun malproksimaj eŭropaj kaj transmaraj landoj. 50—100 pecoj kontraŭ la sama kvanto, aŭ laŭ katalogoj. Ĉiam kaj tuj respondas.

PORTUGALUJO

São João da Pesqueira. — S-ro D-ro António Joaquim de Oliveira, 28-jara advokato, Rua Direita. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe kun advokatoj. Ne respondas al filatelistoj.

SOVJET-UNIO

Nikolaev (Ukrainio). — S-ro W. P. Lubin, rusa studanto, Selinternskaja 13. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t., interŝ. PM, PK kaj ĵurnalojn.

Stalingrad (STZ). — S-ro A. M. Rezniĉenko, Traktorfabrika poŝtfako, poŝtkesto 8. — Dez. kor. longdaŭre pri literaturo, sporto, kulturo, Esp-movado k.t.p., per L, PK, PI. Kontraŭ Esp-libroj sendas laŭdezire librojn en lingvoj angla, franca, germ., rusa kaj Esp. Certe kaj baldaŭ respondos.

Tiflis. — S-ro Voldemaro Marganidze, Dzneladze 48. — Koresp. pri literaturo, teatro, arto (ne kun diletantoj). Kolektas anglalingvajn librojn (fiction) klasikajn kaj modernajn. Rekompencas per interesa sovjeta literaturo en lingvoj angla, franca, germ., muziknotoj kartvelaj kaj rusaj, belartaĵoj, maloftaj PM (kartvelaj, azerbajĝanaj, armenaj, ukrainiaj kaj rusaj) k.t.p.

SVEDUJO

Bjursås. — S-ro Gottfrid Vestgren. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos al ĉiu.

Bredbyn. — S-ro John Hedberg, Box 65. — Dez. kor. kun Ĉinujo, Japanujo, Afriko, Aŭstralio, Hindujo, Egiptujo kaj aliaj ekstereŭropaj landoj. Dez. ricevi specimenojn de florsemoj. Interŝ. fotojn. Certe respondos.

Sala. — S-ro Oscar Engström, 50-jara ŝuisto, Bergsmansgatan 7. — PI k.ĉ.l.

Sala. — S-ro Robert Olsson, 42-jara fervojisto, Järnvägen. — PI k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Ideala lingva ekzercilo:

La enigmoj

Broŝuro plena de enigmoj por lerni novajn vortojn.

La solvoj entenas interesajn kaj sciindajn frazojn pri Esperanto.

1000 premioj al la solvintoj

Ĉiu deka solvinto ricevas premion.

Opinio pri la broŝuro: *„La solvado de la libreto kaŭzis al mi streĉan, sed tre interesan kaj instruplenan laboron."* (S-ro K. H. en R.)

Prezo: —.10 ned. guld. (10 ekz. = —.50 guld.)

Aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

La enigmojn solvis:

Per **dikaj literoj** *ni presas la nomojn de tiuj, kiuj gajnis premion.*

(Daŭrigo) — 301. S-ro J. Csapó en Timišurbo (Rumanujo). — S-ro R. Unger en Göteborg (Svedujo). — S-ino S. Remond en Parizo. — F-ino J. v. d. Eerden en Tilburg (Nederlando). — S-ro H. Fabricius en Gällivare (Svedujo). — S-ro D. Nagy en Satu-Mare (Rumanujo). — S-ro H. Bobbiesi en Buenos Aires (Argentino). — S-ro L. Krisl en Lom-Bruch (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro H. Pitta en Casa Nova (Brazilo). — **310. S-ro Ph. Lichtenberger en Poitiers (Francujo).** — S-ino N. Koudijs-Modoo en Utrecht (Nederlando). — S-ro J. Atlasz en Subotica (Jugoslavio). — S-ro W. de Groot en Sliedrecht (Nederlando). — S-ro J. C. Balke Jr. en Velp (Nederlando). — F-ino A. Reiter en Brzezany (Polujo). — S-ro H. Reiter en Przemysl (Polujo). — S-ro J. v. d. Es en Slikkerveer (Nederlando). — S-ro P. M. d. Toonder en Rotterdam (Nederlando). — S-ro K. Unt en Viljandi (Estonio). — **320. S-ro H. J. Kloosterman en Rotterdam (Nederlando).** — S-ro A. C. Dekker en Rotterdam (Nederlando). — S-ro C. J. S. v. d. Linden en Hago. — S-ro J. v. Mourik en Batavia (Ned. Hindujo). — S-ro R. Perthold en St.-Joachimstal (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro L. Fournier en Lyon (Francujo). — S-ro A. Inselmann en Harburg-Wilhelmsburg (Germanujo). — F-ino Atkinson en Southend-on-Sea (Anglujo). — S-ino V. Boatman en Westcliff-on-Sea (Anglujo). — S-ro C. W. Harvey en Westcliff-on-Sea (Anglujo). — **330. F-ino R. Harvey en Westcliff-on-Sea (Anglujo).** — *Daŭrigo sekvos.*

KION MI AĈETAS JE LA LIBROTAGO?

Zamenhof: ORIGINALA VERKARO
Luksa tolbindaĵo RM 10.— (6.— guld.)

Privat: HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO
I. Deveno kaj komenco, 1887—1900.
Luksa tolbindaĵo RM 2.25
II. La movado, 1900—1927.
Luksa tolbindaĵo RM 5.40

Privat: VIVO DE ZAMENHOF
Kartonita RM 2.25, bindita RM 3.15

Delsudo: AŬSTRALIO, LANDO KAJ POPOLO
Kun 31 tutpaĝaj fotografaĵoj kaj 1 landkarto.
Lukse bindita RM 4.20

Bennemann: INTERNACIA KANTARO
Enhavas 139 popolajn kantojn el 55 landoj, 7 Esperantajn kantojn, rondkantojn kaj kantsalutojn, 3 famajn koncert-ariojn.
Muzika eldono: RM 4.05
Tekstaro: RM 1.35

Mabel Wagnalls: PALACO DE DANĜERO
Rakonto pri Madame la Pompadour.
Bindita RM 4.— (2.40 guld.)

Jean Forge: ABISMOJ, *originala romano.*
Broŝurita RM 1.75, bindita RM 2.75

„ „ **SALTEGO TRANS JARMILOJ,** *originala romano.*
Bindita RM 2.75 (1.65 guld.)

H. A. Luyken: STRANGA HEREDAĴO
Romano originale verkita.
Broŝurita RM 3.—, bindita RM 4.—

H. A. Luyken: PRO IŜTAR
Originala romano el la antikva Babela historio.
Bindita RM 4 .— (2.40 guld.)

Arišima: DEKLARACIO, Romano. Kartonita RM 1.60 (1 guld.)

Bertrana: BARBARAJ PROZAĴOJ. Noveloj.
Kart. RM —.80 (—.50 guld.)

Doroŝeviĉ: ORIENTAJ FABELOJ	Kart. RM —.80
Goethe: HERMANO KAJ DOROTEO	Kart. RM —.80
Niemojewski: LEGENDOJ	Kart. RM —.80
Poe: SES NOVELOJ	Kart. RM —.80
Sienkiewicz: NOVELOJ.	Kart. RM —.80
Strindberg: INSULO DE FELIĈULOJ	Kart. RM —.80
Sadoveanu: NOBELA PEKO	Kart. RM —.80

Mendu ĉe via libristo aŭ senpere ĉe la eldonejo:

FERDINAND HIRT & SOHN, Esperanto-fako, LEIPZIG C 1, Salomonstrasse 15. (Poŝtĉekkonto: Leipzig 52372)

Zamenhofa tago 1934

GRANDAJ PREZMALALTIGOJ

validaj por mendoj, faritaj plej malfrue la 15-an de decembro 1934. Post tiu dato mendoj estos plenumataj nur laŭ la malnovaj prezoj.

	Ordinaraj prezoj en sv. fr. afrankite	Malaltaj prezoj en sv. fr. afrankite	Ordinaraj prezoj en ned. guld. afrankite	Malaltaj prezoj en ned. guld. afrankite
JULIO BAGHY: Dancu Marionetoj	3.80	1.45	1.90	0.75
JEAN FORGE: Mr. Tot aĉetas mil okulojn	4.40	1.85	2.20	0.95
FRANCISKO SZILAGYI: Trans la Fabeloceano	3.30	1.85	1.65	0.95
FREDERIKO KARINTHY—L. TOTSCHE: Vojaĝo en Faremidon (nur broŝ.)	1.32	0.72	0.70	0.40
K. R. C. STURMER: El la Notlibro de Praktika Esperantisto	2.75	1.45	1.40	0.75
ŜALOM AŜ—IZRAEL LEJZEROVICZ: La Sorĉistino el Kastilio	3.85	1.85	1.95	0.95
KOLOMANO KALOCSAY: Lingvo, Stilo, Formo	3.30	1.50	1.65	0.75
KOLOMANO KALOCSAY: Eterna Bukedo	9.90	4.80	4.95	2.40
GOETHE—KALOCSAY: Romaj Elegioj	2.20	1.20	1.10	0.60
DANTE—KALOCSAY: Infero	9.70	4.80	4.85	2.40
LUDOVIKO TOTSCHE: De Paĝo al Paĝo	2.75	1.45	1.40	0.75
EŬGENO AISBERG: Fine mi komprenas la radion	5.—	2.40	2.50	1.20

Ĉiuj prezoj por broŝuritaj libroj. Por binditaj libroj oni devas aldoni por ĉiuj libroj po 1.— svfr. (—.50 guld.).
Minimume mendebla kvanto la valoro de svfr. 3.— (1.50 guld.).

Mendojn plej malfrue ĝis 15-a de decembro akceptas la eldonejo de Literatura Mondo, niaj reprezentantoj kaj ĉiuj esperantistaj librovendistoj.

La supraj libroj estas mendeblaj je la malaltaj prezoj ĉe:
Int. Cseh-Instituto de Esp., Riouwstraat 172, Den Haag (Nederlando).
Manierojn de pago vidu sur la 2-a paĝo!

Aranĝbildo „PREMIO" N-ro 1.

(ruĝa skatolo)

„La popoloj de la mondo."

Bildo: La Esperanto-Domo en Arnhem kun diversnaciaj gastoj. — *Vidu la apudan reproduktaĵon!*

Konkursa tasko: Kunmeti la bildon kaj eltrovi, al kiuj nacioj apartenas la numeritaj personoj? — La solvon oni devas ensendi sur la aldonita poŝtkarto.

100 MON-PREMIOJ:

5 ĉefpremioj: 100, 50, 25, 10 kaj 5 ned. guld., 95 premioj de po 2.50 ned. guldenoj.

Premiojn povas ricevi ne nur tiuj, kiuj ensendis la ĝustan solvon, sed ankaŭ tiuj, kies solvoj estas proksimaj al la ĝusta solvo.

Aranĝbildo „PREMIO" N-ro 2.

(blua skatolo)

„La eltrovaĵoj de la mondo."

Bildo: Vidaĵo el moderna grandurbo. Sur la bildo estas videblaj multegaj eltrovaĵoj. — *Vidu la apudan reproduktaĵon!*

Konkursa tasko: Kunmeti la bildon kaj sur la aldonita poŝtkarto ensendi la liston de tiuj 20 eltrovaĵoj, videblaj sur la bildo, kiuj estas plej gravaj por la homaro.

100 MON-PREMIOJ:

5 ĉefpremioj: 100, 50, 25, 10 kaj 5 ned. guld., 95 premioj de po 2.50 ned. guldenoj.

Premiojn povas ricevi ne nur tiuj, kiuj ensendis la ĝustan solvon, sed ankaŭ tiuj, kies solvoj estas proksimaj al la ĝusta solvo.

Unika propagandilo! Belega donac-objekto

por personoj en ĉiuj aĝoj

okaze de Sankta Nikolao, Kristnasko, naskiĝtago k.t.p.,

ankaŭ por ne-esperantistoj!

ARANĜBILDOJ

Arte desegnitaj, belege kolorigitaj grandaj bildoj (formato 47 × 26 cm.), gluitaj sur bonkvalitan lignotabulon kaj poste fantazie dissegitaj en po 150—200 pecetojn.

La dissegitaj aranĝbildoj estas en elegantaj skatoloj (mezuroj: 266 × 155 × 63 mm.) sigelitaj kaj numeritaj, kun arĝenta surpreso.

La posedantoj de la aranĝbildoj **rajtas partopreni en tre interesaj kaj instruaj konkursoj, kunligitaj kun valoraj mon-premioj.** Vidu la detalojn ĉi tie supre kaj malsupre!

En ĉiu skatolo troviĝas detala regularo kaj poŝtkarto, sur kiu oni ensendas la solvon.

La ĝustaj solvoj estas deponitaj ĉe notario s-ro *A. C. van Mourik Broekman* en Hago, sub kies prezido okazos la juĝo kaj la disdono de la premioj, farota de speciala komitato.

La juĝado kaj la disdono de la premioj okazos du semajnojn post la disvendo de ĉiuj (5000) aranĝbildoj. Tuj post la juĝo ĉiu partoprenanto ricevos skriban raporton pri la rezulto.

PREZO de unu aranĝbildo: 1.50 ned. guld.

Por la sendkostoj oni aldonu —.25 guld.

Ĉe mendo de 2 aŭ pli da skatoloj afrankita sendo ĉien!

Rabatoj ĉe mendo de kvanto! — Reprezentantoj serĉataj!

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto
Riouwstraat 172, Den Haag. (Poŝtkonto 162626.)

Esperanto-Presejo PIER WESTERBAAN, Vaillantlaan 523—529, Den Haag (Nederlando).

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO
RIOUWSTRAAT 172
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 556677
POŜTĈEKKONTO
162626

Tria jaro
Numero 12 (36)

★

Decembro
1934

„Kongresoj"

La vorto „kongreso" laŭ la ŝerca vortaro de niaj kursanoj signifas: *„Multaj homoj en granda ĉambro sidas, parolas kaj — ne komprenas."*

Ŝerca estas la difino, sed tre vera ĝia kerno. Jen trafa ekzemplo el la lastaj tempoj:

Dum la monato Aŭgusto okazis en la pola ĉefurbo Varŝavo la Internacia Geografia Kongreso. Partoprenis en ĝi multaj scienculoj el la tuta mondo. Inter ili ankaŭ la germanaj delegitoj, kiuj de la jaro 1914 ne vizitadis la Geografiajn Kongresojn. La respektindaj scienculoj en bela salono sidis kaj parolis. Ĉu ili komprenis? Jes, sed ĉiu nur sin mem. Ne unu la alian! Antaŭ nelonge ni aŭdis kaj legis kelkajn interesajn detalojn pri tiu kongreso.

Nur du oficialaj lingvoj, la angla kaj la franca, estis permesataj en la kunsidoj. Kiam la germana delegitaro proponis, ke ankaŭ la germana lingvo estu oficialigata, tuj ĉiuj aliaj delegitoj sekvis la ekzemplon kaj komencis postuli la saman rajton por sia propra lingvo. Por ke la nombro de la oficialaj kongreslingvoj ne superu la nombron de la kongresanoj mem, oni ne plenumis tiujn postulojn. La solvo de la problemo restis kiel peza heredaĵo por la venonta kongreso.

Interesa epizodo de la kongreso estis la geologia ekskurso. Ĝi prezentis la babelan situacion, kun ĝia tuta mizero. Anstataŭ komforta interparolado okazis nur senfrukta, turmenta balbutado. En momento unu el la germanaj delegitoj malespere ekkriis:

„Du lieber Gott, wann werden wir endlich eine Einheitssprache haben?" (Bona Dio, kiam ni havos fine unuecan lingvon?)

Dio jam respondis je tiu demando. Precize antaŭ 75 jaroj. Tiam naskiĝis Ludoviko Zamenhof, sur la sama pola tero, por alporti la komunan lingvon.

Sinjoro W. Boerman, la eminenta profesoro de geografio ĉe la Komerca Altlernejo en Rotterdam, kiu partoprenis en la kongreso kiel nederlanda delegito, atentigis la societon pri la ekzisto de Esperanto, sed la scienculoj ne reagis ...

Kara leganto, ĉu vi konas la belan fabelon de la glora Andersen pri *la novaj vestoj de la reĝo?* Pri la vestoj, kiujn nur la saĝaj homoj povis vidi? La reĝo, ministroj kaj la tuta popolo admiris la neekzistantajn vestojn, ĝis kiam fine unu infano kuraĝis eldiri, ke la reĝo estas nuda ...

La malesperiĝinta germana delegito ludis la rolon de tiu fabela infano, inter la scienculoj, kiuj ŝajnigas esti kontentaj pri siaj malperfektaj aranĝoj. Ni esperas, ke li sukcesis disĵeti inter siaj kolegoj la semon de la bonfara dubo. Kaj ni esperas, ke iam ĉiuj scienculoj kaj gravuloj de la mondo kuraĝos konfesi, ke la mondo ne estas perfekta, kaj ke ili ne hontos rimarki kaj konsideri la ekziston kaj la taŭgecon de Esperanto.

La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 2.50 nederl. guldenoj, por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en la monatoj Januaro kaj Julio. Unu numero kostas -.25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., ½ p. 45.-, ¼ p. 25.-, ⅛ p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

ESPERANTISTA KRISTNASKA LIBERTEMPO

en la Esperanto-Domo en Arnhem, 24. Dec. 1934 — 1. Jan. 1935

Ĉiu Esperantisto estas tutkore invitata.

PROGRAMO:

24—26 Dec. Promenoj, ludoj. En la vesperoj intima kunveno.
27 Dec. Dum la tago **amuzaj kaj instruaj konkursoj** (gramatiko, vortaro, societaj ludoj k.t.p.) **kun premioj.** Promenoj. **Vespere parolado de f-ino M. Saxl** el Berlino.
28 Dec. Same kiel en la antaŭa tago. **Vespere jubilea festo je la honoro de la Esperanto-verkisto s-ro H. J. Bulthuis,** okaze de lia 25-jara jubileo kiel ekzamenanto. **Festparolado** de s-ro **P. Heilker:** „Bulthuis kiel verkisto kaj kiel homo."
29 Dec. Matene promeno. Posttagmeze je la 3-a horo **kunveno de la „Nederlanda Esperanta Gruparo". — Vespere festkunveno kun parolado de Andreo Cseh pri „La Tragedio de la Homo",** mondfama ĉefverko de la hungara literaturo. Muziko de f-ino W. M. Smit kaj D-ro C. J. Baart de la Faille. Poste amuzo kaj danco.
30 Dec. Promenoj. Vespere intima kunveno.
31 Dec. Promenoj. Vespere **jarfina kunveno kun parolado** kaj ludoj.
1 Jan. Promenoj. Kunveno kun ludoj.

La Esperanto-Domo estas **riĉe ekipita per ĉiuspecaj societaj ludiloj** (ŝako, damo, ŝulo, domino, diversaj kvartet- kaj kartludoj k.t.p.) kaj posedas **belan bibliotekon.** La domo estos dum la tuta tempo **bone hejtata** per centra varmigo. Ĉiu gasto sentos sin en varma kaj ĉarma hejmo, en paca kaj amika, vere Esperantista atmosfero.

Kotizo ne estas! — Pensionprezoj: 3.50 guld., 3 guld. kaj 2.50 guld., laŭ la rango de la ĉambro. Estas rekomendinde aliĝi frue kaj mendi ĉambron. Adreso: Esperanto-Domo, Esperantolaan 3, Arnhem. — Telefono 26060. Poŝtkonto 13848.

Ankaŭ eksterlandaj gastoj estas kore invitataj!
Venu grandnombre! En ĝojo kaj harmonio ni finu ĉi tiun jaron!

L. MOREAU, administranto de la Esperanto-Domo.

Al niaj abonantoj!

Ni petas tiujn abonantojn, kies pago finiĝis kun ĉi tiu numero, ke ili bonvolu kiel eble plej baldaŭ sendi novan pagon, aŭ informi nin pri eventuala malabono.

La abonantojn en Nederlando ni petas, ke ili enpagu la abonon antaŭ la 1-a de Januaro 1935. De tiuj abonantoj, kiuj ĝis tiu dato ne paĝis aŭ ne informis nin pri malabono, ni enkasigos la pluan abonsumon per poŝtkvitanco.

La eldonejo de LA PRAKTIKO.

ATENTU!

Se vi volas sendi monon al La Praktiko, bonvolu observi la sekvantajn:

La monon oni povas sendi per *poŝtĉekkonto* (Wien A-156933, Praha 500362, Kopenhago 34941, Berlin 129527, Budapest 13201, Zagreb 41345, Riga 4870, Den Haag 162626, Warszawa 190203, Stockholm 74126, Bern III. 6761), *per poŝtmandato,* per *bankĉeko* aŭ per *papermono* en letero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj de la sube nomitaj landoj, kalkulante la valoron laŭ la suba tabelo:

1.— ned. guldeno valoras en:

Aŭstrio 3.70 ŝil., **Belgujo** 15 fr., **Britujo** 2 ŝil. 10 p., **Bulgarujo** 58 lev., **Ĉeĥoslovakujo** 17 kr., **Danujo** 3.10 kr., **Estonio** 2.60 kr., **Francujo** 10.35 fr., **Germanujo** 1.85 m., **Hispanujo** 5 pes., **Hungarujo** 3.30 p., **Italujo** 8 lir., **Jugoslavio** 30 din., **Latvujo** 2.20 l., **Norvegujo** 2.80 kr., **Polujo** 3.70 zl., **Rumanujo** 80 l., **Svedujo** 2.70 kr., **Svisujo** 2.10 fr.

Pro la freneza dancado de la mon-valoroj ĉi tiu tabelo validas nur ĝis la apero de nia sekvanta numero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtaj respondkuponoj. 1 kupono = —.15 ned. guld.

BONAN JARFINON kaj
FELIĈAN NOVAN JARON
ni deziras al ĉiuj niaj ŝatataj abonantoj kaj legantoj.

LA PRAKTIKO.

LA REZULTO DE LA KONKURSOJ

95-a konkurso. En ĉi tiu konkurso partoprenis 109 legantoj de La Praktiko, kaj ili ĉiuj bone solvis la silabenigmon. La ĝusta solvo estas: **La popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.** — La apartaj 24 vortoj estas: *Lakto, Pomo, Ripo, Kelo, Fajfi, Maro, Osto, Lento, Kolo, Pensi, Tendo, Kato, Ungo, Plugas, Tramo, Lundo, Mano, Trono, Blonda, Mono, Fasti, Migri, Blinda, Brando.* — La 8 premiojn la sorto donis al la jenaj solvintoj: F-ino **N. Angelova** en Tirnovo (Bulgarujo). — S-ro **W. K. Goedheer** en Delft (Nederlando). — S-ro **N. Hegre** en Hjuksebö (Norvegujo). — S-ro **J. Hrdina** en Dittersbach (Ĉeĥoslovakujo). — S-ro **Lim Ek Thoean** en Samarinda (Borneo, Ned. Hindujo). — S-ro **R. Pannenborg** en Delfzijl (Nederlando). — S-ino **P. Roubaud** en Vence (Francujo). — S-ro **J. Vital-Vital** en Sankt-Moritz (Svisujo).

96-a konkurso. En la 30-a numero de la Praktiko (Junio 1934) ni publikigis la interesan bildserion pri la edifa historio de niaj du sen-nomaj samideanoj. La bildoj inspiris 18 personojn al verkado de klarigaj versoj. Nia konkursa komitato konstatis, de en ĉiu solvo estas spritaj ideoj, sed laŭ la tekniko de la versfarado la plimulto ĉe la solvoj estas tre kritikebla. Tial ni forte rekomendas al la solvintoj, ke ili diligente trastudu la libron: **„KIEL FARIĜI POETO? aŭ PARNASA GVIDLIBRO",** verkitan de Kalocsay kaj Waringhien. Tiu libro entenas detalan instruon pri ritmo, rimo, versformoj, kaj ankaŭ ampleksan rim-vortaron. *(Aĉetebla ĉe La Praktiko, prezo: broŝurita 2.— guld., bindita 2.75 guld.)* — La anoncitajn ses premiojn la komitato aljuĝis al la sekvantaj solvintoj:

1. S-ro **V. Zamjatin** en Ivanovo (Sovjet-Unio), kiu al la solvo aldonis ankaŭ zorge desegnitajn ilustrajojn. Jen lia solvo:

1. (Prologo)
Sinjor' MALGRAS' — ĉapelomanke,
Baron' di-KUL' — figuras flanke.

2. (Disvolvo)
Al la baron' kaŭzante baron,
La ventro tiras lin en maron ...

3. (Katastrofo)
... Kaj la ĉapel' per ŝpruĉfontano
Revenas al la mastra mano!

4. (Epilogo)
„Do jen la plej racia drono, —
Profundan dankon al barono!"

2. S-ro **inĝ. Charlet** en Hautmont (Francujo), kiu verkis sian solvon imitante nian faman poeton Baghy. Jen lia solvo:

1. La ĉapel' en maron falas
Kaj mi pro malĝojo palas:
Mi ne estas fiŝkaptisto,
Estas mi Esperantisto.

2. Provas kapti ĝin amiko,
Per bastono, sen efiko.
Mi ne helpas; ne helpisto,
Estas mi Esperantisto.

3. Falis li. Aeren venis
La ĉapel', kaj ĝin mi prenis.
Mi gratulas, bonfaristo!
Dankas vin Esperantisto.

4. Nun kontente mi foriras.
Ĉu pri tio iu miras?
Mi ne estas ja savisto,
Estas mi Esperantisto!

3. S-ro **A. v. d. Starre** en Ymuiden (Nederlando) verkis la jenan solvon:

1. En momento kun talento
Ventoblov' ekkaptis
La ĉapelon de flegmul',
Kiun „Job" mi baptis.

2. Bela vido, kun rapido
Helpemul' Simono
Faras sian eblon jam,
Helpe de bastono.

3. Malatento, akcidento,
La bonulo dronas;
La ĉapelon al flegmul'
Tamen li redonas.

4. Job foriras, eĉ ne diras
Unu dankan vorton.
Eble pensas: ĉiu hom'
Portu sian sorton.

4. S-ro **P. Princis** en Usma (Latvujo), el kies solvo ni citas la lastan strofon:

Gracipaŝ kontenta estas:
„Amas min Fortuno!
Dikvezik sub akvo restas?
Kisu lin Neptuno!"

5. S-ro **K. Wälterlin** en Zürich (Svislando). Li tiel finas sian solvon:

Bonakor plu ne revenas;
Lian tombon montras ondo.
Ŝtonakor nun forpromenas ...
Pagas per maldank' la mondo!

6. S-ro **A. Caubel** en Malo-les- Bains (Francujo) meritis premion per la mallongega solvo:

Naĝo, Plumf!
Kuraĝo. Triumf'!

Al la gajnintoj kaj ankaŭ al la ceteraj 12 solvintoj, kiuj ne ricevis premion, nia redakcio kore gratulas.

ATENTU!

80. Artikolo.

Ĉi tiu vorto havas tri signifojn:

1) ĝi estas la nomo de la vorteto *„la"*, uzata antaŭ la substantivoj kiel difina vorteto;

2) parto en la gazeto;

3) var-speco, speco de komercaĵo. En ĉi tiu signifo oni ofte uzas la vorton en la formo *„artiklo"*, por diferencigi ĝin de la signifoj 1) kaj 2). La formo „artiklo" ne estas oficialigita, sed am vaste uzata.

81. Artiko. Artiklo. Artikolo.

La diferenco inter ĉi tiuj simil-sonaj vortoj estas la jena:

Artiko estas la natura ĉarniro inter la moveblaj korpo-partoj, kz-e ĉe la kruroj, brakoj, fingroj.

Artiklo estas la speco de komercaĵo.

Artikolo estas la teksto en la gazeto, pritraktanta certan emon. Ankaŭ la nomo de la vorteto *„la"*.

82. Asekuri. Sekura.

Jen du vortoj parencaj en la eksteraĵo kaj en la signifo:

Asekuri = fari kontrakton pri pago de kompenso, se okazos 1 malutilo, perdo, akcidento k.t.p. Oni asekuras kontraŭ morto, kcidento, malsano, brulo, rabo, ŝtelo, malbona vetero, eĉ kontraŭ perdo de la voĉo (ĉe kantistoj) kaj similaj malbonaĵoj.

Sekura = estanta en sendanĝera situacio. Ekz.: *La forkurinto rovis sekuran rifuĝejon. La ekzisto de Esperanto estas jam ekura.* — **Sekureco** = sendanĝereco, certeco kontraŭ malutiloj.

83. Asimili. Simila.

Ĉi tiuj vortoj estas proksimaj en signifo kaj aspekto.

Simila = havanta tiajn aŭ proksimajn kvalitojn, kiajn ankaŭ a alia objekto aŭ persono havas.

Asimili = similigi al si, proprigi al sia korpo per digesto. Ekz-e nia organismo asimilas la manĝitan nutraĵon. La reganta nacio asimilas la venkitan malgrandan nacion.

84. Asocio. Societo. Grupo. Ligo. Unuiĝo. Federacio. Klubo. Kompanio. Socio.

Ĉi tiuj vortoj ofte estas uzataj en la Esperantista vivo, ĉar ni, Esperantistoj, estas pasiaj organizantoj. Estas do necese, bone koni la diferencojn inter tiuj vortoj.

Grupo = malgranda aro de personoj, kiujn kunligas la sama ideo kaj sama celo. En la Esperanto-movado per ĉi tiu vorto ni nomas niajn plej malgrandajn (lokajn, urbajn) organizaĵojn.

Societo estas la nomo de pli grava, daŭre ekzistanta grupo, havanta pli multe da anoj kaj posedanta regularon.

Asocio estas ankoraŭ pli grava kaj pli vasta ideo, ol la societo. Per ĉi tiu vorto ni nomas landajn aŭ tutmondajn organizaĵojn. *(Universala Esperanto-Asocio. Brita Esperantista Asocio.)*

Unuiĝo = organizaĵo, en kiu la anojn *unuigas* la sama celo. Ĉi tiu vorto estas ĝenerala esprimo por grupo, societo kaj asocio.

Ligo = organizaĵo, en kiu la anojn *kunligas* la sama ideo, celo aŭ intereso. Ĉi tiu vorto estas egalsignifa kun la vorto „unuiĝo", sed en nia movado ni signas per ĝi tutlandajn aŭ tutmondajn organizaĵojn. *(Norvega Esperantista Ligo. Kristana Esperantista Ligo Internacia.)*

Federacio estas la kunligo de memstaraj grupoj, societoj.

Klubo = societo por interparolado, amuzo, regula renkontiĝo.

Kompanio = unuiĝo de kelkaj personoj por direkti komercan entreprenon. *(Esperantista Eldona Kompanio. Firmo Hachette kaj Kompanio.)*

Socio = la tuto de la homoj kune vivantaj laŭ komunaj kutimoj kaj leĝoj. *(La homa socio. La kristana socio. La moderna socio.)*



LA SANKTA NOKTO.

Ni prezentas ĉi tie al nia legantaro la melodion kaj la Esperantan tradukon de la plej disvastigita kaj plej ŝatata kristnaska kanto de la mondo, la germana himno *„Stille Nacht, heilige Nacht"*. Jen la interesa historio de tiu ĉarma kanto:

Pastro Joseph Mohr en Oberndorf (Germanujo) estis en la jaro 1818 inspirita fari kristnask-poemon, kaj lia amiko, Franz Gruber, instruisto en la proksima Arnsdorf, faris melodion por ĝi. Kelkajn horojn post la pretiĝo ĝi estis la unuan fojon kantata en la preĝejo de Arnsdorf, kaj la simpla sed bela himno ravis la tutan ĉeestantaron. — La kanto baldaŭ disvastiĝis tra la tuta mondo. La du aŭtoroj, antaŭe simplaj, nekonataj homoj, fariĝis rapide mondfamaj.

La supra bildo, desegnaĵo de M. Petzoldt, montras la preĝejon de Arnsdorf. Maldekstre de la preĝejo estas videbla la lerneja domo, en kiu laboris Gruber.

La redakcio.

Ne tro rapide. Franz Gruber, 24 Dec. 1818.



(La bildo kaj la muziknotoj estas represitaj el la ŝatata libreto: „ESPERANTA KANTOKOLEKTO", aĉetebla ĉe La Praktiko. Prezo 0.25 guld.)

AL LA VENKO !

PETO. **Kara leganto! Bonvolu ĉi tiujn gravajn informojn traduki en vian nacian lingvon kaj transdoni ilin al la redakcioj de la ĵurnaloj en via urbo, por publikigo. Per tio vi faras por Esperanto tre valoran propagandan servon.**

324. **Esperanto ĉe la blinduloj.** — Dum la tagoj 4—6 de Oktobro okazis en Varŝavo la dua ĝenerala kunveno de la instruistaro de la polaj specialaj lernejoj por difektaj (surdaj, mutaj, blindaj k.t.p.) infanoj. La kunvenintaj pli ol 400 geinstruistoj akceptis la jenan rezolucion: „La dua ĝenerala kunveno, konsiderante la gravan etikan, didaktikan kaj praktikan valoron de la internacia lingvo Esperanto, kaj ĝian rapidan disvastiĝon inter la blinduloj en la tuta mondo, rekomendas enkonduki ĝin en la instru-programon de ĉiuj lernejoj porblindulaj." En Polujo ĝis nun oni instruis Esperanton en la porblindulaj lernejoj de Warszawa, Wilno kaj Lwów. Estas antaŭvideble, ke pro la citita rezolucio la instruado de Esperanto plivastiĝos.

325. **La Hungara Skolta Asocio por Esperanto.** — La Hungara Skolta Asocio en sia lasta oficiala cirkulero (1-Novembro 1934) alvokis ĉiujn hungarajn skoltajn trupojn anonci la nomojn de tiuj skoltoj, kiuj deziras lerni Esperanton.

326. **Esperanto-ŝildoj en la nederlandaj stacidomoj.** — La Direkcio de la Nederlanda Fervojaro donis la permeson, ke en ĉiuj stacidomoj oni pendigu emajlan tabulon kun granda verda stelo, la vorto „Esperanto" kaj la adreso de la loka reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio. — *(Ĉi tiu grava sukceso estas ŝuldata al nia senlaca propagandisto s-ro Hans Bakker, kiu organizas la liveradon kaj elpendigon de la ŝildoj. Interesiĝantoj turnu sin rekte al li. Lia adreso: Rokin 57, Amsterdam-C.)*

327. **Esperanto helpas la sciencon.** — La sveda ĵurnalo *„Arbetet"* (Trälleborg) la 15-an de Novembro publikigis interesan intervjuon, faritan kun la sveda scienculo *Prof. Sigurd Erixon* el Stokholmo, kiu donis prelegojn ĉe la universitato de Lund pri la etnologio de la baltaj landoj. Prof. Erixon klarigis la celojn kaj laborojn de la *„Balta Instituto"*, fondita antaŭ kvar jaroj en Stokholmo, kaj akcentis, ke la lingvo Esperanto faris al la instituto tre utilajn servojn, ĉar ĝi rompis la lingvajn barojn kaj ebligis interrilati kun la diverslingvaj baltaj landoj kaj kolekti valoran sciencan materialon.

328. **Esperanta parolado al la herooj de la stratosfero.** — La 21-an de Aŭgusto en la urbo Ljubljana (Jugoslavio) okazis solena vespermanĝo je la honoro de la belgaj scienculoj *prof. Cosyns* kaj *s-ro van der Elst*, kiuj post sia sukcesa stratosfera flugo alteriĝis en Jugoslavio. Dum la festeno pluraj eminentuloj faris paroladojn por la honoro de la belgaj gastoj. Interalie *s-ro Sirk*, profesoro ĉe la universitato de Ljubljana, en Esperanto-lingva parolado salutis la heroojn de la scienco kaj deklaris, ke ĉi tiu okazo denove pruvis la nepran necesecon de internacia lingvo.

329. **Esperanto instruata en angla lernejo.** — La ŝtata knabina lernejo en *Thorpe Bay* (Anglujo) enkondukis la instruadon de la lingvo Esperanto. La instruadon faras f-ino M. A. Crispin, instruistino ĉe la nomita lernejo.

330. **Internacia Esperanto-kurso por fervojistoj.** — Dum la tagoj 2—12 Majo 1935 okazos en Arnhem (Nederlando) speciala internacia kurso de la internacia lingvo Esperanto por fervojistoj, tramistoj kaj oficistoj de aliaj trafikiloj. La kurson organizas la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en Hago, en kunlaboro kun la Direkcio de la Nederlanda Fervojaro kaj fakligoj en Nederlando. En la kurso povos partopreni ĉiuj geoficistoj de fervojoj, tramoj kaj aliaj trafikiloj, kune kun siaj familianoj. La Direkcio de la Nederlanda Fervojaro decidis doni kvar ekstrajn libertagojn al 25 konduktoroj, por plifaciligi ilian partoprenon en la kurso. — Pri la kurso informojn donas kaj aliĝojn akceptas: Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando. — *(Detalajn informojn pri la kurso oni trovas en la antaŭa numero de La Praktiko, sur la 7-a paĝo.)*

331. **Nova Esperanto-monumento.** — En la urba parko de Novy-Bohumin (Neu-Oderberg) en Ĉeĥoslovakio la 4-an de Novembro oni inaŭguris imponan memorŝtonon kun la surskribo: „Per Esperanto al la interfratigo de la popoloj". — *(Vidu la bildon de la memorŝtono sur la bildopaĝoj de ĉi tiu numero!)*

332. **Esperanto-lingva artikolo en la oficiala poŝtista organo de Jugoslavio.** — La gazeto *„Jugoslovenska Pošta, Telegraf i Telefon"*, oficiala organo de la jugoslava PTT-oficistaro, en sia numero de la 1-Novembro publikigis Esperanto-lingvan artikolon dediĉitan al la memoro de la mortigita reĝo Aleksandro.

333. **Libro pri Zamenhof en la nederlanda lingvo.** — La eldonejo W. P. van Stockum & Zoon en Hago ĵus eldonis valoran libron sub la titolo *„Tragiek en Triomf van Zamenhof"*. Ĝi estas traduko de la konata verko „Vivo de Zamenhof", verkita originale en Esperanto de D-ro Edmond Privat. La tradukon en la nederlandan lingvon majstre plenumis s-ino L. Belinfante-Ahn, membro de la Esperantista societo „Fine Ĝi Venkos" en Hago.

334. **La jugoslava registaro donis permeson por Esperanto-kursoj en mezlernejoj.** — La jugoslava ministerio de publika instruado la 9-an de Oktobro per speciala dekreto sub n-ro 35923 donis la permeson al la ĉeĥoslovaka Esperanto-instruisto Dolfa Bartoŝik, aktiva membro de la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, gvidi Esperanto-kursojn en ĉiuj mezlernejoj kaj pedagogiaj institutoj en la Danuba regiono de Jugoslavio.

335. **Internacia konkurso: „Kristo kaj la universala frateco".** — La junulara komisiono de la Tutmonda Ligo por Internacia Amikeco per la Eklezioj ĵus publikigis la rezulton de sia konata internacia konkurso. Oni ensendis entute 294 laboraĵojn verkitajn en 20 diversaj lingvoj. 10 verkoj estis skribitaj en Esperanto kaj el tiuj 8 ricevis premiojn.

336. **Esperanto disvastiĝas en Nederlanda Hindujo.** — La popol-universitato de la urbo Malang (insulo Java) enmetis en sian programon kurson de la lingvo Esperanto. Partoprenas 50 personoj sub la gvidado de s-ro L. Schoutens, instruisto. La gazetoj „De Malanger", „Sinar Malang", „De Koerier", „De Revue" kaj „D'Oriënt" publikigis artikolojn kaj bildojn pri Esperanto kaj la Esperanto-movado.

337. **Brazilaj filatelistoj por Esperanto.** — La Unua Brazila Filatelia Kongreso, ĵus okazinta en Rio de Janeiro, laŭ propono de s-ro Benjamin Camozato, direktoro de la filatelia revuo „Rio Grande Filatélico", akceptis deziresprimon, ke la filateliaj societoj rekomendu al siaj anoj la lernadon de la lingvo Esperanto.

338. **La „Sved-Internacia Gazetservo" uzas Esperanton.** — La grava informa oficejo *„Sved-Internacia Gazetservo"* (Svensk-Internationella Pressbyrån) en Stokholmo, direktata de D-ro B. Brilioth, la 5-an de Novembro decidis ekuzi Esperanton. La oficejo jam de ok jaroj ĉiusemajne dissendas al la tutmonda gazetaro informojn pri la sveda vivo kaj kulturo, por pliigi la konon de la mondo pri la sveda lando kaj popolo.

Ĝis nun ĝi dissendadis la informojn ĉefe en la angla lingvo, sed de la komenco de Novembro ĝi dissendas ĉiusemajne ankaŭ Esperanto-lingvan eldonon de sia informilo. — *(Ni varme rekomendas al niaj legantoj, ke ili petu la senpagan alsendadon de la informilo kaj traduku la interesajn informojn por siaj lokaj nacilingvaj gazetoj. La redakcioj tre volonte akceptas tiajn informojn, kaj nia movado ricevos gravan helpon. Adreso: Sved-Internacia Gazetservo, Regeringsgatan 16, Stockholm, Svedujo.)*

339. **Esperanto en la Bontemplana movado.** — La gazeto „The International Good Templar", anglalingva organo de la kontraŭalkohola Bontemplana movado, entenas regulan kolonon en la lingvo Esperanto. En Svedujo pli ol mil Bontemplanoj parolas Esperante. *(La adreso de la nomita gazeto: T. Honeyman, 61 Peel St., Partick, Glasgow, Skotlando.)*

340. **Medicinaj fakaj gazetoj kun Esperanto-lingvaj resumoj.** — La sekvantaj tri medicinaj fak-gazetoj: *„La Medicina Catalana"* (3 r. de Sant-Pere en Barcelona), *„Bulletin de la Société Belge d'Orthopédie"* (19 avenue Montjoie en Uccle, Belgujo) kaj *„Journal de Médecine de Lyon"* (52 rue Victor Hugo en Lyon), publikigas lastatempe Esperanto-lingvajn resumojn de siaj pli gravaj artikoloj.

Ĉu skribmaŝinon?

Tiam iru al:

„AMERICAN TYPEWRITER TRADE"

en Hago, Rijswijkscheplein 34.

Telefono: 114231.

Ĉiaj fabrikaĵoj (kun garantio) en ĉiu prezo.

Novaj vojaĝ-maŝinoj jam de 62,50 guldenoj!

La Esperanta Kalendaro

por 1935

55-folia semajn-kalendaro (grandeco 13 × 20 cm.). Ĉe ĉiu tago libera spaco por notoj kaj interesa devizo de diverslandaj samideanoj, kun iliaj nomoj.

Prezo kun sendkosto: —.60 ned. guld.

Aĉetebla ĉe LA PRAKTIKO.

LA HOLANDA MUELILO

Serio de ses belaj desegnitaj poŝtkartoj kun Esperanto-lingvaj tekstoj pri la holandaj vento-mueliloj, kiuj servas por mueli grenon, pumpi akvon kaj segi lignon, kaj kiuj donas specialan ĉarmon al la nederlanda pejzaĝo. — Jen la malgrandigita bildo de unu el la kartoj.

La 6 kartoj en koverto kostas 0.25 guld.

FAVORA PREZO por la abonantoj de La Praktiko: 0.15 guld.

Aĉetebla ĉe LA PRAKTIKO.

LA MONDO RIDAS

En la lernejo.

— Petko, aŭdu! Se vi havas dek monerojn kaj vi perdis el ili tri, kio restas en via poŝo?

— La truo!

Bona edzino.

— Mi gratulas al vi, amiko, pro via edzino. De kiam vi edziĝis, vi estas tute en ordo. Eĉ unu butono ne mankas sur via vesto, kvankam antaŭe ĉiam estis malordo en ili.

— Vere, multon mi povas danki al mia edzino. Post nia edziĝo ŝia unua ago estis instrui al mi la alkudradon de butonoj.

(London Opinion)

La nova modo.

— Hahaha! Ĉu ĝi estas via nova ĉapelo? Ne koleru, mi petas, sed mi ne povas ĉesi en la rido...

— Mi scias, kiam vi ĉesos... Kiam vi ekvidos la fakturon!

(Life)

En kuracista ekzameno.

Profesoro: Ni supozu, ke malsanulo venas al vi, sed vi ne povas konstati, kiun malsanon li havas. Kion vi faros tiam?

Kandidato: Mi postulos de li tridek ŝilingojn kaj sendos lin al vi, sinjoro profesoro.

(Saturday Evening Post)

La esenco.

Edzo: Sed karulino, kial vi mendas senĉese novajn robojn? Ĉu vi ne scias, ke ni naĝas en la ŝuldoj?

Edzino: Jes, mi scias, sed mia kudristino ne scias!

(The Humorist)

Kontentiga klarigo.

— Paĉjo, kial estas tiuj multaj dratoj apud la fervojo?

— Ili estas, mia fileto, la kondukiloj de la telefono kaj telegrafo.

— Kaj kial ne estas kondukiloj ankaŭ sur la alia flanko de la fervojo?

— Ĉar tie iras la senfadena telefono kaj telegrafo.

(Svenska Dagbladet)

Konata regiono.

Ŝipkapitano: Ah, vi vojaĝis sur la Flava Maro? Tiun regionon mi jam ofte travojaĝis, mi bone konas ĉiun ondon...

(Kasper)

Ofendo.

— Kelnero, kian aĉegan bovaĵon vi portis al mi? Ĝi estas vera ofendo kontraŭ la bovaro de nia lando! Terure! Skandalo!

— Pardonu, sinjoro, mi ne volis vin ofendi...

(Tit Bits)

Bona helpo.

— Diru, Joĉjo, ĉu via instruisto ne rimarkis, ke mi faris vian hejmlaboron?

— Jes, paĉjo, verŝajne! Li diris, ke mi ne kapablus sola fari tiom da eraroj.

(Hjemmet)

Plurobla perdo.

— Nia kompatinda amiko, la filologo, pro akcidento perdis la parolpovon.

— Terure! Kaj li parolis en ses lingvoj!

(Herold)

Prava ofendiĝo.

— Kiom da jaroj vi havas, sinjorino?

— Oni neniam kutimas demandi la aĝon de virino!

— Ho, ĉu vi estas jam tiel maljuna?

(Fliegende Blätter)

Monon aŭ vivon!

— Mi skribis al mia patro, ke li sendu al mi monon aŭ revolveron.

— Kaj se li sendos revolveron?

— Tiam mi tuj vendos ĝin.

(Ric et Rac)

Por la korespondado

uzu:

ESPERANTO-LETERPAPERO. — 10 leterpaperoj (liniitaj aŭ neliniitaj), 4-paĝaj, formato 14×21 cm., kaj 10 kovertoj, ornamitaj per la bildo de la terglobo kaj la Esperanto-flago kaj la vortoj: „Esperanto, internacia helplingvo". — *Prezo —.25 guld.*

PROPAGANDA GLUMARKO. — Verda stelo kun la vorto „Esperanto" (laŭ ĉi tiu bildo, montranta la veran grandecon). — *Unu koverto kun 100 markoj kostas —.20 guld.*

Aĉeteblaj ĉe LA PRAKTIKO.

Ĉiu Esperantisto devas legi la gazeton:

UŜE-EĤO dumonata organo de la movado por „Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo" (U. Ŝ. E.)

Enhavas multajn interesajn artikolojn kaj karakterizajn bildojn pri la malsana Eŭropo kaj montras la vojon al la saniĝo, en la spirito plej konforma al la ideo de Esperanto.

Abonprezo por 1 jaro: -.75 guld.

Abonebla ĉe LA PRAKTIKO.

Legu la libreton:

La Eŭropanismo

Kompleta kaj detala klarigo en formo de demandaro pri la propono krei la „Unuiĝintajn Ŝtatojn de Eŭropo". Multaj ilustraĵoj. 32 paĝoj.

Prezo: -.20 guld. — Aĉetebla ĉe LA PRAKTIKO.

RADIO

KONSTANTA PROGRAMO.

(Mezeŭropa tempo.)

Dimanĉe:

10,30—11,00 *Lille PTT Nord,* 247,3 m. — Kurso. Informoj.
10,10—10,30 *Marseille,* 400,5 m. — Informoj, literaturo (en ĉiu dua semajno).
10,00—10,30 *Stockholm,* 426,1 m., kaj aliaj svedaj stacioj. Unufoje en la monato. — Paroladoj. Informoj.

Marde:

19,15—19,30 *Brno,* 325 m., kaj relajsoj. — Kurso.
19,20—19,40 *Huizen,* 1875 m. — Kurso.
20,00—20,10 *Tallinn,* 410,4 m. — Informoj.
22,45—23,00 *Warszawa,* 1339 m., kaj Krakovo. — Paroladoj.

Merkrede:

18,30—18,40 *Sottens,* 443,1 m. — Kurso.
21,00—21,15 *Marseille,* 400,5 m. En ĉiu dua semajno. — Parolado.
22,50—23,00 *Wien,* 507 m., kaj relajsoj. — Paroladoj pri aktualaj temoj.

Ĵaŭde:

18,30—19,00 *Paris PTT,* 431,7 m. — Kurso, parolado, informoj.
21,40—22,00 *Kaunas,* 1935 m. — Parolado.
22,45—23,00 *Warszawa,* 1339 m., kaj relajso. — Parolado.

Vendrede:

19,15—19,30 *Brno,* 325 m., kaj relajsoj. — Kurso.
21,10—21,20 *Nice-Juan-les-Pins,* 240,2 m. — Kurso.

Sabate:

17,10—17,20 *Paris Tour Eiffel,* 1389 m. — Parolado pri turismo; informoj.
18,10—18,25 *Huizen,* 1875 m. En ĉiu dua semajno. — Parolado, informoj.
20,40—20,55 *Barcelona E.A.J.,* 293,5 m. En ĉiu dua semajno. — Informoj de Kataluna Esp. Fed.
21,10—21,20 *Lyon-la-Doua,* 463 m. — Informoj.

S-ro *J. de Saldanha Carreira,* portugala ĉefdelegito de UEA, komencos disaŭdigon tra: **Portugala Radio-Klubo,** CT 1 GO (Parede, Linha de Cascais, Portugalujo). Meztempo Greenwich 0,30, sabate la 15-Dec. kaj poste en ĉiu dua kaj kvara sabato de la monato. Ondlongo 48,2 (6.198 kc.). Li petas informojn pri la aŭdado kaj invitas interesiĝi pri la disaŭdigado. Okazos paroladoj pri Portugalujo kaj informoj.

Interesaj Esperanto-lingvaj disaŭdigoj el WIEN (Aŭstrio) dum la monato Decembro:

19 Dec. Parolado de L. Siedl: Kristnaskaj kutimoj en Vieno.
26 Dec. Parolado de D-ro E. Pfeffer: Kulturaj kaj sportaj rilatoj inter Aŭstrio kaj Bulgarujo.

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Morto. — En Berlin-Wilmersdorf la 18-an de Oktobro mortis *D-ro Bruno Cohnberg,* justeca konsilisto, multestimata sindona adepto de nia movado.

— En Rouen (Francujo) la 16-an de Okt. mortis *f-inĵo Marion,* vicprezidantino de la loka Esp-ista grupo.

— S-ro *James Leakey* mortis en Hatfield (Anglujo) la 1-an de Nov., en la aĝo de 84 jaroj. Li estis fervora propagandisto de Esperanto kaj agadis en multaj bonfaraj movadoj. Li verkis la lernolibreton „Leakey's Introduction to Esperanto".

Esperant-lingva diservo en Rusujo. — La 23-an de Oktobro, okaze de la unua datreveno de la morto de pastro I. G. Ŝirjaev, iniciatinto de la „Esperanta Enciklopedio", nia samideano pastro K. M. Kolobaŝkin faris en la paroĥa preĝejo de Lomigori funebran diservon. La funebra liturgio de Sankta Johano la Orbuŝa kaj ĉiuj kantoj okazis en la lingvo Esperanto.

„European Herald", la multlingva semajna gazeto, la 2-an de Novembro festis sian unuan datrevenon, per festeno en la Hotelo Waldorf en Londono. Prezidis la hispana ambasadoro, Don Ramón Pérez de Ayala, fama literaturisto. La plej interesa tosto estis „La lingvoj", proponita de s-ro Vernon Bartlett, radio-parolisto kaj ĵurnalisto pri internaciaj aferoj. Respondis pluraj personoj en diversaj lingvoj, inter kiuj s-ro Fred Wadham, brita ĉefdelegito de UEA, en Esperanto. Ĉeestis multaj eminentuloj el la rondoj diplomataj, lingvistaj kaj literaturaj.

Flandra Esperanto-kongreso. — La 6-a Flandra Esperanto-Kongreso okazos la 8-10 de Junio 1935 en Bruselo. La kongreskotizo estas 12 belgaj frankoj. La adreso de la kongresa oficejo: 3 P. van Humbeekstraat, Brussel-West.

Jugoslava Esperanto-kongreso. — La 8-a Jugoslava Esperanto-Kongreso okazos en la urbo *Osijek* dum la tagoj 9-10 de Junio 1935. Jam fervore eklaboris la Loka Kongresa Komitato, en kiu partoprenas gravaj aktivuloj de la urbo kaj regiono. Tuj post la kongreso okazos Seminario por Ĉe-metodaj instruistoj, por eduki multajn kursgvidantojn. — La kongreskotizo estas 25 dinaroj, la adreso de la organiza komitato: VIII-a Jugosl. Kongreso de Esperanto, Osijek I., Trgov. dom.

„Kristo kaj la universala frateco". — La konkurso sub la supra titolo, pri kiu ni kelkfoje skribis en La Praktiko, finiĝis kun bona sukceso. La rezulto estas por ni, Esperantistoj, ne nur interesa, sed ankaŭ tre ĝojiga. La organizantoj de la konkurso ricevis entute 294 verkojn en 20 lingvoj. Inter ili estis 10 skribitaj en Esperanto, kaj el tiuj 8 ricevis premion. Jen la nomoj de la premiitoj: R. Ancelet en Hautmont (Francujo), A. Anglada en Barcelona (Hispanujo), E. Henin en Hautmont (Francujo), G. H. Wallin en Vargarda (Svedujo), B. A. Bellib en Bern (Svisujo), J. Gassner en Salzburg (Aŭstrio), A. Hul en Arnhem (Nederlando) kaj K. Loder en Bern (Svisujo), ĉiuj en la aĝo de 14-19 jaroj. Ni kore gratulas al ili. — La konkurso alportis ankaŭ al nia movado ĝojigan rezulton: la organizinta ligo komencis uzi Esperanton. Sur la diplomoj, kiujn la premiitoj (ankaŭ la ne-esp-istaj) ricevis, ni vidas la Esp-an tekston en la unua loko, inter la diverslingvaj tekstoj.

Internacia Ligo de Esperanto-ĵurnalistoj" elektis definitivan estraron. Prezidanto: s-ro W. S. Sonnenberg-Federowsky, ĝen. sekr.: s-ro F. J. Krüger en Ter-Apel (Nederlando), adm. kaj kasisto: s-ro R. Melo en Drancy (Francujo).

Internacia Polica Ligo. — La faka movado de la Esperantistaj policanoj estas en rapida kreskado. Post la reapero de la *„Internacia Polica Bulteno"* la policanoj grupiĝas kaj laboras sur la praktika kampo. La oficialaj rondoj rimarkeble favoriĝas, kaj jam estas atingitaj kelkaj praktikaj sukcesoj en diversaj landoj. Samideanoj, kiuj deziras ricevi informojn aŭ emas kunlabori, turnu sin al: Int. Polica Ligo, 10 rue Engelhardt, Strasbourg-Meinau (Francujo).

Nova viktimo de la „Populara Esperanto-Biblioteko" en Amsterdam estas nia eminenta samideano s-ro *W. Bailey* en Anglujo, membro de la Esp-ista Akademio, kiu ne ricevis la kontraktitan honorarion, nek respondon je siaj pluraj leteroj.

Esperanto-hotelo. — En la dana urbo Aarhus malfermiĝis hotelo sub la nomo *„La Espero",* sub la gvidado de ges-roj Jörgensen. La adreso de la hotelo: Ryesgade 23.

Nova gazeto. — En la malproksima oriento naskiĝis nova Esperanta gazeto sub la titolo *Aganto.* Ĝi estas literatura monata gazeto, kostas por unu jaro 2 sv. frankojn kaj la adreso de ĝia redakcio estas: 2 Kudan, 3-ĉome, Kojimaĉi-ku, Tokio, Japanujo. La unua numero, kiu konsistas el 8 paĝoj en verda kovrilo, enhavas kelkajn novelojn.

Aprila ŝerco en Novembro. — En la mezo de Novembro en la nederlandaj gazetoj *„Maasbode"* kaj *„Limburger Koerier"* aperis artikolo pri la mondlingva afero. El tiu majstraĵo de la publika informado ni citas la jenan frazon: *„En la ĉefstabejo de la internacia Esperanto-movado en Parizo kun ĉagreno oni vidas la grandan progreson, kiun en la lasta tempo faras Volapük, Ido, Novial, Perfecto kaj aliaj sistemaj lingvoj."* Estas sendube, ke tiu artikolo estas ensendita al la kredemaj redakcioj de iu ŝercemulo, kiu tamen elektis malĝustan daton, ĉar laŭ la ĝisnuna kutimo nur la 1-an de Aprilo oni publikigas tiajn mistifikojn. Ni ja bone scias, ke Volapük, Ido kaj Novial estas jam mortintaj lingvo-projektoj. La lingvo Perfecto ankoraŭ eĉ ne naskiĝis. — Nia fervora samideano, s-ro V. Latte Vanweddingen, redaktoro de la gazeto „De Morgen" en Helmond,

publikigis en sia gazeto bohegan respondan artikolon.

Danujo. — Je invito de Dana Esperanto-Instituto s-ro Otto Haar, Ĉe-instruisto el Flensburg (Germanujo), alvenis por gvidi kursojn. En Danujo laboras nuntempe ses eksterlandaj Ĉe-instruistoj.

Ĉeĥoslovakio. — S-ro Haupt gvidas kurson en *Zwittau* por 25 personoj.

Francujo. — F-ino Lidja Zamenhof finis la kurson en *Orléans*, kie la nombro de la kursanoj kreskis de 40 al 60, kaj komencis novan kurson en la urbo *Thiers* (Puy de Dôme). — En *Rueil-Malmaison* komenciĝis kurso sub la gvido de s-ro René Delattre.

Hispanujo. — F-ino Elinjo Pähn el Estonio gvidas kursojn en *Barcelona* kaj *Manresa*.

Jugoslavio. — En *Novi-Sad* la kursoj de nia eminenta ĉeĥoslovaka propagandisto, s-ro Dolfa Bartošik, aktiva membro de la Cseh-Instituto, bonege progresas. Multaj intelektuloj ekinteresiĝis pri Esperanto kaj la nombro de la kursanoj kreskas. D-ro V. R. Mladenovič, direktoro de la loka Knabina Pedagogia Instituto, esprimis al s-ro Bartošik varman rekonon.

Nederlando. — La 5-an de Nov. en *Heerlen* komenciĝis kurso por 15 knaboj, membroj de la societo „De Jonge Wacht". La iniciatinto de la kurso estas pastro Salesius, la kursgvidanto s-ro A. P. A. Pennartz. — S-ro M. de Waard gvidas kvar kursojn en *Rotterdam*, por senlaboruloj. La kursoj estas organizitaj de la Kleriga Komitato de Senlaboruloj. — En *Almelo* f-ine R. C. Wanaar gvidas kurson por 17 personoj. — En *Amerongen* f-ino J. A. Boks gvidas kurson, organizitan de la Societo por Ĝenerala Utilo. — En *Arnhem* s-ro H. J. F. Wansink gvidas komencan kaj progresan kursojn por poŝtistoj. — En *Hilversum* f-ino Juliette Baudin el Svislando gvidas kurson, organizitan de la loka sekcio de L.E.E.N. — La iamaj sekcioj de L.E.E.N. en la urboj Alkmaar, Amersfoort, Arnhem, Bussum, Dordrecht, Hago, Heemstede kaj Rotterdam („Merkurio"), kiuj dum la lastaj semajnoj eliris el L.E.E.N., fondis landan federacion sub la momo *„Nederlanda Esperanta Gruparo"*. La prezidanto de la N.E.G. estas s-ro P. J. Vermaas, honora membro de UEA en Rotterdam, la sekretario s-ro W. Schmidt en Rotterdam (1e Middellandstraat 75). — En *Arnhem* s-ro L. Moreau fervore preparas la kurson de f-ino M. Saxl el Berlino, okazontan en la nova jaro. Formiĝis rekomenda komitato konsistanta el la ĉefaj gravuloj de la urbo. En la Esperanto-Domo estas aranĝata granda ekspozicio pri Esperanto. — En *Dordrecht* komenciĝos kurso en Januaro, gvidota de Andreo Ĉe.

Norvegujo. — S-ro Henry Schjerve, Ĉe-metoda instruisto, gvidas kurson en *Trondheim* por 20 personoj. — En *Oslo* la estinta urbestro de Stokholmo, s-ro Carl Lindhagen, faris publikan paroladon pri „La lingvo-demando en la mond-problemo". Komencan kurson gvidas s-ro Jens Schjerve por 14 personoj. — En *Bergen* post du sukcesplenaj kursoj gviditaj de homeopato s-ro Olav Farstad oni fondis klubon kun 51 membroj. — S-ro Arne Arnessen, la konata meritplena gvidanto de la norvega Esperanto-movado, la 11-an de Nov. festis sian 50-jaran naskiĝtagon.

Portugalujo. — La 21-an de Okt. la Esperanto-Rondo de *Porto* inaŭguris Esp-an propagand-afiŝon ĉe la velodromo „Lima", kie kutimas okazi la internaciaj ludoj. Ĉe la soleno paroladojn faris f-ino L. Mesquita, D-ro Jorge S. C. Santos kaj s-ro A. Laros a Rocha, reprezentanto de la sportista klubo.

Svedujo. — S-ino Erika Seppik komencis kursojn en *Agnesberg* kaj *Surte*. — En *Eskilstuna* kurson gvidas s-ro Tibor Czitrom el Hungarujo. — En *Tierp* komenciĝis kurso gvidata de s-ro Gösta Eriksson. — S-ro H. Ekblad en *Kvicksund* fondis kluban gazeton sub la titolo „La Instigilo". Ĝi estas lerte redaktata hektografata gazeto por la kluboj en la provincoj Södermanland, Närke kaj Västmanland. Jarabono 3 sv. kronoj (10 resp.-kuponoj). Adreso: s-ro H. Ekblad, Villa Skogbacka, Kvicksund.

LA ESPERANTISTA AKADEMIO.

Ĵus aperis la 6-a numero de la **„Oficialaj Sciigoj de la Akademio"**. Ĝi informas pri tio, ke la Akademio decidis komenci specialajn studojn pri kelkaj punktoj de nia lingvo kaj alvokas la tutmondan Esperantistaron al kunlaboro.

La farotaj laboroj estas la jenaj:

a) Vortaro:

Kritika esploro de la Komuna Vortaro. **Inventaro** de nia vort-trezoro.
Listo de ne-oficialaj vortoj, jam uzataj kaj troveblaj en vortaroj.
Listo de internaciaj vortoj, troveblaj en vortaroj.
Vortoj kun malsama ortografio aŭ formo, kaj sama senco.
Pseŭdo-sufiksoj; la sufikso „end".
Propraj nomoj (ne la landnomoj).

b) Gramatiko:

Gramatika karaktero de la vort-radikoj.
Gramatika konkordanco de la Zamenhofa verkaro.
La 16 Zamenhofaj reguloj, laŭ la lingvaj respondoj kaj uzado de Zamenhof.
Korekta uzado de **„po"** kaj **„de"**, kaj de la participoj **„ita"** kaj **„ata"**.

c) Diversaj:

Preferindaj aŭ nerekomendindaj formoj.
Naciaj proverboj, komparoj kaj metaforoj, enkondukotaj en Esperanton.
Sistema esplorado de la verkoj de D-ro Zamenhof, koncerne dubajn aŭ neklarajn lingvajn demandojn.
Interpunkcio.
Oftaj mallongigoj.

La Akademio petas ĉiun Esperantiston, kiu estas kompetenta pri iuj el la supre menciitaj temoj, por baldaŭ sciigi la prezidanton *(s-ro M. Rollet de l'Isle, 35 rue du Sommerard, Paris-5, Francujo)* kaj proponi kunlaboron.

La portebla

TORPEDO

skribmaŝino

estas juvelo inter la skribmaŝinoj.

Liverata ankaŭ kun Esperanto-klavaro.

Petu sendeviĝan demonstracion!

Importisto por Nederlando:

OSCAR MARKX, Nic. Maesstraat 97, Amsterdam-Z.

Telefono: 22059.

Ĉiu vera Esperantisto posedas la libron:

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

Dua eldono, revizita kaj kompletigita.
512 paĝoj. Formato 143 × 195 mm.
Lukse bindita en verda tolo, kun ora surpreso.

Ĉi tiu altvalora verko estas Esperanto-Esperanta vortaro, t.e.: ĝi donas la klarigojn de ĉiu vorto en la lingvo Esperanto mem, sen alilingva traduko. Ĉe la vortoj oni trovas ankaŭ gramatikajn klarigojn kaj multajn ekzemplojn pri la ĝusta uzado de la vorto.

Prezo kun sendkostoj: en Nederlando 6.20 guld.
en aliaj landoj 6.50 guld.

Aĉetebla ĉe LA PRAKTIKO.

NOVAJ LIBROJ

LA ESPERANTA KALENDARO 1935. 55 folioj, formato 13 × 20 cm., prezo 1 ŝil. aŭ 5 respondkuponoj. Eld. Brita Esperantista Asocio en Londono. — Ĵus aperis tre interesa Esperanta kalendaro, en kiu ĉe ĉiu tago estas aldonita frazo aŭ devizo, elektita de samideanoj. Sur ĉiu folio estas unu semajno, kun libera spaco ĉe ĉiu tago, por notoj. Tre taŭga donac-objekto por kristnasko kaj novjaro. — Aĉetebla ankaŭ ĉe La Praktiko, prezo kun sendkosto —.60 guld.

Dr. Edmond Privat: TRAGIEK EN TRIOMF VAN ZAMENHOF (La tragedio kaj triumfo de Zamenhof). El la Esperanto-lingva originalo tradukis s-ino L. Belinfante-Ahn. 150 paĝoj. Formato 14 × 20 cm. Prezo: broŝ. 1.25, bind. 1.75 ned. guld. Sendkosto —.10 guld. Eldonejo W. P. van Stockum & Zoon N.V. en Hago. — Por la 75-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. Zamenhof la plej trafa honorigo al nia Majstro estas la aperigo de ĉi tiu libro, la nederland-lingva traduko de la fama verko de D-ro Privat: „Vivo de Zamenhof". La belaspekta libro entenas unuarangan tradukaĵon kaj ampleksan enkondukon verkitan de la tradukintino. La ĉefa celo de ĉi tiu altvalora libro estas, ke ankaŭ la ne-esp-ista publiko de Nederlando, kiu ofte havas eraran opinion pri Zamenhof, ekkonu lin kaj ĝuste komprenu liajn ideojn, precipe la „homaranismon". Sendube multaj nederlandaj Esp-istoj havigos al si ĉi tiun libron kaj transdonados ĝin al siaj geamikoj por tralego.

KATALOGO DE LITERATURA MONDO. — Nia plej granda eldonejo, Literatura Mondo en Budapeŝto, ĵus eldonis belegan libro-prezaron. Ĝi estas 48-paĝa, riĉe ilustrita, plur-kolore presita broŝuro en formato de 12 × 15 cm. La luksa katalogo entenas la priskribon de ĉiu eldonaĵo de Literatura Mondo kun la bildo de ĉiu libro, krom tio detalan prospekton pri AELA (Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj) por 1935. La katalogo estas senpage sendata al ĉiu petanto. — Oni povas ricevi la katalogon senpage ankaŭ ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

M. Guterman: ENCYKLOPEDYCZNY SŁOWNIK ESPERANCKO-POLSKI. Unua kajero. Eldonas: „Esperanto dla Wszystkich" en Varŝavo. — Ĵus aperis la unua kajero (16 paĝoj) de la nova granda Esperanto-Pola vortaro. La adreso de la eldonejo: ul. Nowolipki 36 en Varŝavo (Polujo).

PETRO. Kursa lernolibro por laboristoj. 6-a eldono. 116 paĝoj. Formato 12 × 17 cm. Prezo 6 fr.fr. Eldonis: SAT, 67 avenue Gambetta, Paris-20. — Aperis la sesa eldono (kun nove kompostita teksto) de ĉi tiu plej populara Esperanto-lernolibro por laboristoj. Ĝi estas tre lerte kaj praktike ellaborita, interesa lernilo. — Aĉetebla ĉe La Praktiko, prezo —.70 guld.

Unu el la tri Esperanto-standoj en la lasta Radio-Ekspozicio en Lyon (Francujo), prezentitaj de la loka „Amikaro Esperantista", kun materialo de „S.F.P.E." — La personoj, de maldekstre: f-ino Broggi, s-ro Perret, f-ino H. Avril, s-ro Alais, s-ro Pouchot prez., s-ro Saget, s-ino Macary.



La Esperanto-ŝlosilo kun la demandaj vortoj el marcipano, fabrikita de la firmo Pel en Leiden, okaze de la festo de Sankta Nikolao, vendata en multaj nederlandaj sukerajejoj.

Germanaj fervojistoj lernas Esperanton. — Nia bildo prezentas la fervoran anaron de la fervojista Esperanto-rondeto „Antaŭen" en la urbo Leipzig.

La anoj de la diligenta Esperanto-Klubo en Petroŝeni (Rumanujo). En la sidanta vico, de maldekstre, niaj fervoraj propagandistoj: s-ro F. Lerch, lerneja subrevizoro V. Lucaciu, ges-roj Sedan kun sia filineto, gimn. profesoro J. Berghian kaj s-ro J. Kanduth. En la mezo staras du Esp-istaj skoltestroj.

S-ro Hans Fox el Danzig, instruisto de la Cseh-Instituto (maldekstre), en la gastama hejmo de s-ro F. Ahnfeldt, delegito de UEA en Torskors (Svedujo).

La Esperanto-ekspozicio en la Kristana Asocio de Junaj Viroj (Y.M.C.A.) en Jokohama (Japanujo), okazinta dum Septembro. Post la ekspozicio komenciĝis kurso.

La inaŭguro de la nova Esperanto-monumento en Novy-Bohumin (Neu-Oderberg) en Ĉeĥoslovakio, la 4-an de Novembro. Nia bildo prezentas la momenton, kiam la urbestro (dekstre staranta) transprenas la belan monumenton. Antaŭ la monumento staras s-ro L. Krysta, la senlaca Esp.-pioniro, prez. de la Regiona Esp. Ligo.

S-ro F. Moor, programestro kaj ĉefa anoncanto de la radio-stacio en Tallinn (Estonio), antaŭ la mikrofono. Li ofte anoncis la programon kaj eĉ deklamis en Esp.



S-ro H. J. Bulthuis (Hago), la konata aŭtoro de multaj Esperanto-libroj originalaj kaj tradukitaj, iama volapükisto. La 28-an de Dec. okazos je lia honoro en Arnhem jubilea festo, okaze de lia 25-jara ekzamen-komitata sekretarieco.

Nia eminenta ĉeĥa propagandisto, s-ro Dolfa Bartoŝik, aktiva membro de la Cseh-Instituto. Li gvidas nuntempe tre sukcesajn kursojn en Jugoslavio, kaj ricevis de la jugoslava registaro permeson por instrui Esperanton en la mezlernejoj kaj pedagogiaj institutoj de la Danuba provinco.

LA MONDO ESTAS INTERESA

La Biblia Societo estas 130-jara. — La mondkonata „Brita kaj Eksterlanda Biblia Societo", kiu en granda skalo disvastigas la Sanktan Skribon en la tuta mondo, kaj kiu en la jaro 1926 eldonis la Biblion en Esperanto, fondiĝis antaŭ 130 jaroj. Dum sia ekzistado ĝi disvendis pli ol 450 milionojn da ekzempleroj de la Biblio, Nova Testamento kaj partoj de tiuj libroj. En la pasinta jaro ĝi publikigis dek-unu novajn tradukojn, kaj kune kun tiuj la Biblio estas tradukita nun en 678 diversajn lingvojn. Dum la pasinta jaro la disvastiĝo de la Biblio en Eŭropo malpliiĝis, kaŭze de la ekonomia krizo.

18 milionoj por plibonigi domojn. — Kiel parton de kriza subten-laboro la sveda registaro donis 18 milionojn da kronoj por plibonigi domojn en la kamparaj distriktoj. La sumon disdonis la movado „por propra hejmo", plejparte por plibonigi kamparajn domojn, sed ankaŭ por konstrui novajn. Per la disdonita sumo oni plibonigis 25,045 domojn.

Nova grandega sport-palaco en Stokholmo. — Ĵus pretiĝis en Stokholmo la nova sportpalaco, kiu havas imponajn dimensiojn kaj estas unu el la plej interesaj konstruaĵoj de sia speco. Ĝi entenas naĝbasenon, en kiu samtempe povas sin bani 500 personoj, en duon-miliono da litroj da akvo. Okaze de akvo-sportaj aranĝoj estas loko por 3000 rigardantoj. Sed se oni malplenigas la basenon kaj aranĝas ekz-e boks-luktadon, eĉ 4000 rigardantoj trovas komfortan lokon. Krom tio la potenca konstruaĵo enhavas varmajn banejojn, restoracion, kafejon, gimnastikajn halojn kaj kunvenejojn.

La prauloj de Greta Garbo. — La „Societo por Hejmregiona Kulturo" de la sveda urbeto Tranås faris zorgan esploron pri la genealogio de la mondfama film-aktorino Greta Garbo, kiu estas sveda virino. La societo konstatis, ke ŝiaj prapatroj dum kvin generacioj loĝis en la pentrinda distrikto ĉirkaŭ la lago Sommen. Unu el la plej fruaj prapatroj de Greta Garbo estis la fama kaj potenca bienposedanto Gabriel Gyllensthal. La patrino de Greta Garbo ankoraŭ vivas en Stokholmo, amplene prizorgata de sia fama filino.

Strangaj rekordoj. — La deziro esti fama kaj superi la aliajn, kondukas multajn homojn al la plej strangaj agoj. Unu amerika gazeto ĵus publikigis tutan liston pri lastatempaj strangaj rekordoj. En la unua loko staras la rekordo de P. Beefsteak, kiu manĝis naŭ kilogramojn da viando en unu sola tagmanĝo. Post kelkaj tagoj li plialtigis sian rekordon al 12 kilogramoj. La plej kapabla pastečo-manĝanto en Ameriko, kiu nomas sin „la pastečo-ĉampiono de la mondo", dum 91 minutoj konsumis 61 pastečojn. En la melon-manĝado kondukas tiu viro, kiu dum unu tago enstomakigis 17 grandajn akvo-melonojn. Alia rekordulo manĝis en unu horo 53 malmolajn ovojn, sed li pagis la admirindan rekordon per alta prezo, ĉar li tuj mortis. S-ro L. N. Silas vetis, ke en kvar tagoj li manĝos 2400 ostrojn. En la unuaj tri tagoj li efektive sukcesis manĝi la porciojn de po 600 ostroj, sed en la kvara tago post la 288-a ostro li ne povis plu manĝi kaj perdis la veton.

„Kvarangulaj ŝtopiloj ne taŭgas por rondaj truoj." Tio estas la prava principo de la sveda grandindustriisto K. F. Göransson, ĉefo de la granda Fer- kaj Ŝtaluzino Sandviken, kie laboras preskaŭ 4000 personoj. Fidele al sia principo s-ro Göransson klopodas laborigi ĉiun laboriston en tiu fako, en kiu la koncerna laboristo estas plej kapabla kaj kontenta. Por atingi tion li organizis psikoteknikajn ekzamenojn, kiujn devas trapasi ĉiu laborserĉanto. Sed ankaŭ la malnovaj laboristoj estas ripete ekzamenataj, por ke oni povu doni al ili pli konvenan lokon, se eble. La ekzamenado okazas per specialaj „testoj" pri kolorsento, mekanika taŭgeco, karaktero, ĝenerala taŭgeco k.t.p. Tiaj ekzamenoj estas ekzemple: dispreni kaj ree kunmeti simplan maŝinon, rakonti dum dek minutoj pri sia plej grava travivaĵo, kaj similaj. La sistemo de s-ro Göransson alportis bonegajn rezultojn: la laboristoj estas pli kontentaj kaj trovas plezuron en sia laboro, kaj sekve de tio ankaŭ ilia produktado pliiĝas en kvanto kaj kvalito.

Heroa propono. — La tuta mondo kun ĝojo aŭdis, ke la fama sveda verkisto, D-ro Axel Munthe, aŭtoro de la libro „San Michele", en la aĝo de 77 jaroj rericevis sian vidpovon per sukcesa operacio farita en Zürich. Kiam D-ro Munthe verkis sian mondfaman libron pri San Michele, li jam forlasis ĉiun esperon pri la konservo de sia vidpovo. Kelkaj el la plej kortuŝaj partoj de la libro temas pri la iom-post-ioma falo de la mallum-kurteno, kiam proksimiĝadis lia blindiĝo. Post la apero de la libro liaj admirantoj superŝutis lin per konsiloj, medikamentoj kaj simpatiesprimoj. Unu el ili faris tre grandaniman proponon. Li deklaris sin preta transdoni sian bonan okulon, se la kuracistoj povas per ĝi anstataŭigi la malsanan okulon.

GRAVA KOMUNIKO AL LA ESPERANTISTAJ SOCIETOJ!

En la lastaj monatoj pluraj Esperantistaj societoj interesiĝis ĉe ni pri la ebleco aboni LA PRAKTIKON favorpreze por ĉiu ano de la societo. Tiuj grupoj esprimis grandan kontentecon pri LA PRAKTIKO, kiu estas *„ideala ekzercilo kaj informilo por la Esperantistaro"*.

Ĝojante pro tiuj pruvoj de kontenteco kaj simpatio, kaj dezirante helpi al la societoj kaj iliaj anoj, ni faris la jenan decidon:

Se iu societo abonas La Praktikon por ĉiu sia ano, ni liveros la gazeton je la favorprezo de 1,50 guld. por unu jaro (anstataŭ la ordinara prezo de 2,50 guld., do kun rabato de 40 %).

Kondiĉoj: La societa estraro mem kolektos la abonmonojn kaj sendos ilin al nia administracio. — Nur tutjaraj abonoj estos akceptataj. — La gazeto estos sendata aŭ al la societa estraro en unu paketo, aŭ rekte al ĉiu membro aparte, laŭ la deziro de la societa estraro.

Tiuj societoj, kiuj havas intereson pri la supra propono, bonvolu kiel eble plej baldaŭ informi nin, por ke ni povu presigi la Januaran numeron en sufiĉa kvanto.

Volonte ni publikigos la komunikojn de tiuj societoj, kiuj abonas la gazeton por ĉiuj siaj anoj. Oni redaktu la komunikojn kiel eble plej koncize kaj ensendu ilin antaŭ la 20-a de ĉiu monato, ĉar en tiu tago ni fermas la redaktadon de la venontmonata numero.

MALNOVAJ JARKOLEKTOJ. — Se la anoj kaj la biblioteko de iu societo deziras posedi la malnovajn jarkolektojn (1932, 1933, 1934) de La Praktiko, ni estas pretaj liveri ilin je la **escepta favorprezo de po —.90 guld., se oni mendas samtempe minimume 10 ekzemplerojn.** Ĉi tiu propono validas ankaŭ por kursoj kaj studrondoj.

PUBLIKIGO DE BILDOJ. — Ricevinte ofte demandojn pri publikigo de bildoj en La Praktiko, ni povas komuniki, ke ni volonte publikigos bildojn pri la societoj aŭ iliaj estraroj kaj iliaj aranĝoj (festo, kurso, ekspozicio, interesa propagando, ekskurso k.t.p.), *se oni sendas al ni bonan fotografaĵon kaj mendas minimume 25 ekz.-ojn de la numero, kiu entenos la bildon, por disvendo inter la loka samideanaro.*. — Prezoj: 25 ekz. = la duoblo de la jara ordinara abonsumo; 40 ekz. = la trioblo de la abonsumo. — Post la apero de la bildo la societo povas aĉeti la kliŝon je malalta prezo, dependanta de la grandeco de la kliŝo. — Societoj, kiuj abonas la gazeton por ĉiuj siaj anoj, anstataŭ mendi ekzemplerojn, povas kontribui al la kostoj de la kliŝigo, pagante 2 guldenojn. — **Ni tre konsilas uzi ĉi tiun tre favoran eblecon, kiu multe kontribuos al la tre dezirinda reciproka konatiĝo inter la Esperantistaro.**

La prezoj supre estas donitaj en nederlanda valoro. Societoj en aliaj landoj bonvolu transkalkuli ilin laŭ nia kurz-tabelo sur la 2-a paĝo de ĉi tiu numero.

LA PRAKTIKO.

LIBRO-LOTERIO de LA PRAKTIKO

Detalaj informoj aperis en la Januara numero. — La tirado okazos la 9-an de Februaro 1935. Rapidu aĉeti la lastajn lotojn!

LA LISTO DE LA PREMIOJ (DAŬRIGO):

191 Vienaj legendoj. De A. Mair.
192 Rememoroj de Esperantisto.
193 Homarismo laboro.
194 El la intima libro de la Verd-urbaj Esperantistoj.
195 Kial venkis Esperanto?
196 Elektitaj noveloj de Turgenev.
197 La nigra galero. De W. Raabe.
198 Ses noveloj. De E. A. Poe.
199 Noveloj. De H. Sienkiewicz.
200 El la skizlibro. De W. Irving.
201 Ano de l' ringludo. De D. Šimunoviĉ.
202 Orientaj fabeloj. De V. Doroševiĉ.

GARDATAJ LOTOJ (daŭrigo). — Alvarez 7291—7301; Conrads 7357—7367; Früh 7420—7430; Hasle 7398—7408; den Hollander 7387—7397; Jónsson 7376—7386; H. P. v. B. 7324—7334; Peschke 7409—7419; Schoondermark 7302—7312; Zubkov 7375.

PRI PERSUJO.

S-ro H. P., kiu faris longan vojaĝon en la landoj de la Oriento, rakontas la jenajn interesajn detalojn pri Persujo:

Se oni demandas iun person: „Kiom da infanoj vi havas?", li respondas: „Kvar aŭ kvin!" Sed se oni poste renkontas tiujn infanojn, oni trovas tri aŭ ses aŭ pli aŭ malpli.

La perso ne ŝatas la nombrojn kaj tio havas ofte malagrablajn sekvojn en la komerco.

Mi estis okaze en la urbo Yezd, por viziti mian anglan amikon C. H., kiam alvenis granda pakaĵo de tapiŝoj. La servisto Ali devis kalkuli ilin. Estis granda amaso kaj Ali bezonis multan tempon. Mia amiko devis iri al kunveno en la urbo kaj petis, ke mi anstataŭu lin. Mi atendis la venon de Ali. Fine Ali revenis en la oficejon. „Kiom da tapiŝoj estis?" mi demandis. „Proksimume kvar aŭ kvin cent", respondis Ali. Li tre miris, ke tiu respondo ne kontentigis min kaj mi insistis, ke li precize kalkulu. Nur en la posttagmezo li revenis kaj li kunportis alian serviston, sian amikon Husain.

— Nu, kiom da tapiŝoj estas? — mi demandis Alin.

— Tricent ĝis tricent-kvindek.

Mi ekkoleris.

— Stultulo! — mi diris, — vi devas precize kalkuli.

Mi demandis al Husain, ĉu eble li scias, kiom da tapiŝoj alvenis.

— Mi ne scias, — diris Husain, — sed estas proksimume cent-sepdek.

Mi ĝojis, ke mi almenaŭ ricevis sufiĉe prudentan respondon. Mi forsendis Alin kaj komisiis Husainon precize kalkuli. Intertempe mia amiko revenis kaj mi rakontis, kio okazis. Li ridis kaj diris, ke Ali estas stultulo kaj ke mi bone faris transdonante la laboron al Husain. Post du horoj revenis Husain, tre fiera.

— Nu, kiom da tapiŝoj estas? — mi demandis.

Husain ridetis:

— Estas cent-kvardek-kvar, sinjoro.

Mi ne scias, kial, sed malgraŭ ĉi tiu preciza respondo mi restis suspekta. Mi demandis:

— Ĝis kiom vi kalkulis?

— Ĝis cent-tridek, — diris Husain, — la resto estas proksimume dek-kvin ĝis tridek-kvin.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PARTOPRENU EN SKRIBA ESP. B-KURSO! — Petu prospekton de la kursgvidanto: s-ro H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

ANARKISTA ESPERANTO-GRUPO letervesperos la 19-an de Januaro. Skribu multnombre! Ni respondos. — Adreso: Folke Rosén, Helgagatan 36, Stockholm 4 (Svedujo).

PETO. — Dudekjara hungara Esperantisto, abituriento, deziras lerni tipografion, teksadon, laktaĵproduktadon aŭ ĝardenkulturon en Okcident- aŭ Nord-Eŭropo. Leterojn anticipe dankas: s-ro Béla Kraus, Gyöngyös 62 (Hungarujo).

ESPERANTO-GRUPO DE GÖTEBORG (Svedujo) aranĝos internacian letervesperon dum Januaro 1935. Sendu poŝtkartojn, leterojn, gazetojn. Ni respondos. Adresu al: S-ro Einar Adamson, Redakcio de „Minareten", Göteborg 7 (Svedujo).

KOMERCISTOJ! Juna germana komercisto serĉas komercajn interrilatojn divers-specajn kun ĉiu lando. — Adreso: S-ro J. Hoesch, Liboristrasse 15, Dortmund (Germanujo).

ATENTU! Letervesperon aranĝos la Esperanto-klubo en Valdemarsvik, la 14-an de Januaro. Skribu multnombre! Almenaŭ unufoja respondo garantiata. — Adreso: Esperantoklubben, Box 6, Valdemarsvik (Svedujo).

PLANT-FIZIOLOGO deziras korespondi kun samprofesianoj el scienca kaj pedagogia medioj. Adreso: S-ro Anat. Volochov, Seeds Laboratory, Institute of Fodders, en Lugovaja (Moskov-Savelova Railway), Sovjet-Unio.

SENDU leterojn kaj poŝtkartojn por nia letervespero okazonta en la fino de Januaro. Respondo garantiata. Adreso: S-ro Gustav Hast, Agnesbergs Esperantoklubb, Agnesberg (Svedujo).

MALOFTA OKAZO! — Plenan kompleton de la ilustrita gazeto LA ONDO DE ESPERANTO (jaroj 1909—1917 = 9 jarkolektoj) oni povas aĉeti aŭ interŝanĝi. — La gazeto enhavas multe da interesa legaĵo kaj historia materialo por tiu periodo, interalie multajn portretojn de Esp. aktivuloj. — La ofertojn adresu tiel: Al Esperantano, Poŝtkesto 994, Moskvo-Centro (Sovjet-Unio).

HELPU la movadon, la verkantojn kaj vin mem, aĉetante kaj legante la bonegan libron „BONHUMORO" de Paul Nyssens. — Prezo kun sendkosto 1.25 ned. guld. Aĉetebla ĉe La Praktiko.

HELPU! Esp-istoj, precipe UEA-delegitoj kaj fotografistoj, sendu al mi adresojn de tombŝtonaj fabrikoj, de kie oni povas ricevi kaj interŝanĝi fotojn, kliŝojn, desegnaĵojn de memorŝtonoj. Fotistoj (kontraŭ rekompenco) faru bildojn en tombejoj pri tombŝtonoj, statuoj kaj aliaj tombmonumentoj. Korespondo Esperante, france, germane, itale, angle. Adreso: S-ro Vilhelmo Eidam, Kurucucca 28, Debrecen (Hungarujo).

Du tagojn en Esperantujo!

Okaze de la kunvenoj en Arnhem je la 29-a kaj 30-a de Dec., s-ro J. H. Vink (Amsterdamschestraat 25, Den Haag) organizos aŭtomobil-ekskurson tien. Forveturo el Hago sabate ĉ. la 12,45 h., alveno en Arnhem ĉ. la 16-a horo, por partopreni en la kunveno kaj festvespero. Reveturo dimanĉe vespere post la manĝo, alveno en Hago ĉ. la 21,30 h. — Prezo, entenanta ĉion (veturojn, tranoktadon, manĝojn k.t.p.): nur 6,50 guld. Detalajn informojn volonte donas s-ro Vink. Aliĝu kiel eble plej frue, ĉar la nombro de la lokoj estas limigita. Pagoj per poŝtkonto 43911 de s-ro H. J. Vink.

TUTMONDAJ GEAMIKOJ! Mi elsendis en la monato Februaro du leterojn kun surskribo „Tuthomara Amikeco". Ili estis pentritaj kaj havis la devon rondiri ĉirkaŭ la terglobo, kaj la lasta ricevanto devis resendi ilin al mia adreso. Bedaŭrinde ili ŝajne perdiĝis survoje. Mi petas ĉiun, kiu scias ion pri tiuj leteroj, bonvolu sciigi min. Mi kore antaŭdankas al ĉiu, kiu helpos trovi ilin. — F. Ulbrich en Uherské-Hradište (Moravio), Ĉeĥoslovakio.

JUBILEO
de s-ro H. J. BULTHUIS.

La 28-an de Decembro okazos festvespero en la Esperanto-Domo en Arnhem, por honori nian konatan kaj ŝatatan samideanon, s-ron H. J. Bulthuis, kiu dum 25 jaroj sindone laboris en nia ekzamena komitato.

Mi petas ĉiujn gesamideanojn, kiuj deziras partopreni en donaco farota al li je tiu okazo, kontribui per sumeto, sendota al mia adreso aŭ enpagota al mia poŝtkonto N-ro 38247.

Al la festvespero ĉiuj geesperantistoj estas kore invitataj.

P. Heilker
ekzamen-komitata prezidanto
Hoofddorp (Nederlando).

Rapidu mendi la luksan bindo-tabulon por la nuna jarkolekto de La Praktiko!

(El bela tolo, kun ora surpreso.)

Prezo kun sendkosto: 1.25 guld.

Ni tre petas baldaŭ mendi, por ke ni sciu, kiom da bindo-tabuloj ni devas fabrikigi.

Bindotabuloj por la jarkolektoj 1932 kaj 1933 estas ankoraŭ haveblaj, prezo po 1.25 guld. — Binditaj jarkolektoj kostas po 3.— guld.

LA REDAKCIO RESPONDAS

S-ro L. B. en Z. (Ned.) — 1. Nederland-lingva jurnalo kun ĉiutaga Esperanto-lingva aldono, laŭ nia scio, ne ekzistas. — 2. Ni scias nur pri unu nederlanda ilustrita revuo, kiu donas Esperanto-lingvajn tradukojn sub la bildoj. Vidu la n-ron 206 de nia rubriko „AL LA VENKO!"

S-ro A. de V. en D. (Ned.) — Pri la ideoj de Zamenhof kaj pri la „homaranismo" vi trovas la skribaĵojn de Zamenhof mem en la libro *„Originala Verkaro de Zamenhof"*, sur la paĝoj: 312 kaj sekvantaj. (Aĉetebla ĉe La Praktiko, prezo 6 guld.).

S-ro B. V. en M. (Jugosl.) — Ni ne konas Esperanto-lingvajn librojn pri best- kaj ter-kulturado.

S-ro K. H. B. en E. (Ned.) — 1. La Esp-an literon „v" elparolu tiel, kiel vi elparolas la nederlandan literon „w". — 2. Ĉe la fino de la linio ni povas disigi la vorton aŭ laŭ la silabado *(Es-peran-tis-ta-ro)* aŭ laŭ la gramatika konsisto *(Esperant-ist-ar-o)*.

S-ro S. W. A. en K. (Sved.) — 1. La radiko „interes-" estas transitiva verba radiko. Do la ĝustaj esprimoj estas: *Esperanto interesas min* kaj *Mi estas interesata de Esperanto.* En la Plena Vortaro vi trovas multegajn ekzemplojn pri la uzado de tiu vorto. — 2. La ĝustaj kaj kutimaj esprimoj estas: *Mi loĝas en la proksimeco de la lernejo* kaj *Mi loĝas proksime al la lernejo.*

D-ro N. H. en O. (Sovjet-Unio). — La Praktiko estas abonebla ĉe la CK de SEU en Moskvo ankaŭ por 1935. Abonprezo por unu jaro: 4.20 rubloj. — Ni regule sendis al vi la gazeton. Por tiuj numeroj, kiujn vi ne ricevis, bonvolu turni vin al via poŝtoficejo. Ni ĉiam denove sendas al niaj abonantoj la ne alvenintajn numerojn, sed ni bedaŭrinde devas ŝanĝi nian belan kutimon, vidante, ke kelkaj abonantoj ĉiumonate plendas pro neriveco de la gazeto. Ekzemple al vi ni jam dufoje sendis preskaŭ la tutan jarkolekton de ĉi tiu jaro. Ni petas vin, bonvolu paroli kun la estro de via poŝtoficejo kaj postuli ordon en la disportado de la poŝtaĵoj, ĉar certe ne ĉe ni estas la kaŭzo de la nericevo.

S-ro J. F. en B. (Hung.) — Ĉiutaga Esperanto-lingva gazeto ankoraŭ ne ekzistas.

S-ro M. B. en T. (Ned.) — Dankon pro la artikoloj el la „L. K." Estas tre bone, ke s-roj Janssen kaj Wijnands sendis ĝustigajn artikolojn. Espereble la redakcio nun vidas, ke ĝi devas esti singarda.

S-ro W. P. en F. (Germ.) — Via abono estas pagita ĝis la fino de Sept. 1935.

S-ro R. W. H. en B.-A. (Angl.) — „Ne bela estas amata, sed amata estas bela". Ĉi tiun frazon ni komprenas jene: Ne tion ni amas, kion ni trovas bela, sed: kion ni amas, tion ni trovas bela. — La alia frazo, kiun vi citis, estas tute klara.

S-ro H. O. en T. (Sved.) — Bedaŭrinde ni ne povas presigi la konkursajn kuponetojn sur apartan paperon kaj aldoni al la gazeto. Tio kaŭzus por ni tro altan elspezon. Sed ni opinias, ke per la eltranĉo de la kuponetoj la valoro de la jarkolekto ne malpliiĝos. Do kuraĝe eltranĉu ilin kaj poste trankvile bindigu la jarkolekton!

S-ro L. A. B. en S. (Usono). — S-ro J. M. (Hung.) — S-ro F. O. en H. (Ĉeĥosl.) — S-ro M. S. en B. (Pol.) — Ni dankas pro la senditaj tekstoj, sed ni ne povas ilin uzi.

S-ro J. R. P. en S. C. (Kanarioj). — 1. Ni ne konsilas uzi la vortojn „enas" kaj „suras". El prepozicio oni povas fari verbon, se la farita verbo havas bonan sencon. Ekz.: *superi, ĉirkaŭi.* — 2. „Hodiaŭ mi ĉaras, sed morgaŭ mi kialos." La du strangaj vortoj en ĉi tiu frazo estas uzeblaj, se ili estas kompreneblaj. Ni komprenas la frazon tiel: „Hodiaŭ mi diradas: *ĉar*, sed morgaŭ mi diradas: *kial.*" Ni rezervu la uzadon de tiaj-vortoj nur al la artistoj de nia lingvo. — 3. La prepozicioj estas uzeblaj kiel prefiksoj, se la tiel ricevitaj novaj vortoj havas sencon. — 4. La oficiala vorto estas: *topazo.* — La preferinda formo estas: *intervjui.* — 5. „Bukoliko" kaj „Pastoralo". Ambaŭ vortoj signifas: poemo pri paŝtistoj kaj paŝtista vivo. — 6. Ni konsilas uzi la formojn *proleto* kaj *proletaro.* — 7. Ni uzas la formon *sovjeto*, por resti fidelaj al la originala elparolo de tiu vorto kaj al ĝia uzado en la eŭropaj kulturlingvoj. — 8. Ĥirologio = lingvo per la manoj kaj fingroj (la parolo de surdmutuloj). — Ni tre konsilas, ke vi aĉetu la Plenan Vortaron.

S-ro E. C. en R. (Ned.) — *Geef U er rekenschap van* = bone komprenu; bone atentu. — *Rekenen op* = kalkuli je. — *Rekening houden met* = atenti pri; konsideri. — *Iemand te woord staan* = interparoli kun iu. — *Zijn blikken staarden wezenloos* = li rigardis fikse kaj senesprime. — *Ik hoop dat U het goed maakt* = mi esperas, ke vi bone fartas. — *Hij ziet er goed uit* = li aspektas bone. — Ĉe kelkaj el la supraj esprimoj ni povus doni pli trafan tradukon, se ni konus la tutan frazon, en kiu la koncerna esprimo troviĝas.

S-ro L. K. en L. (Angl.) — Pri la uzado de la vorto „kvazaŭ" vi trovas multajn ekzemplojn en la Plena Vortaro. La kondiĉa modo (-us) post tiu vorto estas ĝusta.

S-ro F. O. en C. (Hisp.) — 1. Mimeografita" = (maŝinskribita teksto) multobligita per multobliga aparato. — 2. Ni ne vendas kristnaskajn salutkartojn.

F-ino M. V. V. H. en H. (Usono). — Vian plendon, ke vi dum la lastaj tri monatoj ne ricevis La Praktikon, ni bone komprenas, vidante, ke vi nun havas novan adreson, en alia urbo. Estas bedaŭrinde, ke vi ne informis nin pri la ŝanĝiĝo de via adreso. Ni ĉiam regule sendadis la gazeton laŭ via malnova adreso. Bonvolu serĉi la nericevitajn numerojn ĉe la poŝtoficejo de via antaŭa loĝloko. Tiu oficejo devas havi ilin, ĉar ni ne rericevis la forsenditajn numerojn.

S-ino E. M. G. en L.-A. (Usono). — Unu usona dolaro valoras nuntempe 1,44 ned. guld. Do vi pagis tro malmulte.

KONKURSOJ

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Julia numero!

109-a konkurso.

MATEMATIKA PROBLEMO

Ensendis: S-ro F. Charlet en Hautmont (Francujo).

Sur vastega kampo en du diversaj lokoj staras viro kaj virino. La distanco inter ili estas precize 13½ kilometroj. En la sama momento ili ekmarŝas renkonte, la viro kun rapideco de 5 kilometroj dum unu horo, la virino kun rapideco de 4 kilometroj. En tiu sama momento de la ekmarŝo, ankaŭ la hundo, kiu estas ĉe la viro, komencas kuri. Ĝi kuras rekte al la virino, ŝin atinginte tuj rekuras al la viro, kaj tiel plu senhalte kuradas inter la du personoj, ĝis kiam ili renkontas. La hundo kuras kun 21-kilometra rapideco.

DEMANDO: Kiom da kilometroj kuras la hundo ĝis la renkontiĝo de la du personoj?

Al la ensendintoj de la ĝusta respondo ni disdonos 6 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 15-a de Marto. Bonvolu precize plenumi la konkursajn regulojn!

110-a konkurso.

SILAB-ENIGMO.

AG AK AK AR BE BO BO CI DO DO DO ED FA GA GO GO GU IN IN JU KO KO KO LA LI LO LO LO MO NA NA NO NU ON OR OR OS OS PO PO RA RA SO SO SO TO TO TO TO TO UR VE ZO ZO.

El la supraj 54 silaboj formu 27 dusilabajn vortojn kun la jenaj signifoj:

1. Parto de la kapo.
2. Videbla sur la maro.
3. Sur la piedoj estas.
4. Staranta akvo.
5. Grandega birdo.
6. Akvero.
7. La rado havas.
8. Virina vestaĵo.
9. Mallibera viro.
10. Besteto en la lito.
11. En la korpo estas.
12. Ne havanta gepatrojn.
13. La veturiloj havas.
14. Skribilo.
15. Mortigilo.
16. Granda besto.
17. Ŝipoj havas ĝin.
18. La glavo havas ĝin.
19. Parto de la dramo.
20. Manĝata kreskaĵo.
21. Grava meblo.
22. Parto de la cirklo.
23. La birdoj havas.
24. Gravaĵo en ĉiu laboro.
25. Malbela besto.
26. Norda ĉefurbo.
27. Sur la ĉielo videbla.

La unuaj literoj de la ricevitaj vortoj donas gravan konsilon al la Cseh-metodaj kursgvidantoj.

Inter la ensendintoj de la ĝusta solvo ni disdonos 6 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 15-a de Marto.

Bonvolu observi la konkursajn regulojn!

Kupono por la 10[illegible] | Kupono por la 110[illegible]

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu

La Praktiko

ABONPREZO:
Por 1 jaro: 2.50 ned. guld.
„ 1/2 „ 1.25 ned. guld.

La abona jaro komenciĝas en Januaro kaj Julio.

La mendon kaj la pagon oni devas sendi samtempe al: **Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando.**

MANIEROJ DE PAGO:

1) Enpagu la monon al la **poŝtĉekkontoj** de la Int. Cseh-Instituto de Esp., en la jenaj landoj *(post la numeroj de la poŝtĉekkontoj estas la sumo sendota por unujara abono):*

Aŭstrio: Wien A-156933 *(8 ŝilingoj)*
Ĉeĥoslovakio: Praha 500.362 *(40 kronoj)*
Danujo: Kopenhago 34941 *(6 kronoj)*
Germanujo: Berlin 129527 *(4 markoj)*
Hungarujo: Budapest 13201 *(6 pengoj)*
Jugoslavio: Zagreb 41345 *(75 dinaroj)*
Latvujo: Riga 4870 *(5 latoj)*
Nederlando: Den Haag 162626 *(2.50 guldenoj)*
Polujo: Warszawa 190.203 *(8 zloto j)*
Svedujo: Stockholm 74.126 *(5 kronoj)*
Svislando: Bern III. 6761 *(5 frankoj)*

2) Sendu **papermonon** en registrita letero.
3) Per **poŝtmandato.** Sur la kupono indiku la celon de la pago.
4) Per **UEA-kuponoj.** Valoro: 1 svisa franko = 0.50 ned. guld.
5) Per **poŝtaj respondkuponoj.** Unu kupono = 0.15 ned. guld.
6) Per **poŝtmarkoj** de la landoj: *Belgujo* (35 fr.), *Britujo* (5 ŝil.), *Bulgarujo* (140 levoj), *Estonio* (5 kr.), *Francujo* (25 fr.), *Hispanujo* (12 pes.), *Italujo* (20 lir.), *Norvegujo* (5 kr.), *Rumanujo* (150 leoj.). La sumoj montras la prezon de la jarabono. La poŝtmarkojn oni povas sendi en simpla letero kun netravidebla koverto.

PREMIOJ POR KOLEKTANTOJ DE ABONOJ:

N-ro 5. KONVERSACIA LITERATURO, N-roj 1—4.
„ 6. KONV. LITERATURO, N-roj 5—8 kaj kartona ujo.
„ 7. KONVERSACIA VORTARO, KONVERSACIA GAZETO, LA ENIGMOJ kaj GVIDLIBRO DE ARNHEM.
„ 13. Esperanta Kantareto.
„ 15. 25 poŝtkartoj kun la bildo de la Esperanto-Domo.
„ 16. 10 foto-poŝtkartoj pri la Esperanto-Domo kaj Arnhem.
„ 17. 5 poŝtkartoj kun la portreto de D-ro Zamenhof.
„ 18. „Esperantuja Kanto" kaj „Al la Esperanto-Domo" (du kantoj kun muziknotoj).
„ 19. Granda verda stelo kun la vortoj „ESPERANTO PAROLATA" (kun truoj, ringo aŭ piedo, laŭ elekto).
„ 20. Kvin simplaj Esp-insignoj (verda stelo kun pinglo, broĉo aŭ butono, laŭ elekto).

Ĉi tie detranĉu!

Mendilo de koresponda anonceto

Unufoja enskribo kostas -.45 ned. guld. (= 3 poŝtajn respondkuponojn). La abonantoj de LA PRAKTIKO povas unufoje en la jaro senpage anonci.

Bonvolu skribi tre klare, se eble, per skribmaŝino. Se vi skribas per mano, bonvolu imiti presitajn literojn.

Nomo: .....

Profesio: .....

Aĝo (laŭvole, sed konsilinde): .....

Adreso: .....

Deziras korespondi per ..... *kun la landoj:* .....

..... *pri la temoj* .....

Specialaj deziroj: .....

Ĉu vi promesas respondi almenaŭ unufoje al ĉiu, kiu al vi skribas? .....

La monon mi sendas samtempe per .....

Dato .....

.....
(subskribo)

Ĉi tie detranĉu

SE VI VOLAS,

ke La Praktiko fariĝu pli granda kaj pli bona,

varbu novajn abonantojn!

Bonvolu sendi la kolektitajn abonojn sur ĉi tiu papero. Skribu tre klare, se eble per skribmaŝino. Se vi skribas per mano, bonvolu imiti presitajn literojn.

Abonprezo kaj maniero de pago.

PREMIOJ:

Senpage ricevas La Praktikon tiu, kiu kolektas 7 abonojn. — Kiu kolektas malpli ol 7 abonojn, tiu povas elekti premiojn el la listo, po unu premion por ĉiu jarabono aŭ por du duonjaraj abonoj.

Kondiĉo: la kolektanto mem devas ensendi la mendon kaj la monon.

Ĉi tie bonvolu detranĉi

S-ro: 1
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 2
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 3
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 4
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 5
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 6
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: 7
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

S-ro: **SENPAGA**
S-ino: .....
F-ino:
Adreso: .....
Abonkomenco:

Ĉi tie bonvolu detranĉi!

La sumon de ..... *mi sendas samtempe per* .....

Mi elektas la premio(j)n: .....

Dato: .....

.....
(subskribo)

AELA ★ AELA ★ AELA

Kio estas AELA?
AELA estas kooperativa laborkomuno de Aktivuloj el la Esperantistaj Libro-Amikoj.

Kian celon havas AELA?
AELA celas havigi al siaj kooperativanoj — membroj la necesajn bonajn librojn por la plej malkara prezo.

Kiel AELA atingas sian celon?
AELA konsistas el librokonsumantoj, kiuj ankaŭ mem produktas siajn librojn. AELA-libroj estas jam ĉe la preso kvazaŭ antaŭe aĉetitaj. Tial en la prezkalkuloj ne devas troviĝi grava sumo por kovri eventualan perdon ĉe nevenditaj libroj kaj la prezo povas konsisti el la nuraj preskostoj, papero, sendkostoj, aŭtoraj honorarioj kaj malgrandaj administraj kostoj. Ricevante la necesan kapitalon jam antaŭe de la membroj mem, AELA ne bezonas pagi rentumon por kredito kaj profiton por posedantoj. AELA, dependante nur de la membroj presigas siajn librojn kie la preskostoj estas plej malaltaj. AELA produktante ĉefe por la membroj ne bezonas perantojn inter la produktantoj kaj konsumantoj kaj ankaŭ per tio ŝparas gravajn kostojn. Jen pro kiuj motivoj AELA povas malaltigi la prezon de siaj libroj por la membroj al preskaŭ la kvarono de la kutimaj prezoj.

Pri kio diferencas AELA ankoraŭ de aliaj eldonejoj?
La membroj mem elektas la librojn, eldonotajn en la sekva jaro el tuta listo de diversaj libroj. Per tio direktas la evoluon de nia literaturo ne la konsideroj kaj preferoj de iuj eldonejoj, sed la vasta leganta kaj konsumanta amaso mem. Tiel AELA povas aperigi en nia lingvo ne nur librojn de facilaj romanoj, sed ankaŭ instruajn, kulturajn, artajn kaj poeziajn verkojn, kiujn eldonejo bazita sur individua risko ne kuraĝus eldoni.

Kiajn avantaĝojn ĝuas Esperantisto, aliĝanta al AELA?
Li ricevas la tiujaran kolekton de AELA-libroj por la tre malalta kotizo, ricevas la pasintjarajn kolektojn duonpreze, ricevas opajn librojn per rabato de 40%, ricevas senpage la gravan gazeton: LINGVO, LIBRO; rajtas elekti la serion abonatan kaj la librojn de la sekva jaro.

Kiajn librojn eldonos AELA en 1935-a jaro:

SERIO A — LINGVA

En tiu ĉi serio ni donas 1200 paĝojn de tri gravaj verkoj.

1) **Nova Krestomatio**
Dr. K. Kalocsay, Dr. E. Pfeffer

480 paĝoj 20×13,5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 6.30 plus sendkosto. Bindo 1.50 svfr.

Daŭrigo de la Fundamenta Krestomatio, prezentanta per valorega apenaŭ akirebla materialo la literaturan evoluon inter 1905 kaj 1930. Same kiel la Enciklopedio, nepre necesa por ĉiu vera esperantisto: ĝi estas ja samtempe lingvo- kaj literaturo-historio, stilmodelo, legolibro kaj literaturo.

2) **Plena gramatiko de Esperanto. Vorto kaj frazo**
K. Kalocsay, G. Waringhien

412—550 paĝoj 20×13,5 cm. Prezo: broŝ. 5.60—7.60 svfr. (Depende de la amplekso.) Bindo 1.50 svfr.

Jen la unua vere kompleta E-a gramatiko, okupiĝanta detale kaj ĝisfunde ankaŭ pri ĉiu parto de la sintakso. Multlingva franco kaj multlingva hungaro ĝin faris, kio garantias la plenan interlingvecon de la vidpunktoj. Ĉiu nuanco stila ricevas tie sian E-an ekvivalenton: ne per novkreo sed per sagaca trovemo. Eksterordinare grava verko, signifa por la tuta evoluo de la E-a stilo.

3) **Normlingvo por elektroteknikoj**
Eugen Wüster Tradukis E. Pfeffer

200 paĝoj 20×13,5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 2.80 plus sendkosto. Bindo 1.50 svfr.

Malgranda eldono de la fama germanlingva verko de Wüster. Riĉega libro traktanta ĉiujn problemojn de la lingvo teknika, samtempe donanta profundan enrigardon en la vortstrukturon de diversaj lingvoj kaj de Esperanto, kies taŭgecon por internacie teknika lingvo la aŭtoro evidentigas nerefuteble. (Parenteze: la sama germana eldono kostas 9.— markojn)

Se tiuj ĉi libroj en formato 20×13,5 cm. ne atingas la bezonatan paĝonombron kiel kvaran ni aldonos *Evoluo de Esperanto*, de Petro Stojan.

SERIO B — ARTA-SCIENCA

1) **Edmond Privat: Interpopola paco**

ĉ. 200 paĝoj 20×13,5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 3.— plus sendkosto Bindo 1.50 svfr.

Ne necesas aparte prezenti al la E-a publiko E. Privat, la stiliston kaj pensulon. La klara lingvaĵo kaj klara pensogvido brilas en sia plena pompo en tiu ĉi porpaca verko, kiu samtempe prezentas interesajn kulis-sekretojn el la laboroj de la Ligo de Nacioj.

2) **Antal Hekler: Arthistorio II.**
Tradukis K. Kalocsay

180 paĝoj+112 bildopaĝoj. 23×15,5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 10.— plus sendkosto. Bindo 1.50 svfr.

Post la grandsukcesa unua volumo ni ne devas aparte konatigi ĝian daŭrigon, kiu pritraktas la historion de arto de la renesanco ĝis Picasso kaj la moderna arkitekturo. La verko, la sola arthistorio en Esperanto, instruas kaj propagandas samtempe.

3) **Van Loon: Rigardu la teron**
Tradukis G. Saville

480 paĝoj, 125 enpaĝaj ilustraĵoj; 12 unukoloraj bildoj; 18 plurkoloraj bildoj 23×15.5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 11.— + sendkosto. Bindo 1.50 svfr.

Eble la esperantistoj havas la plej grandan interesON pri geografio, ĉar ili ja certe deziras koni la landojn, en kiuj ili havas amikojn. Gravan mankon do kompensas la traduko de tiu ĉi verko grandsukcesa, aperinta jam en 20 lingvoj. Ĝi ne estas seka sciencaĵo, sed donas la abundajn konojn kvazaŭ senrimarke, en formo de sprita babilado. Apartan valoron havas la primitivaj, sed spritaj kaj ege instruaj desegnoj. La libro estas simila luda instruilo, kiel tiu de Aisberg pri la radio.

SERIO C — BELETRISTIKA

1) **Jerome K. Jerome: Tri homoj en boato**
El la angla: G. Badash

240 paĝoj 20×13.5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 4.— + sendkosto. Bindo 1.50 svfr.

Unika libro de bonhumoro. La leganto ne ĉesas plej bonguste ridi pri la tri ĉeffiguroj »por no paroli pri la hundo«. La tradukanton bone konas la legantoj de Literatura Mondo.

2) **Axel Munthe: Romano de San Michele**
El la germana: Jenny Weleminsky

550 paĝoj 20×13,5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 10.—+ sendkosto. Bindo 1.50 svfr.

La granda homkono, la supera arto kaj grandioza sento de humoro de verkisto unuiĝas en la aŭtoro. Li tiras nin kun si nerezisteble tra ridaj kaj larmaj scenoj, el sub lia sorĉo ne estas eble liberiĝi. Vera internaciulo: svedo, parizano, nun vivanta blindiĝinte inter siaj karaj birdoj sur la insulo Capri. Sian verkon li verkis en tri lingvoj. E-o nepre devas posedi ĉi tiun libron.

3) **Stefan Zweig: Amok**
El la germana: I. Lejzerowicz

88 paĝoj 20×13,5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 1.40+ sendkosto. Bindo 1.50 svfr.

Ĉi tiu eterne bela novelo restas neforgeseble en la memoro de ĉiu leginto.

4) **I. Lejzerowicz: El la verda Biblio kaj babilado de Horaĉo Ŝercer**

100 paĝoj+25 bildopaĝoj 15,5×11,5. Prezo: broŝ. svfr. 2.20 + senkosto. Bindo 1.50 svfr.

La delonge anoncita libro fine pretiĝis, kaj, ilustrita de R. Laval, ĝi estos bonega distrilo de vintraj grupvesperoj. Jen nia movado en kurba spegulo. La rido ne nur sanigas, sed ankaŭ instruas.

5-6) **Originala romano**

ĉ. 400 paĝoj. Proksimuma prezo: broŝ. svfr. 6.50 + sendkostoj. Bindo por du volumoj 3.— svfr.

De iu el la verkistoj: Szilágyi, Weinhengst, Vera Gutmann, G. Saville. La verkoj estas parte sub ellaboro, parte sub kontrolo, de provizore ne estas decidite, kiuj du aŭ tri (laŭ la amplekso) estos el ili eldonitaj. Ni esperas, ke vi estos kontentaj pri la elekto, farota faksperte kaj konscience.

Kiom estas la kotizo al AELA en 1935?

1) *Kotizo por la lingva serio:*
Prezoj en svisaj frankoj.
7:— se pagata ĝis la 1-a de februaro
8:50 se pagata ĝis la 1-a de julio
10:— se pagata ĝis la 1-a de decembro.

Por tiu kotizo la membro ricevas la plenan lingvan serion.

2) *Kotizo por la arto-scienca aŭ beletristika serio:*
10:— se pagata ĝis la 1-a de februaro
11:— se pagata ĝis la 1-a de julio
12:— se pagata ĝis la 1-a de decembro.

Por tiu kotizo la membro rajtas elekti unu el la du serioj. La du serioj kune kostas svfr. 18.50; 20.—; 22.—; laŭ la tempo de la pago.

3) *Kotizo por ĉiuj tri kune:*
25:— se pagata ĝis la 1-a de februaro
27:50 se pagata ĝis la 1-a de julio
30:— se pagata ĝis la 1-a de decembro.

Por tiu kotizo la membro ricevas ĉiujn tri seriojn.

Ĉi kotizoj validas por libroj broŝuritaj kun simpla (senregistra) sendo. La librojn de la serioj ŝanĝi je aliaj libroj la membro ne rajtas. Libroj de diversaj serioj ne estas mikseblaj.

Kion atenti ankoraŭ ĉe la pago?

1. Estas haveblaj ankaŭ serioj kun malmola bindo. Tia bindo kostas po 0:90 svfr. pagotajn por ĉiu libro samtempe kun la kotizo.

2. Kostoj por registrita sendo (en kiu okazo AELA garantias kontraŭ perdiĝo) kostas po 0.50 svfr. por ĉiu aparta volumo.

3. La kotizo estas pagebla ankaŭ en partoj plej malfrue 1-an de decembro 1935. Minimuma partopago 3.— svfr. La tempo de la *lasta* partopago fiksas la sumon de la kotizo laŭ la supra tabelo.

Kelkaj pluaj informoj pri la membreco:

La akcepto de kotizoj por 1935 estos fermata la 1-an de decembro.

La membreco ekvalidas post la ricevo de la unua partopago aŭ pago de plena kotizo, post sendo de la plena adreso kaj elekto de la serio, kaj *finiĝas aŭtomate post la ricevo de la abonitaj libroj.*

La libroj aperas sinsekve inter la tempo 1-a de februaro kaj 31-a de decembro 1935. Aperon de iu el la libroj AELA anoncas per la senpaga kvaronjara gazeto LINGVO-LIBRO.

Se sufiĉe da demandoj, AELA presas librojn ankaŭ sur speciale luksa papero kun luksa bindo. Specialajn kondiĉojn pri tio petu aparte.

Kiajn librojn donas AELA por speciale malalta prezo al la membroj?

Ĉiu membro rajtas aĉeti *ĉiun libron* eldonitan de la eldonejo (do ankaŭ libron el alia samjara serio) kun rabato de 40%. Sed el ĉiu libro oni povas aĉeti nur po unu ekzempleron. Ankaŭ kelkdekoj da aliaj libroj, eldonitaj de fremdaj eldonejoj estas haveblaj por tia favora prezo; pri ilia listo demandu la administracion, la liston de la propraj eldonoj vidu sube:

	Ordinara prezo Afrankite	Prezo por AELA-anoj Afrankite
J. Baghy: Dancu Marionetoj	3.75	2.25
J. Baghy: Viktimoj	5.50	3.30
J. Baghy: Preter la Vivo	2.20	1.30
Kalocsay: Lingvo, Stilo, Formo	1.65	1.—
» Streĉita Kordo	4.40	2.65
» Rimportretoj	2.20	1.30
» Eterna Bukedo	9.90	5.95
Kalocsay: Madách Tragedio de l' Homo	4.40	2.65
» Goethe, Romaj Elegioj,	2.20	1.30
Kalocsay—Waringhien: Parnasa Gvidlibro	4.—	2.40
Forge: Mr. Tot aĉetas mil okulojn	4.40	2.65
Szilágyi: Trans la Fabeloceano	3.30	2.—
Genthon: Pentroarto en malnova Hungarujo. Duontole bind. 12.—, 7.20; broŝurita 10.—, 6.—; duonlede bind.	17.—	10.20
Totsche: De Paĝo al Paĝo	2.75	1.65
Engholm: Homoj sur la Tero	4.—	2.40
Kalocsay—Pfeffer: Nova Krestomatio	6.95	4.15
Kalocsay—Waringhien: Plena gramatiko kaj sintakso de Esperanto	?	?
Eugen Wüster: Normlingvo por Elektrotekniko	3.10	1.85
Stojan: Evoluo de Esperanto	2.30	1.40
E. Privat: Interpopola paco	3.30	2.—
Hekler—Kalocsay: Arthistorio II	11.—	6.60
Van Loon—Saville: Rigardu la Teron	12.10	7.25
J. K. Jerome: Tri homoj en boato	5.70	2.60
Axel Munthe—J. Weleminsky: Romano de San Michele	11.—	6.60
Stefan Zweig—Lejzerowicz: Amok	1.55	0.95
Lejzerowicz: El la Verda Biblio kaj Babiladoj de Horaĉo Sercer	2.75	1.65
B. Mussolini: Vivo de Arnaldo	1.55	0.95
M. R. Rilke—A. Münz: Leteroj al Juna Poeto, (nur bindita)	1.65	1.—
T. Herzl—B. Selzer: La Juda Ŝtato	3.—	1.80
Kan Kikuĉi: Amo de Toojuuroo	1.30	0.80
AELA-serio 1933:		
Redaktis Kalocsay: Hungara Antologio	13.20	7.90
Grenkamp—Brzekowski: Pri l' Moderna Arto	7.70	4.60
Dante—Kalocsay: Infero	9.70	5.80
Asch: La Sorĉistino el Kastilio	3.85	2.30
Enciklopedio de Esperanto I—II	33.—	19.80
	67.45	40.40
La kvin supraj verkoj KUNE broŝ.	33.50	
binditaj	38.50	
AELA-serio 1934:		
Weinhengst: Turstrato 4	4.—	2.40
Hekler—Kalocsay: Arthistorio I	14.30	8.60
Jelušiĉ—Rotkviĉ: Cezaro	9.90	5.90
Engholm: Infanoj en Torento	2.20	1.30
Slonimski—Grenkamp: Mia Vojaĝo en Sovetio	3.—	1.80
Ĉeĥoslovaka Antologio	13.20	7.90
Redaktis Kalocsay: Dekdu Poetoj	2.75	1.65
Adamson: Auli	1.80	1.10
Aisberg: Fine mi komprenas la Radion	4.95	3.—
Sturmer: El la Notlibro de Praktika Esperantisto	2.75	1.65
Karinthy: Vojaĝo en Faremidon	1.20	0.70
Kikuĉi: Amo de Toojuuroo	1.20	0.70
Herzl—Selzer: La juda ŝtato	3.—	1.80
Mussolini: Vivo de Arnaldo	1.55	0.95
	65. 80	39.45
La dekkvar supraj verkoj KUNE broŝ.	33.—	
Dekdu el ili binditaj	43.—	

Prezoj kun simpla sendkosto kaj broŝurite. Por ĉiu bindo estas pagota aparte 0.90 svfr. por ĉiu rekomendo po 0.50 svfr.

Leginte tiujn informojn, kion vi faros nun?

Mi rapidos por sendi mian kotison kaj mendon antaŭ februaro al

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO

Riouwstraat 172, Den Haag.

Transkalkulo de la prezoj: 1 sv. fr. = 0.50 ned. guld.

AELA ★ AELA ★ AELA

KORESPONDU!

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —.45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondaĵo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. — *La redakcio.*

ŜLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon gluu sur la bildan flankon
s-ino = sinjorino	L = letero	
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	
dez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

ANGLUJO

Salisbury (Wilts.) — S-ro E. B. Green, inĝeniero, Godshill Wood Farm, Godshill. — Serĉas seriozajn gekorespondantojn en Estonio, Litovujo, Latvujo, Rusujo, Finnlando kaj la malproksima Oriento. L, p.ĉ.t., interŝ. gazetojn ,fotografaĵojn k.t.p. Nepre respondos.

BULGARUJO

Poljane (Omortago). — S-ro Stojan Stamboliev. — Dez. kor.

DANUJO

Laven. — F-ino Rigmor Pedersen, 24-jara oficistino, Alling. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe kun geoficistoj. Interŝ. amator-fotojn.

Tömmerup ĉe Kalundborg. — La loka Esperantista Klubo serĉas gekorespondantojn el Azio, Afriko kaj Sud-Ameriko. Adreso: S-ro H. N. Nederland.

Vig St. — S-ro A. Henriksen, ĝardenisto, Plantkulturejo de Vig. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., interŝ. florsemojn kaj bildojn pri vidindaĵoj.

ESTONIO

Tallinn. — F-ino Helmi Janvert, 24-jara, Heeringa 12.a.-6. — Dez. kor. kun inteligentaj gesamideanoj.

Valga. — F-ino Lydia Panavas, Vabaduse 19. — L, PK. Certe respondos almenaŭ unufoje al ĉiu.

FRANCUJO

Carrières s/Seine (Seine et Oise). — S-ro R. Gazanhes, 10 rue Curie. — Serĉas korespondantojn por siaj 30 parizaj gelernantoj. L, PK, PI bfl. K.ĉ.l., p.ĉ.t.

Valenciennes (Nord). — S-ro Antoine Léchelle, 30-jara, 128 rue de Condé. — PI bfl. Certe respondos.

HISPANUJO

Manresa (Barcelona). — S-ro Josep Tuset, 22-jara oficisto, St. Nou 18-3. — PI, interŝ. revuojn k.ĉ.l. Respondos almenaŭ unufoje.

JAPANUJO

Kande apud Akasi. — La anoj de la „Japana Koresponda Grupo" dez. interŝ. PI kaj PM k.ĉ.l. — Adreso: „J. K. G." en Kande apud Akasi.

Kioto. — Japana Esp-isto serĉas gekorespondantojn nur en Nederlando, por korespondado kaj interŝanĝado de libroj. Ĉiam respondas. Adreso: S-ro K. Kanja, 920 Bakuro-ĉo, Imakoji-Sagaru, Kitano, Kioto.

LATVUJO

Liepaja. — S-ro Otto Egliens, Augustes iela 5—6. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondas.

NEDERLANDO

Arnhem. — S-ro G. Postema, poŝtoficisto. Spiekmanlaan 2. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Breda. — La loka Esp-istaro dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t., certe respondos. — Adreso: S-ro G. Kimmel, 2e Marktstraat 32.

Den Haag. — S-ro A. Meeusen, Reimwardtstraat 82. — Interŝ. PM k.ĉ.l. Mi havas belajn nederlandajn PM. Peco por peco. Certa respondo.

Huizum (Frislando). — F-ino G. Steeneker, instruistino, Ferd. Bolstraat 13. — Serĉas korespondadon. Ankaŭ pri muziko.

Loosduinen (Den Haag). — F-ino L. M. A. Koot, Leijweg 12. — Dez. kor. k.ĉ.l.

Rotterdam. — S-ro Bastiaan van der Wal, 28-jara magazenisto, Jacobusstraat 38. II. — Nur kun rusoj, kiuj povas kaj volas sendi la 5 Esp-ajn poŝtmarkojn el Rusujo. Mi rekompencos per bildkarto aŭ aliaj PM. Certe resp.

Schiedam. — S-ro W. Vermeulen, ŝip-teknikisto, Vondellaan 23.b. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Sybrandaburen (Frislando). — S-ro G. C. Tinkelenberg, instruisto. — Dez. kor. prefere kun instruistoj, pri profesiaj temoj.

Voorburg (Z.H.) — S-ro Adr. Sannen, 31-jara ferkonstruisto, Hofwijckstraat 21. — L, PK, PI, k.ĉ.l., nur kun viroj.

Vriezenveen. — F-ino Jopy Sytstrâ, 18-jara studantino. — L, PK, PI, PM, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

NORVEGUJO

Oslo. — S-ro Ole Antonsen, metiisto, Havegaten 5. — Dez. kor. k.ĉ.l. Certe respondos.

POLUJO

Nowy Bytom (G. Sl.) — S-ro Jozef Kania, Pl. Wolnosci 1, Mleczarnia. — Dez. kor. k.ĉ.l.

Nowy Bytom (G. Sl.) — S-ro Paŭlo Konrad, Miarki 18. — L, PI, k.ĉ.l. Certe respondos.

Tarnów. — F-ino Irena Traumówna, Del. de UEA, ul. Towarowa 338. — Interŝ. PM kun malproksimaj eŭropaj kaj transmaraj landoj. 50—100 pecoj kontraŭ la sama kvanto, aŭ laŭ katalogoj. Ĉiam kaj tuj respondas.

PORTUGALUJO.

Porto. — S-ro Manoel de Freitas, Rua do Monte da Lapa 49-1. — Dez. interŝ. PI precipe pri regionoj kaj popolaj kostumoj, k.ĉ.l. Aparta interŝanĝado kun fraŭlinoj. Nepra respondo.

SOVJET-UNIO

Odessa. — S-ro D-ro N. Holm, kuracisto, Himelnickogo 5 kv. 4. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Interŝanĝo per Esp. libroj. Certe respondos.

SVEDUJO

Kvicksund. — 30 el miaj gekursanoj dez. kor. L PK PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe resp. Skribu al la instruisto: s-ro Holger Ekblad, Villa Skogbacka.

Lund. — 25 geanoj de komenca kurso dez. kor. Skribu al la kursgvidanto: S-ro Erik Fredrikson, teol. stud., Stora Södergatan 47.a.

Skövde. — Grupo de gekomencantoj dez. kor. kun ĉiulandaj gejunuloj per L kaj PI p.ĉ.t. Sendu multnombre al: s-ro Börje Andersson, Norrmalm 35.

Spånga. — S-ro Gösta Carlson, 28-jara frizisto, La Frizejo, Flysta. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. bfl. Certe respondos.

Strömsnäsbruk. — Anoj de komenca kurso dez. kor. per PI. Certe respondos. Adreso: S-ro Albin Soneson.

USONO

La Grande (Oregon). — S-ro Franklin Edwards, 24-jara librotenisto, P.O. Box 139. — L kun Hispanujo, Rumanujo, Jugoslavio, Ĉinujo Italujo, Finnlando. P.ĉ.t. (Ne kolektas PM). Deziras daŭran korespondadon. Certe kaj tuj respondos.

ATENTU! *La lurksan, plukolore presitan 48-paĝan libro-katalogon de LITERATURA MONDO vi povas senpage ricevi ĉe LA PRAKTIKO.*

Privat:

HISTORIO DE ESPERANTO

Volumo I.: Deveno kaj komenco, 1887—1900.

Kart. RM 1.45; bind. RM 2.25

Volumo II.: La movado, 1900—1927.

Bind. RM 5.40

„La du libroj helpu la novajn generaciojn iom pli funde koni kaj kompreni, kiel semiĝis kaj kreskis el la tero unu el la plej mirindaj greneroj de la homa penso."

Privat:

VIVO DE ZAMENHOF

kun portreto de D-ro L. L. Zamenhof.

Kart. RM 2.25; bind. RM 3.15

„La tuta verko ne estas simpla historio de Esperanto ĝis la morto de ĝia kreinto, sed detala priskribo de lia vivo, de liaj ideoj, idealoj kaj klopodoj. Profundan impreson faras la lasta ĉapitro, kiu rakontas pri la morto kaj enterigo de la Majstro."

Mendu ĉe via libristo aŭ senpere ĉe la eldonejo:
FERDINAND HIRT & SOHN, Esperanto-fako,
LEIPZIG C 1, Salomonstrasse 15 (Poŝtĉekkonto: Leipzig 52372)

Esperanto-Presejo PIER WESTERBAAN, Vaillantlaan 523—529, Den Haag (Nederlando).